
Yvonne A. Pereira



# MEMORAĴOJ DE SINMORTIGINTO

De la Spirito Camilo Cândido Botelho

feb

Yvonne A. Pereira
(Mediumino)

# Memoraĵoj de Sinmortiginto

El la portugala lingvo esperantigis:
Affonso Borges Gallego Soares

Unua eldono
1998

SPIRITA ELDONA SOCIETO F. V. LORENZ
Korespondadreso: Caixa Postal 3.133
BR – 20001-970 – Rio de Janeiro (RJ) – Brazilo

La Direktoroj kaj konsilantoj de Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz ne ricevas ajnan honorarion. La publikigo de ĉi tiu libro celas informi Esperantistojn pri la transtomba vivo.

Ĉiuj rajtoj transdonitaj de
Brazila Spiritisma Federacio al
Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz.

Tradukita el la 19-a eldono en la portugala lingvo de Affonso Borges Gallego Soares.

Kovrilo de Douglas Martins.

Kompostado de Gersi Alfredo Bays – FONTO. Chapecó (SC), Brazilo.

Presita de Centro Espírita Léon Denis, Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

ISBN 85-86984-01-9

Eldonis
SPIRITA ELDONA SOCIETO F. V. LORENZ
Sidejo: Rua dos Inválidos nº 34, grupo 903
BR – 20231-040 – Rio de Janeiro (RJ) – Brazilo.

# Tabelo de Enhavo

*Prezento* .......... 9
*Enkonduko* .......... 13
*Antaŭparolo al la dua eldono* .......... 19

## Unua Parto
## **La Damnitoj**

Ĉap. I – La Valo de la Sinmortigintoj .......... 21
Ĉap. II – La Damnitoj .......... 36
Ĉap. III – En la Hospitalo "Maria el Nazareto" .......... 58
Ĉap. IV – Hieronimo de Araujo Silvejra kaj familio .......... 87
Ĉap. V – La komunikiĝo kun la Supro .......... 138
Ĉap. VI – Niaj amikoj – la disĉiploj de Allan Kardec .......... 169

## Dua Parto
## **La Departementoj**

Ĉap. I – La Gardostara Turo .......... 189
Ĉap. II – La arkivoj de la animo .......... 219
Ĉap. III – La Frenezulejo .......... 244
Ĉap. IV – Denove Hieronimo kaj Familio .......... 271

Ĉap. V – Preparaj paŝoj por reenkarniĝo ........................................... 306
Ĉap. VI – "Al ĉiu laŭ liaj faroj" ........................................................ 333
Ĉap. VII – Unuaj provoj ..................................................................... 363
Ĉap. VIII – Novaj direktoj ................................................................. 385

# Tria Parto
# **La Universitata Urbo**

Ĉap. I – La Loĝejo de la Espero ....................................................... 405
Ĉap. II – "Venu al mi" ....................................................................... 426
Ĉap. III – "Homo, konu vin mem!" .................................................... 440
Ĉap. IV – La "malnova homo" ............................................................ 469
Ĉap. V – La kaŭzo de mia blindeco en la 19a jarcento ....................................................................... 487
Ĉap. VI – La ina elemento ................................................................. 507
Ĉap. VII – Lastaj trajtoj ..................................................................... 531

# Prezento

La spirita aŭtoro de ĉi tiu verko, Kamilo Kastelo Branco, naskiĝis en Lisbono (1825) kaj mortis en Sankta Mikelo de Sejde (1890). En la literaturaj rondoj de Portugalujo li brilis kiel fekunda romanisto kaj novelisto kaj fariĝis la plej alta reprezentanto de romantikismo en sia lando. Liaj diverstema verkaro, klasika stilo kaj vorta riĉeco faris lin unu el la majstroj de la portugala idiomo.

Lian vivon kaj lian verkon forte influis orfeco, malriĉeco, pasia karaktero kaj sentimentala malpleno. Trafita de nekuracebla blindeco, li metis finon al la vivo per pafarmilo. Liaj travivaĵoj kiel sinmortiginto ĉefe konsistigas la enhavon de ĉi tiu libro.

Antaŭ ol mediume skribi siajn transtombajn memoraĵojn, Kamilo jam estis diktinta plurajn komunikaĵojn, en la komenco de ĉi jarcento, al la portugala mediumo Fernando de Lacerda, kies fratan amikecon kaj helpon li dankoplene reliefigas en ĉi tiu verko. Tiuj komunikaĵoj, krom multaj aliaj de pluraj Spiritoj, plejparte eminentaj portugalaj literatoroj, troviĝas en kvarvoluma verko titolita “El la Lando de Lumo”, kiun la Brazila Spiritisma

Federacio de longe tenas en sia eldona programo. Unu el la plej sensaciaj sekvoj de tiuj mediumaj leteroj estis la rezigno de granda amiko de Kamilo, ankaŭ literatoro, Antono da Silva Pinto (1848-1911), pri sia intenco sinmortigi.

La mediumo, Yvonne do Amaral Pereira, naskiĝis la 24an de Decembro 1906, en la urbeto Rio das Flores, Brazilo, kaj forpasis la 9an de Marto 1984, en Rio-de-Ĵanejro. Ŝi estis unu el la plej respektindaj spiritistoj en Brazilo. Dek du verkojn ŝi mediume ricevis, el kies spiritaj aŭtoroj du estis mondfamaj literatoroj: Kamilo Kastelo Branco kaj Lev Nikolajeviĉ Tolstoj (1828-1910). Ŝia vivo de simpla virino kun mezgrada instruiteco estis tute dediĉita al la Spiritisma Doktrino, el kies konsolaj revelacioj ŝi ĉerpis forton kaj inspiron por praktiki la virtojn, kiujn Jesuo-Kristo ekzemplis en sia Evangelio.

Ŝiaj mediumaj kapabloj manifestiĝis jam en tre frua infaneco. Ankoraŭ kvinjara – kaj tiel estis ĝis la fino de ŝia vivo – ŝi ofte vidis la Spiritojn kaj kun ili interparolis. Ŝi ankaŭ havis la kapablon eliĝi en spirito el la korpo kaj en tia stato interrilati kun la loĝantoj de la nevidebla mondo, viziti ties regionojn, ĉiam sub la zorga protekto de pli progresintaj Spiritoj, ŝiaj amemaj Gvidantoj. Sed ŝia ĉefa mediuma agado, krom la literatura psikografio, konsistis en la perado de kuracaj receptoj kaj emanigo de fluidaĵoj por rebonigo de malsanuloj, sub la inspiro kaj kontrolo de spiritaj kuracistoj kaj ĉiam absolute senpage, laŭ la rekomendo de la Majstro Jesuo en la Evangelio (Mateo, 10:8): *donace vi ricevis, donace vi donu.*

Esperanton ŝi ankaŭ amis kaj uzis por same altaj celoj. Du korespondantojn ŝi havis, en Pollando kaj en tiama Ĉeĥoslovakio. Al ambaŭ ŝi bonfaris, refirmigante la edzan vivon de unu kaj solidiginte la fidon de la alia pere de sia sincera sento de frateco kaj solidareco kaj helpe de la inspiroj de siaj bonaj spiritaj konsilantoj.

Pri Léon Denis, al kiu la Supro komisiis la taskon doni definitivan redakton al ĉi mediuma laboro, la leganto povas

bone informiĝi, konsultante la verkon *La Kialo de l' Vivo*, eldonitan de Brazila Spiritisma Federacio en Esperanto, en kies “Prezento” la kompetenta brazila esperantisto, D-ro Benedicto Silva, skizas liajn biografiajn trajtojn. Ni nur resumu, dirante, ke li estis franco, brila kaj fekunda disvastiganto de la Spiritisma Doktrino, samtempulo de ties sistemiginto Allan Kardec. Altstila oratoro, lia verkaro tuŝas plej profundajn temojn sciencajn, filozofiajn, historiajn kaj moralajn, el vidpunkto spiritisma. Krom *La Kialo de l' Vivo*, ankaŭ estas esperantigita la bela *Post la Morto*, kiun la eldonaj rondoj de la brazilaj spiritistoj tre baldaŭ publikigos. Léon Denis naskiĝis en Foug, la unuan de Januaro 1846, kaj forpasis en Tours, la 12an de Aprilo 1927. Lian moralan staturon ni povas taksi per tio, ke spiritistoj lin alnomas “Apostolo de Spiritismo”.

Fine, en mia nomo kaj en la nomo de ĉiuj, kiuj kunlaboris por la aperigo de la esperanta versio de ĉi tiu verko, mi volas esprimi eternan dankon al la anĝela Spirito, kiu sur la Tero ricevis la honoran mision esti la Patrino de la Dia Mesio – Maria el Nazareto – kies senĉesa subteno kaj protekto formovis ĉiujn obstaklojn leviĝintajn kontraŭ la efektivigo de ĉi tiu laboro. Tute sendube ŝi ankaŭ zorgos, ke *Memoraĵoj de Sinmortiginto* plenumu sian konsolan mision, nun pere de la idiomo de Frateco, nia amata Esperanto.

Rio-de-Ĵanejro (RJ), la 30an de Septembro 1997.

La Tradukinto.

# Enkonduko

Ĉi tiujn paĝojn mi ŝuldas al la amo de eminenta loĝanto de la spirita mondo, al kiu mi sentas min ligita per dankemo, pri kiu mi antaŭsentas, ke ĝi plu daŭros trans la nuna vivo. Se ne estus la amoplena zorgo de tiu klera reprezentanto de la Doktrino de la Spiritoj – kiu, sur la brilaj paĝoj de sia surtera verkaro pri la spiritisma filozofio, promesis respondi la alvokon de ĉiu sincera koro, kiu lin petus pri helpo por progresi, post lia transiro en la nevideblan regionon kaj en la okazo se al li tion permesus la konsento de la Ĉielo – certe perdiĝus la notoj, kiujn, ekde la jaro 1926, tio estas, de la tagoj de mia junaĝo kaj la apero de mia mediuma kapablo, kune ekflorintaj en mia vivo, mi penege ricevadis de sinmortigintaj Spiritoj, kiuj memvole manifestiĝis en la seancoj de la malnova "Spiritisma Centro de Lavras", en samnoma urbo situanta en la sudekstrema regiono de la Ŝtato Minas Gerais, al kies Estraro mi dumtempe apartenis. Mi parolas pri Léon Denis, la granda apostolo de Spiritismo, tiel admirata de la adeptoj de tiu grandioza filozofio, kaj al kiu mi, pro plej pravaj motivoj, atribuas la intuiciojn, kiujn mi ricevis por *kompilado kaj redaktado* de ĉi tiu verko.

Dum ĉirkaŭ dudek jaroj mi ĝuis la feliĉon senti, ke tiel nobla loĝanto de la spirita mondo kompateme zorgas pri mi, min inspirante en unu tago, min konsilante en alia, viŝante miajn larmojn en decidaj momentoj, kiam dolorplenaj rezignoj trudiĝis kiel kulpelpagoj nepre necesaj al la renobliĝo de mia konscienco ankoraŭ droninta en la malhonoraj sekvoj de sinmortigo en antaŭa ekzistado. Kaj dum dudek jaroj mi kunvivis, se tiel diri, kun tiu respekteginda Frato, kies lecionoj plenigis mian animon per konsoloj kaj esperoj, kies konsilojn mi ĉiam penis sekvi, kaj kiu hodiaŭ, kiel neniam antaŭe, kiam la vivo jam krepuskiĝe subiras, ankoraŭ pli tenere parolas al mi en la modestega ĉambro, en kiu mi skribas ĉi tiujn liniojn!

El inter la multenombraj sinmortigintaj Spiritoj, kun kiuj mi komunikiĝis per miaj mediumaj kapabloj, unu elstariĝis pro la konstanteco kaj simpatio, per kiuj li min ĉiam honoris kaj, ĉefe, pro la glora nomo, kiun li postlasis en la portugala literaturo, ĉar temis pri fekunda kaj talenta romanverkisto, posedanta tiel vastan sciadon, ke ĝis nun mi mem demandas, kial li min distingis per tiel profunda inklino, se mi, obskura, portanta malgrandegan intelektan provizon, nur posedis, por proponi al lia eksterordinara intelekto kiel instrumenton, mian respekteman koron kaj la firman akcepton de la Doktrino, ĉar en tiu tempo mi eĉ ne havis solidan doktrinan klerecon!

Ni lin nomos sur ĉi tiuj paĝoj – Kamilo Kandido Boteljo, tamen kontraŭante lian propran deziron esti identigita per sia vera nomo. Tiu nobla Spirito, al kiu min ligas potenca spirita inklino, ofte videbliĝis, ĝoja ke li sentas sin amata kaj akceptata. Sed ĝis la jaro 1926 mi nur tre supraĵe aŭdis pri li. Mi ne konis eĉ lian literaturan verkaron, abundan kaj erudician.

Malgraŭ tio, li trovis min ĉe tablo de eksperimenta seanco, kiu okazis en la bieno de Kolonelo Kristiano Jozefo de Souza, malnova prezidanto de la “Spiritisma Centro de Lavras”, kie li donis al mi sian unuan mesaĝon. De tiam, jen dum ordinaraj, jen dum intimaj seancoj efektivigitaj en privataj domoj aŭ en la

silento de mia dormoĉambro, malfrue en la nokto, li liveris al mi notojn, periodajn novaĵojn, skribajn aŭ parolajn, literaturajn eseojn, ja veran raportadon pri okazoj de sinmortigo kaj ties bedaŭrindaj sekvoj en la Transmondo, kiuj tiam vere min konsternis. Sed multe pli ofte min forprenis, li kaj aliaj spiritaj amikoj kaj protektantoj, el la korpa karcero, por pliampleksigi diktaĵojn kaj spertojn. Tiam mia Spirito suprenflugis kune kun ili en la nevideblan mondon, kaj la mesaĝoj jam ne estis skribataj, sed *rakontataj, montrataj, elmetataj* al mia mediuma kapablo, por ke mi, vekiĝinte, pli facile komprenu tiun, kiu, pro netaksebla favoro de la Ĉielo, min helpos ilin priskribi, ĉar mi ne estis literaturisto por mem tion fari! Ĉi tiuj paĝoj do, laŭ plej strikta vero, ne estis psikografie ricevitaj, ĉar mi nete vidis kaj aŭdis la ĉi tie priskribitajn scenojn, observis ties personojn kaj lokojn kun absolutaj klareco kaj certeco, kvazaŭ mi ilin vizitus kaj ĉion ĉeestus, tute ne kvazaŭ mi nur ekscius per simplaj rakontoj. Se ili priskribis iun personon aŭ pejzaĝon, la koncerna bildo tuj nete montriĝis samtempe kiel ilin kreis la brila parolo de Kamilo aŭ la vibra ondo de lia penso. Ja per tiu maniero esence poezia, mirinda, kaj ne psikografie, mi ricevis la longan serion da literaturaj eseoj diktitaj de la loĝantoj de la Nevidebla Mondo kaj ĝis nun tenataj en la kaŝiteco de l' tirkestoj. La Spiritoj, kiuj min helpis, utiligis la psikografian procedon nur por la preskribado de receptoj kaj diktado de mallongaj mesaĝoj koncernantaj la medion, en kiu mi laboris. Kaj mi eĉ povas aserti, ke de tiu stranga kunvivado kun la Spiritoj venis la solaj horoj de feliĉo kaj ĝojo, kiujn mi ĝuis en ĉi tiu mondo, krom ankaŭ la rezistemo por la elprovoj, kiujn mi devis plenumi antaŭ la Granda Leĝo!

Sed tiuj mesaĝoj kaj notoj, skribitaj post mia vekiĝo, estis tre malprecizaj, prezentis nek la romanan formon nek la doktrinajn konkludojn, per kiuj la kompilinto poste ilin stampis, celante dolĉan rimedon por elmontri veraĵojn amarajn sed ja konendajn en tiuj tempoj, kiujn ni nun travivas. Oni al si

demandos, kial tion ne faris Kamilo mem... ĉar li certe ĝin kapablus!

Mi respondas, ke, ĝis la momento, kiam ĉi tiuj linioj estas skribataj, mi ĝin ne scias tiel same, kiel ĉia ajn persono! Cetere, mi neniam esploris ĉe la Spiritoj pri ĝia kialo. Aliflanke, dum ĉirkaŭ kvar jaroj estis al mi neeble, pro motivoj sendependaj de mia volo, starigi normalajn komunikojn kun la Spiritoj. Kaj, kiam tiuj baroj estis formovitaj for de mia vivo, la aŭtoro de la mesaĝoj respondis al miaj sinsekvaj alvokoj nur por informi pri sia baldaŭa reveno al la surplaneda ekzistado. Mi troviĝis do en nefavoraj kondiĉoj por redakti la laboron kaj doni formon edukan kaj doktrinan al la revelacioj montritaj al mia Spirito dum la magneta dormo, pri kiuj mi sciis, ke ili devos esti konigitaj al la kolektivo laŭ la deziro de la noblaj protektantaj estaĵoj, ĉar ne estante literaturisto, mi ne kapablus mem provi tiun taskon. Mi do forlasis la mesaĝojn al la forgeso en tirkesto de skribotablo, kaj preĝadis, petegante pri helpo kaj inspiro. Dum ok jaroj mi ĉiutage preĝis, sentante en la koro la ardon de viva flamo de intuicio, flustre avertanta, ke mi atendu la estontecon kaj ne detruu la malnovajn manuskriptojn. Tiel estis ĝis kiam, antaŭ ĉirkaŭ unu jaro, mi ricevis instrukciojn por repreni la aferon, ĉar al mi estos donita la necesa helpo!

Mi plue deklaras, ke mi havas la plej fortajn motivojn por aserti, ke la parolo de la Spiritoj estas sceno viva, kreiva, reala, perfekta! Ĝi estas ankaŭ vibrado de la penso povanta subteni, per efiko de la volo, ĉion, kion ĝi deziras! Dum ĉirkaŭ tridek jaroj mi iel penetris la sekretojn de la nevidebla mondo, kaj ne alian veron mi tie konstatis. Estas tamen rimarkinde, ke, vekiĝinte, mi povis konservi la koncernan rememoron nur tiam, *kiam la helpantaj Spiritoj ĝin permesis al mi!* En la plimulto de la okazoj, kiam oni al mi ĝuigis tiujn flugojn, restis nur la impreso pri la travivaĵoj, la intima certeco, ke mi dumtempe kunvivis kun la Spiritoj, sed ne la memoro.

La plej sensignifaj detaloj povas esti vidataj, kiam Supera aŭ nur progresinta Spirito "parolas", kiel, ekzemple – polvtavolo

sur meblo; flirtado de brizo ondiganta iun kurtenon; ia vualo, ia gracia banto, eĉ ties silkeca brilo, sur virina vestaĵo; la kraketado de flamoj en kameno kaj eĉ ia parfumo. Ĉion ĉi mi povis konstati ĉe la magia parolo de Kamilo, de Viktoro Hugo, de Charles kaj eĉ de la apostolo de Spiritismo en Brazilo – Bezerra de Menezes, kiun miaj gepatroj al mi kutimigis respektegi ekde la lulilo. Iun fojon, kiam Kamilo priskribis rigorvintran vesperon en Portugalujo, montrante la internon de ĉambro, kiun varmigis bone hejtita kameno, mi sentis min invadita de tiela malvarmosento, ke mi frostotremis kaj proksimiĝis al la fajro por min varmigi, dum Kamilo, ĝoja pri sia efekto, ekridis... Cetere, tiu fenomeno estas nenio nova. Ne alimaniere Johano Evangeliisto ricevis la diktaĵojn por sia Apokalipso kaj la Judaj profetoj siajn revelaciojn por instruado al la popolo.

En la Apokalipso, paragrafoj 10, 11 kaj sekvantaj de la unua ĉapitro, la eminenta servanto de la Sinjoro evidentigas la aluditan fenomenon per jenaj mallongaj vortoj: "*Mi min trovis en la Spirito en la tago de la sinjoro, kaj mi aŭdis malantaŭ mi grandan voĉon kvazaŭ de trumpeto, dirantan: – Kion vi vidas, tion skribu en libron kaj sendu al la sep eklezioj...*"– ktp, ktp: kaj la tuta grava libro estis tiel diktita al la apostolo, nome per scenoj realaj, kortuŝaj, vivaj, per vizioj detalplenaj kaj precizaj! Spiritismo vaste pritraktas ĉiujn tiujn interesajn okazojn, ke ne kaŭzu miron tio, kion ni ĉi tie priparolas; kaj en la unua ĉapitro de la majstra verko de Allan Kardec – *La Genezo* – troviĝas ĉi tiu loko, certe tre konata de la studantoj pri la Spiritisma Doktrino: "La instruoj (de la Spiritoj) povas esti transigataj per diversaj rimedoj; per la simpla inspiro, per aŭdigo de la parolo, per la videbliĝo de la instruantaj Spiritoj, per vizioj kaj aperoj, ĉu en sonĝo, ĉu en maldorma stato, kaj de ĉio estas multaj ekzemploj en la Evangelio, en la Biblio kaj en la sanktaj skriboj de ĉiuj popoloj".

Mi tute ne pretendas, ke mi staras sur la sama nivelo de tiu supre dirita misiulo, nome Johano Evangeliisto. Laŭ la

malfacilaĵoj, kontraŭ kiuj mi batalis por skribi ĉi tiun libron, montriĝis tre evidentaj al mia kompreno la ŝarĝon da malperfektaĵoj, malaltigantaj mian Spiriton. Sed la amata disĉiplo, kiu, kvankam elektita misiulo, estis tamen ankaŭ modesta fiŝkaptisto, sendube havis sian spiritan protektanton por ke li tiel povu skribi tiujn belajn paĝojn aŭreolitajn de scienco kaj aliaj instruoj, de nekontestebla valoro, kiuj trapasus la jarcentojn glorante la Veron! Tre povas esti, ke tiu lia helpanto estis la Majstro mem...

Mi ne povas taksi la meritojn de ĉi tiu verko. Dum longa tempo mi al mi mem malpermesis ĝin konigi al iu ajn, ĉar mi rigardis min nekapabla ĝin analizi. Mi eĉ ne opinias min kompetenta por ĝin repuŝi, same kiel mi ne kuraĝas ĝin akcepti. Vi mem, leganto, tion faru. Sed pri unu afero mi estas nepre certa, nome ke ĉi tiuj paĝoj, de la unua ĝis la lasta, estis skribitaj kun la plej profunda respekto al la Doktrino de la Spiritoj kaj ĉe la sincera alvoko al la sanktega nomo de la Plejaltulo.

Rio-de-Ĵanejro, la 18an de Majo, 1964

*Yvonne A. Pereira*

# Antaŭparolo al la dua eldono

Nepre necesis skrupula reviziado de ĉi tiu verko, kiu antaŭ kelke da jaroj estis al mi konfidita por ekzameno kaj kompilado, tiel pro la taskoj al mi submetitaj en la spirita mondo, kiel ankaŭ pro la aŭtoritato, kiun mi akiris super la mediuma instrumento je mia dispono.

Sed iom neĝustatempe mi tion faris, ĉar ne estis eble ĝin plenumi en la oportuna tempo, pro motivoj ligitaj pli al la malbonoj de la surtera socio, kontraŭ kiuj baraktis tiu mediuma instrumento, ol al mia volo de laboristo atenta al la plenumado de la devo. Kaj tiu revizio ja trudiĝis des pli tial, ke, transigante la verkon, mi devis ampleksigi en tia grado la ankoraŭ krudajn vibrojn de la mediuma cerbo, en ĉi tiu estigante psikajn eblecojn por kaptado de la vidaĵoj nepre necesaj al la laboro, ke tiuj vibroj, aktivigitaj ĝis maksimuma grado elportebla por tiu cerbo, fariĝis tro ekscititaj kaj efikis kvazaŭ senbride torentaj kataraktoj, ne ĉiam facile obeantaj al mia premo por eviti tromultvortecon, akumuladon de vortfiguroj, kiuj nur nun estas forigitaj. Nenio tamen aliiĝis en la doktrina trajto de la verko, tiel same, kiel en ĝia aparta revelacia karaktero. La verkon mi, je la dua fojo,

transdonas al la leganto ja tia, kia mi ĝin ricevis de la Superaj Spiritoj, kiuj al mi komisiis tiun dornan taskon ĝin prezenti al la homoj. Kaj kvankam mi, celante faciligi al la publiko la komprenon pri la spirita vivo, ne ĉiam konservis la literaturan formon de la originaloj, kiujn mi havis antaŭ miaj okuloj, tamen mi ne ŝanĝis ĝiajn altvalorajn informojn nek ĝiajn konkludojn, kiujn mi respektis kiel sanktan aliulan laboron.

Meditu pri ĉi tiu paĝoj, leganto, eĉ se al via orgojlo estos malfacile ilin kredi! Kaj se iafoje, ĉe la legado de pli drama epizodo, larmoj prirosos al vi la palpebrojn, ne kontraŭstaru la bonfaran impulson altigi vian koron per kompatema preĝo por tiuj tordiĝantaj en la tragikaj konvulsioj, rezultintaj el la senpripensa malobeo al la leĝoj de Dio!

*Léon Denis (Spirito)*

Bela-Horizonto, la 4an de Aprilo 1957

# UNUA PARTO

# **LA DAMNITOJ**

## Ĉapitro I
## **La Valo de la Sinmortigintoj**

Precize en la unua monato de la favorjaro 1891 min surprizis mia malliberigo en regiono de la Nevidebla Mondo, kies dezertecan panoramon formis profundaj, ombroplenaj valoj. Tio estis serpentaj interkrutejoj kaj sinistraj kavernoj, en kiuj ululis, kvazaŭ hordoj da rabiaj demonoj, Spiritoj de iamaj homoj, frenezaj pro la vere ne imageblaj intenseco kaj strangeco de la suferoj, kiuj ilin turmentadis.

En tiu morna regiono, al la afliktitaj okuloj de l' kondamnito ne montriĝis eĉ la dolĉa bildo de ia arbareto, kiu vidus liajn horojn de malespero; nek konsolaj pejzaĝoj, kiuj povus distri lin el la teda rigardado al tiuj krutaĵoj, kien penetris nenia formo de vivo krom tiu manifestiĝanta per la ekstrema hororo!

La grundo, kovrita per nigraj, fetoraj substancoj, fulgsimilaj, estis malpurega, pasteca, glitiga, naŭza! Pezega, sufoka kaj glacia estis la aero, kiun nigrigis minacantaj nebulegoj, kvazaŭ ĉirkaŭe muĝadus eternaj fulmotondroj, kaj ĝin enspirante, la tie malliberigitaj Spiritoj sufokiĝis, kvazaŭ pulvorigitaj substancoj, pli nocaj ol cindro kaj kalko, invadus iliajn spirajn organojn, ilin torturante per turmentego neimagebla por la homa cerbo,

kutiminta al la glora heleco de la Suno – ĉiela donaco ĉiutage benanta la Teron – kaj al la vivigaj fluoj de la salubraj ventoj, kiuj donas viglon al la fizika korpo de ties loĝantoj.

Tiam ne estis en tiu regiono – kaj ja neniam estos –, paco, nek konsolo, nek espero: ĉio, en tiu loko stampita per la malfeliĉo, estis mizero, teruro, malespero kaj hororo. Ĝi kvazaŭ estus la hida kaverno de l' Nekompreneblo, nepriskribebla eĉ por Spirito suferinta la punon tie ekloĝi.

La valo de la lepruloj, abomena loko de la antikva Jerusalemo, tiel riĉa je emocivekaj tradicioj, kiu en nia mondo bildigas la plej malaltan gradon de la homaj mizero kaj suferado, estus konsola ripozejo en komparo kun la regiono, kiun mi provas priskribi. Tie almenaŭ ekzistis solidareco inter la elpelitoj! Tiuj malsamseksaj eĉ sin reciproke amis! Ili unuiĝis per bonaj amikosentoj, fratiĝante en sia doloro por ĝin mildigi; formis sian societon, amuziĝis, faris servojn, unuj al aliaj, dormis kaj sonĝis, ke ili estas feliĉaj!

Sed en la malliberejo, pri kiu mi volas raporti, nenio el ĉio ĉi estas ebla, ĉar la larmoj tie verŝataj estas tro ardaj por permesi aliajn interesojn, krom tiuj naskitaj de ilia propra intenseco!

En la valo de la lepruloj ekzistis la kompensa grandiozo de la Suno, por revigligi la korojn, la freŝeco de la antaŭmatena aero kun siaj rebonigaj rosoj! Tie la malliberulo povis kontempli pecon el la blua ĉielo... Sekvi, kun kortuŝita rigardo roton da transflugantaj hirundoj aŭ kolomboj!... Li revus, kiu scias? Kvietiĝinte pri la amaraĵoj de sia vivo, ĉe la poezia prilumeco de l' plenluno, li raviĝis de la milda trembrilo de la steloj, kiuj el la Neatingeblo kvazaŭ signus al lia malfeliĉo, flustrante konsolojn en la izoleco al li trudita de la tiamaj feraj leĝoj!... Kaj poste, la Printempo revenis, renovigante la kreskaĵojn, kiuj per siaj dolĉaj parfumoj balzamis la aeron, kiun la ventetoj ĉiutage repurigis per aliaj refortigaj balzamoj el sia tenera sino... Kaj ĉio tio estis kvazaŭ ĉielaj donacoj, kiuj per kelktempa mildigo de lia malfeliĉo celis repacigi lin kun Dio!

Sed tio tute ne ekzistis en la kaverno, kie mi suferis la turmentegon, min surprizintan en la transtombo, ĉar tie regas la doloro, kiun nenio konsolus, la malfeliĉo, kiun nenia favoro mildigus, la tragedio, kiun prirosus nenia trankviliga penso! Ne estas ĉielo, nek lumo, nek suno, nek parfumo, nek paŭzoj!

Estas nur la konvulsia, nekonsolebla plorado de l' kondamnitoj, kiuj neniam kvietiĝas! La terura "grincado de dentoj" laŭ la saĝa kaj prudenta averto de la Nazareta Majstro! La spitema blasfemo ĉe ĉiu nova frapo de la menso turmentata de doloraj rememoroj! La neŝanĝebla frenezeco de konsciencoj kontuzitaj per la hontiga skurĝado de l' rimorso! Estas ja la venenita kolero de tiu jam ne povanta plori pro elĉerpiĝo sub troo da larmoj! Estas la desapontiĝo, la teruriga surprizo de tiu, kiu sentas sin viva, malgraŭ tio, ke li sin ĵetis en la morton! La ribelo, la sakro, la insulto, la ululado de koroj, kiujn la monstra batado de la kulpelpago aliigis en bestiojn! Estas la flagrado de konscienco, la animo vundita de siaj propraj, senprudentaj agoj, la menso en tumulto, la spiritaj fakultoj envolvitaj en la mallumo fontanta el si mem! Estas ja la "grincado de dentoj en la ekstera mallumo" propra al malliberejo starigita de l' krimo kaj destinita al turmentego kaj korektado! Ja la infero, laŭ plej hida kaj drama bildo, ĉar tie montriĝas, krom ĉio ĉi, abomenegaj sceno de bestiaĵoj, la malnoblega manifestiĝo de la plej malĉastaj instinktoj, kiujn mi hontus priskribi al vi, homoj, miaj fratoj!

Kiuj tie provizore restas, kiel mi, tiuj estas grandaj krimuloj; la feĉo de la spirita mondo – legioj da sinmortigintoj, kiuj de tempo al tempo tien enfluas, kondukitaj de la kirlego el malfeliĉoj, en kiuj ili implikiĝis, por tie seniĝi je siaj vitalaj fortoj, kiuj, kiel damna sekvo de la sinmortigo, ĝenerale restas en sia tuteco ĉirkaŭ iliaj fizikaj-spiritaj envolvaĵoj. Tiujn legiojn, prefere venintajn el Portugalujo, Hispanujo, Brazilo kaj portugalaj kolonioj en Afriko, konsistigas malfeliĉuloj bezonantaj la konsolan helpon de la preĝo, ja tiuj homoj, senprudentaj kaj senpripensaj, kiuj satiĝinte pri la vivo, kies celon ili ne volis

kompreni, riskis enabismiĝi en la Nekonataĵon, strebante al Forgeso, tra la krutaĵoj de la Morto!

La Transtombo tute ne estas tia abstraktaĵo, kia oni ĝin supozas sur la Tero, aŭ iaj paradizaj regionoj facile atingeblaj per iaj nemultaj sensignifaj formuloj. Ĝi simple estas, ĝustadire, la Reala Vivo, kaj kion oni trovas, penetrinte ĝiajn regionojn, tio ja estas Vivo! Vivo intensa, manifestiĝanta per sennombraj aspektoj, saĝe aranĝita laŭ kontinentoj kaj grupoj, same kiel sur la Tero ĝi estas organizita laŭ landoj kaj gentoj. Vivo, kiu tie disponas ekzemplajn instituciojn, edukajn kaj sociajn, prezentantajn modelon por la progreso de la homaro. Ja en la Nevidebla, prefere ol en la surplanedaj mondoj, la homaj estaĵoj ĉerpas inspiron por fari sian malrapidan surteran progresadon.

Mi ne scias, kiel disvolviĝas la laboroj de korektado al sinmortigintoj en la ceteraj samcelaj centroj aŭ spiritaj kolonioj, funkciantaj sub la ĉieloj de Portugalujo, Hispanujo kaj samlingvaj nacioj. Mi nur scias, ke mi apartenis al tiu sinistra legio, kiu pro logika kaj natura sekvo, estis malliberigita en tiu terurega regiono, kies memoro ankoraŭ hodiaŭ kaŭzas abomenon al mia sentemeco. Tre povas esti, ke iuj personoj akre kontestas la verecon de ĉi tiuj priskriboj, asertante, ke la malsaneca fantazio de senpripensulo, kiun tro lacigis la asimilado de Danto, el si mem produktis la ĉi-prezentitan raporton... sed ili certe forgesas, ke, kontraŭe, la florenca poeto ja sciis, kion la nuna jarcento ne kapablas agnoski!...

Ĉi tiujn mi ne admonos kredi. Tia temo trudiĝas ne simple al la kredo, sed ja al la rezonado, al la ekzameno, al la esplorado. Se ili scias rezoni kaj povas esplori – ili tion faru kaj nepre venos al logikaj konkludoj, kiuj ilin metos sur la spurojn de veraĵoj tre interesaj por la homa speco! Sed al kio mi ilin admonas, kion mi arde deziras kaj por kio mi plej fervore klopodas, tio estas, ke ili ne provu koni tiun realaĵon tra la mallumaj vojoj, en kiujn mi ĵetis min, kiam mi plenumis la memmortigon pro malŝato de la averto, ke la morto estas nenio alia ol la vera formo de ekzistado!...

Alivorte, kion vi, leganto, povus supozi ekzistanta en la nevideblaj sferoj, ĉirkaŭantaj la mondojn aŭ planedojn, se ne la matricon de ĉio, kio en ĉi tiuj rebildiĝas?!... Nenie oni trovus la abstraktaĵon, aŭ la nenion, ĉar tiaj vortoj havas nenian sencon en la Universo kreita kaj regata de Ĉiopova Intelekto. Nei kion oni ne konas, ĉar oni ne kapablas tion kompreni, estas malsaĝo nepravigebla en la nuntempo. La nuna jarcento invitas la homon al esplorado kaj libera ekzameno, ĉar la Scienco, en siaj multoblaj manifestiĝoj, senŝanĝe pruvadas, ke la neeblo estas erara nocio en ĝia pli kaj pli vasta kampo de agado. Kaj la pruvoj pri la realeco de la superteraj kontinentoj ja troviĝas en la arkanoj de la transcendaj psikaj sciencoj, al kiuj la homo ĝis nun donis tre relativan gravecon.

Cetere, kion la homo konas en sia planedo mem, kie li de jarmiloj renaskiĝas, por kategorie malagnoski tion, kion la estonteco popularigos sub la aŭspicioj de la Psikismo?... Sian vilaĝon, sian knabon, aŭ, se pli vastaj estas iliaj ambicioj, kelke da najbarlandoj, kies moroj egalas liajn proprajn?...

Ĉie, ĉirkaŭ li, ekzistas realaj mondoj, enhavantaj abundan, intensan vivon: kaj se li tion ignoras, ĝi estas tial, ĉar li plezuras en la blindeco, perdante tempon ĉe frivolaĵoj kaj pasioj tiel plaĉaj al sia karaktero. Li neniam esploris la oceanajn profundaĵojn – eĉ nuntempe li ankoraŭ ne povos ĝin fari. Malgraŭ tio, sub la verdaj, ondiĝantaj akvoj, ekzistas ne nur perfekte organizita mondo, sed ja ia universo, kiu konsternus pro sia grandiozeco kaj ideala perfekteco! En la aero mem, kiun li spiras, en la grundo, sur kiu li paŝas, la homo trovus aliajn organizitajn vivocentrojn, obeantajn la intelektan, saĝan impulson de grandanimaj leĝoj, kies fundamento sidas em la Dia Penso, kiu tiujn centrojn instigas al la progreso por la konkero de l' plenperfekteco! Sufiĉas, ke li sin provizu per precizaj aparatoj, por konstati la ekzistadon de tiuj socioj, kiuj kvankam estante, unuj nevideblaj kaj aliaj apenaŭ suspektataj, tamen tute ne ĉesas esti konkretaj, harmoniaj, veraj!

Tiucele, li ankaŭ mem kapabliĝu, disvolvante tiujn naturdotojn, kiujn li heredis de sia dia origino... Li ekmovu penson, volon, agon, koron tra la altaj vojoj de la supera Spiriteco... kaj li ja atingos la astralajn sferojn ĉirkaŭantajn la Teron!

..........................................................................................................................

Mi estis do malliberulo en tiu abomena kaverno de l' hororo!

Sed mi tie ne loĝis sola. Mi estis en kompanio kun ia grupo, multnombra legio da kulpuloj kiel mi.

Tiam mi ankoraŭ sentis min blinda. Almenaŭ mi sugestis min tia, kaj tia mi restis, kvankam mia blindeco vere rezultis de la morala malsupereco de mia Spirito, apartiĝinta for de la Lumo. Sed preter mi, blinda, ne pasis nerimarkite tio, kio prezentiĝis malnobla, malbela, sinistra, malmorala, obscena, ĉar miaj okuloj konservis vidpovon sufiĉan por tiun tutan feĉon rigardi – pro kio mia malfeliĉo pliintensiĝis.

Dotita per forta sentemeco, mi nun, por mia pli granda sufero, havis ĝin superekscitita, kio ankaŭ spertigis al mi la suferojn de la aliaj turmentatoj, miaj samsortanoj. Tiun fenomenon estigis la mensaj fluoj, kiuj fontante el la legio mem, verŝiĝadis sur ĝin tutan, tiel okazigante impresan fenomenon de klasa altiriĝemo, kio estas tio sama, kiel aserti, ke ĉiu el ni ankaŭ ricevis la sugestiojn pri la suferoj de la aliaj, krom esti submetita al la embuskoj de siaj propraj suferoj.

Kelkfoje sovaĝaj bataloj okazis en la vojetoj, laŭlonge de kiuj viciĝis la kavernoj servantaj al ni kiel loĝejoj. En senŝanĝa kolerhumoro, ni, pro sensignifaj motivoj, nin ĵetadis unuj kontraŭ aliaj por violentaj luktoj, en kiuj, simile kiel fariĝas ĉe la malaltklasaj tavoloj de la surteraj socioj, ĉiam venkis tiu plej lerta kaj kruela. Tie mi ofte estis insultata, mokata je miaj plej karaj kaj delikataj sentoj per pikŝercoj kaj sarkasmoj, kiuj min

ĝismedole indignigis; priĵetata per ŝtonoj kaj bategata tiel longe ĝis mi, ekscitita de identa fobio, min donis al sovaĝaj repagoj, egaliĝante al la agresintoj kaj kun ili baraktante en la koto de sama spirita speco!

Malsato, soifo, glaciiga malvarmo, laceco, maldormado; turmentaj fizikaj bezonoj, facile imageblaj por la leganto; la naturo akrigita ĉe ĉiuj siaj deziroj kaj apetencoj, kvazaŭ ni ankoraŭ portus la karnan envolvaĵon; la komunaĉa vivado, tre hontiga, de Spiritoj, kiuj estis viroj, kun aliaj, kiuj animis inajn korpojn; konstantaj tempestoj, eĉ inundoj, koto, fetoro, ĉiama mallumo, la senespero pri liberiĝo de tiom da amasigitaj turmentoj, la ekstrema malkomforto, fizika kaj morala – jen la, por tiel diri, "materia" panoramo, kiu kadris niajn ankoraŭ pli akrajn moralajn suferojn![1]

---

[1] Postmorte, antaŭ ol la Spirito orientiĝos kaj gravitos al la "spirita hejmo", kiu laŭmerite al li konvenas, ĉiam estas necese, ke li dumtempe restu en ia "vestiblo" en regiono, kies denseco kaj korpremantaj, lokaj aspektoj respondas al la vibraj, mensaj statoj de la ĵuselkarniĝinto. Tiel li restos ĝis li estos nature "malanimaligita", tio estas, ĝis li seniĝos je la vitalaj fortoj, de kiuj estas saturitaj ĉiuj vivantaj materiaj korpoj. El tio oni ja konkludos, ke la restado en tiu sojla regiono de l' Transtombo estas provizora, kvankam ĝenerale aflikta. Kiaj estis la karaktero, la plenumitaj faroj, la vivmaniero, la speco de morto de la elkarniĝinto – tiaj estos la tempo de restado kaj la suferado en tiu loko. Estas unuj, kiuj tie restas nur kelke da horoj, dum aliaj tie loĝas monatojn, sinsekvajn jarojn, kaj reenkarniĝas ne atinginte la Superan Spiritan Mondon. Kiam temas pri sinmortigintoj, la afero alprenas specialajn dimensiojn, dolorajn kaj kompleksajn. Ili ordinare tie loĝos dum la tempo, kiu al ili ankoraŭ mankis por veni al la fino de tiu ekzistado kiun ili frue tranĉis. Estas facile antaŭvidi la situacion de tiuj malfeliĉuloj, portantaj grandajn ŝarĝojn da vitalaj, animaligitaj fortoj, abundon da krimaj pasioj kaj kompletan malordon mensan, nervan kaj vibran. Por ili unu sola balzamo ekzistas: – la preĝo de la karitataj animoj!

Se pro ĝia troa longeco, tiu periodo translimos la normalajn aplikeblajn procedojn, tiam la tuja reenkarniĝo montriĝas kiel kuracrimedo elektinda, kvankam dolora kaj akra, kio estos preferinda al multo da jaroj en tiel mizera situacio. Tiel kompletiĝos la tempo, kiu mankis por la finiĝo de la tranĉita ekzistado.

Eĉ revi pri la Belo, sin doni al korfaciliga meditado aŭ al bonfaraj rememoroj ne estis permesite al tiu, kiu okaze kapablus tion fari. En tiu medio superplena de malbonoj, la penso restis enfermita en la ĝin ĉirkaŭantaj fajroj, nur povante elsendi vibrojn, kiuj agordus al la insido propra al tiu loko... Kaj, pro la envolviteco en tiel frenezigaj flamoj, estis neniu, kiu povus havigi al si ian momenton da kvieteco kaj konsiderado por ekpensi pri Dio kaj petkrii Lian patran favorkorecon! Oni ne povis preĝi, ĉar la preĝo estas bono, estas balzamo, estas suferpaŭzo, estas espero! Kaj al la mizeruloj, kiuj tien sin ĵetis en la torentoj de la sinmortigo, estus neeble ekhavi tiel altajn favorojn!

Ni ne sciis, ĉu lumas la tago aŭ refalas la nokto, ĉar ĉiamaj ombroj ĉirkaŭis la horojn de ni travivatajn. Ni estis perdintaj la ideon pri tempo. Regis nur, por vipadi al ni la demandojn, ia premeganta sento pri malproksimeco kaj longatempeco rilate al ĉia pasintaĵo, kaj al ni ŝajnis, ke de antaŭ jarcentoj ni estas aljungitaj al tiel akra kalvario! Ni ne esperis el tie eliri, kvankam tiu deziro estis unu el la mordantaj obsedoj, kiuj nin frenezigis... ĉar la Senkuraĝeco naskinta la malesperon, kiu armis nin por la sinmortiga bato, asertis al ni, ke tia stato daŭros eterne!

La kalkulado de la tempo, por Spirito droninta en tiu abismo, ĉesis en la ĝusta momento, kiam li por ĉiam pereigis sian karnan armaĵon! De tiam estis nur – teruro, konfuzo, trompaj induktoj, insidaj supozoj! Ni ankaŭ ne sciis, en kiu loko ni troviĝas, la signifon de tiu konsterna situacio, el kiu ni afliktite provis eskapi, ne komprenante, ke ĝi estas produkto de nia flameganta menso mem, de niaj propraj vibroj interfrapiĝintaj pro milo da nepriskribeblaj malbonoj! Kaj ni penadis fuĝi el tiu loko, celante reveni al niaj hejmoj, kion ni faris blinde, per furiozaj kuregoj, kvazaŭ rabiaj frenezuloj! Sed kiel malbenitaj Ahasveroj, ni nenie trovis konsolon, pacon, ripozon... samtempe kiel nekontraŭstareblaj fluoj, kvazaŭ potencaj magnetoj, nin altiris returne al nia malluma loĝejo, trenante nin meze en nigra kirlego el sufokaj svenigaj nuboj!

Aliajn fojojn, palpe erarante en la ombroj, ni iradis tra interkrutejoj, stratetoj kaj vojetoj, ne sukcesante trovi ian indicon pri elirejo... Kavernoj, ĉiam kavernoj – ĉiuj numeritaj –; aŭ vastaj marĉoj similaj al kotaj lagoj, ĉirkaŭitaj de apikaj krutaĵoj, kiuj al ni ŝajnis faritaj el ŝtono kaj fero, kvazaŭ ni estus entombigitaj vivaj en la profundaj tenebroj de ia vulkano! Tio ja estis ia labirinto, kie ni perdiĝis, neniel povante atingi la finon! Iafoje okazis, ke ni ne scias reveni al la deirpunkto, nome al la kavernoj servantaj al ni kiel loĝejoj, kio devigis nin resti senŝirme tiel longe ĝis ni trovos ian malplenan rifuĝejon, por ke ni denove nin ŝirmu. Nia plej ordinara impreso estis, ke ni troviĝas enfermitaj sub la grundo, en karcero elfosita en la sino de la Tero, – kiu scias, en la internaĵoj de ia montaro, al kiu ankaŭ apartenus ia estingiĝinta vulkano, kiel ŝajne pruvis tiuj nemezureblaj kotejoj kun elhakitaj muroj, memorigantaj pri pezaj mineraloj?!...

Terurite, kvazaŭ bando da rabiaj ŝakaloj, ni tiam komencis ĥore, furioze blekadi, ke oni nin forprenu de tie kaj redonu al ni la liberecon! Postsekvis la plej krudaj terurmanifestiĝoj, kaj ĉio, kion la leganto povas imagi, kiel ian konfuzan bildon de tragikaj scenoj elpensitaj de l' Hororo, restos tre malproksime de la realo, kiun ni tiam travivis kaj kiun kreis niaj pensoj mem, apartiĝintaj for de la Lumo kaj de la Amo de Dio!

Kvazaŭ fantaziaj speguloj obsede persekutus niajn fakultojn, jen tie rebildiĝadis la terura vidaĵo: la korpo malkomponiĝanta pro la atako de la malsategaj vibrioj, la abomeninda aktiveco de l' putrado iranta la naturan vojon de la organa ruiniĝo, formanĝanta nian karnon, niajn viscerojn, nian sangon difektitan de l' fetoro, unuvorte nian korpon, kiu por ĉiam malaperis en la naŭza bankedo de miliono da voremaj vermoj, nian korpon, kiu estis malrapide detruata antaŭ niaj konsternitaj okuloj!... kiu mortis, tio ja estis la vero, dum ni, la mastroj, la Memo sentema, pensokapabla, inteligenta, kiu ĝin uzis kiel nuran provizoran vestaĵon, restis plu vivanta, sentema, pensokapabla, inteligenta, desapontiĝinta kaj timplena, spitante la eblecon

ankaŭ morti! Kaj – ho terura magiaĵo, superanta nian tutan povon pripensi kaj kompreni! ho neforigebla puno, suferiganta la dizertinton, kiu aŭdacis insulti la Naturon, antaŭtempe plenumante tion, kion nur al la Naturo koncernis decidi kaj efektivigi: – Ni, vivantaj en spirito, sentis, antaŭ la putra korpo, ke ties ruiniĝo nin atakas!... Nian astralan korpon doloris la monstra pikado de la vermoj! Ĝisfreneze kolerigis nin tiu tortura reefiko, pro kiu nia perispirito, ankoraŭ animaligita, portanta abundan provizon da vitalaj fortoj, refletis tion, kio okazis al ĝia iama ŝlima envolvaĵo – kvazaŭ la eĥo de bruo resendiĝanta tra inter la krutaĵoj de monto, laŭlonge de la tuta valo...

Tiam nia malkuraĝeco, tiu sama, kiu nin brutigis kaj kondukis al sinmortigo, devigadis nin iri returne.

Kaj ni reiris.

Sed la sinmortigo estas kvazaŭ ĉirkaŭvolvanta araneaĵo, en kiu la viktimo – la sinmortiginto – baraktas nur por tio, ke li ĉiam pli kaj pli embarasiĝu, implikiĝu, enretiĝu. Jen superregis la konfuziĝo. Nun la persistado de la malbona memsugesto rememorigis al ni la superstiĉajn legendojn, aŭskultitajn dum la infanaĝo kaj longe tenatajn en la subaj tavoloj de la konscio; ili korpiĝis en ekstravagancaj vizioj, al ĉi tiuj donante kompletan realecon. Ni kredis nin starantaj antaŭ nenio alia, ol la Inferaj tribunaloj!... Jes! Ni ja vivis en la plena interno de la mallumaj regionoj!... Kaj Spiritoj el la plej malaltaj klasoj de la Nevidebla Mondo – obsedantoj, kiuj svarmas en ĉiuj malsuperaj sferoj, tiel de la Tero kiel ankaŭ de la Transtombo; tiuj samaj, kiuj nutris niajn mensojn per la sugestoj al memmortigo, por amuziĝi per niaj afliktoj, profitis el tiu nenormala situacio, en kiun ni enfalis, por kredigi al ni, ke ili estas juĝistoj, komisiitaj nin juĝi kaj puni, sin prezentante al niaj fakultoj, malordigitaj de la suferado, kiel fantastaj estaĵoj, tragikaj kaj impresaj fantomoj. Ili elpensis satanajn scenojn por nin turmenti, submetis nin al nepriskribeblaj humiligoj, trudis al ni hontindaĵojn kaj malĉastaĵojn, nin perforte devigante partopreni en iliaj

abomenegindaj obscenaĵoj! Junulinoj, kiuj la sinmortigon pravigis per amaferoj, forgesante, ke la vera amo estas pacienca, virta kaj obeema al Dio; malŝatante, per efektiva ampasia egoismo, la sanktegan amon de la patrino, kiu restis nekonsolebla; malrespektante la honorindajn blankajn harojn de la patro – kiuj ambaŭ ja neniam forgesos la baton al iliaj koroj donitan de sendanka filino, kiu preferis la morton al pluvivado en tiu sanktejo, la patra domo, – havis nun, tiuj junulinoj, sian koron kaj sian pudoron ofendataj de tiuj fiaj bestiaj estaĵoj, kiuj al ili kredigis la devon fariĝi iliaj sklavinoj, ĉar al tiuj apartenas tiu regno de mallumo, kiun ili preferis al la forlasita hejmo! Sed vere tiaj estaĵoj estis nenio alia ol Spiritoj de iamaj homoj, vivantaj en krimado: – voluptamuloj, drinkemuloj, diboĉuloj, intriguloj, hipokrituloj, mensoguloj, perfiduloj, delogistoj, kruelaj murdistoj, kalumniuloj, satirusoj – unuvorte, tiu malbonfara legio, turmentadanta la surteran socion, kiu ofte havas pompajn funebraĵojn kaj solenajn enterigojn, sed kiu en la spirita mondo simple konsistigas tiun ĵus menciitan abomenindan kanajlaron... ĝis reenkarniĝoj kulpelpagaj, mizeraj kaj malŝatindaj ĝin pelos al novaj progresigaj provoj.

Post tiel bedaŭrindaj sinsekvoj, venis aliaj, ne malpli dramaj kaj ardaj: – malĝustaj faroj de ni plenumitaj dum la enkarniĝo, niaj kulpoj, niaj pekoj, niaj krimoj mem, korpiĝadis antaŭ niaj konsciencoj kiel novaj akuzantaj vizioj neelpeteblaj en la senĉesa kondamno, kiun ili verdiktis kontraŭ ni. Nun la viktimoj de nia egoismo reaperis en hontigaj, obstinaj rememoroj, irante kaj reirante preter ni en konstanta interpuŝiĝado, per kio ili trudis al nia jam tiel konsumita korpo spirita la plej afliktantan nervan malekvilibron, kies kaŭzo estis la konsciencriproĉo!

Sed super tiel bedaŭrinda amaso da malfeliĉoj, super tiela honto kaj tiel krudaj humiligoj viglis, kompatema, la patra favorkoreco de la Plejalta Dio, de la justa kaj bona Patro, kiu “ne volas, ke la pekinto mortu, sed ke li vivu kaj pentu”.

En la kadro de la travivaĵoj, spertataj de la sinmortiginto post la pereo, kiu lin antaŭtempe kondukis en la tombon, la Sinistra Valo nur reprezentas kelkatempan stadion. Li tien portiĝas pelata de ia natura impulso, kun kiu li harmonias ĝis forkonsumiĝos la pezaj ĉenoj lin katenantaj al la surtera fizika korpo, detruita antaŭ la tempo difinita de la natura leĝo. Estos necese, ke de li apartiĝu la potencaj tavoloj da vivfluidaĵoj, kiuj envolvis lian fizikan korpon, tavoloj alĝustigitaj, pro specialaj altiriĝemaj proprecoj de la Granda Patrino, la Naturo, al la astrala korpo, nome la perispirito, kaj kiuj en ĉi tiu aglomeriĝas en kvanto sufiĉa por la elplenumo de kompleta ekzistado; estos necese unuvorte – kaj neniel antaŭ tio ĉi – ke malfortiĝu tiuj altiriĝemoj, kio ĉe sinmortiginto fariĝos sub la plej afliktaj malfacilaĵoj, kun impresa malrapideco, por ke li atingu vibran staton povantan havigi al li kvietigon kaj progreson.[1]

Alivorte, kiaj estis la trajtoj de lia karaktero, liaj malmeritoj kaj la grado de liaj ĝeneralaj ŝuldiĝoj – tia estos la graveco de lia situacio, la intenseco de la spertotaj suferoj, ĉar en tiuj okazoj afliktos la animon ne nur la disrevigaj sekvoj de la memmortigo, sed ankaŭ la reverso de la antaŭe faritaj kulpoj.

De tempo al tempo kurioza karavano vizitadis tiun ombrejon.

Tio estis kvazaŭ la inspektado de ia bonfara asocio, la protekta helpado de ia homama institucio, kies abnegaciajn celojn oni tute ne povus pridubi.

[1] La dolorajn impresojn kaj sensacojn, fontantajn el la karna korpo, kiuj akompanas la ankoraŭ materiigitan Spiriton, ni nomas *magnetaj revibroj,* por la animala magnetismo ekzistanta en ĉiuj vivaj estaĵoj kaj ĝia afineco kun la perispirito. Temas pri fenomeno identa kun tiu, iganta homon, kies brako aŭ kruro estis amputitaj, senti jukadon ĉe la polmo aŭ ĉe la plando, jam ne ekzistantaj. Ni konis, en unu hospitalo, kompatindan laboriston, kiu malgraŭ amputita je ambaŭ krutoj, sentis ilin kaj la piedojn tiel vivaj ĉe si, ke pro la forgeso, ke li ne plu havas ilin, li, provante ekstari, suferis grandan falon kaj vundiĝis. Temas ja pri facile observeblaj fenomenoj.

Ĝi venis serĉe de tiuj el ni, kies vivofluidaĵoj, malfortigitaj pro la kompleta diseriĝo de la materio, permesis ilian translokadon en la mezajn aŭ transirajn regionojn de la Nevidebla Mondo.

Ni supozis, ke tiu karavano estas ia grupo da homoj. Sed vere temis pri Spiritoj, kiuj pelis la fratecon ĝis la ekstremo materiiĝi en sufiĉa grado, ke ili fariĝu plene perceptataj de nia malforta vidado kaj tiel inspiru al ni konfidon al ilia helpo.

Ili sin prezentis en blankaj vestoj, irante en unuopa vico sur la kotaj stratoj de la Valo, en severe disciplinita kolumno, kaj per atenta rigardo oni distingis sur ĉies brustoj malgrandan ĉielbluan krucon, verŝajne ian emblemon aŭ insignon.

Sinjorinoj apartenis al tiu karavano, kaj la kolumnon antaŭiris taĉmento da lancistoj, kvazaŭa gvidistaro, samtempe kiel aliaj samarmilaj soldatoj kvazaŭ izolkordone ĉirkaŭis la vizitantojn, kio evidentigis, ke ĉi tiuj estas severe ŝirmataj kontraŭ ĉia ajn malamikaĵo, kiu povus veni de ekstere. En la dekstra mano la eskortestro tenis, alte levitan, neĝblankan flagon, sur kiu legiĝis, per same ĉielbluaj literoj, ĉi tiu eksterordinara skribaĵo, kiu havis la efikon trudi neordinaran, nevenkeblan timon:

# LEGIO DE LA SERVANTOJ DE MARIA

La lancistoj, portantaj ŝildon kaj lancon, havis bronzkoloran haŭton kaj estis sobre vestitaj, kvazaŭ soldatoj de la antikva Egiptujo. Kiel estro de tiu ekspedicio distingiĝis respektinda viro, portanta blankan kitelon kaj kuracistan insignon krom ankaŭ la supredirita kruceto. Sed lian kapon, anstataŭ la karakteriza ĉapo, kovris hinda turbano, kies faldojn ligis en la fronto la tradicia smeraldo, emblemo de la kuracistoj.

Ili penetradis en la loĝatajn kavernojn, por ekzameni ties okupantojn. Kompatplenaj, ili sin klinis ĉe la strataj kloakoj, levante ĉi tie kaj tie iun malfeliĉulon falintan sub la troa suferado;

elprenis tiujn, troviĝantajn en kondiĉoj ricevi helpon, ilin kuŝigante sur brankardojn portatajn de viroj, kiuj laŭŝajne estis servistoj aŭ lernantoj.

Superreganta, serioza voĉo de iu nevidebla, kiu parolis kvazaŭ ŝvebante en la aero, ilin gvidis en la karitata agado, klarigante detalojn aŭ nuligante momente okazintajn miskomprenojn. Tiu sama voĉo alvokadis la helpotajn malliberulojn, dirante iliajn nomojn, pro kio sin mem prezentis, sen la bezono esti serĉataj, tiuj en pli bonaj kondiĉoj, tiel faciligante la laboron de la karavanuloj. Hodiaŭ mi povas aserti, ke ĉiuj tiuj amikaj kaj protektaj voĉoj estis transsendataj per delikataj, sentivaj ondoj de la etero kun la sublima helpo de magnetaj aparatoj, instalitaj por bonfaraj celoj en difinitaj lokoj de la Nevidebal Mondo, t.e., ĝuste en la regiono, kiu nin akceptis post nia eliro el la Valo. Sed ni tiam ne sciis ĉi tiun detalon, pro kio ni sentis nin tre konfuzitaj.

La brankardoj, zorge transportataj, estis gardataj de tiu jam menciita izolkordona soldataro kaj ŝirmataj en la interno de grandaj veturiloj, similantaj trajnojn, kiuj akompanis la ekspedicion. Sed tiuj trajnoj prezentis interesan, priskribindan apartaĵon. Anstataŭ konsisti el tiuj de ni konataj fervojaj vagonoj ili pli ĝuste rememorigis ian primitivan veturrimedon, ĉar ilin formis malgrandaj, interligitaj diliĝencoj, ĉirkaŭfermitaj per tre dikaj persienoj, kio neebligis al la pasaĝero rigardi la traveturatajn lokon. Blankaj, leĝeraj, kvazaŭ elĉizitaj el specialaj, lerte lakitaj materialoj, ili estis tirataj de ĉarmaj, same blankaj ĉevalparoj, noblaj bestoj, kies unika beleco kaj neordinara eleganteco vekus nian atenton, se ni povus rimarki ion alian, ol la malfeliĉojn, kiuj nin tenadis absorbitaj en la rondo de niaj personaj bezonoj. Temis verŝajne pri ekzempleroj de la plej alta normanda raso, fortikaj kaj inteligentaj, kun belaj, gracie ondiĝantaj kolhararoj, kiuj ornamis iliajn fierajn kolojn, kvazaŭ silkaj manteloj, neĝblankaj kaj rafine franĝitaj. Sur la veturiloj ankaŭ distingiĝis la samaj ĉielblua emblemo kaj respektinda skribaĵo.

La malfeliĉuloj, ricevantaj tian helpon, ordinare troviĝis senkonsciaj, forkonsumitaj, kvazaŭ ilin trafis stranga komato. Sed aliaj, freneziĝintaj aŭ dolorpremataj, vekus ja kompaton pro la ekstrema senkuraĝeco, en kiu ili daŭre restis.

Post skurpula serĉado, la stranga kolumno marŝis returne al la loko kie staris la trajno, same defendata de hinda lancistaro. Silente ĝi trapasis vojetojn kaj stratetojn, foriĝante, foriĝante... ĝis ĝi malaperis for de niaj okuloj kaj ni refoje dronis en la peza, nin envolvanta soleco... Vane kriegadis pri helpo tiuj, kiuj sentis sin flanke lasitaj. Vere ili ne kapablis kompreni, ke tiel okazas ĉar ne ĉiuj troviĝas en tia vibra stato, kiu al ili ebligus translokiĝi en malpli suferigajn regionojn. Ili vane petegadis pri justeco kaj kompato, aŭ ribele ektumultis, postulante, ke ankaŭ ilin oni lasu veturi kun la aliaj. La karavanuloj ne respondis per eĉ ia ajn gesto; kaj se iu, pli malfeliĉa aŭ aŭdaca, provis alsalte atingi la veturilojn por eniri, tuj dek, dudek lancoj, barante al li la vojon, devigis lin retropaŝi.

Tiam, abomena ĥoro da sinistraj hurloj kaj ploroj, da blasfemoj kaj satanaj ridegoj, – la grincado de dentoj propra al la damnito, kiu stertoras en la mallumo de l' malbonoj, kiujn li mem forĝis – reeĥis longe kaj dolore tra la kotaj stratoj, pro kio ŝajnis, ke kolektiva frenezo atakis la mizerajn malliberulojn, pliintensigante ties rabion ĝis grado nevortigebla en homa lingvo!

Kaj tiaj ili restis... Kiel longe?... Ho kompatema Dio! Kiel longe?...

Ĝis ilia neimagebla stato de sinmortigintoj, de mortintoj-vivantoj, permesos ankaŭ al ili translokiĝon en malpli sinistran regionon...

# Ĉapitro II
# **La Damnitoj**

Kiuj sin ĵetas en la memmortigon, tiuj ordinare esperas liberiĝi de malfeliĉoj rigardataj kiel neelteneblaj, de suferoj kaj problemoj, kiujn ili opinias nesolveblaj pro la malvigleco de misedukita volo, ofte senkuraĝiĝanta antaŭ la honto pro senkreditigo aŭ malhonoro, antaŭ la humiligaj rimorsoj, kiuj makulas la konsciencon kiel sekvo de agoj plenumitaj ekster la leĝoj de Bono kaj Justeco.

Ankaŭ mi tiel pensis, malgraŭ tiu aŭreolo de idealisto, kiun pro vanteco mi kredis glorkronanta al mi la frunton.

Sed mi trompiĝis, kaj luktoj senfine pli vivaj kaj krudaj atendis min en la tombo, por plenjuste skurĝi al mi la animon nekredantan kaj ribeleman.

Dum la unuaj horoj sekvantaj la brutalaĵon, kiun mi faris kontraŭ mi, mi efektive perdis la memkonscion. Mia Spirito, krude perfortita, kvazaŭ svenis posedita de abomena kolapso. La sentoj, la fakultoj eksterigantaj la racian "memon", paraliziĝis, kvazaŭ nepriskribebla kataklismo disbatis la mondon. Sed super tiuj ruinoj regis forta konscio pri la prostracio, kiu falis sur mian estaĵon. Estis kvazaŭ tiu malbenita krako, kiu ĝis hodiaŭ sinistre

reeĥas en miaj mensaj vibroj –, ĉiam, kiam, forŝovante la vualojn de la memoro, kiel nun, mi revekas la abomenegindan pasintecon – disĵetus unu post alia la molekulojn, kiuj en mia estaĵo konsistigis la Vivon!

La homa lingvo ankoraŭ ne bezonis elpensi vortojn sufiĉe ĝustajn kaj kompreneblajn por difini la absolute neimageblajn impresojn, kiuj ekinfektas la "memon" de sinmortiginto, tuj en la unuaj horoj sekvantaj la malfeliĉegan okazaĵon. Tiuj impresoj leviĝas kaj pliintensiĝas, envolviĝas en kompleksoj, radikiĝas kaj kristaliĝas, en kresko esprimanta ian mensan kaj vibran staton, kian la homo ne povas kompreni, ĉar ĝi neatingeblas por la kreito, kiu dank' al Dio tenis sin for de tiu anormalaĵo. Kompreni kaj ĝuste mezuri la intensecon de tiu tragedia surprizo povas nur la Spirito, kies fakultoj brulis en la bolado de sama doloro!

Dum tiuj unuaj horoj, kiuj per si mem bildigus la abismon, en kiun li sin ĵetis, se ili ne prezentus sole nur la preludon al la diabla simfonio, kiun li kontraŭvole devos interpreti pro la logikaj dispozicioj de la naturaj leĝoj, kiujn li rompis, la sinmortiginto, duonkonscia, en torpora stato, svenigita, sed, por lia pli granda turmento, ne tute senigita je siaj sensokapabloj, sentas sin dolore kontuzita, diserigita en siajn milionojn da psikaj filamentoj, kiujn violente trafis la kruela okazaĵo. Paradoksoj kirliĝas ĉirkaŭ li, suferigante lian feblan perceptopovon per turmentegaj fajraĵoj el konfuzaj sensacoj. Li perdiĝas en la vakuo... sin mem ne konscias... Sed li tamen teruriĝas, malkuraĝiĝas, konscias la timegigan profundecon de la eraro, kontraŭ kiu li albatiĝis, deprimiĝas ĉe la pereiga certeco, ke li transpasis la limojn de al li permesitaj agoj, senorientiĝas, duonvidante, ke li iris tro malproksimen, trans la linion strekitan de la Prudento! Tio estas la psika traŭmatismo, la pereiga ŝoko, kiu, lin disŝirinte per siaj neeviteblaj tenajloj, postulos de li, por malpliintensiĝi, vojon plenan de dornoj kaj larmoj, jardekojn da severaj elprovoj, ĝis li estos rekondukita al la normalaj vojoj de la progreso, interrompitaj pro tiu arbitra kaj kontraŭefika ago.

Iom post iom mi sentis, ke el la konfuzaj ombroj, en kiuj mi dronigis mian malfeliĉan Spiriton post la falo de la karna korpo, releviĝas la plej supera el la atributoj, kiuj la Dia Patro donis al la homoj kiuj tra la jarmiloj devos Lin respeguli laŭ Lia bildo kaj simileco: – la Konscienco! la Memoro! la dia kapablo de pensado!

Mi sentis, ke mi glaciiĝas de malvarmo, ja frostotremas! la ĝena impreso kvazaŭ vestoj el glacio algluiĝus al mia korpo, kaŭzis al mi netakseblan maltrankvilon. Krom tio, mankis al mi la aero por la libera funkciado de la pulmoj, kio igis min kredi, ke, ĉar mi deziris forkuri el la vivo, tio estas do la morto, kiu proksimiĝas kun sia sekvantaro el disŝirantaj simptomoj.

Putraj, abomenaj odoroj krude naŭzis al mi la flarsenton, kaj akra, intensega, freneziga doloro subite atakis mian tutan korpon, lokiĝante aparte en la cerbo kaj radiante el la aŭda organo. Skuata de nepriskribeblaj kovulsioj de fizika doloro, mi almetis la manon al la dekstra orelo – la sango fluadis el la truo, kiun boris la pafaĵo de la pulvarmilo, uzita por la menmortigo, makulante al mi la manojn, la vestaĵojn, la korpon... Sed mi nenion vidis. Ni rememoru, ke mia memmortigo rezultis el la ribelo, ke mi fariĝis blinda, kion mi rigardis kiel suferon superan al miaj fortoj, kiel maljustan punon de la naturo kontraŭ miaj okuloj, kiuj ja bezonis vidi, por ke mi povu digne kaj noble perlabori la propran vivtenon.

Mi do ankoraŭ sentis min blinda, kaj, por pliintensigo de mia senorientiĝo, ankaŭ vundita, ne mortinta! ĉar la vivo plu daŭris en mi, kiel antaŭ la sinmortigo!

Malgraŭvole mi komencis kolekti la pensojn. Mi retrospektis mian vivon ĝis la infanaĝo, ne preterlasante eĉ la dramon de la lasta akto, ekstra programero de mia ekskluziva respondeco. Sentante min viva, mi konsekvence konstatis, ke la vundo, kiun mi faris al mi mem, serĉante la memmortigon, estis nesufiĉa, kio ja pliakrigis tiujn jam tre grandajn suferojn, kiuj de antaŭ longe turmentadis mian ekzistadon. Mi supozis min alforĝita al ia lito en hospitalo aŭ en mia propra hejmo. Sed la neebleco

rekoni la lokon, ĉar mi tute ne povis vidi; la ĉagrenoj, kiuj min afliktadis, la ĉirkaŭanta soleco, ekmetis min en profundan angoron, samtempe kiel sinistraj antaŭsentoj avertis min pri la konfirmo de senrevena efektivaĵo. Mi krie vokis al miaj familianoj, al amikoj, kiujn mi sciis sufiĉe korligitaj por helpi min en krizaj momentoj, sed daŭre kolerekscitis min la plej konsterna silento. Mi galhumore demandis pri flegistoj, kuracistoj, kiuj povus helpi min en la okazo, se mi, ne estante en mia domo, restus tenata en iu hospitalo; pri servistoj, ĉambristoj, pri iu ajn, kiu povus helpi min, malfermante la fenestrojn de tiu ĉambro, kiun mi supozis okupi, por ke la puraj aerfluoj revigligu al mi la pulmojn; kiu komplezus al mi per varmaj kovriloj, bruligus la kamenfajron por mildigi la froston, kiu rigidigis al mi la membrojn; kiu havigus kvietigilon por la doloroj turmentantaj mian organismon, kaj ankaŭ nutraĵon kaj akvon, ĉar mi malsatis kaj soifis!

Anstataŭ la amikaj respondoj, kiujn mi tiel forte sopiris, kion post kelkaj horoj mia aŭdosento kun mirego distingis, tio estis surdiga voĉbruado, kiu, estante en la komenco svaga kaj malproksima, kvazaŭ ĝi reliefiĝus el premsonĝo, iom post iom pliklariĝis ĝis preciziĝi en konkludigaj detaloj. Tio estas sinistra ĥoro el multaj voĉoj, parolataj en interpuŝiĝa konfuzo, sen interligo, kiel okazus ĉe grupo da frenezuloj.

Sed tiuj voĉoj ne sin turnis unuj al aliaj, ne konversaciis. Ili blasfemis, plendis pri sennombraj malfeliĉoj, lamentis, protestis, hurlis, kolerkriis, ĝemis, stertoris, ploris senkonsole, elverŝante ploron ja abomenan pro ties malespera tono; rabie petegis pri helpo kaj kompato! Teruregita, mi sentis, ke strangaj puŝoj, kvazaŭ nekontraŭstareblaj frostotremoj, transigis al mi abomenajn influojn, kiuj, venante de tiu tutaĵo kaptata de la aŭdosento, estigis afinan fluon inter mia superekscitita esto kaj tiuj, kies voĉojn mi distingis. Tiu ĥoro, izokrona, manifestiĝanta per rigora kadenco laŭ siaj intervaloj, kaŭzis al mi tielan teruron, ke, kolektante ĉiujn fortojn disponeblajn en tiel aflikta situacio, mi ekmoviĝis, celante foriĝi de tie en alian lokon, en kiu mi ne plu aŭdus ĝin.

Palpante en la mallumo, mi provis ekiri. Sed ŝajnis, ke potencaj radikoj alnajlis min al tiu malseka kaj glacia loko. Mi ne povis dekroĉiĝi! Jes! Tio estis pezaj ĉenoj min senmovigantaj, plensukaj radikoj, kiuj, min kateninte al tiu stranga lito, neebligis al mi la deziratan foriĝon. Cetere, kiel forkuri, se mi estis vundita, konsumiĝanta pro internaj hemoragioj, kun sangomakulitaj vestoj, kaj ja blinda, efektive blinda?! Kiel min montri al la personoj en tiel abomena stato?!...

La malkuraĝeco – tiu sama hidro, kiu logis min en tiun abismon, kie mi nun rabiis – ankoraŭ plilongigis siajn nesatigeblajn tentaklojn por senrimede kapti min. Ankoraŭ duan fojon mi forgesis, ke mi estas homo! ke necesas lukti por atingi la venkon, kiel ajn suferiga estos ĝia prezo! Mi do reduktiĝis al la mizero de l' venkito! Kaj rigardante tiun situacion kiel nesolveblan, mi cedis al la larmoj por angorplene ploradi, ne sciante, kion provi por havigi al mi helpon. Sed dum mi verŝadis abundajn larmojn, tiu frenezula ĥoro, restante ĉiam la sama, tragika, funebra, regula kiel horloĝa pendolo, akompanis min per stranga similtoneco, altirante min kvazaŭ ĝi posedus magnetajn, nekonstraŭstareblajn afinecojn...

Mi persistis en la deziro ne plu aŭdi la teruran sonon. Post obstinega penado, mi ekstaris. La strebadon tre malfaciligis mia frostiĝinta korpo kaj la muskoloj, kiuj streĉiĝis pro ĝenerala rigidiĝo. Mi tamen ekstaris. Sed kiam mi ĝin faris, jen ĉirkaŭe haladzis la penetrema odoro de sango kaj internaĵoj putrantaj, kio kaŭzis al mi ĝisnaŭzan abomenon. Ĝi venis ĝuste de la loko kie mi dormis, kaj mi ne komprenis, kiel povis tiel malagrable odori la lito, en kiu mi kuŝis kaj kiu por mi estis tiu sama, kiu akceptis min en ĉiu nokto. Sed tamen, kiom multe da putraj odoroj min surprizis nun! Por iel klarigi al mi tiun strangan, afliktantan fakton, mi ĝin atribuis al la vundo, kiun mi faris celante la memmortigon, al la sango, kiu fluadis makulante al mi la vestojn. Efektive! Mi trovis min kovrita per ia pasteca venenseraĵo, ia kvazaŭa abomeninda koto, elŝvitanta el mia

propra korpo kaj ĝene sorbiganta mian vestaĵon, ĉar kun miro mi konstatis, ke mi portas ceremoniajn vestojn, malgraŭ ke mi estis alforĝita al lito de doloro. Sed samtempe kiel mi prezentis al mi klarigojn, mi ankaŭ konfuziĝis ĉe la demando, kiel tio povas fariĝi, ĉar estis ne akcepteble, ke ia simpla vundo, eĉ tia kvanto da verŝita sango, povus elspiri tielan putran odoron kaj ke, ĉe tio, miaj amikoj kaj flegistoj malzorgus la necesan purigadon.

Mi maltrankvile palpis en la mallumo, celante trovi la kutime uzatan elirpordon, ĉar ĉiuj forlasis min en tiel kriza horo. Sed en iu momento, mi stumblis sur rubamaso kaj instinkte alklinis min al la tero por esplori, kio tiel baras al mi la vojon. Tiam senrimeda frenezo subite potencis miajn fakultojn, kaj mi komencis kriadi kaj hurladi kiel rabia demono, respondante per same drama tono al tiu makabra simfonio, kies ĥora blekado senĉese trafis mian orelon laŭ intermitoj de angora atendo!

Tiu amaso da ruboj estis nenio alia, ol la tero de tombofoso antaŭ ne longe fermita!

Mi ne sciis, kiel mi, blinda, povas duonvidi, meze en la min envolvantaj ombroj, la ĉirkaŭan medion!

Mi troviĝis en tombejo! La tomboj, kun siaj malgajaj krucoj el blanka marmoro aŭ nigra ligno apud impresaj figuroj de enpensiĝaj anĝeloj, viciĝis en la majesta senmoveco de la dramo, en kiu ili rolis.

La konfuziĝo kreskis: – kial mi troviĝis tie? Kiel mi venis, se pri tio mi konservas nenian memoron?... Kaj por kiu celo mi tien iris sola, vundita, dolorita, lacekonsumita?... Vere mi "provis" la memmortigon, sed...

Terura flustro, kvazaŭ la konscienco, per neforpelebla averto, klarigus la memoron konsternitan de tiu senekzempla efektivo, tondre reeĥis tra la alarmitaj internaĵoj de mia esto:

"Ĉu vi ne strebis al la memmortigo?... Jen vi havas ĝin..."

Sed kiel do?... kiel tio povas esti... se mi ne mortis?!... Ĉu mi ne sentas min viva?... Kial do mi restas sola, droninta en la funebra izoliteco de mortintejo?!...

Sed la senrimedaj faktoj trudiĝas tiel al la homoj, kiel al la Spiritoj, kun impona simpleco. Mi ankoraŭ ne venis al ia konkludo rilate miajn naivajn kaj patosajn demandojn, kaj jen mi vidas min, – mian propran figuron! – kvazaŭ antaŭ spegulo, *mortinta, sternita en ĉerko, en plena putrado, sur la fundo de tombofosaĵo,* ĝuste tiu, sur kiu mi ĵus stumblis!

Mi forkuris terurigita, dezirante kaŝi min de antaŭ mi mem, obsedita de la plej abomena hororo, dum tondraj ridegoj de uloj, kiujn mi ne sukcesis vidi, eksplodis malantaŭ mi, samtempe kiel tiu sinistra ĥoro, ke ajn mi rifuĝis, daŭre persekutis miajn turmentatajn orelojn. Kiel ia frenezulo, kia mi efektive fariĝis, mi kuradis, kuradis, dum antaŭ miaj blindaj okuloj bildiĝis la satana abomeneco de mia propra kadavro, putranta en la tombo, pastece tegita per grasa koto, kovrita de naŭzaspektaj vermoj, kiuj voreme luktadis por kontentigi en ĝiaj pustuloj sian neestingeblan malsaton, transformante ĝin en la plej abomenan kaj teruran putraĵamason, kiun mi iam vidis!

Mi volis malaperi de antaŭ mi mem, provante plenumi la agon, kiu min malfeliĉigis, tio estas – *mi mense reproduktis la tragikan scenon de mia memmortigo, kiel se mi duan fojon serĉus la morton, por malaperi en tiun regionon, kiun, pro mia nescio pri la transtombaj realaĵoj, mi supozis la eterna forgeso!* Sed estis nenio, kio povus malpliakrigi tiun kruelan vizion! Ĝi ja estis vera! Perfekta bildo de la efektivaĵo, kiu refiguriĝis sur mia fizika-spirita organismo kaj kiu pro tio akompanis min ĉie, kien ajn mi iris, persekutis miajn senlumajn retinojn, invadis miajn animajn, ŝoktaŭzitajn fakultojn, kaj trudiĝis al la blindeco de mia pekinta, Spirito, min senkompate turmentante!

Dum mia hastega forkuro, mi eniradis tra ĉiuj malfermitaj pordoj por ie min kaŝi. Sed mi estis ŝtonpelata el ĉiu loĝejo, en kiu mi, en la kirlo de la min reganta frenezo, provis min ŝirmi, ne povante distingi tiujn, kiuj traktis min kun tiela malrespekto.

Kaj mi erarvagis sur la stratoj, jen palpante, jen stumblante, ĉiam afliktita kaj persekutata, en tiu sama urbo kie oni min diigis kiel genion. Koncerne la okazaĵojn rilatajn al mia persono, mi aŭdis komentariojn elverŝitajn en formo de kritikoj mordantaj aŭ nerespektaj, aŭ penetritajn per sincera bedaŭro pro mia lamentata forpaso.

Mi revenis al mia domo, en kies ĉambroj regis surpriza malordo ĉe la objektoj por mia pesona uzo, ĉe miaj libroj, manuskriptoj kaj notoj, jam ne trovataj en la kutimaj lokoj, kio tre kolerigis min. Ŝajnis, ke ĉio dislokiĝis! Mi trovis min fremda en mia propra domo! Serĉante amikojn, parencojn, al kiuj mi korligiĝis, mi surprize konstatis ilian indiferentecon rilate al mia malfeliĉego, kio dolorige min ŝokis kaj pligravigis mian ekscitecon. Mi do iradis al kuracistaj konsultejoj, provis enhospitaliĝi, ĉar mi suferis, febris, mensomalsanis, samtempe kiel ekstrema perturbostato turmentegis mian internaĵon, metante min en bedaŭrindan staton de humiliĝo kaj aflikto.

Sed ĉie, kien mi iris, mi sentis min senhelpa, oni neadis al mi atenton, malzorgaj kaj indiferentaj antaŭ mia situacio. Vane el miaj lipoj eliĝis acidaj riproĉoj, kiujn mi mem akompanigis per la prezentado de mia stato kaj de miaj personaj kvalitoj, rigardataj de mia nekorektebla orgojlo kiel nerezisteble allogaj: – ĉiuj ŝajnis senatentaj al mia insista plendbabilo, ne konsentante al mi eĉ afablan rigardon!

Afliktita, malkvieta, freneza, baraktante en ondoj da malbonaŭguraj ĉagrenoj, mi nenie trovis eblecon por ekvilibriĝi kaj tiel havigi al mi konsolon kaj mildigon! Mankis al mi io ne plu havebla, mi sentis min nekompleta! Mi perdis ion, kies manko lasis min en tiu stato de konsterniteco, kaj tiu perdita "io", parto de mi mem, altiradis min al la loko, kie ĝi mem troviĝis, per la nerezistebla forto de ia magneto; ĝi vokis min al si trudeme, nekontraŭstareble! Kaj ĝi efikis sur min kun tiela altirforto, tiu okazaĵo estigis en mi tian malplenecon, tiel profunda estis la vere vitala aficeco min liganta al tiu "io", ke, neniel povante

daŭre resti ie ajn, kien mi iris, mi returnis min al la terura loko, de kiu mi venis: – la tombejo!

Tiu "io", kies manko tiel forte frenezigis min, estis mia propra korpo – mia kadavro! – putranta en la mallumo de tombo![1]

Klininte min, ĝemplorante, super la tombon, kiu entenis miajn mizerajn restaĵojn, mi tordiĝis en timegigaj konvulsioj de doloro kaj kolero, baraktante en krizoj de satana rabio, ĉar mi komprenis, ke mi mortigis min, ke, kvankam enterigita, mi tamen plue vivas kaj multe, multe pli suferas ol antaŭe, supermezure, troe pli multe ol kiel antaŭ la malkuraĝa kaj senpripensa ago!

Dum ĉirkaŭ du monatoj mi vagis senkonsila kaj perpleksa, en stato de turmenta nekomprenado. Ĉar mi restis ligita al la karna portaĵo, regis en mi ĉiuj nekontraŭstareblaj homfizikaj bezonoj, kaj tiu ĉagreno, kune kun la ceteraj ĝenoj, kondukis min al konstantaj krizoj de malespero. Puŝoj de ribelo kaj blasfemado, krizoj de rabio atakis min, kvazaŭ la infero mem blovus sur min siajn pereigajn inspirojn, tiel kronante la malbonfarajn vibrojn, kiuj ĉirkaŭvolvis min per mallumo.

---

[1] Jam, antaŭ proksimume dudek jaroj, unu el miaj sindonaj spiritaj edukistoj – Charles – kondukis min al iu publika tombejo en la urbo Rio-de-Ĵanejro, por viziti sinmortiginton, kiu rondiradis ĉirkaŭ siaj putrantaj restaĵoj. Ne necese klarigi, ke tian viziton ni faris per astrala korpo. La perispirito de tiu kripligita sinmortiginto, abomenaspekta kiel demono, kaŭzis al mi hororon kaj naŭzegon. Ĝi montriĝis tute kripligita kaj nerekonebla, kovrita per cikatroj, tiom da cikatroj kiom estis la pecoj, al kiuj reduktiĝis lia karna envolvaĵo, ĉar la malfeliĉa ĵetis sin sub la radojn de vagonaro kaj estis disŝirita en pecojn. Oni tute ne povas priskribi la suferadon de tiu Spirito! Li estis freneza, konsternita, iafoje furioza, nekapabla por ia rezonado, nesentiva por ĉia ajn vibro krom por tiu de sia senmezura malfeliĉego! Ni provis lin alparoli: li ne aŭdis nin! Kaj Charles, malĝoje kaj per neesprimebla, tenera tono, klarigis: – "Ĉi tie nur la preĝo sukcesos efiki! Ĝi estas la sola balzamo, kiun ni povas bonfare verŝi sur lin, sufiĉe sankta por, post kelka tempo, nur post la kulpelaĉeto, post la riparado dum amaraj ekzistadoj, elverŝigontaj senĉesan ploradon, kaj tio daŭros ne malpli ol jarcenton, eble multe pli... Dio kompatu lin, ĉar ĝis tiam..." Dum multe da jaroj mi petis por tiu malfeliĉa frato en miaj ĉiutagaj preĝoj. – *(Noto de la mediumino)*

Malgraŭ mia blindeco mi vidis, ke fantomoj, afliktitaj kaj plorantaj, vagas tra la aleoj de la sankta loko, kaj iafoje neimageblaj teruroj skuis al mi la vibran sistemon ĝis tia grado, ke tio reduktis min al stranga svenstato, kvazaŭ miaj animaj fakultoj malvigliĝis, perdinte la forton por daŭre vibradi!

Malesperigita antaŭ tiu eksterordinara problemo, mi ĉiam pli kaj pli nutradis la deziron formalaperi, forkuri de antaŭ mi mem, por ne plu fari al mi demandojn ne havante lucidecon por al ili respondi, ĉar mi ja ne kapablis rezoni, ke la fizika-materia korpo, formita el la putrema surtera ŝlimo, vere pereis pro la memmortigo, kaj ke kion mi konfuze prenis por ĝi, dank' al la streĉa ligiteco, per kiu ilin kunigis la naturaj leĝoj de afineco, tute nenuligeblaj por la memmortigo, tio estis la fizika-spirita korpo, nedetruebla kaj nemortema, vivanta kaj duonmateria organismo antaŭdestinita por noblaj celoj, por glora estonteco en la kadro de senfina progresado, trezorejo, en kiu estas gardataj, kvazaŭ la kofro entenanta valoraĵojn, miaj sentoj kaj agoj, miaj pensoj kaj faroj, ĉar tiu spirita korpo ja estas envolvaĵo de la sublima fajrero viviganta la homon, nome la Animo! eterna kaj senmorta kiel Tiu, kiu ĝin kreis el Si Mem!

Foje, dum mi palpe iris kaj reiris laŭ la stratoj nerekonebla por amikoj kaj admirantoj, kompatinda blindulo suferanta en la transtombo la humiligan malhonoron pro sinmortigo; mizerulo en la spirita socio, malsatege baraktanta en ekstrema senhaveco de Lumo; afliktita, erarvaganta fantomo, sen ia hejmo, sen ia ŝirmejo en la vastega, senlima mondo de la Spiritoj; elmetita al abomenaj danĝeroj, ĉar ĉi tiuj ekzistas ankaŭ inter la elkarniĝintoj; persekutata de malicegaj estaĵoj, banditoj de la nevidebla mondo, kiuj amas surprizi, per abomenaj embuskoj, estulojn travivantajn la saman doloran situacion kiel mi, por fari ilin siaj sklavoj kaj per ili plimultigi la hordojn de obsedantaj Spiritoj, kiuj turmentas la surterajn sociojn kaj ruinigas la homojn, ilin subigante al la plej hontindaj tentoj pere de fatala influado – ĉe stratangulo mi renkontis ian amason da ĉirkaŭ ducent

individuoj de ambaŭ seksoj. Estis nokto. Almenaŭ mi tiel supozis, ĉar la mallumo ĉiam ankoraŭ envolvis min, kvankam ĉion, kion mi nun rakontas, mi vidus pli ĝuste per la sensado, ol per la vidorgano mem. Cetere, mi rigardis min blinda, ne povante ĝis tiam klarigi kiel mi, kvankam senigita je tiu netaksebla senso, tamen kapablis vidi tiom multe da hontegindaĵoj kaj ja ne kapablis eĉ distingi la sunlumon kaj la ĉielbluon!

Tiu amaso estis la sama koncertanta tiun sinistran ĥoron, kiu min teruregis, kaj mi ĝin rekonis pro tio, ke en la momento de nia renkonto, ĝi komencis furioze hurli, ĵetante al la ĉielo tiajn blasfemojn, kompare kun kiuj la miaj estis nuraj ŝercoj!

Mi provis reiri, kaŝi min, timegante fariĝi konata al ĝi. Sed ĉar ĝi marŝis en direkto kontraŭa al la mia, tuj ĝi min envolvis, miksante min en sian tutaĵon por fine sorbi min tutan en siajn ondojn!

Mi estis malgraŭvole turnopelata, puŝata, trenata, kaj tiel multenombra estis tiu amaso ke mi tute perdiĝis en ĝiaj faldoj. Nur pri io mi certis, ĉar ĝuste tion mi aŭdis el la ĉirkaŭa blekado: nin ĉiujn gardis soldatoj, eskortantaj la amason, ĵus kaptitan! Ĉiumomente novaj erarvagantoj, unu post alia, alkolektiĝis al la amaso, de kiu ili, same kiel mi, ne plu povis apartiĝi. Ŝajnis, kvazaŭ senmanka taĉmento da rajdantaj militistoj eskorte kondukas nin al malliberejo. Aŭdiĝis la piedfrapado de la ĉevaloj sur la strataj slaboj, kaj akrepintaj lancoj brilis en la mallumo, inspirante timon.

Kredante min objekto de perfortaĵo, mi protestis kontraŭ ĝi. Laŭvoĉe kriegante, ke mi ne estas ia krimulo, mi konigis min per citado de miaj titoloj kaj kvalitoj. Sed se la rajdantoj aŭdis min, ili tamen ne degnis respondi. Silentaj, mutaj, rekte sidantaj, ili rajdis sur siaj bestoj, tenante nin enfermitaj en netranspasebla rondo! En la fronto, trabatante vojon en la mallumo, la estro tenis bastonon, ĉe kies supro flirtis malgranda flago, sur kiu ni duonvidis ian skribon, sed la ombroj estis tiel

densaj, ke ni ne povus ĝin legi, eĉ se la nin vipanta malespero konsentus halton por la manifestiĝo de unu tia deziro.

Longa estis la irado, dum kiu tranĉa frosto glaciigis nin. Miajn larmojn kaj kriojn de doloro kaj malespero mi miksis kun la terurega ĥoro, tiel kunludante la monstran simfonion el blasfemoj kaj lamentoj. Ni antaŭsente konsciis, ke ni estas severe gardataj, ke ni neniam povos eskapi! Ne sukcesante eltiri eĉ unu solan monosilabon el niaj kondukantoj, ni marŝis, malrapide pelate, ĝis ni fine komencis penigan vojon tra profunda valo, dum kiu ni devis iri po du en vico, kaj per la sama aranĝo ankaŭ iris niaj gardistoj.

Kavernoj, ĉiuj numeritaj, ekaperis ambaŭflanke de la stratoj, kiuj ŝajnis pli ĝuste mallarĝaj trapasejoj inter krutaj, ombroplenaj montoj. Temis verŝajne pri ia stranga “vilaĝo”, ia “urbo”, kie la loĝejoj estis kavernoj pro la mizero de ties loĝantoj, kiuj ne posedus suficajn rimedojn por fari ilin pli agrablaj kaj komforte loĝeblaj. Sed tia estis la realaĵo nome, ke ĉio ankoraŭ restis farota en tiu loko, kiu ja ĝuste bildigis la sidejon de la Malfeliĉo! Anstataŭ grundo, oni nur distingis ŝtonojn, kotejojn aŭ marĉojn, ombrojn, pluvegojn... Sub la ardego de la febro, kiu ekscitis mian malfeliĉon, mi eĉ pensis, ke, se tia loko ne estas malgranda regiono de la Luno, certe tie ekzistas lokoj tre similaj...

Oni internigis nin ĉiam pli kaj pli funden en tiun abismon... kaj ni iradis, pluen, pluen... ĝis fine, en la mezo de vasta placo marĉaspekte inundita, la rajdantoj haltis. Ĉe tio, ankaŭ haltis la amaso.

Meze en la subite ekreganta silento, jen la soldataro turnis sin en la kontraŭa direkto por retiriĝi.

Efektive! Ni vidis, ke ĉiuj, unu post alia, forrajdis en la serpentajn kurbiĝojn de la kotplenaj vojetoj, nin tie forlasante.

Konsternitaj kaj timoplenaj, ni postkuris ilin, deziregante ankaŭ foriĝi. Sed vana estis nia peno! La stratetoj, la kavernoj, kaj la marĉoj sinsekve aperis, unu post alia, miksiĝe formante ian labirinton, en kiu ni vojeraris, ĉar kien ajn ni nin direktis,

ĉiam ni trafis la saman scenejon, la saman fizikan konturon. Neimagebla teruro ekposedis la strangan hordon. Miaflanke, mi ne povis eĉ pripensi aŭ prikalkuli por serĉado de ia tuja solvo. Mi havis la senton, kvazaŭ min envolvas la tentakloj de terura premsonĝo. Kaj ju pli da penoj mi faradis por trovi racian klarigon pri la okazaĵoj, des malpli mi ĉi tiujn komprenis, des pli humiligita mi min rigardis ĉe tiu premeganta konsterniĝo!

Miaj kunuloj estis hidaspektaj, kiaj same montriĝis la ceteraj malfeliĉuloj, kiujn ni renkontis en tiu malbenita valo kaj kiuj nin akceptis kun samaj larmoj kaj stertoroj, kiel la niaj. Malbelaj, vidiĝante hororalarmitajn fizionomiojn; palegaj, kripligitaj de la intensa suferado; kun distaŭzitaj vestoj kaj neimageble tragika aspekto, ilin ne rekonus eĉ tiuj, kiuj ilin amas kaj al kiuj ili ja inspirus naŭzabomenon! La normala homo ne kapablas, ne falinte en la kaptilojn de l' frenezo, taksi kion mi eksuferis, de kiam mi konvinkiĝis, ke tio, kion mi vidas ne estas sonĝo, ia inkubo kaŭzita de la bedaŭrinda frenezo de l' ebrieco! Ne! Mi ne estis alkoholmaniulo, ke mi lasus min kapti de la ungegoj de tiel perversa delito! Ĝi ja ne estis sonĝo, inkubo kreanta en mia menso, koruptita de malĉastado, tiun bildon, kiu antaŭ miaj okuloj, alarmŝokitaj de tiel infera surprizo, montriĝis kiel la plej turmenta realaĵo, kiun povus elpensi la infero mem – realaĵo ja kruela, konsterna, abomena! – kreita de legio da damnitaj sinmortigintoj, kies malliberigo en medio konforma al ilia krize grava stato signifis antaŭzorgan protekton kaj karitaton al la homa gento, kiu ne elportus, sen grandaj perturboj kaj malfeliĉegoj, la enmiksiĝon de tiaj mizeruloj en ilian ĉiutagan vivon![1]

[1] Efektive, en la transtombo, la longe infektitaj mensaj vibroj de alkoholmaniulo, voluptamulo, kokainmaniulo, ktp, povas krei kaj subteni pereigajn, diboĉajn viziojn kaj mediojn. Se, krom tio, ilin trafis la perturboj de sinmortigo, tiam la situacio povos atingi neimageblajn proporciojn.

Jes! Prezentu al vi multnombran aron da misformaj estuloj – viroj kaj virinoj – karakterizitan de ties halucinoj, respondaj al intimaj problemoj; ke ĉiuj surhavas vestojn kvazaŭ pastece sorbigitajn de la tomba ŝlimo, vidigante dolordifektitajn vizaĝojn, sur kiuj stampiĝis la stigmatoj de akregaj suferoj! Imagu lokon, vilaĝon envolvitan en densaj ombrovualoj, frostan kaj aersufokan, kie amasiĝus, trafitaj de memmortigo, transtombaj estuloj, portantaj sur si la malhonoran makulon de la speco de morto, kiun ili elektis, celante trompi la Dian Leĝon – kiu al ili ja konsentis la korpan vivon kiel altvaloran rimedon de progreso, netakseblan instrumenton por elpago de gravaj kulpoj de la pasinteco!

Ja tiel aspektis la amaso, kiun miaj teruritaj okuloj vidis en mallumo taŭga por tia timegiga speco de percepto. Cetere, mi forgesis, en la frenezo de la min karakterizanta orgojlo, ke ankaŭ mi apartenas al tiel abomenega tutaĵo, ke mi same estas malbelega haluciniĝinto, ŝlimtegita stigmatulo!

Ĉi tie kaj tie mi vidis unujn, kiuj de tempo al tempo eksterigis, per konvulsiaj movoj, la angorojn de la pendumo, penegante per instinktaj, emociegaj gestoj, liberigi sian kolon, violkolore ŝvelintan, de ĉifonaj ŝnuroj aŭ tolaĵoj, kiuj reflektiĝis en la perispirito dank' al la malharmoniaj vibradoj de la menso, daŭre nin turmentantaj! Kaj aliajn, irantajn kaj reirantajn, kiel frenezuloj, en miregigaj kuroj, laŭte petegantajn pri helpo per tondaj kriegoj, ĉar ili ĉiumomente sentis sin envolvitaj en flamoj kaj timegis antaŭ tiu fajro, kiu, forkonsuminte al ili la fizikan korpon, de nun senĉese brulas en la duonmateria sentivo de la perispirito! Mi rimarkis, ke ĉi tiuj plejparte estas virinoj.

Jen aperadis aliaj kun la brusto, aŭ la orelo, aŭ la gorĝo sangokovritaj. Ho tiu sango, senŝanĝe, konstante fluanta, kiun nenio kapablus forviŝi de la subtila strukturo de la perispirito, krom la elaĉeta, ripara reenkarniĝo! Tiuj malfeliĉuloj, krom esti atakataj de multspecaj mizeroj, ankaŭ konstante maltrankviliĝis de la obseda provo haltigi la sango-ŝprucadon, jen per la manoj,

jen per la vestoj aŭ per ia ajn rimedo, kiun ili supozis je sia dispono, sed ili neniam sukcesis, ĉar tio estis ia bedaŭrinda mensa stato, ilin ĝenanta kaj impresanta ĝis malespero! La ĉeesto de tiaj mizeruloj impresis ĝisfreneze pro la neimagebla drameco de tiuj izokronaj, senŝanĝaj gestoj, kiujn ili malgraŭvole devis plenumadi. Kaj ankoraŭ aliaj, sufokiĝantaj en la barbara asfiksio de l' dronado, baraktantaj en furioza angoro serĉe de ia helpo, simile al tio, kio okazis en ilia ekstrema horo kaj kion ili registris en siaj mensoj; englutantaj akvon per seninterrompaj, lacegigaj plengorĝoj, en senfina ripetado de scenoj de sovaĝa agonio, kiujn la homaj okuloj ne kapablus vidi sen vualiĝi de l' frenezo!

Sed estis ankoraŭ pli!... Kaj la leganto pardonu mian memoron pri tiuj detaloj, eble seninteresaj por lia literatura bongusto sed certe utilaj kiel averto por lia verŝajne senbrida karaktero, devigita travivi la malfacilaĵojn de jarcento, dum kiu la terura “morbus”[1] de la memmortigo fariĝis endemia. Cetere, mi ne intencas prezenti beletraĵon por delekto de gusto kaj inklino artismaj. Mi nur plenumas sanktan devon, provante min turni al tiuj, kiuj suferas, por al ili malkaŝi la veron pri tiu abismo, kiu, per malicaj logoj, jam ruinigis multe da nekredemaj animoj meze en tiuj ĉagrenoj komune trafantaj ĉiun homon dum la vivo!

Sed tre proksime al la loko, en kiu mi enfermiĝis por rifuĝi de la abomena hordo, distingiĝis, pro sia impresa malbeleco, dekkelke da malfeliĉuloj, kiuj serĉis la “eternan forgeson” sin ĵetante sub la radojn de vagonaro. Kun siaj perispiritoj misforme kripligitaj, ili montriĝis kiel la armaturo de monstra aberacio, vestitaj per flugetantaj ĉifonaĵoj kaj kovritaj per sangaj, konfuze distranĉitaj cikatroj, ia intermiksaĵo el kontuzvundoj, unuj sur la aliaj, kvazaŭ fotografe fiksiĝis sur tiu subtila, impresebla plako, nome la perispirito, tiu bedaŭrinda stato, al kiu la memmortigo reduktis ilian karnan envolvaĵon – tiun templon, ho mia Dio, pri kiu la Dia Majstro admonas, ke ni ĝin prizorgu kiel altvaloran, efikan instrumenton destinitan por helpi nin dum nia marŝo rekte al la gloraj spiritaj konkeroj! Frenezigitaj de intensega

---

[1] Latina vorto kiu signifas "malsano".

suferado, poseditaj de la plej ekstrema aflikto, kiu povas trafi la dioriginan animon, montrantaj al la timigitaj okuloj de observanto tion, kion plej tragikan, plej emocian kaj hororan entenas la malsuperaj regionoj de la Nevidebla Mondo, tiuj malfeliĉeguloj hurladis per tiel impresa kaj drameca plorlamentado, ke ili tuj kontaĝis, per sia malsaniga influado, kiun ajn ili renkontus sur sia vojo; kaj ĉi tiu tuj ekinfektiĝus de la nekonsolebla, ilin reganta frenezo... ĉar tiu terura speco de sinmortigo, unu el la plej bedaŭrindaj priskribitaj en tiu ĉi verko, tiel profunde kaj violente skuis ilian nervan strukturon kaj ceterajn sentivojn de la perispirita korpo, – similajn al tiu, kiu traŭmatis la tuton, paralizante, pro la brutaleco de la ago, eĉ la intelektajn fakultojn – ke ĝuste pro tio, la intelekto mem ne kapablis orientiĝis, disdividita kaj konfuzita meze en la ĥaoso, kiu formiĝis ĉirkaŭ ĝi!

.....................................................................................................................

La menso konstruas kaj produktas. La penso – oni jam multfoje asertis – estas kreiva, sekve ĝi naskas, korpigas, tenas la imagojn, kiujn ĝi mem generis, realigas, retenas pasintaĵon, kiun ĝi tenajlopotence konservas vivanta tiel longe, kiel ĝi volas!

Ĉiu el ni, en la Sinistra Valo, per ekscitega vibrado kaj mensa fiksado de la dolora momento de l' memmortigo, kreis la scenejojn kaj respektivajn scenojn, kiujn ni travivis dum la lasta minutoj de nia surtera ekzistado. Tiuj scenoj, reflektitaj ĉirkaŭ ĉiu, estigis konfuzon en la loko, ĉie dissemante tragedion kaj inferon kaj torturante per ekstremaj afliktoj la tie malliberigitajn malfeliĉulojn. Pro tio, tie kaj tie montriĝis pendingoj, ĉe kiuj balanciĝe pendis la korpo mem de la sinmortiginto, elvokante la momenton, en kiu li sin ĵetis en la memvolan morton. Diversspecaj veturiloj, krom ankaŭ rapidegaj, fumvomantaj vagonaroj, trafis kaj muelŝiris, sub siaj radoj, mizerajn senprudentulojn, kiuj celis senvivigi la propran korpon per tiu abomena rimedo, kaj kiuj nun, kun la menso

“saturita” de tiu terura momento, senĉese ĝin reproduktis, vidigante al la afinaj kunuloj siajn abomenindajn rememorojn![1] Torentaj riveroj kaj eĉ longaj etendaĵoj de la oceano ekaperis subite meze de tiuj ombraj vojetoj: – tio estis dekkelke da damnitoj, kiuj pasis, freneziĝintaj, elmontrante scenojn de dronado, ĉar iliaj ardegantaj mensoj trenis kun si la tragikan memoron pri la sinĵeto en la akvon!... Viroj kaj virinoj iradis senesperaj: unuj sangokovritaj, aliaj konvulsie tordiĝantaj sub la torturaj doloroj de venenigo kaj, kio estis pli ŝoka, vidigantaj la refiguraĵon de siaj internaĵoj, koroditaj de la englutita tokson; kaj ankoraŭ aliaj, kiuj brulante kaj kriegante pri helpo en frenezaj kuregoj, komunikis pli grandan panikon al siaj malfeliĉkamaradoj, kiuj timis brulvundiĝi de ilia kontakto – ĉiujn ja posedis kolektiva frenezo! Kaj, kompletige al la profundeco kaj intenseco de tiuj neimageblaj turmentoj – la moralaj ĉagrenoj; rimorsoj, sopirado al la amataj karuloj, pri kiuj oni havis nenian sciigon, la samaj ĉagrenoj, kiuj kaŭzis nian malesperon kaj ankoraŭ persiste afliktis nin!... kaj la fizikaj-materialaj ĉagrenoj; – malsato, malvarmo, soifo, la ordinaraj, fiziologiaj bezonoj, turmentaj, kolerekscitaj, senesperigaj! laceco, deprima maldormo, malvigleco, sveno! Trudaj bezonoj, ĉiaspecaj ĝenoj, nesolveble deriantaj ĉian eblon de mildigo – ho, la insida kaj neevitebla vido de la putranta kadavro, ties naŭzegaj fetoroj, la reeĥa efiko, en la ekscitita menso, de la vermoj konsumantaj la karnan ŝlimon, kio igis la malfeliĉegan turmentaton supozi, ke ankaŭ lin atakas la putrado!

---

[1] Dum multaj seancoj, kiujn mi havis la okazon ĉeesti en spiritistaj societoj de la Ŝtato Minas Gerais, la vidivaj mediumoj akorde asertis, ke ili vidas ne nur la afliktitan Spiriton de la manifestiĝanta sinmortiginto sed ankaŭ la scenon de la sinmortigo mem, kiu malkaŝis antaŭ liaj mediumaj kapabloj la ekstreman momenton de la tragika okazo. – *(Noto de la Mediumino.)*

Kaj kurioza afero: ĉiu, el tiu skorio, trenis, pendantajn de si, fragmentojn de ia fosforeska, luma ŝnuro, kiu kvazaŭ ŝirrompita, violente tranĉita, disŝpruce splitigis, simile al kompakta elektra kablo kun rompitaj fadenoj, elverŝante fluidaĵojn, kiuj devus resti kunigitaj por difinita celo. Nu, tiu detalo, ŝajne sensignifa, havis fundamentan gravecon, ĉar ĝuste en ĝi kuŝas la kaŭzo de la perturboj regantaj la sinmortiginton. Nun ni scias, ke tiu fluidec-magneta ŝnuro, kiu ligas la animon al ties karna envolvaĵo kaj al ĉi tiu komunikas la vivon, atingos la taŭgajn kondiĉojn por malligiĝi de la korpo nur okaze de la natura morto, kiam tio fariĝos nature, senrompe, ne perforte. Sed ĉe la sinmortigo, ja pro tranĉo, do ne malligiĝo, pro kruda elŝiro, rompo, dum ĝi ankoraŭ konservas sian tutan fluidecan kaj magnetan forton, ĝi estigos grandan parton, se ne ĉiujn ĉi tie priskribitajn perturbojn, ĉar ankoraŭ ne estingiĝis la provizo da magnetaj fortoj subtenantaj vitalan strukturon destinitan al ekzistado, kiu en multaj okazoj devus longe daŭri, kio igas la sinmortiginto senti sin ia "mortinto-vivanto", laŭ la plej esprimiva signifo de ĉi tiu vorto. Sed kiam ni unuafoje ĝin rimarkis, ni ne konis tiun naturan fakton, kiun ni rigardis kiel plian motivon por konfuzo kaj teruro.

Tia bedaŭrinda stato, por ties kompreno la homo ne disponas adekvatajn vortojn nek bildojn, daŭras ĝis elĉerpiĝos la rezervoj de vitalaj kaj magnetaj fortoj, kio varias laŭ ĉies grado de vivipoveco. La individua karaktero mem kontribuas por la plilongigo de tiu delikata stato en la okazo, kiam la turmentato estas pli aŭ malpli cedema al la allogoj, krudaj kaj malsuperaj, de la sensoj. Temas ja pri ia komplekso, kiun nur la tempo, kun la helpo de longa serio da suferoj, sukcesos korekti.

.......................................................................................................................

Unu tagon, post longdaŭra ekscitiĝo, ekregis min profunda malvigleco. Stranga malforteco tenis min kvieta,

kvazaŭ sveninta. Mi kaj multaj aliaj samsortanoj de mia grupo estis lacekonsumitaj, nekapablaj por plua rezistado al tiel senesperiga situacio. Urĝa bezono de ripozo nin ofte svenigis, devigante nin rifuĝi en niaj malkomfortaj kavernoj.

Sed eĉ ne dudek kvar horoj pasis, depost kiam min trafis tiu nova stato, kaj jen ankoraŭfoje ekagitis min la murmuro de tiu sama "vagonaro", jam aperinta en la Valo en aliaj okazoj.

Mi kaj kvar kamaradoj, portugaloj kiel mi, havis kiel loĝejon la saman kavernon, kaj en la daŭro de nia longa, kune travivita turmento, ni fariĝis nedisigeblaj kompanoj por la kuna suferado en tiu komuna dolorrifuĝejo. El ĉiuj, unu tamen tre incitadis nin pro la portado, malgraŭ la premiteco de la situacio, de konstante surmetita monoklo, de bone tajlita frako kaj respektiva orkapa bastono, kolekto kiu, laŭ mia neŭrastenia kaj impertinenta opinio, faris lin pedanta kaj malsimpatia en loko kie oni vivis turmentata de fetoro kaj putrado kaj kie niaj vestoj montriĝis kvazaŭ pastece sorbigitaj de strangaj, grasegaj substancoj, ja mensaj refiguraĵoj de la putraĵoj formiĝintaj sur niaj karnaj envolvaĵoj. Sed mi forgesis, ke ankaŭ mi ĉiam ankoraŭ portadis nazumon kun ties kordoneto, redingoton por la ceremoniaj tagoj, abundajn, kombitajn lipharojn... Mi konfesas, ke tiam, malgraŭ la longa kuvivado, mi ankoraŭ ne sciis iliajn nomojn. En la Sinistra Valo la malfeliĉo estas tro arda, ke la tiea malliberulo zorgu pri aliula identeco...

La konata murmuro ĉiam pli kaj pli alproksimiĝis...

Ni haste eliris sur la straton... Vojetoj kaj placoj kiel antaŭe pliniĝis per damnitoj, samtempe kiel tiuj samaj angoraj kriegoj por helpo eĥiĝis tra la ombroplenaj deklivoj, celante altiri la atenton de tiuj venantaj por la kutima inspektado...

Kaj jen, meze en la peznebula ombra atmosfero, ekaperis la blankaj veturiloj, trarompante la mallumon per potencaj lumĵetiloj.

La karavana vagonaro haltis sur la kotplena placo kaj el ĝi eliris taĉmento da lancistoj, tuj poste eliĝis sinjorinoj kaj sinjoroj, kiuj ŝajnis flegistoj, krom la ekspediciestro, kiu, kiel ni antaŭe klarigis, distingiĝis per tio, ke li portis hindajn turbanon kaj tunikon.

Silentaj kaj diskretaj, ili komencis la rekonadon de la helpotoj. Tiu sama aŭstera voĉo, kiu, same kiel en la antaŭaj okazoj, ŝajne vibradis en la aero, pacience vokadis la forkondukotojn, kiu, aŭdinte siajn proprajn nomojn, sin mem prezentis.

Sed estis aliaj, kies ne ĝustatempa prezentiĝo trudis al la helpistoj la bezonon ilin serĉadi. Ĉe tiu okazo, la stranga voĉo indikis la ĝustan lokon, kie troviĝis tiuj mizeruloj, per jenaj simplaj klarigoj.

Ŝirmejo numero tia... Strato tia:...

Aŭ, laŭ la cirkonstanco:

– Demenciĝinta... Senkonscia... Ne trovebla en la ŝirmejo... Erarvaganta en tia strato... Li ne respondos nomvokon... Rekonebla per tia aŭ tia apartaĵo...

Verŝajne iu, de tre malproksime, celturnis potencajn teleskopojn al niaj mizeraj loĝejoj, por tiel liveri al la laborema ekspedicio detalajn informojn pri la okazantaĵoj...

La laboristoj de la Frateco, post konsultado sur mapo, rapidis al la indikita loko kaj de tie elkondukis la vokitojn, unujn en siaj komplezemaj brakoj, aliajn en brankardoj...

Subite eksonis en la drameca atmosfero de tiu infero, en kiu mi multe suferadis, tondre eĥiĝante tra la plej profundaj anguloj de mia estaĵo, mia nomo, vokata por la liberiĝo! Tuj poste aŭdiĝis la nomoj de tiuj kvar kamaradoj, kiuj troviĝis kun mi en la placo. Nur tiam mi eksciis iliajn nomojn kaj ili la mian.

Kvazaŭ per nevidata, potenca laŭtparolilo, la malproksima voĉo precizigis:

Ŝirmejo numero 36 de la strato numero 48 – Atentu!... Ŝirmejo numero 36 – Eniri en la sukurvagonaron – Atentu!... Belarmino de Queiroz e Souza – Hieronimo de Araujo Silvejra – Johano d' Azevedo – Mario Sobral – Eniru en la vagonaron... [1]

Kun larmoj de nesprimebla emocio mi suriris la malgrandajn ŝtupojn de la platformo, kiun al mi montris ĝentila kaj pacienca flegisto, dum la soldatoj garde ĉirkaŭis min kaj miajn kvar kamaradojn, por eviti, ke la ankoraŭ tie restantaj malfeliĉeguloj supreniru kun ni aŭ nin kuntrenu en sian tumulton, tiel estigante konfuzon, kiu ja prokrastus la revenon de la ekspedicio.

Mi eniris. Tio estis larĝaj, oportunaj, komfortaj ĉaroj, kies nekomunaj sofoj, kvazaŭ remburitaj per blanka ermeno, havis la dorson turnitan al la ventolaperturoj, kiuj similis la lukojn de la modernaj aviadiloj. En la mezo staris kvar samformaj sofoj, en kiuj sin komfortigis kvar flegistoj, kaj ĉio signis, ke ili tie restas por gardi nin.

Ĉe la enirpordoj legeblis tiu skribo jam antaŭe vidita sur la flago portata de la taĉmentestro:

## Legio de la Servantoj de Maria

Post nelonge, tute elplenumiĝis la tasko de la abnegaciemaj legianoj. En la interno aŭdiĝis la obtuza tintado de sonorileto, sekvita de rapida peno por levado de alirpontoj kaj envagoniĝo de la laboristoj. Almenaŭ tia estis la imagserio, kiun mi konceptis en la menso...

La stranga vagonaro ekmoviĝis, sen ke ia ruliĝo aŭ la plej eta balanciĝo impresus nian sensaron. Sed ni ne povis reteni

[1] La leganton mi pardonpetas, ke mi ne transkribas la ĝustajn nomojn de tiuj personoj, kiel ilin malkaŝis la aŭtoro de ĉi tiuj paĝoj. – *(Noto de la Mediumino)*

niajn larmojn, aŭdante la senesperan, furiozan kriegadon de la malfeliĉuloj, kiuj tie devis resti tial, ke ili ankoraŭ ne sufiĉe senmateriiĝis por transiĝi en malpli densajn regionojn de la nevidebla mondo.

Sinjorinoj akompanis nin kaj nin prizorgis dum la vojaĝo. Per dolĉaj paroloj ili invitis nin al ripozo, certigante al ni sian solidarecon. Ili plenzorge komfortigis nin sur la kusenoj de la sofoj, kvazaŭ sindonaj, bonkoraj fratinoj de la Bon-farado...

La veturilo foriĝis... Iom post iom la griza nebulo aerdisiĝadis antaŭ niaj okuloj, turmentataj dum longaj jaroj de la plej dolora el la blindecoj: tiu de la kulpa konscienco!

La veturo plirapidiĝis... Tiu nebulo el ombroj perdiĝis en la fora posto kvazaŭ horora inkubo, kiu ĉesiĝus ĉe la fino de malbona dormo... Nun la vojoj estis larĝaj, rektaj ĝis perdiĝo el la vido... La atmosfero fariĝis blanka kiel neĝo... Fekundaj ventoj blovadis, gajigante la aeron...

Ho Dio Kompatema!... Ni ja forlasis la Sinistran Valon!... Tie ĝi restis, malaperinta en la mallumo de la abomeneco!... Tie ĝi restis, inkrustita en la nevideblaj abismoj kreitaj de la homaj pekoj, por turmentado de la animo, kiu forgesis sian Dion kaj Kreinton!

Kortuŝita kaj timenta, mi tiam povis altigi la penson al la Senmorta Fonto de la Eterna Bono, por humile danki la grandan ricevitan favoron!

# Ĉapitro III
# **En la Hospitalo “Maria el Nazareto”**

Post kelkatempa veturado, dum kiu ni havis la impreson, ke ni trairas grandajn distancojn, jen oni malfermis la persienojn, tiel ebligante al ni distingi, ĉe la ankoraŭ malproksima horizonto, severan tutaĵon el fortikigitaj muregoj, ĉe kiuj alte staris peza fortikaĵo turdanta respekton kaj timon en la ĉirkaŭa soleco.

Tio estis malgaja, senhoma regiono, envolvita en nebuloj, kvazaŭ la tutan pejzaĝon kovrus ia tegaĵo el sinsekvaj neĝadoj, sed kiu tamen permesis la travidon. Oni ĉe la unua vido ne distingis vegetaĵaron nek signojn de loĝantoj en la ĉirkaŭaĵoj de la grandega fortikaĵo, sed nur longajn, blankajn ebenejojn kaj montetojn, kiuj, makulpunktante la vastaĵon, similis al buloj amasigitaj de la neĝo. Kaj sur la fono, plantitaj en la mezo de tiu solece nostalgia regiono, la minacaspektaj muregoj, la impona fortikaĵo, tipo de la malnovaj mezepokaj konstruaĵoj, havantaj, kiel ĉefan trajton, seson da turoj, kies forte impresaj linioj vekus la atenton de la preterpasantoj.

Profunda maltrankviliĝo forte frapis nian sentemon, revekante timojn iel kvietigitajn dum la traveturo.

Kio atendas nin transe de tiel malgajaj limoj?... ĉar oni evidente nin tien kondukas...

Vidate de malproksime, tiu konstruaĵo inspiris timegon, sugestante rigorajn regulojn kaj severajn disciplinojn... Ekposedis nin tia impreso de potenco, grandeco kaj majesto, ke ni sentis nin plej malsuperaj, senkuraĝigitaj je ĝia nura vido.

La vagonaro ĉiam pli kaj pli alproksimiĝis, ĝis ĝi fine haltis antaŭ pordego, verŝajne la ĉefa enirejo. Trans la kornico legeblis, zorge prilaborita kaj formita el grandaj, artisme desegnitaj literoj, tiu portugallingva, jam de ni konata skribo, kiu, kvazaŭ sorĉefike, nin retrankviligis tuj kiam ni ĝin malkovris:

# Legio de la Servantoj de Maria

kaj kiun sekvis tiu indiko, kies impresivo pelis nin en novajn maltrankviliĝojn:

# Korekta Kolonio

Sen respondo al la konfuzaj demandoj de la penso, ankoraŭ malrapidema kaj konsternita pro la konstantaj turmentoj, kiuj jam de longe min persekutadis, mi sendevigis min je ĉia esplorado kaj lasis liberan kuron al la okazoj, rimarkante, ke same agis miaj kunuloj.

Al tiu fortikaĵo ne mankis eĉ la ekstera defendo de ia ĉirkaŭfosaĵo. Super ĉi tiu malleviĝis ponto, kaj la vagonaro, venkinte la baron, nin definitive enirigis en tiun Kolonion, kio tamen ne liberigis nin de la pezaj maltrankviloj koncerne la nin atendantan estontecon. Ĉe la eniro, ni rimarkis multenombrajn militistojn en la ĉirkaŭaĵoj, kvazaŭ ia regimento tie enkazerniĝis. Ni forte miris, ke ili tre similas la antikvajn soldatojn de Egiptujo kaj Hindujo. Sur la portiko de la ĉefa turo legeblis tiu alia skribo, kaj ĉio ŝajnis al ni tre interesa, kvazaŭ sonĝo, kiu plenigus nin per necertecoj:

## Gardostara Turo

En kiu loko ni troviĝas?... Ĉu ni revenis Portugalujon?... Ĉu ni vojaĝis tra iu nekonata lando, dum la neĝo ĉie disŝutiĝis, superregante la pejzaĝon?...

Ni senhalte trapasis la vastan militistan placon, certaj ke temas pri fortikaĵo identa al tiuj surteraj, kvankam aŭreolita de neesprimebla nobleco, neekzistanta en tiuj samspecaj, kiujn ni konis en Eŭropo, ĉar en tiu okazo ni ne kapablis kompreni la veran celon de ĝia ekzistado en tiuj solecaj regionoj de la malsupera Nevidebla Mondo, ĉirkaŭitaj de danĝeroj multe pli seriozaj, ol kiel ni povus supozi.

Ni surprizite konstatis, ke ni eniras en ege movplenan urbon, kvankam ĝin kovris vastaj neĝvualoj aŭ densa nebulo. Sed ne forte frostis, kio nin ankaŭ surprizis, kaj la Suno, timeme aperante tra la nebulo, donis al ni la eblon ne nur por varmiĝado sed ankaŭ por la distingo de ĉio staranta ĉirkaŭe.

Grandiozaj konstruaĵoj sin trudis al ĉies rigardo, prezentante la admirindan klasikan, portugalan stilon, kiu tiel forte kortuŝis niajn animojn. Tre okupitaj estuloj eniradis kaj eliradis, en laborplena movado, kaj ĉiuj estis uniforme vestitaj per longaj, blankaj kiteloj, sur kies brustoj montriĝis la ĉielblua kruco kun apudaj komencliteroj: L. S. M.

Tiuj konstruaĵoj ŝajnis publikaj ministerioj aŭ departementoj. Loĝdomoj viciĝis, gracliniaj kaj elvokivaj en sia nobla kaj supera stilo, desegnante artajn stratojn, kiuj etendiĝis kun blankelaka koloro, kvazaŭ tegitaj per neĝo. La vagonaro haltis antaŭ unu el tiuj konstruaĵoj, kaj ni estis invititaj eliri. Sur la portiko legeblis ĝia celo, per videblaj literoj:

### Departemento de Viglado
(Sekcio de Identigo kaj Enmatrikuligo)

Tio estis la sidejo de la Departemento, kies direkcio nin identigos kaj enmatrikuligos kiel internulojn de la Kolonio. Ekde

tiu momento ni troviĝos sub la rekta protektado de unu el la plej gravaj institucioj apartenantaj al la Legio direktata de la altranga Spirito Maria el Nazareto, anĝela, sublima estulo, kiu en la Tero meritis la honoran mision akompani, per patrinaj zorgoj, Tiun, kiu estis la elaĉetinto de la homaro!

Kondukite en vastan, imponaspektan korton, kiu memorigis malnovajn klostrojn de Portugalujo, ni poste estis transportitaj en malgrandaj grupoj, po dek en grupo, al iu kabineto, kie pluraj funkciuloj kunlaboradis en la taskoj de enskribado. Tie ni devis informi la surteran identecon, la motivojn, kiuj instigis nin al sinmortigo, ties specon kaj la lokon, kie restis la kadavro. En la okazo, se la ĵusveninto ne kapablis respondi, la ekspediciestro tuj plenigus la mankon, ĉar li ĉeestis dum la tuta ceremonio, raportante al la estro de la Departemento pri la grava, ĵus plenumita misio. Tiel peniga laboro, koncernanta tutan legion, daŭris maksimume du kvaronhorojn, ĉar la uzitaj procedoj ne egalis tiujn de la surteraj oficejoj. La respondoj de la pacientoj estis ĝustadire gravuritaj en kuriozaj diskoj, ia speco de albumoj animitaj de scenoj kaj movoj dank' al la efiko de specialaj magnetaj aparatoj. Tiaj albumoj reproduktis eĉ la sonon de nia voĉo, nian bildon kaj la ceterajn informojn pri ni mem, se oni nur ilin kontaktigus kun mirinda, tiucela meĥanismo, tute same kiel surteraj diskoj kaj filmoj reproduktas la homan voĉon kaj ĉiaspecajn sonojn kaj bildojn, kiuj en ili gravuriĝis por esti konservataj. Nian identecon oni do pli ĝuste fotografis: la bildoj elsenditaj de niaj pensoj en la momento, kiam ni respondis la koncernajn demandojn, estis kaptataj per procedoj tiam ne kompreneblaj por ni.

Dum longa tempo ni ne plu vidis la virinojn, kiuj alvenis kun ni al la Departemento de Viglado. La regularo de la Kolonio devigis, ke ili estu apartigitaj for de siaj malfeliĉo-kunuloj. Tiel, ĉe la alveno, tuj post la enmatrikuligo, ili estis konfiditaj al la sinjorinoj, funkciistinoj de la Viglado, iuj ilin kondukos al la Virinaj Departementoj. Ni do, ekde la enmatrikuligo, estis apartigitaj for de la ina elemento.

Post nelonge, transdonite al la prizorgo de aliaj servantoj, kies laboroj disvolviĝis ene de la muroj de la institucio, ni devis eniri en novajn transportilojn, klare destinitajn por interna uzado, ĉar al ni ja estis necese daŭrigi la veturadon komencitan en la Valo.

Nun niaj veturiloj estis malpezaj kaj graciaj, tirataj de tiuj samaj admirindaj, normandaj ĉevalparoj, kaj povantaj enteni po dek pasaĝerojn. Post unuhora moderrapida veturado, lasante post ni la kvartalon de la Viglado, kaj penetrante, por tiel diri, la kamparon, ĉar ni antaŭeniradis tra neloĝata regiono, malgraŭ ke ties ŝoseoj prezentis plej zorgan planadon, ornamitaj per arbetoj neĝblankaj kiel la Alpaj floroj, ni ekvidis grandajn limŝtonojn, kvazaŭ triumfarkojn, signantajn la eniron en novan Departementon, novan provincon de tiu Korekta Kolonio situanta en la nevideblaj limoj inter la Tero kaj la ĝustadiraj Spiritaj Regionoj.

Efektive. Tie troviĝis la necesa indiko sur la fronto de la ĉefa arkado, ia gvidilo por helpi la ĵusveninton solvi siajn eblajn dubojn:

## Hospitala Departemento

Ambaŭflanke distingiĝis aliaj, kiuj per sagoj montris la deirpunkton de novaj vojoj, dum novaj skriboj kontentigis la scivolon aŭ la bezonon de la vojaĝanto:

Dekstre: Frenezulejo.

Maldekstre: Izolejo.

Niaj kondukistoj enveturigis nin tra la meza, kie ankaŭ legeblis subtitole:

## Hospitalo Maria el Nazareto

Trans la markŝtonoj ni surprize ekvidis vastegan ĝardenornamitan parkon kaj grandajn konstruaĵojn, starantajn

sur vidplaĉaj lokoj de la regiono. Senŝanĝe prezentante la portugalklasikan stilon, tiuj konstruaĵoj distingiĝis per forte elvokiva beleco kun siaj arkadoj, kolonoj, turoj, terasoj, ĉirkaŭ kiuj plektiĝis floraj grimpkreskaĵoj, kreante agrablan estetikon. Por tiuj, kiel mi, mizeraj kaj angorplenaj, venintaj de mallumaj regionoj, tia loko, kvankam ĉarmomanka pro sia senŝanĝa blankeco, montriĝis kiel plej alta espero pri elaĉeto! Kaj ornamante la parkon, ne mankis eĉ artisme konstruitaj fontanoj, ŝprucigantaj kristalpuran akvon, kiu silente faladis, kaskade naskante delikatajn perlosimilajn gutojn, samtempe kiel mildaj birdoj, aroj da graciaj kolomboj, leĝere flugetadis inter lilioj.

Diference de la ceteraj hospitalaj fakoj, kiel la Izolejo aŭ la Frenezulejo, la Hospitalon Maria el Nazareto ne ĉirkaŭis ia ajn barilo. Nur frondaj arboj, bedoj de lilioj kaj rozoj desegnis por ĝi graciajn murojn. Mi ofte pensis, en la tagoj de mia resaniĝado, kiel rava fariĝus la tiea pejzaĝo, se la natura diverskoloreco dirrompus la neĝblankan vualon, kiu, ĉion envolvante, malgajigis la medion per malcedema monotoneco!

Lacaj, dormemaj kaj malĝojaj, ni supreniris la vastan ŝtuparon. Grupoj da ĝentilaj flegistoj, kiuj estis ĉiuj viroj, sub la estreco de du hinde vestitaj junuloj, asistantoj de la direktoro de la Departemento, – pri kiuj ni poste sciis, ke ili nomiĝas Romero kaj Alcesto – akceptis nin el la manoj de la funkciuloj de la Viglado, komisiitaj por nia ĝisnuna gardado, kaj nin bonkore subtenante, enkondukis nin en la internon de la hospitalo. Ni penetris belegajn galeriojn, laŭ kies longo larĝaj, vitritaj pordoj, kun palebluaj kadroj, travidigis la internon de la malsanulejoj, kio komprenigis, ke la malsanulo neniam sin trovos sola. Ĉe indiko de la flegistoj, la grupoj apartiĝis: – dek dekstren... dek maldekstren... Ĉiu dormejo havis dek blankegajn, komfortajn litojn, vastajn salonojn kun balkonoj rigardantaj al la parko. Oni karitate havigis al ni banon, hospitalajn vestaĵojn, tirante al ni larmojn de danko kaj ĝojo. Al ĉiu el ni oni proponis bongustan buljonon, varmetan kaj revigligan, en teleroj tiel blankaj kiel la

littukoj; kaj ĉiu sentis la guston de tio, kio plej plaĉas al li. Kurioza fakto: dum ni prenis nian simplan manĝon, venis en nian memoron la gepatra domo, la familiaj kunvenoj, la manĝo-tablo, la dolĉa figuro de niaj patrinoj servantaj al ni, la seriozaspekta patro ĉe la kapo... kaj nedifineblaj larmoj miksiĝis kun la revigliga manĝo...

En angulo oportuna por la dek litoj, kameno varmigis la ĉambron, refreŝigante al ni la fortojn. Kaj supre, alte pendanta de la muro, kiu kvazaŭ havis porcelanan konsiston, fascinanta kolora pentraĵo, luma kaj kvazaŭ animita per vivo kaj inteligento, vekis nian atenton, tuj kiam ni transpasis la gastaman sojlon. Tio estis bildo de la Virgulino el Nazareto, iel simila al la fama pentraĵo de Murilo, kiun mi tre bone konis, sed superbeligita per talento ne trovebla ĉe la surteraj genioj de la pentrarto!

Post kiam ni finis la manĝon, jen eniris nian ĉambron du hindaj viroj, kies apartaĵoj komprenigis, ke ili estas kuracistoj. Ĉi tiuj akompanigis sin per du aliaj viroj, kiuj devos prizorgi nin dum la tuta tempo de nia hospitala kuracado, ĉar ili respondecis pri la malsanulejo en kiu ni estis lokitaj. La nomoj de ĉi tiuj estis Karlo kaj Roberto de Canalejas, respektive patro kaj filo, kiuj dum sia enkarna vivo estis hispanaj kuracistoj. Sed ilin ĉiujn ni malklare distingis pro nia stato de malfortikeco. Tio estis, kvazaŭ ni sonĝas, kaj kion ni rakontas al la leganto, tion ni nur duonvidis, kiel dum la varioj de sonĝo...

Malgraŭ tio, la hindoj alproksimiĝis al ĉiu lito, dolĉe parolis al ĉiu el ni, almetis super niaj turmentataj kapoj siajn manojn, tiel delikatajn kaj neĝblankajn, ke ili ŝajnis diafanaj, oportune aranĝis al ni la kusenojn, tiel devigante nin al ripozo, nin patre kovris alŝovante kovrilojn sur niajn frostigitajn korpojn, samtempe kiel murmuradis, per tiel karesaj kaj sugestioplenaj tonoj, ke peza dormemo tuj venkis nin:

“– Vi bezonas ripozon... Ripozu sentime, amikoj... Vi ĉiuj estas gastoj de Maria el Nazareto, la dolĉa Patrino de Jesuo... Ĉi tiu domo apartenas al ŝi...”

Kaj se oni tiel agis kun ni, certe aliaj asistantoj same traktis la ceterajn anojn de la mizera legio kolektita de la Amo de Dio!

.............................................................................................................................

Vekiĝinte, post profunda kaj reboniga dormo, mi havis la impreson, ke ĝi daŭris longajn horojn. Mi iel sentis, ke mia rezonado fariĝas klara, plifaciligante la distingon kaj komprenon de la cirkonstancoj. Mi konstatis, ke mi ĉiam ankoraŭ posedas la memkonscion, ke mi senŝarĝiĝis de tiu malsaneca inkuba stato, kiu naskis tiom da paroksismoj. Sed, ve al mi! Tia mensa revigliĝo, anstataŭ mildigi, ĝustadire profundigis la afliktojn, ĉar ĝi instigadis min ekzameni pli prudente kaj serene la gravecon de la malbono, kiun mi faris al mi mem! Arda sento de bedaŭro, rimorso, timo, desapontiĝo malhelpis al mi ĝuste taksi la pliboniĝon de la situacio. Kaj ĝena premo de honto vipadis al mi la honorsenton, kriante al mia orgojlo, ke mi tie troviĝas senmerite, ĝuante nenian rajton al tia trakto, sed sole nur tolerata de la grandanimeco de plej karitataj estuloj, kiujn inspiris la vera amo al Dio!

Amaregaj duboj daŭre kirliĝadis en mia menso. Ne eble estas, ke mi mortis. La memmortigo tute ne metis finon al mia vivo! Mi daŭre restas viva, ja tre viva!...

Kio do okazis?... Miaj kamaradoj de malsanulejo kaj certe ĉiuj ceteraj, kiuj apartenis al tiu multenombra grupo veninta el la malluma Valo, fordonis sin al similaj pensoj. Konsterniteco, timo kaj nekonsolebla bedaŭro stampiĝis en tiuj misformitaj vizaĝoj.

Kaj, akompanante la novan serion da ĉagrenoj, kiuj invadis nin, malgraŭ la enhospitaliĝo kaj la reboniga dormo, la fizikaj doloroj, rezultantaj de la vundo, kiun ni faris al ni mem, daŭre turmentadis nian sentemon, kvazaŭ ili memorigus al ni pri nia senrimeda stato de damnitoj.

Mi kaj Hieronimo iam kaj iam ĝemadis pro la vundo, kiun ĉe la orelo boris la pulvarmilo uzita en la tragika momento; Mario Sobral konvulsie tordiĝadis, kun ŝvelinta kolo, baraktante, en periodaj kuntiriĝoj, kontraŭ la asfiksio, ĉar li sin pendumis; Johano d'Azevedo, konservante en sia torturata menso la venenadon de la korpo, kiu forkonsumiĝis en la sekreto de la tombo, mallaŭte ploradis, petante pri vizito de kuracistoj; kaj Belarmino, en senĉesa sangado, kun brako doloranta, rigida, paralizita – ho ve, jam de tiam antaŭludante tiun enkorpan dramon, kiun li devos travivi en estonta enkaniĝo – ĉar li sin mortigis per tratranĉo de la manartiko!

Tamen la revigligo estis sentebla. Sufiĉus al ni rimarki, ke ni jam ne plu vidas la mensajn scenojn eliĝantajn el ĉies kapo kaj reproduktantajn, per teruraj refiguraĵoj, nian ekstreman momenton, kiel ja okazis en la Valo, en kiu, krom tiuj bildoj, ekzistis neniu alia pejzaĝo. La malsanulejo, tre komforta, atestis pri tio, kiel zorge oni enloĝigis nin. Eĉ elmontroj de arto kaj beleco troviĝis en tiuj pordoj kun palebluaj kadroj, formitaj el substanco glazurpolurita kiel porcelano; en tiuj kurtenoj el same bluaj puntoŝtofoj, en tiuj blankaj grimpkreskaĵoj, kiuj suprenrampante la balkonojn, enŝoviĝis en la terason, kvazaŭ ili gvatus niajn drame grimacajn vizaĝojn de damnitoj kaptitaj ĉe l' freŝa faro.

Subite, la voĉo de malsanulo, iu el niaj kamaradoj, rompis la silenton de la meditado, en kiu ni drongis la penson, vortigante siajn proprajn impresojn, kvazaŭ li nur al si parolus:

"– Mi venis al la konkludo – li diris, lante kaj amare – ke ni faros la plej bonan, se ni rekomendos nin al Dio, senplende rezignaciante antaŭ la ankoraŭ venontaj okazaĵoj... Por nenio servis la malespero, krom por fari nin ankoraŭ pli malfeliĉaj! Tiom da ribelo kaj malsaĝo... kaj nenion alian ni atingis, ol la pligravigon de niaj jam tre akraj suferoj!... El tio oni vidos, ke ni ĝis nun elektis malĝustajn vojon por niaj destinoj... Sed estas neneigeble, ke ni ĉiuj estas subordigitaj la Plejalta Direktado,

sendependa de nia volo!... Afero ja tre signifoplena... Mi ne bone scias, ĉu mi mortis... Sed mi sincere kredas, ke ne!...

La sinjorino mia patrino estis persono simpla, humila, ne multe instruita, sed pie sindona al sia kredo kaj respekto al Dio. Alkolektinte la filojn ĉe la kameno, por al ili lernigi la vesperajn preĝojn, ŝi, per stranga konvinko, asertadis, mikse kun la principoj de la kristana kredo, ke ĉiuj homoj havas nemorteman animon, kreitan de la Plejsupera Estulo kaj destinitan al glora elaĉeto per la amo de Jesuo-Kristo, kaj ke pri tiu animo ni iam devos prezenti respondecan kalkulon al nia Kreinto kaj Patro! Neniun pli altan scion mi de tiam akiris! Mi rigardas tiujn lecionojn, donitajn de mia patrino dum la familiaj vesperkunvenoj, superaj al tiuj, kiujn mi ricevis en la Universitato. Bedaŭrinde, por mia malfeliĉo, mi ridetis la patrinan saĝon, interniĝante en la flankajn vojojn de la mondumaj pasioj... Sed tamen, ho mia patrino! mi konsentis la eblecon de la nobla kredo, kiun vi provis enverŝi en mian ribeleman animon! Mi ne estis ĝustadire ia ateisto!...

Hodiaŭ, post la paso de tiom da jaroj, travivinte tiom multe da suferoj, enfalinte en situaciojn, kiajn mi ne kapablas ĝuste taksi, mi konvinkiĝas, ke la sinjorino mia patrino pravis: – mi devas posedi ja nemorteman animon! Oni saviĝas el revolvera pafo, el ĝi oni povas eĉ resaniĝi! Oni bonfartas post engluto de korodaĵo, depende de la cirkonstancoj, en kiuj oni ĝin prenis. Sed oni ne eskapas el pendumo, kiel mi elektis! Kaj se mi troviĝas ĉi tie, se mi travivis tiun tutan suferadon, ne sukcesante neniigi en mia interno la fortojn de la vivo, mi do estas nemortema! Kaj mi estas nemortema tial, ke mi efektive havas ian animon, dum la karna korpo, ja tute ne senmorta, devas forkonsumiĝi en la tombo! Kaj se mi posedas animon, ĝuantan la doton de la senmorteco, tio signifas, ke ĝi originas el Dio, la Eterna Estulo! Ho mia patrino, vi diradis la veron! Ho mia Dio! mia Dio! Vi ekzistas! Kaj mi ĉiam malkonfesis vin per miaj agoj, miaj pasioj, mia malatento al viaj leĝoj, mia krima indiferenteco kontraŭ

viaj principoj!... Nun... jen sonis la horo, ke mi prezentu al vi respondecan klakulon pri tiu animo, kiun vi kreis – pri mia animo! Kaj nenion mi havas por diri al vi Sinjoro, krom tio, ke miaj pasioj malfeliĉigis ĝin, dum vi ordonis, ĉe ĝia kreado, ke mi ĝin obeeme konduku al via sino el Lumo! Pardonu min! Pardonu min, Sinjoro, mia Dio!...”

Abundaj larmoj miksiĝis kun asfiksiaj stertoroj, sed, kvankam ekspirante amarecon, ili jam ne prezentis la makabran karakterizon de la konvulsioj, kiujn la plorado kaŭzis en la Valo.

Kiu parolis, estis Mario Sobral.

Mario havis grandajn nigrajn okulojn, distaŭzitan hararon, frenezecan rigardon. Li studis en la Universitato de Coimbra kaj prezentis la perfektan tipon de la Lisbona riĉa bohemiulo. Lia parolo ordinare montriĝis nervoza kaj facila, kaj li estus bonega oratoro, se la Universitaton li estus fininta ne kiel bohemiano sed kiel klerulo. Dum la malliberigo en la Valo li estis unu el la plej suferantaj, kiujn mi konis, kaj tia li restis dum la tuta longa tempo de la釘internigo de la Kolonio.

Per tiu parolado komenciĝis sinsekvo da konfidencoj inter la dek. Mi ne scias la kaŭzon, kial ni deziris interparoli. Verŝajne la bezono de reciproka konsolado instigis nin malfermi niajn korojn, kio cetere montriĝus senefika por mildigo de la ĉagrenoj, ĉar, se konsoliĝo malfacile atingeblas por sinmmortiginto, li des pli certe ne sukcesos malpliakrigi la mizeron premantan lian animon per rememorado de pasintaj doloroj kaj malfeliĉoj.

“– Amiko, potenca estas via dialektiko, kaj mi vin gratulas pro la progreso de via rezonado: – ja ne tia vi estis, kiam mi havis la honoron ie koni vin...”– mi ĉikanis, tre incitita pro la rompo de la silento.

“– Ankaŭ mi tiel kredas, amiko Sobral, kaj admiras la logikecon de viaj konsideroj”– enmiksiĝis sin portugalo kun abundaj lipharoj, mia litnajbaro, kies dekstrorela vundo, senĉese sanganta, kaŭzis al mi senfinan maltrankvilon, ĉar ĉiufoje, kiam

mi atentis ĝin, mi konsciis, ke ankaŭ mi portas egalan vundon, kio min turmentadis per akraj rememoroj.

Tiu estis Hieronimo de Arauĵo Silvejra, el la dek la plej malpacienca, pretendema, nekonsekvenca kaj ribelema. Li daŭrigis:

“– Cetere mi neniam malkredis la ekziston de Dio, Kreinto de ĉiuj Estaĵoj. Mi estis... pli ĝuste mi estas! Mi estas, ĉar mi ne mortis! – praktikanta katoliko, dumviva frato de la respekteginda Kunfrataro de la Sankta Triunuo, ĝuanta la rajton pri specialaj benoj kaj indulgencoj, en okazo de bezono...”

“– Mi kredas, kara najbaro, ke alvenis, aŭ jam pasis, la okazo, ke vi postulu la favorojn, kiujn vi rajtas... Neniam vi ilin pli bezonis ol nun...”– mi rebatis, en kreskanta malbona humoro, kiel obsedanta turmentisto.

Li ne respondis, plu parolante:

“– Sed ekde la junaĝo mi estis tre malpacienca kaj nervoza! Mi facile impresiĝis, estis malkvieta kaj malkontenta, iafoje melankolia kaj sentimentala... kaj mi konfesas, ke mi neniam rigardis serioze la verajn kristanajn devojn, esprimitajn en la sanktaj admonoj de nia konsilanto kaj konfesprenanto el Lisbono. Kaj certe ĝuste pro tio, kiam trafis min la ruiniĝo de mia komerca negoco, ĉar, tion vi eble ne scias, mi estis import-eksporta vinkomercisto; droninta en ne elpageblaj ŝuldoj; surprizita de brua kaj senrimeda bankroto; senpova por eviti la mizeron, kiu antaŭ mi kaj mia familio malfermegis faŭkojn fatalajn; akuzata de amikoj kaj familianoj kiel sola respondeculo pri la drama malsukceso; senkuraĝigita de la perspektivo pri tio, kio okazos al mia edzino kaj filoj, kiujn pro granda amo mi kutimigis al troa komforto, eĉ al lukso, sed kiuj nun vidis min punita kaj suferanta kaj min krude kulpigis pri ĉio, anstataŭ pacience helpi min forigi la krucon de l' ruiniĝo, kiu nin ĉiujn dispremis – tiam ŝanceliĝis la kuraĝo, kiun mi ankoraŭ havis, kaj mi “provis” forkuri de ĉiuj, eĉ de mi mem, por ŝpari al mi riproĉojn kaj humiligojn. Sed mi trompiĝis: – mi nur transloĝiĝis,

ne sukcesis trovi la morton kaj apartiĝis for de mia familio, kio ŝarĝis min per neelporteblaj ĉagrenoj!”

“– Jes, ja bedaŭrinde! – reparolis Mario per la sama malĝoja tono, kvazaŭ li ne estus aŭdinta la ĵusfinitan plendon. – Mi falis en la tenebron de l' Malfeliĉo!... kvankam mi trovis laŭlonge de la vivo favorajn okazojn, kiuj, ebligante al mi la regadon super la pasioj, metus min sur la vojon al la honestaj akiroj!... Mi forgesis, ke la respekto al Dio, al la Familio, al la Devo, estas sankta, atingenda celo, ĉar en la gepatra domo oni ja instruis min pri la bonaj principoj de la Moralo!... Juna, alloga, inteligenta, klera, mi fieriĝis pro tiuj dotoj kaj flegis mian egoismon, senbridigante malnoblajn instinktojn, kiuj postuladis ĝuojn ĉiam pli kaj pli ekscitajn... La paveca kunvivado en la Universitato faris el mi ian pedanton, ian vantemulon, kies ekskluziva intereso estis la bruaj, se ne skandalaj, paradoj... Pro tio mi perdiĝis en la tumulta kirlo de la inklinoj al la malnoblaj pasioj... Kaj poste, ne plu povante retrovi min mem, por min redoni al mia propra regado mi strebis al la morto en la supozo, ke mi tiel povos kaŝiĝi de la rimorsoj malantaŭ la forgeso de tombo!... Mi trompiĝis! La morto ne akceptis min! Ĝi certe trovis min tro malnobla por doni al mi favoron de sia protekto! Tial ĝi redonis min al la vivo, kiam la tombisto havis la honoron kaŝi mian naŭzan figuron de antaŭ la lumo de la suno!...

Sed mia patrino, jes, ŝi ja ne eraris: – mi estas nemortema! Neniam mi mortos! Mi ekzistos dum la tuta eterna tempo, antaŭ la vizaĝo de Tiu, kiu estas mia Kreinto! Jes! Ĉar nur nemortema estulo povas supervivi la malfeliĉojn, kiuj turmentis mian sentemon, depost tiu fatala printempa nokto de la jaro 1889!”

Li malproksimen direktis siajn kongestitajn okulojn, kvazaŭ li vokus pasintajn rememorojn en la nunon, kaj spiregante murmuris, terurita antaŭ tiu plej nigra paĝo, makulanta al li la konsciencon:

“– Jes, mia Dio! Pardonu min! Mi pentas kaj submetiĝas, ĉar mi konfesas, ke mi eraris! Mi pereis antaŭ vi, mia Dio, ĉe la

furioza ampasio, kiun mi nutris por Eŭlina! Sed se vi ĝin permesos, mi rehonoriĝos pro amo al vi...

Eŭlina! Vi ne valoris eĉ la panon, per kiu mi kvietigadis vian malsaton! Sed mi amis vin super ĉiaj konvencioj, eĉ spite mian honoron mem! Perfida kaj malica vi estis, sed ankaŭ mi estis maldigna, ankoraŭ pli ol vi, ĉar mi estis edzo, ligita al edzino nobla kaj digna! Patro de tri senkulpaj infanetoj, al kiuj mi ŝuldis amon kaj protekton! Mi ilin forlasis, Eŭlina, kaj indiferentiĝis antaŭ iliaj ĉarmoj, ĉar mi lasis min forraviĝi de la viaj, formantaj vian strangan sudamerikan belecon!... Ho kiel bela vi estis!... Sed vi ne amis min... Kaj post kiam vi trenis min, falon post falo, elsuĉante mian monujon kaj mian koron, vi forgesis min en la senespero de l' mizero kaj sendanko, ĉar al mi vi preferis tiun brazilan kapitaliston, vian samlandanon, kiu vin amindumis!

Mi iris al via domo kaj ricevis vian malŝaton... Senespera, ke mi perdis vin, mi petegis, rampis frenezpasie ĉe viaj piedoj, agante laŭ mia ĉiama senprudenteco! Ereton de via kompato mi plorpetis, vidante, ke jam ne eblis via amo!

Mi provokis vin al disputo, kompremante, ke vi nesenteme reagis al miaj malesperaj provoj por repaciĝo... kaj, blindigite de viaj ripetataj insultoj, mi vin agresis, vundante la adoratan vizaĝon, mi vin senkompate bategis, piedfrapis kaj, ho mia Dio! ho Dio mia! mi vin strangolis, Eŭlina! Mi murdis vin! Murdis vin!...”

Li sufokiĝe haltis, atakita, kiel perfekta damnito, de la abomenaj konvulsioj, kaj poste daŭrigis kvazaŭ li sin turnus al siaj kamaradoj:

“– Kiam, regata de hororo, mi konsciis mian abomenindaĵon, nur unu rimedo venis en mian kapon, rapida kiel obseda impulso, por eskapi el sekvoj, kiujn, en tiu momento, mi rigardis neelteneblaj: – la sinmortigo! Kaj en tiu loko mem, sen tempoperdo, mi ŝiris la litkovrilojn de la malfeliĉa... kaj pendigis min sur trabo en la kuirejo...”

"– Ja ne tre poezieca formo por la morto de amanto... – mi mokis, tedita de tiu longa rakonto, kies ĉiutagan ripetadon mi aŭdis detempe de la Valo. – Mi vetas, ke Via Moŝto, S-ro Profesoro, kiu strebis al tiel eleganta fino, kiel Petronio, mortis pro la platona amo al iu angla sinjorino, blonda kaj beltalia... Al kleraj portugaloj, kiel Via Moŝto, plaĉas ami anglajn damojn..."

Nur mi turnis min al Belarmino de Queiroz e Souza, kies nomo odoris nobelecon.

Ĝis tiu tempo ankoraŭ incitis min la teniĝoj de tiu kompatinda kunludanto de la granda dramo, kiun mi ankaŭ travivis; kaj ĉe ĉiu favora okazo, mi lin ridindigis, elmontrante esence propran malbonan inklinon, kiu kaŭzis al mi multe da ĝenoj kaj ĉagrenoj, ĝis mi korektis ĝin dum la klopodoj por la interna renoviĝo, kiun en la Spirita Patrolando mi trudis al mia karaktero.

Belarmino estis alta kaj magra, tre eleganta kaj bonmaniera. Li sin deklaris riĉa kaj multevojaĝinta profesoro de Dialektiko, Filozofio kaj Matematiko kaj poligloto, ornamaro respektinta por unu sola, surtere treniĝanta homo, sed kiu ne evitigis al li resti, kaj kun li la monoklo, la frako kaj la bastono, en la kotejoj de la Sinistra Valo, dum tiu interesa provtempo, kiun al li trudis la memmortigo. Tion mi multfoje ĵetis al li rekte en la vizaĝon, incitegita pro la malmodesta citado de siaj diversaj titoloj. Sed la doktoro – ĉar li ja estis doktoro, honorita de pli ol unu Universitato –, neniam rebatis al mi la impertinentaĵojn. Ĝentila, bonedukita, sentimentala, li ankaŭ atingus la bonkorecon, se malgraŭ tiuj belaj dotoj, lian karakteron ne difektus la orgojlo, la egoismo, pro kiuj li sin mem diigis kaj opiniis supera al ĉiuj ceteraj.

Aŭdinte mian parolon, li, kiel ĉiam, respondis ne kolere. Tute male, li al ĉiuj sin turnis, elverŝante sian koron, per milda, eĉ malgaja tono:

"– Mi sincere opiniis, ke la tombo ensorbos mian personecon, ĝin transmutaciante en tiun esencon perdiĝontan en la abismojn de la Naturo: – nome la Nenio!

Disĉiplo de Aŭgusto Comte, la filozofio entiris min en la Materiismon, en la akcidencan Meĥanismon – la solan kontentigan eksplikon, kiun al mia intelekto mi povis proponi, ĉe la anomalioj, kiujn mi renkontis ĉe ĉiu paŝo dum la vivo, alarmantaj mian koron kaj disrevigantaj al mi la menson!

Mi ĉiam nutris grandan teneron kaj kompaton al la homoj, kiujn mi rigardis kiel Malfeliĉo-kunulojn, ĉar miaopinie la vivo estis la kulmino de Malfeliĉo, kvankam mi ĉiam penis kiel eble plej multe apartiĝi de ili, timante alligiĝi per troa amo kaj sekve suferi! Kaj ne alie mi rigardus, ol kiel malfeliĉon, la fakton, ke homo naskiĝas, vivas, laboras, sufera, ĉiamotive luktas... por iam fatale dispolviĝi en la tombo!

Mi neniam inklinis al amindumoj de alta aŭ malalta klaso. Kial ami, fondi familion, kontribuante por ĵeti pliajn malfeliĉujojn en la vivofluon, se la Filozofio krome venigis min al la konvinko, ke Amo estas nura sekrecio de la cerbo?... Mi estis ja studemulo kaj studadis por min mem surdigi kaj tiel eviti alsvarmon da pensoj pri la mizera situacio de la homaro. Tial ne restis al mi liberaj horoj por la flegado de korinklinoj al anglaj aŭ portugalaj damoj... Mi studadis por forgesi, ke ankaŭ mi iam forperdiĝos en la vakuo! Mi estis malfeliĉulo, kiel la tuta homaro! Nur en la serena etoso de la hejmo mi ĝuadis ian plezuron... Mi kiel eble plej forte alkroĉiĝis al la hejmo, malĝoja, ke mi iam estos truddevigita forlasi ĝin por neniiĝi ĉe la vermoj, eldetruontaj mian individuecon! Mia patrino, kiu konfesis la samajn konvinkojn kiel mi, ĉar ankaŭ ŝi ricevis ilin de mia patro, sufiĉis al mi kiel kompanio por la senokupaj horoj. Kiel vi vidas, ne la malfeliĉo ĉe amo estis la motivo de mia "provo" por sinmortigo, sed ja la perdo de la sano! Mi ĉiam estis fizike febla, malfortika, ia tristulo, malfeliĉa kaj malkontenta revemulo, kiun timegigis la Ekzisto! Nekorektebla senkonsoleco mallumigis la tagojn de mia vivo! Enfermita en tiu deprima rondo, mi vidis, ke mian organismon ektrafas tuberkulozo, hereda malsano, kiun mi ne povis kontraŭbatali! Seniluziigite de la Scienco, mi tial preferis

elfini, sen pli grandaj suferoj, la mizeran materion, kiu ekputradis pro la diseriga efiko de nekuracebla malsano, materio, kiu pro sia naturo mem estis destinita al la putrado de morto, al la eterna falo en la abismojn de la Nenio!

Kial do mi atendus, ĝis la dolora avanco de la tuberkulozo estingos mian individuecon post malrapidaj turmentoj, sen ia konsolo, sen la kompensa espero al postmorta estonteco, kie mi trovus nenion alian, ol la absolutan neniiĝon, la kompletan diseriĝon, mi, homa bubo ĵetita en forlasitecon, de kiu ĉiuj forkurus, eĉ la patrino mem – kiu scias? – pro timo al la danĝero de kontaĝo?!...

La morto estis bona, tre logika solvo por mi, kiu nur havis, kiel malkuraĝigan perspektivon, la korpon ruinigitan de la malsano kaj la absolutan neniigon de la esto...”

“– Mi ne havas la kompetentecon de Via Moŝto, Sinjoro Profesoro, nek la kapablon por tiel subtila rezonado. Sed kun la respekto, kiun Via Ekscelenco meritas, mi opinias abomeneginda peko, ke oni ne agnoskas la ekziston de Dio, Lian patrecon al ĉiuj kreitoj kaj la eternecon de la animo, kiel ajn krima kaj malnobla oni estas. Feliĉe por mi, tio estis aferoj, kiujn mi ĉiam plej fervore kredis...”– naive enŝoviĝis Hieronimo, ne konsciante la profundan tezon, kiun li prezentis al eksprofesoro de Dialektiko.

“– Kiel do kaj kiakaŭze vi ekribelis kontraŭ la naturaj cirkonstancoj de la homa vivo, nome la suferoj, kiuj vi trafis en tiu bedaŭrinda disdivido, en tia maniero, ke vi, kiel vi diris, deziris morti, S-ro de Araujo Silvejra?!... ke mi, ne helpata de la Fido, senigita je la Espero, senprotekta por la malkredo je iu Superega Estulo, regata de la pesimismo, al kiu min kondukis miaj konvinkoj, rigardanta la tombon nur kiel forgeson, neniiĝon, ensorbiĝon en la vakio – senkonsiliĝis ĉe la ekfrapo de la malfeliĉo kaj “provis” min mortigi, por eviti vanan, neegalan lukton, tio estas komprenebla! Sed vi?!... Vi, kiuj kredas la Patrecon de iu Kreanta Dio, sidejo, kiel vi diras, de senfinaj

perfektaĵoj, sub kies saĝa gvidado vi iradas; vi, certaj pri la senmorteco de via animo, destinita al la sama gloro de ĝia Kreinto, heredanta ties eternecon mem, al kiu ĝi iras pro la natura ondo de la leĝo de altiro kaj reciproka inklino; vi eĉ tiel falis en malesperon kaj ekribelis kontraŭ tiu sama leĝo, ĉar mi scias, ke la kredo je ia Absoluta Povo malpermesas, kiel pekon, la memmortigon! Jen tute ne akceptebla paradokso! Vi, posedantoj de unu tia scienco, kun koroj prilumitaj de la fervoroj de tiel radluma kredo, kun energioj revigligitaj de la potenco de tiel sublima espero, vi devis vin rigardi ankaŭ dioj, superhomoj, por kiuj la malfeliĉoj estus nuraj momenta kontraŭaĵoj! Ho, se mi nur povus konvinkiĝi pri tiu veraĵo! Mi ja ne timus denove alfronti la ĉagrenojn, kiuj ruinigis al mi la vivon, nek la tuberkulozon, kiu reduktis min al tio, kion vi nun vidas!”– replikis kun fera logiko la disĉiplo de Comte, kies sincereco vekis mian simpation.

“– Kaj nun, kia la opinio de Via Ekscelenco pri la nuna situacio? Kian klarigon proponas la comtista filozofio pri tio, kio al ni okazas?!...”– mi demandis kun granda scivolo, interesiĝante pri la diskuto.

“– Nenion! – li simple respondis. – Ĝi proponas ja nenion... Mi restas la sama... Mi ne sukcesis morti!...”

Estis evidente, ke perpleksigaj duboj nin ĉiujn atakis, inkluzive lin. Ni ja ne volis kliniĝi antaŭ la evidenteco de ia realaĵo, kiun ni timis rigardi rekte en la vizaĝon.

“– Parolu al ni ion pri vi, S-ro Boteljo – tiel Johano kuraĝis puni min. – De longe vi plezuras, nin observante, sed silentas pri via persono, kiu tiel kurioza ŝajnas al ni... Kio min koncernas, mi ne deziras resti nekonata! Vi bone scias la motivojn, kiuj min ĵetis en la abomenon de la memmortigo: – la pasio al ludo. – Mi ĉion forludis! Inkluzive la honoron, ja la propran vivon!...”

“– Pardonu, amiko d' Azevedo, kiel vi forludis la vivon... se ĉi tie vi estas, al ni parolante pri vi?! – malkonsente sin enmiksis Hieronimo.

La interparolanto surpriziĝis kaj ne respondinte, insistis ĉe la deziro eksciti min:

“– Nu, glora romanisto, malnova bohemiano de Porto, malsupreniru de via malbela piedestalo el orgojlo... Diru al ni ion pri via “majesta” supereco...”

Mi eksentis la kaŭstikecon de tiuj malĝentilaj esprimoj de Johano, kiu antipatiis al mi samproporcie kiel mi al lia tre kara amiko Belarmino, kaj kiu momente ĉesis ploreti por malbonhumorigi min.

Mi incitiĝis, ĉar mi ĉiam estis homo trosentema kaj ofendiĝema, kaj la morto ankoraŭ ne korektis al mi tiun gravan anomalion.

“– Kiel do?!... Ĉu mi devus konfidenci privataĵojn al tiaj feĉuloj nur pro tio, ke ili al mi konfesis la siajn?!... Ĉu mi ŝuldas ian konsideron al tia skorio, kiun mi trovis en la abomeninda Valo?!...”– mi pensis, ja sufokita de la orgojla inklino rigardi min supera estulo.

La konsideron, kiun mia malsaĝeco neadis al miaj malfeliĉo-kunuloj, mi ĉiam ankoraŭ afablis al mi mem, opiniante, ke mi tien estis ĵetita, ĉar min trafis krianta maljustaĵo; ke mi ne meritis tiun malliberigon, ĉar mi estis pli bona, pli digna, pli inda je favoroj ol la ceteraj kamaradoj, kiuj kun mi tie rifuĝis. Kiel ajn tamen, mi preferis ne elverŝi mian koron, ĉar min malinstigis la orgojlo. Sed malaltklasaj estuloj, kiel ni, ne kapablas bridi impulsojn de la penso kaj silentigi korelverŝojn antaŭ egaluloj; superregi emociojn por eviti la hontigajn esploradojn de sia interno en la ĉeesto de nekonatoj. Pro tio, la torentoj da senbridaj vibroj elverŝiĝas el iliaj koroj vestitaj per arda kaj emocia parolo, eĉ malgraŭ ilia volo, kvazaŭ la magnetaj kluzoj, ilin retenantaj en la abismoj de la menso, rompiĝus pro la ilin trafintaj skuoj. Cetere, la sincera voĉo, la nobla afableco de la profesoro de Filozofio kaj Dialektiko, invitante al konduto malpli kruda ol tiu, al kiu mi ĝis tiam alkutimiĝis, igis min konsenti la proponon de Johano d' Azevedo. Sed mi prefere min turnis al tiu unua,

pensante, ke nur lia klereco kapablos kompreni min, kaj al li mi rakontis serioze kaj gravmiene, atribuante al mia persono gravecon ridindan pro la humilega situacio, en kiu mi troviĝis:

“– Mi, Sinjoro Profesoro, estas persono, kiu sin opiniis iluminita de senmanka sciado, sed mi vere komencas nun kompreni, ke mi nenion sciis, kaj ankoraŭ ne scias eĉ tion, kio troviĝas antaŭ mia propra nazo. Mi estis malriĉegulo (mi diras “mi estis”, ĉar io sekrete diras al mi, ke ĉio tio apartenas al la pasinteco), portanta tiun netolereblan malvirton, la orgojlon. Fine, mi ja ne malkredis la ekziston de Superega Estulo, direktanta Sian Kreitaron, sed ĝin rigardante kiel Nekonataĵon, defiantan la homan povon por deĉifro de ties enigmojn, mi ne nur ne penetrigis en mian vivon la respekton al tiu Estulo sed ankaŭ prezentis al ĝi nenian kalkulon pri tio, kion mi intencis aŭ faris por kontentigo de miaj kapricoj kaj pasioj. Estas do superflue aserti, ke, min opiniante tre saĝa, mi kuntrenis tiun disonancan mankon, ke mi malkredis la ekzisteblecon de ĉiopovaj, neeviteblaj leĝoj, fontantaj el la kreanta kaj Gvidanta Diaĵo por direkti la Kreitaron, kaj ja pro tio mi kulpis gravegajn erarojn!

Mi suferis, kaj en mia vivo abundis senesperigaj situacoj! La rezignacio estis virto, al kiu neniam konformiĝis mia esence perfortema kaj malserena karaktero. La profundeco de mia suferado faris min acidhumora, incitiĝema. La orgojlo izolis min en la konvinko, ke escepte de mi ekzistis nur meze bonaj valoroj.

Post jardekoj da vanaj luktoj, da aspiroj elpelitaj el la menso kiel objektive nerealigeblaj, da fiaskintaj idealoj, da deziroj tiel justaj kiel nekontentigeblaj, da streboj repuŝitaj, da klopodoj dispelitaj de sinsekvaj elreviĝoj, da voladoj, kiuj, celante la bonon, revenadis al sia dirpunkto senfortaj kaj rompitaj de senkompataj malsukcesoj – jen, amiko, la blindeco, kiu trafis miajn lacajn okulojn kiel perpleksiga premio al la luktoj, kiuj de miaj fortoj postulis kulminajn streĉojn!

Mi fariĝis blinda!

La nigra fantomo de la eterna mallumo etendis super miaj teruregitaj okuloj sian mantelon el tenebroj, kiun nek la homa scienco, nek la sublima kaj naiva fido de tiuj amikoj, kiuj provis min konduki al la rezignacio, nek la mistikaj votoj de la min amantaj koroj al la Ĉielaj Potencoj – kapablus formeti!

Mi ankoraŭ pli forte malkredis je tiuj Potencoj:

– Blinda! Ja mi, blinda?!...

– Kiel mi vivus, blinda?!...

Mi konsideris, ke, se tiu Superega Estulo, je kiu mi ĝis tiam ne malkredis, vere ekzistus, tio ja ne okazus, ĉar Li certe ne dezirus malfeliĉigi min. Mi forgesis, ke, dissemitaj tra la mondo, estas milionoj da blinduloj, multaj en situacio ankoraŭ pli prema ol la mia, kaj ke ĉiuj, kiel mi, estas kreitoj de tiu sama Dio! Mi malkredis, ĉar mi pensis, ke, se aliaj fariĝis blindaj, tio tute ne koncernas min – sed ne mi devus fariĝi tia! Vera maljustaĵo estis asigni al mi unu tian destinon!

Blinda!!... Tio estis la kulmino!

Tiel profunda, kiel surpriza malespero formanĝis mian volon, la forton de mia menso, mian moralan kuraĝon, reduktante min al la malŝatinda stato de malkuraĝulo! Mi, kiu tiel heroe sciis transsalti la rifojn, malhelpintajn al mi la penojn por venki la batalojn de la vivo, mi de tiam ne plu povos luktadi! Mi konfesis min kiel venkiton. Blinda, mi rigardis mian vivon, kiel ion apartenantan al la pasinteco, realaĵon, kiu "estis" sed kiu ne plu "estas"...

La fatala obsedo de la memmortigo ekrondiris miajn fakultojn. Mi inkliniĝis al ĝi kaj enlasis ĝin per la tuta sento de forlasiteco, kiu regis mian eston, senkuraĝan kaj venkitan. La morto allogis min kiel honora krono por ekzistado, kiu neniam klinis la nukon antaŭ io ajn! La morto etendis al mi siajn allogajn brakojn, false montrante al miaj pensoj, difektitaj de la malkredo je Dio, la tomban pacon pere de konsolaj vizioj!

Preninte firman decidon sub la inspiro de malsanecaj sugestoj, profunde malĝoja kaj soleca en mia ekstrema malfeliĉo;

sen la protekto de la milda konsolo de la Fido, kiu malpliakrigus la ardecon de mia intima malespero; ĉe la eksciteco de la imagemo, jam per si mem trokuraĝa kaj pasia, mi kreis doloran romanon pri mi mem, kaj, min opiniante martiro, mi senapelacie min kondamnis!

Mi ja timis kaj hontis fariĝi blinda!

Mi min mortigis por kaŝi antaŭ la socio, antaŭ la homoj, antaŭ miaj malamikoj, la nekapablecon al kiu mi estis reduktita!

Ne! Neniu plezuros, vidante min ricevi la amaran panon, antaŭ la aliula kompatemo! Neniu ĝuos la spektaklon, por mi humiligan, kiun donus mia ŝanceliĝa figuro blindpalpanta en la mallumo de ne plu vidpovaj okuloj! Miaj malamikoj ne ĝojos, sin amuzante per la venĝa vido de mia senrimeda malvenko! Milfoje ne! Mi ne stultiĝos en tiu marasmo, ke mi rigardus nur al mia interno, dum ekstere, ĉirkaŭ mia ombro velkinta pro la blindeco, la Universo daŭre radios vivon fekundan kaj progreseman!

Mi min mortigis, ĉar mi taksis min tro malforta por daŭrigi, en la intima nokto de l' blindeco, tiun vojiradon, kiu, jam ĉe la bona lumo de la okuloj, abundis je malhelpoj kaj kontraŭaĵoj!

Estis troe! Mi ĝismedole ekribelis kontraŭ la Destino, kiu rezervis por mi tiel konsternan surprizon, kaj sub la frakasa premo de drama maljusteco, kiun mi supozis venata de Dio, mi restis senkonsola! Miaopinie, la Providenco, la Destino, la mondo, la socio, ĉiuj eraris: – nur mi pravis, ja trograndigante la tragedion de mia malespero!

Kiel do?!... Mi, posedanto de potenca inteligenteco, estis malriĉega, preskaŭ malsata, dum ĉirkaŭ mi cirkuladis stultuloj kaj malkleruloj kun farĉitaj kasoj! Mi, kiu rigardis min idealista kaj bona, estis atakata de malfeliĉoj, kiuj, per konstanta sieĝado, pelis min en situaciojn spitantajn ĉian eblecon de venko! Mi, kies sentimentala koro flamis per noblaj kaj teneraj aspiroj, verŝajne sublimaj, senĉese trafiĝis de nekomprenemo, de nereciproko, de malŝatoj des pli amaraj, ju pli intensa estis la

radiado de mia sento! Mi, honesta, justa, kondutanta laŭ noblaj principoj, ĉar ĉi tiujn mi rigardis pli belaj, pli konformaj al la idealismo, ornamanta mian karakteron, mi devis havi rilatojn kun friponoj, negoci kun ŝtelistoj, disputi kun hipokrituloj, konfidi al ruzuloj, respekti malhonestulojn!...

Ja estis troe!...

Kaj post tiel longa vico da malfeliĉoj – ĉar por mi, individuo senpacienca kaj tute ne rezignaciema, tiuj faktoj, tiel ordinaraj en la ĉiutaga vivo, superstaris kiel veraj moralaj katastrofoj –, jen la dolora krono de la blindeco, kiu reduktis min al la senvaloreco de vermo, al la angoro de la forlasiteco de l' idioto, al la izoleco de l' enkarcerigito!

Mi ne plu eltenis!

Mankis al mi kompreno pri tiel granda anomalio! Mi ne komprenis Dion! Mi ne komprenis lian Leĝon! Mi ne komprenis la Vivon! Ja torento da nesolvebla konfuzo inundis al mi la penson, konsternegitan ĉe tiu realaĵo! Nur tion mi komprenis: – ke mi bezonas morti, devas morti! Kaj kiam homo ne plu fidas sian Dion kaj Kreinton – malfeliĉega li fariĝas! Ja ia mizerulo, ia demono, ia damnito! Al abismo li sin tiras, la abismon li serĉas, en la abismon li sin ĵetas!

Mi ĵetiĝis!

.......................................................................................................................

Mi ne scias, kiajn kruelajn sugestojn mia blasfema parolo disblovis en la malsaneca etoso de mia ĉambro, sed mi vidis, ke la malgaja grupo lasis sin gliti en malharmonian vibradon, cedante al dolora plorado kaj al impresaj krizoj, precipe la eksa vineksportisto – Hieronimo – kaj la universitatano Sobral, el ĉiuj la plej suferantaj. Mi mem, laŭgrade kiel mi elvolvis mian korpreman raporton, tiel intense revenis, en la menso, al la pereigaj situacioj de mia pasinta enkarna vivo, al ties stadioj,

dolorplenaj kaj neeviteblaj, kiuj min tiel kruele deprimis – ke varmegaj larmoj denove elfluis sur mia palega vizaĝo, dum ankoraŭfoje mallumiĝis mia vidado kaj la ombroj anstataŭis tiujn dolĉajn detalojn de la flirtantaj, bluaj kurtenoj kaj de la rozaj grimpkreskaĵoj suprenvolviĝantaj ĉirkaŭ la balkonaj kolonanoj.

Servemaj flegistoj, pro la neatenditeco de la incidento, alkuris, por vidi, kio okazas. En la Hospitalo Maria el Nazareto, la malsanulo, envolvita en la revigligaj mensaj emanaĵoj de siaj protektantoj kaj gvidantoj, superverŝita de magnetaj ondoj, resanigaj kaj fortikigaj, celantaj lian bonfarton, devis kunhelpi en la kuracado, tenante silenton kaj neniam distriĝante per konversacioj pri personaj aferoj. Estis grave, ke li ripozu, penu forgesi la turmentan pasintecon, forviŝu ŝokajn rememorojn, reboniĝante, kiel nur eble, el tiuj senĉesaj disŝiroj, kiuj lin de longe vundis. Oni nin riproĉadmonis do kiel malobservantojn de unu el la plej gravaj internaj reguloj. Kaj ni tute ne povus senkulpigi nin, prezentante kiel motivon la nescion, ĉar, laŭlonge de la intermuroj, fosforeskaj afiŝoj ĉiumomente vekis nian atenton per konstanta admono al silento, dum la institucio mem donis la ekzemplon, kondukante siajn senĉesajn laborojn sub la regado de saĝa diskreteco. Kaj, kvankam per bonkora tono, oni avertis, ke en okazo de rekulpo, la direkcio punos nin per la translokiĝo al la Izolejo, ĉar la ripeto de tiu fakto estigus malordon kun neantaŭvideblaj sekvoj ne nur por nia farto entute, sed ankaŭ por la hospitala disciplino, kiu nepre devas esti rigore observata – kio komprenigis al ni, ke pli severaj estas la reguloj en la Izolejo, pli timinda ties disciplino. Kaj por eviti tiel drastan decidon, oni starigis pli severan vigladon en nia sekcio. Depost tiu okazaĵo, oni komisiis soldaton el la taĉmento da hindaj lancistoj por deĵorado en niaj apartamentoj.

Post ĉirkaŭ kvaronhoro, blonda, ridetanta flegisto, junulo eble aĝanta dudek tri jarojn, kiun ni ekvidis, dum nia eniro en tiun gravan transmondan institucion, ĉar li estis unu el tiuj, kiuj

kun Romeo kaj Alcesto nin tie akceptis, vizitis nin en la kompanio de aliaj du laboristoj de la domo; kaj elradiante simpation, li ekparolis tre afable, forpelante el ni ĉian ĝenatecon:

"– Miaj amikoj, mi nomiĝas Joel Steel. Mi estas – aŭ estis, se tiel vi volas – denaska portugalo, tamen anglodevena. Vere la malnova Portugalujo ĉiam estis tre kara al mia koro... Neniam mi povis forgesi la feliĉajn tagojn, kiujn mi travivis en ties malavara sino... Mi estis feliĉa en Portualujo... sed poste... la sorto trenis min en Kimrujon, naskolandon de mia kara patrino, Doris Mary Steel da Costa, kie... Nu, kiel sampatrujano kaj amiko, mi invitas vin en la kirurgian kabineton, kie vi estos submetataj al la necesaj ekzamenoj, ĉar nun komenciĝis la kirurgia kuracado..."

Ni volonte konsentis, esperplenaj. Nenion alian ni de tre longe deziris! La doloroj, kiujn ni sentis, nia ĝenerala malbonfarto, kiel suferiga reeĥo de ĉio, kio okazis al nia fizika-materia korpo, de antaŭ longe igis nin sopiregi la viziton de kuracisto.

Mario kaj Johano, kies stato estis pli grava, estis transportitaj sur brankardoj, kaj la ceteraj iris apogite sur la frataj brakoj de bonkoraj flegistoj.

Tiam mi povis observi ion el tiu bonfara domo, ricevanta la mildan protekton de la altega Patrino de la Nazaretano.

Ne nur la arkitektura tutaĵo indis admiron. Ankaŭ la instalaĵoj, la grandioza kolekto da aparatoj, da eksterordinaraj instrumentoj, konformaj al la bezonoj de la astralmonda kuracado, vidigis la tre altan gradon, kiun la Medicinon atingis ĉe niaj protektantoj, kvankam tiu loko, kie ni troviĝis, ne estis altnivela regiono de la Spirita Mondo.

Sindonaj kaj diligentaj kuracistoj helpis per frata komplezemo la mizerulojn, bezonantajn iliajn servojn kaj protekton. Ĉe iliaj bonkoraj fizionomioj stampiĝis la kompatema zorgo de supera estulo pri tiu malpli forta, de la progresinta intelekto pri sia malfeliĉa frato, ankoraŭ droninta en la mallumo

de nescio. Sed ne ĉiuj portis hindostilajn uniformojn. Multaj surhavis longajn, tre blankajn kaj vaporecajn kitelojn, similajn al kuriozaj tunikoj el fosforeska ŝtofo...

Mi ne vidis, kio okazis al miaj malfeliĉ-kunuloj. Sed, kio min koncernas, atinginte la pavilonon, destinitan al la kuracaj laboroj, mi transdoniĝis el la flegado de Joel Steel sub la zorgon de la juna doktoro Roberto de Canalejas, kiu enkondukis min en iun fakon, kie mia fizika-spirita korpo estis submetita al gravaj, detalaj ekzamenoj. Lia patro, Karlo de Canalejas, respekteginda maljunulo, eksa hispana kuracisto, kiu praktikis la Medicinon kiel sanktan apostoladon, farante el ĝi heroan mision de abnegacio kaj karitato, indan je la aprobo de la Ĉiela Kuracisto, kaj unu el tiuj hindaj psiko-kuracistoj, nin sukurintaj ĉe nia alveno – Rosendo –, prizorgis min kiel kuracistoj. Dume, Roberto asistis ilian gravan laboron, same kiel kandidato al doktoreco la lecionojn de l' majstroj en la temploj de la Scienco, kio klarigis, ke li ankoraŭ staĝas kiel studento pri la tiea Medicino.

Al mia astrala korpo oni aplikis fizik-astralajn kuracprocedojn ĝuste ĉe la partoj respondaj al tiuj, kiujn, ĉe la surtera fizika envolvaĵo, disŝiris la pafaĵo de la pulvarmilo uzita por la memmortigo, nome la faringo, la aŭda kaj la vida aparatoj kaj la cerbo, ĉar la vundo etendiĝis tra tiu tuta delikatega regiono de mia kompatinda karna envolvaĵo.

Tio estis kvazaŭ mi, ankoraŭ kiel enkarniĝinto (kaj efektive tiel estis, ĉar ja tiel estas ĉe ĉiuj homoj), havis ian duan korpon, muldilon, modelon de tiu, kiun detruis la brutala memmortigo; kvazaŭ mi estus ia “duoblaĵo”, kaj tiu dua korpo, kvankam estante nedetruebla, tamen spertus la efikon de ĉio, kio okazus al la unua; kvazaŭ stranga akustikaj proprecoj subtenadus vibrajn reeĥojn, povantajn daŭri dum nedifinita tempo kaj malsanigi tiun duan korpon.

Mi nun scias, ke la duonmateriaj histoj de tiuj menciitaj regionoj de mia perispirito, profunde difektitaj, ricevis la efikon de lumsondoj, de magnetaj banoj, de kvintesencaj balzamoj,

de lumaj substancoj ĉerpitaj el la sunradioj; ke el tiuj histoj oni prenis moviĝantajn, sonorajn fotojn kaj mapojn por specialaj analizoj; ke tiujn fotografaĵojn kaj mapojn oni poste alsendis al la "Sekcio por Planado de Fizikaj Korpoj", de la Departemento de Reenkarniĝo, por studoj koncernantaj la preparadon de la nova karna vestaĵo, kiun mi ricevos por reveno al la surteraj elprovoj kaj kulpelaĉetoj, pri kiuj mi supozis, ke mi povus ilin eviti per tiu freneza ago. Dum unu horo mi submetiĝis al tiu stranga kuracado, ĉirkaŭita de subtilaj, lumaj, transcendaj aparatoj, kaj dum tiu tempo la pli aĝa doktoro de Canalejas kaj la hinda kirurgo amplene sin dediĉis, min revigligante per kuraĝigaj vortoj, admonante min al konfido je la estonteco, al espero je la Superega Amo de Dio! Kaj mi ankoraŭ scias, ke mi kaŭzis ne nur tre penigajn laborojn kaj eĉ laciĝon al tiuj sindonaj servantoj de la Bono, sed ankaŭ maltrankviligajn zorgojn, kiuj ilin devigis al streĉaj oferoj ĝis la estingiĝo, en mia fizika-astrala organismo, de tiuj magnetaj fluoj, kiuj ĝin afinigis al tiu surtera fizika, kaj kiuj tenadis tiun konsternan perturbon, kiun nenia homa esprimo kapablos priskribi!

Tiel okazas, ĉar la "astrala korpo", tio estas, la perispirito – aŭ, ankoraŭ, la "fizika-spirita korpo"– ne estas, kiel oni ĝin supozis, ia abstraktaĵo, ia senkorpa, etereca estaĵo. Kontraŭe ĝi estas viva, reala organismo, sidejo de la sensacoj, ĉe kiu stampiĝas kaj reefikas ĉiuj okazaĵoj impresantaj la menson kaj tusantaj la nervan sistemon, de kiu ĝi estas la direktanto.

Kaj en la konsisto de tiu admirinda envolvaĵo de la Animo – la Dia Esenco, kiu ekzistas en ĉiu homo kaj montras ties originon –, ankaŭ estas ia materia, kvankam kvintesenca substanco, kiu al ĝi ebligas malsaniĝi, sentiviĝi, ĉar tiaspeca materio estas tre impresiĝema kaj sentiva, havanta naturon delikatan, nedetrueblan, evoluipovan, subliman, kaj ĝuste pro tio ne povantan suferi, sen tre gravaj perturboj, la perforton, kiun brutala ago, kiel la memmortigo, faras al la surtera envolvaĵo.

Sed ĉe tiel zorga kuracado ankoraŭ pligrandiĝis la duboj pri mia situacio. Multajn fojojn, dum tiu senesperiga restado en la Sinistra Valo, mi, ho jes! mi ja kredis, ke mi mortis kaj mia damnita animo elpagas en la infero por la gravegaj malsaĝaĵoj, kiujn mi faris dum la vivo. Sed nun, pli serena, vidante, ke oni min internigis en bonan hospitalon, ke oni min submetas al kirurgia kuracado, kvankam la ĉi-tieaj procedoj estas tre malsamaj, ol tiuj al mi konataj, jen novaj ondoj da necerteco maltrankviligis al mi la spiriton:

Ne! Ne eble estas, ke mi mortis!

Ĉu tio estus morto?... Ĉu vivo?...

Verŝante do amaran ploron, jen mi, en iu momento de tiu unua tago sub la sindona prizorgado de Karlo kaj Rosendo, febra, ekscitita, nekapabla regi min plu, ekkriis:

“– Sed kie, efektive, mi troviĝas?... Kio okazis?... Ĉu mi sonĝas?... Ĉu mi mortis aŭ ne?... Ĉu mi vivas?... Ĉu mi estas mortinta?...”

Respondis al mi la hinda kirurgo, ne haltigante sian delikatan laboron. Fiksante sur mi mildan rigardon, eble por vidigi, ke mia situacio kaŭzas al li bedaŭron aŭ kompaton, li, elektinte plej persvadan esprimtonon, klarigis, lasante nenian eblecon al dua interpreto:!

“– Ne, mia amiko! Vi ne mortis! Vi neniam mortos!... ĉar ne ekzistas morto en la Leĝo reganta la Universon! Fariĝis nur tio, ke ia bedaŭrinda malfeliĉego trafis vian surteran fizikan korpon, detruitan antaŭ la ĝusta tempo pro malbona decido de via menso... La Vivo tamen ne sidis en tiu via surtera fizika korpo, sed ja en ĉi tiu, kiun vi nun vidas kaj sentas ĉe vi; ĝuste ĉi tiu efektive suferas, vivas, pensas kaj posedas la subliman atributon de la senmorteco, dum tiu alia, el karno, kiun vi forĵetis, taŭga nur por uzado en la surtera scenejo, jam malaperis sub la malgaja ŝtono de tombo, kiel provizora vestaĵo de ĉi tiu, kiu plu vivas ĉi tie... Sed trankviliĝu... vi pli klare komprenos vian situacion laŭgrade kiel vi reboniĝos...”

Oni portis min sur brankardo direkte al la malsanulejo. Mia stato postulis ripozon. Oni donis al mi refortigan buljonon, ĉar mi malsatis, kaj ĉar mi ankaŭ soifis, oni trinkigis al mi balzaman, kristalpuran akvon. Ĉirkaŭe, la silento kaj la kvieteco, envolvitaj en ondoj da konsolo kaj bonfarado, invitadis al enpensiĝo. Obeante bonkoran sugeston de Rosendo, mi provis endormiĝi, dum la desapontiĝo, trudita de la neelpetebla realeco, aŭdigis siajn definitivajn klarigojn en mia turmentata menso:

"– La Vivo ne sidis en tiu surtera fizika korpo, kiun vi detruis, sed ja en ĉi tiu, kiun vi nun vidas kaj sentas, kaj kiu posedas la subliman atributon de la senmorteco!"

# Ĉapitro IV
## Hieronimo de Araŭĵo Silvejra kaj familio

Nenian sciigon ni ricevis pri niaj familioj, nek pri niaj amikoj. Akrega resopirado, kvazaŭ koroda acido mordus al ni la amokapablojn, enverŝis en niajn malfeliĉajn korojn la disrevigan amarecon de milo da afliktantaj necertecoj. Joel kaj Roberto multfoje trovis nin kaŝplorantaj, sopirantaj pri amataj karuloj, kies nomojn ni tie neniam aŭdis! Tiuj bonaj amikoj nin karitate revigligadis per kuraĝigaj vortoj, asertante, ke tiu ĉagreno estas pasema, ĉar nia situacio emas mildiĝi, kio nepre kondukos nin al la solvo de tiuj plej urĝaj problemoj.

Sed al ni estis permesate sciiĝi pri mensaj vizitoj kaj frataj deziresprimoj por paco kaj estonta feliĉo, pri ĉia ajn elmontro de Amo sendita de karuloj, restintaj sur la Tero, aŭ de simpatiantoj, krom ankaŭ de tiuj, kiuj, loĝante en la spiritaj regionoj, amas nin kaj interesiĝas pri nia reboniĝo kaj progreso. Tiuj pensoj, se nur ilin elradius menso vere altiĝinta al noblaj deziroj, estis al ni transsendataj per plej kurioza kaj tre efika rimedo, kiu tiam, pro nia spirita perturbo, nin perpleksigis, sed pri kiu ni poste eksciis, ke ĝi estas natura, eĉ ordinara afero ĉe edukaj institucioj en transiraj regionoj de la transmondo.

En ĉiu dormejo, staris ia delikatega aparato de strukturo formita el elektromagnetaj substancoj, kiuj, kunigante netakseblajn potencojn por altiro, selekto, reprodukto kaj elsendo, bildigis sur sia speguleca surfaco ĉiajn imagojn kun ties sonoj, kiujn oni bonvoleme kaj karitate sendis al ni. Kiam la afabla koro de iu familiano, aŭ eĉ de iu nekonato, ĵetis fratajn vibrojn, tra la senmezura Spaco, petegante la Plejaltan Patron pri favoroj al niaj animoj afliktataj de l' ĉagrenoj, tiam nin tuj atentigis subita eklumo, kiu, aŭdigante la flustron de preĝo, ankaŭ reproduktis la bildon de la preĝanto, kio iafoje tre surprizis nin, ĉar okazis, ke ofte montriĝis sur tiu magneta spegulo personoj, kiujn ni ne ĉiam honoris per amikeco kaj sindono, dum aliaj, kiuj de niaj koroj ricevis plej multajn komplezojn, malofte mildigis la akrecon de nia intima situacio per la sankta kareso de Preĝo! Tiel ni povis ekscii, kion oni pensas pri ni; la petojn adresitajn al la Diaj Potencoj, ĉian bonon, kiun oni al ni deziris aŭ faris.

Sed bedaŭrinde tia okazo, kiu tiom multe mildigus la akran solecon de nia vivo; kiu efikus kiel kvietiga konsolo sur la ardega sopirado, malvigliganta al ni la menson kaj la koron, estis maloftega en preskaŭ la tuta Hospitalo, se paroli pri la korligoj lasitaj sur la Tero, ĉar la genia aparato kapablis registri nur la sincerajn elvokojn, tiujn, kiuj, pro la sublima naturo de la vibroj elsenditaj en la momento de la Preĝo, povus alagordiĝi al tiuj magnetaj ondoj kun transsenda povo por rompi la naturajn malhelpojn kaj atingi la plej altajn spiritajn sferojn, kie la Preĝo estas ricevata ĉe brilegoj kaj benoj. Sed la fariĝo de tiel konsola fakto ne ebligis, kiel ni ja deziregis, la akiron de detalaj sciigoj pri ties okaziganto, kio kaŭzis al ni tro amaran aflikton, konsternan sopiradon, ĉar ni sentis nin forgesitaj, senigitaj je ĉia ajn informo!

Malgraŭ tio, tiuj samaj elsendaparatoj senĉese montradis, ke nin tamen memoras loĝantoj de l' transtombo. De aliaj spiritaj regionoj, same kiel de aliaj lokoj de nia Kolonio mem, alvenis

frataj deziresprimoj por paco, amika konsolado, kuraĝigado por la estontaj tagoj. Oni preĝis por ni per fervoraj petegoj, alvokante ne nur la patrinan protekton de Maria al niaj senmezuraj malfortaĵoj, sed ankaŭ la favorkoran helpon de la Dia Majstro.

Sed el la Tero, ne maloftaj estis la okazoj, kiam disĉiploj de Allan Kardec, penante konformigi siajn konduton al la kristanaj instruoj, regule kunvenadis en sekretaj kabinetoj, simile al la antikvaj inicitoj en la sekreteco de l' temploj kaj, respektemaj, obeante fratajn impulsojn pro amo al la Dia Kristo, elsendis amajn pensojn por nia bono, nin ofte vizitante pere de potencaj mensaj fluoj, kiujn la Preĝo benis kaj sanktigis per mildeco kaj kompato kaj kiuj verŝiĝis, kiel hela lumo de konsola espero, en la internon de niaj animoj, turmentataj kaj forgesitaj!

Sed ne nur tio.

Sub la gvido de eminentaj Mentoroj, fratecaj karavanoj da Spiritoj sin dediĉantaj al bonfarcelaj studoj kaj lernadoj, vizitadis nian malgajan loĝejon, veninte el pli feliĉaj spiritaj regionoj, por al ni alporti sian kompateman solidarecon dum restado, kiu plenigis nin per ĝojo. Ni tiel starigis bonajn amikrilatojn kun estuloj morale multe pli superaj al ni, sed kiuj ne disdegnis honori nin per sia estimo. Tiaj amikecoj, tiel dolĉaj inklinoj, estis porĉiamaj, ĉar ili havis kiel fundamenton la neprofitemajn, noblajn principojn de la kristana frateco!

Nur post tre longe oni permesis al ni la ĝojon akcepti la viziton de tiuj karuloj, kiuj nin antaŭiris en la tombon. Sed eĉ en tiuj okazoj, ni devis kontentiĝi per rapidaj intervidiĝoj, ĉar memmortiginto rilatas al la spirita vivo kiel kondamnito al la surtera socio: li ne ĝuas normalajn rajtojn, vivas en malgaja kulpelaĉeta regiono, kie estas permesata la ĉeesto de neniu krom liaj edukistoj, dum li mem, pro la nestabileco de sia vibrado, ne sukcesos eliri el la malvasta rondo, en kiu li moviĝas, ĝis komplete estingiĝos la efikoj de tiu malfeliĉega kulpo.

"–... Kaj oni vin ligos mane kaj piede, kaj elĵetos vin en la eksteran mallumon, kie estos la plorado kaj grincado de dentoj.

Kaj vi neniel eliros el tie, ĝis vi pagos la lastan kodranton...” – saĝe avertis la Ĉiela Instruisto, antaŭ multe da jarcentoj...

..........................................................................................................................

Du faktoj profunde signifaj por la disvolviĝo de niaj fortoj, ĉe tiu alĝustiĝado al la spirita vivo, okazis en la tagoj tuj sekvintaj nian akcepton en tiun gravan transmondan institucion. Ni dediĉos ĉi tiun ĉapitron al la pli sensacia el ambaŭ, lasante al la sekvanta la raporton pri la dua okazaĵo, ne malpli grava, ĉar ja decida pro la leciono, kiun ĝi tiam havigis al ni.

Iun matenon, prezentiĝis al ni la juna D-ro Roberto de Canalejas por komuniki, ke ni estas invititaj por grava ĉi-vespera kunveno, dum kiu ĉiuj ĵusvenintoj rendevuos kun la estro de la Departemento, al kiu ni tiam estis konfiditaj, por komuninteresaj klarigoj.

Hieronimo, kies malbona humoro timige pliakriĝadis, formale deklaris sian malinklinon ĝin ĉeesti, ĉar liaopinie la nura enhospitaligo ne devigas lin al servemaĉa obeemo, kaj li aldone sciigis, ke tiumomente lia nura intereso estas ekhavi informojn pri sia familio. Sed Roberto delikate klarigis, elmontrante nenian incitiĝon, ke inviton li portas, ne ordonon, kaj ke, ĝuste tial, neniun oni devigos konsenti.

Hontigite kaj ankaŭ ŝokite de la malgentila konduto de nia kamarado, ni konsentis, montrante la plej afablan el la ridetoj, konservataj en la arkivo de malnovaj rememoroj, kaj krome dankante pro la honoro, kiun oni faras al ni.

En tiu tempo, ni jam estis submetataj al faka kuracado, kiun ni poste priparolos kaj pri kiu ankaŭ ne konsentis la eksa frato de la Sankta Triunuo, el Lisbono, kiam li eksciis, ke temas pri terapio bazita sur magnetopsikaj principoj, afero, kiun li tute ne akceptis!

Malgraŭ tio, li malpacience kaj senĝene sin turnis al la bonkora kuracisto, tuj post tiu incidento, kaj diris, jam tute forgesinte sian ĵusan, bedaŭrindan konduton:

"– S-ro Doktoro, mi nutradas la esperon, fidante la noblajn sentojn sendube ornamantajn vian tiel noblan karakteron, ricevi de Via Moŝto netakseblan komplezon..."

Roberto de Canalejas, kiu antaŭ ol fariĝi Spirito konvertita al Bono, sindona laboristo de l' Frateco, certe estis perfekta ĝentilulo en la surtera socio, apenaŭ montris neesprimeblan rideton kaj respondis:

"– Mi estas tute preta servi al vi, mia amiko! Pri kio temas?..."

"– Temas pri... Mi havas urĝan bezonon direkti ian peton al la honorinda direkcio de ĉi tiu domo... Mi afliktiĝas pro la manko de informoj pri mia familio, kiun de longe mi ne vidas... mi eĉ ne scias kiel longe!... Vane mi atendas novaĵojn... kaj jam ne restas al mi fortoj por elteni en la brusto tiun korŝiran sopiradon... Mi deziras ricevi de la alte estiminda estraro de tiu ĉi Hospitalo la permeson iri en mian hejmon kaj sciiĝi pri la motivoj kaŭzantaj tiel sendankan silenton... Miaj familianoj ne vizitas min... Mi ne ricevas leterojn... Ĉu estos eble al Via Moŝto porti petskribon al S-ro Direktoro? Ĉu la interna reglamento ne malpermesas tiun mian paŝon?..."

Ĉe tio evidentiĝis, ke la kompatinda ekskomercisto ŝajne ne faris al si ĝustan ideon pri sia situacio, kaj, pli ol siaj samsortanoj, baraktis, pro la mensa malordo, inter la statoj surtera kaj spirita.

"– Tute ne, mia kara! Estas nenia malpermeso! La direktoro de ĉi tiu institucio ĝojos aŭskulti vin!"– asertis la pacienca kuracisto.

"– Ĉu mi do prezentu hodiaŭ mem la peticion?..."

"– Mi parole komunikos vian peton... kaj Joel sciigos vin pri la koncerna decido..."

Post ĉirkaŭ du kvaronhoroj, Joel revenis en la malsanulejon por informi al la afliktita malsanulo, ke la direktoro invitas lin persone prezentiĝi en lia kabineto. La flegisto tamen montriĝis enpensiĝa, kaj sur lia vizaĝo, ordinare klara kaj ridetanta, ni trovis ian nuancon de bedaŭro.

Nia kunulo, kiu, kiel sciate, estis la plej ribelema kaj sendisciplina el la dekopo, postulis, ke Joel redonu al li la kompleton, kiun oni deprenis de li ĉe la enhospitaliĝo, ĉar estus por li abomene prezentiĝi antaŭ la ĉefo vestita per malbela malsanulkitelo, same kiel ni ĉiuj cetere troviĝis.

Kun tre serioza mieno, Joel ne volis kontraŭi lin kaj al li redonis tiun vestaĵon.

Ambaŭ eliris, kaj antaŭ ol ili trairis la vastegan galerion, al kiu estis turnitaj la pordoj de la dormejoj, jen la juna D-ro de Canalejas envenis nian ĉambron kune kun unu el niaj hindaj kuracistoj, kiu, ridetante kaj per amika tono, nin alparolis:

"– Ni venis ĉi tien, karaj amikoj, por inviti vin akompani vian kamaradon Hieronimo de Araujo Silvejra dum la migrado, kiun li provos fari. Ni scias, ke al neniu el vi plaĉas la reguloj de ĉi tiu domo, iel malhelpantaj la ricevon de detalaj novaĵoj el la surteraj regionoj. Sed konvenas al vi scii, ke tian rigoron oni starigis por via bono, kvankam ne estas formala malpermeso por nedaŭra vizito al la Tero, kiel vi post ne longe konstatos. Atentu ĉi tiun jam de vi konatan aparaton por vidado je longa distanco kaj ekde nun sekvu la paŝojn de nia amiko Hieronimo. En la okazo, se li elpetos al si la permeson, kio miaopinie estas atendebla pro lia obstina insistado, vi lin akompanos dum lia tre dezirata vojaĝo por revidi la familion, sed por tio vi ne bezonos eliri el ĉi tiu loko... Kaj morgaŭ, se vi ankoraŭ strebos en viajn hejmojn por antaŭtempa vizitado, vi estus senprokraste kontentigitaj... por ke la ribelemaj impulsoj, taŭzantaj al vi la menson, ne plu prokrastu la akiron de tiuj novaj inklinoj, kiuj al vi portos utilon en la estonteco... Ĉiuj ceteraj malsanuloj, en la samaj kondiĉoj kiel vi, en ĉi tiu momento ricevas egalan admonon..."

Li proksimiĝis al la aparato kaj per gracia lerteco donis al ĝi tian amplekson, ke ĝi povu reprodukti homan bildon laŭ ties natura staturo.

Perpleksaj, sed interesitaj, ni eliris el la litoj, kiujn ni malofte forlasis, kaj prenis lokon antaŭ la lumiĝanta ekrano. Oni nin komforte sidigis en foteloj ornamantaj la ĉambron, dum tiuj zorgemaj laboristoj de la Bono lokiĝis apud ni. Tio estis, kvazaŭ ni atendus la komenciĝon de teatra ludo.

Subite, Joel ekaperis antaŭ ni, tiel nature kaj videble, elstarante sur tiu sama plano, sur kiu ni troviĝis, ke ni kredis vidi lin iranta en la malsanulejo, aŭ ke ni mem iras post li... Li subtenis Hieronimon per la brako... direktiĝante al la servista elirejo... kaj tiel intensa fariĝis la sugestio, ke ni tuj eksteriĝis el la realo, forgesante, ke efektive ni ĉiam ankoraŭ restas komforte sidantaj en foteloj, en niaj ĉambroj...

Pli realeca ol la hodiaŭa kinematografo kaj supera al la nuntempa televidilo, tiu eksterordinara ricevilo de scenoj kaj faktoj, tiel ofte uzata en nia Kolonio kaj kiu kaŭzis al ni tiel fortan admiron, en pli progresintaj sferoj plipotenciĝas, evoluas ĝis transcendeco kiel helpilo por la instruado de Spiritoj celantaj la akiron de teoriaj scioj, kiuj en la estonteco ebligos al ili plenumi decidajn elprovojn dum la surteraj luktoj. Ĉe tia grado, ĝi kapablas traserĉi kaj selekti, en la plej foraj regionoj de la ĉiela spaco, la pasintecon mem de la tera Globo kaj de ties homaroj, ties Historion kaj ties Civilizaciojn, krom ankaŭ, se necese, la pasintecon de la individuoj, ĉar tiuj elementoj dise troviĝas kaj intermiksiĝas en la eterecaj ondoj, eterne moviĝantaj en la nevidebla mondo, en tiuj ondoj ili restas gravuritaj, reproduktitaj kvazaŭ en spegulo, kvankam en konfuziĝo, kunpuŝiĝante kun aliaj bildoj, same kiel en la homa konscio ankaŭ gravuriĝas liaj agoj, liaj ĉiutagaj faroj!

Tiele do ni trapasis kelkajn aleojn de la blanka parko kaj atingis la Centran Konstruaĵon, sidejon de la direkcio de tiu nobla legio da scienculoj-inicitoj, laborantaj en la Hospitala Departamento.

Sed alveninte, Hieronimo estis transdonita al la zorgo de unu asistanto de la direktoro, kaj Joel retiriĝis. La asistanto tuj enkondukis la vizitanton en ĉambron, kies larĝaj fenestroj rigardis al ĝardeno, vidigante la melankolian panoramon de tiu urbeto, kie tiom multe da doloroj interpuŝiĝadis!

Tio estis kabineto, iaspeca konsultejo aŭ vizitoĉambro, aranĝita laŭ perfekta hinda stilo. Ia subtila parfumo, el esenco nekonata al nia flarsento, delektis nin, samtempe kiel pligrandiĝis nia admiro al la netaksebla naturo de tiu nin servanta aparato. Malpeza kurteno el supla, dolĉe briletanta ŝtofo, svingiĝis ĉe fronta pordo kaj jen ekaperis la ĉefdirektoro de la Hospitala Departemento.

Per eksalto, la kompatinda Hieronimo, kiu jam sidis, provis ekstari, kaj lia unua movo celis la forkuron, sed lia akompananto lin retenis.

Antaŭ li staris viro, kies aĝo estis inter kvardek kaj kvindek jaroj, vestita laŭ strikte hinda maniero, surhavanta blankan turbanon, kie plej bela smeraldo stelsimile scintilis, larĝmanikan tunikon, zonon ĉirkaŭ la talio kaj tipajn sandalojn. La ovala, mildebruna vizaĝo prezentis pure klasikajn trajtojn, kaj el la lumaj, penetremaj okuloj kvazaŭ radiis inteligentaj, magnetefikaj fajreroj. Sur la ringa fingro de la maldekstra mano, altvalora gemo, simila al tiu sur la turbano, distingis lin, eble kiel majstron, disde la ceteraj anoj de tiu nobla plejado da kuracistoj servantaj en la Hospitalo Maria el Nazareto.

Tiel ravitaj kiel Hieronimo mem, ni konfesis nian fortan altiriĝon al tiu nobla figuro.

La asistanto Romeo, kiu akceptis la peticianton, senprokraste sciigis la motivon de la vizito:

"– Kara frato Teokrito, jen nia zorgato Hieronimo de Araujo Silvejra, kiu nin tiom maltrankviligas... Li deziras viziti la familion en la surtera medio, asertante, ke la obeo al la reguloj de nia institucio transpasas la limojn de lia rezignaciemo... Pro tio li

preferas la amasiĝon da ĉagrenoj, al la atendo de oportuna okazo por efektivigi sian deziron...”

La prezentito nerespekte interrompis, regata de nervozeco:

“– Ja tio estas la ĝusta esprimo de la vero, Via Moŝta Princo! – ĉar li kredis, ke li troviĝas antaŭ ia regnestro. – Mi preferas denove barakti en la kirlo da doloroj, el kiu mi antaŭ ne longe eliris, ol plu elporti la kruelan sopiradon, kiu min turmentas, pro la manko de sciigoj pri mia familio!... Se do ne estas nefleksebla malpermeso por tia ebleco en la regularo, mi petegas Vian Moŝton pri la favorkora konsento, ke mi revidu miajn gefilojn!... Ho miaj karaj filinoj! Kiel ĉarmaj ili estas, sinjoro! Tri filinoj kaj unu sola viro: – Arinda, Marieta, Margareta, sepjara kiam mi ŝin forlasis, kaj Albino, jam dekjara!... Mi suferas de tiom da sopirado, Sinjoro mia Dio!... Mia edzino, bela virino, nomiĝas Zulmira! Tre bonedukita ŝi estas!... Mia aflikto estas ekstrema! Mi ne sukcesas havigi al mi trankvilon por la necesa konsidero pri mia nuna stranga situacio!... Tial mi humile petegas Vian Moŝton pri kompato al miaj turmentoj!”

La fajrerantaj okuloj de la ĉefo de la kuracista legio kompateme turniĝis al tiu maltrankvila Spirito, ankoraŭ bezonanta longan tempon por lerni la memregadon. Kortuŝite ĉe la mensa malordo de la peteganto, li fiksis sur lin bonkoran rigardon, antaŭvidante lian longan, luktoplenan vojon, al li konvenan tiel longe, ĝis li sukcesos atingi la feliĉigan staton de rezignaciemo aŭ kontentiĝemo! Hieronimo, kredante, ke li renkontos la malmodestecon de la surteraj burokratoj, hardiĝintaj en sia ordinara burleska fanfaronado, al kiu li estis kutiminta, surprizite rimarkis en tiu penetrema rigardo la humilecon de larmo pendanta en la okuloj.

La nobla viro lin dolĉe prenis per la brako, sidigis lin antaŭ si sur komforta kuseno, dum Romeo, staranta, respekteme observis. La hindo proponis al la sinmortiginto tason kun kristalpura akvo, kiun li mem ĉerpis el eleganta kruĉo, brilanta kiel sunkaresata nebulo. Ne povante rifuzi, la portugalo trinkis

ĝin kaj poste, iel kvietigita, prenis teniĝon de atendo ĉe sia ĵus farita peto.

"– Mia amiko! Mia frato Hieronimo! – komencis Teokrito. Antaŭ ol respondi ĉi tiun version de via petego, mi devas klarigi, ke mi tute ne estas, laŭ via supozo, ia princo, kaj do mi ne kuntrenas tiun Moŝtan titolon. Mi simple estas Spirito, iama homo! kiu, vivinte, suferinte kaj laborinte dum multe da surteraj ekzistadoj, lernis, dum tiu irado, ion rilatan al la Tero mem. Servanto de Jesuo Nazaretano – ja tio mi havas la honoron esti, kvankam tre modesta, malmultmerita, havanta multajn mankojn! la humila laboristo, kiu apud vi, suferantaj animoj, provas fari la unuajn paŝojn en la kultivado de la Vinberejo de la Dia Majstro; provizore komisiita, laŭ Lia milda decido, por servadi al Maria el Nazareto, Lia respekteginda Patrino!

Inter ni ambaŭ, Hieronimo – mi kaj vi –, malgranda estas la diferenco, ne tre longa la distanco: – vivinte pli multajn fojojn sur la Tero, mi tial pli multe suferis, iom pli longe laboris, kaj do lernis pli facile rezignacii, ĉiam rezigni pro amo al Dio, kaj regi la proprajn emociojn; mi observis, luktis pli fervore, tial mi havigis al mi pli grandan sperton. Mi ne estas, kiel vi vidas, suvereno de ĉi tiu regiono, sed ja simpla laboristo de la Legio de Maria – Maria, la sola Suverena Majesto reganta ĉi tiun Korektan Institucion, en kiu vi provizore loĝas! Unu via pli maljuna frato – jen mia vera karaktero, ja tia vi devas rigardi min!... sincere deziranta helpi vin por la solvo de tiuj gravaj problemoj, en kiuj vi implikiĝis... Nomu min do *frato Teokrito*, kaj vi pravos..."

Li faris mallongan paŭzon, turnante siajn belajn okulojn al la nebuleca vastaĵo vidata tra la fenestroj, kaj daŭrigis kortuŝita:

"– Ĉu vi do deziras revidi viajn gefilojn, Hieronimo?!... Estas juste, mia amiko! La filoj ankaŭ estas partoj de nia morala esto, kies amo ravas nin per plej altaj emocioj, sed kiu ne malofte ankaŭ nin kondukas al la konsterno de profundaj ĉagrenoj! Mi komprenas viajn fervorajn sopirojn de amoplena patro, ĉar mi scias, ke vi amis viajn gefilojn sincere kaj sindone! Mi konas la

akrecon de viaj duboj nun, kiam vi troviĝas disigita de tiuj karaj estuloj, kiuj tie restis, en Porto, orfaj je via gvido kaj je via protekto! Kiel vi, Hieronimo, mi estis patro kaj ankaŭ amis! Estas plej juste do, ke mi, valorigante viajn inklinojn laŭ la grado de la miaj, laŭdu vian aspiron anstataŭ ĝin riproĉi, ĉar ĝi forte atestas pri via respekto al la Familio! Sed mi neniel konsilus vin ŝanĝi ĉi tiun domon, en kiu vi tiel pene releviĝas, por la pereigaj influoj de la surteraj medioj, eĉ se nur dum unu horo! eĉ por tio, ke vi serĉus informojn pri viaj gefiloj!...”

“– Sinjoro! Kun la respekto, kiun meritas via aŭtoritato, mi petegas vin pri kompato!... Ĝi estos nedaŭra vizito... Kaj mi donas al vi mian vorton de honoro, ke mi nepre revenos... ĉar mi bone scias, ke mi estas nenio alia, krom arestito...”– ankoraŭ kontraŭstaris la obstina senpacienculo, denove baraktante en la mensaj konfuzoj, en kiuj li emis implikiĝi.

“– Eĉ tiel mi ne aprobas la efektivigon de tiu deziro nun, kvankam mi ĝin opinias justa... Bridu iom pli la impulsojn de via karaktero, mia Hieronimo! Lernu regi la emociojn, reteni la sopirojn, ilin transformante en saĝajn aspirojn, sub la sankta protekto de la Espero! Memoru, ke ĝuste tiaj impulsoj, senprudentaj, bazitaj sur la nerezignaciemo, sur la malpacienco kaj sur misuzo de la juĝokapablo, ĵetis vin en la perfortecon de memmortigo! Vi ja vidos viajn gefilojn! Sed, por via propra bono, mi petas, ke vi konsentu prokrasti la deziratan projekton ĝis post kelke da monatoj... kiam vi estos pli bone preparita por alfronti la sekvojn de via senbrida ago! Konsentu, Hieronimo, submetiĝi al la kuracado konvena al via stato, al kiu viaj kamaradoj volonte submetiĝas, fidante al tiuj lojalaj servistoj, kiuj ame kaj sindone deziras vin ĉiujn helpi! Akceptu la inviton por tiu hodiaŭa nokta kunveno, ĉar el ĝi vi ĉerpos grandan bonon... dum ia vizito al la Tero en ĉi tiu momento, la kontakto kun la familio, en via nuna nefirma situacio, malhelpos la mildajn, jam ellaboritajn planojn por vin konduki al la tiel bezona reordigo de viaj fortoj...”

"– Sed... Mi ne akiros, Sinjoro, serenecon por ia ajn estonta projekto, ĝis mi havigos al mi la deziratajn informojn!... Ho Dio el la Ĉielo! Greta, mia plej juna infano, kiu tie restis, sepjara, tiel blonda, tiel bela!..."

"– Ĉu vi jam pensis peti helpon al la patra grandanimeco de la Ĉiopova Sinjoro, ke vi estu forta por rezignacia, tre prudenta atendo, kiu ja kroniĝos per sukceso?... Ni celas vian bonstaton, Hieronimo, nia deziro, estas konduki vin al tia situacio, kiu havigu al vi kelktempan pacon por via nepre necesa rehono–rindiĝo... estas necese, ke vi havigu al vi bonvolon por altiĝi al la Bono! Praktiku la preĝon... penu agordiĝi al la superaj vibroj kapablaj instigi vin al elaĉetaj realigoj... Estas nepre necese, ke vi tion faru meminiciate kaj libervole, ĉar ni povas nek vin devigi, nek mem fari anstataŭ vi... Vi do rezignu tiun kontraŭefikan projekton, kaj konfidu nian volontecon helpi kaj protekti vin..."

Sed la ekskomercisto el Porto estis nekonvinkebla. Lia rebelema kaj perfortema karaktero, kiu pro impeto de pereiga obstino, preferis morti, ol lukti, por alfronti la malfeliĉan situacion ĝis li ĝin korektos kaj venkos, senpacience rediris, ne konsciante la altan esprimon de la karitato, kiun oni faris al li.

"– Mi konfidos, sinjoro... frato Teokrito... se necese, mi rampados ĉe la piedoj de vi ĉiuj!... sed nur post kiam mi revidos miajn karulojn kaj sciiĝos pri la motivoj, kial ili forlasis min, por ke mi iel trovu kompenson al tiu min disŝiranta sopirado..."

Plenuminte sian devon de konsilanto, Teokrito komprenis la vanecon de insistado. Rigardante la zorgaton, kiu verŝadis abundajn larmoj, li malĝoje murmuris, dum Romeo kompateme balancis la kapon:

"– Vi eldiras profundan veron, kompatinda frato! Jes! Nur poste!... Nur poste vi trovos la vojon al rehonorindiĝo!... Estas karakteroj, kiujn nur la akraj pikiloj de la doloro estos sufiĉe potencaj por korekti kaj konduki al la Devo!... Vi ankoraŭ ne

sufiĉe suferis por konscii, ke vi devenas de Ĉiokompatema Patro!...”

Li dum momento fariĝis enpensa, kaj plu parolis:

“– Ni povus eviti tiun incidenton, malpermesi la viziton kaj puni ĉi tiun vian agon. Por tio ni havas aŭtoritaton kaj rajton. Sed vi ankoraŭ estas tro materieca, vin ankoraŭ regas multe da surteraj antaŭjuĝoj, por ke vi povu kompreni nin!... Cetere, niaj procedoj, persvadaj, ne trudaj, estus neakordigeblaj kun ia necedema malpermeso, kiom ajn ĝin pravigus la Prudento... Sed mi konsultos niajn Gvidantojn en la Templo, kiel ni ja devas ĉe tiaj problemoj, kian vi ĵus estigis...”

Li enfermiĝis en sekretan ĉambron apudan al la konsultejo, kaj profunde enpensiĝinte, ekkomunikiĝis kun la supera direkcio de la Kolonio, kun sidejo en la regiono kie situis la Templo. Post mallonga spaco da tempo, li revenis kaj informis pri la fina decido:

“– Niaj plej altaj gvidantoj konsentas al vi liberecon de agado. Kvankam estulo, en tia situacio kiel vi, ne povas ĝui la naturan liberecon de la Spirito liberiĝinta de la karna jugo, tamen ni ankaŭ ne povas perforte trudi al vi devojn, kies plenumadon vi abomenus. Vi ja vizitos viajn karulojn sur la Tero... Vi do iros al Portugalujo, en la urbon Porto, kie vi loĝis, en Lisbonon, kiel vi deziras... Kaj ĉar la patra kompatemo de la Kreinto ofte eltiras el kondamninda aŭ senprudenta ago utilan lecionon por la kulpinto mem aŭ por ties observanto, tial mi estas certa, ke via senprudenteco ne estos senfrukta por vi mem kaj samtempe havigos amason da profundaj avertoj al ĉiuj, kiuj ilin akcepteme ekscios. Sed atentu la jenon, kara Hieronimo: – Rifuzante niajn konsilojn kaj ribelante kontraŭ la regularo de ĉi tiu Institucio, vi faras kulpon, kies sekvoj falos sur vin mem. Tiun viziton vi faros sub via ekskluziva respondeco! Ne estas permeso por ĝi: – ĝin trudas ja via libervolo! Se la ĉagrenoj el ĝi rezultontaj transpasos la limojn de via sufereltena kapablo, vi devos plendi kontraŭ vi mem, ĉar niaj klopodoj nur celos la mildigon de la malfeliĉoj

kaj ties evitigon, se nenecesaj... Jen kial ni ne konsentas havigi al vi la deziratajn informojn pere de la disponeblaj rimedoj... ĉar la vero estas, ke, por ilin ricevi vi tute ne bezonus forlasi ĉi tiun lokon...”

Sin turninte al la asistanto, li plu parolis:

“– Preparu lin por la veturo... kontentigu liajn surterajn mondumajn kapricojn... ĉar tre baldaŭ li ĉagreniĝos pri la Tero... Lasu lin agi laŭ sia plaĉo... Amara estos la leciono, sed ĝi liveros al li pli fruan komprenon kaj sekve progreson...”

.......................................................................................................................

Ekestis paŭzo en la prezentado de la sinsekvaj okazaĵoj. Spertante grandan korprematecon, ni samtempe mallaŭdis nian kamaradon pro lia kapricema konduto. Ni interkonsente atribuis al la malbona edukiteco de Hieronimo tiun evidentan malobeon al la regularo de la nobla institucio, sed nian paroladon interrompis la ĉeestantaj servantoj:

“– Sendube, la socia bonedukiteco multe helpas al adaptiĝo al la spiritaj medioj. Sed ĝi ne prezentas ĉion. La elpurigitaj sentoj, la menso harmonianta kun noblaj principoj, la bonaj kvalitoj de la karaktero kaj de la koro, kiuj kune konsistigas la moralan “bonedukitecon”, jen la bazo por promesplena situacio en la Transtombo... se nur memmortigo ĝin ne nuligos...”

“– Ĉu la estroj de ĉi tiu domo ne povus liveri la deziratajn sciigojn, tiel evitigante al la malsanulo la riskon de ia vojaĝo, alportonta gravajn difektojn al li ĝenerala stato?...”– mi scivole demandis.

“– Jes, se tiaj sciigoj kontribuus al la bonstato de la paciento. Cetere, al estuloj en viaj kondiĉoj preskaŭ ĉiam konvenas sin deteni de ŝokoj aŭ emocioj, kiuj nutrus ilian staton de eksciteco... Novaĵoj el la Tero neniam alportos ian konsolon al ni, loĝantoj de la Spirita Mondo! En ĉi tiu kazo, estas evidente,

ke la direktantoj de la institucio deziras kaŝi de la kompatinda malsanulo ion, kio sennecese lin profunde vundos. Se li volonte submetiĝus al la protektaj regularoj, la realaĵon, kiun li post ne longe ĉeestos, li konus en la tempo, kiam li estus sufiĉe preparita por ĝin alfronti, kio evitigus al li tre dolorajn skuojn. Sed lia ribelemo metas lin en tre delikatan situacion, ĉar li transdoniĝis al siaj propraj senprudentaĵoj, kiuj perforte efektivigos ĉe li tiun edukan laboron, kiun liaj konsilantoj farus milde kaj amoplene...”

Sed, jen ni denove rimarkis moviĝon sur la lumanta plato de la bildricevilo. Kaj tio, kio tiam montriĝis, tiele transpasis la limojn de nia atendo, ke ni eksuferis kun la malfeliĉa Hieronimo la dramajn situaciojn, kiujn lia familio travivis post lia morto.

..........................................................................................................................

La asistanto Romeo ekspedis instrukciojn al la Departemento de Viglado, kiu respondecis pri ĉiuj servoj ekster la Kolonio. Olivier de Guzman, lia zorgema direktoro, petis la Sekcion de Eksteraj Rilatoj pri disponigo de du gardistoj, gvidantoj, de elpruvita kompetenteco, por akompani la vizitanton al la Tero, ĉar ne akcepteblus lasi, ke zorgato de la Legio de la Servantoj de Maria, ankoraŭ sensperta kaj malforta, risku sola la danĝeron de unu tia ekskurso.

Prezentiĝis – Ramiro de Guzman –, en kiu ni rekonis la estron de tiuj ekspedicioj, kiuj vizitadis la Sinistran Valon, ankaŭ sub kies zorgo ni eliris el tie; kaj alia, kies nomon ni ne sciis, ambaŭ surhavantaj tiun jam popularan veston de hindaj inicitoj.

Ni komencis kompreni, ke en tiu modela institucio la avangardaj postenoj, portantaj plej gravan respondecon; la malfacilaj taskoj, postulantaj pli multe da energio, volo, scioj kaj virtoj, estas komisiataj al tiuj allogaj, belkarakteraj personoj, ĉe kiuj ni, ekde la unuaj tagoj, konstatis altajn kvalitojn, intelektajn kaj moralajn.

Sub la estreco de Olivier estis organizita inda ekspedicio, al kiu ne mankis eĉ la soldata eskorto.

Dume, sentebla ŝanĝo fariĝis en la manieroj de la kompatinda Hieronimo. La memobseda penso pri vizito al la familio, perturbante al li la fakultojn, faris lin senatenta al ĉio ĉirkaŭa, revenigante lin, pli forte ol iam antaŭe, al lia pasinta homa pozicio: – riĉa burĝo en Portugalujo, vinkomercisto ĵaluza pri la socia reputacio, sklavo de la antaŭjuĝoj, amoplena, fervora familiestro. Ni nun vidis lin surhavanta bonkvalitan redingoton, belan kravaton, orkapan bastonon, kaj portanta sub la brako bukedon da rozoj por donaci al la edzino, ĉar ĉion ĉi li postulis de la pacienca zorgemo de Joel, al kiu oni rekomendis kontentigi ĉiujn liajn dezirojn. Kaj niaj mentoroj, kiuj troviĝis en la malsanulejo, komprenante nian miron, klarigis, ke la vulgaraj aŭ la tre homecaj Spiritoj nur tre malrapide sukcesas liberiĝi de tiuj etaj frivolaĵoj nedisigeblaj de la surteraj rutinoj.

Vojaĝante, sub severa gardado, en diskrete fermita veturilo, Hieronimo vere similis ian arestiton, sed tion li ne konsciis. Ŝajnis, ke, pro sia profunda absorbiteco, li eĉ ne rimarkis la ĉeeston de Ramiro kaj ties adjutantoj, kredante, ke li faras vojaĝon similan al multaj aliaj, kiujn li iam laŭkutime entreprenis.

La veturilo ruliĝis senŝanĝe. Se ne ĉeestus la gardistoj, kiuj konstante memorigis pri la spirita naturo de tiu sceno, ni asertus, ke tiu kaleŝo tute ne estas ia “duonmateria kreaĵo”, kian necesigas la edukaj metodoj de la Transtombo, sed ja ia tre peza kaj komforta transportilo, pri kiu oni facile supozus, ke ĝi apartenas al la Tero mem.

Ni vidis, ke ili trapasas vojojn ombroplenajn, interkrutejojn kovritajn per plumbaj neĝtavoloj, intermontojn, kotajn valojn similajn al mornaj maĉoj, kaj tiuj bildoj lasis nin maltrankvilaj pro tio, ke, laŭ la klarigo de la komplezemaj asistantoj, tiuj panoramoj estas malpurmensaj kreaĵoj de surteraj homoj kaj de malfeliĉaj elkarniĝintoj, ankoraŭ alkroĉitaj al la trivialaj manifestiĝoj de la penso. Sed ili ankaŭ traveturis aĉajn domarojn,

similajn al mizeraj vilaĝoj, loĝatajn de estuloj apartenantaj al la plej malsuperaj regionoj de la nevidebla Mondo, de elkarniĝintaj banditoj kaj krimulaj hordoj, kiuj maliceme kaj kolere impetis kontraŭ la kaleŝo kun la intenco ĝin ataki pro la certeco, ke en ĝia interno troviĝas estuloj pli feliĉaj ol ili. Sed la purblanka flago, prezentanta la emblemon de la respekteginda Legio, igis ilin timoplene returniri. Multaj el tiuj estontaj pentantoj kaj regeneriĝintoj – ĉar ili ja devenis, kiel ĉiuj ceteraj kreitoj, el la Amo de ia Kreinto Superega Justa kaj Bona, kaj tiel ja emis al la progreso kaj al la morala renoviĝo –, kiuj ankoraŭ konservis la kutimon, tiel ordinaran sur la Tero, uzi ĉapelon, ĝin demetis omaĝe al la respektinda nomo elvokita de la flago, dum aliaj foriĝis kriante kaj plorante, dirante blasfemojn kaj sakraĵojn, kio al ni kaŭzis miregon kaj kompaton. Plu ruliĝis la veturilo, sed ĝiaj okupantoj sin turnis al neniu el ili, estante certaj, ke por iliaj koroj, ŝtoniĝintaj en la malbono, ankoraŭ ne sonis la horo ricevi helpon por memvole celi sian rehonorindiĝon.

Subite, ekkrio unisona, kvankam diskreta, eliĝis el niaj brustoj, kvazaŭ singulto el tenera sopiro, dolĉe vibrante en la malsanulejo:

– Portugalujo! Amegata Patrolando! Portugalujo!...

– Ho Dio el la Ĉielo!... Lisbono! Jen Taĥo, fiera kaj bela!... Porto! Porto, elvokanta tiel karajn rememorojn!...

– Dankon, Sinjoro Dio!... Dankon pro la favoro, ke ni revidas nian naskolandon post multjara forestado kaj tumulta resopirado!... Kaj ni ploris kortuŝitaj, dankoplene emociitaj!

Efektive, portugalaj pejzaĝoj, ĉiuj tre karaj al niaj dolorplenaj koroj, nin ĉirkaŭis, kvazaŭ ni, kiel komence asertis la ĉeestantaj mentoroj, apartenus al la akompanantaro de la kompatinda Hieronimo!

Ju pli funde, pro la bonegeco de la ricevilo, nin regis la konsola sugestio, des pli intensiĝis en niaj fakultoj la impreso, ke ni persone atingas la portugalan landon, dum la vero estis, ke ni ne eliris el la Hospitalo!...

La svage fora silueto de la urbo Porto pale ekkonturiĝis en la malgajaj brumoj, envolvantaj la surteran atmosferon, kvazaŭ desegno krajonita sur griza tolo. Nelonge pasis kaj jen la stranga karavano paŝis en la urbaj stratoj, kvazaŭ ili irus en la regiono mem de la Viglado, kio tre edifis nin.

Iuj portugalaj arterioj, malnovaj konatoj de nia tumulta pasinteco, preterpasis antaŭ niaj okuloj nebuligitaj de emocia ploro, kiel se ni ankaŭ ilin trairus. Tre ekscitita, antaŭsentante la realecon de tio, kion malbonaŭgura korpremo sekretis al lia animo, kaj kiun nur freneza timego antaŭ la fatalo provis obstine kaj vane kaŝi, Hieronimo, haltinte antaŭ bonaspekta domo kun ĝardenoj kaj balkonoj, haste supreniris la peronon, dum liaj protektantoj karitate alprenis atendan teniĝon.

Tio estis lia iama loĝejo.

La eksa vinkomercisto senĝene eniris, kaj la unua impulso de lia sopiranta koro celis la malpli aĝan filinon, al kiu li plej pasie sin tiris:

"– Greta, ho mia kara filineto! Jen via paĉjo, Greta!... Greta?!..." – tiel li ŝin vokis, kiel iam, kiam ĉiuvespere li revenis al la hejmo post la penigaj tagaj laboroj.

Sed neniu respondis al liaj amoplenaj alvokoj! Nur malatentemo, la ĉirkaŭa seniluziiga soleco, aŭguris malfeliĉojn eble ankoraŭ pli akrajn ol tiuj, kiujn lia koro ĝis nun eltenis, dum en la sentimentalaj profundaĵoj de lia animo, turmentata de multaj ĉagrenoj, senkonsole tondris la amaj, sed vanaj, krioj de lia patra karesemo, nun sen la respondoj de la preferata infano, jam forlasinta tiun lokon, kiu al li iam estis tiel kara!

"– Greta!... Kie vi estas, filineto?... Greta!... Estas via patreto mem, kiu alvenas, mia filino!..."

Li serĉis ŝin tra la tuta domo. Ŝajnis tamen, ke malaperis de sub la suno tiuj sanktegaj pecoj de lia animo, kiujn li tie forlasis, kaj ke li, la sola postvivinto de ia senmezura katastrofo, ne povas sin akomodi al tiu frakasa realaĵo, nome revidi neloĝata, dramece malplena, la hejmon, kiun li amegis!

Li alvokis la edzinon, kriis la nomon de ĉiu filo, unu post alia, kaj fine kriege vokis la servistojn: – Neniun li vidis!

Sed strangaj ombroj kaj figuroj, moviĝantaj en la ĉambroj, kiuj iam apartenis al lia familio, indiferente lasis lin kriadi kaj demandadi, ne degnante respondi nek perceptante lian aleston... ĉar tio estis enkarniĝintaj estuloj, la novaj loĝantoj de la domo, kiu iam apartenis al li! La meblaro mem, la interna dekoracio, ĉio ŝanĝigis, vidigante ian efektivon, kiu lin konfuzis. Korŝira elreviĝo pikis lin per trafa bato, forpelante el lia animo la komencan entuziasmon kaj permesante, ke korpremaj induktoj lin regu ĉiam pli kaj pli forte. Rimarkinte, ke sur la muroj de iu ĉambro pendas pentraĵoj al li nekonataj, li fiksis sian rigardon sur kromolitografo ĉe angulo de la kameno, kies kalendaro montris la daton de la kuranta tago. Li legis:

*– 6a de Novembro 1903 –*

Neretenebla terurtremo morne trakuris liajn vibrokapablojn. Por eksterordinara streĉo, li elmovis kaj prifosis rememorojn, forskuante de la menso la polvon de milo da konfuzaj ideoj, malklarigantaj lian rezonadon. La kapturna surprizo antaŭ tiu senrimeda realaĵo, kies konscion li ĝis nun prokrastis per malcedema elpensado de naivaj sofismoj, ŝancelis al li la prudenton: – de longe li ne ekpensis informiĝi pri datoj! La vero estis, ke li perdis ĉian ideon pri tempo, envolvite en la kirlo el malfeliĉoj, kiuj lin trafis post lia fatala ago de dizertinto el la surtera vivo! Tiel akra fariĝis la frenezo, en kiu li baraktis post la tragika momento, kiam li provis sinmortigi; tiel grava la malsano, kiu lin trafis post la ŝoko pro la penetro de la pafaĵo en lian cerbon, ke pro la rezultintaj turmentoj li perdis la kalkulon de la tagoj, deflankiĝis funden en la Nekonatan, ne plu konsciante, ĉu la tagoj estas noktoj, ĉu la noktoj estas tagoj... ĉar en tiu abismo, kie li longe restis malliberigita, la sola vidaĵo estis mallumo! Por li, por lia perceptopovo sufokita de la malespero,

la surtera kalkulado de la Tempo ankoraŭ ne transpasis tiun fatalan tagon, ĉar li memoris neniun alian, kiu ĝin sekvus:

*– 15a de Februaro 1890 –*

Kaj jen tiu kalendaro antaŭ li, indiferenta sed signifoplena, servante al grandioza celo, malkaŝis al la turmentato, ke li estis for de sia hejmo dum dek tri jaroj!

Batite kaj terurite ĉe la kunpuŝiĝo de la pasinteco kun la realeco de l' nuno, kun la menso taŭzita de neforpelebla senkonsoleco, li kuregante sin ĵetis al la strato. Li demandos la najbarojn pri la loko, kie troviĝas la familio, ĉar ili certe transloĝiĝis dum lia foresto. Sed la lancistoj, starantaj ĉe la pordo, per krucado de siaj armiloj formis netranspaseblan barilon, haltigante al li la senpripensan forkuron kaj devigante lin eniri en la veturilon. Ĉe la impresaj plendkrioj de la kompatinda, kiu ne submetiĝas al tio, kion li opiniis malliberigo, alsvarmis scivoluloj kaj senokupuloj de la nevidebla mondo, Spiritoj ankoraŭ loĝantaj en la mallumaj spiritaj regionoj de la Tero. Inter mokoj, insultoj kaj ridegoj, ĉi tiuj lin turmentadis per kulpigoj kaj riproĉoj kaj samtempe informis lin pri tio, kio okazis al tiuj, kiujn li serĉas. Ramiro de Guzman kaj liaj adjutantoj ne interhelpis por evitigi al li la ĉagrenan paroladon, ĉar pri tiu vizito li mem respondecas, kaj la sola rekomendo estis, ke oni garantiu al li la revenon en la kolonion post ne multaj horoj.

"– Ĉu vi ja deziras ekscii, kie troviĝas via tre amata familio, ho malŝatinda princo de la bonaj vinoj?!... – koler-blekadis tiuj malfeliĉuloj. – Sciu do, ke ĉiuj antaŭ multe da jaroj estis forpelitaj el ĉi tiu loko!... Viaj kreditoroj forprenis de ili la domon kaj tiuj malmulton, kiun vi lastahore kaŝkolektis por viaj filoj! Serĉu vian Albinon en la Lisbona Prizono! Vian "Gretan" ĉe la stratkloakoj de la Ribejra Kajo, kie ŝi vendas fiŝojn, transportservojn kaj amoron al tiuj, kiuj bonvolas pli malavare rekompenci, ĉar ŝin ekspluatas la patrino mem, via edzino

Zulmira, kiun vi kutimigis al lukso, translimanta viajn havaĵojn kaj kies orgojlo neniam permesis al ŝi alkonformiĝi al honesta laborado kaj al malriĉeco!... Viaj filinoj Marieta kaj Arinda?... Ho ve! la unua, kiu edziniĝis, estas superŝarĝita per malsanaj filoj, baraktas en mizero, suferante pro malsato kaj batoj de krudaĉa, ebriiĝema edzo... La dua... frotlavas plankojn, briligas marmitojn kaj poluras la botojn al malpuregaj vojaĝantoj ĉe lastklasaj hoteloj! Ĉu vi miras, ke vi aŭdas tion?... Ĉu vi tremas kaj teruriĝas?... Kial?... kian efektivaĵon vi esperis?!... Ĉu ne tian heredaĵon vi al ili postlasis per via sinmortigo, kanajlo?!...”

Kaj ili ekofendis la malfeliĉan per insuloj kaj riproĉoj, kvazaŭ senkompata prifajfado, intencante ataki la veturilon kaj el tie lin forpreni, sed tion malhelpis la protektanta gardistaro.

Malgraŭ tio, la ribelema zorgato de la Legio de la Servantoj de Maria postulis, ke oni lin konduku al la loko kie troviĝas tiu filo, kiu estis la espero de lia vivo, tiu ido plej kara, kiu ankoraŭ travivadis la delikatan floradon de la aĝo dekjara, kiam li, lia patro mem, decidis pere de sinmortigo lin forlasi al la danĝeroj de la orfeco.

Sub la konvulsia ardeco de stranga ploro, li rimarkis, ke oni lin kondukas kaj ke li enveturas trans la mornaspektajn murojn de ia malliberejo, ne povante tamen distingi, ĉu li troviĝas en Porto aŭ ja en Lisbono.

Efektive! Enfermita en ombra karcero, tie restis Albino, kiu implikiĝinte en krimojn de ĉantaĝo kaj rabo, estis kondaminita al izola malliberigo dum kvin jaroj kaj, kiel rekulpinto pri tiuj eraroj, al samjara punlaboro en Afriko! Malgraŭ la frapanta diferenco pro dektrijara disiĝo, Hieronimo rekonis la filon, kiu, malpurega, pala, kadukigita de la malliberejа severeco, brutigita de suferado kaj mizero, prezentis la tragikan bildon de homo, kiun difektis la malvirtoj!

La eksa komercisto rigardadis, en la duonlumeco de la karcero, la mizeran figuron, sidantan sur ŝtonbenko kaj havantan la vizaĝon inter la manoj. El liaj senesprimaj okuloj, fiksitaj sur

la slaboj de la grundo, ruliĝis malesperaj larmoj, per kio la sinmortiginto komprenis, ke la junulo profunde suferas. Tra la menso de la enkarcerigito defiladis longa vico da nigraj pensoj, kaj dank' al la magneta altiriĝemo ekzistanta inter ambaŭ, la gasto de la Hospitalo Maria el Nazareto povis ekscii pri la kortuŝaj peripetioj, trenintaj la junulon en tiel bedaŭrindan krepuskon de la socia vivo, apenaŭ ĉi tiu eliris el la infaneco! Kvazaŭ la alesto de la turmentata animo de Hieronimo sorbigus telepatiajn sugestiojn al liaj sentivaj kapabloj, Albino komencis rememoradi, ne sciante, ke li tiel kontentigas la dezirojn de sia patro, kiu celis informiĝi pri la okazintaĵoj. La junulo, hontante pri la faritaj kulpoj, rememoris la patron mortintan antaŭ dek tri jaroj kaj en penso diradis al si mem, kun la vizaĝo banata per ardantaj larmoj, dum Hieronimo lin aŭdis, kvazaŭ li parolus per laŭta voĉo:

"– Pardonu min, Sinjoro, mia bona Dio! Kaj helpu min, per via Favorkoreco, en ĉi tiu dolora krizo de mia vivo! Tute ne estis mia deziro, ĵeti min en tian senrevenan abismon, kiu min por ĉiam makulis. Mi volis esti bona, mia Dio! sed al mi mankis bonkoraj amikoj, kiuj donus al mi helpemajn manojn, oportunojn, kiuj malfermus al mi honestajn perspektivojn! Post la morto de mia patro, mi, sensperta kaj sendefenda infano, vidis min ĵetita en forlasiteco! Mi ne havis la rimedojn por instruiĝi kaj tiel min kapabligi al io honesta kaj digna! Mi suferis malsaton! Kaj malsato samtempe turmentas la korpon kaj venenas la koron per ekscitado al ribelemo! Mi travivis la nigran aflikton de la mizero sen esperoj nek paŭzoj, de soleco de orfo mordata de la sopiroj pri la pasinteco, kadukiĝinta en la plena aŭroro de la vivo pro la seniluziiĝo el multoblaj ĉagrenoj! Mi ne povis alproksimiĝi al la bonaj, al la honestaj kaj respektindaj, celante ke ili min komprenu kaj helpu por la peniga konkero de digna estonteco, ĉar tiuj niaj malnovaj amikoj, kiujn mi kun konfido serĉis, min suspekteme forpuŝis, opiniante, ke mi apartenas al senhonorigita posteularo, ĉar, krom ĉio ĉi, mia patrino ekprenis

malĉastan konduton, tuj post kiam ŝi vidis sin senprotekta kaj sola! Mi fariĝis viro post frapiĝado kontraŭ la plej malbonaj aspektoj kaj elementoj de la socio! Mi bezonis vivi! Vipadis min la ofendita fiereco, la nebridebla ambicio liberiĝi de tiu abomeninda mizero, kiu min persekutis ekde la sinmortigo de mia kompatinda patro! Forlogis min tentoj ja malicaj sed kiuj antaŭ miaj neklereco kaj malforteco montriĝis kiel savantaj solvoj!... Kaj mi cedis al ilia delogo, ĉar mi ne havis la gvidan protekton de iu vera amiko, kiu al mi montrus la ĝustan elektindan vojon!... Ho mia Dio! Kiel malĝoja estas la orfeco de homo forlasita, ankoraŭ en la infaneco, en tiu ĉi mondo plena de hontegindaĵoj!... Ho mia kara kaj kompatinda patro, kial vi vin mortigis, kial?... Ĉu vi do ne amis viajn gefilojn, kiuj ja falis en malfeliĉegon pro via morto?... Kial vi vin mortigis, mia patro?... Ho, eĉ ne kompaton vi sentis al ni? Kiel ofte mi memoras vin!... Multajn fojojn, en la komenco, mi ploris senkonsola pro sopirado pri vi, kiu estis tiel bona al ni, viaj filoj!... Se vi amis nin, kial vi vin mortigis, kial?... Kial vi preferis la morton, ĵeti nin en mizeron kaj forlasitecon, ol lukti pro amo al ni? Kial vi ne kontraŭstaris la ĉagrenon, antaŭvidante, ke via eraro ruinigos viajn malfeliĉajn gefilojn, kiuj nur pri vi kalkulis en tiu ĉi mondo? Se vi estus viva kaj tiel elplenuminta nian edukadon, hodiaŭ mi certe estus homo utila, honesta kaj respektata, dum efektive mi estas nenio alia ol ia sendignulo, makulita de neriparebla malhonoro!...”

Tio estis ombraj, kaŭstikaj vibroj, kiuj refrapis en la konscienco de la memmortiginto, kiel se stiletoj ŝirus al li la koron! Li sin rigardis la sola kulpinto pri la neripareblaj malfeliĉoj de la filo, kaj tia konvinko pliintensiĝis, per torturaj diastoloj, laŭgrade kiel la rememoroj, emerĝinte el la ardeganta menso de Albino, preterpasis, kvazaŭ eltranĉaĵoj el doloraj epizodoj, antaŭ liaj teruritaj okuloj de dizertinto el la Devo! Neniam, sur la Tero, iun homon trafis, antaŭ justica tribunalo, tiel signifoplena akto de akuzado, kiel tiu, kiun la malfeliĉa sinmortiginto kontraŭ

si mem faris, validigante raporton pri tiuj malfeliĉoj, kiujn priskribis la rememoroj de lia filo, kaj kiujn la ombroj de la prizono garnis per la nigraj ornamoj propraj al la profundaj kaj senrimedaj dramoj!

Senkosila, li sin ĵetis al la junulo kun la neretenata deziro kompensi tiun multon da tiel profundaj ĉagrenoj per sia alesto, per sia ĉarma patra zorgemo, per sia nepereema amo preta etendi al li amikan, protektan manon. Li volis sin senkulpigi, petegi lin pri pardono, li, la pekinta patro, doni al li varmkorajn konsilojn, kiuj, konsolante kaj revigligante, liberigu lin de tiel ruiniga senkuraĝeco. Sed vana estis lia penado, ĉar Albino daŭre ploradis, lin ne vidante nek aŭdante, neniel povante supozi, ke tie alestas tiu mem, kiun li ankoraŭ priploras!

Tiam la kompatinda ankaŭ ekploris, elsendante ŝoke deprimajn vibrojn, ĉar li rigardis sin senpova por helpi la filon enkarcerigitan. Kaj ĉar lia alesto, kiu disradiis senesperigajn sentojn kaj disĵetis danĝerajn ondojn da dramaj pensoj, povus efiki pereige sur la debilan menson de la maliberulo kaj eble sorbigi al li la senkuraĝecon mem kondukantan la memmortigo – tial Ramiro de Guzman kaj lia asistanto alproksimiĝis kaj vanigis lian sieĝon, kaŝinte Albinon for de liaj okuloj.

"– Ni revenu, mia amiko, al nia paca domo, kie vi trovos ripozon kaj mildan solvon al viaj akraj mizeroj... – amike admonis la estro de la ekspedicio. Ne plu kalcitru! Turnu vin al la Amo de Tiu, kiu, alnajlita al la kruco, donis al la homoj, kiel ankaŭ al la Spiritoj, la lecionojn pri rezignacio antaŭ la malfeliĉo, pri submetiĝo antaŭ suferado!... Vi estas laca... vi bezonas sereniĝi por pripensi, ĉar en tia stato de malfortikeco vi nenian helpon povos alporti al iu ajn!..."

Sed ĉio signis, ke Hieronimo ankoraŭ ne sufiĉe suferis por cedi al la avertoj de siaj spiritaj gvidantoj.

"– Ekskuzu min, sinjoro, sed mi ne povas!... – li kriante obstinis. – Mi nepre vidos mian filinon, mian Gretan! Mi volas vidi ŝin! Mi bezonas senmaskigi tiun bandon da klaĉistoj, kiuj

ŝin daŭre misfamigas!... Mia plej juna filino, ĵetita en la Kajon de Ribejra?... Mankis nur tio!... Neeble! Neeble, ke tiom da malfeliĉo amasiĝis sur unu sola koro! Ne! Tio ne estas, ne povas esti vera! Mi konfidas al Zulmira! Ŝi ja estas patrino! Ĉe mia foresto ŝi zorgus pri ŝi! Mi volas vidi ŝin, mia Dio! mia Dio! Mi bezonas vidi mian filinon! Mi bezonas vidi mian filinon, ho Dio el la Ĉielo!"

Montriĝis tamen, ke novaj kaj pli akraj torentoj da elreviĝoj nepre superverŝos lian vunditan koron, ĝin plinigante per nekvietigeblaj doloroj!

Ankoraŭ en la malproksimo, konturiĝis antaŭ la angorplena rigardo de la stranga vojaĝanto la perspektivo de la Ribejra Kajo, kie granda amaso svarmis tien kaj reen en senlaca moviĝado, el kiu elstare distingiĝis la vendistinoj kaj la marĉandistinoj, virinoj kiuj sin proponis por transportservoj, kun tre krudaj manieroj kaj suspektinda honesteco.

Hieronimo ekpaŝis inter la homamaso, kaj de proksime lin sekvis la soldatoj kaj tiu pacienca gardisto, kiu ŝajnis lia ombro mem. Premegantaj antaŭsentoj avertis lin pri pri la vereco de tio, kion asertis la "klaĉistoj". Sed, dezirante mensogi al si mem, fortege rifuzante agnoski tiun abomenan realaĵon, li sentis sin devigata esplori la vizaĝojn de la vendistinoj; li nervoze iradis kaj reiradis, afliktita, terurita de la penso, ke li trovos inter tiuj senzorgaj kaj senhontaj personoj la karmemorajn trajtojn de sia adorata plej juna filino!

Subite li haltis per drama, alarma repaŝo: – li ĵus rekonis Zulmiran, gestantan en arda disputo kun delikata, blonda junulino, kiu plorante sin defendis kontraŭ nejustaj kaj neelporteblaj akuzoj, kiujn tiu ĵetis sur ŝin. La zorgato de la nobla Teokrito rapide alproksimiĝis, kvazaŭ pelate de malesperiga diastolo, kaj tuj, trafite de finofara bato, li staris senmove, regata de ne malpli tortura sistolo, ĉar en la ploranta junulino, li rekonis sian Gretan.

Ŝi ja estis fiŝvendistino! Apude kuŝis la korboj, preskaŭ malplenaj. Ŝi surhavis la tipajn vestaĵojn de tiu klaso kaj malpuregajn lignoŝuojn. Zulmira male portis sinjorinan veston, kio tamen ne forprenis de ŝi la vendistinajn manierojn.

La hontinda disputo temis pri la tiutaga enspezo. Zulmira akuzis la filinon pri ŝtelo de parto de la profito por apliko en kaŝitaj celoj. La junulino larmante protestis, hontoplena kaj suferanta, asertante, ke ne ĉiuj klientoj en tiu tago pagis siajn ŝuldojn. En la ardego de la disputo, Zulmira pli forte ekscitiĝis kaj vangofrapis la filinon, dum la ĉirkaŭantoj elmontris nenian miron nek provis malpermeis tiun perforton per kvietigaj procedoj.

Indignante, la ekskomercisto metas sin inter ambaŭ kun la intenco fini tiun bedaŭrindan scenon. Li riproĉas la edzinon, karese alparolas la filinon, al ŝi viŝas la larmojn fluantajn sur la vizaĝo kaj invitas ŝin reiri en sian hejmon. Sed neniu el la virinoj povis lin vidi nek aŭskulti, tute ne konsciis liajn intencojn, kio, lin tre forte kolerante, igis lin konvinkiĝi pri la vaneco de siaj provoj.

Malgraŭ tio, Greta levprenis la korbojn, ilin oportune metis sur la ŝultrojn kaj foriris. Zulmira, kiun la malprosperoj, ne bone komprenitaj nek elportitaj, trenis en tiujn ekscesojn, ŝin transformante en abomenegindan megeron, sekvis ŝin furiozante, eksplodante per trivialaj sakroj kaj insultoj.

Ne longe daŭris ilia irado. Ili loĝis en ombra mansardo en la ĉirkaŭaĵoj de Ribejra. Veninte en tiun mizeraĉan domon, la kruela patrino komencis turmente bategadi la malfeliĉan junulinon, de ŝi postulante ĉiakoste la tutan enspezon, dum la senpova fiŝistino petegadis pri ĉeso kaj kompato. Fine, la senkorulino – al kiu la turmentata Spirito de la lojala edzo portis, el la Transmondaj regionoj, bukedon el rozoj – krude eliris, kuntrenante malhelajn ondojn da malamo kaj nigraj pensoj, ĵetante en la aeron insultojn kaj blasfemojn en tiu nun al si propra slango, pri kiu Hieronimo miris, ke li ĝin ne konas.

La junulino restis sola. Apud ŝi la nevidebla figuro de la amema kaj suferanta patro fordoniĝis al korŝira plorado, rigardante sin senpova por helpi la adoratan idon de sia koro, sian Gretan, kiun en la menso li ankoraŭ vidis tiel blonda kaj bela en la lilia senkulpeco de la sepjara aĝo!... Sed kiel okazis al ŝia frato Albino, tiel same la malfeliĉa junulino kaŝis la larmobanatan vizaĝon en la manoj kaj, elsidinte ĉe iu angulo, dolorplene rememoris la nigran tagojn de sia ankoraŭ tre mallonga sed jam tiel aventurplena vivo!

Margareta malfermis la kluzojn de la penso, kaj ondoj da korŝiraj rememoroj ŝpruce elverŝiĝis, konigante al la patro la longan kalvarian vojon, kiun ŝi ekiris ekde tiu fatala tago, kiam li kulpiĝis antaŭ la Providenco, dekliniĝante de la devo vivi por ŝin protekti kaj el ŝi fari virinon honestan kaj utilan al la socio, al la familio kaj al Dio. Li aŭdis ŝin, kvazaŭ ŝi parolus per laŭta voĉo, kaj ju pli efektivaj sin montris al li la malfeliĉoj de la mizera orfino, des pli intensiĝis lia elreviĝo, la dolorega surprizo, la nekonsolebla ĉagreno, kiuj trapikis lian koron, simile al mortigaj lancoj, kiuj de li forprenus la vivon! Li falis surgenue ĉe la piedoj de sia malfeliĉa plej juna filino kun plektitaj petegantaj manoj, dum el lia animo de kondamnito verŝiĝis konvulsia ploro kaj lian spiritan korpon skuis traŭmatizaj tremoj, kvazaŭ li estus tuj atakota de strangaj febroj.

Kaj je en tiu humiliga kulpula teniĝo la zorgato de la sublima legio ricevis la plej ekstreman punon, kiun al lia konscienco povus trudi la sekvoj de lia sovaĝa kaj malpia sinmortiga bato!

Jen la amara resumo de la dramo travivita de Margareta Silvejra, tiel ordinara en la nuntempaj societoj, kie ĉiutage senkonsciencaj gepatroj forlasas sian sanktan respondecon kiel gvidantoj de la Familio, kie vantemaj kaj frivolaj patrinoj, sen tiu sublima aŭreolo, per kiu la skrupule plenumita devo kronas siajn heroojn, malvirtiĝas ĉe la brutalaj skuadoj de la frenezaj pasioj, senbridigitaj de la malnobliĝintaj moroj:

Fariĝinte orfa je la patro en la sejpara aĝo, la blonda kaj bela Greta, malfortika kaj delikata kiel florantaj lilioj, elkreskis en la mizero, meze de ribeloj kaj miskomprenoj, ĉe la patrino, kiu, kutiminte tiel al la malmodero pro insidema orgojlo, kiel ankaŭ al la subiĝo antaŭ pereiga vantamo, neniam rezignaciis pri la socia kaj financa dekadenco, kiu ŝin trafis post la tragika forpaso de la edzo. Zulmira sin prostituis, vane esperante, per tiu kulpa kaj kondamninda rimedo, reveni al la iama brilo. La nespertan filinon ŝi trenis en la koton, kiu ŝin makulis. Sendefenda kaj ne konscianta la brutalajn insidojn de la malvirtaj medioj kaj kutimoj, kiuj ŝin embuskis kiel rabobestoj, la junulino frue kaptiĝis en la retoj de la malbono, malgraŭ ke ŝi ne havis inklinon al tiuj mizeraj, ĉiutage travivataj okazaĵoj. La dekadenco frue alvenis, same kiel la malhonora falo. La lacegiga laboro kaj la Ribejra Kajo, kun ties ordinara foireca movado, liveris al ambaŭ la rimedojn, por ke ili ne konsumiĝu sub la akregaj torturoj de la malsato! Zulmira traktis transportservojn, diversaspecajn vendojn, negocojn ne ĉiam honestajn, ordinare utiligante por ilia plenumo la fortojn kaj la allogan junecon de la filino, kiun ŝi sklavigis, akaparante al si profitojn kaj gajnojn por sia ekskluziva plezuro. Sed la kompatinda fiŝistino, kies karaktero ne alkonformiĝis al la galo de tia abomeneginda sklaveco, suferis pro tio, ke ŝi ne vidis eblecon sin kaŝi for de tiu mizera ekzistado, kiun al ŝi rezervis la destino. Kaj malklera, nesperta, timeme, ŝi ne scius sin mem defendi, kio faris ŝin cedema antaŭ la nigra situacio kreita de ŝia patrino mem! Same kiel Albino, ankaŭ ŝi pensis pri la patro, sentante, en la fundo de la koro, lian nevideblan aleston, kaj ŝi murmuris, premata kaj anhelanta:

"– Kiel forte mi sentas vian mankon, ho amata, karmemora patro!... Mi tiom multe memoras pri vi!... kaj miaj malfeliĉoj neniam vin forgesigis al mi, vin, kiu estis tiel amema kaj sindona al viaj gefiloj! Kiom da malbonoj la destino estus al mi ŝparinta, ho patro, se vi ne estus dekliniĝinta de la devo prizorgi viajn

gefilojn ĝis la fino!... Kie ajn vi estas, akceptu miajn larmojn, pardonu min pri la veneno, kiun mi nevole ĵetis sur vian nomon kaj kompatu miajn malhonorajn suferojn, helpante, ke mi malimplikiĝu el tiu dolorega dornejo, ĉe kiu mi sufokiĝas sen ia lumo de espero pri liberiĝo, por kuraĝigi min!...”

Tio estis la maksimumo eltenebla por la Transmonda malliberulo! Li ne havis fortojn por daŭre trinki la galon el la amaraĵoj, kiujn en la sanktegan sinon de lia familio ĵetis la kondamninda ago, kiun li faris kontraŭ si mem! Aŭdante la lamentojn de la malfeliĉa filino, kiun li tiel forte amis, li sentis sin abomene vundita ĉe la plej delikataj kaj profundaj fibroj de sia patra koro, kie la suferaj krioj de la rimorsoj violente refrapis kaj vekis en liaj spiritaj internaĵoj la nekonsoleblan doloron, la doloron naskitan de la plej sincera kompato, kiun li iam povus sperti! Malesperante pro la neebleco doni tujan helpon al la malfeliĉa filineto, aŭ almenaŭ ŝin alparoli, kuraĝigante ŝian animon per la konsolo de sia alesto aŭ per konsiloj, Hieronimo pliintensigis la tonon de sia kutima senprudenteco kaj falis en deliran staton, absolute regata de frenezo pro malrezignacio.

Ĉe neperceptebla signalo de Ramiro Guzman, la lancistoj alkuris, lin ĉirkaŭis kaj protektis kontraŭ la danĝero de eventuala forkuro, rapide forkondukante lin. Kortuŝite de la suferoj de la juna Greta, Ramiro, kiu estis viro, estis patro kaj havis tre amatan filinon, kredeble ankoraŭ pli malfeliĉan, amoplene alproksimiĝis kaj surmetante siajn protektemajn manojn sur ŝian frunton, transigis en ŝian eston magnetajn efluvojn, kvietigajn kaj kuraĝigajn. Greta iris en la liton kaj falis en profundan dormon, sub la patra beno de la servanto de Maria... dum la sinmortiginto, baraktante en la “plorado kaj grincado de dentoj”, petegadis, ke oni lasu lin iel ajn helpi la filinon trafitan de abomena malhonorigo!

Sed lin energie superregante, por ke li dum momento provu rezoni, la pacienca gvidanto rediris:

"– Sufiĉe, frato Hieronimo, ĉesigu viajn malprudentaĵojn! Vi atingis la kulminon de malobeo kaj kapricemo, akcepteblan por nia toleremo! Ĉu vi do ne volas kompreni, ke nenion ajn vi kapablos fari helpe al viaj gefiloj, ĝis vi akiros la por tio nepre necesajn kvalitojn, kiuj al vi tute mankas?... Ĉu vi ne komprenas, ke viaj gefiloj, kiuj baraktas en akrega elprovado, fatale cedus, kiel vi, al memmortigo, se vi restus apud ili, influante ilian sendefendan sentemon per tiuj pereigaj, al vi esence propraj vibroj, kaj estante ne sufiĉe konscia pri via stato entute, kia vi ja preferas resti?... Ni foriru Hieronimo! Ni revenu al la Hospitalo... Aŭ ĉu vi ankaŭ deziras spuri Marietan kaj Arindan?!..."

Konsterniĝante, kvazaŭ sub la efiko de renovigaj fortoj, la kondamnito trudis momentan paŭzon al si mem, por ne daŭra pripenso. Kaj forskuinte la malesperajn halucinaĵojn, kiuj nebuligis lian rezonkapablon, li plendecide respondis:

"– Ho ne! Ne, mia bona amiko! Sufiĉe! Mi ne eltenas plu! Miaj kompatindaj gefiloj! En kielan abismon mi ĵetegis vin, ĝuste mi, kiu vin tiel forte amis!

Pardonon, frato Teokrito! Nun mi komprenas... Pardonon, frato Teokrito..."

De nia malsanulejo, ni vidis, ke ili revenas kun la samaj antaŭzorgoj...

Hieronimo ne plu apartenis al nia grupo.

# Ĉapitro V
## La Sinkono

Dua okazaĵo, krom tiu ĵus rakontita, sin trudis kiel decida etapo en niaj destinoj. Ĝi komenciĝis per tiu honora invito de la Hospitala Estraro, ke ni partoprenu en akademia kunveno por studoj kaj psikaj eksperimentoj.

Kiel dirite, Hieronimo rifuzis la inviton, kaj tial, dum ni iris al la sidejo de la Departemento por ĉeesti la kunvenon, li, posedita de profunda konsterno, de ekstrema senkonsoleco, petis pri la alesto de pastro, ĉar, kiel konfesanto de la romkatolika kredo, li havis la bezonon tiamaniere konsiliĝi kaj revigliĝi, por refortigi sian fidon al la Dia Povo kaj kvietigi al si la koron, kiu, pli ol iam antaŭe, trovis sin disrompita. La grandanima gvidanto de la Hospitala Departemento konsentis, komprenante, ke en la spirito de la portugala ekskomercisto elkrepuskiĝas la progreso, kaj ke, pro liaj religiaj principoj, al kiuj li sin obstine alkroĉiĝis, estus konvene, ke la parolo, inspiranta al li pli da respekto kaj konfido, lin ankaŭ same preparu por la adaptiĝo al la spirita vivo kaj ties ŝanĝoj.

En la Legio de la Servantoj de Maria kaj eĉ en la servoj de la Kolonio, kiu nin gastigis, estis eminentaj Spiritoj, kiuj dum

pasintaj ekzistadoj surhavis la albon kaj ĝin honoris per noblaj faroj, kiujn al ili inspiris la lumaj fontoj de la sanktegaj ekzemploj de la Dia Paŝtisto. El inter multaj, kiuj kunlaboradis en la edukaj servoj de la Institucio, ĉi-supre menciitaj, distingiĝis pastro Mikelo el Santaremo, servanto de Maria, humila kaj respektema disĉiplo de la Doktrinoj konsekritaj sur la supro de Kalvario.

Li oficis kiel direktoro de la Izolejo, kiu, kiel ni scias, estis fako de la Hospitalo Maria el Nazareto uzanta severajn edukprocedojn, sub rigida disciplino, ĉar en ĝi estis akceptataj nur malcedemaj individuoj, kiujn malbonigis multego da surteraj pasioj aŭ kiujn hardis insidemaj antaŭjuĝoj kaj ardegaj ĉagrenoj de la koro. Havante nesupereblan paciencon, estante respektinda ekzemplo de humileco, saĝeco kaj obeemo, aŭreolita de noblaj sentoj de amo al malfeliĉuloj kaj malvirtiĝintoj, kaj penetrita de patra kompato al ĉiu ajn Spirito de sinmortiginto, pri kies ekzisto li sciis, la pastro estis la konvena konsilanto, la taŭga mentoro por la internuloj de la Izolejo. Krom pastro, li ankaŭ estis profunda filozofo, psikologo kaj scienculo. Antaŭ tre longe, en pasinta ekzistado, li studis la Sekretajn Doktrinojn, en Hindujo. Ĝin sekvis aliaj surteraj enkarniĝoj, dum kiuj li ĉiam elmontris la plej noblajn inklinojn al la kristana servado. La lastan li travivis en Portugalujo, kie li ricevis la supre diritan nomon, kiun li konservis en la transmondo, kune kun sia titolo de sincera kaj honesta religiulo.

Frato Teokrito transdonis la pentantan Hieronimon al tiu sindona laboranto, certa pri lia kompetenteco por solvi tiel dornajn problemojn. Kaj tiel, en tiu sama vespero, kiam la linioj de l' krepusko reliefigis per grizeta nebulo la neĝkovritajn ĝardenojn de la hospitalaj kvartaloj, Hieronimo de Araŭĵo Silvejra transloĝiĝis en la Izolejon, sub la protektaj zorgoj de iu pastro, kiel li ja deziris. De post tiu tago ni ne plu vidis nian samkulpan kunulon. Sed unu jaron poste, ni havis la ĝojon retrovi lin. En sekvontaj ĉapitroj ni denove parolos pri tiu tre amata kamarado ĉe la luktoj por rehonorindiĝo.

De la morgaŭo de tiu tago, en kiu ni enloĝiĝis en la granda Astralmonda Institucio, oni nin ĉiutage kondukis al psiko-kuracaj kabinetoj, kie oni havigus tre efikan magnetan kuracadon, ĉar post kelke da tagoj ni konstatis, ke ni fariĝis pli viglaj, pli klare rezonas kaj laŭgrade fortikiĝas, kvazaŭ ni ingestus refortigajn tonikojn pere de la al ni farataj aplikoj. Niaj amataj flegistoj ĉiumatene kondukis nin al tiuj kabinetoj. Ĉiu dekopo eniris en antaŭĉambron, ĉirkaŭ kiu vice staris remburitaj benketoj, kaj kie ni devis mallonge atendi. Ni rimarkis, ke tie estas multe da tiaj ĉambroj, situantan en longa galerio, laŭ kiu impresaj kolonoj linie viciĝis en majesta perspektivo. En tiuj lokoj regis la hinda stilo, invitanta al meditado kaj seriozo.

Poste ni eniris la laborĉambron.

Saturitaj de blua luminesko, tiam ankoraŭ ne perceptebla por niaj spiritaj kapabloj, tiuj kabinetoj havis ne grandajn dimensiojn. Atendis nin malgrandaj orientstilaj kusenoj, teksitaj el materialo simila al blanka pluŝo. Duoncirkle dismetitaj, ili indikis, ke ni devas eksidi. Sed hindoj, absorbiĝintaj en sia karitata tasko, atendis la pacientojn.

En la komenco, tiaj ceremonioj, impresaj kaj ĉirkaŭitaj de ia preskaŭa mistero, tre ekscitis nian scivolon. Ni ne konis hindajn psikistojn en Portugalujo, nek nin okupis pri studoj kaj esploroj de transcenda naturo. Sed jen ni nun surprize nin trovas sub la dependeco kaj protekto de ia legio da orientaj inicitoj, kies realan ekziston ni apenaŭ kredis, ĉar al ni tio ŝajnis io tro mistika kaj legenda. Tamen la nun rigardata medio, saturita de religia pieco, kiu potence efikis sur niajn fakultojn, ilin kvietigante pro la influo de sankta fervoro, faris tiel profundajn kaj ravajn impresojn sur niaj Spiritoj, ke, konsternite de tiel senprecedenca efektivo, ni kredis, ke ni sonĝas. Kiam, en la unuaj fojoj, ni eniris en tiujn kabinetojn saturitajn de nekonataj povoj, nin eĉ regis nevenkebla dormemo, kiu al ni kaŭzis ian kvazaŭan duonkonsciencon.

La operaciantoj montris al ni la duoncirklon formitan de la blankaj kusenoj. Malantaŭe sin metis kvin el la kuracistoj,

distancaj unu de alia je simetria egala spaco, tiel kie ambaŭ ekstremaĵojn de la duoncirklo okupis unu kuracisto. La sesa, kontraŭe staranta, kvazaŭ fermis la cirklon, en kiu ni restis entenataj – kaj li havis la brakojn krucitaj ĉe la zono, la frunton atenta kaj enpensiĝa, kvazaŭ li elsendus mensajn, superregantajn fortojn por karitata sondado kaj ekzameno en la ardega interno de nia turmentata esto.

Ĉirkaŭ ni mallaŭte vibradis harmoniaj preĝomurmuroj. Ni ne kapablus distingi ĉu ili preĝas, alvokante la sublimajn povojn de la Ĉiela Kuracisto por nia konsolo, aŭ ĉu ili nin admonas kaj instruas. Kio tamen troviĝis ekster ĉia dubo, estis tio, ke ili trasondas nian penson per siaj mensaj povoj, funde esploras nian karakteron, ekzamenante nian personecon kun la celo decidi pri la plej ĝusta korekto – simile al kirurgo, kiu esploras la internaĵojn de paciento por lokalizi kaj ataki la malsanon. Tia certeco kaŭzis al ni multoblajn impresojn, malgraŭ la strangeco de nia stato. La honto pri tio, ke ni intencis trompi la Superajn Leĝojn de la Kreado, ilin malŝatante per nia brutala ago; la konsciencriproĉo, por la insulto ĵetita kontraŭ la Majesto de la Ĉiopova; la deprima malĝojo pro tio, ke ni oferis niajn plej bonajn fortojn al la malsuperaj materiaj ĝuoj kaj prefere kontentigis la mondumajn postulojn, neniam konsiderante la urĝajn bezonojn de la animo, nek al ni mem konsentante ian tempon por la interna prilumado – estis akregaj stiletoj, kiuj en nin funde penetris dum tiu sublima esplorado, al kiu ni submetiĝis, al ni sentigante ĉagrenojn kaj bedaŭrojn, kiel antaŭludon al efektiva kaj fekunda pento. Niaj pasintaj, plej sensignifaj agoj revenis el la mallumaj abismoj, en kiuj ili restis, por reviviĝi antaŭ ni, nete gravuritaj en nia esto mem! Nia vivo, interrompita de la memmortigo, rebildiĝis, ekde la infaneco, antaŭ niaj okuloj surprizitaj kaj teruritaj, kaj al ni estis neeble reteni la torenton da scenoj reaperigitaj por ekzameno! Ni volis forkuri por eviti la honton malkovri tiom da abomenindaĵoj, kiujn ni supozis por ĉiam kaŝitaj, eĉ de ni mem, ĉar estis dolore,

tro suferige malligi tiel diversajn pakaĵojn, enhavantajn malicon kaj fiaĵojn, antaŭ tiel noblaj kaj respektindaj atestantoj!

Sed vana estus tia deziro! Ni sentis ke al tiuj kusenoj ligas nin la efiko de voloj, kiuj potencis nian eston! Sed post kelkaj minutoj, ili ĉesigis la operacion. Forneniiĝis la torporo. La malgajaj ombroj de la pasinteco, repuŝite en la tumultan profundegaĵon de la subkonscio, malaperis for de nia vido, kio mildigis la torturon el la rememorado. Tiam la enpensiĝa frunto de la operacianto ekserenîĝis, kvazaŭ diafana ĉielarko. Kun la mieno kaj sinteno superverŝitaj per amoplena kompato, li alproksimiĝis, surmetis siajn neĝblankajn manojn sur niajn kapojn, kaj dume liaj kvin asistantoj sekvis lin per samaj gestoj kaj esprimoj. Post tio, ili kompateme sorbigis al ni bonefikajn fluidaĵojn – ja dia terapio –, kiuj helpos nin iom post iom forigi la impresojn de malsato kaj soifo; ignori la frenezigan senton de intensa frosto, kiun ĉe sinmortiginto kaŭzas la kadavra malvarmeco komunikiĝanta al la perispirito; malpliardigi la nekonfesindajn apetitojn kaj forlogojn, kiaj la seksaj misuzoj, la alkoholdrinkado, la fumado, kies refrapantaj efikoj kaŭzis konsternajn perturbojn al niaj spiritaj sensojn, neebligante al ni ian progreson ĉe la adaptiĝo kaj trudante neordinaran humiligon, ĉar ili evidentigis la malsuperegan klason, al kiu ni apartenis en tiu grava societo de la Spiritoj, kiuj nin gastigis.

El inter la ekzercoj, al kiuj oni nin tie instigadis, distingiĝis tiu, celanta la edukadon de la menso, pro la neceso forbalai el nia esto tiun dramecan kaj teruran kutimon, fariĝintan jam freneza tiko, nome ke ni povas nin mem helpi ĉe la obstina, angora deziro mildigi la fizikan suferon, kiun al ni kaŭzis tiaspeca morto.

Kiel supre dirite, tie estis tiuj, kiuj penadis ĉesigi hemoragiojn; pendumitoj, kiuj iam kaj iam konvulsiis, tordiĝante en la iluzia penado por liberiĝi de disŝiritaj ŝnuroj aŭ ĉifonoj, pendantaj de iliaj koloj; dronintoj, baraktantaj kontraŭ la fluoj, kiuj ilin trenis en la akvofundon; la “disŝiritoj”, hidaj kiel fabelaj

fantomoj, kiuj, en makabre intermitaj kurbiĝoj, siniluzie provis kolekti la disajn, sangokovritajn fragmentojn de la karna korpo, kiu ie restis sur la tero, dispecigita sub la radoj de la veturilo, antaŭ kiu ili, en aŭdaca aventuro, sin ĵetis, supozante ke ili tiel eskapas el la sankta kompromiso de la vivo! Tiaj gestoj – ni denove klarigu – ripetiĝante de la momento, kiam efektiviĝis la memmortigo kaj kiam la instinko de memkonservado gravuris en la menso la primitivan impulson por eviti la morton, degeneris en mensan misordon de la nervoj, refariĝante pere de la vibroj esence propraj al la vivoprincipo, kiuj refrapadis en la menso kaj transiĝis al la spirita korpo. Estis urĝe, ke la Karitato, ĉiam preta disetendi siajn protektemajn flugilojn super la turmentatoj, korektante, mildigante, malakrigante malbonojn kaj suferojn, apliku sian favorkorecon al la malfeliĉuloj baraktantaj en tiu marĉo de perfidaj halucinoj. Tial, kun la manoj metitaj sur niaj kapoj, ilin envolvante en magnetaj ondoj taŭgaj por la karitata celo, la fratoj-operaciantoj flustradis mildajn sugestojn, kiuj klare kaj forte reeĥis tra la labirintoj de nia "mem", kvazaŭ trumpetalvokoj vekantaj nin por esperplena aŭroro:

"– Memoru, ke vi jam ne estas homoj!... Post kiam vi el ĉi tie eliros, rigardu vin ne alie, ol kiel nemortemajn animojn, ne plu trafeblajn por la misordoj de la karna envolvaĵo!... Vi estas Spiritoj! Kaj ja nepre kiel Spiritoj vi daŭrigos vian progresadon en la spiritaj sferoj!"

..........................................................................................................................

Ĝojigis nin la invito al la kunveno prezidota de Teokrito. Ni ja estis sentemaj por tiaj elmontroj de amikeco kaj konsidero.

Hororttremo trakuris miajn sensojn, kiam mi rekonis en la multenombra ĉeestantaro tiujn hirtaspektajn, distaŭzitajn, terurvekajn figurojn de la Sinistra Valo, kvankam mi devis al mi mem konfesi, ke ili tie sin trovas iel serenigitaj, kiaj same estis mi kaj miaj loĝkunuloj. Konvenas klarigi, ke la anoj de nia grupo

povus esti klasitaj kiel "pentantoj" pro tio, ke ili obeeme sekvis la gvidadon de la eminentaj direktoroj de tiu ŝirmanta azilo. Unu aŭ alia tenis malpli harmonian konduton, tiel kreante seriozan, solvendan problemon. Sed la plimulto sendube ankoraŭ forte kateniĝis al sia animala naturo, ĉu pro la malsupereco de sia karaktero, ĉu pro la perforteco de la bato, rezultinta el la brutala speco de memmortigo. El inter ĉi tiuj distingiĝis la "disŝiritoj", la dronintoj, la sinĵetintoj de granda alteco, ktp, ktp. Menskonfuzitaj, kvazaŭ idiotigitaj, al ili ne estis facile atingi sufiĉan rezonkapablon por kompreni la devojn de la spirita vivo. Ili loĝis en la Frenezulejo pro multe da konvenaj motivoj, interalie la neceso ilin kaŝi de nia vido, ĉar ilia ĉeesto, abomena por nia sentemo, kaŭzis al ni ekscite perturbajn impresojn, kiuj nin malhelpis akiri la serenecon necesan al nia resaniĝo.

Malgraŭ tio, ankaŭ ilin oni kondukis al la loko de la kunveno; kaj kiam, akompanate de niaj sindonaj amikoj Joel kaj Roberto, ni eniris en la vastan salonon, tiam ni ilin distingis inter multaj aliaj malsanuloj, kiuj, same kiel ni, ankaŭ estis invititaj.

Observante la malnovajn kunulojn de la malluma valo, mi vidis, ke ili penadas, same kiel ni mem de kelke da tagoj ankaŭ faris, korekti tiujn malbelajn tikojn, jam supre menciitajn, ĉar, pelate de la kutimo al ilia ripetado, ili ĝustatempe ekatentis kaj dume haltigis la koncernan mensan impulson, sekvante la sugeston donitan de la amemaj asistantoj. En tiuj okazoj, ili nervoze ridis pri si mem, ĉe emociaj korelverŝoj, pensante, ke ili *devas ne plu senti tiajn impresojn*... kvazaŭ per la rido ili forskuus turmentaj vibrojn. Ili ridis por dekutimiĝi de tiu malutila ploro, vekanta danĝerajn sentojn!... En la Hospitalo estis malpermesataj tiuj rabiaj konvulsioj de la Sinistra Valo... kaj ploradi malesperigite de tiuj samaj turmentoj, pro kiuj ni antaŭe ploris, estus maldigi la torentojn da agonioj, kiujn la sanktega karitato de Maria malpliakrigis per la sindono de siaj servantoj...

Kaj dum mi ilin observadis, mi ankaŭ ridis, ne kaŝante mian similecon kun la stranga grupo...

Ĉe signalo de Roberto, ni eksidis.

La ĉambro prezentis nenion, kio vekus apartan intereson. Sed se ne estus malsufiĉa nia vidpovo por distingi la sublimajn manifestiĝojn de karitato svarmantajn ĉirkaŭe, ni tiam estus rimarkintaj, ke delikataj, fluidecaj vaporoj, kiel milda, refreŝiga roso, disbloviĝadis en la loko, ĝin saturante per dolĉaj vibroj.

Ĉe angulo de la podio, kiu en la salonfundo frontis kontraŭ la ĉeestantaro, troviĝis aparato tre simila al tiuj starantaj en la malsanulejoj, kvankam tiu ĉi prezentis distingiĝajn apartaĵojn. Du junaj inicitoj komencis ekzameni ĝin, kaj dume Frato Teokrito okupis la katedron, havante ambaŭflanke de si du aliajn kolegojn, kiujn li prezentis al la ĉeestantoj kiel nin gvidontajn instruistojn kaj al kiuj ni devos dediĉi la plej grandan respekton. En ili ni ĝoje rekonis tiujn du hindajn junulojn, kiuj nin akceptis, kiam ni interniĝis en la hospitalon: Romeo kaj Alcesto.

Silento religia disradiis harmoniajn ondojn da pia seriozeco en la vasta salono, kie kunvenis ĉirkaŭ ducent Spiritoj kaptiĝintaj en la plej implikaj retoj de la malfeliĉo kaj trenantaj la hontigan ŝarĝon de la propraj malvirtoj, de la sennombraj amaraĵoj, kiuj mallumigis al ili la vivon.

En la regionon, kie situis nia malgaja kolonio, falis la tristaj nuancoj de la krepusko, kiu tie inspiris tiel pezan melankolion, ke ĝi multfoje elfluigis larmojn el nia koro.

Ses melodiaj batoj de nevidata horloĝo dolĉe eksonis en la salona vasteco, anoncante la komencon de la kunveno. Kaj harmonia preĝokanto, rava, kortuŝa, duonvoĉe aŭdiĝis, kvazaŭ ĝi venus al ni, tra nevideblaj ondoj de la etero, el malproksima, por ni neprecizigebla loko, dum sur ekrano apuda al la katedro de Frato Teokrito desegniĝis la impresa bildo de la apero de Gabrielo al la Virgulino el Nazareto, por anonci la malsupreniron de la Redemptoro en la sendankajn regionojn de la Planedo.

Estis la dolĉa tempo de la Anĝeluso...

Stariĝinte, la direktoro faris mallongan, kortuŝan saluton al Maria, kaj tio estis la unua fojo, ke li nin kolektis por preĝi. Dolĉa konsolo verŝiĝis en niajn korojn. Larmoj ekŝprucis kaj mildaj emocioj, leviĝante el la profundoj, kie ili restis entombigitaj, vekiĝis en ni ĉe la rememoroj pri la patra domo, pri la fora infanceco, pri niaj patrinoj, nin instruantaj ĉe la lito la sankatan eldiron de la unuafoja preĝo, kaj kiujn certe neniu el ni amis per inda amo!...

Kiel ĉio ĉi kuŝis malproksime, preskaŭ forviŝita en la abismoj de la pasioj kaj de ties malfeliĉoj!... Kaj jen tiuj rememoroj neatendite releviĝis, kiel bonfara fantomo, venanta por patrinkise tuŝi niajn humiligitajn fruntojn!

Fundaj resopiroj faciligis nian animon, inklinigante ĝin al la tenera influo de tiu grandioza okazo, al ni donita kiel benata favoro...

Estus longe priskribi detalojn de tiel bela kiel utila sinsekvo da instruoj kaj spertoj, kiujn ni ekricevis depost tiu memorinda vespero. Ili konsistigis tiun delikatan kuracadon, – ja iaspecan moraligan terapion, – kiu decide instigis nin al reagoj nepre necesaj por la urĝe bezonata reedukiĝo. Ni limiĝos nur al tio, ke dum tiu unua leciono oni nin submetis al tiel delikataj operacioj, faritaj en la interno de nia esto, ke la necertecon pri la spirita stato, en kiun ni antaŭe falis, oni lerte kaj karitate malaperigis for de nia menso, ebligante, ke al ni libere evidentiĝu la lumo de la vero. Ni kategorie konvinkiĝis pri nia stato de Spiritoj apartiĝintaj de la surtera karna envolvaĵo, kio por la plimulto estis ĝis tiam kaŭzo de akraj konfuzoj, de nekompreneblaj konsternoj! Kaj ĉio disvolviĝis simplamaniere, ĉar ni mem estis la vivantaj libroj uzataj por tiuj grandiozaj lecionoj – nome la nerefuteblaj operacioj! Jen kiel la erudiciaj instruistoj procedis por plenumi sian sanktegan komision:

Belarmino de Queiroz e Souza, kiu, kiel ni scias, portis vastan intelektan kulturon kaj krome sekvis la filozofiajn

doktrinon de Aŭgusto Comte, estis invitita, el inter aliaj poste ricevontaj la saman privilegion, supreniri la estradon, sur kiu efektiviĝos la admirinda instrua operacio. Ni rimarku, ke Frato Teokrito partoprenis en tiel delikata ceremonio kiel honora prezidanto, eminenta profesoro de la aliaj, tie funkciantaj profesoroj.

Oni sidigis la eksinstruiston de lingvoj antaŭ tiu lumanta aparato, kiu ĉe la alveno kaptis nian atenton. Kun ĝi oni kontaktigis lin pere de ia diademo ligita al ege maldikaj fadenoj similaj al subtilegaj lumstrioj. Dum Alcesto ŝaltis la aparaton, Romeo sciigis al li, per gravtona voĉo, ke li devas reveni je kelke da jaroj en la pasintecon, per rigora kunordigo de la rememoroj, deirante de la ĝusta momento, kiam la tragika decido ekposedis liajn fakultojn. Por ke li sukcesu, Romeo helpis, revigligante lian menson per bonfaraj emanaĵoj, kiujn li ĉerpis el siaj propraj fortoj.

Belarmino obeeme submetiĝis, senrezista antaŭ ia aŭtoritato, kontraŭ kiu li havis nenian forton por malcedi. Kaj rememorante, li denove travivis la suferojn al li truditajn de la tuberkulozo, la luktojn tenatajn kontraŭ si mem ĉe la ideo pri memmortigo, la nekonsoleblan malĝojon, la kruelan angoron, kiu ekpotencis liajn fakultojn, baraktantajn inter la deziro vivi, la timo antaŭ la senkompata malsano, kiu konsumadis lian fizikan eston per senĉesa turmentado, kaj la urĝa bezono de la memmortigo, por, laŭ sia malsaneca rezonado, pli milde trafi la destinon, kien la malsano lin trenus sub akra suferado. Sed laŭmezure kiel proksimiĝis la fino, la pozitivista filozofo fariĝis evitema, ebstine rezistante al la ricevita ordono. Ŝajnis, kvazaŭ glacia ŝvito banas lian frunton de pensulo, sur kiu la teruro ĉiam pli kaj pli intensiĝis, elmontrante esprimojn de malespero ĉe ĉiu nova ŝpruco de la doloraj rememoroj...

Sed, kio pli forte surprizis estis tio, ke sur la lumineska ekrano, al kiu li estis ligita, sinsekve aperadis la scenoj rememorataj de la paciento, fakto ja impresa, kiu tiel al li, kiel

ankaŭ al la spektantaro, ebligis vidi, ĉeesti la tutan amaran dramon, antaŭintan lian malesperan agon, kaj la emociajn, bedaŭrindajn detalojn de tiu abomeneginda momento! Ĉi tiun sekvis la turmentaj transtombaj situacioj, la abomena dramo, kiu lin konsternis, la konfuzaj sensacoj, kiuj dum longa tempo tenis lin en stato de frenezo.

Dum la unua operacianto helpis la pacienton eltiri siajn proprajn rememorojn, la dua ilin komentariis, klarigante la faktojn okazintajn antaŭ kaj post la memmortigo, kiel eminenta instruisto klariganta lernendan objekton al nekleruloj. Tiucele, li montris la fenomenojn rezultintajn el la disiĝo de la inteligenta estulo for de sia korpa kokono el ŝlimo, perfortita de la pereiga bato, kiun li donis al si mem. Ni tiel spektis la surprizan, sengloran odiseon travivitan de Spirito, kiu sin mem elpelis el la karna ekzistado. Pro la ignoro al la Leĝo, kiun li malobeis, li freneze baraktadis, kaptita de la monstraj tentakloj de neeviteblaj sekvoj, kiujn naskis la rompo de harmonia kaj difinita kolekto da naturaj, saĝaj, neŝanĝeblaj, eternaj Leĝoj!

Tiuj eksterordinaraj scenoj fine forbatis la materiismajn – jam tre skuitajn – konvinkojn de la pozitivista filozofo, ebligante al li konstati en si mem, pere de detala ekzameno, la apartiĝon de lia astrala korpo disde la materia envolvaĵo el koto, dum li mem postvivis kun ĉiuj siaj fakultoj, malgraŭ la memmortigo kaj la kadavra putriĝo.

Per tiel efika kiel simpla procedo, la plimulto el la ĉeestantoj povis kompreni la kaŭzon de la nepriskribebla ardeco de siaj suferoj, de la turmentaj, ankoraŭ daŭrantaj fizikaj sensacoj, de la multoblaj perturboj, kiuj al ili neebligis la sereniĝon aŭ la forgeson, kiun ili erare esperis atingi en la tombo.

Inter aliaj faritaj observoj, aparte komentariindas, pro sia strangeco, la fakto, ke ni ĉiuj, dum ni ankoraŭ estis en la Valo, trenis, pendantaj de nia astrala korpo, brilegantajn fragmentojn, kiel se de ŝirrompita ŝnuro, aŭ elektra kablo, elsaltus sparkoj el la subtilegaj fadenoj de ties strukturo, pro la ankoraŭ ne elĉerpita

energio. La mentoroj klarigis, ke la kaŭzo de nia akrega suferado kuŝas tuta en tiu tre kurioza fenomeno, ĉar ĉe la natura morto tiu ŝnuro milde malstreĉiĝas, liberiĝas el la altirfortoj ĝin kuntenantaj al la karna korpo helpe de la karitataj zorgoj de la laboristoj en la Kultivejo de la Sinjoro, kiujn koncernas la sanktega misio flegi la mortantojn, dum ĉe memmortigo ĝi estas violente ŝirita kaj, kio pliakrigas la situacion, kiam la vivorezervujoj, ankoraŭ plenaj de suko por la daŭro de kelkfoje longa ekzistado, faras ĝin ankoraŭ pli fortika, por tenado de la kuniĝemo necesa al la ekvilibro de la vivo.

Nu, oni klarigis al ni, ke por liberiĝi de la profunda malekvilibro, kiun tia efiko estigis ĉe nia fluideca organismo, (ni ĉi tie ne parolas pri la morala malordo, eble ankoraŭ pli dolora) ni nepre bezonos loĝi novan karnan korpon, ĉar sen tio ni daŭre status kiel estuloj malharmoniigitaj kun la leĝoj regantaj en la Universo, kaj ĉiam neesprimeblaj ĉagrenoj al ni barus ĉian efektive progresocelan realigon.

Sed Belarmino, plorante kaj sub la atako de spasmaj konvulsioj, baraktis ĉe la rememorado de siaj afliktoj, dum la ĉeestantoj, kunsentaj kun li, el tiu terura demonstrado tiris konkludojn rilatajn al si mem.

La instruisto dume klarigis:

"– Vi povas konstati, miaj amikoj, ke ĝuste pro la forkuro de la surplaneda ekzistado tra la trompaj deklivoj de la memmortigo, la homo, krom evitigi al si neniun el la amaraj situacioj, kiuj lin afliktis, tute male aldonis novajn, eble pli ardajn kaj suferigajn, al la kolekto de siaj iamaj malbonoj, kiujn li certe eltenus, se pli solida morala edukado, bazita sur la plenumado de la Devo, inspirus lian ĉiutagan konduton. Tiun edukadon gvidan, avertan kaj ja preventan kontraŭ tiaj malfeliĉoj, kiajn ni nun bedaŭras, la homo ne havigas al si sur la monda scenejo, kie li estas vokita al urĝaj devoj, nur tial, ke li ĝin ne volas, ĉar ĉirkaŭ li, en lia planeda loĝejo, abundas instruoj kaj lecionoj kapablaj konduki lin al la elaĉetontaj aŭroroj de la Bono kaj Devo!

Li tamen, la nesingarda surtera vojaĝanto, ĉiam preferas malŝpari la bonfarajn oportunojn, donatajn de la Dia Providenco kaj celantajn lian moralan kaj spiritan altiĝon, por pli libere envolvi sin en la insidajn ombrojn de la pasioj, ekscitantaj la malvirtojn kaj malprudentaĵojn, kiuj lin senrimede faligas en la abismon.

En la kirlo de la surteraj ambicioj, same kiel ĉe la kunfrapiĝo kun la lin afliktantaj elprovoj; ĉe la batoj de la ĉiutagaj sortovicoj, neforigeblaj en la medio kie li faras siajn provojn por progresi, kiel ankaŭ ĉe la ĝuado de la dolĉaj plezuroj de prospera kaj feliĉa hejmo – al la homo neniam venas en la kapon fari ian ajn penon por la lumigado de sia interno, por la morala, mensa kaj spirita reedukado al li nepre necesa en tiu estonteco, kiun lia Spirito devos konkeri laŭ la natura ordo de la Leĝoj de l' Kreado. Li eĉ ne komprenas, ke li havas animon dotitan per diaj ĝermoj, por la akirado de altvaloraj moralaj kapabloj kaj eternaj spiritaj kvalitoj; ĝermoj, kies disvolvon li devas efektivigi ĝis perfekteco tra glora penado por supreniri al Dio, al la Senmorta Vivo! Li ne scias, ke ĝuste ĉe la kulturado de tiuj dotoj kuŝas la sekreto de la plena realigo de liaj plej karaj idealoj, de liaj plej sopirataj sonĝoj; kaj, krome, ke ignorante la dian esencon en li pulsantan, kiu estas li mem, lia senmorta Spirito, ido de la Ĉiopova, li memvole sin kondamnas al la Doloro, glitante en la abomenindajn devojiĝojn de la besta naturo kaj eble de la krimado, kiuj lin trenos en la logikan sekvon de la elaĉetoj, de la reboniĝoj kaj doloraj spertoj ĉe la elprovoj de la reenkarniĝo, dum al li tiu suprenirado fariĝus pli milda, se li per saĝa primedito provus esplori sian propran originon kaj la estontecon, kiun li devas konkeri!

Ja tia fatala nescio pelis vin, miaj karaj fratoj, en tiun bedaŭrindan situacion, en kiu vi hodiaŭ baraktas, sed kiun nia frata zorgo, inspirata de la ekzemplo de la Dia Ŝafido, provos mildigi, kvankam nur la tempo kaj viaj klopodoj mem, turnataj

al direktoj kontraŭaj al tiuj, kiujn vi prenis ĝis nun, montriĝas kiel la nepra kaj plej ĝusta provo por via urĝe necesa reboniĝo.

Kiel vi vidas, vi detruis la materian korpon, ja necesan al la Spirito reenkarniĝinta sur la Tero, sed kiun vi obstine rigardis kiel la solan absolutan formon de vivo. Vi tamen nek formalaperis, kiel vi deziris, nek liberiĝis de la ĉagrenoj, kiuj vin malesperigis. Vi vivas! Vi ankoraŭ vivas! Vi ĉiam vivos! Vi vivos, dum la tuta eterneco, vivon ja senmortan, kiu neniam, neniam estingiĝos en via esto, senĉese komunikante al via konscienco nekontraŭstareblan impulson, pelantan antaŭen, ĉiam plu transen!...

Ĉar vi ja estas lampo de netaksebla valoro, kiun fekundigis tiu Eterna Fokuso, verŝanta Sian Senmortecon sur la Kreitaron, kiun Li eligis el Si mem, kaj al kiu Li donis la benon de la progresado tra la eternaj tempoj, ĝis Ĝi atingos la plenan gloron ĉe la Superega harmonio en Lia Sino!

Kion vi nun rigardas en vi mem, en ĉi tiu por vi solena kaj neforgesebla momento, elsendiĝantan el via menso impresita de tiuj sensaciaj, vin koncernantaj okazaĵoj, tio sendube signos decidajn etapojn sur la vojo, kiun vi nekontraŭstareble iros tra la estonteco. Ekde nun vi certe deziros ion lerni pri vi mem... ĉar la vero estas, ke vi scias neniom pri la Esto, la Vivo, la Doloro kaj la Destino... malgraŭ la diplomoj, per kiuj vi brave paradis sur la Tero, kaj malgraŭ la titoloj kaj honoraĵoj, kiuj tiel bone alkonformiĝis al via stulta vanteco de homoj deturniĝintaj for de la dia idealo!...”

Revigligite de la saĝaj disdonantoj de magnetaj energioj, Belarmino revenis al sia loko inter la ĉeestantaro, dum alia paciento supreniris la estradon por nova demonstracia ekzameno. Sed nun lia vizaĝo, antaŭe malgaja kaj deprimita, radiis per esperplena ĝojo! Li eksidis apud ni kaj, kaŝpremante al ni la manojn, ekkriis:

“– Jes, miaj amikoj! *Mi estas nemortema!* Mi ĵus, sen ia ombro da dubo, konstatis en mi mem la konkretan ekziston de

mia senmorta "memo", de tiu spirita estaĵo, kiun mi neis! Mi scias nenion! Nenion! Mi devas rekomenci miajn studojn!... Sed tiu sola certeco signifas por mi netakseblan konkeron de feliĉo: – Mi estas nemortema!... Mi estas nemortema!..."

En la sekvantaj tagoj, dum samcelaj seancoj, ni estis devigitaj ekzameni kun doloregaj detaloj la misagojn faritajn en la daŭro de tiu ekzistado, kiun ni forfinis, observante la interplekton da malbonoj moralaj, materiaj, kiuj nin trenis en la nunan, abomenegindan situacion. Helpate de la paciencaj mentoroj, ni per la penso revenis al la infanaĝo, reiris sur la irita vojo, kaj, multfoje banataj de abundegaj larmoj, senŝanĝe desapontitaj, ni rekonis nin mem kiel la aŭtorojn de la elreviĝoj, kiuj faligis nin en la ombrojn de la memmortigo. Kiel fie ni agis en la plenumado de la ĉiutagaj taskoj truditaj de la socia vivo! Kiel konstante krudaĉa estis nia konduto, malgraŭ la ŝmiro el civiliziteco, pri kiu ni fieris!...

El la anoj de tiu pentanta legio, multaj klare vidigis en si la abomenindan frukton de nesufiĉa morala edukado, kiun ili ricevis en hejmoj ne gvidataj de la vera kristana instruado! Junuloj, kiuj, apenaŭ elirinte el la adoleskanteco, falis, senhelpaj, ĉe la unua kunpuŝiĝo kun la ordinaraj ĉagrenoj de la surtera vivo, kaj kiuj pro tio preferis la aventuron de la memmortigo, ĉar al ili tute mankis idealo, prudento, respekto al si mem, al la Familio kaj al Dio! La malfeliĉegoj, kiujn ili trovis post la sinmortigo, prezentis teruran ateston, timegigan akuzon kontraŭ la neprirespondeco de iliaj gepatroj aŭ de tiuj, kiuj pri ili respondecis antaŭ Dio, la malhonoran pruvon pri ilia neglekta konduto, laŭ kiu ili ne klopodis havigi solidan moralan edukadon al siaj zorgatoj! Ni tiam eksciis, ke, ĉe tiaj okazoj, severajn kalkulojn devos iam prezenti al la Superegaj Leĝoj tiuj malzorgemaj gepatroj, kiuj lasis liberan kuron al la malicaj inklinoj de la filoj, ne provante ilin korekti kaj tiel faciligante la ekeston de tiuj malesperaj senprudentiĝoj, kies logika rezulto ja estis la memmortigo!

Post tiel kompleksaj ekzamenoj, ni ĉeestis novajn seancojn, por lerni kiel ni preferinde devus agi por eviti la sinmortigon, kiaj devus esti nia ĉiutaga konduto, niaj klopodoj, se ni ne estus forpuŝintaj la rezonadon inspiratan de la Devo, la fidon al ni mem kaj al la patra amo de Dio! Ĉe multaj okazoj, la solvo de la problemoj, kiuj kondukis sur la randojn de la abismo, troviĝis tre proksime de la suferanto; la helpo, sendota de la Providenco al ĝia tre amata filo, aperus post kelke da tagoj, monatoj, dum al li sufiĉus nur kuraĝi por ne longa atendo, en glora atesto pri firma volo, pacienco kaj morala braveco, necesa al sia spirita progreso! Tiam ni konkludis, kun senreviga surprizo, ke ni estus facile gajnintaj la venkon kaj eĉ la feliĉon, se ni estus serĉintaj ĉe la Dia Amo la inspiron por plenumi la devojn de tiu ekzistado, kiun ni malfeliĉe forfinis!

Tiuj instruoj, kiuj al ni ĉiuj havigis rimarkindajn bonfarojn, okazis ĉiun duan semajnon, kaj al ili la eminentaj mentoroj aldonis klarigajn prelegojn. Promesplenajn reboniĝojn ni spertis en nia ĝenerala stato, dum dolĉaj esperoj flustris edifan konsolon al niaj dolorantaj koroj. La ĉeesto de la instruistoj fariĝis motivo de grandega ĝojo por niaj animoj, resaniĝantaj de tiel akraj afliktoj. La paroloj, kiujn ili direktis al ni dum la lecionoj, efikis kvazaŭ refreŝiga roso sur la ardecon de nia suferado; tiel same iliaj prelegoj kaj instruoj, la karesa kaj kompatema kuracado en la kabinetoj, estis aliaj motivoj, por ke ni sentu nin plenaj je konfido kaj espero. Sed ni neniam vidis ilin, krom dum tiuj difinitaj okazoj; kaj en ilia ĉeesto ni tiel forte timis, ke ni ne kuraĝis eldiri eĉ monosilabon, sen esti antaŭe alparolitaj.

Post iom pli ol du monatoj, ni kapabliĝis al pli vastaj induktoj, komparante la ricevitajn lecionojn kaj ilin pripensante en la soleco de niaj ĉambroj.

El la faritaj analizoj rezultis la certeco, ĉiam pli kaj pli klara, pri la graveco de nia situacio. Sed nia senŝarĝiĝo je tiuj konsternaj, antaŭe travivitaj ĉagrenoj, ne signifis malpligraviĝon de nia kulpeco; kontraŭe, la ebleco rezonadi vidigis detalplene

la gravecon de la eraro, kio nin forte senrevigis kaj malĝojigis. Kaj el la instruoj kaj spertoj, kiujn oni karitate donis al nia komprenpovo kiel bazon kaj instigon al ia urĝa, nepre necesa sinrebonigo, cele al ja neprokrastebla progreso, ni kunmetis la ĉi-suban resumon, kiun ni aldonas al niaj simplaj, transtombaj skriboj:

> 1 – La homo estas kunmetaĵo de triobla naturo: – homa, astrala kaj spirita, t.e. – materio, fluido kaj esenco. Tiun kunmetaĵon oni ankaŭ povas esprimi en maniero pli konkreta kaj populara, konforma al la unua grado de observo: – karna korpo, fluideca korpo aŭ perispirito, kaj animo aŭ Spirito; de ĉi tiu lasta radias la Vivo, la Intelekto, la Sento ktp, ktp. – fajrero enhavanta la dian esencon kaj kiu, ĉe la homo, signas ties ĉielan devenon! El tiuj tri korpoj, la unua, provizora, respondas nur al la neceso de la neforigeblaj cirkonstancoj, kiuj sin trudas al ĝia posedanto, kaj estas destinita al kompleta malkomponiĝo pro sia propra naturo, kiel devenanta de la primitiva ŝlimo: – tio estas la korpo el karno. La dua, nemortema, emas progresi, disvolviĝi, perfektiĝi per senĉesa laborado en la miljaraj luktoj: – tio estas la fluideca korpo; kaj la Spirito, eterna kiel la Fonto, el kiu li devenas, nepereema lumo, kiu emas briladi ĉiam pli kaj pli bele, ĝis li respegulos, en relativa grado, tiun Superegan Lumon, kiu al li donis la Vivon, por la gloro de ties Kreinto mem, estas la dia esenco, farita laŭ la bildo (kio li iam ja estos) de Dio Ĉiopova!

2 – Kiam li vivas sur la Tero, tiu inteligenta estulo, disvolviĝonta tra la Eterneco, estas nomata Homo! La homo do estas Spirito malliberigita en karna korpo, aŭ *enkarniĝinta.*

3 – La Spirito plurfoje revenas sur la Teron por preni novan karnan korpon, *renaskiĝas multajn fojojn* por denove kunvivi, kiel homo, en la surteraj socioj, tute same, kiel ĉi tiu devas multfoje ŝanĝi siajn vestojn...

4 – La memmortiginto estas krima Spirito, kiu fiaskis ĉe siaj devontigoj al la saĝaj, justaj kaj neŝanĝeblaj Leĝoj starigitaj de la Kreinto, *kaj kiu, pro tio nepre devas denove travivi la surteran sperton, prenante novan korpon, ĉar li detruis tiun, kiun la Leĝo havigis al li kiel helpilon por perfektiĝi* – sanktan havaĵon, kiun li devus prefere ami kaj respekti, ol detrui, ĉar li tute ne rajtis malplenumi la grandajn devojn de la surplaneda ekzistado, kiujn li, antaŭ ol naskiĝi, prenis sur sin en la ĉeesto de la propra konscienco kaj antaŭ la Dia Patro, kiu por tiu celo al li donis la Vivon kaj la necesajn rimedojn.

5 – La Spirito de sinmortiginto revenos en novan surteran korpon *en tre suferigaj kondiĉoj*, kiujn pli akrigos la sekvoj de tiu profunda malekvilibro estigita de la malespera ago en lia astrala korpo, t.e., en lia perispirito.

6 – La reveno de sinmortiginto en novan karnan korpon estas leĝo. Leĝo nenuligebla! Ĝi estas neevitebla kulpelpago, al kiu li vole-nevole devos submetiĝi, ĉar nenia ajn rimedo ekzistas por lia bono, krom *ripeti la surteran programon, kiun li ne plenumis.*

7 – Falinte pro sinmortigo, la homo forĵetas kaj detruas sanktan, leĝe starigitan oportunon por la konkero de situacioj, kiuj honorigus kaj nobligus lian konsciencon, ĉar la suferoj, kiam oni ilin heroe eltenas kaj superregas per potenca strebo al la venko, estas kvazaŭ magia spongo, kiu forviŝas de la kulpa konscienco la malhonoran ombron ofte devenantan de pasinta krimado en antaŭaj surteraj ekzistadoj. Sed se, anstataŭ savanta heroeco, la homo preferas eskapi el la promesplenaj laboroj pere de mematenco, klare vidiganta la koton de la malsupereco, kiu malbeligas lian karakteron, tiam li prokrastos la sopiratan kontentigon de siaj plej karaj deziroj, ĉar li ja neniam povos sin detrui pro tio, ke la fonto de lia Vivo kuŝas en lia Spirito kaj ĉi tiu estas nedetruebla kaj eterna kiel la Sankta Fokuso, el kiu li devenas!

8 – Sinmortiginto malofte restas dum longa tempo en la Spirita Mondo. Aŭ li tre baldaŭ reenkarniĝos, pro la multeco de la ruinigaj, kuntrenitaj sekvoj; aŭ li prokrastos la kontentigon de tiu nepra bezono, en la okazo se malpligravigaj cirkonstancoj ebligos al li vizitadi kursojn por lernado de edifaj objektoj, kiuj mildigos al li la estontajn luktojn por lia rehonorindiĝo.

9 – Sinmortiginto estas kvazaŭ kontraŭleĝa fremdulo en la Spirita Mondo. Lia ĉeesto en ĝiaj regionoj, antaŭ la tempo nature difinita, kontraŭas la leĝojn regantajn la harmonion de la nevidebla mondo; kaj, se oni ilin toleras, protektas kaj konvene gvidas, tio estas tial, ĉar la perfekteco de tiuj leĝoj, fontanta el la amoplena sino de la Plejalta Patro, dekretis, ke al ĉiuj pekintoj estu konstante

renovigataj la okazoj por reboniĝo kaj rehonorindiĝo!

10 – Per renaskiĝo en nova karna korpo, la sinmortiginto ree plenumos tiun programon de laboroj kaj diversaj luktoj, pri kiuj li erare supozis, ke li povos el ili eskapi tra la misvojoj de la memmortigo; li denove travivos taskojn, elprovojn similajn aŭ tute egalajn al tiuj, kiujn li deziris forpuŝi de si; li nepre suferos la tenton al memmortigo, ĉar li mem sin metis en tiun malfacilan cirkonstancon, trenante en kulpelpagan reenkarniĝon la amarajn sekvojn de sia krima pasinteco! Sed al tia tento li povos rezisti, ĉar tiucele li estis instruita kaj preparita en la Spirita Mondo. Tamen, se li duan fojon fiaskos – kio estas neprobabla – tiam pligrandiĝos lia respondeco kaj sekve ruinige pligrandiĝos la nombro de la suferoj kaj revirtigaj luktoj, ĉar li ja estas nemortema!

11 – La neesprimebla stato de senkonsola angoro, de aflikta maltrankvilo kaj de konstantaj malĝojo kaj nekonteteco; la nenormalaj situacioj, kiuj sinsekve kreiĝas en la animo, en la menso kaj en la vivo de sinmortiginto, nepriskribeblaj por la homa penso kaj kiujn nur li povas kompreni, permesos al li reveni al sia normala stato nur post kiam finiĝos iliaj kaŭzoj, kio okazos post kulpelpagaj ekzistadoj, post akraj elprovoj, en kiuj li severe atestos pri sia morala valoro ĉe senĉesaj ploroj, nobligaj faroj kaj doloraj rezignoj, kiujn li tute ne povos eviti al si... Kaj tiel malfeliĉa laboro povos postuli de li la persiston ĉe lukto centjara, ducentjara... eble pli longa... depende de la grado de liaj malmeritoj kaj de lia emo al tiaj justaj kaj neeviteblaj penadoj!

Tiuj konkludoj tute ne permesis, ke ni faru al ni iluziojn pri la nin atendanta estonteco. Ni do frue komprenis, ke en tiu dorna situacio, kiun ni nun travivis, unu sola principo montriĝas kiel rimedo por eblaj mildigoj en ia tempo, kies malproksimecon ni ne kapablis antaŭvidi: – submetiĝi al la ordonoj de la leĝoj, kiujn ni malobeis, sekvi la konsilojn kaj instruojn donatajn de niaj amoplenaj mentoroj, lasante nin eduki kaj gvidi laŭ ilia alta kriterio, kiel ŝafoj obeemaj kaj strebantaj al la superega konsolo de ia ŝafejo...

# Ĉapitro VI
## La Komunikiĝo kun la Supro

> “En tiu tempo, Jesuo elparolis kaj diris: – Mi Vin gloras, ho Patro, Sinjoro de la ĉielo kaj la tero, ke tion Vi kaŝis for de saĝuloj kaj prudentuloj, kaj malkaŝis al infanoj.”
> S. Mateo, 11:25

> “Ĉar kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili.”
> S. Mateo, 18:20

Malgraŭ la efikeco de tiel ŝatindaj metodoj, tamen eĉ en la Hospitalo kaj ankoraŭ pli multe ĉe la internuloj de la Izolejo kaj la Frenezulejo estis tiuj ankoraŭ ne povantaj rekoni la propran situacion kun la atendebla konfido. Ili daŭre restis konsternitaj, duonkonsciaj, dronintaj en bedaŭrinda stato de mensa inerteco, nekapablaj por ia ajn konkero, kiu ebligus al ili ian progreson. Estis urĝe ilin veki, ilin skui per la revivigo de animalaj vibroj, al kiuj ili estas kutimintaj, por tiel ebligi, ke ili ion komprenu pere de homaj agoj kaj paroloj! Kion fari, se ili ne kapablis kompreni la harmonian parolon de la spiritaj mentoroj, nek ĉi tiujn vidi tiel klare kiel necese kaj tiel ricevi iliajn karitatajn konsilojn, kvankam tiuj mentoroj laŭeble materiiĝis kun la celo doni pli da efikeco al siaj operacioj?

La respekteginda Protektantino de la Instituto ankaŭ volis vidi ilin tuj resaniĝintaj, ĉar tion deziris ŝia sublima Patrina koro!

Tial la sindonaj servantoj de la nobla Legio, direktata de Maria, ne hezitis utiligi ekstremajn rimedojn, por atingi la karitatan celon.

Niaj instruistoj – Romeo kaj Alcesto – informis la eminentan direktoron de la Hospitala Departemento pri la urĝa neceso viziti la Teron serĉe de lernantoj de la psikaj sciencoj, por tiel kuraci mensajn kompleksojn de iuj internuloj, nesolveblajn en la Spirita Mondo. Detale sciiĝinte pri la afero, dum kunsidoj, en kiuj ankaŭ partoprenis la sindonaj kuracistoj de la kabinetoj, Frato Teokrito elektis la Komisionon, kiu devos senprokraste vojaĝi al la Tero kun la celo esplori, ĉu estas ebla ia efika surtera kunlaboro. Li samtempe ekspedis peton pri helpo al la Departemento de Viglado, ĉar, kiel ni scias, tiun sekcion koncernas la rilatoj inter nia Kolonio kaj la surteraj scenejoj.

Olivier de Guzman, kun tiu preteco, karakterizanta la decidojn kaj ordonojn en ĉiuj tieaj centroj de laboro, disponigis al sia malnova kamarado de bonfaraj servoj la kompetentan personaron necesan por la grava entrepreno. Samtempe li petis de la Sekcio pri Eksteraj Rilatoj fidindajn informojn pri la ekzisto de asocioj por studoj kaj eksperimentoj psikaj, de nekontestebla seriozeco, funkciantaj en la astrala regiono ampleksita de Portugalujo, Hispanujo, Brazilo, latinamerikaj landoj kaj portugalaj kolonioj, kaj kies agado havus kiel signon la kristanajn principojn de la vera frateco. Krom tio, li ankaŭ petis informojn pri la spirita situacio de la mediumoj apartenantaj al tiuj asocioj.

La prefero estis por Brazilo, por la tiea multeco da sciencaj organizaĵoj, ĉe kiuj la religia sento kaj la luma kristana moralo troviĝis en la bazo de la idealo pri Amo kaj Frateco, tiel admirata de tiu Legio, krom ankaŭ pro la impona falango da mediumoj, riĉe dotitaj por la dorna komisio, kaj kies ekzisto en la lando de la Sankta Kruco estis registrita en la sliparoj de la Viglado.

En tiu sama nokto, forveturis el la kvartalo de la Viglado, direkte al Brazilo, malgranda karavano sub la komando de nia jam tre estimata amiko Ramiro de Guzman. Ĉar temis pri lumaj, tute senmateriiĝintaj Spiritoj, tial, pro la neneceso de transportveturiloj, ili dumvojaĝe uzis la flugkapablon, pli rapidan kaj konvenan al siaj spiritaj agadoj. Krom la sindonaj instruistoj Alcesto kaj Romeo, tiun karavanon konsistigis du kirurgoj, specialistoj en la scienco pri la fizika astrala organismo, kiuj respondecis pri la koncernataj pacientoj, same kiel ambaŭ Canalejas respondecis pri niaj malsanulaj ĉambroj. Kiel rajtigitoj de la direktoro, ili estis komisiitaj ekzameni la kapablecojn de la mediumoj, kies nomojn kaj laŭdajn referencojn liveris la Sekcio pri Eksterj Rilatoj, kaj de tiu ekzameno dependos la definitiva elekto de la vizitotaj asocioj.

Sed antaŭ ol tiu komisiono forveturis, la ĝenerala direkcio de la Instituto, lokita en la palaco de l' Templo, sendis telepatian mesaĝon al la spiritaj direktoroj kaj instrugvidantoj de la asocioj, al kiuj apartenis tiuj mediumoj, same kiel al ties propraj gvidantoj kaj apartaj protektantoj, por ilin peti pri la nepre necesa permeso kaj altvalora kunlaboro ĉe la aranĝotaj interkonsentoj kun iliaj protektatoj.

La servoj farotaj de la homaj perantoj – la mediumoj – nepre estu volontaj. Absolute nenion oni trudos aŭ postulos. Kontraŭe, la senditoj de la Instituto iris peti, en la nomo de la Legio de la Servantoj de Maria, pri ilia bonvola kunlaboro, ĉar estis principo de la inicaj skoloj, de kiuj estis adeptoj la direktantoj de la Korekta Instituto Maria el Nazareto, apartenanta al la Legio, nenion trudi al iu ajn, sed male persvadi al plenumado de la devo.

Post kiam oni venis al interkonsento per la telepatia kominikiĝo, estis decidite, ke la spiritaj gvidantoj de la elektitaj mediumoj sugestu al ili enlitiĝi pli frue ol kutime kaj metu ilin en staton de milda magnetisma dormo, kio ebligos al iliaj Spiritoj mensklarecon kaj agliberecon cele al la bona kompreno pri la

traktado, okazonta dum la nokto. Post kiam la dormo ilin eksterigos el la fizika korpo, ĉiun kandidaton oni kondukos al la sidejo de la asocio, al kiu li apartenas, ĉar tiun lokon oni elektis por la interparoloj.

Post finpretigo de la plano, forveturis de la Instituto la misiista karavano, konsistanta el ok personoj, nome kvar specialistoj de la Hospitalo kaj kvar asistantoj de la Viglado, por tiujn sekure gvidi ĝis la indikitaj lokoj.

Sonis ĝuste la dudek-tria horo en la simplaj kampaniloj de la unue vizitajtaj lokoj, kiam la sindonaj servantoj de Maria komencis ŝvebi super la pitoreskaj regionoj de la lando de la Sankta Kruco, sin direktante, sen ia hezito, al la centro de Brazilo.

La milda heleco, venanta el la lastaj fazoj de la plenluno, dolĉe verŝis, sur la dorson de la planedo por elprovoj, melankoliajn, sugestiplenajn tonojn, dum la vivaj odoroj de la brazila flaŭro, riĉa je bonefikaj esencoj, balzamis la atmosferon, kvazaŭ oni bruligus incensujojn da raraj parfumoj omaĝe al la eminentaj vizitantoj, sciante ties preferojn de orientaj inicitoj...

Tiam, konsultinte sian mapon kun la necesaj informoj, ili elektis kelkajn urbojn en la centra regiono de tiu granda lando, indikitajn de la Sekcio pri Eksteraj Rilatoj kiel havantajn seriozajn societojn por studo kaj praktikado de la psikaj sciencoj; kaj, sin dividinte en kvar grupojn, po nur du en ĉiu grupo, ili rapide atingis la celitajn puktojn, ĉar estis decidite, ke por la serĉado de la mediumoj ili vizitos kvar urbojn en ĉiu fojo kaj ke, post starigo de la definitivaj interkonsentoj, ili kolektiĝos en difinita loko de la Spirita Mondo kun ties gvidantoj kaj mentoroj, por nepre necesaj traktadoj rilate al la grava entrepreno.

Tial, dum tiu trankvila nokto en la brazila internlando, kie la kvieteco kaj la morsimpleco ne infektas per gravaj malpuraĵoj la socian medion, karitata agado de la spirita mondo efektiviĝis ĉe kelke da centroj de studo, en lokoj tre modestaj, sed kie tamen la sanktega lumo de la Frateco ĉiam ankoraŭ brilis en la senmorta kulto de la amo al Dio kaj al la proksimulo.

Elvolvinte sian celon, la senditoj petis la mediumojn, kies Spiritoj estis tien kondukitaj dum iliaj korpoj profunde dormis, pri ilia kompatema kunlaboro por helpi mizerajn sinmortigintojn, nekapablajn konvinkiĝi, sole nur per spiritaj rimedoj, pri la devoj de la spirita vivo. La bedaŭrindan staton, al kiu reduktiĝis tiuj malfeliĉuloj, la petantoj ne mankigis en sia longa elvolvo. *La mediumoj devos oferi grandan kvanton de siaj propraj fortoj por mildigi la suferadon de tiuj mizeruloj, kiuj frapos al iliaj pordoj*. Ili probable elĉerpiĝos en la karitata penado por sekigi iliajn larmojn kaj eĉ povos esti, ke dum tia kontakto ilin trafos kaj ĉagrenos impresoj pri neesprimeblaj koramarecoj, maltrankviliga angoro, perdo de la apetito, sendormeco, eĉ malpligrandiĝo de la natura korpa pezo. Sed la direkcio de la Instituto Maria el Nazareto garantiis reprovizi ilin, post la fino de ilia sindevontigo, per la konsumitaj fortoj, ĉu organaj, ĉu mensaj aŭ magnetaj. Krome, la Legio de la Servantoj de Maria, ekde tiu dato, neniam lasos ilin sen sia frata kaj dankema protekto. Se ili sin riskis por la plenumo de tiel grava kunlaboro, tio estis tial, ke ili opinias, ke *la mediumoj edukitaj laŭ la ora kristana moralo estas modernaj inicitoj kaj pro tio devas scii, ke la taskoj rilataj al iliaj postenoj en tia Skolo, al kiu ili apartenas, nepre devas obei al du esencaj kaj sanktaj principoj de la Kristana Inicado, heroe ekzemplitaj de la Eminenta Majstro, kiu ĝin postlasis: – Amo kaj Abnegacio!*

Ili tamen estos liberaj akcepti aŭ ne la inviton. La komisio distingiĝos per sia volonteco, estos pleumita sen ia ajn trudo, surbaze de la konfido kaj de la dudek gemediumoj, el inter kiuj tamen nur kvar sinjorinoj, humilaj, bonkoraj, de kies spiritaj envolvaĵoj radiis, ĉe la koro, lumfadenoj, senkondiĉe kaj abnegacie proponis siajn servojn al la senditoj de la Lumo, pretaj por la nobla laboro. El la viroj, nur du konsentis, certe ne movate de vera abnegacio sed fidelaj al siaj mediumaj devoj, tute simile al oficisto asidue

vizitanta sian laborejon pro sia nura devo de subulo. La ceteraj, kvankam honestaj, sinceraj en la idealo, al kiu ili sin donis pro amo al Jesuo, tamen senkuraĝiĝis por ia formala interkonsento. La montritaj bildoj, prezentantaj la debilan staton de la helpotaj pacientoj, ties transtomban turmentegon, sentigis al ili tielajn impresojn kaj teruron, ke ili preferis reteni siajn helpemajn impulsojn, tamen devontigante sin al konstanta helpo pere de la bonfara elsendo de sinceraj preĝoj. Ĉi tiuj estis do liberigitaj je ĉia rekta devoligo, kaj la vizitantoj rigardis plenkontentigaj la rezultojn de sia misio. Rimarkindis tamen, ke Brazilo estis indikita kiel preferinda loko, kie troviĝis mediumoj riĉe dotitaj, honestaj, sinceraj, absolute neprofitamaj!

Post tio sekvis la nepre necesaj ekzamenoj de la spirita organismo kaj materia envolvaĵo de ĉiuj, kiuj sin devontigis al tiu grava komisio.

Ĉe iliaj litoj, oni submetis iliajn karnojn portaĵojn al detala esplorado. La cerba vigleco, la kora funkciado, la harmonio de la sangcirkulado, la ĝenerala stato de la visceroj kaj de la nerva sistemo, kaj eĉ la funkcioj stomaka, rena kaj intesta estis zorge ekzamenitaj. La okaze observitajn misondojn oni ĝustatempe korektos pere de fluideca kaj magneta procedoj, ĉar ili ankoraŭ disponis dudek kvar horojn por la preparaj aranĝoj.

Oni poste transiris al la ekzameno de la fizika-astrala envolvaĵo, nome la perispirito. La Spiritojn de la ses kontraktitaj mediumoj oni kondukis al unu el la urĝahelpaj domoj, kiujn la Kolonio, al kiu ili devis doni sian karitatan kunlaboradon, tenis en siaj ĉirkaŭaĵoj aŭ proksime de la Tero mem – iaspeca Helpdepartemento kie ofte efektiviĝis gravaj esploradoj kaj alispecaj laboroj ligitaj al la Kolonio. Tie ili ricevis plendetalajn instrukciojn koncernajn al la plenumotaj servoj, iliaj perispiritoj estis ekzamenitaj kaj revigligitaj per aplikado de fluidecaĵoj ege bonefikaj por la celata entrepreno, la nombro kaj grado de ties vibroj estis analizitaj kaj la aperintaj ekscesoj aŭ mankoj estis korektitaj, por ke tiuj vibroj *kontraŭstaru, sen ŝanceliĝoj, kaj,*

*kiel nur eble, ankaŭ superregu, ilin korektante per la saniga efiko de sia vigleco* – la danĝerajn, malsanigajn, afliktoplenajn emanaĵojn el la mensoj de tiuj sinmortigintoj freneze obseditaj de plej ekstrema doloro! Oni eĉ povas aserti, ke la mediuma kontakto kun tiuj komunikiĝontaj Spiritoj ekestis tiuokaze, kiam, ilin interligante al la mediumoj per harmoniaj magnetaj fluoj, oni tiel estigis la simpatian altiriĝemon, la kombiniĝon de la fluidaĵoj, ja nepre necesan kondiĉon por fariĝo de tiel delikata kiel superbela speco de fenomenoj.

Fininte tiajn preparojn, oni rekondukis hejmen la surterajn kunlaborantojn kaj ilin liberigis de tia dormo, en kian oni ilin metis, por ke ili reprenu siajn materiajn korpojn tiam, kiam ajn ili deziros. Kaj, kiel senlacaj herooj de la frata amo, ĉiuj revenis al siaj postenoj en la Nevidebla Mondo, por sin donadi al nova serio da preparaj aktivecoj celantaj la laboron dum la morgaŭa nokto, kiam komenciĝos sinsekvo da seancoj en kvar urboj de la brazila internlando. Kaj nenion mirigan prezentas ilia agado, ĉar, kiel sciate, ĉiuj altrangaj inicitoj estas doktoroj pri Medicino, ankaŭ havantaj vastajn sciojn pri la fizika-astrala organismo.

Depost la reveno de tiu intertrakta komisiono, neordinara movado regis en la sekcioj de la Viglado kaj de la Hospitalo. La morgaŭan matenon oni informis nin, ke ĉe la vesperkrepukso ni forveturos por instrucela vojaĝo al la surteraj regionoj, pro kio forte ekĝojis niaj koroj, ĉar ni antaŭvidis la eblecon revidi niajn amikojn kaj familianojn. De la Viglado, ĉe la tagiĝo, forveturis teamoj da laboristoj kaj teknikistoj, portante aparatojn necesajn al la grava laboro okazonta je la unuaj horoj de la nokto. Kiel la direktantoj de nia Kolonio, tiel ankaŭ iliaj helpantoj, nome instruistoj kaj edukistoj, severe observadis la tie uzatajn metodojn, skrupule sekvis la regulojn postulatajn por la komunikiĝo inter la Tero kaj la Spirita Mondo, fidele plenumis la programojn starigitajn ĉe la orientaj sanktejoj, kie ili, antaŭ tre longe, ankoraŭ kiel homoj, lernis la gravajn Psikismajn Sciencojn. Pro tio, ankaŭ venis malsupren taĉmento da lancistoj,

kiuj, post rigora inspektado en la interno de la konstruaĵo, en kiu okazos la psikisma kunsido, aŭ, kiel ĝi ordinare estas nomata – la Spiritisma Seanco – garde posteniĝi, farante protektan rundon ekde la unuaj horoj post la noktomezo. Tiamaniere, la hindaj soldatoj, kvazaŭ nevenkebla baro, tute ĉirkaŭis la modestan domon, sidejon de la Spiritista Centro, elektita por la unua etapo de la laboro, kaj la respektegindan emblemon de la Legio oni starigis super la fasado de la konstruaĵo, nevideblan por la ordinara homa vido sed neniel malpli realan kaj veran, ĉar la nobla asocio estis provizore cedita al tiu eminenta kaj honorinda spirita institucio. Sindonaj laborantoj, sub la gvidado de teknikistoj kaj direktoroj de la Sekcio de Eksteraj Rilatoj, preparadis la ĉambron destinitan por la okazigo de la fenomenoj, farante ĝin kiel eble plej simila al tiuj medioj en la Instituto taŭgaj por la instruado al iliaj pacientoj. Dume, oni petis la spiritan direktoron de la koncernata Centro pri la komplezo mediume rekomendi, al ties surtera direktoro, ke li *tute ne enlasu laikan aŭ malseriozan ĉeestantaron en la ĉi-noktajn laborojn, pro ties graveco kaj delikateco,* ĉar ja nenion alian ol *legion da sinmortigintoj oni tien kondukos por helpo, kaj ankaŭ ĉar en tiaspecaj laboroj, kiuj nepre estu sekretaj, devas partopreni nur tiuj honestaj, diligentaj kaj sinceraj adeptoj de la kristana inicado jam reboniĝintaj per la lumoj de la evangeliaj virtoj.*

Oni malavare disverŝis magnetajn fluidaĵojn en la operacia ĉambro, pro duobla celo: – ilia utiligo kiel materialo necesa al la estigo de demonstraciaj bildoj dum la instruado al la pacientoj, kaj ilia refreŝiga kaj tonika efiko por kontraŭstari la malutilajn, maltrankviligajn kaj misharmoniajn vibrojn tiel de la ĉeestantaj afliktitaj Spiritoj, kiel ankaŭ de iu surtera kunlaboranto mem, kiu en tiu tago ne preĝus nek viglus kaj tiel kuntrenus sur la sanktegan tablon, ĉe kiu okazos la komunikiĝo kun la Nevidebla Mondo, la emanaĵojn el sia malordigita menso.

Por la finpreparo de ĉio, ĉe la vesperkrepusko komenciĝis la transportado de la Spiritoj vokitaj por tiu gravega entrepreno.

Sed en la mateno de tiu sama tago, post la prelego, kiu ĉiam sekvis la balzamefikajn aplikojn por nia kuracado, oni atentigis nin pri la graveco de tiu kunveno, en kiu ni estis partoprenontaj.

– Dum la vojaĝo, estos preferinde, ke ni detenu nin de ĉia ajn konversacio. Ni devos teni la ekvilibron de niaj mensaj fortoj, donante al ili noblan direkton. Ni provu rememori, dum la irado, la instruojn, kiujn de du monatoj ni ricevadis, ilin resumante kiel se ni estus submetiĝontaj al ekzameno. Tio, tenante nin koncentritaj, helpos niajn kondukantojn laŭdeve defendi nin, ĉar ni estis trapasontaj danĝerajn, malsuperajn regionojn de la Nevidebla Mondo, kie svarmas hordoj da banditoj de la malsuperaj spiritaj sferoj, kio evidentigis la gradan respondecon de tiuj, kiuj ricevis la komision gardi nin dum la veturo. La silento kaj la koncentriĝo, kiun ni kapablos observi, plirapidigos la nin trasportontajn veturilojn, tiel neebligante ĉian atakon de tiuj banditoj, kvankam la legianoj havis la certecon, ke ili povos facile nuligi iliajn probablajn sturmojn.

– Pro nenia ajn motivo ni povos apartiĝi de la grupo, eĉ ne pro la laŭdinta intenco viziti la Patrujon aŭ la familion. Tia maldisciplino povus kosti al ni multe da ĉagrenoj kaj larmoj, ĉar ni estis malfortaj, senspertaj, kaj apenaŭ konis la nevideblan mondon, kie svarmas delogoj, tentoj, hipokriteco, mistifikado, malico, ankoraŭ pli multe ol sur la Tero! En oportuna okazo, ni vizitos niajn karulojn sen malhelpoj, kiuj nin ĉagrenus.

– En la loko de la operacioj ni devos konduti kvazaŭ ni starus antaŭ la Plej Alta Tabernaklo mem, pro la respekteginda karaktero de tiu kunveno, kiun oni efektivigos post alvokoj al la sanktega nomo de la Plej Alta, kaj kiun ankaŭ alestos Lia Ununaskito pere de favorkoraj radiadoj el Sia granda frata amo, ĉar ja ĉi tion mem Li promesis al la sinceraj disĉiploj de Sia Sublima Doktrino, kiuj en Lia nomo kunvenos por la komunikiĝo kun la Ĉielo.

– Se estas devo de honesta kaj serioza kristano subpremi pasiojn kaj malpurajn dezirojn, sin apogante al la bonvolo por

ilin superregi dum la ĉiutaga revirtiĝado, do en la okazo, kiam ni troviĝos en la respekteginda Templo, kie oni celebros la subliman misteron de la interfratiĝo de mortintoj kaj vivantoj por interŝanĝi ideojn kaj tiamaniere sin reciproke klerigi, instrui kaj inspiri, des pli grava devos ĉiuj, homoj kaj Spiritoj, sin antaŭgardi per la plej dignaj sintenoj, vokante al si la plej purajn pensojn, por aŭreoli siajn mensojn per nobleco konvena al tiu sankta evento; forgesi ĉagrenojn, trivialajn zorgojn, tre alten levante la nivelon de siaj karitataj sentoj por bonfarado al la proksimulo, ĉar al ni konvenus ĉiam memori, ke al nia grupo apartenas estuloj ankoraŭ pli malfeliĉaj ol ni mem, kiuj restas katenitaj al tielaj nerva malordo kaj mensa taŭziteco, ke ilia stato spertis ankoraŭ nenian mildiĝon, kaj pri kiuj la frateco ordonas, ke ni ilin helpu malgraŭ nia malforteco, kunlaborante per firmaj, bonvolemaj pensoj kaj al ili sendante favorajn vibrojn. Per tia sinteno ni ilin ĉirkaŭos per pli freŝaj energioj, kiuj, mildigante la ardecon de la ilin premantaj angoroj, al ni ankaŭ havigos la meriton de la vera kunlaborado.

– Oni plu diris al ni, ke sur la Tero ne ĉiuj homoj, enlasitaj en la sanktan kunvenejon por la elvokoj, observas tiun moralan kaj mensan higienon, necesan al la bona irado de la interkomunikiĝo kun la Nevidebla Mondo. Ke nuntempe, inter la enkarniĝintoj, eĉ frivoleco kaj ekscesoj regas en la interrilatoj kun la mortintoj, kio estas bedaŭrinda, ĉar kiu kondutas frivole aŭ senpripense ĉe tiel respektinda kiel delikata afero, tiu amasigas sur sin gravegajn respondecojn, kiuj amare pezos sur lia konscienco en la estonteco. Ĝuste tial maloftiĝas tiuj spirite lumaj seancoj, dum kiu oni povus ĝui la vidon de multo el la spirita grandiozo, ĉar ne ĉiam la anoj de la partoprenanta teamo estas efektive indaj je la alta komisio, kiun ili pretendas plenumi. Ili ja forgesas jenon: por ke la veraĵoj de la ĉielaj misteroj elmontriĝu al ilia intelekto, travidiĝu al ilia kompreno, malkaŝante sian esence propran sublimon, estas kaj ĉiam estis necesaj al ties esplorantoj la morala kaj mensa memdisciplino, antaŭa

individua sinpreparo, kiu de ĉiuj postulas efektivan internan aliiĝon, aŭ almenaŭ la fervoran deziron revirtiĝi, firman strebadon al la vera celo de Bono!... Sed ke, eĉ tiel kaj malgraŭ ĉio, Frateco ordonas, ke anĝelaj Spiritoj ofte turnu sian atenton al la societoj, kie okazas tiuj misuzoj, por, karitate profitante la plej konvenan oportunon, ilin viziti kaj admoni ties senprudentajn anojn, ĉi tiujn kiel eble instrui, veki en ilia konscienco la ĝustan komprenon pri la terura respondeco, per kiu ili sin ŝarĝas, ĉar ili ja ne volas surmeti la tunikon el virtoj, montritan en la malnova parabolo de la Ĉiela Gvidanto kiel devigan veston ĉe la tablo por la dia festeno kun la socioj de la Spirita Mondo![1] Kaj ke, tiel agante, tiuj Spiritoj faras nenion alian ol observi principojn de la frateco ekzemplita de la Nazareta Majstro mem, kiu ne disdegnis malsupreniri el diaj sferoj en la turmentoplenan abismon de la homaj malicoj por montri al la pekuloj la vojon de la Devo kaj la praktikadon de la regeneraj virtoj!

Ni do ekveturis, ĉe la vesperkrepusko, direkte al la surteraj regionoj. Gardis nin peza eskorto da lancistoj, skipoj da asistantoj, psikistoj kaj teknikistoj de la Viglado, ĉar neniu, el ia ajn sekcio de la Kolonio kaj eĉ el la Templo mem, vizitus la Tero aŭ aliajn najbarajn regionojn sen la altvalora helpo de la sindonaj kaj kuraĝaj laboristoj de tiu Departemento, kiuj efektive respondis pri la tieaj plej penigaj taskoj. Ricevinte sufiĉan instruadon, ni tial kondutis tute konforme al la ricevitaj rekomendoj. Niaj kamaradoj en malpli bonaj kondiĉoj, ĝuste tiuj, kiujn koncernis tiom multe da aktivecoj, estis transportataj en specialaj veturiloj, tute fermitaj kaj gardataj de la fidela hinda trupo, kvazaŭaj moveblaj izolejoj por pestuloj, kio neebligis al ni ilian vidon. Sed iliaj korŝiraj krioj, iliaj ĝemoj kaj konvulsia plorado, kiujn ni tiel bone konis, klare atingis nin, vekante en ni kortuŝecon kaj profundan kompaton. Afliktoplenaj, ni serĉis helpon por la angoro, kiun tio kaŭzis al ni, en la prudentaj konsiloj

[1] Sankta Mateo, 22:1 ĝis 14.

de Romeo kaj Alcesto, niaj karaj mentoroj, firme tenate niajn mensajn fortojn ĉe karitata vibrado favora al ili, kio ja bonfaris eĉ nin mem.

Ni atingis la celon de la vojaĝo, kaj rava vido surprizis niajn okulojn, kutimintajn al la malgajaj brumoj de la Hospitalo. Estis rimarkinde, kiel ni sur la Tero povis pli bone rigardi ĉion ĉirkaŭan, ĉar neniam antaŭe ni vidis konstruaĵon tiel pompe ornamitan per lumon, kiel tiu modesta domo, sur kiun verŝiĝis brilegoj, radiantaj el la Supro kaj ĝin envolvantaj per kvazaŭa kristalbrila brakumo! Supre staris, kun la konataj komencliteroj, la radiluma Kruco – emblemo de la servantoj de Maria, rezidantaj en la Instituto, kies blua scintilado konfuzis kaj ravis. Lancistoj gardostaris ĉe la malgranda domo, aliiĝinta en stelpalacon, kaj eĉ ia luma ŝnuro, kvazaŭ defendilo el orkoloraj nebuloj, ĝin zorge ĉirkaŭis, en dumetra distanco de la strato. Al spertulo ne estus malfecile kompreni la celon de tiaj antaŭzorgoj postulataj de la eminentaj servantoj de la Instituto de Maria el Nazareto: eviti la enŝoviĝon en la operaciejon eĉ de nepuraj mensaj emanaĵoj, por ĝin kiel eble antaŭgardi kontraŭ ĉiaspecaj malutilaj atakoj el la ekstero!

Ni eniris kaj nia miro kreskadis...

La aktiveco en la spirita sfero estis intensa sed, kiel facile konstateble, la parto, kies plenumo koncernis la homon, ŝajnis malgranda.

Enirinte en la salonon destinitan por la nobla evento, ni nur vidis maljunan viron, absorbiĝe leganta kompendion pri transcenda filozofio, kio ŝajnis entuziasmigi lin, ĉar dum li profunde sin koncentris sur la instruoj, kiujn li ĉerpadis en la saĝoplenaj paĝoj, el lia frunto radiis lumaj fajreroj, kiuj lin alte rekomendis al la juĝo de la Nevidebla Mondo. Li evidente komprenis la gravecon de la laboroj en tiu nokto, pri kiuj li ankaŭ respondecis, kaj pro tio li ĝustatempe sin preparadis, starigante harmoniajn komunikajn fluojn inter si kaj siaj tre amataj spiritaj amikoj. Li estis la surtera direktanto de la domo.

La vidinda sceno, cetere, estis grandioze impresa.

La limoj de la laborĉambro malaperis, kvazaŭ oni magie formovis la murojn por plivastigi la lokon. Anstataŭ ili ni vidis rondajn vicojn da sidlokoj, similajn al balkonoj, kaj la tuto havis la aspekton de akademia amfiteatro. Niaj gvidantoj montris al la balkonoj, indikante la al ni rezervitajn lokojn. Ni sendiskute obeis, kaj dume la malfeliĉaj kunuloj, kies grava stato motivigis tiun laborplenan iniciaton, estis pacience kondukataj de siaj flegistoj kaj kuracistoj-asistantoj kaj sidigataj en la plej antaŭa vico de la balkonoj, en loko adekvata al ilia stato.

En la ĉambro jam troviĝis la surteraj personoj invititaj por ĉi tiu nokto, nome la elektitaj mediumoj, la rektanimaj, bonvolemaj kunlaborantoj, ĉiu okupanta la koncernan lokon. Al ĉi tiuj montriĝis en la kruda ĉambro nenio alia, krom la blankaj, senornamaj muroj, la tablo kovrita per simpla tuko, libroj, blankaj paperfolioj dismetitaj proksime al la manoj de la mediumoj kaj kelke da krajonoj. Sed la vidivaj mediumoj perceptis ion nekutiman, eksterrutinan, kaj timeme sciigis al siaj kolegoj, per diskretaj konfidencoj, ke *gravaj vizitantoj el la Transmondo honoras la Domon en ĉi tiu nokto,* kaj al tio ili aldonis la priskribon de iuj detaloj, kiel ĉeesto de la lancista taĉmento, de la kuracistoj kun siaj kiteloj kaj emblemoj kaj la diligentaj flegistoj.

Al ili tamen oni vere ne kredis, ĉar ankoraŭ dum la unua jardeko de ĉi tiu jarcento multaj spiritistoj, eĉ tiuj pli forte konvinkitaj, tre malfacile akceptis la eblecon, ke en la Spaco estas necesa la agado de militistoj, de flegistoj kaj kuracistoj, kiuj praktikus sian noblan sciencon por helpo al elkarniĝintaj malsanuloj...

Sed se ne estus la malhonora mizero, kiu nin katenis al spirita malsupereco kaj al ni neebligis pli ampleksan vidpovon, ja naturan en aliaj kondiĉoj, ni certe kapablus vidi la scenejon en ties respekteginda realeco, anstataŭ malklare percepti tion, kion niaj gvidantoj kaj mentoroj rigardis en la tuta brilego de ties glora signifo:

– En la mezo de la salono elstaris la labortablo de la surteraj kunlaborantoj, ĉe kiu sidis la prezidanto kune kun la grupo da mediumoj kaj ceteraj partoprenantoj, por la starigo de simpatia, altira pensofluo. Antaŭe krudforma, kia ni ĝin vidis enirante, nun ĝi fariĝis brilblanka, ĉar el la foraj regionoj de la Supera Transmondo verŝiĝis sur ĝin brilega lumkaskado, ĝin altigante al la nivelo de respekteginda altaro, kie la celebro de la Frateco inter la homoj kaj la Spiritoj okazos sub la sankta protektado de la Ŝafido de Dio, kies honorindan nomon oni tie alvokis.

– Ĉirkaŭprenante tiun unuan magnetan fluon, estigitan de la harmoniaj vibroj de la enkarniĝintoj, estis dua, formita de ĉarmaj, diafanaj estuloj, kies vizaĝojn ni apenaŭ povis fikse rigardi pro la intensaj briloj de tie elradiantaj, kiuj ilin pli ĝuste similigis al sorĉe ravaj siluetoj, ornamitaj per kristalpuraj radioj: tio estis la Spiritoj Gvidantoj de la vizitata Centro, la protektantoj de la mediumoj, Spiritoj helpantaj kaj familiaraj de la ĉeestantoj, kiuj abnegacie, eble de jarmiloj sin dediĉadis al ilia spirita elaĉeto!

– Krom tiu ĉeno, okupante pli grandan spacon en la ejo, kaj, samkiel la du unuaj, ronde aranĝita etendiĝis la pli vasta ĉeno formita de la vizitantoj kaj kiun tutan konsistigis la fakularo komisiita de la Departemento de Viglado kaj subordigita al la Sekcio de Eksteraj Rilatoj, sub la direktado de nia amiko Ramiro de Guzman.

La estro de la Domo sidis ĉe la tablokapo, honorloko, kiu postulas de sia okupanto noblan inklinon al Bono kaj kiu, laŭ la hindaj procedoj uzataj en la Instituto, estis la ŝlosila punkto de tiu cirklo favoranta la gravan entreprenon; ĉe tiu loko, krom li, ankaŭ staris la spirita direktanto de la domo kaj la estro de nia ekspedicio, Ramiro de Guzman, kaj pli supre posteniĝis Romeo kaj Alcesto, la rektaj instruantoj de la turmentata grupo, kies delikata partopreno efikos pere de la parolo de la surtera instruanto – la prezidanto de la seanca tablo.

Al ambaŭ koncernas kolekti la vibrojn de la pensoj kaj paroloj de la prezidanto, elvolvitajn dum la grava evento; kunigi

ilin, kun la disponeblaj kvintesencaj elementoj, intermiksante la tuton kun la magnetaj ondoj de la enkarniĝintaj partoprenantoj; ilin prilabori kaj transformi en scenojn, donante al ili vivon kaj movon, ilin konkretigante kaj materiigante ĝis tia grado, ke tiuj malfeliĉaj elkarniĝintaj spektantoj povu ĉion facile kompreni. Pro tio ili ricevas la kunlaboron de la fakuloj disponigitaj de la Viglado, t.e. de la Sekcio de Eksteraj Rilatoj, kaj la amoplenan, nepre necesan helpon de la sciencaj kabinetoj lokitaj en la Hospitalo, direktataj de Teokrito.

Niaj kuracistoj kaj flegistoj jam troviĝis sur siaj postenoj, ĉu apud la mediumoj, ĉu apud la malsanuloj, irante kaj reirante, fidelaj al tiu apostoleco, tiel ĉarma kiel sublima, kiun en la Transmondo la Medicino asignas al ili – eĉ pli sankta ol tiu sur la Tero, ĉar transmonde ili sin dediĉas al tiel noblaj laboroj sole nur sub la altega insppiro de Amo kaj Frateco.

... Kaj, serene starantaj sur siaj postenoj, deĵoris la lancistoj – tiuj silentaj kaj bravaj kunlaborantoj – kies potenco troviĝis ne en la lancoj, kiuj en liaj manoj ne esprimis perforton, sed ja en liaj mensoj, rigore edukitaj en la forĝejoj de aŭsteraj laboroj, de netrompeblaj disciplinoj, de abnegacioj kaj lernadoj nobligitaj ĉe la doloro de l' sinoferoj!

Ĉiu kunlaboranto do okupis la koncernan lokon, kaj nun, kiel preskribis la inicaj reguloj, oni devis fari la nomvokadon, kies plenumo apartenis al la frato Grafo de Guzman, kiel estro de la multnombra karavano. Alestis, por la laboro dum tiu nokto, la komisiitoj de la estroj de l' Instituto Maria el Nazareto. Vokite, la spirita estro de la Societo same agis, informante, ke ankaŭ liaj subalternuloj ĉeestas por la sanktiga tasko. Koncerne la surterajn kolegojn, la homajn helpantojn – ne ĉiuj akurate kolektiĝis je la difinita horo! La nomvoko, kiu ilin celis el la spirita mondo montris nenion alian ol tion, ke tri personoj forestas je la plenumo de la Devo...

Fine komenciĝis la laboroj, en la nomo de la Plejaltulo kaj sub la petita protekto de la Plej Alta Majstro el Nazareto. Videble

inspirata de la potencaj pensoj de la ĉeestantaj, lumaj estuloj, la prezidanto de la Domo eldiris varman preĝon, profundan kaj kortuŝan, kiu inklinigis niajn korojn al emocio kaj al pie enmemiĝo. Kaj dum li preĝadis, pli intense faladis sur la tablon la neĝbluaj radioj venantaj de la Supro kvazaŭ malavaraj benoj, kiuj al nia imago ŝajnis ekbriloj de la kompatema rigardo de Maria, gvidanta siajn servantojn en la karitata misio helpi malfeliĉajn pekintojn.

Sed ni petegu la ĉeestantajn mentorojn kaj protektantojn, ke ili favoru nin per la kapablo de la malproksima vidado, kiun ni ankoraŭ ne havas sed kiu ĉe ili esprimas unu el la belaj atributoj de la farita progreso, kaj ni respektoplene laŭiru tiun bluan kaskadon, kiu pompe ornamis la modestan sidejon de la societo, kie kunvenas la disĉiploj de la granda inicito Allan Kardec, por provi, ĉu ni sukcese malkovros ĝian originon...

Jen ni estis kontentigitaj, sub la kondiĉo, ke ni prenu la leganton kun ni dum tiu ekskurso por la dezirataj esploroj... Celumite, la magia binoklo montris al ni, ke sub la puregaj ekbriloj, kiuj penetradis la krudan konstruaĵon, malaperis la limoj, ĝin enfermintaj en la kadro de simpla surtera domo, kaj ĉi tiu transfiguriĝis kiel celo de amaj radioj venantaj el la direktoroj de nia Instituto. Ni vidis, reflektitan en la senmakulaj ondoj de tiuj plendolĉaj scintiladoj, la bildon de tio, kio okazas en la sekreta kabineto de la Templo-sanktejo, kie kunsidas tiuj, kiuj respondecas, antaŭ la Plej Alta Estraro de la Legio, pri ĉiuj loĝantoj de la Kolonio. Ankaŭ tiuj aŭsteraj majstroj do alestas la kunvenon, en kiu ni partoprenas, ĉar ni ja ilin vidas: kiel ni, ili kunsidas ĉe sankta, senmakule blanka tablo – la tablo por la komunikiĝo kun la Plejsupro –, respekteginda altaro ĉiutage atestanta iliajn noblajn idealistajn manifestiĝojn, iliajn profundajn studojn, kiel kristaniĝintaj scienculoj, pri la Dia Kreado kaj la gravaj problemoj rilataj al la homo; iliajn fervorajn vibrojn de amo kaj respekto al la Ĉiopova Patro kaj al la proksimulo! Temas pri dek du viroj, belaj, noblaspektaj, kies aĝon, oni je la unua

vido ne povus precizigi, sed pli atenta observado montrus, ke ĝi ja povus esti tiu plej kara al ilia koro aŭ al iliaj rememoroj! De iliaj seriozaj, pripensantaj mensoj, samkiel de iliaj noblaj koroj, radias arĝentlumaj scintiloj, atestantaj la firman solidecon de la virtaj principoj, kiuj ilin impulsas!

Ni ne vidas alestantojn al ilia kunsido. Ili estas solaj, izolitaj en la ĉambro, kiun sanktigas la vibroj de la preĝoj eliĝantaj el iliaj animoj, suprenlevitaj de la Fido! Eĉ iliaj rektaj disĉiploj mem, tiuj, kiuj ĉiutage kunlaboras por la prospero kaj bonstato de la Kolonio, ne rajtas partopreni en tiu sekreto. Temas pri intima, ekskluzive privata kunveno! Ili bezonas homogenecon, la plej firman, kiun povus disponi iliaj fortoj celantaj la Bonon! – *ĉar gravas subteni la ĝeneralan harmonion de la grupo, kiu kuraĝis kunsidi en la nomo de la Superega Kreinto de la Universo kaj sub la protekto de Lia Solenaskito, kies ĉeesto estis fervore petita en la komenco de la laboroj.* Antaŭ Maria ili respondecas pri ĉio okazonta en la humila kunvenejo de disĉiploj de Allan Kardec, sur kies supro oni starigis la emblemon de Sia Legio! Kaj kio estas ankoraŭ pli grava, antaŭ Ŝia Respekteginda Filo, la Majstro kaj Redemptoro, al kiu ŝuldas obeon ĉiuj Legioj, ĉar Li estas la Plej Alta Direktanto, al kiu la Kreinto donis la povon elaĉeti la Teron kaj ties homarojn.

Ŝi ja respondecas, krom ankaŭ ili, pri la laboroj en la kunvenejo, tial estos nepre necese tenadi la harmonion por sukcesigi la aferon!

Por ke la Amata Majstro estu ankoraŭfoje glorata; por ke Lia Respekteginda Nomo ne estu preteksto por frivolaĵoj; por ke oni ne faru la sakrilegion degenerigi la alvokon adresatan al la Senmakula Ŝafido de Dio en sensignifan, banalan formulon; por ke Li ĉeestu tiujn laborojn kaj ja estu efektiva Lia Ĉeesto, en spirito kaj vero, en la templo de la sekvantoj de Kardec, vizitata de iliaj zorgatoj, ili tie vibras, en sekreta kunsido, altigante, per sublimaj streboj, siajn pensojn, koncentritajn kaj firmajn, etendante, per la plej bonaj energioj de siaj mensoj, la proprajn

animojn en sia preĝo, por ke ĉiuj – ja ĉiuj senescepte! – partoprenantaj en la grava kunveno, meritu la ĉeeston de la Plej Alta Konsolanto kaj tiel ekestu la nevenkeblaj, sanktaj kaj puraj fluoj konvenaj por tiu nokto, ligilo nepre necesa inter la ĉeesto de la Dia Majstro kaj la surtera spiritista seanco, serioza kaj bone direktata!

Ĝuste tial la ceteraj servantoj, kvankam honestaj, sindonaj kaj sinceraj, ne povas ĉeesti tiun gravan kunvenon, kiu havas lokon en la Transmondo. Ankoraŭ ne prosperis al ĉi tiuj atingi vibrostaton perfekte egalan al ilia, kiel ĝin necesigas la sankteco de tia mandato. En la vasta kolonio de la Instituto Maria el Nazareto, nur tiuj dek du majstroj de la inicado perfekte identiĝas laŭ moralaj kvalitoj, niveloj de virto kaj sciado kaj spirita stato, por la kunuleco ĉe tiu sublima kunsido!

Sed malgraŭ tio ili estas simplaj kaj modestaj. Ili konscias, ke el si mem ili tre malmulton povas disdoni al tiuj, kiuj plej bezonas kaj suferas, ĉar ili opinias malgranda sian provizon da scioj, kvankam longa estis ilia vojo al spertiĝo, la pilgrimado sur la irejoj de sinofero kaj larmoj! Ili sekve ne malscias, ke ili ankoraŭ restas malproksime de la perfekteco! Sed ili klopodas iradi per ĉiam pli firmaj paŝoj cele al la grandioza flegata idealo – la definitiva unuiĝo kun Jesuo, kaj tiel ili vidigas, per nedubelaj atestoj, ke nek personaj pasioj nek malpuraj deziroj plu ŝancelas iliajn volojn funde harditajn en Amo, Justeco kaj Devo!

Tiel, formante harmonian grupon, ili preĝas kaj petegas, kaj neniu rigardas sin sufiĉe inda esti nomata majstro aŭ estro de la ceteraj! Ili nur scias, ke ili devas servi, ĉar ja nenio alia ili estas ol servantoj de granda organizo, kies reganta leĝo estas la amo al la proksimulo, la sindono al noblaj aferoj, la justeco, la abnegacio, la laboro, la progreso por konkero de tio plej bona! Por ili, la vera estro, la Majstro – estas Jesuo el Nazareto – kaj kiel tian ili honoras lin kaj lin respekte alvokas ĉiam, kiam estas postulate de la cirkonstancoj! Kaj kiel servantoj, kiel disĉiploj kaj subuloj, ili strebas fari noblajn agojn, konkeri meritojn por altiĝi en la juĝo de la Amata Sinjoro!

Ili fervore kredas, ke la Eminenta Instruisto, kiun ili petegas pri helpo kaj protekto, ne malatentis la alvokojn, elsenditajn el la plej sentema profundo de iliaj Spiritoj; kontraŭe, ke Li ja malsuprenvenis, favorkora kaj tenera kiel ĉiam, ne nur en la purbrilan sanktejon, en kiun nur ili rajtas eniri, sed ankaŭ en la modestan dometon kie okazas la festeno de Frateco, al kiu ankaŭ venis humilaj viroj kaj virinoj, ankoraŭ enkarniĝintaj, kiuj penege treniĝas tra la dornoj de la elprovado por la plenumo de elaĉetaj lernadoj. Tion atestas la torento el spirita lumo, kiu ĝin sanktigis! Ĉar ilia certeco pri la ĉeesto de Jesuo al la kunvenoj nobligitaj de la virtoj kaj moralaj kaj intelektaj voloroj de ties direktantoj, ĉu enkarniĝintaj, ĉu elkarniĝintaj, ja venas de tio, ke el ilia spirita aŭdosento neniam forviŝiĝis la miregindaj esprimoj de tiu amoplena, neforgesebla kaj sublima voĉo, stariganta la senmortan promeson:

*"Kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili"* [1]

Kiel kutime okazas en la veraj kunvenoj de la spiritisma-kristana inicado, kies noblaj principoj postulas de ties adeptoj, kiel nepre necesan kondiĉon, la moralan kaj mensan renoviĝon, en tiu nokto, memorinda por ĉiuj anoj de mia malfeliĉa legio, oni elektis la evangelian temon por studo kaj komentarioj. Kiel ni vidas, la instruon proponis Jesuo, kiun oni tie rigardis kiel Ĉefinstruiston, Honoran Prezidanton, kies lecionoj formis la fundamenton de ĉio, tie okazonta.

Oni do komencis la legadon de la Evangelio, kiun sekvis rava, fekunda komentario de la surtera prezidanto. La klarigaj paraboloj, la grandanimaj kaj amoplenaj faroj, la neforgeseblaj promesoj ankoraŭfoje kortuŝis la lernantojn de la Doktrino de Allan Kardec, sidantajn ĉe la tablo, kaj tiam, *la unuan fojon,*

[1] Sankta Mateo, 18:20.

dolĉe resonis en la interno de ĉiu el ni la dia invito al elaĉeto – ĉar ĝis tiu momento ni ankoraŭ ne aŭdis samspecajn predikojn. Por la tie alestantaj homoj, tio estis nur la frato-prezidanto, leganta kaj komentarianta la elektitan temon, en momento de brilega inspiro, kiam de la Supro ŝpruce kaskadis vivegaj, radilumaj intuicioj, rebildigantaj la longan vicon da ekzemploj de la Dia Modelo kaj la esprimojn de Lia senmakula moralo. Sed por la Spiritoj amase kolektiĝintaj en la ĉambro, nevideblaj por preskaŭ ĉiuj surteraj partoprenantoj, kaj ja aparte por la malfeliĉuloj, tien kondukitaj por instruiĝi, estis multe, multe pli ol tio! Por ĉi tiuj tio estis bildoj, figuroj, sinsekvoj, kiuj agitiĝas ĉe ĉiu frazo de la parolanto! Tio estis ia leciono – ja stranga, originala kuracrimedo! – kiun oni donas la ni kiel medikamenton por mildigo de niaj mizeroj! La parolo, vibrado de la kreiva penso, resonante per sonoraj ondoj, en kiuj rebildiĝis la mensaj imagoj de tiu ĝin elsendanta, kaj disvastiĝante tra la ĉambro saturita per taŭgaj fluidecaj, magnetaj substancoj kaj animalaj fluidaĵoj de la enkarniĝintaj mediumoj kaj ĉeestantoj, estis tuj utiligata kaj konkretigita, videbliĝante dank' al naturaj efikoj, kiujn estigis la mensaj fortoj de la Protektantoj, kunsidantaj en la Templo, kune kun tiuj de la ceteraj kunlaborantoj. Pliintensiĝis la agado de la teknikistoj de la Viglado, komisiitaj por la delikata tasko kaptadi la ondojn kie rebildiĝis la mensaj imagoj, kunordigi kaj stabiligi la sinsekvojn, ktp, ktp. Kaj tiele prilaborita en la mirinda laboratorio de la menso, muldita kaj retenita de eminentaj specialistoj sin dediĉantaj al la bono de la proksimulo – la parolo korpiĝis, fariĝis realaĵo, ĉar ja kreiĝis la vivanta sceno de tio, kion oni legis kaj komentariis!

Sur la balkonoj, ĉirkaŭgarditaj de lancistoj, kiel malliberuloj de la peko, kiaj ni ja estis, ni ĝuis la senatendan kaj agrablan surprizon spekti la elvolvon de la elektitaj rakontoj, moviĝantan sur la flambrila lumfasko, kiu, venante de la Supro, lumigis la tablon kaj la ĉambron. Se oni aludis la senkomparan personon de la Nazareta Majstro – jen aperis la bildo de Lia respekteginda

figuro, *kian ĉiu el ni kutimis imagi en la penso detempe de la infaneco!* Se oni rememorigis Liajn farojn, Lian vivon el sublimaj ekzemploj, Liajn neforgeseblajn agojn kiel Senkondiĉa Protektanto de la suferantoj – tia ni Lin vidis, kiel Lin priskribas la evangelia teksto: – bonkora kaj amoplena, disdonanta aromojn de Sia Amo kaj de la diaj virtoj, kies Sublima Relikvujo Li estis – al malriĉuloj kaj suferantoj, al blinduloj kaj paralizuloj, al maniuloj, al frenezuloj kaj lepruloj, al nekleruloj kaj al infanoj, al maljunuloj kaj al tiuj de bona volo, al pekuloj kaj adultulinoj, al impostistoj, al samarianoj, al doktoroj, al senesperuloj kaj afliktitoj, al malsanuloj en la korpo kaj en la spirito, al pentantoj, kiel ankaŭ al la kredantoj de Lia Doktrino el Lumo kaj al Siaj apostoloj mem!... kaj dume la prezidanto – kiu ne vidis per la materiaj okuloj tiujn majestajn scenojn, eliĝantajn el liaj legado kaj komentarioj, sed kiu kortuŝiĝis pro la harmoniaj kaj dolĉaj vibroj, kiuj ilin estigis – eldiradis kaj klarigadis la ravajn, neforgeseblajn parolojn, kiuj tra la jarcentoj forviŝis tiom multe da larmoj, kvietigis tiom multe da soifantaj koroj, aliigis tiom multe da angoraj duboj en la serenecon de solida kaj nerompebla konvinkiteco:

> "– Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos. Metu sur vin mian jugon, kaj lernu ĉe mi, ĉar mi estas milda kaj korhumila; kaj vi trovos ripozon por viaj animoj. Ĉar mia jugo estas facila, kaj mia ŝarĝo estas malpeza."
>
> "– Feliĉaj estas la plorantaj kaj suferantaj, ĉar ili konsoliĝos. Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos. Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo."
>
> "– Feliĉaj estas vi malriĉuloj, ĉar via estas la regno de Dio. Feliĉaj estas vi, kiuj nun malsatas, ĉar vi satiĝos. Feliĉaj estas vi, kiuj nun ploras, ĉar vi ridos."
>
> "– Ĉar la Filo de homo venis, por savi tion, kio estis perdita."

"– Kaj estas la volo de Tiu, kiu min sendis, ke el ĉio, kion Li donis al mi, mi ne perdu ion."

"– Se vi volas eniri en la regnon de Dio, venu, levu vian krucon, kaj sekvu min." [1]

"– Kiel mi vivas, diras la Sinjoro, la Eternulo, Mi deziras ne la morton de malvirtulo, sed ke la malvirtulo deturnu sin de sia vojo kaj restu vivanta." [2]

"– Mi estas la granda kuracisto de l' animoj kaj mi venas alporti la kuracilon, kiu devas vin resanigi; la malfortuloj, la suferantoj kaj la malsanuloj estas miaj preferataj filoj, kaj mi venas savi ilin. Venu do al mi, vi ĉiuj, kiuj suferas kaj estas ŝarĝitaj, kaj vi estos malŝarĝitaj kaj konsolataj."

"– Mi venas instrui kaj konsoli la neniohavajn malfeliĉulojn; mi venas diri, ke ili levu sian rezignacion al la nivelo de siaj provoj; ili ploru, ĉar la doloro estis sanktigita en la ĝardeno de l' Olivarboj; sed ili esperu, ĉar la konsolantaj anĝeloj ankaŭ venos sekigi iliajn larmojn."

"– Viaj animoj ne restas forgesitaj; kaj mi, la dia ĝardenisto, kulturas ilin en la silento de viaj pensoj."

"– Dio konsolas la humilulojn kaj donas al ili la forton, kiun ili petas de Li. Lia potenco kovras la Teron, kaj ĉiam apud larmon Li metis ian balzamon."

"– Nenio perdiĝas en la regno de mia Patro, kaj viaj ŝvitoj, viaj afliktoj formas la trezoron, kiu vin riĉigos en la superaj sferoj, kie la lumo anstataŭas la mallumon kaj kie la plej nuda el vi ĉiuj estos eble la plej brila." [3]

---

[1] Jesuo Kristo – La Nova Testamento.
[2] Jeĥezkel 33:11 – La Malnova Testamento.
[3] La Evangelio laŭ Spiritismo, de Allan Kardec. (Komunikaĵo de la Spirito de la Vero).

Kaj ekestis rava sinsekvo da scenoj, el kiuj elstariĝis la Amoplena Konsolanto, disradiante nekontraŭstareblajn invitojn al ni, suferantaj kaj senesperaj pekintoj, dum la preleganto rememorigis Liajn diajn farojn!...

Religia silento regis en la balkonoj, la vibrado el nekonataj emocioj ekflamigis, en la sensivaj profundoj de niaj turmentataj kaj malĝojaj Spiritoj, aŭroron de konfido, preludon al la Fido, nin instigonta al la elaĉetaj laboroj. Kaptite de la interesoj de tiu forte alloga doktrino, ni raviĝe rigardis tiujn signifoplenajn bildojn, momente kreitajn por nia instruado, kaj en kiuj ni distingis la Nazaretanon, helpantan la malfeliĉulojn, dum la dolĉa voĉo de la parolanto, envolvita en la fluidecaj, ankoraŭ pli dolĉaj ondoj, radiantaj el la karitata penso de la anĝelaj estuloj, kiuj nin protektis, karese predikadis, per tonoj, kiuj resonis en la plej profundo de niaj Spiritoj soifantaj konsolon, kvazaŭ ili por ĉiam gravuris en ties plej kaŝaj anguloj la senkomparan figuron de la Ĉiela Kuracisto, kiu nin nepre resanigos! Tiam ni sentis, ke la unuan fojon, de post multe da jaroj, la Espero etendis sian lumomantelon super niaj animoj, ombritaj de malluma senkuraĝeco kaj malpia nekredemo!

Subite la angorplena ekkrio de ekstrema malespero rompis la majestecon de la religia silento benanta la kunvenejojn!

Unu el niaj mizeraj samsortuloj, ĝuste el tiuj, kiujn dum la malliberigo en la sinistra Valo ni alnomis “disŝiritoj” pro tio, ke ili konservis sur sia astrala korpo la tragikajn signojn de la disfrakaso de iliaj karnaj envolvaĵoj sub la radoj de pezaj ferveturiloj, kaj kies ege grava stato de nekomprenemo kaj sufero nepre bezonis la homan helpon por esti mildigita – ankaŭ esperante pri kvietigo al la kruelaj turmentoj, kiuj lin ekscitegadis, ĵetis sin sur la genuojn kaj petegis en larmoj tiel korŝiraj, ke ekvibris el kompato la fibroj de la ĉeestantoj – kiel iam kondutis la malfeliĉeguloj en la ĉeesto de la Milda Galilea Rabeno:

“– Jesuo-Kristo! Mia Sinjoro kaj Savanto! Kompatu ankaŭ min! Mi kredas, Sinjoro! kaj mi volas vian favorkorecon! Mi ne

povas elteni plu! Mi ne povas plu! Mi freneziĝis en la suferado! Helpu min, Jesuo el Nazareto, ankaŭ min, pro kompato!...”

Ĉe iu signo de Alcesto kaj Romeo, la bonkoraj flegistoj lin subtenis kaj kondukis apud la mediumon, ankoraŭ junan sinjorinon, kun gracia talio kaj delikata vizaĝo, kiu en la antaŭtago, kiam la laboristoj de la Instituto faris siajn esplorojn, celante efektivigi la kunvenon, devontigis sin por la grava tasko. Du kuracistoj, kiuj respondecis por la dirita spirito, akompanis lin kaj efektivigis lian kunligon kun la netaksebla perantino, al kiu ili ankaŭ havigis plej sindonan flegadon, por ke okazu nenia malhelpaĵo.

Tiam la sceno atingis tian kulminon, samtempe la plej patosan kaj la plej subliman, kian oni povas prezenti al si!

Ekposedante iun karnan aparaton, kiun oni por momento pruntis al li kun la kristana, bonfara celo helpi lin ekhavi ian faciligon, la malfeliĉa sinmortiginto eksentis, laŭ ties tuta intenseco, la tragedion, kiun jam de multe da jaroj li trasuferadis, vivante en la mallumo de neimagebla turmentego!... ĉar nun li disponis aliajn materiajn organojn, ĉe kiuj liaj vibroj, ardegaj kaj uraganaj, sovaĝe interpuŝiĝante, resendiĝis plene animaligitaj por estigi en lia torturata astrala korpo plendetalajn rebildiĝojn de tio jam pasinta! Korŝirajn kriojn, makabrajn stertorojn, satanajn terurojn, la tutan hororan mensostaton, kiu lin regis, li komunikis al la mediumino, kiu tiel esprimis, kiom al ŝi permesis la potenco de ŝia sublima doto, por la tie alestantaj enkarniĝintoj – la terurvekan malfeliĉegon kaŝitan de la tombo!

Freneziĝinta, *vidante sur la tablo la fragmentojn, al kiuj reduktiĝis lia mizera karna korpo, kiun li mem ĵetis sub la radojn de vagonaro, ĉar lia nekredebla mensostato igis lin ĉie vidi la malbonon, kiu ja troviĝis en li mem, kiel malfeliĉego perfortanta al li la konsciencon* – li ekposedis la junan mediuminon per suferiga agitiĝado kaj, sin klinante super la tablo, *li ekkolektis tiujn fragmentojn, penante rekunmeti la korpon, kiun li hororplene vidis por ĉiam dispecigita sur la reloj,* sub la tragedia

potenco de unu el la plej abomenaj halucinoj, ordinare okazantaj en la transmondo!

Trafita de la fajro el la neimagelba turmentego de la pekinto, kiu en si mem portas la efektivigon de tiu severa admono de la Evangelio:

> *"– estos elĵetitaj en la eksteran mallumon; tie estos la plorado kaj la grincado de dentoj".*

la malfeliĉa, perdiĝinta ŝafo, kiu malŝatis la admonojn de la prudenta kaj saĝa Galilea Paŝtisto, nervoze ekprenis paperojn, librojn kaj krajonojn, kiuj, por uzo de la psikografoj, estis dismetitaj sur la tablo, kaj, *kredante rekoni en ĉi tiuj la proprajn, disfrakasitajn viscerojn, muelrompitajn ostojn, sangantajn karnojn – la koron, la cerbon – reduktitajn al abomenaj buletoj* – li, en konvulsia plorado, ilin montradis al la prezidanto de la kunveno, kiun li facile vidis, petegante lian interhelpon ĉe Jesuo Nazaretano, tiel bone konata de la prezidanto, ke Tiu rebonigu al li tian halucinan situacion, nome ke li, sentante sin tiele, dispecigita, tamen sin rekonas kaj sentas viva!

Nervoza, malkvieta, ekscitegita, la danteska malliberulo de la kruelaj tentakloj de la memmortigo samtempe ridegis kaj ploris, petegis kaj ĝemis, tordiĝis kaj ululis, elmontrante, sufokita de brulturmentegaj larmoj, la neimageblan dramon, kiun per la memmortigo li por si mem kreis, la nekonsoleblan konscien-ciproĉon, ke li preferis la nekredadon, en kiu li vivis kaj mortis, al la admona kaj prudenta rezignacio antaŭ la ĉagrenoj de la malfeliĉo, ĉar li nun malfrue rekonis, ke *ĉiuj dramoj de la surtera vivo estas nur pasemaj kontraŭaĵoj, banalaj malfacilaĵoj kompare kun la monstraj suferoj kaŭzataj de la memmortigo, kies naturon kaj intensecon neniu homo, eĉ ne elkarniĝinta Spirito mem, kapablus taksi, ilin ne spertinte!*

Kortuŝa – la ĉefa persono ĉe la tablo – la prezidanto, kiun ame inspiras nevideblaj protektantoj, lin kompateme alparolas

kaj konsolas, montrante la sanktegan lumon de la Evangelio de la Dia Majstro kiel la superegan kaj solan rimedon povantan lin helpi, kaj ankoraŭ certigante al li, per sia honorvorto, kiun li ne hezitas doni kiel garantiaĵon, tiel certa li estas pri sia aserto, la interhelpon de la Ĉiela Kuracisto, kiu tuj kvietigos la strangajn malbonojn lin afliktantajn. Li tiam faras preĝon, simplan kaj amoplenan, antaŭe invitinte ĉiujn alestantajn korojn suprenflugi kun li la senfinan spacon direkte al la ama sino de Jesuo, por petegi pri tujaj favoroj al la malfeliĉegulo bezonanta serenecon por elviŝi el la menso la makabran vizion, per kiu liaj kulpoj vipas al li la animon kaj la daŭradon de la Vivo, kiujn ambaŭ li intencis neniigi, forkurante sur la misaj vojoj de la memmortigo!

Volonte akompanas lin ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la malfeliĉa halucinato: – enkarniĝintoj sidantaj ĉe la tablo, elkarniĝintoj efektivigantaj la majeste noblan seancon, nome mentoroj, gardistoj, asistantaj gvidantoj de la Domo, lancistoj kaj eĉ ni mem, la pli kvietaj kulpuloj, profunde kortuŝitaj. Ankaŭ preĝas la direktantoj de nia Kolonio, kiuj en la sekreteco de l' templo vidas ĉion okazantan ĉe ni; preĝas Teokrito kaj liaj adjunktoj, kiuj, en la Hospitalo, ankaŭ atentas la laborojn pere de tiuj potencaj, de ni konataj, aparatoj, aŭ simple uzane la duoblan vidadon, kiun ili facile agigas. Kaj tiel dolĉe harmoniigita kaj fervorigita pro la vigla impulso de la homogenaj pensoj de tiom multe da koroj frate unuiĝintaj per la sublima kiso de la karitato, laŭ tio, kion Karitato povas enteni plej belan kaj abnegacieman – la sankta kaj senmakula preĝo transformiĝis en viglan, brilegantan lumfluon, kiu post ne multe da minutoj atingis la Sanktan Celon kaj revenis fekundigita per la efiko de Lia dia favorkoreco! Ĉiu penso, unuiĝinta al la ceteraj per kompatemaj streboj, ĉiu karitata esprimo ĉerpita el la koro, kiuj supreniris direkte al la Plejalta Patro kun peto por la malfeliĉulo, kiun memmortigo senhonorige brulstampis, kaj kiu bezonis homan helpon por adaptiĝi al la transtomba vivo – estas voĉoj, kiuj al li flustras esperon, fekundaj, netakseblaj balzamoj sur lin gutigantaj

kelktempan ripozon, signoj de kvieteco ĉe la kruelaj tempestoj, kiuj skuas lian Spiriton enfermitan en malfeliĉego!

Post la preĝo sekvis impresa silento, kia nur en la pasinteco ekzistis sur la Tero, kiam oni praktikis la misterojn en la sanktejoj de la antikvaj temploj de orientaj sciencoj. Ĉiuj tenis sin en koncentriĝo, dum la mediumino konvulsie tordiĝadis kaj ploradis, esprimante la teruron de la komunikiĝanta estulo.

Iom post iom, dum oni ne plu eldiris unu solan vorton kaj nur agadis la mensaj fortoj de la elkarniĝintoj kune kun tiuj de la enkarniĝintoj, efektiviĝis la Dia Interveno... de kies priskribo ni ne detenos nin, ĉar ĝia transcendeco indas nian ekzamenon.

La mensaj vibroj de la ĉeestantaj enkarniĝintoj kaj aparte tiuj de la mediumino, kies sano fizika-materia, fizika-astrala, morala kaj mensa troviĝis en kontentigaj kondiĉoj, *ĉar ĝin antaŭe ekzamenis la organizintoj de tiu grava spirita entrepreno,* reagis kontraŭ tiuj de la komunikiĝanta Spirito, kiuj, difektitaj, malsanaj, senbridiĝintaj, krudege atakis la unuajn, kvazaŭ sovaĝaj ondoj de potenca torento, kiu abrupte enverŝiĝus en la smeraldan sinon de la oceano, admirinda kaj grandioza, reflektanta la brilegojn de la suna firmamento. Ekestis do arda batalo por la efektivigo de la sublima psika operacio, ĉar estis necese, ke sanigaj efikoj, magnetaj fluidaĵoj miksitaj kun spiritaj, speciale taŭgaj esencoj liveritaj de la mediumino kaj la asistantaj spiritaj gvidantoj, sin trudu kaj superregu tiujn elsenditajn de la suferanta estulo, kiu ne kapablis ion ajn produkti trans la limoj de sia malsupereco. La potenca fluo iom post iom prezentis la atendeblajn, bonefikajn fruktojn kaj milde regis la pereigajn vibrojn de la memmortiginto, trapasinte la altvaloran mediuman portilon, kiu, *materiigante tiun fluon, adaptante ĝin por altiriĝemo al la paciento, faris ĝin asimilebla por ĉi tiu, kies astrala envolvaĵo forte suferis pro la animaligitaj impresoj, postlasitaj de la karna korpo,* kiu estingiĝis sub la tomba ŝtono!

Tio estis kvazaŭ aplikiĝus al la fluideca organismo de la pentanto sendolorigaj kompresoj, kvietigantaj en ĝi la boladon

de la multoblaj ekscitoj, por fari ĝin kapabla elporti la solan terapion konvenan al tiu delikatega okazo. Ĝi estis kvazaŭ dia sedativo, kiu kompateme gutigus lumsanigajn efikojn sur liajn animajn vundojn, *tra tiu homa filtrilo, nome la mediuma magnetismo,* sen kiu la malfeliĉa neniel asimilus ian ajn bonfaron, kiun oni dezirus apliki al li! Kaj tio ankaŭ estis kvazaŭ sangotransfuzo en mortanton, kiu revenus en la vivon post kiam li pendis ĉe la rando de l' tombo, la sorbigo de alvaloraj esencoj, kiujn la mediumino abunde ricevis de la Supro, aŭ de la ĉeestantaj mentoroj, por ilin poste transigi al la suferanto.

Iom post iom la mediumino kvietiĝis, ĉar pli trankvila fariĝis la kompatinda "disŝirito", kiu ne plu vidis la mensajn bildojn de sia senprudenta ago, kio estas la samo kiel diri, ke malaperis la satana vido de la fragmentoj de lia propra korpo, kiujn li vane provis rekolekti por rekunmeto.

Agrabla sensaco de kvieteco trakuris liajn perispiritajn fibrojn, dolorantajn pro la longe elportitaj afliktoj... Ĉiam ankoraŭ regis tiu solena silento favoranta la dolĉajn, nemateriajn manifestiĝojn de la patrina protekto de Maria, de la neesprimebla favorkoreco de ŝia Senmakula Filo. Tra la salono ankoraŭ resonis la dolĉaj tonoj de la evangelia melodio, kvazaŭ ĉielaj kavatinoj kantantaj pri espero:

*"– Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos..."*

dum li ploradis meze en grandaj korelverŝoj, duonvidante la eblecon de pli bona situacio. Liaj larmoj tamen jam ne esprimis la malkvietegajn stertorojn de la komenco sed ja la dankemon de iu spertanta bonfaran intervenon...

Tiam Romeo kaj Alcesto energie direktas la fortojn de la intuicio sur la menson de la prezidanto, kiu ornamiĝis per diamantaj lumoj. La specialistoj alproksimiĝas al la mediumino,

al kiu la malfeliĉulo estas ligita. Kaj la prezidanto per detalaj klarigoj, rakontas al li ĉion, kio al li okazis kaj kial ĝi okazis. Lia havigas al li signifoplenan lecionon, kiun tiuj agentoj konkretigas pere de demonstraj bildoj. Tiam ni vidis la ripeton, en la surtera spiritista seanco, de tio, kion ni estis vidintaj en tiuj kunvenoj en la Hospitalo, prezidítaj de la eminenta Teokrito: – La vivo de la paciento, kvazaŭ fotografita, reflektita en tiuj bildoj, reaperas el liaj propraj rememoroj, preterpasante antaŭ liaj okuloj, ekde la lulilo ĝis la tombo, kiun li mem elfosis! Li revidis kion li faris, ĉeestis la nedaŭrajn stertorojn de la agonio, kiun li mem trudis al si sub la radoj de iu veturilo; rigardis, kun perplekso kaj teruro, la rompitaĵojn, al kiuj lia brutala ago reduktis lian homan figuron, plenan de forto kaj de suko por daŭre vivi... sed nun li fariĝis libera je tiuj rompitaĵoj, kvazaŭ li estus vekiĝinta el hida terursonĝo!... Li eĉ rimarkis, verŝante abundajn larmojn, ke ies kompatemaj manoj kolektis liajn sangokovritajn restaĵojn de sur la reloj; ĉeestis, emociita, ties enterigon en sanktan lokon... kaj li vidis la konsolan bildon de Kruco garde staranta ĉe lia tombo. Tiel li komprenis kaj konfesis tiun efektivon, kies akcepto estis al li malfacila kaj naŭza, nome ke li estas senmorta kaj plu vivos, ankoraŭ kaj por ĉiam vivos, malgraŭ la memmortigo! Ke la infera decido, provi trompi la diajn leĝojn, utilis al nenio alia, krom superŝarĝi al li la ekzistadon kaj la konsciencon per tiom gravaj, kiom pezegaj ŝuldoj! Kaj ke, se la materia korpo ja estingiĝadis en la putrema ŝlimo de ia tombo – tamen la Spirito, kiu estas la reala personeco, ĉar li devenas de la Eterna Lumo de la Superega Kreinto, marŝos nedetruebla direkte al la estonteco, spite ĉiujn ĉagrenojn kaj malhelpojn, viva kaj eterna kiel la Senmorta Esenco mem, kiu al li donis la Vivon!

Ho Dio en la Ĉielo! Kia religia ceremonio superus per gloroj tiun simplan kunvenon, havantan, nek ornamojn nek socian reeĥon, sed en kiu la turmentata animo de sinmortiginto, nekredanta la favorkorecon de sia Kreinto, malesperanta pro la amaso da rezultintaj suferoj kaj kruelaj rimorsoj, konvertiĝas al

la hela lumoj de la Fido dank' al la nerezistebla dolĉeco de la Evangelio de la Milda Nazaretano?!... Kia Diservo, kia rito, kiaj festoj kaj pompoj surteraj povus egali la grandiozon de la sekreta sanktejo de iu centro de studoj kaj laboroj spiritaj, kie la misiistoj de Amo kaj Karitato, senditaj de la Solenaskito de Dio, ĉirkaŭŝvebas envolvitaj en puraj, senmakulaj vibroj, donante al la nuntempaj inicitoj, kiuj kunvenas ĉe bonegaj mensaj ĉenoj, la altvaloran ekzemplon pri nova praktikado de Frateco?!... En kiu kampo de la homa aktiveco la homo trovus pli honoran glorigon, kiu ordenus al li la animon, ol tiun, ke li estas altigita al la meritplena rango de kunlaboranto kun la Ĉielaj Sferoj, dum la Senditoj de la Lumo malkaŝas al li la transtombajn misterojn, donante al li sanktegajn instruojn pri ia elaĉeta Moralo, pri ia Dia Scienco, kun la nobla celo reeduki lin por la definitiva eniro en la ŝafejon de la Dia Paŝtisto?!...

Homo, ho mia Frato, kiu, kiel mi, devenas de la sama Glora Lumfokuso! Senmorta animo naskita por altegaj destinoj en la malavara sino de la Eterneco! Akcelu vian evoluadon direkte al la Supro sur la vojoj de la Sciado, reedukante vian karakteron ĉe la helaj lumoj de la Evangelio de la Kristo de Dio! Kulturu viajn animajn kapablojn en la sankta silento de la noblaj kaj sinceraj meditadoj; forĵetu la malnobligajn vantaĵojn; forpuŝu la mondumajn plezurojn, kiuj utilas por nenio, krom por eksciti al vi la sentumojn malprofite por la feliĉaj elverŝiĝoj de la dia esto, kiu pulsas en vi; forĵetu plej malproksimen el via koro la pereigan egoismon, kiu vin malaltigas en la sino de la spiritaj socioj... ĉar ĉio tio estas nenio alia ol teruraj rifoj malhelpantaj al vi la supreniron al la lumo!... Malfermu vian eston por la akcepto de aktivaj virtoj kaj lasu vian koron pli vaste vibri por la komunikiĝo kun la Ĉielo... Tiam la dornoj de via surtera kalvario estos malakrigitaj kaj ĉio montriĝos pli milda kaj justa al via juĝo, nun prilumita de la sublima kompreno pri la Vero, ĉar vi estos akceptinta en vian sinon la fortojn de Bono, kiuj fontas el la Superega Amo de Dio!... Kaj poste, kiam vi sentos vin inklina

al abnegaciemo; kiam vi estos kapabla por la severaj sindetenoj necesaj al la vera inicito pri la Elaĉetaj Sciencoj; kiam vi estos apartiginta vin koron for de la pasemaj iluzioj de la mondo, en kiu vi spertas la saĝecon de la Vivo, kaj kiam vian senmortan animon regos la entuziasmo pri la sankta idealo de la Dia Amo – tiam ekburĝonu, kvazaŭ milda, plej ĉarma ĉiela floro, via mediumeco por la malkaŝa komunikiĝo kun la Nevidebla Mondo, elpetalante la rozon de la frata amo sur la preterpasantajn malfeliĉujojn, kiuj ne povosciis ĝustatempe sin gardi, kiel vi, per la nevenkeblaj fortoj, kiujn al la animo havigas la Senmorta Scienco de la Evangelio de la Kristo!

# Ĉapitro VII
## Niaj amikoj – la disĉiploj de Allan Kardec

En la intertempoj de la kunvenoj, ni ne revenis al nia transmonda ŝirmejo. Ni restadis en la surtera medio mem. La koncerna vojaĝo estis tro malfacila, ke ia multenombra kaj peza grupo, kiel la nia, povus ĝin ĉiutage ripeti. Tiel okazis, ke ni restis ĉirkaŭ du monatojn inter la homoj, la tempon necesan por efektivigo de tiuj intimaj kunvenoj, kiujn ni tiel bezonis, kaj de aliaj, celantaj nian inicadon, dum kiuj oni nur pritraktis la principojn kaj konceptojn moralajn kaj filozofiajn, sen la praktikado de la misteroj.

Nia stato de memmortigintoj, kies aŭro, infektita de malsuperaj vibroj, povus komuniki perturbon kaj deprimon al la kompatindaj enkarniĝintoj, al kiuj ni alproksimiĝus, aŭ de ĉi tiuj ricevi influojn malutilajn por la delikata kuracado, al kiu ni estis submetataj, detenis nin restadi en ia ajn loko loĝata aŭ vizitata de enkarniĝitaj animoj.

Estas grave klarigi, ke ni estis animoj irantaj la vojon al reedukiĝo, kaj, ĝuste pro tio, submetitaj al tre severaj kondutreguloj, kio al ni malpermesis vivadi sencele inter la

homoj, ruinige influante la surteran socion... situacio, kiu nepre efektiviĝus, se ni daŭre restus ribelemaj kaj obstinaj en la eraro.

Ni estis do kondukataj en pitoreskajn lokojn, malfacile alireblajn por la homoj, en la ĉirkaŭaĵo de la vilaĝoj, en kiuj ni pasloĝis: – boskojn agrablajn, herbejojn ombratajn de fruktarboj, verdantajn, fruktdonajn montetojn, kie la brutaro plezure manĝadis freŝan, preferatan herbon. Oni starigis tendojn, kaj jen ĉarma kampadejo, nevidebla por homaj okuloj sed perfekte reala por ni, kaj kiun la dolĉa bukolikeco signis per allogaj nuancoj, ekaperis sub la senŝanĝe blua volbo de la brazila ĉielo, kie la flamanta ĉaro de la Suno brilegadis per la senegala pompo de siaj revigligaj radioj.

Nokte, milda melankolio dolĉigis la amaraĵojn de nia situacio, kiel forpelitoj el la hejmo kaj el la familio, kaj tiam, reveninte de la ravaj evangeliaj prelegoj, okazintaj dum la kunvenoj de la kristanaj spiritistoj, ni restis en meditado en la senŝanĝa silento de la montetoj aŭ de la kvietaj fruktejoj. Rememorante la fekundajn instruojn pri la ekzisto de ia Superega Estulo, Kreinto kaj Patro, ni rigardis la ĉielan kupolon, inkrustitan per belegaj, lumbrilaj steloj. Tiam profundaj pensoj vastigis nian rezonadon, dum ni kontempladis, kortuŝitaj kiel enamiĝintaj junuloj, tiun sideran spacon kuntrenantan la netakseblan gloron, per kiu ĝin donis la Superega Arkitekto: – ĉi tie, jen brilegantaj, enormaj astroj, potencaj sunoj, centroj de forto, lumo, varmo kaj vivo; tie, mondoj de raveganta beleco kaj neimagebla grandeco, kies splendo trafis niajn okulojn de transmondaj kondamnitoj, kvazaŭ frata, amoplena signo, certiganta, ke ankaŭ ili estas loĝejoj de aliaj homaroj, de animoj, niaj fratoj, marŝantaj direkte al la elaĉeto, enamiĝintaj al Bono kaj Lumo, kaj same kiel ni, devenintaj de la sama patra, dia blovo, kiun en nia interno ni nun sentis pulsadi, malgraŭ la ekstrema morala mizero, en kiu ni baraktadis! Kaj ĉie la glora esprimo de la penso de la Plejalta, parolanta pri Ties povo, Ties amo, Ties saĝo!

Ne malofte, sub la dolĉa susurado de la frondaroj, kiuj girlande ornamis tiujn montetojn, ĉe la mildaj ventetoj refreŝigantaj la nokton, kiun prilumis la brilo de la astroj ruliĝantaj en la senlima spaco, niaj amikoj, la disĉiploj de Allan Kardec, tio estas, la mediumoj, la moralinstruistoj, la evangelizistoj, kies altruismo kaj bonvolemo tiom multe kunefikis por mildigo de niaj afliktoj, nin vizitadis, en la nokta silento, apenaŭ iliaj fizikaj korpoj ekripozis en profunda dormo. Ĝuante la rajton libere eniri en nian porokazan tendaron, ili kompate kaj amoplene konversaciis kun ni, donis pli vastajn klarigojn pri la bonegeco de la doktrino, kiun ili praktikadis, sin montrante kiel piajn kredantojn al la patreco de Dio, al la senmorteco de la animo kaj al la evoluado de la estaĵo sin direktanta al sia Ĉiopova Kreinto!

Kun fervora entuziasmo pri sia Fido, ili nin instigadis al la amo al Dio, al la espero pri Lia patra boneco, al la konfido je tiu estonteco, kiun Li rezervis por la homa speco, al la kuraĝo por venki, montrante ĉion ĉi kiel nepre necesan bazon de sereneco por la granda strebado al la progreso! Ili ĉiuj sin prezentis kiel nekontesteblajn, kortuŝajn atestojn pri la nobleco de la filozofiaj instruoj donitaj de la Doktrino, de kiu ili estis adeptoj kaj kies bazoj, sidantaj sur la grandioza moralo de la Dia Modelo kaj sur la Scienco pri la Nevideblo, ilin transformis en neskueblajn fortikaĵojn de la Fido, kapablajn kontraŭstari ĉian ajn malfeliĉon kun sereneco, firma menso kaj surlipa rideto, per kio elmontriĝis la ĉielo, kiun ili portis en si mem dank' al siaj superaj scioj pri la Vivo kaj la homaj destinoj! Tiam ili plenelokvente rakontis pri la ardeco de la malfeliĉo, kontraŭ kiu multaj el ili luktadis. Ilin aŭskultante, ni forte miregis, kaj samtempe kreskadis nia admiro al ili, kio plialtigis ilian indon en niaj okuloj: – ĉi tiu respektinda viro, estro de multnombra familio, estis malriĉega kaj tenadis senhaltan batalon por la vivteno de la siaj; tiu alia, nekomprenata en la hejmo, soleca en la sino de la propra familio, kiu ne respektis lian sanktan rajton pensi kaj kredi laŭ sia plaĉo; ĉi tiu

sinjorino, elportanta la pezan krucon de malfeliĉa edziniĝo, sub la imperativa jugo de akraj humiligoj kaj ĉiutagaj ĉagrenoj! Sed jen ankaŭ ĉi tiu alia, kiu vidis morti en plena juneco la solan filon, protekton kaj dolĉon por ŝia vidvineco kaj maljunaĝo!... krom ankaŭ ĉi tiu junulino, kiu, en la tagoj antaŭaj al la ame dezirata edziniĝo, ricevis, kiel rekompencon al sia dolĉa kaj esperplena korligiĝo, la abomenindan ĵurrompon de tiu, kiu vekis en ŝi la unuajn raviĝojn de la koro!... ĉar la iniciteco en la Kristanan Spiritismon ne evitigas al la homo la necesecon de la grandaj riparadoj kaj doloraj elprovoj!

Sed la sereneco, la pacienca rezignacio superregis tiajn batojn kontraŭ iliaj koroj! Ili sin turnis, konfidoplenaj, al la amema koro de Jesuo, fidelaj al Lia dolĉa alvoko, pri kiu ili sciis, ke ĝi ja estas konstanta! Al la dolĉaj, ĉielaj influoj ili malfermis siajn korojn, nobliĝante ĉe la spirita helpo de siaj gvidantaj mentoroj... kaj nun ili marŝis kun konfido direkte al la estonteco, certaj pri la fina venko! Sen ia sinĝeno, male kun videbla bonhumoro, ili rekontis, ke inter ili estas tiuj, kiuj iras plenumi sian devon en la seancoj, ne preninte la vespermanĝon pro manko de rimedoj, sed kiuj pro tio ne sin opinias malfeliĉaj, ĉar ili esperas, ke la Superega Patro, kiu vestas la kampajn liliojn kaj zorgas pri la bezonoj de la birdoj de la ĉielo[1] ankaŭ havas rimedojn por rebonigi ilian situacion, kiel eble plej baldaŭ... kaj tial ili sentas sin fortaj por, per si mem kaj kun la helpo de la Fido kaj de la kuraĝo, kiu el ĝi fontas, reagi kontraŭ la momenta manko kaj venki!

De tiu, por tiel diri, ĉiutaga kunvivado rezultis, ke fortaj, nedetrueblaj korinklinoj kaj simpatioj de ambaŭ flankoj ekestis, ĉefe el ni, la elkarniĝintoj, ĉar ni estis sincere dankaj pro la

[1] Sankta Mateo, 6:19 ĝis 21 kaj 25 ĝis 34.

konsidero, kiun oni donis al ni, kaj pro la netakseblaj favoroj, kiujn al ili ni ŝuldis.[1]

Ni ĝuis la permeson, ilin sekvi dum laborplenaj vojaĝoj por plenumo de la bonfarado. Forte interesaj, tiaj laboroj servis al ni kiel grandiozaj instruoj, ĉar alkroĉite al freneza egoismo, ni ne komprenis, kiel iu povas sin dediĉi al aliula bono per tiel noblaj elmontroj de neprofitemo kaj frata amo. Mi ne detenos min dediĉi kelkajn liniojn de ĉi tiuj rakontoj al la priskribo de la aktivecoj, kiujn ni tiam ĉeestis, aludante nur tion, kion ili efektivigis en spirita korpo, dum la horoj de dormo kaj fizika-materia ripozo.

La mediumoj kaj la ceteraj enkarniĝintaj kristanaj inicitoj, komisiitaj de la Instituto Maria el Nazareto, meritis ties konfidon kaj ĝuis ties gardadon tiel longe ĝis ili elplenumos la taskojn, pri kiuj ili sin devontigis ĉe la Instituta estraro. Sed tiu gardado ofte etendiĝis tra ne difinita tempo, dum kiu la surtera lernanto estis akceptita kiel ano de la Kolonia servantaro, kio estas la samo kiel diri, ke li fariĝis kunlaboranto de la nobla Legio de la Servantoj de Maria. Se ili montriĝus vere sindonaj al la apostola servado, farata sub la aŭspicioj de la granda doktrino, kiun kunordigis la ĉefo de la Skolo, ĉe kiu ili iniciĝis, nome Allan Kardec; ili do ne limigus sian bonvolan kunlaboradon al la sekretaj ĉiusemajnaj seancoj en la societoj, al kiuj ili apartenis.

[1] Efektive, dum nia mediuma praktikado ni havis la okazon starigi solidajn rilatojn de amikeco kun loĝantoj de la Spirita Mondo. En certa fazo de nia ekzistado, kiam dolorajn kaj decidajn atestojn trudis al ni la Leĝo de Kaŭzoj, malgranda aro da malnovaj suferantoj, kiujn ni iam estis helpinta, inkluzive de iuj sinmortigintoj kaj du eksobsedantoj, kiuj al ni amikiĝis okaze de praktikaj laboroj por rebonigo de obseditoj, videbliĝis dum vizito, kiun ili faris al ni, tiam proponante sian helpon por mildigi nian situacion. Sed pro la neebleco, ĉar la situacio estis senrimeda, ili kun la niaj miksis siajn larmojn kaj nin ofte vizitadis, al ni havigante grandan konsolon per la atesto de sia tiel bonvolema inklino. – *(Noto de la Mediumino.)*

Male, li pliampleksigus la trafon de sia propra agado, klopodante favore al la glorigo de la Afero, al kiu ili servadis.

Tra la nokto, tiuj, al kiuj ni korligiĝis, transportiĝis, en spirita korpo, en grandaj distancoj, kunlaborante kun siaj mentoroj kaj gvidantoj ĉe noblaj taskoj. Ĉe ni, ĉiu dekpersona, aŭ eĉ malpli granda grupo, povus ilin akompani celante instruiĝi, ilin sekvi dum tiuj edifaj migradoj favoraj al la afero subtenata de la Grandanima Majstro, se nur la protektantoj kaj asistantoj de la grupoj gvidus la laborojn kaj la mentoroj ĉe la Legio partoprenus en la karavano.

Dum nia dumonata, surtera kunvivado, mi havis la okazon ilin kelkfoje sekvi, kune kun aliaj kamaradoj de nia grupo, inkluzive de Belarmino, kaj akompanataj de niaj afablaj amikoj, de Canalejas kaj Ramiro de Guzman.

Gvidate de siaj spiritaj instruantoj, ili vizitadis hospitalojn en la nokta silento, alproksimiĝante al tiuj litoj, en kiuj ĝemadis kompatindaj malsanuloj, senesperaj kaj malĝojaj, kun la karitata deziro havigi al ili kvietigon kaj novajn energiojn per aplikado de vivigaj magnetismaj elementoj, de kiuj ili estis riĉegaj rezervujoj. Profitante la dormemon, en kiu dronis tiuj malsanuloj, niaj enkarniĝintaj kunuloj ilin amike alparolis kaj revigligis, enverŝante en ilin la helan lumon de Fido kaj Espero, kiu prilumis iliajn Spiritojn de fidelaj kredantoj; vekis en ili la kuraĝon kaj la strebon al la venko pere de konsiloj kaj sugestoj, kiujn al ili inspiris iliaj bonkoraj akompanantoj. Tiel, ni kun ili ankaŭ eniris en privatajn loĝejojn, rimarkante, ke ili ĉiam strebis al servado kaj lernado, tute egale ĉu ili vizitadis palacojn, kabanojn aŭ eĉ bordelojn, ĉar ili konsciis, konsente kun siaj gvidantoj, ke ankaŭ tie troviĝas konsolbezonaj koroj, senfortigitaj Spiritoj por revigligi kaj admoni! En aliaj okazoj, ili petis nin pri kunhelpo ĉe iliaj klopodoj por konsoladi grandajn malfeliĉulojn, nome enkarniĝintajn personojn, kiuj travivis dolorajn elprovojn el la vico de la al ili konvenaj suferoj, kaj kies emo al senkuraĝeco kaj malespero povus esti fatala. Tiam ili tiujn kondukis al la

sidejo de la asocio, al kiu ili apartenis, kaj dum iliaj karnaj portaĵoj, same kiel tiuj de iliaj protektatoj, restis en profunda dormo, ili revigligadis tiujn kompatindajn suferantojn, al ili elvolvante saĝajn, konvinkajn argumentojn, konigante la grandiozajn evangeliajn instruojn, kiuj riĉigis iliajn proprajn animojn kaj el ili faris grandajn, konstante bravajn batalantojn, kiuj neniam rigardus sin venkitaj, senkuraĝaj, senesperaj!... Ĝuste tiam ni prezentis al ili nian doloran travivaĵon, konsentante priparoli la pereigan aventuron, kiun al ni rezervis la senkuraĝeco kaj kiu nin trenis en la abismon de memmortigo! En tiuj okazoj, Belarmino profitis la oportunon por elverŝi sian entuziasmigan parolon de fekunda kaj brila oratoro. Pli ol unufoje li povis forpreni, el nedubebla falo, malfeliĉulojn jam sin ĵetontajn en la ombran regionon, de kiu ni devenis. Ĉio tio havigis al ni utilegan profiton, altvalorajn lecionojn, allogan ekzempladon, samtempe kiel konsola reago nin revigligis kaj havigis al ni la esperon!

Sed post du monatoj, ĉar ni ne plu bezonis ion ajn ricevi de la surtera, materia medio, estis ordonite al la grupo iri returne al sia Kolonio en la Astrala Mondo. Ne sen profunda emocio ni brakumis, ĉe ilia lasta, adiaŭa vizito en nia bukolika tendaro, tiujn tenerajn kaj korsimplajn amikojn, kies komunikiĝema kormildo tiel sanigan viglon havigis al niaj ŝanceliĝemaj kaj maltrankvilaj animoj. Kvankam iliaj karnaj korpoj restis dormantaj dum ilia vizito al ni, tamen ili ja nedubeble montriĝis al nia rigardo kiel viroj kaj virinoj, kaj ni neniel rimarkis ian diferencon koncerne iliajn envolvaĵojn.

Ni certigis ilin pri nia eterna dankemo, eldiris niajn esprimojn de nerompebla korinklino, promesis al ili oftajn vizitojn, tiel baldaŭ kiel al ni permesos la cirkonstancoj, kaj ja reciprokecon de la afablaĵoj kaj konsiderado, per kiuj ili nin honoris, tuj kiam ni sentos nin kapabla por tio. Ili siaflanke promesis al ni daŭre interesiĝi pri tiu drama situacio, kiu nin malliberigis, ĉu preĝante por ni al la Dia Indulgemo, ĉu transsendante al ni siajn esprimojn de amikeco pere de tiuj telepatiaj mesaĝoj, kiujn iliaj mediumaj kapabloj komencis produkti, kaj tiu promeso tre feliĉigis nin.

Efektive, veninte en nian neĝan azilon, ni ofte vidis, ke iliaj amikaj figuroj aperadis en la hela lumo de la televidiloj, ĉiam envolvitaj en la opalecaj ondoj de la preĝo kaj de la bonkoraj pensoj, per kiuj ili esprimis al Dio siajn bondezirojn por la plibonigo de nia situacio.

Se al ni, dum tiuj du longaj monatoj sur la terkrusto kiel gastoj sub la serena ĉielo de Brazilo, la gardantaj Spiritoj ne donis la permeson viziti regionojn al ni karajn de nia Patrolando, kies sopiraj rememoroj plormalsekigis sentemajn fibrojn de niaj animoj, ili tamen konatigis al ni tiujn amikojn komplezemajn kaj afablajn, mildajn kaj humilajn, nome la disĉiplojn de la nobla majstro de la Inicado – Allan Kardec –, kies memoron ni de tiam honoradis per respektoplena kulto de admiro! Kaj ni pensis, kortuŝitaj kaj sincere ravitaj: – Unu tia doktrino, kapabla eduki la korojn, ilin prilumi per la puraj manifestiĝoj de la Boneco, kiujn ni vidis radiantaj el niaj novaj amikoj, ne povas esti malproksima de la ĉielaj veraĵoj!

.......................................................................................................................

Pasis du longaj, penplenaj jaroj, dum kiuj ni multe ploradis, sub la pezo de korskuaj rimorsoj, en la ĉiutaga ekzamenado de la eraro, kiun ni faris kontraŭ ni mem, kontraŭ la Naturo kaj kontraŭ la saĝaj Leĝoj de la Eternulo, kaj kiu metis nin en tiun amaran situacion naskitan de la memmortigo! Kelkajn fojojn ni denove ĉeestis aliajn seancojn en la surteraj kabinetoj por psikaj eksperimentoj, vizitante niajn amikojn kaj al ili parolante per la mediumaj komunikrimedoj.

En tiu tempo, mi ekrilatis kun afabla mediuma aparato, nome iu mediumo dotita per eksterordinaraj kapablecoj, kiu ofte vizitadis min kaj la ceterajn, ĉu per bonvolaj pensoj kaj elradiadoj senditaj por nia bono, ĉu per fervora preĝado. Li estis mia sampatrujano, kaj mi ne povas ne konfesi, ke tio ja potence min altiris kaj kortuŝis! Esplorema, kuraĝa, sentima, eĉ

nesingarda, krom ankaŭ pasia, entuziasma amanto de la Sciencoj pri la Nevideblo, al kiuj li sin tiris kun arda raviĝo, li iris ĝis la ekstremo, kvazaŭ revema enamiĝanto, rondiri ĉirkaŭ la muregoj de nia Kolonio, en astrala korpo, dum la nokta ripozo aŭ dum profundaj mediumaj trancoj, kun la inteco veki nian atenton por senpere komunikiĝi kun ni, kio forte maltrankviligis niajn mentorojn kaj la estraron de la Kolonio. Oni al li ne permesis la eniron pro la granda danĝero de tiel rekta kontakto kun medio ekskluzive destinita por kondamnitoj, sed oni havigis al li gardon kaj helpon por la reveno, konsiderante la sincerecon de la intencoj, kiuj lin motivis, kaj la fakton, ke li trapasos abismajn lokojn de la Spirita Mondo. Tiel aminda kiel kuraĝa amiko nedubeble havis, kiel mediumo, siajn konsilantojn kaj gvidantojn, ĝuis apartan protektadon. Malgraŭ tio, li ankaŭ havis – la liberan volon –, la kapablon libere agi laŭ sia plaĉo, ĉar al li estis rekomendite sin gardi per la disciplino konvena al la praktikado de la mediumaj kapabloj, disciplino, kiun ĉiu inicito devas observadi kun la plej granda rigoro! Sed li neprudente sin ĵetadis en la Nevideblan Mondon, aŭdace eniradis ombrajn regionojn, ne atendante invitojn aŭ oportunajn okazojn donitajn de siaj superuloj, uzante kiel ŝildon la ardan Fidon, kiu al li inspiris la deziron de Bono. Nu, en unu el la okazoj, kiam ni vizitis niajn brazilajn amikojn, la sindonaj mentoroj ĝuigis al ni koran intervidiĝon kun tiu amema samlandano. Ni neatendite vizitis lin, kiu nin facile vidis kaj pro tio sincere ekĝojis. Dume oni ordonis al ni mediume komuniki al li ian parolon, kiel rekompencon pro lia granda sindono! Kaj jen mi fariĝis kortuŝita, hezitema, konfuzita, skribante al miaj malnovaj amikoj el Lisbono kaj Porto, post tiom multaj jaroj da foresto! Ni tamen vizitis nur la mediumon kaj tuj revenis al la koncentrejo de la legio.

Sed malgraŭ ĉio tio, la disciplinoj de la unuaj tagoj plu daŭris senŝanĝe: – ni ĉiam ankoraŭ restis enhospitaligitaj, submetataj al plej zorga kuracado kaj kompleksaj ekzercoj por korektado de niaj mensaj misfunkcioj, krom ankaŭ al instruado

kaj praktiko ĉe la reedukaj servoj. Ni jam konis la feran logikon de la Reenkarniĝo – fantomo kiu teruregas ĉian kulpan Spiriton, aparte tiun de sinmortiginto, kaj kiun li malemas akcepti, kvankam li estas intime konvinkita, ke temas pri sin altrudanta vero; kiun li provas nei, ĉar li ĝin timas, tamen sentante, ke kun ĉiu tago, kun ĉiu minuto elfluanta ĉe tiu konsola staĝo, kie servas iliaj sindonaj gvidantoj, li estas de ĝi altirata same kiel la etan ŝtalpecon altiras la potenca, nekontraŭstarebla magneto; kaj kiun li obstine penas forpeli el siaj pensoj, tamen sciante, ke ĝi estas neevitebla en lia destino, kia la morto en la destino de homo! Sed ni persone ankoraŭ ne rememore spertis ĝin, esplorante la rivelajn arkivojn de la subkonscio, por tiel rigardi nian eston laŭ ties tuta morala malsupereco. Nia stato de memmortigintoj, kies ekscititaj vibroj torturadis al ni la mensojn per tro doloraj refrapoj kaj impresoj, malfruigis la posedon de tiu kapablo, kiu facile efektiviĝas ĉe la normalaj aŭ progresintaj estuloj.

En tiu tempo jam tre fortikiĝis niaj rilatoj de amikeco kun la personaro de la hospitalaj servoj kaj aparte inter ĉiu grupo kaj ties rektaj respondecaj gvidantoj, nome kuracistoj, flegistoj, gardistoj, instruistoj kaj psikistoj.

Nu, la asistanto, kiu pli konstante akompanis nin, estis la juna hispana kuracisto Roberto de Canalejas, kies belajn kvalitojn, intelektajn kaj moralajn, ni ĉiutage observadis. Li kaj lia patro, Karlo de Canalejas, hispana, anĝelkora etnobelo kun animo de apostolo, krom ankaŭ Joel Steel, meritis de nia pavilono entute kaj de nia malsanulejo aparte la plej korajn elmontrojn de amikeco kaj respekto. Roberto ne estis tamen tre progresinta estulo, malgraŭ la vasteco de sia kapitalo da moralaj bonkvalitoj, kiun li penege akiris dum surteraj ekzistadoj. Temis pri Spirito senhezite marŝanta sur la malglata vojo al la progreso, kaj ankoraŭ ne pasis unu jarcento de kiam li venis en la Transtomban vivon, post tre akra, elaĉeta enkarniĝo, dum kiu la doloro de brutala edzinperfido disŝiris al li la koron kaj la

feliĉon, kiun li supozis ĝui. Roberto travivis nenion alian ol la ruiniĝon de sia hejmo pro la ĵurrompo de la edzino, kiun li amis kun la tuta sindono ebla por edza koro; li vidis morti la karan, sepjaran filinon, naskitan la unuan el tiu ligo, kiun ĉio supozigis bonaŭgura kaj longedaŭra, viktimon de la sopiro kaŭzita de la patrina malesto kaj pligravigita de la tuberkulozo heredita de el la patro mem, kiu siavice infektiĝis dum abnegaciaj esploroj ĉe malsanuloj portantaj la teruran morbon, ĉar, kiel kuracisto, li sin dediĉis al homamaj studoj pri tiu ĝis nun nesolvebla problemo! Pezajn humiligojn kaj milon da malfacilaj situacioj li travivis pro sia malsamnivela edziĝo, ĉar la sorto pelis lin en pasian enamiĝon al la ĉarma Lejla, filino de la Grafo de Guzman, nia tre estimata amiko el la Viglado! Pro la varma reciproka amo de la nekonstanta junulino, kiu tiam aĝis nur dek kvin jarojn, li edzoligiĝis al ŝi, malgraŭ la kontraŭstaro de Don Ramiro, kies psikologia esploro pri la propra filino aŭguris ne feliĉan finon al tiu grava okazaĵo. Roberto de Canalejas vere estis nenio alia ol malriĉa kaj senfama adopta filo de malavara nobelo, kiu al li donis nomon kaj socian pozicion sed kies riĉaĵo estis dise utiligita ĉe entreprenoj por helpo kaj protekto al la senhelpa infanaro.

En la lastaj tempo de la 17a jarcento, Roberto, travivante unu ekzistadon de la centro de Eŭropo, sinmortigis en la jaro 1680. Pro tiu dolora motivo, jam en la 20a jarcento, kiun ni travivis en la Spirita Mondo, li ankoraŭ suferis la sekvojn de sia pasinta, kondamninda ago, ĉar lia geedzeca dramo, okazinta en Hispanujo dum la unua duono de la 19a jarcento, ja estis nenio alia ol ripeto de la travivaĵo, al kiu li ne volis submetiĝi en la fino de la 17a jarcento! Tiu nobla amiko, kies serioza meditema aspekto nin tiel forte allogis, sin montris en la Transmondo tia, kia li estis en la karno dum sia lasta ekzistado travivita en Hispanujo: – meza staturo, densa, nigra barbo elegante pintigita laŭ tiama aristokrata modo, akompanata de zorge flegitaj lipharoj; vasta kaj abunda hararo, haŭto blankega, preskaŭ

neĝkolora, nigraj okuloj, grandaj kaj pensemaj, memorigantaj pri andaluziaj ciganoj, kaj longaj manoj vidigantaj la konstantan ekzerciĝadon de pianisto aŭ la teruran malsanon, kiu faligis lian lastan karnan portaĵon. Li mem al mi malkaŝis tiun teruran resumon de sia vivo dum noktaj promenoj, kiam li akompanis nin tra la senhomaj aleoj de la Hospitala parko. Sed li tion faris kun la altruisma intenco nin instrui kaj admoni, ke ni brave alfrontu la severan estontecon, kiu nin atendas, ĉar la sinmortiginto devas ripari la malfortecon, kiun li elmontris, liberiĝante, per seriozaj atestoj pri forteco kaj per elaĉetaj decidoj, el la senkuraĝo, kiu lin katenas al la morala malsupereco.

Ĉu pro tio, ke li amis kaj konis Portugalujon, kie li vivis la lastajn monatojn de sia ekzistado kaj ricevis, kiel lastan restadejon por sia karna armaĵo, la portugalan teron; ĉu pro tio, ke krom kuracisto li ankaŭ estis altmerita artisto, ĉar li sin dediĉis al beletro kaj muziko, kaj nia grupo ja konsistis el portugalaj intelektuloj fieraj pri sia heroa Patrolando, la vero estis, ke ni ligiĝis al li per kora simpatio, kiu tuj fandiĝis en nemorteman, fratan korinklinon.

Belarmino de Queiroz e Souza, la filozofo-poligloto, kiu en tiu tempo nur iam kaj iam sin montris kun la malnova monoklo, estis el tiuj, kiuj la plej forte entuziasmis pro la nova amikrilato, ĉar en la amiko li asertis iel rekoni iun similan al li. De Canalejas konfesis, ke dum sia enkarniĝo li falis en la malfeliĉon adopti materialismajn doktrinojn, neante la ideon pri la Superega Estaĵo kaj forpuŝante la lumon de la kristanaj sentoj prefere por la ekskluziva superregado de la Scienco, kio senrimede malŝirmis lin dum la sinsekvaj ĉagrenoj de la ekzistado kaj poste pligravigis al li la propran moralan situacion, kiam la doloro donis finofaran baton al lia hejmo. Ili daŭre subtenadis inter si longajn paroladojn pri la tiel interesaj materialismaj temoj ĉe la lumoj de la psika scienco, kaj Roberto respondis per nerefutebla logiko la vivajn argumentojn de Belarmino, kiu apenaŭ komencis sian reedukiĝon sur la spirita kampo, ĉar super li Roberto avantaĝe

posedis pli profundajn sciojn ne nur pri Filozofio sed ankaŭ pri Scienco kaj Moralo... kaj estis plaĉe ilin vidi, amike kaj frate pridiskutantaj la plej belajn kaj profundajn temojn: – la poligloto strebis al relernado, renovigante sciojn super la ruinoj de la malnovaj konvinkoj; la juna kuracisto enmanigis al li garbojn da antaŭe ne konataj lumoj, kiuj lin gvidus sur la estontecaj vojoj, kaj tiucele la kuracisto baziĝis sur konkretaj faktoj, kiuj tiel plaĉis al lia kunparolanto! Multfoje ni, la aŭdantoj, kaŝe ridetis, rimarkante la nulecon de la kompatinda Belarmino, kiu sur la Tero rigardis sin kiel grandan klerulon, en la ĉeesto de simpla hospitala asistanto ĉe iu Kolonio de sinmortigintoj, ia maleminenta laboristo, kiu ne havis eĉ signifajn meritojn en la Spirita Mondo!...

Unu tagon, kiam li iom plilongigis la viziton en niaj apartamentoj, komunikante al ni la informon, ke post ne multe da tagoj estos finita nia kuracado, mi alparolis lin, ne sen ia ĝenateco pro mia maldiskreteco:

"– Kara S-ro Doktoro! Tiuj mallongaj rakontoj pri via vivo, kiujn vi plej bonvole konfidencis al mi, faris tiel fortan impreson en la interno de mia esto, ke ili min profunde kortuŝis kaj instigis al pripensado. Sur la Tero mi estis romanverkisto kaj al miaj modestaj produktoj mi celis doni certan moralan karakteron. Mi postlasis grandan verkaron, se ne laŭ la kvalito – ĉar hodiaŭ mi konfesas, ke tre malmulta estis mia intelekta kapitalo – almenaŭ laŭ la kvanto!... Sed mi asertas, ke tre malofte mi elpensis miajn romanojn! Ili estis pli ĝuste fruktoj de la kuniĝo de observado kun la sentimentalaj ornamoj, kiujn mi plurfoje uzis por mildigi la durecon de la realaĵo kaj tiel tre baldaŭ allogi eldonistojn kaj legantojn, de kiuj dependis mia monujo, preskaŭ ĉiam malplena... stato, kiu ja ne tre rekomendas surteran verkiston!

Kiu scias, S-ro Doktoro, ĉu via afableco ne havigus ankoraŭ pliajn informojn pri via persona dramo, kiu tiel forte impresis min, por ke mi iam, vizitante la Teron, provu rakonti, helpe de

iu mediuma peranto, ion interesan traplektitan per tiuj lumaj doktrinoj, kiujn mi ĉi tie komencas lerni?... Mi povus, kiu scias informi la malnovajn legantojn de miaj surteraj verkoj pri la lumradiantaj novaĵoj, kiujn mi ĉi tie trovis, ilin romanece traplektante per realaj aspektoj de la intima vivo, tiel homa kaj tiel instrua, de Spiritoj, kun kiuj mi ĉi tie konatiĝus, kaj kiuj ankaŭ estis homoj, ankaŭ suferis, amis, ankaŭ luktis kaj mortis, same kiel la tuta homaro?... Kaj tion mi celas, ĉar mi aŭdis de la ĉi-tieaj majstroj, ke al Spirito, deziranta progresi, alportas grandan meriton rompi la tombajn barierojn por raporti al la homoj pri siaj transmondaj spertoj, pri la moralo, kiu ĉi tie surprizas ĉiujn ĵusvenintojn de la Tero?!...”

Li fariĝis enpensiĝa, kaj peza melankolio ombris al li la vizaĝon, kiun mi kutimiĝis vidi serena, kio min pentigis pri miaj paroloj. Sed post ne longe li respondis, kvazaŭ li releviĝus el la pasinteco, de mi timeme elvokita:

“– Jes! Al spirito tiaspeca laboro havigas meriton ĝuste tial, ĉar temas pri unu el tiuj plej malfacile efektivigeblaj por ni! Ni plej senpene penetrus en la kaŝejon de obsedantoj en la krudaj surteraj regionoj de la nevidebla mondo, por ilin reteni, kaj al ili forpreni la liberecon; aŭ en iun sorĉistejon kun ĝia arsenalo da trompaĵoj, kie oni faras kruelaĵojn kontraŭ elkarniĝintoj kaj enkarniĝintoj, por ke ni tiel nuligu krimajn iniciatojn; pli rapide ni konvinkus hardiĝintan malbonulon submetiĝi al elaĉeta reenkarniĝo, ol ni venkus tiun densan dornejon, kia estas la menso de mediumo, por transsendi sparkojn el la lumoj, kiuj ĉi tie nin ravas!

Mi unue devas klarigi, ke ne multaj mediumoj ekzistas, kiuj pretus sin doni al tiel delikata speco de laboro!... kaj kiam ni trovas iujn dotitajn per la necesaj kapablecoj, ili, krom montriĝi ne edukitaj laŭ la kristana moralo – elemento nepre necesa al la celo starigita de la grandaj mentoroj instigantaj al tiaspeca praktiko –, ankaŭ tiele sin tenas ĉe memkomfortemo, rezistemaj al la disciplinoj, kiujn ni de ili postulas por ilia bono mem, krom

ankaŭ ĉe la dubemo kaj ĉe la vanteco sin rigardi iluminitoj, elektitoj, nepre necesaj al tiu propaganda movado de la Nevidebla Mondo, ke ili tute nuligas nian entuziasmon, kvazaŭ iliaj mensoj trafus nin per glaciaj duŝoj! Pro tio ni preferas la simplajn animojn, la humilajn kaj malgrandajn, kiuj tamen havante nenion alian krom tre malgrandaj intelektaj kapitaloj, postulas de ni persistecon, sindonon kaj penegajn laborojn, por ke ni ion povu malkaŝi al la homoj pere de iliaj kapablecoj!

Se mia vivo, estimata amiko, aŭ pli ĝuste, miaj vivoj, tra la surteraj migradoj, dum kiuj mi submetiĝis al la progresigaj laboroj, ja estus rakontataj al viaj legantoj, certe ili havigus al ili tute ne forĵetindajn leciojojn! La vivo de iu ajn homo, de iu ajn Spirito, estas ĉiam riĉa je klarigaj spertoj, la instruplena romano, kiu forte ravas pro tio, ke ĝi reflektas la batalon de la homaro kontraŭ si mem dum longa irado direkte al la florplena, orkolora haveno de elaĉeto! Vi povos kolekti viajn observojn ja ĉi tie, ĉar en la malvasteco de ĉi tiu azilo troveblas edukaj temoj transigindaj al la homoj per la mediuma kanalo. Sed mi proprasperte devas averti vin, ke kontraŭ viaj laŭdindaj deziroj amasiĝos la plej elrevigaj malhelpoj, des pli ĉar *ĉiaj obstakloj leviĝas antaŭ memmortiginto pro tio, ke li enfalis en nenormalan situacion, kiu afekciis eĉ la plej sensignifan fibron de lia psika organismo, kiel ankaŭ lian destinon!* Sed viaj noblaj intencoj, via persisteco, la amo al laboro, la aspirado al bono kaj belo povos fari miraklojn, kaj mi ne dubas, ke viaj estontaj majstroj kaj gvidaj edukontoj donos al vi la koncernan orientadon.

Koncerne la petitajn informojn, mia amiko, mi plezure havigus ilin al vi! Mi rigardas vin sincere bonintenca. Liberiĝinte de la surteraj antaŭjuĝoj, la Spirito ne plu konservas la homan honton malkaŝi al siaj amikoj la lin turmentantajn suferojn kaj intimajn apartaĵojn. Sed bedaŭrinde mi ne sentas min sufiĉe abnegaciema por revidi la teruran dramon, kiu ankoraŭ perturbas min! Rerigardi la pasintecon, kies cindroj ankoraŭ ardas pro la interna fajro de neforgesebla amo, kiu ĉiujn miajn

paŝojn en la Spirita mondo envolvas per la mortotuko de resopirado kaj nereteneblaj ĉagrenoj; eltiri el la subkonsciaj ombroj la adoratan figuron de la perfidulino, kiun mi neniam povis malŝati, penante havigi al mi la superegan konsolon de forgeso; vidi ŝin releviĝi el la faldoj de miaj rememmoroj tia, kia ŝi estis ankoraŭ hieraŭ, bela kaj alloga, ligita per edzeco al mia destino, kaj rememori la feliĉajn horojn de la edzeca kunvivado, kiujn mi kredis senmortaj, ne komprenante, ke ili ja estis trompaj, falsaj, kaj fontis sole nur el mia sincereco, el la min inspiranta fido, el mia granda bonvolo – tio ja estos duan fojon suferi la neelporteblan aflikton konfesi ŝin kiel adultulinon, kiam mia tuta esto deziregas vidi ŝin elaĉetita el tiu malnonoro, kiu ŝin ĵetis en la abomenan abismon de la plej hontinda kaj honormakula situacio por virina Spirito: – la adulto! Mi ne povas, Kamilo, mi ne povas! Mi amas Lejlan kaj sentas, ke tia amo disvolviĝos kun mi tra la eternaj tempoj, ĉar jam de multe da jarcentoj ĝi sekvas mian destinon... ekde kiam la dolĉa pura voĉo de Paŭlo el Tarso, anoncante la Bonan-Novaĵon, triumfe eĥis sub la potencaj frondaroj en la arbaroj de la Malnova Iberujo!... Kaj mi senripoze klopodos tiel longe, ĝis ŝi estos denove kun mi, elpaginta per la korŝira riparado, al kiu ŝi submetiĝis pelite de la konsciencriproĉoj, la insulton faritan al mi, al si mem, al la Leĝo de Dio, al niaj filoj kaj al sia patrineco kaj edzineco!"

Farinte paŭzon, dum kiu li lasis vidi en siaj okuloj la grandegan amon regantan lian koron, li daŭrigis per humilaj tonoj, duobligantaj mian admiron al tiu noblega karaktero, kiun de tri jaroj mi ĉiutage observadis.

"– Se mi nur povus, Kmilo, mi evitigus al mia kompatinda Lejla la dolorojn de la kulpelpago, ŝin altirante al karesema kunvivado kun mi kaj forviŝante el niaj rilatoj, kiel mi iam ja provis, la makulojn de la kulpo per la kiso de pardono, kiun mi spontanee kaj volonte donis al ŝi jam de longe! Sed ŝi volas nenion akcepti de mi, antaŭ ol pagi sian ŝuldon sub la batoj de tempestoplena reenkarniĝo, kiun mornigos la plorado pro akraj

suferoj, por ke ŝi iam povu rigardi sin inda je mia amo kaj je la pardono de Dio! Ŝia konscienco, nigrigita de la kulpo, estis la aŭstera juĝisto, kiu ŝin juĝis kaj kondamnis, ĉar ŝi, kun la animo vundita de mordantaj rimorsoj, tiele timegas kaj abomenas sian pasintecon, ke nenio, ja nenio kapablos mildigi la ardegon, kiu ŝin torturas, krom la neevitebla doloro ĉe turmenta surtera elaĉeto! Mi ja volus alproksimiĝi, malpliakrigi mian resopiron, rekte parolante al ŝi, dum maldormo aŭ dum dormo, por ŝin konsoli kaj instigi, per miaj esprimoj de eterna amikeco, al batalado por la venko! Sed eĉ alproksimiĝi mi ne povas, ĉar, se ŝi min perceptas, ŝi teruriĝas kaj provas forkuri, hontante la makulon, pri kiu ŝin akuzas la konscienco! Mi tamen povos vidi aŭ akompani ŝin, kiam ajn mi volos, sed nepre singarde, evitante ke ŝi min perceptu, por ne konfuzi ŝin...”

“– Mi konvinkiĝas ĉiam pli kaj pli, S-ro Doktoro, ke miaj legantoj multe ĝojus, se mi revenus por prezenti al ili la kortuŝajn epizodojn, kiujn mi rimarkas en la interlinioj de viaj rakontoj...”

“– Mi petos la patron de Lejla konigi al vi, mia kara portugala verkisto, tiun dramon, kiu tiel forte allogas vin... kiu scias?!... Laboro estas rekonata kiel fundamenta rimedo de progreso, kaj ĉia nobla, grandanima intenco, inspiranta sinceran laboranton, nepre ricevos dian aprobon por efektiviĝi... Don Ramiro de Guzman kapablas tion fari. Li estas hardita Spirito, kiu spertiĝis pri la batoj de l' malfeliĉo kaj povoscias regi la emociojn, ĉar li posedas en plej alta grado la mensan disciplinon. Li povos kaj ja volos fari ĝin, ĉar li sin devontigis antaŭ mi mem klopodi por la morala reedukiĝo de la junaĝa virino sur la Tero, memore al la malfeliĉa filino, tiel amata de lia patra koro, sed kiu tiom multaj kaj akraj ĉagrenoj kaŭzis al li... malgraŭ la rafinita edukado kiun li klopodis havigi al ŝi. Mi parolos al li pri la afero.”

Komprenante, ke li pretas foriri, mi ankoraŭ demandis, fidela al la malnova, impertinenta scivolo de l' romanverkisto, kiu ĉie priflaras sentimentalajn materialojn, per kiuj li altigu siajn temojn:

"– Kaj... pardonu min, bonega doktoro... Via edzino... la ĉarma Lejla... kie ŝi nun troviĝas?..."

Li trankvile stariĝis kaj serioze fiksis sian penson, kvazaŭ li provus sendi telepatian mesaĝon al siaj superuloj. Poste li alproksimiĝis al tiu mirinda bildoricevilo, zorge agordis ĝin al la surtera krusto kaj atendis, murmurante kvazaŭ al si mem:

"– Eble vesperiĝas en la sudokcidenta hemisfero... Ni ne estos maldiskretaj, se ni provos ŝin vidi nun..."

Efektive! Iom post iom infana figuro elstariĝis el la duonlumo de ĉambro ĉe malriĉega familio. Ĉio montris, ke temas pri plej modesta, kvankam ne mizera, brazilana hejmo. Iu knabino, laŭŝajne kvinjara, kies enpensiĝa kaj malĝoja mieno vidigis la krudecon de la ŝtormoj agitantaj ŝian Spiriton, distriĝis per siaj modestaj ludiloj de malriĉa infano kaj ŝajnis mense maltrankviliĝi de rememoroj, kiuj konfuziĝis kun la nunaj okazaĵoj, ĉar ŝi alparolis siajn pupojn kvazaŭ ŝi konversacius kun personoj, kies figuroj desegniĝis simile al konturoj de "crayon", en ŝiaj mensaj vibroj. Roberto malĝoje rigardis ŝin kaj sin turnis al mi, kiu alprenis la instruon, ravite antaŭ la majesteco de l' dramo, kies originon oni konigas la mi:

"– Jen ŝi! Reenkarniĝinta en la lando de la Sankta Kruco... kie ŝi trairos sian doloran kalvarion el elaĉetoj... Nun ŝi vivas for de la medioj, kiujn ŝi tiel multe amis!... senprotekta pro la foresto de tiuj, kiuj tiel sindone amegis ŝin, sed kies korojn ŝi piedpremis per plej kruela sendanko! Lejla malaperis por ĉiam en la abismo de la pasinteco!... Alia nun estas ŝia nomo: – Maria... la honorinda nomo de nia respekteginda Gardantino... Por la surtera mondo ŝi estas bela, ĉarmoplena infano, naiva kaj senkulpa kiel la anĝeloj en la Ĉielo! Sed antaŭ sia propra konscienco kaj la juĝo de la Sanktega Leĝo, kiun ŝi malrespektis, ŝi estas la virino adulta, ĵurrompinta, malfidela, blasfema kaj sinmortiginta, ĉar Lejla ankaŭ sinmortigis, malŝatinte la gepatrojn, la edzon, la filojn, la Familion, la Honoron, la Devon, pro la pereigaj logoj de la malnoblaj pasioj..."

Du larmoj pendis ĉe la veluro de liaj helaj, andaluzaj okulharoj, dum li kortuŝite daŭrigis:

"– Ho Kamilo! Gloro al Dio! Hosana al Lia Patra Boneco, kiu kaŝas antaŭ la enkarniĝintoj la nigran vicon de ties pasintaj eraroj!... Kio fariĝus el la homa socio, se ĉiu homo povus rememori siajn pasintajn ekzistadojn?!... se ili reciproke konus sia spiritan pasintecon?!...

Subite, nepriskribebla krio, plena samtempe de teruro, de emocio aŭ honto, kiu randumus frenezecon, rompis la silenton de la humila brazila hejmo, eĥiĝante en la kvieteco de nia transtomba malsanulejo: – la knabino ĵus perceptis Roberton, vidis lin kvazaŭ reflektita en la telepatiaj ondoj, ĉar la rimorso komunikis al ŝia konscienco, ke li estas la granda viktimo de ŝiaj eraroj. Ploregante, ŝi serĉis rifuĝon en la patrinaj brakoj, kaj la kaŭzon de tiu subita krizo ja neniu komprenis...

La asistanto de Teokrito sin detenis daŭrigi, rapide elŝaltante la impresan aparaton.

"– Ĉiam estas same – li malĝoje ekkriis –, ŝi ne kuraĝas rigardi min... Ŝi tamen pensas pri mi kaj deziras reveni al kunvivado kun mi..."

Post adiaŭo, li foriris enpensiĝa. Mi neniam plu parolis al li pri tiu afero. Sed en tiu sama vespero mi ekskribis notojn por preparado de ĉi tiuj modestaj paĝoj...

Kiu povus scii, kion al mi rezervus la favorkoreco de la Plej Alta?... Eble ne estus tute malprobable, ke mi povos verki kiel iam... Ĉu mi nun ne havas kelkajn surterajn amikojn kapablajn min aŭskulti kaj kompreni?

Jes ja! Mi tre multe pliboniĝis dank' al la efika kuracado ĉe la Hospitalo Maria el Nazareto... Tion atestis la radianta Espero, kiu fortigis al mi la Spiriton!

# DUA PARTO

## LA DEPARTEMENTOJ

## Ĉapitro I

### La Gardostara Turo

Kiel vi pensas? Se viro havas cent ŝafojn, kaj unu el ili erarvagis, ĉu li ne lasas la naŭdek naŭ, kaj iras al la montoj, kaj serĉas tiun, kiu erarvagas? Tiel same ne estas la volo de via Patro, kiu estas en la ĉielo, ke unu el ĉi tiuj malgranduloj pereu.

Jesuo-Kristo
**La Nova Testamento.** [1]

Frato Teokrito sendis al ni kurieron kun honora invito al kunveno en la aŭditorio de la Hospitalo.

Tie alveninte, ni konstatis, ke malgrandan nombron da hospitaligitoj oni distingis per la sama alvoko, ĉar la ĉeestantaro konsistis nur el tiuj anoj de nia grupo, kies kuracado baldaŭ finiĝos.

La nobla direktoro de la Hospitala Departemento alvenis senprokraste. Akompanate de Romeo kaj Alcesto, kiuj sidis apud li, frato Teokrito okupis la honoran katedron, dum ĉe dua plano,

[1] Mateo, 18:12 kaj 14.

sur al ili destinita podio, prenis lokon la kuracista skipo, kiu nin prizorgis dum nia restado en la hospitalo.

Prenante la kutiman, dignoplenan teniĝon kaj uzante esprimojn de plej altaj afableco kaj saĝo, neniam dementitaj, la klera inicito alparolis al ĉeestantojn pli-malpli jene:

"– Ni danku Dion en la plej alta Ĉielo, Kreinton de Ĉiuj Ekzistaĵoj, ke Li, amataj amikoj kaj fratoj, ĉeestas tiun ĉi kunvenon, por kiu ni petegas Lian protekton de Patro kaj Sinjoro!

Sincera ĝojo igas niajn animojn hodiaŭ elverŝi hosanajn dankojn al la Korfavora Majstro, pro la feliĉega triumfo, kiun al ni estas konsentite rigardi: – ke vi bonvole akceptis kredi je la Dia Patreco kaj sekve je la Spirito kiel fajrero originanta el la volo de la Ĉiopova kaj destinita al glora evoluado tra la Eterneco! Vi tamen ankoraŭ restas malfortaj, ŝanceliĝantaj kaj malgrandaj. Sed tio ne malhelpos, ke antaŭ vi, dum la estontaj jarmiloj, malfermiĝu senfina vojo de revirtigaj bataloj, invitante vin al la persista laborado por la Progreso, cele al la konkero de l' definitiva elaĉeto en la amoplena sino de la Kristo de Dio.

Certaj pri tio, ke korfavora, justa, plej amanta Patro sindone zorgas pri Sia idaro, preta etendi al ĝi protektan manon por levi ĝin al la nepereemaj ĝojoj de Sia regno – kiu el vi ne sentos sin kuraĝa, sufiĉe entuziasma por tiu kompensa batalado, nedubanta la finan venkon?!... Kiu ne kolektos la tutan en si disponeblan bonan volon por ĉiutage peni sin levi je unu plia grado en la longa kaj malfacila, sed neniel neplenumebla, suprenirado, kies kulmino estas la kuneco kun la Tre Amata Majstro, la glora unueco en Lia Amo?!...

Ni vin kunvenigas por informi, ke hodiaŭ finiĝas la kuracrestado al vi permesita en ĉi tiu Hospitalo, ĉar la stato de via fizika-astrala organismo, pro ĝia okulfrapa pliboniĝo povos nenion pli aspiri el nia gastamo. Vi tamen ankoraŭ ne estas resaniĝintaj, vi eĉ ja restas malsanaj... kaj tiaj vi ankoraŭ longe restos se vi ne helpos vin mem per forta kaj disciplinita volo cele al la kompleta reboniĝo! Ni ja konas la neesprimeblajn suferojn,

la pezajn angorojn kaj afliktajn malsanetojn, kiuj en via interno krias por helpo, kaj vi ne povas kompreni, kial ni vin forpermesis el la hospitala kuractempo, se vi ankoraŭ sentas vin bezonantaj tiom multe da zorgoj! Tiel estas, karaj fratoj, ĉar vi nun eniras novan fazon de la kuracado konvena al via resaniĝo, kuracado de karaktero ekskluzive morala kaj mensa, ĉar la vero estas, ke vi ne bezonus hospitalon, eĉ ne kirurgojn kaj flegistojn, por atingi resaniĝon en la spirita medio, se vi posedus noblajn moralajn kvalitojn, mensan progreson bazitan sur la virtoj de la koro kaj la plenumado de la devo. Tiaokaze via volo, harmonianta kun la superaj vibroj, al kiuj vi devus agordi viajn proprajn vibrojn, forŝovus la vualojn kovrantajn la spiritan sciencon, al kies posedo viaj mensoj kapabliĝus pro spontanea altiriĝemo... kaj vi enirus, nature kaj libere, la Nevideblan Mondon, kvazaŭ en vian hejmon mem – ĉar Tiu Mondo ja estas la origina patrolando de ĉiuj kreitoj! Sed bedaŭrinde – kaj tion vi bone scias – vian surteran vivon, viajn agojn ne inspiris tiu sintenado necesa al feliĉa eniro en la astralmondajn sociojn. Vi malŝatis la noblajn principojn, la altajn celojn; vi misformis al vi la karakteron ĉe la febra interfrapiĝo de la malnoblaj pasioj, kiuj sur la Tero venenas la menson; vi sklavigis la koron al la malicaj antaŭjuĝoj; vi malgrandigis vian propran animon ĉe la insidaj delogoj de la trompa orgojlo kaj kronis la vicon da malprudentaĵoj, ĉe kiuj vi plezuris, per malnobla ago kontraŭ la Leĝo de Tiu, kiu estas la Sola Sinjoro de la tuta Kreitaro kaj kiu, pro tio, ankaŭ estas la Sola Superege Potenca por disponi pri la Vivo de Siaj kreitoj!

En tiel morale malsuperaj kondiĉoj, katenitaj al pereigaj antaŭjuĝoj, vi nenion sukcesus asimili en la Spirita Mondo, se ne estus la helpo de la konkretigitaj formoj, de la rimedoj, al kiuj kutimiĝis viaj mensoj. Konvenis toleri viajn nesciadon kaj mensmalfortecon favore al via progreso mem! Konvenis apliki la karitaton, sufiĉe sanktan por plej gravaj atingoj en mallonga tempo! Senfine favorkora, la Superega Providenco donas al siaj komisiitoj liberecon por ke ili servadu al Bono, uzante mildajn procedojn, prefere prudentajn kaj persvadajn. Pro tio ni havigis

al vi, ĉe la malfeliĉego, en kiun vi falis, tiun kuracadon plej konforman al via mensostato, nome tiun pli rapidan kaj efikan por la urĝa helpo, kiun vi bezonis! Ĉar vere sufiĉus nur via mensa reago por deturni la malbonon, kiu afliktis vin – se via stato ĝin ebligus!

Dank' al la Saĝa Providenco, ni hodiaŭ kunvenigas vin ĉi tie por tiuj simplaj instruoj, kies valoron vi jam kapablas ĝuste rekoni.

Tiel do, kio nin koncernis fari por via bono, tion ni entute efektivigis, tio estas, lerte kaj pacience levi vian vibran staton ĝis vi troviĝis en la kondiĉoj elteni novan programon sur via vojo de kulpintaj Spiritoj, kiuj, ĝuste pro tio, devos labori. Reakirinte pli bonajn kondiĉojn en via spirita mondo, vi devos klopodi por via morala reboniĝo. Via restado en ĉi tiu Departemento estis kvazaŭa prepara kurso por via akcepto en sferojn kie vi devos elmontri vian tutan valoron kaj bonvolon!

Via situacio neeviteble necesigos novan reenkarniĝon. Vi devos ripeti la surteran ekzistadon, kiun vi fiaskigis per memmortigo, rifuzante la plenumon de la sankta devo sperti la lernadon ĉe la Doloro, favoran al vi mem, al via progreso, al via estonta feliĉo! Vi tamen rajtas libere elekti, ĉu ĝi okazu nun aŭ poste, kiam vi akirinte pli bonan moralan provizon ĉe ni, opinios vin kapablaj por, dum unu sola surtera ekzistado, solvi pli urĝajn elaĉetajn ŝuldiĝojn –, kio al viaj Spiritoj havigos multe da gajno kaj merito!

Vi certe komprenis, kion ĉi tio signifas, nome ke, se vi tuj reenkarniĝos, vi pagos nur etan parton de via ŝuldo, se vi prokrastos, vi ĝin likvidos, ĉar tiam vi ĝuos favorajn kondiĉojn por rezisti kontraŭ la batoj trudataj de tiel ampleksa elpurigo.

Estus do nepre konsilinde ankoraŭ iom malfruigi la ripeton de via surtera kompensa elprovado. Dume vi povos, se vi vere inklinas al studado de la Scienco pri la Nevideblo, fari inican kurson ĉe ni, kio – tion ni certigas al vi – vin multe kapabligus por la venko kaj ankaŭ mildigus la amaraĵojn kaj kontraŭaĵojn

esence proprajn al la renobligaj travivaĵoj, kiuj, kiel vi scias, estas dolorplenaj, ĉar kion ni havigus al vi per tia instruado, tio ja estus la Scienco pri la Vivo, sub la aŭspicioj de la granda Edukanto Jesuo el Nazareto, kies doktrinojn la homaro obstine malakceptas, nesciante, ke per tio ĝi forigas sian propran feliĉon, la nepereeman gloron de sia senfina destino ĝis tre malproksima estonteco!

Tiun Sciencon vi povus lerni sur la Tero mem, ĉar tie ekzistas diversaj elementoj, solidaj kaj veraj, kapablaj lumigi cerbojn kaj korojn, ilin kondukante sur la vojon de Vero. En la grandioza historio de la homaro brilegas eminentaj figuroj, distingiĝantaj per la vera posedo de virtoj kaj saĝo, kiuj al ili donis la titolon de mentoroj kapablaj konduki la homojn al ties grandiozaj destinoj kiel filojn de la Superega Dio. Ili malsuprenvenis el altaj spiritaj sferoj, reenkarniĝis inter siaj fratoj, la homoj, humiliĝis ĉe la memofero de enkarna ekzistado, celante plenumadi la superegajn decidojn de la Kreinto per Amo al la malpli progresintaj kreitoj, kiujn ili klopodas eduki kaj nobligi, oferante al la laboroj por tiel sublima idealo la plej zorgajn penadon kaj bonvolon altigantajn iliajn animojn de misiuloj kaj mentoroj! En Jesuo el Nazareto vi vidu la plej eminentan el tiuj figuroj, kiuj trairis la ombrajn surterajn regionojn. Sub lia orientado agis ĉiuj ceteraj, ĉar ĝis nun neniu estulo, loĝinta sur la Tero, kapablis atingi, per la penso turnita al la origino de la planedo, la ĝustan tempon, kiam la Amata Sinjoro ricevis el la manoj de la Ĉiopova la Teron kaj ties homarojn, por ilin levi el la komenca abismo, eduki kaj glorigi en la radiado de la senmorta Lumo!

Sed... de jarmiloj vi reenkarniĝas sur la Tero, kies altvalorajn trezorojn, en ĝi deponitajn de la Ĉiela boneco, vi neniam pensis utiligi... vi indiferente preterpasis ilin sen eĉ ekzameni ilian ĝustan valoron, kaj estas timinde, ke, forirante de ĉi tie sen tiuj kapabloj ankaŭ akireblaj por vi sur la Tero, vi ĉiam ankoraŭ baraktados en tiu sama neelirebla rondo, al kiu vi daŭre kateniĝas... ĉar vi estas malfortaj, ne scipovas kontraŭstari la tentojn de via orgojlo kaj ja bezonas fortojn por rekomenci la iradon...

El tiuj, kiuj kun vi antaŭ tri jaroj eniris ĉi tien, multaj daŭre restas absolute senpovaj por provi ion ajn. Kelkaj, katenitaj al la memoro de absorbaj pasioj, hardiĝintaj en la erara vojo de malkredo kaj senkuraĝiĝo, tute nekapablaj, morale kaj mense, por la laboroj de la normala progreso, ankoraŭ bezonos la toleremon kaj la sanktan amon de Maria, kiu, kiel Modela Patrino, tre multe kompatas la mizerulojn. Aliaj male devos tuj reenkarniĝi, por korekti tiujn gravegajn difektojn, kiuj daŭre restas en iliaj astralaj korpoj kiel sekvo de la perfortega bato donita de la memvola morto. Se ili ne reenkarniĝos por la korekto de tiaj malordoj, kiuj nebuligas eĉ ilian prudenton, ili povos nenion provi, eĉ ne la ripeton de tiu dramo, kiu ilin puŝis al la abomeninda ago, dramo, kiun ili fatale reludos, ĉar ĝi estis, aŭ la elpago de krimoj faritaj en pasintaj ekzistadoj, aŭ la sekvo de nuntempaj kulpoj, pri kiuj ili respondecas antaŭ la Granda Leĝo, el kiuj ili volis eskapi pere de la memmortigo, kaj kiujn ili ankaŭ devos elpagi, ĉar tiel ĝin postulos ilia propra konscienco, kiu antaŭ si mem misharmoniiĝis kaj malhonoriĝis! Ili estas tiuj samaj, kies speco de memmortigo, tre violenta, translimis la eblecon de mildigo per la psika terapio al vi aplikita, kies procedojn vi sufiĉe bone konas, por ke oni ilin priskribu al vi. Kiel kompreneble, la longa kaj ja utila loĝado en la materio estos terapio urĝa kaj de pruvita efikeco, ĉar ĝi korektos la vibran malordon, moderigante ties ardecon kaj intensecon. Post tiel konsterna intertempo, la Spirito reprenos tiun mensklarecon favoran al nova etapo, dum kiu li nur zorgos pri la revirtigaj spertoj, ĉar tiam li jam troviĝos en la konvena stato, kun ŝancoj por venki!

Kiel vi vidas, karaj amikoj, unu jarcenton, du jarcentojn... eble pli!... kaj la sinmortiginto ankoraŭ estos trinkanta la galon el la konsterna sekvo de sia malrespekto kontraŭ la leĝo de la Granda Kreinto de Ĉiuj Ekzistaĵoj!”

Ni atente aŭdis, scivolaj kaj malkuraĝaj antaŭ la perspektivo de la estonteco, kiun ni ne kapablis precize prezenti al ni, timeme konsciante la gravecon de nia eraro, kiu al nia animo gustis tiel

aŭ pli amare, ol kondamno al pendumo, kaj komprenante, kun bedaŭro, la neceson, ke ni forlasu tiun bonfaran ŝirmejon, sub kies protekto, se ne la sopiratan ĝojon – kiun ni ja ne meritis – ni almenaŭ akiris la plej valoran bonon, kiujn kulpinta Spirito povas aspiri kiel esperdonan lumilon sur la vojoj de sia kalvario el kulpelpagoj: – abnegaciemajn fratojn, protektemajn amikojn, fidelajn al la noblaj kristanaj principoj de Amo kaj Frateco!

Sed Teokrito daŭrigis, ĝoja pro nia mensa teniĝo, petanta malkaŝan konsilon:

"– Alvenis la okazo por vizito en la Tero, tiel forte dezirata de vi! Ni havigos al vi gardistojn kaj sekuran transportadon, pro tio ke vi estas nespertaj kaj ankoraŭ troviĝas sub la zorgo de la Legio, ĉar ni ne konsideras finita nian kunhelpon al via morala reboniĝo! Konvenas, ke vi, atinginte la surteran kruston, plej prudente pripensu – preĝante kaj viglante – laŭ la konsilo de nia Dia Modelo, tio estas, rezonante sub la klaraj inspiroj de Devo, Moralo, kaj Bono, kaj ne lasante vin treni de la malnovaj deziroj kaj logoj, de la vantamo, de la senzorgemo tiel ordinara ĉe la malsuperaj regionoj de la planedo.

Ni avertas vin, ke al vi estos malbone, se vi preferos resti sur la Tero, forgesante viajn amikojn en tiu ĉi Kolonio, la fratan kristanan protekton, kiun vi ĝuas ĉi tie. Penu, ke vi ne maldeziru reveni kun la sindonaj kompaniuloj, kiuj servos al vi. Se vi revenos al ĉi tiu hejmo, kiu estas la sola, al kiu vi vere apartenas, volonte submetiĝante al la patrina gvidado de nia Plej Nobla Protektantino, estos al vi permesite eniri en alian Departementon de tiu ĉi Instituto, pli bone dotitan ol la Viglado kaj la Hospitalo, kaj tien vi supreniros ne por ĝui feliĉojn kaj ĝojojn, kiujn vi ankoraŭ ne rajtas, ĉar vi ilin ne konkeris, sed por akiri sciojn, kiuj kapabligu vin por la bataloj de la progreso, kiun vi devas atingi!

Antaŭ ol vojaĝi al la Tero, vi estas invitataj al instruvizito en la Departementoj, kiuj konsistigas la unuajn fakojn de nia Instituto. Multon vi profitos de la scioj, kiujn vi povos ricevi, kiel en la Viglado, tiel ankaŭ en la fakoj de la Hospitala

Departemento, nome la Izolejo, la Frenezulejo kaj ankaŭ en la Departemento de Reenkarniĝo kun ties interesaj sekcioj, kiuj plej intime vin interesos... ĉar vere vi ne devas revidi la surteran Patrolandon sen tiuj scioj havigotaj de la Departementoj; ili faros vin pli fortaj por kontraŭstari la memoron pri la malnovaj logoj... Sed estas necese, ke vi ne faru al vi iluziojn pri tio, kio vin atendas dum tiu migrado sur la Tero: memoru Hieronimon!... Jam pasis multe da jaroj, depost kiam vi forlasis la karnajn restaĵojn en la koto de l' tombo... Multaj el vi jam estas forgesitaj de tiuj, kiujn vi korvundis per la sinmortigo... se ne tute, almenaŭ sufiĉe por tio, ke ili seninteresiĝis pri la sorto de la sendankulo, kiu ne hezitis ilin trapiki per tiel kruela aflikto: – envolvita en la bolado de la materiala vivo, la homo ĉion facile forgesas... Vi do ne kredu, ke vi rikoltos ĝojon dum tiu migrado! Cetere, la Tero neniam regalis per feliĉigaj kompensoj tiun, kiu, konsciante, ke li devenas de dia fajrero, klopodas marŝi al Dio entuziasmante pro la ĉielaj ĝojoj, kiuj lin atendas... Sed ni sentas nin trankvilaj koncerne tiajn apartaĵojn! Al vi ne okazos tio, kio surprizis Hieronimon: – vi estas preparitaj por la eblaj elreviĝoj, por la neatenditaj batoj de okazaĵoj, pri kiuj vi ankoraŭ ne scias!

Nun, iru ripozi... kaj la Dia Majstro konsentu al vi siajn inspirojn...”

..............................................................................................................

En la morgaŭa tago, ni ŝanĝis nian loĝejon.

Joel kondukis nin al pavilono aneksita al la Hospitalo, ia gastejo por loĝado de tiuj ĵus forlasintaj la grandan institucion. Girlandornamita per grimprozujoj kaj tute ĉirkaŭita de sveltaj cipresoj, ĝi rememorigis pri klasikaj pejzaĝoj de la malnova Hindujo, tiel amata kaj glorata de tiu plejado da majstroj, al kiuj ni sentis nin ligitaj. Oni nomis ĝin Hinda Pavilono aŭ, ankoraŭ, Domo de l' Rozoj. Sed nebulo kovris per nostalgio ankaŭ tiun kvietan lokon, envolvante ĝin en sian eternan mortotukon.

Neesprimebla bonfarto regis nian animon en tiu ĉarma mateno. Belarmino, kiu ordinare sin tenadis serioza kaj pensema, montris sin gaja, komunikiĝema. Johano d' Azevedo deklaris sin esperplena kaj preta volonte plenumi nur tion, kion al li konsilos Frato Teokrito, kaj tiucele li intencis interparoli kun la tre bonkora direktoro. Kaj mi – mi sentis min eĉ feliĉa, eĉ permesis al mi pensi pri estontaj literaturaj projektoj, ĉar mi kredis, ke okaze de baldaŭa vizito en la Tero mi atingos tondran transtomban sukceson, reprenante la kutimajn literaturajn laborojn kun la helpo de la unua renkontita mediumo. Tiam ni ankoraŭ tute ne suspektis pri la amplekso de la ardaj luktoj, kiujn al ni trudos la elaĉetaj devoj... kaj la komforto, la karesa akcepto, al ni donitaj de tiuj abnegaciemaj servantoj de Bono, formetinte la tragikan dolormantelon, kiu kovris niajn Spiritojn, igis nin pensi, ke finfine la memmortigo ne estis tiel kruela kiel ĝi eble ŝajnus...

Mario Sobral estis la sola, kiu sin ne iluziis, ĉar, vidante nian ĝojon dum la unuaj horoj pasigitaj en la Hinda Pavilono, li diris:

"– Dio tiel konservu vin por ĉiam, amikoj!... Tion al mi ne permesas la konscienco!... Ĝi necedeme akuzas min, konsentante nenian pacon al mia malfeliĉa koro! La silento, kiun niaj amikoj gardas pri mia krimo, teruregas min pli multe, ol se oni min ĉiutage kulpigus kaj al mi antaŭsentigus repagojn!... Ne eble estas, ke mia konduto kontraŭ miaj edzino kaj filoj, kontraŭ la mizera Eŭlina, kontraŭ miaj kompatindaj gepratroj, pasis nerimarkite de la Leĝo, kies sojlo ekmalfermiĝas por mia kompreno... Se mi krimis kontraŭ mi mem per sinmortigo, mi ankaŭ krimis pro la malbono farita al aliulo. Ĉu vi scias, Kamilo, jam de kelka tempo mi sentas la manojn rigidiĝintaj... inertaj... malplenaj... kvazaŭ ili estus detranĉitaj... kelkfoje mi ilin serĉas, konfuzita, ĉar mi sentas ilian mankon... kaj tiam, subite, dum mi demandas al mi, kio povus kaŭzi tian strangaĵon, korŝira vido malordigas al mi la menson: – mi vidas Eŭlinan faligita sur

la kanapo, konvulsie tordiĝanta sub la klakado de la vangofrapoj, per kiuj mi kontuzadis ŝian vizaĝon... stertoranta inter miaj manoj de murdisto... manoj, kiuj tie restas, apartigitaj de la pojnoj, ŝin strangolante!... Ho Dio mia! Kion signifas tia nenormalaĵo?!... Kiu alia mensa perturbo sin prezentos por puni min?!... Mi vin petas, amiko Kamilo, donu al mi vian multevaloran opinion...”

“– Tio eble estas, mia kara amiko, la ĉagrenoj, kiuj halucinas al vi la menson... la rimorsoj, kiuj maltrankviligas vian konsciencon... ĉar, finfine, vi ne ĉesis ami tiun kompatindan virinon... Kial vi ne konsiliĝas kun Frato Teokrito?!...”

“– Mi jam faris, Kamilo, mi jam ĝin faris...”

“– Kaj do?... kion li diris al vi?”

“– Li konsilis al mi konfidi la Dian Providencon, kiu neniam forlasas iun ajn kreiton petegantan pri helpo; ke mi rezignaciu ĉe la senrimedeco de la situacio, kiun mi mem kreis, kaj revigliĝu ĉe la Fido por korekti ĝin... Li admonis min al konstanta preĝado, al penado por starigi simpatian, magnetan fluon, tiucele petegante Marian, ke Ŝi min helpu, instruu, konsolu, por ke mi mense prepariĝu por la estonteco... ĉar en la nuna momento neniun alian rimedon mi povas disponi krom ĉi tiu...”

“– Vi do tion faru!... Se li tion konsilis al vi, ĝi signifas, ke nur tio povas havigi al vi, kion vi ja bezonas...”

“– Mi ja tion faras, Kamilo, mi nepre tion faras!... li insiste rediris, ekscitita kaj suferanta. – Sed ju pli mi ĝin provas, kun sindona fervoro, despli mi konvinkiĝas, ke tiu vido antaŭsignas la estontecon: – mi reenkarniĝos, kiel ja asertas Romeo kaj Alcesto, por elpagi mian duoblan krimon... mi reiros mutilita, sen la manoj... ĉar ili apartiĝis por sin fordoni al krimado... ili kune kun mi senhonoriĝis, strangolante kompatindan, sendefendan virinon... Mi jam eĉ ne havas ilin, Kamilo!... Mi ilin ne sentas, ne vidas... ili estas entombigitaj kune kun la korpo de Eŭlina... kaj por ilin rehavi, rehonoriĝintaj kaj elpuriĝintaj el tiu abomeneginda makulo, mi devos sperti la turmentegon travivi ekzistadon sen ili, por ke mi lernu ĉe la suferado, ĉe la

neimageblaj torturoj el ĝi rezultontaj, ĉe la honto de humiliga anomalio, ke la manoj estas sanktega propraĵo de la karna korpo, nin konstante avertantaj, ke ni devas ilin servigi ekskluzive al Bono kaj al Justeco, neniel al krimado!... Eŭlina estis duoble sendefenda: – ŝi estis virino kaj sekve malforta, krom ankaŭ forlasita de la familio kaj de la socio, ĉar nenio alia ŝi estis ol mizera publikulino! Sed... eĉ fariĝinte tiel malfeliĉa kaj mizera, ŝi estis, super ĉio, kreitaĵo de Dio, ido de la Superega Estaĵo, Ĉiopova kaj Justa... same kiel mi, kiel vi, amiko Kamilo, kiel la tuta homaro! Tiu Patro, kiu sendistinge amas ĉiujn Siajn filojn, nun postulas de mi respondecan kalkulon pri la vivo, kiun mi forprenis, tiu superega havaĵo, pri kiu nur Li scias kaj povas disponi, ĉar nur Li scias kaj povas ĝin doni! Ŝian rajton kiel ido de la Superega Kreinto neniu povus forpreni de Eŭlina!... de ŝi, kompatinda, kiu neniun alian rajton ĝuis en tiu mondo el fiaĵoj, eĉ ne la rajton vivi, ĉar *mi, volante ke ŝi ne plu vivu,* murdis ŝin! Mi murdis Eŭlinan!... Kaj nun mi aŭdas la reeĥon, en la plej kaŝitaj anguloj de mia Spirito trapenetrita de rimorsoj, de la aŭstera kaj kortuŝa voĉo de la Konscienco – kiu kvazaŭ estas la voĉo de Dio mem resonanta en la interno de nia senmorta esto: "– Kaino, Kaino!... Kion vi faris kontraŭ via frato?..." Ho Kamilo, Kamilo, mia amiko!... Kiam mi strangolis Eŭlinan, mi forgesis, ke ankaŭ ŝi estas filino de Dio! ke ankaŭ ŝi havas sanktajn rajtojn donitajn de tiu Korfavora kaj Justa Patro! Kaj nun..."

Larmoj torente elfluis, interrompante lian parolon, kaj kortuŝa ombro de malĝojo kovris la kvietan etoson de la Domo de l' Rozoj. Cetere, la ĝojo, kiu regis nian internon en tiu mateno, fontis nur el tio, ke ni ĝojigis Teokriton por la progreso farita dum nia trijara restado en la Hospitalo...

..........................................................................................................................

Karlo kaj Roberto volonte konsentis nin akompani dum la instruvizito proponita de la sperta direktoro de la Hospitala

Departemento. Ni opiniis, ke ĝi komenciĝu ĝuste de la Gardostara Turo, kiu, kvazaŭ nevenkebla fortikaĵo staranta en la mezo de kruda regiono de la Nevidebla Mondo, defendis avangardan postenon de viglado kontraŭ danĝeraj, diversspecaj atakoj, ĉar eĉ la malsuperajn mensajn emanaĵojn, venantajn de ekstere, oni tie kontraŭbatalis kiel unu el la plej timindaj invadoj.

Longa estis la irota vojo. Simpla, rapidfluga ĉaro transportis nin, ĉar ĝis tiam ni eĉ ne antaŭvidis la eblecon translokiĝi per la penso, praktikante la memflugadon. Ĉe certa punkto de la vojaĝo, jam tre malproksime de la hinda Pavilono, ni aŭdis, ke Roberto parolas, respondante iun konfidencon de Mario Sobral:

"– La senkuraĝeco estas malbona konsilisto, amiko Sobral! Bone estus al vi serene pripensi la proponon, kiun al vi faris la sperto de Frato Teokrito. Kvankam ĝi ŝajnas banala, sensignifa konsilo, ĝi tamen enhavas profundan saĝon kaj prezentas al vi la oran ŝlosilon, per kiu vi malfermos tiujn barojn, kiujn vi kredas ekzisti sur la vojoj de l' revirtiĝo! Cetere, per kio gravas ekzistado kun tridek, sesdek jaroj da sinoferoj, en kiu la karna korpo povos suferi mutilon, se ĝuste per ĝi ni rekonkeros la spiritan honoron, la pacon mankantan en la konscienco, ĉar ĝi havigos la oportunon por tiu elaĉeta verko, nin harmoniigonta kun la Leĝo, kiun ni malobeis?!... Ne timu, Mario, la elaĉetajn klopodojn, ĉar ni ĉiuj, kiuj eraras, bezonas ties helpon por liberigi la konsciencon, sekve nian destinon, de la malnobligaj ŝuldiĝoj, kies amaso nin tiom malagordas al la harmonioj de la Dia Leĝo, prisemante nian vojon per anomaliaj situacioj. Antaŭ vi etendiĝas la Estonteco, por helpi vin ĉe la bezonata morala renoviĝo! Ĝi montros al via menso, se vi volonte okupiĝos per serioza, prudenta pripensado, ke vi povos forviŝi el via animo la humiligan makulon de la malbonaj agoj per la plenumado de la nobligaj devoj! Se do estas necese denove sperti la surteran ekzistadon en mutilita korpo, por ke vi lernu, ĉe ties sekvaj malfacilaĵoj, uzi vian tutan karnan envolvaĵon por ekskluzive

noblaj celoj, vi tute senhezite akceptu tiun oferon! Vi ja konvinkiĝis, ke vi eraris, tial vi certe rigardos justa preni sur vin la respondecon pri la agoj, kiujn vi faris malutile al vi mem, ĉar ja tion postulas la spirita honoro, la morala digno de la Spirito! Kaj se vi dume scios klarigi vian internon per la brilaj lumoj de la konfido al Dio, de la espero pri Lia patra boneco, nutrante ĝin per kuraĝo kaj rezignacio, certa pri tio, ke vin neniam forlasos ĉe la malglataĵoj de la revirtiga vojo la Amo de tiu Patro, kiu ne kondamnas sed ja helpas Sian kreiton releviĝi el la abismo, en kiun li lasis sin engliti, vi eĉ povos rideti al la malfeliĉo, trovi ĉarmojn laŭlonge de via irota kalvario!”

La entuziasmo, kun kiu la juna doktoro eldiris siajn fundamentitajn avertojn, ŝajne revigligis nian mizeran kunulon, kiu silentis kaj restis trakvila dum la cetera parto de la tago.

Sed jen en la malproksimo duonvidiĝis la impresaj domblokoj de la Departemento, al kiu ni apartenis. Enpensiĝinte, mi murmuretis, ne antaŭvidante, ke mi estos komprenata:

“– En kiu, el tiuj domoj, troviĝas la kompatinda Hieronimo?...”

“– Via amiko Hieronimo de Araujo Silvejra troviĝas tie, malliberigita en la Izolejo – respondis Karlo de Kanalejas –, kiel malobeinto al la hospitalaj reguloj.”

“– Kial tiu sekcio estas nomata Izolejo?...” timeme alparolis Mario.

“– Ĉar tien estas sendataj tiuj, kies konduto kontraŭstaras al la disciplinoj postulataj de la Hospitala regularo, la nerezignaciuloj, kiuj misuzis sian liberon, ne estante tamen veraj ribeluloj... Ĝi estus kvazaŭ ia arestejo... Sed tiu humiliga vorto ege malplaĉas al la direktantoj de la kolonio, vorto, kiu cetere ne esprimus la veran naturon de ĝia celo, kiel vi poste konstatos...”

“– Ĉu do Hieronimo estas malliberigita?...”

“– Ĝuste!... Por sia bono kaj por la bono de tiuj, kiujn li amas...”

Mario impresite agitiĝis kaj denove demandis:

"– Kiel oni povas kompreni, Doktoro de Canalejas, ke Hieronimo, ameganta edzo, tre karesema patro, estas arestita, dum mi, duoble, trioble, dekoble krima, restas inter bonaj amikoj?!..."

"– Vi, Mario, estas sincere pentanta Spirito, kiu akceptas la konsilojn de tiuj respondecantaj pri via protekto antaŭ Maria; kiu deziras, ke ili vin laŭcele konduku al rebonigantaj kondutreguloj, ĉar vi ja vin montras inklina al la plej krudaj oferoj por elviŝi la kulpan pasintecon... dum Hieronimo obsede sin tenis ĉe malrezignacio kaj nekomprenemo, obstine alkroĉiĝante al ĉiuj rememoroj pri la pasinteco, kies perdon li bedaŭras kaj el kiu li sin nutras, sen fortoj por ĝin forgesi, ĉar li malinklinas doni al si la penon pensi pri rimedoj, kiuj mildigus lian situacion, kiu estus ja tute alia, se li serĉus la prudentan ŝirmon de la rezignacio!... Cetere, ĉu vi ne pasigis longajn jarojn kiel malliberulo en la horora mallumo de la Valo, kaptita de malesperaj afliktoj, suferegante pro la fera pezo, kiu premegadis al vi la konsciencon?... Kaj ĉu vi ne restas en la kaptiteco, kiun vi trudis al vi mem, ĉar ja via menso, malĝoja kaj senkonsola, malpermesas al via koro kaj al via intelekto ĉian ajn feliĉon?..."

"– Surprizas min konstati, ke post la morto ni povas sperti, inter multe da aliaj strangaj neatenditaĵoj, la suferon esti ĵetitaj en iun karceraĉon..."– mi grumblis, ĉagrenita pro la novaĵo, kiu al mi ŝajnis absurda.

"– Unue, Kamilo, estas vi, kiu aludas ian "karceraĉon", dum mi nur parolis pri ia Izolejo, al kies celoj la vorto prizono ja tute ne konformas. Due, vi ĉiuj nepre konsentos, ke neniel devus surprizi vin la ekzisto de prizonoj ĉi tie, en la transtombaj regionoj. Vi estis tre kleraj homoj, erudiciaj pensuloj, kun potenca dialektiko... kaj tia nescio rimarkindas ĝuste pro via klereco!

Post kiam ni ekkomprenas la ĝeneralan agadon de la malsuperaj elkarniĝintaj Spiritoj, ni ĉi tie ofte pensas pri tio, kio okazus al la surtera homaro, se ne ekzistus krimobridaj procedoj

en la spiritaj socioj, ĉar eĉ malgraŭ ilia ekzisto, mallumaj hordoj da transmondaj banditoj ĉiumomente atakas la nesingardajn homojn cedantajn al ties influo, kaj tiel kunefikas por iliaj faloj kaj por la malordo inter la popoloj!

Sur la Tero estas homoj ja konantaj tiun realaĵon, kiun vi ĉi tie ĵus eltrovis kaj kiu ŝajne vin tiom ĉagrenas. Jesuo plurfoje aludis tiun gravan fakton kaj eĉ antaŭvidis la eblecon, ke la kulpulon oni ligu mane kaj piede. La religioj insiste predikas tiun severan instruon, kaj kvankam ili ĝin neperfekte faras, ili tamen ne misprezentas la realaĵon! De alia flanko, la Tria Revelacio, kiu, sur la Tero, jam de kelke da jaroj prezentas longajn raportojn pri la Nevidebla Mondo, tute malkaŝas al la kompreno de ĉia ajn inteligento impresajn detalojn pri tiu ege interesa realaĵo, kiun eĉ la plej antikvaj popoloj akceptis kaj komprenis, laŭ ties ĝusta formo, kiel kredindajn verojn! Se vi nun surpriziĝas pro la informo, ke via amiko restas malliberigita en tiu Izolejo por ribeluloj, tio estas tial, ĉar vi neniam antaŭe okupiĝis pri efektive seriozaj temoj, preferante direkti viajn eksterordinarajn intelektajn kapablojn al la neproduktivaj frivolaĵoj esence propraj al la homaj socioj, plezurantaj ĉe la mensa malpenemo, ĉe la inercio de la intelekta neagemo!...”

Mi ĝenita silentis, efektive rememorante ne malmultajn informojn pri la afero, kiujn mi, kiel homo, ekhavis per legadoj kaj studoj, sed al kiuj mi donis nur relativan atenton, ĉar blindigita de la vanta supozo, ke mi estas saĝa, prudenta kaj logika, mi rigardis la religiajn filozofiojn entute kiel suspektegindajn fontojn kreitajn de la kolektiva intereso, rezervante respektoplenan estimon nur al la Sanktaj Evangelioj, kiujn mi konsideris kiel bonegajn regularojn pri Moralo kaj Frateco starigitajn de efektive Supera Homo, kiu, kvankam modelo por la homaro, tamen estis tro mistika por esti imitata de homoj konstante bategataj de frakasaj obstakloj, des pli ke por mia malsaneca kompreno, venenita de tiu vantema senscieco, kiu ekster siaj orgojlo-mucidaj limoj vidas nenion alian ol mallumon, li mem falis ĉe la

praktikado de siaj oraj reguloj, ĉar li lasis sin venki sur malhonora kruco, dum la homaro daŭre glitadis en sinsekvajn, nesondeblajn abismojn.

Sed de Canalejas daŭrigis, logante nin per sia parolo:

"– Cetere, kial ĉi flanke de la vivo ne ekzistus prizonoj kaj rigoroj, se ĉi tie troviĝas pli multe da krimuloj ol tie sur la Tero?!... ĉar la homoj ja faras grandajn krimojn, kontraŭ kiuj ne ekzistas puno en la homaj kodoj, sed kiuj multe pezas ĉe la nekorupteblaj regularoj de la Transtomba Justico! Krom tio, kiom da krimoj ne ricevas korektadon sur la Tero, malgraŭ la ekzisto de koncernaj punoj en la surteraj punkodoj mem?! Aŭ ĉu vi pensas, ke la homo povas vivi spitante la Justecon, laŭ la kaprico de siaj propraj malbonaĵoj?!... Ĉu vi kredas, ke la morto faras feliĉaj tiujn, kiuj sin fordonis al ekscesoj en la materia mondo?... Vi trompiĝas! La homo, kiu malpie vivis, en ĉiutaga spitado al la diaj leĝoj per malnoblaj agoj malutilaj al si mem, al la proksimulo kaj al la socio, en ŝoka malŝato al la lin atendanta spirita estonteco, eniros kiel malpiulo, kiel efektiva kulpulo en la mondon de la realaĵoj, kie li estos punita de la logikaj kaj neeviteblaj sekvoj de la kaŭzoj, kiujn li mem estigis! Jen la origino de tio, kion vi vidas ĉi tie aŭ en aliaj regionoj, kie svarmas la spirite malsupera elemento, kaj ankaŭ en la surtera scenejo mem, ĉar la Tero liveras al la Dia Justeco vastegajn kampojn por aplikado de la punoj necesaj al la kulpuloj: – amaso da suferoj, ardegaj nenombreblaj luktoj, celantaj estingi en la kulpaj konsciencoj la fajron de la frenezigaj rimorsoj... Kaj ĉar en tiujn mornajn regionojn de la Nevidebla Mondo eniras nur krimaj Spiritoj, kiuj, kapricemaj kaj tiranaj, volas ĉiam ankoraŭ malutili al la proksimulo kaj al si mem, tial necese trudiĝas la rigoraj procedoj, same kiel okazas en la surtera socio al tiuj, kiuj malobeas la homajn leĝojn, ĉar bone estas al vi ekscii, ke la surteraj organizoj estas nenio alia, ol neperfektaj refiguraĵoj de la modelaj institucioj de la Spirita Mondo!"

Glitante, la veturilo jam alproksimiĝis al la celo de nia vojaĝo. Ĉirkaŭ ni ekregis silento, kaj ni fariĝis enpensaj pro tio, kion ni ĵus aŭdis. Tiel simpla, tiel reala montriĝis tiu astrala mondo, ke ĝia realeco mem, ĝia impresa simpleco kunagis por tiu konfuzo, ke ni rigardas nin homoj, estante ja Spiritoj!

.......................................................................................................................

La Gardostara Turo montriĝis kvazaŭ inkrustita en la grizaj nebultavoloj, rememorigante antikvajn fortikaĵojn de Eŭropo. Imprese majesta, ĝi trudis respekton, se ne timegon, al vojiranto en la Nevidebla Mondo, kiu ne konus ĝian celon.

Akompanate de niaj gvidantoj, ni ricevis la rajton libere transpasi ĝiajn portikojn. Aflikta emocio verŝis angorajn vibrojn en nian eston, senkuraĝigitan de la rememoroj pri la elportitaj ĉagrenoj, ĉar estis al ni, kvazaŭ tiu peza kaj morna medio revekus en nia animo la dramojn travivitajn en la ombroj de la Sinistra Valo.

La Turo, kiel ni scias, estis fako de la Departemento de Viglado, kaj kvankam ĝia direkcio ĝuis memstarecon, ĝi tamen nepre devis funkcii en harmonio kun la ĝenerala direkcio de la Departemento, en perfekta akordo de ideoj kaj frata solidareco. Ĝi estus la plej grava posteno en la tuta Kolonio, se tie povus ja ekzisti iu malpli grava inter ili, ĉar ĝi situis en danĝera regiono de la malsupera astrala mondo, ĝin ĉirkaŭis nocaj perturbaj elementoj, kiujn ĝi devis kontraŭbatali, forpeli, por tiel neebligi la sieĝon de atakemaj Spiritoj, krom ankaŭ konduki al aliaj regionoj tiujn malfeliĉulojn, kiuj, persekutate de obsedantaj Spiritoj, volis je ajna kosto ricevi ŝirmon en la Kolonio, kio ja estus neebla, ĉar temis pri ejo speciale destinita por loĝado de sinmortigintoj.

Pri la interna administracio respondecis iama katolika pastro, portugalo, kiu antaŭ longe ankaŭ estis inicito ĉe Hinduismaj Temploj. Sub lia orientado, servadis aliaj kundisĉiploj, kiuj, kvankam ne incitoj, tamen obeeme sin

fordonis al la plej penigaj laboroj en malsuperaj regionoj. Tiajn servojn ili mem volonte elektis kiel elpagon pro la ekscesoj, kiujn ili, ricevinte sur la Tero la honoran komision esti paŝtistoj de animoj, faris kontraŭ la interesoj de la Evangelio de la Krucumito, de ili makulita per mensogado, hipokritaĵoj kaj falsaj, trompaj interpretadoj! Sed la funkcioj de direktado estis nur internaj kaj limiĝis al ia inspektado (asistado de Superulo); la defendaj procedoj koncernis la centran sidejon de la Departemento.

Ricevite de afablaj asistantoj, ni estis tuj kondukitaj al la ĉambro de la direkcio kaj prezentitaj de la bonaj amikoj Canalejas, kiuj siavice transdonis la rajtigleteron subskribitan de Teokrito, petantan pri la vizito, kiu tiom konvenis al la grupoj komencantaj sian lernadon.

Post la afabla akcepto, oni bonvenigis nin en la nomo de la Majstro inter la Majstroj kaj de la Gardistino de la Legio, kaj la direktoro esprimis bondezirojn por nia kompleta resaniĝo kaj konsekvenca progreso. Ravite, ni rimarkis, ke nenia supraĵeco aŭ afektado estas en la manieroj de tiuj, kiuj nin alparolas. Kontraŭe, la simpleco, la ĉarmaj esprimoj de vera kunsento elradiis nedifineblan altiron, nin kaptante per dolĉa logo!

Post kiam niaj gvidantoj kaj la direktoro, Pastro Anselmo el Sankta Maria, interkonsentis pri la vizitprogramo, oni ne perdis tempon ĉe senutilaj konversacioj, ĉar la nobla direktanto tuj elpaŝis kun gravaj klarigoj, dum ni iris direkte al la supraj etaĝoj. Mi ne detenos min de la agrabla devo fini ĉi tiun ĉapitron per la informoj ricevitaj dum la kurioza vizito.

"– Mi komence klarigos al vi, miaj karaj amikoj – parolis Pastro Anselmo dum nia supreniro –, ke la Gardostara Turo nuntempe akumulas taskojn pro la fakto, ke nia Instituto ankoraŭ ne estas definitive instalita. Mankas specialigitaj laborantoj, kaj ĉiuj niaj Departementoj superŝarĝite sin okupas pri multoblaj laboroj. Ni, ekzemple, apartenantaj al la Turo, pritraktas, kiel vi vidos, okazojn tiel variajn kiel dornajn, eĉ nekonformajn al nia ekskluziva specialeco."

Jen ni atingis la plej altan etaĝon, ĉar nia esplorvizito sekvos laŭ inversa direkto, tio estas, de la supra al la malsupraj etaĝoj.

Droninta en duonombro, kvazaŭ la kvintesencoj, el kiuj ĝi konsistis, fontus el la plej pezaj specoj tie ekzistantaj, aperis antaŭ ni ronda, vastega salono, ĉirkaŭita de komfortaj remburitaj benkoj. Larĝaj, vitritaj pordoj sin sekvis laŭ ĝia tuta limrondo kaj ebligis, ke oni vidu ĉion okazantan en la interno de ĉiu ĉambro. Invitite de la afabla ĉiĉerono, ni alproksimiĝis al la pordoj kaj, kiel nur eble, esplorrigardis en la internon, sed ne estis al ni permesita la eniro. Ni tamen aŭdis nenian sonon: – la vitraĵoj konsistus el izolaj, tute bruimunaj substancoj!

En la unua kabineto troviĝis stranga aparataro, kiu ŝajnis esti potencaj teleskopoj, maŝinoj perfektigitaj ĝis ideala efikeco, por sondado je grandaj distancoj per iaspecaj "x-radioj", kapablaj esplori la abismojn de la senfina Spacego, krom ankaŭ la Nevidebla Mondo kaj la Tero. Sed estis aliaj, defiantaj nian komprenon de novicoj en la spirita mondo.

En la dua kabineto, ekranoj lumaj kaj kolosaj, ĉe kiuj la ekranoj en la Hospitalaj malsanulejoj ŝajnis graciaj miniaturoj, vidigis, ke ankaŭ tie necesas reprodukti faktojn kaj scenojn okazintajn je nemezureblaj distancoj, ilin bildigi al la tiucele rajtigitaj teknikistoj kaj observantoj por iliaj skrupulaj ekzameno kaj studo.

Tiaj aparatoj, kies perfektecon la homo ankoraŭ ne konceptas, malgraŭ ke li jam iras survoje al ilia eltrovo, ebligis al la manipulanto ekkoni eĉ la minimumajn detalojn pri ia ajn afero, inkluzive, se necese, la disvolviĝon de infuzorioj en la abisma sino de l' oceano, kiel ankaŭ, laŭbezone, la sinsekvajn paŝojn de unu homa ekzistado, aŭ la agojn de iu Spirito aktivanta en la Nevidebla Mondo, en la malsuperaj tavoloj aŭ dum penigaj komisioj kaj ekskursoj rilataj al la helpservoj. Sed la regularoj, tie rigore observataj, preskribis ilian utiligon nur en vere necesaj okazoj.

Sed ankaŭ estis tria kabineto, el ĉiuj la plej granda, ĉar ĝi okupis tutan etaĝon de la majesta turo. Ĝi ŝajnis prefere ia, por tiel diri, mekanika oficejo kies laboristoj estus eminentaj scienculoj. Ĉi tiu loko estis destinita por la magneta maŝinaro ebliganta la utiligon kaj funkciadon de ĉiuj mirindaj aparatoj ekzistantaj en la Kolonio, inkluzive de la noktolumiga sistemo. Ĝi ja similis iaspecan elektran centralon distribuantan diversajn fluidecaĵojn taŭgajn por la bona funkciado de la menciita aparato. Kaj en ĉiuj fakoj regis seninterrompa aktiveco, senĉesa, peniga, eble lacekonsuma laborado. Multaj sinjorinoj apartenis al la skipo da funkciuloj, kiujn en tiu loko ni vidis plenumantaj noblajn servojn. Ili ŝajnis flugilhavaj estuloj, en silenta iro-reiro, seriozaj kaj atentaj, envolvitaj en belaj blankaj vestoj, tiel blankaj, ke ili ŝajnis lumaj. Tiu apartaĵo vekis nian atenton kaj igis nin supozi, laŭ nia senscieco, ke temas pri uniformoj por interna uzo. Sed tio vere elmontris nenion alian ol la bonstatan vibronivelon de iliaj mensoj, kiujn ili penadis malaltigi en loko neakordigebla kun ties efektiva ekspansiopovo!

"– En ĉi tiu fortikaĵo – daŭrigis Anselmo el Sankta Maria –, al kiu apartenas ne nur la Gardostara Turo sed ankaŭ ĉiuj ceteraj, kazerne loĝas la reĝimento da milicianoj kaj specialigitaj lancistoj, kiuj ĝin gardas kaj defendas kontraŭ eblaj atakoj, venontaj de ekstere. Multaj el tiuj reĝimentoj estas disĉiploj de la populara Kristana Inicado, kiuj faras siajn unuajn paŝojn sur la vojo de la noblaj laboroj direkte al sia elaĉeto! Kelkaj ankaŭ estis memmortigintoj, kiuj nun provas ĉe ni la riparadon de malnovaj kulpoj. Sed aliaj eliris el la plej nigra maliceco, ĉar krom sinmortigintoj ili estis danĝeraj obsedantoj, kaj pro tio facile takseblas iliaj kulpoj, la krimoj faritaj ĉe tiel bedaŭrinda konduto! Ĉiujn tamen traktas kun sindona amo kaj kristana karitato la direkcio de la Kolonio, kiun koncernas la laboroj kunhelpantaj por ilia reedukado. Ĉi tiujn lastajn, nome la iamajn obsedantojn, eĉ celas specialaj rekomendoj, venintaj de la plej altaj Sferoj, ĉar la Respekteginda Gardistino de la Legio deziras vidi ilin kiel

eble plej frue apartenantaj al la armeo de tiuj veraj konvertiĝintoj al la Doktrino de Ŝia Amata Filo, al la Legio de la sindonaj laborantoj por la Nobla afero de la Majstro inter la Majstroj! Tial, krom la laboroj, kiujn ili plenumas ankaŭ en la kadro de la ilin koncernanta instruado, ĉiuj studas, lernas de siaj instruantoj nemalhaveblajn nociojn pri Amo, Justeco, Devo, la vera Bono, prepariĝas por praktiki la Moralon de la Kristo de Dio, la ŝuldatan respekton al la Ĉiopova, ĝis ili denove reenkarniĝos por la decidaj elprovoj. Multaj tamen jam venke transpasis la unuajn etapojn de tiuj nepre necesaj atestoj, tio estas, jam revenis de la teruraj kulpelpagaj reenkarniĝoj kaj ĉi tie daŭre ricevas instruadon por estontaj progresoj! Mi ne povos ne mencii la batalionojn da hindaj lancistoj, ankaŭ ĉi tie enkazernigitajn, kiuj volonte kaj abnegacie pretas servi kiel modelo por tiuj ĵus pentintaj, ilin kontrolante, kun ni kunlaborante por ilia regenerado, kaj dume ankaŭ farante aliajn netakseblajn servojn al la direkcio de nia Instituto. Tiuj hindoj, malnovaj apartaj disĉiploj de la ĉi tie loĝantaj inicitoj, el kiuj kelkaj jam bone progresis sur la vojo al la lumo de Vero, estas, kiel facile videblas, la vera subtenilo de la ordo kaj disciplino garantiantaj la pacon inter ĉiuj ceteraj.

Nia viglado nepre devas esti senlaca, severa, skrupula pro la tumulta karaktero de la regiono kie situas nia kolonio, kiu, proksima al la Tero, de ĉi tiu ricevas perturbajn influojn; ne nur de la Tero sed ankaŭ de la hororaj krutaĵoj, ĉe kiuj situas tiu valo, en kiu ni kolektas niajn estontajn gastojn; de la malsuperaj regionoj kie svarmas la malicaj estuloj venantaj el la surteraj socioj; kaj de la irejoj, sur kiuj vagas hordoj hardiĝintaj en la malbono, kies sola okupo estas delogado por eniri en siajn vicojn nesingardajn kaj nespertajn Spiritojn kiel vi. Krom ĉio ĉi ni menciu la nevideblajn, ruinigajn ondojn da fluidaĵoj kaj mensaj emanaĵoj, kiuj, suprenvenante de la Tero, kunflue dikigas tiujn venantajn de la malsupera nevidebla mondo kaj kiujn ni kontraŭbatalas kvazaŭ tio estus mikroboj de pesta epidemio.

Per ĉi tiuj aparatoj ni do estas konstante informitaj pri la faktoj okazantaj en la Valo de la Sinmortigintoj. Dank' al ili ni ĉeestas ĉion tie fariĝantan, ĉion ni ekscias kaj aŭdas. Ni povus utiligi la klarvidadon, la transvidadon, krom aliaj animaj kapabloj, kiujn ankaŭ posedas niaj teknikistoj, por ke ni informiĝu pri ĉio necesa, ĉar eĉ en la Turo ni havas funkciulojn kapablajn por tiel gravaj kiel delikata servo, kiel tiuj diligentaj fratinoj, kiujn ni tie vidis skrupule plenumantaj sian devon. Sed ni ĝenerale preferas la aparatojn, por eviti nenecesan troŝarĝon de tiel delikataj animkapabloj en medio mikskonsista kiel ĉi tiu, saturita de pezaj influoj, kiuj postulus de niaj fratinoj grandan elspezon de altvaloraj energioj, superegajn penojn, dum la disponebla aparataro plenumas la saman servon sen postuli treajn mensostreĉojn.

Kiel ajn malfeliĉaj estas do la malliberuloj en la Valo, aŭ la devojiĝintoj plezurantaj ĉe malbono, kies agado troviĝas en la limoj de niaj aktivecoj, ili tamen neniam restos senprotektaj, ĉar la servantoj de Maria ilin gardas pere de tiuj mirindaj aparatoj por vidado kaj komunikado kaj ilin helpas en la oportuna momento, tio estas, kiam ili mem plenumos la kondiĉojn por ricevi helpon kaj esti transportataj en alian lokon. Sed... ia fatala sekvo el la memmortigo leviĝas kontraŭ ties turmentataj viktimoj, neebligante al la Karitato de la servantoj de Frateco ilin helpi kun la dezirata rapideco: ili nome ne estas komplete liberaj je la ligiloj ilin katenantaj al la karna envolvaĵo, alivorte ili restas duonenkarniĝintaj aŭ, se vi volas, duonelkarniĝintaj!

La vivigaj potencoj, kiujn la Dia Naturo ĝenerale enmetis en ĉiujn genrojn de la Kreitaĵaro kaj, aparte, en la homan estaĵon, agas sur la sinmortiginton per la tuta forto de sia mirinda kaj subtila aktiveco, pro la duonmateria naturo de tiu astrala korpo, kiun li, krom la materia envolvaĵo, posedas. Li tial ankoraŭ tre longe vivos animalan vivon eĉ malgraŭ, en pluraj okazoj, la malkomponiĝo de la karna korpo! Pulsados en li, kun impresa potenco, la vivegaj altiroj de lia homa naturo, ĝis la vivofortoj,

liveritaj por la tuta, antaŭe konsentita daŭro de la ekzistado, estingiĝos, atinginte la tempon, kiun la Leĝo difinis por lia elkarniĝo. Restos do la sinmortiginto en tiel nenormala kiel bedaŭrinda situacio, kaj ni, malgraŭ nia bonvolemo, povos fari nenion por helpi lin![1] Kaj tiel, miaj filoj, ja devas esti, kaj vi, pli bone ol iu ajn, tion scias! Tiele preskribas la leĝo, rigora, nekoruptebla, neevitebla, ĉar ja perfekta kaj saĝa, kaj nin koncernas peni ĝin kompreni kaj respekti por nin mem ne malfeliĉigi, intencante ĝin malobei!

De tio venas la malfeliĉego, trafanta la memmortigintojn kaj nia senpoveco mallongigi la daŭron de iliaj turmentoj. Kio al ili okazas estas natura efiko de kaŭzo, kiun ili mem estigis, ĉar ili ja enfalis en tian delikatan situacion, nome ke nur la tempo povas helpi ilin. Kion ni povas fari por ilia bono, tion ni provas sen ŝpari penojn, nome: – iam kaj iam, aŭ pli bone, en la ĝusta kaj oportuna okazo, aranĝi ekspediciojn da misiuloj, kiuj volonte malsupreniru en ilian inferon kaj ilin elkonduku en ĉi tiun institucion, en kiu ili ricevas ŝirmon kaj konvenan instruadon por respekti Dion, kiun ili, kiel homoj, neniam memoris; ĉiutage kunveni por preĝadi por ili, verŝante bonfarajn radiojn el niaj vibroj sur iliajn superekscititajn mensojn, penante mildigi la

[1] Altega Korfavoro ĝenerale kondukas tiajn kazojn, konsideratajn kiel la plej gravaj, al tuja reenkarniĝo, ĉe kiu la kulpulo kompletigos la tempon, kiu restis por fini la tranĉitan ekzistadon. Kvankam tre doloraj, eĉ nenormalaj, tiaj reenkarniĝoj estas preferindaj al la transtombaj turmentegoj, ĉar cetere ili ŝparas al la pacientoj grandan tempoperdon. Naskiĝos do homoj misformitaj, mutaj, surdaj, mensodebilaj, idiotaj, intelekte malfruiĝintaj, ktp. Temas nur pri okazoj de misvibrado, ĉar mankis al la perispirito sufiĉa vibropotenco por muldi la novan korpon, malgraŭ la helpo de la transmondaj tekniksitoj. Tiel ili kompletigos la tempon restantan por fini la frue tranĉitan ekzistadon, korektos tiujn vibrajn perturbojn kaj memkompreneble spertos kvietigon. Tio estas nenio alia ol iu terapio, ekstremaj rimedoj postulataj de tiu situacio. Cetere la sola por tiaj kazoj, kiam longa devas esti la interrompita vivo! Ho vi, kiuj legas ĉi tiujn paĝojn! Kiam vi surstrate renkontos iun vian fraton en tiela nenormala stato, ne hontu preĝi antaŭ li: viaj harmoniaj vibroj ankaŭ efikos kiel bonega kuracado!

ardecon de iliaj suferoj per dolĉaj inspiroj pri espero! Se ili ne sin tenus en tiela halucina stato, dronintaj en la profundegaĵoj de malespero, de la pereiga nekredo al Dio, ĉe kiu ili ĉiam plezuris, ili perceptus la invitojn al preĝado, kiujn al ili ni ĉiutage sendas dum la vesperkrepusko, kiel ankaŭ la kuraĝigajn parolojn, per kiuj ni provas ilin veki por la aŭroro de la konfido al la korfavoraj potencoj de la Plejalta Patro, ĉar ni ne povas ne konsideri, ke ni rilatas al kristanaj popoloj, kiuj pli aŭ malpli emocie rememoras la foran infanecon, kiam ĉe la kameno, sub la ŝirmo de la patrina sino, ili balbutadis la dolĉajn frazojn de la anonco de Gabrielo al la Virgulino el Nazareto, ricevonta kiel filon la elaĉetonton de la homaro... kaj ja tial premas nin la zorgo utiligi ĉiujn permesatajn rimedojn, por iel ajn sekigi la larmojn al tiaj mizeraj nekredantoj, kiuj sin ĵetis en tiel hororan abismon!

Ĉiufoje, kiam ĉe iu kondamnito estingiĝis aŭ eĉ malpliiĝis lia provizo da animala vivoforto – tute egale ĉu li sincere pentis aŭ ne –, ni komunikas al la sukurservon de la Viglado, kiu tuj iros renkonte al li por lin elkonduki sub la ŝirmon de la Legio. Tiam, laŭ tio, kia estas lia morala kondiĉo – pentinta, ribelema, ŝtonkora – tiu Departemento lin sendos al la koncernaj fakoj, kiujn vi jam konas, nome: – la Hospitalo, la Izolejo, la Frenezulejo kaj eĉ al ĉi tiuj Turoj, ĉar, kiel jam dirite, pro la fakto ke nia fako ankoraŭ ne komplete instaliĝis, ni akumulas taskojn, tenante ĉi tie provizorajn postenojn por gardo de tiuj grandaj krimuloj, kies libereco estas forprenita pro ilia tro longedaŭra restado sur la vojoj de malbonfarado – nome la memmortigintoj-obsedantoj.

Helpe de niaj aparatoj por transvidado – (klarvida-magneta-mekanika) – kiuj proksimigos al ni la faktojn kaj scenojn, kiujn ni bezonas vidi, ilin selektante disde tiom da aliaj, dank' al inteligentaj dispozicioj, per kiuj ilin funkciigas niaj teknikistoj, – same kiel potenca magneto altiras al si ŝtalsplitojn – ni lokalizas la helpoton, skizas la planon de nia itinero, kiun ni poste prezentas al la direkcio de la Viglado; ĉi tiu liveras la

rimedojn por la ekspedicio... kaj ni forprenas, kun la favoro de Dio kaj la konsento de Lia Ununaskito, unu plian ŝafinon el la ungegoj de l' malbono...

La eniro en tiujn kabinetojn estas severe malpermesata al ĉiu, kiu en ili ne laboras. Tial ni ne invitos vin al pli detala ekzameno en la aparato. La funkciularo konsistas el elitaj Spiritoj, misiuloj de Amo, teknikistoj kiuj specialiĝis pri tiaspeca servado kaj kiuj, povante plenumi laborojn en sferoj brilantaj per lumoj kaj benoj, preferas malsuprenveni en la ombroplenajn abismojn de malfeliĉego por servadi, pro amo al la Dia Majstro, al la sanktega afero de siaj mizeraj, malsuperaj fratoj – kiel veraj gardanĝeloj de la malfeliĉuloj, kiujn ili tenas sub sia protekto!

Ĉiun dekduan horon ili estas anstataŭataj de alia skipo por laŭplaĉe ripozi en la ĝardenoj de l' Templo, kiu, kiel vi scias, estas la plej alta regiono de nia humila Kolonio; aŭ sin dediĉi al aliaj okupoj ilin koncernantaj, aŭ suprenflugi al siaj veraj loĝejoj. Tie ili revigliĝas el la angoroj elportitaj en la malluma medio, kie ili laboras por la bono de la proksimulo kaj kien ili revenos la sekvantan tagon, fidelaj al la devo, kiun ili volonte prenis sur sin... ĉar necesas reliefigi, karaj amikoj, ke la servojn de helpo kaj protekto al la parioj de memmortigo subtenas nenia komisio aŭ leĝa dispozicio ĝuste pro tio, ke memmortigo ja troviĝas ekster la Leĝo! Temas do pri volontulaj taskoj, sankta florado de la sentoj de Karitato kaj Abnegacio ĉe tiuj, kiuj deziras ilin praktiki pro amo al la puraj doktrinoj de la Dia Ŝafido, de tiu Dia Modelo, kiu la Karitaton prezentis kiel la plej altan virton, ĉar la leĝo, rajtiganta ĝian plenumon, permesas, ke oni kiel eble plej multe bonfaru al tiuj, kiuj suferas!

"– Mi miras, vidante, ke personoj tiel riĉe dotitaj sin fordonas ĉe lokoj kaj al laboroj tiel malmulte agrablaj – rimarkigis Belarmino kun la acida impertinenteco de iu, kiu sur la Tero ĝuis la nobelecan vivon de kapitalisto, por kiu estas malhonoraj la penigaj laboroj, la senĉesaj klopodoj pro la devo. – Ĉu ne troviĝas en la Legio funkciuloj spirite malpli progresintaj kaj do

pli konformaj al la naturo de la medio kaj de la lacigaj taskoj en ĝi plenumataj?... Ĉi tiuj certe malpli suferus pro tio, ke malpli granda estus ilia sentemo...”

Kun afabla kaj simpatia rideto, Anselmo respondis:

“– Klare videblas, frato Belarmino, ke vi ne konscias la delikatecon kaj la profundecon de la spiritaj aferoj, kies intensecon oni ne suspektas sur la Tero! Nia skipo da malpli progresintaj funkciuloj, policistoj, asistantoj, flegistoj, gardistoj, ktp, ktp, povos elmontri, kaj ja elmontras, bonegan kapitalon da bonvolo, konstantan laborpretecon, strebon pregresi per heroaj faroj, sed ĝi ankoraŭ ne kapablas plenumi tiel gravan laboron!

Nur Spirito kun senmakuloj virtoj kaj elpruvita sperto scipovus distingi, en la meandroj de la kompleksa karaktero de kulpulo, kia la sinmortiginto, la verajn inklinojn al pento, aŭ ĉu tropezaj efikoj de la vivo-principo jam ne agas sur lian fizikan-astralan korpon, por, nur tiam, aranĝi helprimedojn, kiuj lin konduku al sekura loko. Nur teknikisto, posedanta vastajn sciojn pri la psiko, scipovus eltiri, el la profundaj memortavoloj de unu tia kulpulo, turmentegita de la sufero, liajn antaŭajn ekzistadojn, reirante kun li sur la vojoj de la pasinteco, revidante la historion de lia surtera vivo, por esplori, surbaze de tiu biografio, la kaŭzon, kiu lin faligis, kaj tiel orienti la koncernan edukprogramon aplikotan en la Instituto, ĉar ĝuste laŭ la informoj liveritaj de la teknikistoj de la Departementoj de Viglado kaj de la Hospitalo, oni enklasigos la pacientojn akceptitajn en la Kolonion kaj ilin sendos al la diversaj disponeblaj fakoj por rebonigo, kiuj funkcias eĉ en la surteraj regionoj, en la kadro de la reenkarniĝa programo. Nur abnegaciema animo, sufiĉe progresinta en la regado de si mem, povus rigardi, sen freneziĝi pro terurego, la malsuperajn regionojn, kie la degenerado kaj la doloro atingas la kulminon de la malbono, kaj kompare kun kio la Valo, kie vi restis, ŝajnus komforta loko!

Kiel ekzemplon, mi informas, ke estas animoj de memmortigintoj, kiuj ne sukcesas eniri la Valon laŭ la naturaj vojoj. Tien eniri signifas, ke la kulpulo jam ricevas ian protekton, ĉar li troviĝas sub nia zorgo kaj gardo, kvakam kaŝitaj, kaj estas enskribita en la registroj de la Kolonio, kiel kandidato al estonta enhospitaligo. Estas tamen tiu, kiuj, antaŭ ol atingi la Valon, estas kaptitaj, aŭ forlogitaj kaj devojigitaj de hordoj da obsedantoj, kelkfoje iamaj sinmortigintoj, aŭ da mistifikantoj, krimaj perversaj estuloj, feĉo de la nevidebla mondo, kiuj plezurante ĉe malbonfarado, daŭre vivas sur la Tero inter la homoj, infektante la sociojn kaj tiujn hejmojn, kiuj al ili ne kontraŭstaras per viglado ĉe bonaj pensoj kaj prudentaj agoj, malfeliĉigante nesingardajn homojn, kiuj akceptas ilian influon pro sia propra malsupereco morala kaj mensa! Sklavigite de tiela hordo, la sinmortiginto submetiĝas al torturoj, ĉe kiuj la okazaĵoj en la Valo – kiuj estas la logika sekvo de la memmortigo – ŝajnus nuraj ŝercoj.

Malhavante efektivajn spiritajn povojn, tiuj malfeliĉuloj, kiuj vivas for de la lumo de Bono kaj Amo al la proksimulo, ĝenerale kolektiĝas en sinistraj, terurvekaj lokoj de la Tero mem, akordaj kun siaj mensaj statoj, kiel la sino de mallumaj praarbaroj, forlasitaj katakomboj, solecaj kavernoj en montoj ĝenerale nekonataj de l' homoj, kaj eĉ ombraj grotoj en surmaraj rokoj aŭ krateroj de estingitaj vulkanoj.

Hipokritaj kaj mensogemaj, ili kredigas al siaj viktimoj, ke tiaj regionoj estas ilia verko, konstruitaj per la potenco de iliaj kapabloj, ĉar ili envias tiujn Koloniojn de regenerado direktatajn de lumaj estuloj. Malliberiginte tiujn animojn, ili ĉiamaniere torturas ilin, komencante per aplikado de “fizikaj” suferoj kaj pudorofendaj procedoj, ĝis la frenezigo de iliaj mensoj jam brulantaj ĉe la profundeco de iliaj propraj personaj turmentoj; fine, ili trudas al ili torturojn, kies kompreno translimas la imagivon de viaj mensoj kaj kies vidon vi ne eltenus pro tio, ke vi ankoraŭ estas tro malfortaj por teni vin imunaj kontraŭ la pezaj sugestoj, kiuj, falinte sur vin, povus vin malsanigi!

Sed... sur la specialiĝintajn laboristojn, prilumitajn de vasta progreso, nenio malbone efikas! Ili akiris imunecon, regas la terursenton, vekitan de tiaj vidaĵoj, per siaj vibraj kaj mensaj fortoj, kaj direkte al la plej ekzotaj regionoj de la globo ili turnas la lensojn de siaj magnetaj teleskopoj, de sia potenca televidilo, same kiel la prizorgemon de siaj noblaj pensoj de kristana frateco... kaj ili ekiras, serĉe de la superturmentataj animoj de tiuj malfeliĉuloj, duoble deturniĝintaj de la natura vojo de l' destino, nome pro la sinmortigo mem kaj pro la malnobla altiriĝemo, kiu ilin trenis al kuniĝo kun la plej malaltklasaj elementoj de la Nevidebla Mondo!

Kelkfoje, ili trovas tiujn animojn, post persista, peniga serĉado. Sed ne ĉiam, post la lokalizo kaj koncerna informo al la direkcio de Viglado, kiu siavice ĝin komunikas al la ĝenerala direkcio de la Instituto, ni povas ilin tuj forpreni. Iaokaze necesas skizi planon por la liberigo, starigi ian nete difinitan programon; peti helpon de aliaj falangoj, iafoje tre malsuperaj al ni laŭ kapableco kaj moralo, sed tamen konantaj la dornan, malluman terenon, sur kiu ni devas agi; fari klopodojn, sendi komisiulojn, akcepti kompromisojn, doni garantiojn kaj eĉ utiligi ruzaĵojn, teni akrajn batalojn, certe sen uzo de glavo, sed en kiuj la pacienco, la toleremo, la celado al Bono, la morala energio, la kuraĝo por labori, montrataj de la liberigantoj, kaŭzus admiron kaj respekton pro ilia heroeco! Ne malofte ili malsuprenvenas en la satanajn lokojn, kie la kaptita animo tordiĝas sub la torturoj de krueleguloj dezirantaj trudi al ĝi siajn proprajn kutimojn. Ili sin miksas en la hordon, submetiĝas al la drama neceso multfoje ŝajnigi sin sektanoj de la Mallumo!... En tiuj okazoj ĉiam suferas tiuj abnegaciaj laboristoj de Amo, verŝas amarajn larmojn, sed restas fidelaj al la sanktegaj devoj rilataj al la elaĉeta afero, al kiuj ili sin fordonis! Nenian heziton ili montras en tiu misiula komisio, per kiu ili ŝuldigis sin ĉe la Dia Modelo, kiu sin oferis por la homaro, kaj ili daŭre servadas, energiaj kaj heroaj, por la bono de siaj malpli progresintaj fratoj!

Fine, post neimageblaj luktoj, ili kokektas tiujn suferantojn, kiuj ne iris, en la ĝusta tempo, en la Valon; laŭregule transdonas ilin al la Viglado, kiu, siavice, ilin sendas al konvena loko, ĝenerale la Frenezulejo, ĉar tiuj malfeliĉuloj efektive eliras frenezaj el la retoj de obsedo, en kiujn ili lasis sin impliki... Kaj, kio estas tre grava: – ili ankaŭ forprenas la obsedantojn mem, la turmentistojn, kiuj estas nenio alia, ol aŭdacaj Spiritoj de malicaj homoj vivintaj en la mallumo de krimado, apartiĝintaj de Dio! Se ili, krom obsedantoj, ankaŭ estas sinmortigintoj, nia Kolonio povas ilin reteni. Sed tiuokaze ni loĝigas ilin ĉi tie, en la Viglado mem, en taŭga loko de ĉi tiu fortikaĵo, ĉar krom havi altiriĝemon al neniu alia regiono pli bona ol ĉi tiu, ili ankaŭ estas rigardataj kiel estuloj danĝeraj kaj nebonvenaj en fakoj, kie oni klopodas por la morala altigo de aliaj krimuloj inklinaj al bono! Ni ilin tenas sub severa gardado, kiel eble penante havigi al ili fortojn kaj rimedojn, por ke ili reedukiĝu kaj rehonorindiĝu. De ĉi tie ili ne supreniros al pli agrablaj, malpli densaj regionoj, sen unue reveni al nova karna ekzistado, por senŝarĝiĝi el siaj pli indignaj krimoj, ĉar iliaj moralaj kaj mensaj kondiĉoj, tro difektitaj, malpermesas al ili pli grandajn eblecojn. Ilia instruado limiĝos al malvasta lernado pri si mem, al elementaj konoj pri la leĝoj de frateco prezentitaj en la Evangelio de l' Sinjoro kaj al regeneraj laboroj plenumataj aŭ sur la scenejoj de la Tero, sub la gvidado de rigoraj asistantoj, aŭ ĉe nia taĉmento de milicianoj, kie tiucele specialiĝintaj mentoroj ilin orientos por la farado de nobligaj servoj, kiel reago al la multa malbono farita en la pasinteco. Servante kiel milicianoj, ili ĉasos aliajn, de ili konatajn, hordojn da obsedantoj; montros al ni maliculajn kaŝejojn, pri kies ekzisto, ĉi tie kaj aliloke, ili bone scias, tiamaniere donante valoran helpon al nia afero, kio estos al ili tre favore kreditita por la programado de la kulpelpagoj, al kiuj ili ŝuldiĝis. Sed se temas pri nur malicaj estuloj, ne sinmortigintaj, tiam al ni ne estas permesite ilin gastigi. Sed nia Helposervo ilin kondukos al la ŝirmejoj ekzistantaj, po malmulte sed ĉie, en la transiĝaj

regionoj – iaspecaj policejoj de la Nevidebla Mondo – kie ilin atendos la sorto plej konforma al ilia bedaŭrinda kondiĉo de malsuperaj Spiritoj, sorto ja responda al la leĝoj de afineco, justeco kaj frateco.”

Sekvis mallonga silento. Ni estis ravitaj, surprizitaj pro la neatenditeco de tiu elvoko, kiu vere samvaloris kiel alterudicia leciono! Anselmo el Sankta Maria dolĉe fiksis sian rigardon sur niaj vizaĝoj, absorbitaj pro la atento vekita de lia parolo, kaj mallaŭte konkludis, kvazaŭ li etendus sian penson tra la florplenaj vojoj parfumitaj de la senkompara esenco de l' Evangelio de la Grandanima Edukanto:

“– Jes, miaj filoj!... Tiele ĝi devas okazi, ĉar la Nazaretano mem asertis, ke la bona paŝtisto lasas la obeeman ŝafaron ŝirmitan en la paŝtejo, ekiras por serĉi la perditan ŝafon, kaj ripozas nur post kiam li revenigas ĝin libera je la danĝeroj, kiuj ĝin minacis!... Kaj Li aldonis, kiel pravigon kaj glorigon de niaj klopodoj por kunlabori kun Li:

“– Ne estas la voko de via Patro, kiu estas en la ĉielo, ke unu el ĉi tiuj malgranduloj pereu...”

# Ĉapitro II
## La arkivoj de la animo

“Respektu vian patron kaj vian patrinon.” (Dekalogo)
ELIRO, 20: 12

Vesperiĝis. La ombroj plidensiĝis sur la plumba horizonto de la peza regiono. Ni malsupreniris al la tuj sekvanta etaĝo kaj dumire mi riskis fari demandon:

“– Indulgu min, Respekteginda Pastra Moŝto, pro la deziro detale esplori aferon, kiu tiele plaĉas al miaj kristanaj sentoj kaj al mia intereso de lernanto: – Kiamaniere la direktoroj de ĉi tiu eminenta Institucio ekscias, ke Spiritoj, malfeliĉigitaj de la memmortigo, malaperis, kaptitaj de malamikaj falangoj?...”

“– Se ni devontigis nin antaŭ Jesuo kiel kunlaborantoj por lia elaĉeta idealo, aniĝante al ia Legio patronata de Lia respekteginda Patrino – li tuj respondis –, ni do devas teni en ĉi tiu Turo teknikistojn, kies ekskluziva rolo estas serĉi la malaperintojn helpe de la senerara efikeco de tiuj aparatoj, kiujn vi ĵus ekvidis... Al ĉiu oni destinis regionon kun difinitaj limoj por sondado... Malnovaj turmentistoj siavice, regeneriĝintaj sub nia zorgo kaj aliĝintaj al la taĉmento de milicianoj, volonte sin prezentas, tuŝitaj de pento, por indiki lokojn de ili konatajn, en la Nevidebla Mondo aŭ sur la Tero, kie estas kolektitaj la viktimoj de la obseda opreso kaj kie estas farataj la plej grandaj kruelaĵoj.

Post kontrolo de la lokalizo, tiujn lokojn oni vizitas kaj rebonigas... Sed la informoj kaj ordonoj ĝenerale venas de la Plej Altaj Regionoj... de tie, kie ŝvebas la karitata protektado de la kompatoplena Patrino de la homaro, la Guberniestrino de nia Legio... Se la koncernataj animoj ne klasiĝas kiel rektaj zorgatoj de la Gardistino, la Gvidanto de la falango, aŭ legio, al kiu ili apartenas, rajtas elpeti ŝian favoron por la devojiĝintoj, ŝian aman kunhelpon por tiu celado, ĉar frata solidareco ligas la diversajn instituciojn de la Sidera Universo, senmezure pli perfektajn ol tiuj ekzistantaj en la materiaj, surteraj regionoj... Krom tio, kiel ajn mizera kaj forgesita estus kulpulo, ĉiam troviĝos iu, kiu lin amas, pri li sincere interesiĝas, kaj kiu pro tio adresos fervorajn petegojn por li al Maria, eĉ rekte al la Dia Majstro aŭ al la Kreinto mem! Se do la sinmortiginto lasas sur la Tero neniun, kiu kompatus lian enorman malfeliĉon kaj al li sendus mildajn, karesajn esprimojn de karito per la bonfara preĝo, nepre certe estas, ke en la transtombo ekzistas iu, kiu ĝin faros: – korinklinaj ligoj de malproksima pasinteco, malnovaj amikoj kelkatempe forgesitaj pro la enkarniĝo; amataj estuloj, kiuj lin akompanis dum pasintaj migradoj sur la Tero; lia protektanto, la amoplena Gardanĝelo, kiu konas ĉiujn liajn paŝojn kiel ankaŭ liajn plej kaŝitajn pensojn; ĉiuj zorgos pri li per veraj atestoj de la frata amo, kiun ili kulturadas sub la inspiro de la amo al Dio! Se la petego estas adresita al Maria, tiam instrukcioj estas tuj sendataj al ŝiaj kurieroj, kiuj siavice ilin dissciigas al la pluraj postenoj kaj organizoj de helpo kaj ŝirmado al sinmortigintoj, tenataj de la Legio. Tiuj instrukcioj indikas al la servantoj la momenton de la agado por helpo al la nova suferanto, lian nomon, naciecon, la daton de la akcidento, la lokon kie ĝi okazis, la specon de memmortigo elektitan. Se, ekzemple, la koncernata animo troviĝas en regiono apartenanta al nia kampo de agado, tiam la serĉadon, kiel jam dirite, plenumos la servistoj de Viglado. Kie ajn li troviĝos, oni lin lokalizos, malgraŭ ĉia sinofero! Se la perversaj kaj obsedantaj hordoj, kiuj lin dekomence persekutis,

ne forturnis lin de la kondiĉoj normalaj, tiam la klopodado ordinare estas facila. Se tamen la laboro montriĝas tre dorna kaj peniga kaj pro tio necesigas la kunhelpon de aliaj rimedoj, apartenantaj al nia Legio aŭ fremdaj al ĝi, ni rajtas ilin elpeti kaj ja estas tuj kontentigitaj. Estas okazoj, kiel ni jam klarigis, kiam ni bezonas eĉ alvoki malpli progresintajn grupojn, nome peti la helpon de falangoj malsuperaj al ni laŭ moralo kaj scioj!

Se la petegon oni tamen adresos al alia eminenta Spirito, ĝi estos prezentita al Maria, kaj fariĝos la samaj disponoj, ĉar Maria estas la sublima gastigantino de la kulpeguloj sin ĵetintaj en la timegindajn abismojn de la memmortigo... Ĉio tio tamen ne signifas, ke nia Plej Alta Direktorino devas atendi petegojn kaj alvokojn de kiu ajn por fari siajn kompatemajn disponojn! Ĉi tiuj, kontraŭe, estas konstante farataj, per tenado de specialaj organizoj destinitaj al observado kaj helpo al memmortigintoj; per tenado de tiuj, kiuj, kvankam ne specialaj, tamen ilin ankaŭ akceptos en oportuna okazo, estante dissemitaj ĉie, en la Nevidebla Mondo kiel sur la Tero; kaj per la dispozicioj mem de la leĝo de amo kaj frateco, kiu al ni preskribas plenumi ĉian eblan bonon, farante al la proksimulo tion, kion ni dezirus, ke la proksimulo faru al ni, leĝo amoplene kaj rigore observata en la spirite progresintaj rondoj de la Nevidebla Mondo!

Kiel ajn tamen, la Preĝo, kiel vi vidis, eldirita kun amo kaj fervoro por la bono de sinmortiginto, estas la sanktega vehiklo portanta, en ĉiu tempo, netakseblajn konsolojn, ĉielajn favorojn al tia malfeliĉulo, ĉar ĝi estas unu el la helprimedoj, kiujn la supredirita leĝo starigis favore al la suferantoj, instrumento, kiun la leĝo disponas por agigi balzamajn vibrojn necesajn al la kuracado postulata de la bezonoj de tiu turmentita animo. Ĝuste pro tio, grave eraras la surteraj homoj, rifuzante plenumi tiun agon de solidareco, intereso kaj bonfaro pro la nejusta supozo, ke ĝia apliko restus senutila, ĉar senrimeda estus la malfeliĉa situacio de la memmortigintoj! Kontraŭe, la Preĝo efikas tiel laŭdinde kaj utile, ke tiu, kiu preĝas por iu el vi, ja volonte

kunlaboras kun la servistoj de la Legio de Maria, kunhelpante iliajn penojn kaj sinoferojn ĉe la klopodado por malplisuferigo kaj reedukado, al kiu ili sin fordonis!

Kiel vi konstatis, per tiu ĉi pala bildo, nia laboro estas ampleksa kaj intensa. Se la homoj, kiuj atencas kontraŭ tia sankta dono, la enkorpa vivo – kiun la Ĉiopova konsentas al la kulpa animo kiel benatan kaj nobligan oportunon por rehonorindiĝo – mezurus la intensecon de la suferoj kaj sinoferoj, kiujn ni alfrontas por ilia bono, ili certe sin detenus ĉe la rando de la abismo kaj pripensus la gravan respondecon, kiun ili prenos sur sin, se ne pro amo aŭ kompato al si mem, almenaŭ pro konsidero kaj respekto al ni, iliaj spiritaj gvidantoj kaj sindonaj amikoj, kiuj tiom da penigaj luktoj, tiom da ĉagrenoj eltenas, tiom da larmoj ankoraŭ mem verŝigos el niaj koroj, ĝis ni povos ilin konduki al la konsolaj regionoj protektataj de la espero!

..........................................................................................................

La afabla ĉiĉerono informis, ke en unu el tiuj ombraj fakoj ĉirkaŭantaj la centran turon, simple nomatan – la Turo – troviĝas tiaj timindaj obsedantoj, ĉefoj aŭ anoj de mallumaj, perversaj bandoj, kiuj, krom esti sinmortigintoj, ankaŭ respondecas pri abomenegaj krimoj, punindaj, laŭ la sublimaj leĝoj de la Eterna Leĝodonanto, per akregaj jarcentaj riparadoj. Ni esprimis la deziron vidi ilin, kaj ni prezentis al ni, ke temas pri nenormalaj estaĵoj, tute ne koncepteblaj por nia imagemo, eble iaj apokalipsaj monstroj, inferaj fantomoj, kiuj eĉ ne havus homan formon. Kun patreca rideto, la maljuna doktoro de Canalejas demandis al la eminenta instruanto, kiu nin gvidis, ĉu estos eble, ke ni konu iun el tiuj Spiritoj, ĉar tio nin utilos, ke ni gardu nin dum la proksima vojaĝo al la surteraj regionoj, kie svarmas multenombraj samspecaj bandoj. Pastro Anselmo afable konsentis, sed ne sen malgranda limiga kondiĉo:

"– Mi estas informita de la direkcio de via Hospitalo pri la interesoj, kiuj konvenas al la ĉi tie ĉeestantaj lernantoj. Tial

mi konsentos al vi ne vastan rigardon al la loko, kie ni loĝigas tiujn kompatindajn zorgatojn respondecajn pri tiom da krimoj, kiu loko estas ĝuste tiu frontestaranta Turo. Tie troviĝas la tiel nomataj karceroj, kie ili estas tenataj sub konstanta gardo tiel, kiel oni neniam gardus surterajn arestitojn!

Mi devas konigi al vi, ke tiaj obsedantoj jam ekiris la vojon de regenerado. La afliktaj batoj de la unuaj rimorsoj jam skuas la pezan torporon, en kiu ili tenadas siajn konsciencojn. Timuliĝante antaŭ la fantomo de l' estonteco, ili bone konscias tion, kio atendas ilin en la korprema regiono de kulpelpagoj, sub la ardegeco de la diversaj riparadoj, kiujn ili, frue aŭ malfrue, devos travivi. Timigitaj de la malhonora amplekso de siaj kulpoj, ili supozas, ke tiel longe dum ili rezistos kontraŭ la ĉiutagaj admonoj al regenerado, ili restos liberigitaj je tiuj ŝuldoj... El ĉi tie ili tamen ne sukcesos eliri por regajni la liberecon, ĝis la pento montros novan vojon al iliaj konsciencoj nigrigitaj de la blasfema pekado... eĉ se por tio ili devus resti malliberigitaj dum jarcentoj – kio estas tre malprobabla.

Ho miaj karaj amikoj, farantaj la unuajn paŝojn sur la savantaj vojoj de tiu Dia Scienco, kiu elaĉetas kaj nobligas la karakteron de la kreito, ĉu homo, ĉu Spirito! Ho vi, kies vizito en mia humila posteno de laboristo en la kultivejo de la Sinjoro min tiom honoras kaj feliĉigas! Kunlaboru kun mi kaj kun miaj helpantoj en ĉi tiu fako de la Departemento de Viglado! Kunlaboru kun la direkcio de ĉi tiu Instituto, sur kies respondeco pezas tiom da destinoj de kreitoj devantaj marŝi al Dio! Kunlaboru kun la Legio de la Servantoj de Maria kaj kun la afero de la Elaĉeto, iniciatita de la Dia Majstro, fervore preĝante por tiuj perditaj ŝafoj, kiuj obstine preteratentas la dolĉan alvokon de sia Milda Paŝtisto! Estu do la unua ago, per kiu vi ekiros la longan vojon de la farendaj riparoj – la sublima karitata servo, elspironta siajn senmortajn aromojn el bonfaroj en la amoplena sino de la Kristo de Dio – la Preĝo por la revirtiĝo de tiuj malfeliĉaj leĝorompintoj, kiuj sin ĵetegis, temeraraj kaj frenezaj,

en la plej malluman kaj tragikan abismon, en kiu povas droni kreito havanta prudenton kaj libervolon! Preĝu! Kaj al vi mi certigas – kredu tion! – ke vi tiamaniere bele komencos tiun agadprogramon, kiun vi devas plenumi por firmigo de via progreso!

Sed ĉi tie – li plu parolis, post paŭzo, kiun per nenia maldiskretaĵo ni aŭdacis profani – ilin helpas sindonaj prizorgantoj. Prenante en kalkulon la fatalan sensciencon, kiun ili montris, inklinante al malbonfarado, ja la solan malpligravigan cirkonstancon, kiu al ili meritigas helpon kaj protekton, la korfavoro eksplicita en la nin reganta leĝo preskribas, ke al ili ni havigu instruadon kaj klarigojn, efikajn rimedojn por ke ili rekapabliĝu denove eniri la normalajn vojojn de evoluo kaj progreso, rimedojn per kiuj ili disbatu la mallumon, kiun ili mem amasigis ĉirkaŭ si. Tiucele, ilin retenante, senigante je la libereco, kiun ili ege misuzis, ni al ili donas konvenajn konsilantojn kaj instruantojn, nome tiajn longe spertiĝintajn pri la katekizado de sovaĝuloj kaj indiĝenoj de barbaraj surteraj regionoj en Afriko, Hindoĉinujo, Amerikoj kaj la malproksima, preskaŭ neloĝata Patagonujo...

Venu... kaj vi vidos pere de televidaj aparatoj tion, kio okazas en la frontestaranta Turo...

Li aliris al vasta salono, verŝajne direktora kabineto por ĝenerala kontrolado. Sobraspekta meblaro, studilaroj kaj abunda aparataro por transsendo de parolo kaj bildoj cele al rapida interkomunikiĝo kun la tuta Kolonio: jen ĉio, en kio konsistis la aranĝo de tiu soleca ĉambro. Li sidigis nin kaj starante, en la karaktero de majstro, kiu tiam li ja estis, daŭre elvolvis siajn ĉarmajn klarigojn:

"– Jen en kio konsistas la "karceroj" en ĉi tiu ombra loko de la Instituto Maria el Nazareto..."

Proksimiĝinte al la televidigaj aparatoj, li ilin lerte funkciigis... kaj jen ni mirakle troviĝis en longa galerio, kies arkadoj, memorigante malnovajn klostrojn, esprimis la klasikajn, al ni tiel karan, portugalan stilon.

Mi ne scias, ĉu la fluidecmagnetaj ondoj, servantaj kiel vehiklo de tiuj aparatoj, havis la povon penetri la fibrojn de nia fizika-astrala organismo, agordiĝante al nia propra animradiado; mi ne scias, ĉu ili, elradiante la efikojn de siaj nekonataj proprecoj tra la ĉambro antaŭenigis niajn mensojn al la alta fenomeno de la maldorma sugestio, aŭ ĉu tio estis la potenca efiko de la mensa forto de tiuj majstroj pri psika magnetismo, kiuj nin akompanis ĉiam, kiam oni kondukis nin por spekti la televidajn elsendojn. Sed certe ja estis, ke en tiuj momentoj ni havis la impreson, ke ni efektive iradas tra tiu galerio tute envolvita en peza duonlumo, kio al niaj nespertaj Spiritoj transigis korpremajn sentojn de angoro kaj timo.

Lokitaj en ambaŭ flankoj de la galerio, tiuj "karceraĉoj" montriĝis al niaj okuloj kiel malgrandaj ĉambroj pri studado kaj loĝado, nome kiel lernoĉambro, manĝoĉambro kaj dormoĉambro, tiel havigante sufiĉan komforton por ne ŝoki la malliberulon per la humiligo de nekontentigebla bezono, kio lin inklinigus al malkonfido kaj ribelemo. Ili ja similis malgrandajn apartamentojn de modela internulejo, kie la lernantoj loĝus unuope, ĉar tiuj ĉambroj destiniĝis al gastigo de po unu sola malliberulo!

Mi ne povis deteni min kuraĝe vortigi miajn impresojn, kaj min turnis al Pastro Anselmo:

"– Kiel do?!... Ĉi tie mi vidas edukejon, ne malliberejon!... Ĉirkaŭitaj de larĝaj fenestroj kaj belaj, impresivaj balkonoj, tra kiuj penetras sanigaj aerfluoj, tiuj ĉambroj, sen kradoj kaj gardistoj, prefere invitas al enpensiĝo, al meditado kaj al utila studado, dank' al la nerompebla, ĉirkaŭreganta silento... Ho, mi ĉi tie klare vidas la bonfaran influon de saĝaj misiulaj edukistoj, spertaj pri direktado de edukejoj, ne provosoj, kiuj sin trudus per forto!..."

"– Jes – ridetante respondis la nobla estro de la Turo –, ni obeas la dispoziciojn de la leĝoj de Amo kaj Frateco, laŭ la esence edukaj normoj de la Plej Alta Majstro. Efektive, ne

koncernas nin puni iun ajn, kiom ajn krima li estus, ĉar eĉ la Majstro ne tiel agis! Nia devo estas instrui kaj eduki, revigligante la kuraĝon, la ŝanceliĝantan karakteron per edifaj klarigoj, cele al regeneriĝo per praktikado de Bono!... ĉar la punon, la turmenton, la krimulo portas en si mem ĉe la infero, en kiun aliformiĝis lia konscienco senĉese flamigata de miloj da malsanaj afliktoj... kio ne necesigas lin turmenti per kromaj punoj kaj repagoj! Li mem sin juĝos kaj al si mem aplikos la meritítajn punojn... Ĉu vi volas konkretan ekzemplon, el tiuj plej impresaj?... Rigardu...”

Li alproksimiĝis al unu el tiuj aparatoj ornamantaj la salonon, lerte funkciigis alian luman prembutonon, kaj dum sur la magneta ekrano bildiĝis vira figuro en la viglo de siaj kvardek jaroj, per ĉio simila al ni mem, li ĝentile daŭrigis siajn klarigojn:

“– Jen unu el la timindaj obsedantoj, estro de malgrandnombra bando da ŝtonkoraj kaj malicaj estuloj, portanta multoblajn malvirtojn kaj moralajn degeneraĵojn, krimulo kaj memmortiginto, kiu trenis en sian abismon de malnobleco kaj mizero tiujn senprudentulojn – elkarniĝintajn kaj enkarniĝintajn – kiujn li sukcesis delogi kaj entiri en sian vojon, kaj kies krimoj havas tielan gravecon antaŭ la dia leĝaro, ke nin ne mirigus la senatenda alveno de decidoj el la Altaj Sferoj ordonantaj lian alkondukon al la koncernaj kanaloj por kulpelpaga reenkarniĝo ekster la surtera Globo, en planedo pli malsupera ol la nia, aŭ por restado en ties spiritaj ĉirkaŭaĵoj, kie li povus, dum relative mallonga tempo, elpagi ŝuldon, kies likvido sur la Tero postulus multajn jarcentojn! Sed tia programo ja estus tro severa rimedo, ege abomena por la karitato kaj por la neimagebla amo de nia Milda Paŝtisto, kiu preferos unue elĉerpi ĉiujn logikajn kaj laŭleĝajn rimedojn por persvadi kiel al pento, tiel ankaŭ al regeneriĝo, tiucele uzante la grandan amemon kaj kompaton, kiujn nur Li scipovas apliki!

Maria propetis sian Dian Filon pro tiu ĉi malfeliĉulo, kaj al ni ŝi rekomendis maksimuman paciencon, la plej fekundan karitaton kaj amon, kiujn ni kapablos esprimi, por apliko al lia bedaŭrinda situacio! Tial, kvankam malliberigita, kiel vi vidas, li senĉese ricevas ĉian helpon, moralan, spiritan kaj eĉ "fizikan", se mi tiel povas min esprimi, kiun lia kruda, animala naturo postulas. La kristanan moralon, kiun li tute ne konas, oni al li ĉiutage prezentas, kiel nutraĵon nepre necesan pro lia tiurilate konsterna mizero... Li ĝin ricevas pere de la instruoj de la sankta Evangelio, dum kolektivaj lecionoj, enscenige ludataj, kiajn vi ĉeestis en tiuj surteraj seancoj, kiuj ja estas nenio alia, ol malgrandaj postenoj por helpo al la servoj plenumataj en la Nevidebla Mondo; kaj, kiel la ceteraj lernantoj-arestitoj, li estas helpata ĉe la ekzameno de la plej altaj instruoj de la Elaĉetinto kaj ĉe ilia komparo kun liaj propraj agoj... nome tiu Elaĉetinto, kiu, fidela al Sia misio kiel Majstro kaj Savanto, al li etendis sian kompateman manon, por levi lin el la peko!

Sed niaj metodoj utiligas alispecan instruadon, energian, preskaŭ perfortan, kiun nur la inicitoj povos apliki pro la delikateco de tia procedo, postulanta specialan teknikon... Tial ĝi estas ĉiam komisiata al unu el la plej popularaj specialistoj de nia Kolonio – ia teknikisto – tiu Olivier de Guzman, kiun vi konas kiel la direktoron de la Departemento de Viglado. Tiel li akumulas plej delikatajn taskojn, ne nur pro tio, ke ĝi estas lia devo, ĉar la bona laboristo neniam restos senaga en la Kultivejo de la Sinjoro, sed ankaŭ pro la de mi jam parolita manko de laboristoj. Rigardu, kio okazas en la apartamento de tiu krimulo-lernanto kaj juĝu vi mem..."

Efektive, sidanta ĉe la studotablo, kun la vizaĝo inter la manoj, en teniĝo de senkuraĝeco aŭ profunda maltrankvilo; kun distaŭzitaj haroj, densaj kaj ondaj; mieno turmentata de tumultaj pensoj radiantaj ĉirkaŭ la kapo per pezaj emanaĵoj similaj al plumbogrizaj nuboj, jen tie estis antaŭ ni la malliberulo, kvazaŭ li troviĝus en tiu sama salono kiel ni! Sed surprizite ni

en tiu obsedanto rekonis nur homon, simple kaj nur homon – aŭ Spiriton, kiu estis homo! – tute ne ian fabelan estulon! Spirito disiĝinta de la karno, jes, sed portanta la homan formon, krudan kaj pezan, kiel signon de la morala malsupereco, kiu lin tenis malproksima de la spiriteco! Li estis vestita tiel same, kiel en la momento, kiam li pereis, en sia karna envolvaĵo, sub la memmortiga bato: – pantalono el fajna nigralana ŝtofo, montranta, ke sur la Tero li estis altsocieta persono, kaj ĉemizo el blanka silko kun manumoj kaj antaŭo el Flandra punto. Juĝante laŭ la vestaĵoj, ni kredis, ke lia restado en la ombroj de transmonda malbonfarado estas ne malproksima de centjara daŭro, kio estigis en la profundoj de niaj animoj doloran vibradon el kompatemo. Ĉe la koro, malgraŭ la longa tempo pasinta, tragika stigmato perfidis lin kiel anon de la sinistra falango da kulpuloj, al kiu ankaŭ ni apartenis: la sango, viva kaj freŝa, kvazaŭ ĝi estus ĵus ekŝprucinta, elverŝiĝis de larĝa truo, kiun certe malfermis rapiro aŭ ponardo, kruele makulante la fizikan-astralan organismon; malgraŭ la tempo pasinta, ĝi konstante, seninterrompe elverŝiĝadis, kiel se ĝi estus pli ĝuste impreso el la okazintaĵo efikanta sur la halucinitan, malluman menson de tiu mizerulo!

Sed jen eniris la lin gvidanta majstro, kiu kompateme vizitadis la ĉambrojn, unu post alia, lumigante en la krudaj koroj de tiuj mizeraj krimuloj la stelajn lampojn de la Sciado, per kiuj ili sin turnu al pli utilaj vojoj!

La malnova obsedanto ekstaris respektoplene, farante riverencon propran al nobelo. Olivier de Guzman – tiu estis lia majstro – lin afable salutis:

"– La paco de la Sinjoro estu al vi, Agenor Peñalva!"

La kulpulo ne respondis kaj restis kun nekontenta vizaĝo. Ĉe signo de la majstro, li denove sidiĝis ĉe la tablo, dum la nobla gvidanto restis staranta.

Gravmiena, kun afabla teniĝo kaj patra parolo, Olivier de Guzman, kiu, same kiel la ceteraj superaj inicitoj, portis la veston

de la bela kaj diligenta legio, al kiu li apartenis, ekelvolvis al sia disĉiplo la lecionon de tiu tago, devigante, ke li skribu ĝin en kajeroj, por ke, ĝin analizante kaj primeditante, li ĝin zorge stampu en sia menso. En la sekvanta tago, la disĉiplo devos prezenti detalan raporton pri siaj konkludoj rilataj al la studita temo. Tiu leciono, kiun ni ĉeestis, konsistis el grava tezo pri individuaj rajtoj, tiel en la surteraj kiel en la astralaj socioj, ĉe la lumo de la Grandanima Leĝo de la Kreinto; pri la rajtoj de reciproka respekto, de solidareco kaj frateco, kiujn la homaro ŝuldas al si mem en la harmonia ĉeno de la unuopaj agoj de homo kontraŭ si mem kaj kontraŭ siaj similuloj. La lernanto devos ekzameni tiun delikatan tezon, konsiderante sian konduton dum la lasta surtera ekzistado kaj dum sia ĝisnuna restado en la Nevidebla Mondo, kaj ankaŭ ĝin submetante al la reguloj de la leĝoj regantaj la astralan mondon kaj al tiuj de la kristana moralo, kiuj estas nepre necesaj al la progreso kaj bona stato de ĉiuj homoj, kaj pri kiuj li jam de kelka tempo ricevadas klarigojn. La lernanto havis la rajton kontraŭargumenti, demandi pri eventualaj duboj kaj eĉ konfesi... sed rimarkinda estis la ampleksa kvanto da profundaj klarigoj de la majstro ĉe ĉiu malkonsento de la obstina disĉiplo[1]! Kaj tian penadon, ekskluzive koncernantan la konsciencon, ĉiu malliberulo povus provi sendepende de sia klereco!

Perpleksaj ĉe la intenseco kaj amplekso de la servoj en la Turo, ni demandis la paciencan instruanton:

"– En la okazo, se tiu kompatinda Spirito konvinkiĝos pri la neceso de Bono, kien oni sendos lin?... Kio fariĝos el li?... Kaj kial, malgraŭ lia evidenta malbonvolo, oni al li donas majstron de tia rango, tiajn profundegajn lecionojn, kiajn ni ĉi

---

[1] Ĝi estis kvazaŭa "moralinstrua leciono" de la Gvidanto, kiajn ni kutime ĉeestas dum la bone direktataj spiritismaj seancoj, sed certe ampleksigita de la cirkonstancoj kaj de la klereco de l' instruanto.

tie ĉeestas, dum ni, inklinantaj bonvole trairi la estontecon gvidate de viaj konsiloj, apenaŭ duonvidas tiujn al ni tiel karajn inicitojn kaj ne ricevas eĉ ian tekston, kie ni lernu la leĝojn, kiuj de nun nin inspiros, des malpli skribilojn?!...”

Tuja kaj konkludiga estis la respondo:

“– Unue – klarigis Pastro Anselmo – ne forgesu, ke vi estas malsanuloj ĵus ricevintaj forpermeson de la Hospitalo kaj, krome, ke, enirinte antaŭ nur tri jaroj en ĉi tiun ŝirmejon, vi ankoraŭ estas nenio alia, ol ĵusvenintoj, kiuj eĉ ne la psikan ekvilibron sukcesis atingi... Cetere, tiel evidenta estas la diferenco inter viaj kondiĉoj kaj liaj, ke ili ne akceptas eĉ ian komparon por diskutado! Ne miru do, ke tiu, kiun ni tie observas, ricevas tion, kio al vi ŝajnas senrajta... Via horo de spirita instruado eksonos ĝustatempe, kaj pro la atendo vi neniom perdos... Enirinte antaŭ tridek ok jaroj en ĉi tiun Turon, nur nun Agenor Peñalva konsentas entrepreni la nepre necesan konadon de si mem, por obei la Leĝon kaj malpligravigi sian propran situacion, kiu amare pezas sur li... Aliflanke, ĝuste pro sia morala malsupereco, li bezonas pli grandan vigladon kaj zorgon ol vi, kies inklino konvertiĝi al la Lumo aŭguras favoran estontecon...

Jam longedaŭra estas la laboro postulata de la ŝtonkoreco, en kiu sin ŝirmis tiu pekulo, pro lia timo antaŭ la estontaj sekvoj de la ekscesoj, kiuj mallumigis al li la vivon. Por konvinki tiun deviinton, ke li kuraĝu revirtiĝi, estis eĉ necesa la patra persistemo de iu Oliver de Guzman, kutiminta al traktado kun la indiĝenoj de l' Nordo kaj duonbarbaroj de l' Oriento! Li tre baldaŭ reenkarniĝos! Tro difektita estas lia mensostato, por ebligi, ke li sin direktu al efektive progresigaj situacioj! Nur longa, dolorplena surtera ekzistado, kiu estigus definitivajn ŝanĝojn en lia menso ĉar ĝi senbalastigus lian ombroŝarĝitan konsciencon je granda amaso da malpuraĵoj, donos al li okazon por novaj itineroj sur la vojo de la normala progreso... kaj ĝuste por lin inklinigi al tia decido, neniel tamen ĝin trudante; por lin prepari al la akirado de sufiĉaj fortoj por la ardaj bataloj, kiujn li eltenos en la surteraj

scenejoj, ni lin ĉi tie retenas, penante lin kiel eble plej moraligi, lin repacigante kun li mem kaj kun la Leĝo! Se ni tiel ne faros, lia venonta kaj neevitebla reenkarniĝo refalos en la saman eraran rondon, en kiu la ceteraj degeneris, kio tute ne konvenas al li nek al ni mem, ĉar pri lia reedukiĝo ni respondecas antaŭ tiu Leĝo!

Sed plu observu tion, kio okazas en lia ĉambro...”

Daŭre tenante plej streĉan atenton, ni estis surprizitaj de rapide sin sekvantaj okazaĵoj, kiuj pro sia alte eduka karaktero meritas aparte zorgan raporton.

Ni vidis, ke, ĉe gesto de la mentoro, la paciento ekstaris kaj lin obeeme sekvis, kvazaŭ pelate de nekontraŭstareblaj influoj. Ili iris, Olivier antaŭe, laŭlonge de granda galerio, kie troviĝis la “karceroj” de la gardatoj. Post ne longe, ili eniris vastan salonon, iaspecan kabineton por scienca eksperimentado. Ĝi ŝajnis ia tabernaklo, kie sanktegaj misteroj senvualiĝis, montrante al la observanto, kiom li devos lerni kaj progresi ĉe la psikaj sciencoj, por meriti la senmortan trezoron, kiun la Ĉielo heredigis al la homa gento.

Tiu kabineto konserviĝis konstante saturita de magnetaj emanaĵoj taŭgaj al ĝia celo, milde disradiantaj bluan fosforeskon, delikategan, subtilan, preskaŭ nepercepteblan por nia ankoraŭ tro nesufiĉa kapablo vidi la spiritajn aferojn, kaj absolute nevideblan por la malakrega vidado de tiu, kiu tien penetris por submetiĝi al la konvena operacio. Sur estrado polurbrila kiel kristalo vidiĝis seĝo strukturita per substancoj ankaŭ kristalsimilaj pro sia diafaneco kaj tra kies interno cirkuladis, kiel sango trafluanta la arteriojn de karna envolvaĵo, ia fosforeska, blua fluidaĵo, se nur oni funkciigis malgrandajn prembutonojn, similajn al steletoj, apartenantajn al la tutaĵo de tiu stranga aparato.

Antaŭ la kurioza objekto, samspeca kiel tiu ekzistanta en la akceptejo de la Hospitalo, – kie ni vidis tiun fenomenon, nome nian disiĝon de la materia organismo, per mensa regreso ĝis la

tago de la sinmortigo, sub la direktado de Teokrito kaj la asistado de Romeo kaj Alcesto –, elstariĝis kvarangulo ĉirkaŭ du metrojn alta, brilega kiel spegulo, iaspeca fluide-magneta, ultra-sensiva plato, kapabla registri en sia senmakula pureco la plej etan impreson, mensan aŭ emocian, de iu, kiu tien eniris. Ni vidis, ke pro la eniro de Agenor la plato grade malklariĝis, kvazaŭ malpura spiraĵo estus ĝin senbriliginta.

Atentante la aparaton, mi senpacienca kaj scivola, demandis, forgesante la diskretecon, kiu konvenus konservi:

"– Ŝajnas, ke tio estas ia kabineto por okazigo de transcenda fenomenaro! Por kio ĝi utilas, via Pastra Moŝto?..."

"– Trafa estas via penso! Efektive, mia amiko, temas pri ia sanktejo por transcendegaj operacioj! La aparataro, kiun vi vidas, harmonie strukturita per substancoj ĉerpitaj el la sunradioj – kies altirpotenco efikas kiel la magneto –, estas iaspeca termometro aŭ fotografilo, per kiu ni kutime mezuras, reproduktas kaj movas la pensojn... la rememorojn, la farojn pasintajn, kiuj stampiĝis en la psikaj faldoj de la menso, kaj kiuj, pro la magneta agado, reaperas, kvazaŭ per sorĉo, el la ruinoj de la profunda memoro de niaj disĉiploj, por impresi la platon kaj videbliĝi kiel la realaĵo mem iam travivita!..."

Ektremo de timego trakuris niajn psikajn fibrojn. Nia unua impulso, aŭdinte la respondon mallonga, same kiel profundan laŭ ties kapturna amplekso, estis forkuri, terurigitaj pro la perspektivo ankaŭ vidi niajn pensojn kaj pasintajn agojn tiele konigitaj.

Ni havis intiman suspekton, ke niaj mentoroj plendetale konas ĉion pri ni, ne esceptante eĉ niajn pensojn. Sed la diskreteco, la karitato de tiuj senkomparaj amikoj, kiuj neniam uzis tian povon por nin aflikti aŭ humiligi, lasis nin trankvilaj, ĉar nian internon regis la komforta sento, ke ni restos tute ignorataj. Sed vere alarmis nin ne tio, ke ili nin tute konas, sed ja la ebleco, ke ni mem vidu tiujn fotografaĵojn de la pasinteco; ke ni mem spertu la monstrajn scenojn fatale refiguritajn en tiu

fidinda spegulo, kaj ilin mezuru kaj analizu, kio neatendite aperis antaŭ ni kiel malhonora pendumilo nin atendanta kun novspeca torturo!

"– Iluminita estulo – daŭre klarigadis la saĝa instruanto, interna direktoro de la Gardostara Turo –, jam edukita laŭ bonaj principoj de moralo kaj scienco, ne utiligos tiujn aparatojn, en la okazo se li deziros aŭ bezonos elriti el la arkivoj de la memoro siajn pensojn, rememorojn, unuvorte la pasintecon. Al li simple sufiĉos la volo, la mensoforto agigata laŭ inversa direkto... kaj tio pasinta fariĝos estanta, ĉar li travivos tiujn elvokitajn momentojn tiel same, kiel li ilin iam efektive travivis! Sed por la reedukado kiel de la nespertaj animoj, tiel ankaŭ de la malprogresintaj, ili montriĝas utilaj kaj nepre necesaj, tial ni ilin uzas ĉi tie, per kio ni ege faciligas al ni la laboron.

Sed ĉion, kion ni ĉerpas el ĉies menso, ni rigardas kiel sanktan, neniam perfidotan konfiditaĵon, kaj ni eĉ povas sciigi, ke nur la majstro-instruanto de la paciento konas ties terurajn sekretojn, kiujn li zorge konservas por ties instruado, ĉar tiel preskribas la leĝoj de Karitato. Nur sporade, kiel en ĉi tiu momento, ni povas ion ekkoni, ĉar temas pri instruado al la kolektivo, des pli prave, kiam tiu kolektivo lasas sin gvidi de volonta deziro al progreso kaj de tiu kriterio, kiun ni vidas radianta el vi mem..."

Agenor, videble teruregita pro la direkto, kiun la okazaĵoj prenis, provis helpi al si per mistifikado, tute ne konsciante la altnivelan mensokapablon de tiu, kiu al li servis kaj kiu, por esti pli bone komprenata, kompateme sin malaltigis:

"– Ne, moŝta sinjoro, mia majstro, ne! Mi ne estis malbona filo kontraŭ miaj gepatroj!... La notoj, kiujn mi hieraŭ prezentis al vi, koncernantaj tiun apartaĵon de mia vivo, estas ja veraj, mi ĵuras la vi!... Sendube estas ia eraro ĉe tiu detalo, kiu igis vin ilin forĵeti!... Eraro kaj troa rigoro kontraŭ mi!... Vi ordonas, ke mi skribu la devojn de bona filo laŭ la leĝoj de Dio Ĉiopova, kiun mi timas kaj respektas! Vi volas, ke mi ankoraŭfoje ilin lernu,

por ke mi morgaŭ elmetu tiujn rememorojn de filo sur la paĝojn de tiu intima taglibro, kiun oni min trudas verki por komparado kun la filaj devoj... Sed se mi estas certa pri la vereco de miaj asertoj rilataj al tiuj rememoroj, por kio do tiel laciga laboro?!... Prefere vi bonvolu adresi al la koncerna aŭtoritatulo mian petegon pri liberigo... Kial vi tiom suferigas min?... Ĉu do ne ekzistas pardono kaj bonvolemo en la leĝo de la bona Dio, kiun mi tiom multe amas?... ĉar mi ja estas profunde religiema... kaj pentis miajn grandajn pekojn... ĉi tie mi restas jam de tiom da jaroj!... Mi restadis en inferaj karceroj tenata de tiu malica hordo, kiu min trude aligis, post la memmortigo, al sia tendaro... Turmentata, mi travagis senhomajn insulojn, antaŭ ol submetiĝi al iliaj abomenindaj deziroj... Mi alfrontis la terurajn furiojn de la oceano, forlasita kaj perdita sur solecaj rokoj... Dum dek jaroj mi restis alkatenita al malpurega fosaĵo de tombejo, en kiun oni enterigis mian naŭzan, kotkovritan, fetoran korpon! Mi estis persekutata de mallumaj bandoj da venĝemaj malamikoj; batata kvazaŭ rabia hundo, forpelata kvazaŭ rampulo, mordata de milionoj da vermoj, kiuj min frenezigis per hororo kaj angoro, sub la superega torturo de konfuziteco ebliganta nenian klarigon, ne povante kompreni tiun tragikan aflikton, ke mi sentas min viva dum mi kuŝas en tombo, putranta kaj formanĝata de abomenegindaj vibrioj!... La maliceguloj trenis min kiel kaptiton, ligitan per fortikaj ŝnuroj, kaj min enfermis ĝuste en tiun tombon, kie kuŝis... bone... mi volas diri... Vi tion ja scias, mia majstro... Kie kuŝis tiu, kiun mi amis... Jes! Kiun mi malfeliĉigis kaj poste murdis, timante revenĝon de ŝia familio, ĉar temis pri aristokrata knabino... Oni neniam identigis la murdinton... Sed tiuj maliceguloj ĉion sciis kaj post mia memmortigo venĝis la mortintinon... Oni min tiele persekutis, ke por liberiĝi de tia jugo kaj evitigi al mi la turmentadon, mi devis aliĝi al la bando kaj fariĝi tia, kiel ili, ĉar nur tiun alternativon ili proponis... Multo da cirkonstancoj do malgravigas miajn erarojn... Krom tio, mi poste estis arestita de lancistoj, malliberigita en la Sinistra Valo, kie mi

suferis novan ĉenon da teruraj turmentoj... Kaj nun en ĉi tiu Turo, senigita je mia libereco, ne povante eĉ distriĝi sur la stratoj de Madrido, kiun mi tiel amis, nek spiri la puran, freŝan aeron de la kamparo, kio min tiel plezurigas!... Ĉu mi estas, aŭ ne, filo de la Bona Dio?!... Aŭ ĉu mi estas frato de Satano mem?!...”

Elmontrante plej rimarkindan serenecon, la bonkora mentoro respondis:

“– Se nekonato aŭdus viajn konstantajn plendojn, Agenor Peñalva, li supozus, ke oni faras maljustaĵojn en la limoj de tiu loko, kiun lumigas la sanktaj favoroj de la Nobla Direktorino de nia Legio!... Tamen, la longa vico da malfeliĉoj, kiujn vi priskribis, fontis ekskluzive el la pekaj ekscesoj de viaj agoj mem kaj el la sovaĝaj, brutalaj instinktoj, kiujn vi ankoraŭ konservas... De tridek ok jaroj oni vin pacience admonas al intima reformo, kiu certigu al vi malpli dolorajn situaciojn! Sed vi obstine rifuzas ĉian ajn sperton celantan la bonon, restante enfermita en malbonvola orgojlo, kies venena efiko sur vian Spiriton malhelpas vin elpaŝi direkte al la progresoj, kiujn vi de longe jam devus esti farinta! Oni plej tolereme traktas vin ĉi tie, malgraŭ ke vi tion ne konfesas! Vi bone scias, ke via malliberigo sub nia gardo samvaloras kiel protekto kontraŭ la obseda jugo de tiu falango, kiun vi estris, kaj vi ja scias ankaŭ, ke de vi mem dependas la akiro de la libereco, kiun vi tiel forte sopiras! Oni neniam vin molestis ĉi tie. Al vi ni ĉiutage proponas spiritajn trezorojn, ĉar estas nia deziro, vidi vin riĉigita per la lumoj, kiuj el ili radias! Kiel gasto de la Legio de Maria, vi estas de Ŝi mem rekomendita al la direkcio de ĉi tiu Instituto, ke ni rekonduku vin al la karna rondo – al la reenkarniĝo – ne antaŭ ol vi atingos progresonivelon sufican por la bona sukceso de la estontaj surteraj provoj, kiuj ja estos severaj pro la graveco de viaj ŝuldoj antaŭ la Leĝo!

Oni ĉiutage elmetas por via ekzameno la motivojn pro kiuj oni forprenis vian liberecon. Vi scias, ke vi estas kulpa. Vi scias, ke vi trenis en la abismon de memmortigo kelkdekon da

nesingarduloj, kiuj lasis sin trompi de la pereigaj sugestoj de la ruzo, kiun vi uzis kiel inteligenta obsedanto... ilin malfeliĉigante pro la nura plezuro fari malbonon aŭ pro la envio, kiun vi iel sentis kontraŭ ili... same kiel vi iam, estante ankoraŭ homo, delogadis kompatindajn fraŭlinojn, enamiĝintajn kaj senprudente konfidemajn, kaj ilin kondukis al memmortigo pro la amara perfido, per kiu vi ilin elrevigis – ja antaŭsignoj, montrantaj vin kiel estontan obsedanton... Sed via orgojlo sufokas la logikajn konkludojn de la rezonado kaj vi preferas, kiel pli komfortajn, la ribelemon kaj la sofismon, evitante la respondecojn kaj tiel prokrastante la akcepton de ŝuldoj, kiuj vin teruras, ĉar vi ja timas tiun estontecon, kiun vi mem preparis per la perversaĵoj, kiujn vi decidis plenumi! Sed nun de pli altaj sferoj venas dispozicioj pri vi: – estas urĝe, ke ni akcelu vian marŝon al la progreso, ŝparante al vi senfinan restadon en tiu erara rondo, kiu plilongigas al vi la suferojn. Por meti finon al tiel bedaŭrinda stato de la aferoj, ni submetos vin al la ekstrema procedo! Pro ĝia dolora karaktero, ni preferus ĝin ne uzi, havigante al vi tempon pli ol tiun necesan, por ke vi mem serĉu la vojon al via rehonorindiĝo. Ni avertas vin, ke de nun vi ĉiutage, trudate de nia volo, faros memekzamenon, malrapidan, grandan, detalan, kiu konvinku vin pri la urĝeco de la intima reformo, kiun vi tiel bezonas... Mi scias, ke tia memesplorado estos suferiga, sed vi mem ĝin provokis per via obstina rezisto kontraŭ la eniro en la vojon de la morala reboniĝo!

Vi do asertas, ke vi estis bona filo al viaj gepatroj?... Des pli bone, ĉar tial vi tute ne timos la elvokon de via pasinteco! Ni do per tiu memesplorado komencos la serion da analizoj necesaj en via kazo, ĉar la devo, kiu unua koncernas la homon plenumi en la socio, aperas en la sankta sino de la hejmo, en la Familio!

Ni do vidu, kiajn meritojn vi havas kiel filo, ĉar ĉiuj senescepte estos rigore kredititaj al vi, por mildigo de viaj estontaj riparoj:

Agenor Peñalva! Eksidu antaŭ ĉi tiu spegulo, sub la magneta baldakeno, kiu fotografos viajn pensojn kaj rememorojn! Turnu vian atenton al la tempo, kiam vi aĝis kvin jarojn en via lasta surtera ekzistado! Rememoru ĉiujn viajn agojn kontraŭ viaj gepatroj... aparte kontraŭ via patrino!... Vi spertos la defiladon de viaj propraj faroj kaj estos juĝata de vi mem, de via konscienco, kiun ĉi-momente trafos la potenca eĥo de jam pasinta realaĵo, kaj de tiu realaĵo vi ne povos fuĝi, ĉar ĝi estis fidele kaj rigore gravurita en la nepereemaj internaĵoj de la senmorta animo!...”

Kiel ĉia grandkulpa Spirito, Agenor en la decida momento ekprovis elturniĝi. Alpremiĝinte, per subita movo, kontraŭ angulo de la ĉambro, li terure kriegadis, en paroksismo de aflikto, kun la freneza rigardo de perfekta damnito:

“– Ne, sinjoro, mia majstro, estu bonvola, mi vin petegas!... Lasu min ankoraŭfoje reveni en mian ĉambron por nova sinpreparo! Mi...”

Sed la unuan fojon, de kiam ni eniris tiun gravan edukejon, aŭdiĝis ordona, aŭtoritata esprimo, el la buŝo de unu el tiuj delikataj edukistoj, ĉar Olivier de Guzman energie rediris:

“– Eksidu, Agenor Peñalva! Mi ordonas al vi!”

La pekulo eksidis kaj ne plu diris unu solan vorton. Ekregis religia silento. Oni povus aserti, ke la respekteginda ceremonio ĝuas la benplenan, sanktegan ĉeeston de la Dia Kuracisto de la animoj, kvazaŭ Li dezirus prezidi super la konsciencekzameno de unu plia perdita filo, tuj sin turniĝonta al la pardonemaj brakoj de la Patro.

Nun Agenor ŝajnis tre kvieta. Olivier, kies mieno alprenis profunde gravan esprimon, kvazaŭ li streĉus siajn mensajn fortojn ĝis ekstrema intenso, lin konvene komfortigis, envolvante lian frunton per rubando el luma strukturo, kies transcenda blankeco elmontris, ke ĝi fontas el la sunlumo mem. Sed tiu bendo, kiu rememorigus diademon, estis ligita al la baldakeno,

kovranta la seĝon, per lumaj, samnaturaj, preskaŭ nevideblaj fadenoj, kio igis nin konkludi, ke la baldakeno estas la ĉefmotoro de tiu aparato tiel simpla, kiel grandioza laŭ sia celo. La ekrano, kiu siavice ankaŭ ligiĝis al la baldakeno per multoblaj lumbrilaj strioj, ŝajnis harmonie strukturita per la sama sunluma elemento.

Tiam aŭdiĝis la voĉo de la mentoro, kiu kvankam aŭtoritata, tamen estis envolvita en neesprimeblaj vibroj de kareso:

"– Vi aĝas kvin jarojn, Agenor Peñalva, kaj loĝas en la patra domo, en la ĉirkaŭaĵo de Malago... kiel solfilo de honesta, feliĉa edziĝo... kaj viaj gepatroj revas prepari al vi brilan elstaran estontecon!... Profunde religiemaj, ili praktikas noblajn virtojn en siaj ĉiutagaj, ordinaraj agoj... kaj karesas la belan celon konsekri vin al Dio, vestante al vi la pastran albon... Revoku el la faldoj de la animo viajn agojn, kiel filo, kontraŭ viaj gepatroj... aparte tiujn kontraŭ via patrino! Faru tion senhezite! Vi troviĝas en la ĉeesto de la Ĉiopova Kreinto! kiu al vi donis la konsciencon kiel koniganton de Liaj Leĝoj!..."

Tiam ekaperis antaŭ niaj miregitaj okuloj tio nepriskribebla por la homa lingvo! La penso, la rememoroj de la mizerulo, lia pasinteco, liaj kulpoj, eĉ liaj krimoj, *de filo kontraŭ siaj gepatroj,* ekmoviĝis per vivaj scenoj sur la sensiva, senmakula spegulo, pentrante al li lian propran moralan bildon, por ke li, ĉion spektante, sin mem revidu en la tuta abomeneco de siaj faloj, kvazaŭ lia Konscienco estus la tenejo de ĉiuj liaj faroj, kiuj nun, elprenitaj el la fundo de la dorminta memoro pere de transcendega magneta altiro, tumulte leviĝis, lin dispremante per la neeltenebla pezo de malluma realaĵo!

La bedaŭrinda historio de tiu persono – murdinto, sinmortiginto, deloginto, obsedanto – ampleksus profunde draman volumon. Ni ne cedos al la deziro ĝin rakonti. Sed kiel kompletigan aldonon al ĉi tiu ĉapitro ni prezentos mallongan resumon de tio, kion ni ĉeestis en tiu memorinda transtomba vespero, niaopinie ne tute seninteresan por la leganto... ĉar

bedaŭrinde, eĉ nuntempe ne estas oftaj la modelaj filoj en tiu respektinda institucio, nome la surtera Familio!

.....................................................................................................................

– Ekde la unuaj jaroj de sia junaĝo Agenor Peñalva montriĝis kiel filo malobeema, malinklina al kareso kaj respekto al la gepatroj. Neniam li danke konfesis la zorgojn, kies objekto li estis: – liaj gepatroj estus prefere sklavoj, kiujn koncernus servadi al li kaj por li prepari decan estontecon, ĉar ja li, la filo, estis la sinjoro!

– Interne de la hejmo, liaj sintenoj estis senŝanĝe despotaj, malamikaj, malrespektaj, kruelaj! Ekster la hejmo li tamen malŝparis komplezojn, afablaĵojn, ĝentilaĵojn!

– Ribelema kontraŭ ĉia ajn provo celanta lian korektadon.

– Dezirante certigi al li estontecon liberan de la troa laborado ĉe la agrikulturaj okupoj, kiujn ili tiel bone konis; kaj krome sciante, ke li estas ambicia kaj nekontenta pro sia obskura deveno, la heroaj gepatroj sin fordonis al senmezuraj memoferoj por lin vivteni en la Regna ĉefurbo, pagante por li la rajton akiri lokon ĉe kompanio de la reĝa armeo, ĉar nenian alvokiĝon li montris por la eklezia kariero, frue elŝirante la patron el lia revo. Li prefere strebis al la militista kariero, pli konforma al la mondumaj aspiroj, kiuj lin entuziasmigis, kariero kiu cetere faciligus al li la eniron en tiujn, de li enviatajn, aristokratajn rondojn.

– Li hontis la humilan situacion de tiuj, kiuj lin generis kaj abnegacie zorgis pri lia vivo kaj bonstato ekde la lulilo; li forĵetis la honorindan patran nomon, Peñalva, kontraŭ alia fiktiva, kiu pli pompe sonus ĉe

aristokrataj oreloj, sin mensoge proklamante ido de Krucistaj generaloj kaj noblaj kavaliroj, liberigintaj Hispanujon de la araba jugo.

– Pro la forpaso de la maljuna patro, kiun li ne vizitis dum la necedema malsano, kiu lin viktimis, li malhumane forlasis la propran patrinon! Ŝiajn havaĵojn, la rimedojn, je kiuj ŝi kalkulis por trapasi la maljunaĝon, li forprenis de ŝi, forgesante ŝin, sen vivteno, en la Provinco.

– Li verŝigis al ŝi la nekonsoleblajn larmojn de seniluziiĝo pro la sendanko, per kiu li ŝin regalis, kiam, vidante ŝin pli bezonanta protekton kaj kareson, li lasis ŝin sur dolorplena *via crucis* el humiligoj pro loĝado ĉe malproksima parencaro, kiuj rigardis la mizerulinon kiel netolereblan ĝenon!

– Li rifuzis gastigi ŝin ĉe si en Madrido – kompatindan krudmanieran maljunulinon, kun simpla parolo kaj maleleganta eksteraĵo –, ĉar lian domon frekventis elstaraj personoj de la altranga burĝaro kaj etnobelaro, en kies klaso li edziĝis, sin ŝajnigante nobeldevena.

– Li kaŝe irigis ŝin al Portugalujo, ĉar la malfeliĉulino insiste petadis lin pri protekto ĉe la senrevena mizero, en kiu ŝi estis dronanta. Li sendis ŝin al unu sia patroflanka onklo, kiu jam de longe transloĝiĝis al Porto. Sed li agis malzorge, sen certiĝi pri la ĝusta loko de ŝia celo. Tiel, lia patrino, ne sukcesinte trovi la bofraton, kiu ne plu loĝis tie, perdiĝis en la teroj de Luzitanio, kie kompatemaj sampatrujanoj ŝin karitate gastigis.

– Tiuj samaj sampatrujanoj skribis al li, sciigante lin pri la suferiga situacio de la patrino, kiu refoje petegis lin pri helpo. Li ne respondis, senkulpigante sin antaŭ la konscienco per la baldaŭa entreprenota vojaĝo.

> – Efektive, nutrante senlime ambiciajn idealojn, li transloĝiĝis al la malproksima Ameriko, forlasinte eĉ la edzinon, kiun li trompis per iluziaj promesoj, celante eviti la sekvojn de indigniga amintrigo, en kiu li ankoraŭvoje ludis la rolon de turmentisto, delogante, senhonorigante kaj eĉ kondukante al memmortigo malfeliĉan, simplaniman fraŭlinon el la rondo de siaj konatoj. Tiele, tute forgesinte sian patrinon, li ŝin por ĉiam forlasis, kaj la kompatinda maljunulineto falis en tiun ekstremon, ke ŝi devis mizere treniĝi sur la stratoj, vivante el aliula kompatemo, dum li prosperadis en la libera, multpromesa Ameriko!

Tio estis dramaj, naŭzaj bildoj, kiuj sin sekvadis per scenoj de kortuŝa realeco, premante al ni la korojn kaj ĉagrenante la ĉeestantajn mentorojn, kiuj malĝoje klinis siajn kapojn malsupren.

Sed Agenor, kiu komence ŝajnis trakvila, grade ekzaltiĝis ĝis malespero; kaj nun, konvulsie plorante, li blekpetegadis, per alarmaj krioj, ke oni lin indulgu, ke la mentoro lin kompatu, kaj dume, kun kongeste ruĝa vizaĝo, freneza pro ekstrema angoro, atakata de la centoble turmenta fobio de la rimorsoj, li forpuŝadis de si la vidaĵojn kvazaŭ la infero mem minacus lin formanĝi!

"– Ne! Ne, mia majstro, milfoje ne! – li blekadis en larmoj kaj per dramaj gestoj de malespera abomeno. – Sufiĉe, pro amo al Dio! Mi ne povas! Mi ne povas! Mi freneziĝas de doloro, mia bona Dio! Patrino! Mia kompatinda patrino, pardonu min! Aperu al mi, patrino mia, kaj certigu al mi, ke vi ne malbenas la sendankan filon, kiu vin forgesis, por ke mi tiel povu senti ian faciligon! Helpu min per la almozo de via pardono, ĉar iri al vi por ĝin petegi mi ne povas, mi, damnito, vivanta en la infero, kondamnita de la saĝa leĝo de Dio!... Mi ne povas plu elteni la vivon sen via ĉeesto, patrino mia! La plej turmentaj resopiroj konsternas mian koron, en kiu via bildo, humila kaj de mi ofendita, gravuriĝis per neforviŝeblaj trajtoj sub la forkonsumanta

fajro de la rimorso pro la malbono, kiun mi faris al vi! Ho venu via malĝoja figuro verŝi lumon sur la tenebran malfeliĉon en kiu mia mizera animo perdiĝis, galvenenita de tiom multe da krimoj! Almenaŭ en sonĝoj, almenaŭ en miaj halucinoj, aperu al mi, por ke mi almenaŭ ĝuu la konsolon provi sendi al vi ian geston respektan, kiu mildigus la neelteneblan doloron de tiu dispremanta torturo, ke mi ofendis vin! Aperu al mi, por ke Dio, per vi, povu min pardoni pri ĉiuj malbonoj, kiujn mi amasigis sur vin!... Pardonon, mia Dio, pardonon! Mi ja estis, ho Dio, abomeneginda filo! Mi scias, ke mi estas nemortema, Dio mia! kaj ke Vi estas senlime saĝa kaj favorkora! Konsentu do al mi la gracon reveni al la Tero por elpurigi la konsciencon je la abomenaĵo, kiu ĝin difektas! Lasu min, Sinjoro, ripari tiun monstran kulpon! Havigu al mi la suferadon! Mi volas suferi pro mia patrino, por meriti ŝian pardonon kaj tiun amon, kiu estis tiel sankta kaj kiun mi tamen malŝatis! Punu min, Sinjoro Dio! Mi pentas! Mi pentas! Pardonu min, patrino mia! Pardonu min!...

La saĝa instruanto deprenis de lia frunto la lumbrilan rubandon.

"– Leviĝu, Agenor Peñalva!"– li aŭtoritate ordonis.

La malfeliĉa obeis, ŝanceliĝante, kun frenezaspekta rigardo, kvazaŭ li estus ebria.

La vidaĵoj ĉesis aperi.

Sed li, nekonsolebla, kompatinda konscia frenezulo – sin ĵetis sur la genuojn, kovris al si la konfuzitan vizaĝon per la kunstreĉitaj manoj kaj daŭre ploradis, venkita de la plej impresa senkuraĝeco, kiun mi ĝis tiam vidis en nia Instituto...

Olivier de Guzman ne interhelpis per provo konsoli lin. Li nur starigis lin kaj, lin patre subtenante, rekondukis lin al la apartamento. Tie alveninte, li sur la tablo reordigis grandan albumon, kies paĝoj ŝajnis ĉifitaj; kaj sur blanka folio li skribis titolon kaj subtitolon, kies profundeco skuis nian animon per ektremo de granda, suferiga emocio:

– TEZO: La 4a Ordono de la Leĝo de Dio: – “Respektu vian patron kaj vian patrinon, por ke longe daŭru via vivo sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi.”

– Listo de la devoj de filoj al siaj gepatroj.

Li poste foriĝis, ne dirante eĉ unu plian vorton. Atendis lin alia disĉiplo. Nova tasko postulis liajn sindonajn zorgojn...

Pastro Anselmo turnis la etan butonon de la aparato. Ankaŭ ĉesis por ni la vidaĵoj!

Mi ne povis min deteni kaj, preskaŭ malbonhumora, mi demandis:

“– Ĉu oni do lasas la malfeliĉulon tiele senhelpa, droninta en tiel senespera situacio?... Ĉu tiela ago sufiĉe elmontras la karitaton de la laboristoj de tiu nobla, nin gastiganta Legio, komisiitaj por lia protektado?...”

Karlo kaj Roberto svage ridetis, ne respondante, dum la maljuna inicita pastro bonvole kontentigis mian maldiskretan scivolon:

“– La mentoroj plendetale konas siajn disĉiplojn kaj siajn taskojn. Agante, li nepre scias, kion ili faras!... Cetere, kiu asertis al vi, ke tiu pentanto restos sola kaj senprotektaj!... Tute male, ĉu li ne troviĝas sub la patrina protekto de Maria el Nazareto?...”

Kiam la pordegoj de la fortikaĵo fermiĝis post ni, signante, ke ni devas ekiri returne, ni ankoraŭ aŭdis, korpreme resonantan en niaj konsternitaj mensoj, la kriegadon de la malbona filo en la rabiaj konvulsioj de l' rimorso:

“– Pardonu min, patrino mia! Ho mia Dio, pardonu min!”.

# Ĉapitro III
## La Frenezulejo

"Kaj se via mano aŭ via piedo faligas vin, detranĉu ĝin kaj forĵetu ĝin de vi: estas bone por vi eniri en vivon kripla aŭ lama prefere ol, havante du manojn aŭ du piedojn, esti enĵetita en la eternan fajron."

Jesuo Kristo
**La Nova Testamento**[1]

Ni ne detenos nin de la deziro rekonti la sensaciajn impresojn, kiuj sur ni faris la dua el la vizitoj zorge programitaj de Frato Teokrito cele al nia instruado, en la vespero de la tago sekvinta tiun, en kiu ni vizitis la Turon.

Larĝe malfermiĝis la imponaj pordegoj de la Frenezulejo, enlasante nin kvazaŭ ni estus eminentaj personoj.

Kiel tre ĝuste montris ĝia nomo, la Frenezulejo akceptadis tiajn estaĵojn, kies mensa stato, tro deprimita pro la refrapoj de la memmortigo, nekapabligis al ili normalan rezonadon.

La direktoro de la Frenezulejo estis malnova psikisto deveninta de la antikva Hindujo – originejo de la surtera spirita saĝeco – profunde konanta la esoteran sciencon pri la homa

[1] Sankta Mateo, 18:8.

animo, klarvida kaj sperta alienisto, kies neĝblankaj haroj, elŝoviĝe pendantaj ĉirkaŭ blanka turbano, aspektis kiel ĉarma laŭrokrono, atestanta liajn meritojn konkeritajn en laboro kaj sindono al siaj malfeliĉaj fratoj. Lia nomo – kristana nomo –, adoptita post lia iniciĝo en la elaĉetan lumon de Kirstanismo, estis Johano, la sama de tiu respekteginda apostolo, kiu al li malkaŝis la arkanojn de la Pura Doktrino, al kiu li de tiu tempo por ĉiam sin fordonis. Kaj ja simple kiel Fraton Johanon ni konis tiun ĉarman personon, sur kies ŝultroj pezis la timeginda respondeco pri la plej seriozmalsanaj internuloj de la tuta Kolonio! Sufiĉe materiiĝinta, por ke ni lin pli bone komprenu, Frato Johano havis brunan haŭton kiel ĝenerale la hindoj; grandajn, penetremajn okulojn, vastan kaj inteligentan frunton, tute blankiĝintajn harojn kaj altan staturon. Smeraldoj, kuŝantaj unu sur la maldekstra ringa fingro kaj alia alte sur la turbano, atestis, ke li estas kuracisto, ĉar vere eĉ ne unu solan el tiuj saĝaj inicitoj ni vidis, kiu ne estus vestita same kiel la ceteraj kolegoj, escepte de la pastroj, kiuj preferis uzi, pro cirkonstancaj devoj, la sacerdotajn vestojn.

Forte simpatiante tiun respektegindan figuron, ni lin tute senceremonie ĉirkaŭis, kvazaŭ ni delonge konus lin, altirataj de la bonegaj, al li esence propraj vibroj, dum li estis eniranta en tiun gravan institucion, kiu al nia rigardo konstateble montriĝis aranĝita laŭ la postuloj de Frateco, inspirata de la dia kristana amo, kiel ankaŭ laŭ tiuj de la psiko-kuraca scienco.

"– Antaŭ ol pritrakti ĉian ajn interesan temon – li klarigis, ĝentila kaj atentema –, mi devas certigi al vi, ke miaj karaj zorgatoj, estuloj afekciitaj de la suferado, estas sendanĝeraj. Kelkaj ankoraŭ troviĝas en halucina stato; aliaj estas dronintaj en impresa prostracio, bezonantaj, kiel vi vidos, nian zorgon kaj specialan flegadon. Sed mi asertas al vi, prenante por komparo surteran frenezulejon, ke ili estas sendanĝeraj, ĉar miaj kompatindaj zorgatoj konscie ofendus neniun ajn; ili ne agresus, ne atakus, kiel ofte okazas kun malsanuloj de l' surteraj

frenezulejoj. Sed ili portas en si plej pereigajn danĝerojn – ne nur kontraŭ enkarnuloj sed eĉ kontraŭ Spiritoj, kiujn ankoraŭ ne imunigas la sanaj, viglaj mensaj sintenoj –, pro kio ni ilin apartigas de vi, tenante ilin en izolo. Ilia bedaŭrinda vibrostato, malaltigita ĝis la ekstrema nivelo de deprimo kaj malsupereco, havas tielan nocivon, ke se ili alproksimiĝus al enkarnulo kaj restus apud li dudek kvar horojn, kaj se tiu homo, nenion scianta pri psikaj aferoj, mense similus al ili, pasive cedante al la efiko de sugestiado, tiam povus ja okazi, ke ili nekonscie kondukus lin al memmortigo aŭ faligus lin grave malsana, halucinita aŭ eĉ freneza! Apudiĝe al infano, ili povos ĝin mortigi pro subita malbonfarto, en la okazo se proksime al la etulo ne troviĝos iu, kiu, pro natura dispozicio, al si altirus tiel danĝerajn emanaĵojn, aŭ ia tuja spirita terapio, kiu ĝin gardus kontraŭ la pereiga kontaĝo, kio, en tiu okazo, montriĝos kiel logika sekvo de disvastiĝinta pesto...”

Impresite, Belarmino, kun kuntirita vizaĝo, demandis:

“– Kiel unu tia grava okazo povus fariĝi, Frato Johano?!... Ĉu do ekzistas tiaj eblecoj sub la Saĝa Leĝo de la Kreinto?... Kiel mi ilin komprenu, sen difekti la respekton, kiun mi havas al tiu Leĝo?!...”

La kunparolanto, farinte geston de nedifinebla malĝojo, saĝe respondis:

“– La Leĝo de la Dia Providenco, mia filo, preskribis kaj ordonis Bonon kaj Belon, kiel superegan normon por la harmonio en ĉiuj fakoj de la Universo. Dekliniĝante de tiu grandioza principo – ja neŝanĝebla vojo de evoluado – la homo respondos por ĉia malordo, en kiu li enretiĝos! Tiaj okazoj, kiel la ĵus pritraktitaj, povas fariĝi kaj rezultas de leĝmalobeoj kaŭzitaj de nia morala malprogreso, estante ja suferigaj malbonoj esence propraj al la malsupereco de la koncerna planedo. Mi devas tamen rimarkigi, ke mi ne asertas ilian oftecon, sed ke ili povas okazi kaj ja estas okazintaj! Kaj tiel ili nepre okazos, kiam estos simileco de inklinoj – afineco – ĉe ambaŭ flankoj, tio estas, inter

la elkarniĝinto kaj la enkarnulo. Koncerne la infanon, delikatan kaj plej impresiĝeman estaĵon, ni konfesu, ke ĝi estas vundebla per plej sensignifaj agantoj, kondiĉe nur ke ĉi tiuj ne harmoniu kun ĝia delikata naturo. Ni ja scias, ke ektimo, ia forta impreso, ia superreganta sento kiel la resopiro pri tre amata persono ankaŭ povas igi ĝin malsani kaj forlasi sian etan karnan portaĵon!

La sama Leĝo, kontraŭ kiu tiuj eblaĵoj povas sin teni, ankaŭ havigas la la homoj efikajn defendrimedojn!

Purigante la menson per harmoniigo de l' sentoj al la farado de la vera Bono, kiel ankaŭ al la plenumado de Devo; ĉar la harmoniaj vibroj naskitaj de la komunikiĝo de la menso kun la Lumo, kiu de la Supro disradias per bonfaraj tonoj sur tiujn, kiuj ĝin serĉas, la enkarna estaĵo povos imunigi sin kontraŭ tia kontaĝo, same kiel la homo imuniĝas kontraŭ la surteraj epidemioj pere de la profilaktikaj substancoj konformaj al la karna organizaĵo, nome la vakcinoj... Ĉar temas pri psika viruso, la antidoto nepre estos samnatura, strukturita per energioj kontraŭaj, ankaŭ psikaj... De nia flanko, ĉar la Leĝo reganta la nevideblan Regionon nenuligeble preskribas, ke tielajn malfeliĉegojn oni kiel eble plej evitigu, ni tial ĉiamaniere klopodas por tion plenumi, kaj estas al ni sankta devo antaŭgardi la homojn ĝenerale kaj la infanojn speciale kontraŭ tiaspecaj akcidentoj.

Bedaŭrinde oni ne ĉiam nin komprenas kaj helpas por tiu celado, ĉar la homoj volonte sin ĵetas per malpiaj, tute senbridaj sintenoj, en tiajn situaciojn, kiuj, kiel ni asertis, kvankam nenormalaj, povas ja estiĝi...

Por tiu, kiu cedis al la sieĝo de la elkarnulo, la rezultintaj malbonoj estos la sekvo de lia malviglado, de liaj malnoblaj kutimoj kaj sentoj, de la tuto de liaj malsuperaj mensaj sintenoj, de lia indiferenteco kontraŭ la ideo pri Dio, ĉe kio li preferis stagni, ĉar li forgesis, ke la ideo pri Dio estas la nepereema fonto liveranta la elementojn nepre necesajn al la bonfarto, al la venko, kie ajn moviĝas la homa estaĵo! Por la "nekonscia"

kaŭzinto de la farita malbono, tio estos unu plia malmerito rezultinta el la memmortigo kaj kies respondeco aldoniĝos al la ceteraj, kiuj pezas sur lin...”

“– Kaj ĉu ne ekzistas sekura rimedo antaŭgardi la homon kontraŭ tiu pereiga danĝero, al kiu li estas elmetata, kvazaŭ li paŝus sur trompaspekta tereno traborita de mortigaj eksplodaĵoj?...” mi enpensiĝe demandis, antaŭvidante multe da surteraj dramoj kies kaŭzo sidus sur klarigoj, kiujn oni tie donis al ni.

“– Jes, ili ekzistas! – vive respondis la klera doktoro. Diversaj rimedoj ekzistas, per kiuj ili estas avertataj, kaj mi povas eĉ aserti, ke la alarmo estas konstanta, senlaca, senhalta, eterna! – kaj celanta ne nur tiun aŭ tiun alian homgrupon sed ja la tutan homaron!

La avertoj, kiujn la homoj bezonas por eviti ne nur tiun pereigan sekvon sed ankaŭ la ceterajn turmentojn, kiuj povas trafi ilin dum iliaj surteraj provoj por progresi, troviĝas en ĉies konscienco mem, ĉar la konscienco estas la koniganto pri la leĝaro, laŭ kiu la homoj devas konduti kaj kiu al ili difinas la plenumadon de Devo kiel ŝirmon kontraŭ ĉia ajn fiasko, kiu povus ilin surprizi tiel en la surtera socio kiel ankaŭ en la spirita! Tiuj avertoj aperas en la preskriboj, kiujn la kredoj kaj sanktaj tradicioj de ĉiuj popoloj disvastigis tra la generacioj, same kiel troviĝas en la lecionoj pri tiu eduka moralo, kiun la Granda Nazareta Majstro postlasis tiel al la homa gento, kiel ankaŭ al la Spiritoj apartenantaj al la Tero. Tia moralo, kiu tute ne estas frukto de la hiperbola mistikemo de pasia kaj fantaziema popolo, kontraŭe montriĝas kiel logika kaj viva normo, kies aplikado al la agoj de la ĉiutaga ordinara vivo certigos al la homo – al la homaro – la feliĉon, pri kiu li de jarmiloj revas, pri kiu li baraktas dum senĉesaj sengloraj luktoj, sed por kies konkero li malŝparadas altvaloran tempon, forĵetante la solajn rimedojn, kiuj povus lin helpi en tiu heroa odiseado, nome la obeon al la leĝoj regantaj la Universon kaj direktantaj lian destinon, same

kiel la memreformon nepre necesan kaj de tio rezultantan! Kaj nun, havantaj absolutan efikecon, tiuj avertoj aperas en la lumaj kodoj de la tiel nomata Tria Revelacio, kiu nuntempe direktas la socian transformiĝon konturiĝantan sur la Tero. Ebligante rektajn rilatojn inter la videbla kaj nevidebla regionoj; starigante kaj popularigante la interŝanĝon de ideoj inter ni, la elkarniĝintaj Spiritoj, kaj la homoj ankoraŭ enfermitaj en la karna armaĵo, la Nova Revelacio instruos ĉiujn, kiuj interesiĝos pri la grandiozaj temoj specife apartenantaj al ĝia kampo, tiel ebligante al la homoj ricevi el la Nevidebla Mondo ĉion, kion ili efektive bezonas por sin fortikigi kaj akiri la sciencon pri la Venko. Tiamaniere la homo nepre ekkonos ĉiujn aspektojn de la vivo en la Nevidebla Mondo, kiujn al li permesas lia morala kaj mensa progreso! Ties gloroj kaj belaĵoj estos al li malkaŝataj; la supozataj sekretoj, kiuj enfermas la morton en nepenetreblaj regionoj, estos solvitaj per videblaj kaj klarigaj faktoj, same kiel la lin ĉirkaŭantaj danĝeroj – kiel tiuj ĵus pritraktataj – la abismoj kaj la malfeliĉegoj, per kiuj povus lin trafi la loĝantoj de la ankoraŭ malsuperaj regionoj de la Nevidebla Mondo. Ĉion ajn, kion la Spiritoj povis fari por veki la atenton de la homoj cele al ilia instruado, per admonoj koncernantaj ilian spiritan destinon, tion la Spiritoj ja provis pere de la Nova Revelacio. Sed la homoj volonte aŭskultas nur la ordonojn de la pasioj! Ilin interesas nur la personaj opinioj, la momentaj ĝuoj! Ili preferas kontentigi siajn kapricojn, malgraŭ ties malnobleco, krom ankaŭ la postuloj de la orgojlo, fonto de fatalaj faloj... kaj ĝuste tial ili ofte malŝatas ĉion, kio povus ilin altigi al Dio kaj al ili evitigi malfeliĉegojn kaj seniluziiĝojn – timegindajn eblecojn, kiel tiuj, kiujn mi ĵus menciis –, ĉar ja ne per ĉiutaga malvirtiĝado, lulate de malnobligaj pasioj, ili sin imunigos kontraŭ tiaspeca malbono, kies sola antidoto troviĝas en la praktikado de la veraj virtoj, same kiel en la mensa altiĝado al la regno de la Lumo! Ili volonte restas surdaj al la admonoj de la Dia Protektanto, kies deziro estas gardi ilin, kontraŭ la atakoj de la malbono, en la ombro de Sia Evangelio de Amo

same kiel per la parolo de la Nova Revelacio, kiu ĉiujn alvokante, en Lia nomo, por la plej nobla transformiĝo, tiele avertas:

– Ho Homo, estaĵo farita el la radilumaj spiroj de la Dia Fokuso: – memoru, ke vi estas nemortema!... Konsideru, ke ĉio, kion vi vidas, kion vi tuŝas kaj posedas – la hodiaŭajn konkerojn, kiuj naskas la orgojlon en via sino, la vantaĵojn, kiuj flatas vian egoismon, la frenezajn pasiojn, kiuj frakasas vian karakteron, kompromitante al vi la estontecon, la fiktivajn surterajn glorojn, kiuj vin lulas kaj flatas vian vantemon, vin sklavigante al la materio – ĉio forpasos, iam malaperos, konsumiĝinte en la neelpetebla fajro de la realo, ĉar ĉio ja dronos en la forgeso de la nekonserveblaĵoj, kiuj ne povos resti en la sino de Perfekta verko. Sed vi restos por ĉiam! Vi staros por rigardi la bedaŭrindajn ruinojn de viaj propraj eraroj, timeme atendante la aŭroron de novaj estontaj okazaĵoj! Memoru, ke la mondoj ruliĝantaj en la senfina lazuro, tiuj fokusoj de lumo kaj energio, kiuj dolĉigas al vi la pensojn, kiam nokte, ĝuante la meritītan ripozon post la tagaj laboroj, vi vin fordonas al la kontemplado de ilia lumo, brileganta je nesondeblaj distancoj; ke la malproksimaj planedoj, kiuj en la multaj sideraj regionoj de la Senlima Universo kreskas, progresas kaj ĉiam pli brilornamiĝas dum sia jarmila vojirado, portante sur sia malavara dorso aliajn homarojn, viajn fratojn, en konstanta ascendo al la Eterna Disdonanto de Vivo, kaj trenante en sia ĉarma orbito plejadojn de aliaj juvevoj el la neimitebla juvelujo de la universo; ke la Astro Reĝo mem, kiu vidis vin naskiĝi kaj renaskiĝi tiom multe da fojoj sur la Tero, subtenante al vi la vivon, vin gvidante kaj varmigante al vi la iradon, ridetante ĉe viaj venkoj de marŝanta Spirito, zorgante pri via sano kaj vin protektante en la nokto de l' jarmiloj, kunlaborante kun vi ĉe la penigaj lernadoj necesaj al via edukado kiel diheredonto – vi, Homo, memoru, ke ankaŭ ili forpasos, mortos, por cedi lokon al aliaj novaj, pli bonaj ekzempleroj, kiuj siavice vojos al la sama sorto! Sed vi ne forapsos! Vi transvivos la sinsekvadon de l´

tempoj same kiel Tiu, Kiu vin kreis kaj faris vin eterna kiel Li mem, dotante vin per la esenco de la Vivo, kiu ja estas Li mem, de kies Sino vi originis!

Tial do, Homo, gardu vin! Estante, pro heredaj rajtoj, destinita al la dia gloro en la sino de la Eterneco, vi ne povos eviti la laborojn de la evoluado, kiun vi nepre bezonas konstrui, de la ascendaj streboj esence propraj al via naturo, por ke vi iam atingu tiun orbiton, de kiu vi devenas!... kaj dum tiu nepre necesa vojiro, kiomfoje vi malobeos la preskribojn regulantajn la harmonian gradiĝon de via altiĝado, tiom same vi suferos la efikojn de la disonanco, kiun vi estigis per kontraŭstaro al Leĝo, al kiu vi estas submetita kiel kreito de Perfekta Estaĵo!... Zorgu pri vi dum ankoraŭ estas tempo!... dum vi iras sur la vojo de la normala itinero, kiu de vi postulas nur bonfarajn realigojn... Evitu la viziton de Doloro, kiu, pro via neglekto en la plenumado de Devo, trudos al vi suferigajn provtempojn, vin devigante lesivi la konsciencon per nenuligeblaj riparoj krom la suprediritaj realigoj!... Lernu de Via Plejalta Patro, kiu vin plej bone dotis por la gloro de Sia Regno, la amon kaj la respekton al Bono, la solan bazon, por ke vi akiru tiun grandiozan venkon, al kies efektivigo vi estas alvokata cele al via propra honoro, ĉar, laŭ la Leĝo, tiu feliĉo estas heredaĵo de via senmorta Spirito!... Vi do klopodu por perfektigi vian karakteron, ornamante per virtoj tiun animon, kiu, en iu tago de la Eterneco, devos respeguli laŭ simileco la bildon de Sia Kreito!

Por la atingo de tiel glora celo la Grandanima Ĉielo donis al vi – la Idealan Modelon, la Nesupereblan Instruanton, kapablan konduki vin al la pinto de la destino al vi asignita: – Jesuo el Nazareto, la Kriston de Dio!

Amu lin! Sekvu lin! Imitu lin!... kaj vi atingos la Regnon de la Plejalta Patro!...

Tiel admonas la Nova Revelacio, kiun la Nevideblaj Estaĵoj proklamas sur la Tero.

Sed kiuj ja volontas atenti ĝin kun respekto, penante akcepti la sublimajn invitojn kiujn la Ĉielo per ĝi sin malkaŝante, faras al la homoj?...

Prefere ja la filoj de l' malfeliĉo! Tiuj, kies animoj, batitaj de l' ekstremaj seniluziiĝoj surteraj, akceptis en la koron la revivigan influon de la ĉielaj veraĵoj, kiujn ĝiaj altvaloraj instruoj permesas duonvidi! La bonkoraj idealistoj kun animoj sentemaj kaj humilaj, allogitaj de l' Bono kaj Belo, la pensuloj ne infektitaj de nedigesteblaj teorioj fontintaj el personaj eraremaj opinioj, kaj kies mensaj streboj transsaltis la surterajn barojn ĉe la nebridebla, nobla dezirego agordiĝi kun la harmoniaj vibroj radiantaj el la Perfektulo!... Sed la granduloj kaj potenculoj, la superranguloj trolaŭditaj pro siaj komfortaj surteraj pozicioj, kies bone provizitaj kasoj kaj abunde kovritaj tabloj spitas la zorgojn: unuvorte tiu sennombra amaso, kiu nur al si mem kredas kaj nur sin mem adoras, ĉar ĉiajn kapricojn ĝi povos aĉeti, ĉiajn pasiojn sukcesos ĝissate kontentigi, distrante sin ĉe la logo de la malnoblaj plezuroj, kiuj trompas la sentojn kaj samtempe venenas la animojn – tiuj preferas nenion kompreni, turnante la dorson al ĉio, kio povus deteni ilian marŝon en la abismon... ĝis ili tien efektive falegos, malgraŭ la avertoj dise ripetataj dum jarmiloj tra la tuta mondo... kie ili enretiĝas kaj reduktiĝas al tia bedaŭrinda stato... Ĉu vi volas konstati?...

Dirinte tion, li ekpaŝis kaj direktis sin al balkono rigardanta al vasta korto, iaspeca pitoreska klostro, kie graciaj arbedoj donis agrablan aranĝon al la limigita pejzaĝo. Kelke da artaj benkoj ornamis la malgrandajn aleojn, kie imprese malĝojaj figuroj de suferantaj estaĵoj, kiuj, kiel ni, iam estis homoj, sidis en silenta ripozo.

Frato Johano invitis nin kliniĝi super la balkono, alta je unu metro super la korto, kaj daŭrigis:

"– Tiuj strangaj figuroj, kiujn nur de tie vi rigardos, ĉar ne estas bone, ke vi al ili alproksimiĝu, venis, same kiel vi, el la Valo de la Sinmortigintoj. Sed dum vi reakiris la serenecon kaj

atingis sufiĉan kondiĉojn por esperigaj provoj, tuj kompatindaj fratetoj nur sukcesis liberiĝi de la ekscitego, kiu ilin turmetegis, por fali en apation, kio evidentigas, ke tre malsamaj estas via morala nivelo kaj la grado de via respondeco ĉe la memmortigo. Ili restas konsternitaj, stuporigitaj sub impresoj tre ŝokaj kaj dume nevenkeblaj! Ili ne povas rezonadi kiel dezirinde ĉe elkarniĝinta Spirito; ne kapablas pripensi laŭ la pleneco de sia prudento, kaj konscias la ĉirkaŭantajn okazaĵojn nur tiel, kvazaŭ ili vidus la realon el la fundo de ĉerko!

La dramaj puŝegoj, kiuj ilin surprizis en la tempestoj de iliaj malprudentaĵoj, kaj la kruelegeco de la malbonoj, per kiuj ili de longe sin mem ĉirkaŭis, altiĝis ĝis tiela grado, ke al ili febliĝis la vigleco esence propra al la Spirito, tiu konscia estaĵo origininta el dia ekvolo!

Ĉi tie, en la morna izoliteco de tiu ĉi korto, pri kiu la eterna korfavoro de la Sinjoro de Ĉiuj Ekzistaĵoj permesis, ke ĝi estu provizita per komforto kaj agrablaj aspektoj, troviĝas, kun granda morala necesbezono, multe da estaĵoj, kiuj sur la Tero estis famuloj, pri kiuj sindonaj admirantoj publikigis elokventajn nekrologojn en gravaj ĵurnaloj kaj memore al kiuj oni celebris pompajn funebrojn; kiuj posedis ĉion, kion plej bonan ekzistas sur la Tero... sed kiuj bedaŭrinde forgesis, ke ne ĉio en la Senlima Universo estas plezuroj, lukso; ke ne ĉiam la altaj sociaj rangoj aŭ la materiaj riĉaĵoj estos ŝirmo al tiuj, kiuj ilin ligis al siaj eraroj; ke ne ĉiam la farado de perversaĵoj aŭ la senprudentaĵoj de l' malmoraleco, same kiel la abomenindaj egoismaj agoj, restos senpunaj dum ties aŭtoroj forgesiĝos en sia fatala descendo en la mallumon!

Ĉi tie kolektiĝas fieruloj kaj sensamuloj, kiuj kredis, ke ili povos senprudente uzi siajn karnajn korpojn, sin fordonante al diboĉaj moroj, satigante la sensojn per multego da koruptaj pereigaj ĝuoj. Ili tamen sciis, ke ili tiel malbonigas al si la sanon kaj iros en la tombon antaŭ la tempo difinita en la leĝoj de la Kreado – ĉar ĝuste pri tio ilin avertadis la kuracistoj, al kiuj ili sin

turnis, kiam ĉiaspecaj ekscesoj sin elperfidis per organaj misfunkcioj ĉe iliaj karnaj armaĵoj –, se ili ne ĝustatempe sin detenos, korektante la perturbojn per modera konduto.

Ili ĉiuj tion ankaŭ sciis! Tamen ili daŭre krimadis kontraŭ si mem! Ili sentis la deprimajn efikojn, kiujn la abomenaj, malnoblaj kutimoj estigis kiel en la fizika, tiel ankaŭ en ilia morala strukturo. Sed ili daŭrigis, sen ia ajn penso por sin korekti! Ili do malrapide, konscie sin mortigis, sen ia dubo pri sia ago, ĉar ili havis tempon por ĝin pripensi! Ili malvarme kaj malnoble sin mortigis, obsedate de siaj malvirtoj, konsciante, ke ili sin mem turmentadis, malŝatante tiun netakseblan donacon, kiun ili ricevis de la Eternulo, nome la korpon, per kiu ili povus fari novajn progresojn!

Vi rimarkos, miaj karaj amikoj, ke el ili multaj volus forgesi premajn malfeliĉojn per dormigo de la menso en drinkado; ke ili, nekonsoleblajn, premate de nerebonigeblaj angoroj, serĉus superegan konsolon ĉe ebrieco, kiu eble havigus al ilia sufero la deziratan faciligon. Sed tiu ŝajna malgravigo estas sofismado esence propra al la ribelema obstinulo, ĉar la invito por malpezigo de la ĉagrenoj, kiuj afliktas kaj persekutas la homaron, vibradas de antaŭ du jarmiloj, en ĉiuj anguloj de la Planedo, kaj mi povas ja aserti al vi, ke eĉ ne unu sola homo, depost kiam tiun inviton eldiris la Plej Alta Esprimo de Amo sin oferinta sur la supro de la Kalvario, ne aŭdis pri ĝi, ĉu dum li portis la karnan vestaĵon, ĉu dum li restis en la Nevidebla Mondo, atendante la reenkarniĝon. Tial ankaŭ ĉi tiuj kompatinduloj certe ĝin aŭdis ie sur la Tero aŭ en la Spirita Patrolando:

"– *Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos...*" [1]

... Kial ili do volis forgesi akrajn ĉagrenojn kaj malfeliĉojn, ĉe diboĉa, malhonora kaj malnobliga drinkado, kiu krom ne

[1] Sankta Mateo, 11:28, 29 kaj 30.

povi helpi ilin, eĉ pligravigis ilian situacion, farante el ili sinmortigintojn centfoje pli respondecajn?!... Ĉar, sciu bone, tiaspecaj kulpuloj havas multe pli grandan respondecon ol la malfeliĉulo, kiu, perfide vundita de intensega pasio, en momento de ekstrema senkuraĝeco lasis sin engluti de la abismo!

Sed atentu ĉi tiun novan specon: – tio estas kokainmaniuloj, opiomaniuloj, ĉiaspecaj toksikomaniuloj, kiuj pro sia miskutimiĝo lasis sin fali ĝis la plej malsupera stato de dekadenco atingebla por Spirito, kreaĵo de Dio! Ili troviĝas en bedaŭrinda stato de vibra deprimo, kiel veraj mensdebiluloj, idiotoj de la spirita regiono, malhonoriĝintaj morale, mense kaj spirite, ĉar iliaj monstraj malvirtoj ne nur deprimis kaj mortigis la materian korpon sed ankaŭ komunikis al la fizika-astrala organismo la pereigajn sekvojn de ilia abomeninda malmodero, infektante ĝin per malpuraĵoj, per pestaj influoj, kiuj akrege makulis ĝin – tiun delikatan kaj impreseblan strukturon, teksitan per fajnaj scintiloj, kiun la homo devos plibeligi per la akirado de ĉiam pli aktivaj kaj meritaj virtoj, nobligi kaj altigi per puraj pensoj elsendataj en noblaj impulsoj proksimaj al la diaj spiroj – sed kiun li neniam! neniam malnobligu per farado de tiel bedaŭrindaj fiaĵoj!...

Ni efektive vidis, sekvante per atenta rigardo la indikojn de la eminenta moralisto, estaĵojn misfiguritajn de la malbono, kiun ili en si mem portis, kiel malfeliĉegajn sekvojn de la malmodero – ili montriĝis idiotaj, ploremaj, suferplenaj, senkuraĝigitaj, kaj iliaj vizaĝoj misformitaj, malbelaj, deprimitaj, ankoraŭ rememorigis la tragikajn scenojn de la Sinistra Valo. Treege da makuloj montris, sur iliaj astralaj eksteraĵoj, la stigmatojn de la malvirtoj, al kiuj ili sin fordonis. Unuj eĉ aspektis kvazaŭ lepruloj, dum aliaj elspiradis naŭzajn haladzojn, kvazaŭ ia miksaĵo el la tabako, alkoholo kaj toksaĵoj, kiujn ili trouzis, fermentus per putraj fetoroj, kies reefikoj infektus ilajn proprajn vibrojn, kiuj tiel, pezaj kaj difektitaj, esprimus la viruson, kiu venenis al ili la materian korpon!

Ankaŭ la "distranĉitoj" konsistigis la malfeliĉegan legion internigitan en la Frenezulejon. Ili ankoraŭ konservis sur si la impresan kovron el sangaj vundoj. Iam kaj iam doloregaj spasmoj ilin skuis, kvazaŭ ili konvulsius pro la rememoro de la pasinteco. Pezaj kaj lantaj estis iliaj movoj, kaj nur penege ili paŝis, vidigante mankon de vibrofortoj por agigi la menson kaj utiligi tiujn kapablojn, kiuj estas naturaj propraĵoj kiel de homoj, tiel ankaŭ de Spiritoj. Ŝajnis, ke ili estas reŭmatuloj, malsanuloj, kiujn kvazaŭ ligus bandaĵoj rigidigantaj al ili la artikojn...

Malĝojaj antaŭ tiel akraj suferoj kaj tiel konsterna morala dekadenco, ni angorplene demandis:

"– Kaj kio fariĝos el tiuj kompatindaj estaĵoj?... Kia estonteco ilin atendas?...

Per rapida gesto kaj sama tono, la eminenta estro de tiu neordinara fako kontentigis nian angoran scivolon, esprimante la senduban malĝojon, kiu, ĉe tiel bedaŭrindaj elmontroj de morala malsupereco, kompatigis lian noblan animon de disĉiplo de la Evangelio:

"– Ho ve! Ilin atendas drama estonteco ĉe la elaĉeta kirlo de proksima, neevitebla reenkarniĝo! – li respondis. – La ekzemploj, kiujn mi nun prezentas, estas senrimedaj en la spirita vivo! Nenio ĉi tie povos kuraci la kruelajn angorojn, kiuj ilin premegas, nek ŝanĝi la komplikan situacion, kiun ili al si mem preparis per siaj sovaĝe malmoderaj agoj kaj malpia nesingardemo, ĉe kiuj ili plezure plensatiĝis, donante liberan kuron al la malvirtoj, kiuj ilin malŝatindigis! Ja ili, kaj sole nur ili peros korfavoron al si mem, ĉar ili volonte fariĝis la kaŭzintoj de la eraroj, kiujn ili ne volis evitigi al si! Sed tio kostos al ili malĝojon, korpremon kaj senfine amarajn dolorojn, antaŭ kiuj estulo en normala situacio restus konsternita! Por ke ili konvinkiĝu pri la propra situacio kaj submetiĝu pli malpli rezignacie al la venontaj sekvoj de la pasintaj malprudentaĵoj, estas necese, ke ni, dum ili ĉi tie restos, faru penigan katekizan laboron, senlacan aplikadon de speciala terapio morala kaj fluideca, kaj al ili havigu

karesan subtenon de sankta respondeco. Sed ofte okazas, ke multaj el tiuj kompatinduloj portas en la koro ribelemon, obstinan koleron pro la malfeliĉego, rilate al kiu ili rigardas sin kiel viktimojn kaj ne kiel respondeculojn. Ne akceptante la evidentecon de la nuna realo, ili malrezignacie ekprenos novan surteran envolvaĵon, pligravigante sian situacion per la malbonvolo, en kiu ili enfermiĝas, per malsubmetiĝo kaj senpacienco, senkuraĝigitaj de la antaŭsentoj pri la turmentataj interfrapiĝoj de la neevitebla kulpelpago! Kiaj ili sin montras ĉi tie, ĉi tiuj antaŭvidigas nenion alian ol etan bandon da estontaj lepruloj, renaskiĝontaj en la amaraĵojn de la ombraj surteraj regionoj, en la mizerajn tavolojn de la surplaneda socio; krom ankaŭ kanceruloj kaj paralizuloj, mensdebiluloj kaj idiotoj, nervozuloj, konvulsiuloj, neresanigeblaj malsanuloj, portontaj kompleksojn, kiuj konfuzos la surteran medicinon kaj spitos ĉiujn bonfarajn provojn de tiu nobla scienco... Krom tio, ili ankaŭ malagrable pezos sur la homan socion, ĉar ja de ĉi tiu, de ties eraroj ili estas frukto, al ĝi ili apartenas, pro kio estas juste, ke ĝi mem ilin gastigu kaj subtenu tiel longe ĝis tio estos necesa... ĝis tiu malfeliĉega situacio malakriĝos!

Ili baldaŭ reenkarniĝos. Kun ni ili restos nur la tempon necesan por reboniĝi el la plej severaj krizoj sub la prizorgo de tiuj niaj sindonaj kunlaborantoj, komisiitaj por ilia gardado. Ili foriros en la reenkarniĝon tiaj, kiaj ili nun statas, ĉar ne alia kuracilo kapablos malgrandigi la profundecon de ilia malsano. En la estontan korpon, kiun ili modlos laŭ sia nuna, makulplena figuro, ili kunportos ĉiujn malbonojn naskitajn de la diboĉaj kutimoj, al kiuj ili senbride sklaviĝis... kaj en tia situacio, kiel jam klarigite, ili estos malfeliĉeguloj, kiuj sin peze trenados tra stacioj de mizeroj kaj larmoj...

Sed tiel ardaj suferoj liveros al ili riĉan rikolton da estontaj gajnoj. Ĉe la elaĉetaj fajroj de la malfeliĉo, la malpuraj tegaĵoj, neebligantaj brilon al iliaj astralaj korpoj, maldikiĝos, dum akceliĝos ties vibroj, kiuj, venkante la inercion, reakiros taŭgan

movon por la spiritaj riparoj. Iliaj koroj, impulsate de la eduka doloro, ascendos en streboj de ardaj preĝoj al la Superega Kaŭzo de la Vivo, per konstanta kreskado de fervoro kaj fido, ĝis ili atingos la lumajn tavolojn de la Spirita Mondo, kie ili reeĥos kaj agordiĝos al bonfaraj, superaj vibroj, kiuj malrapide, reefike korektos ilian malsuperan vibradon... Tiamaniere la malbona fokuso iom post iom estingiĝos ĝis ili fine, post la diseriĝo de la karna envolvaĵo, estos kvietigitaj kaj en kondiĉoj por ion lerni ĉe ni cele al sia reedukiĝo, post kiam ĉesos ilia kuracado en nia fako...”

“– Se mi bone komprenis, tio signifas, ke la kulpelpaga reenkarniĝo, atendanta tiujn malfeliĉegulojn, estas al ili trudata de ĉi tiu Departementa sekcio kiel nura hospitala kuracado?... Temas do pri antidoto... ia medikamento?...”– mi demandis, skuate de suferiga desapontiĝo.

“– Jes! – malĝoje respondis la klera konferencisto. – Nura medikamento! Iaspeca kuracado trudata de la urĝeco kaj graveco de la malsano! Dolora operacio, kiun ni faras kun bedaŭro, sed al kiu ni senhezite submetas la pacientojn, kun la certeco, ke nur post ĝia efektiviĝo ili ekresaniĝos. Ĝi do ne estos ĝustadire ia puno, kiel vi ĝin rigardis, ĉar ja neniu trudis punon aŭ eldiris verdikton, kaj kontraŭ tio atestas la fakto, ke ĉiuj el ni ĉi tie servantaj al la Leĝo klopodas, kiom nur eble, por mildigi ilian turmentan situacion. Ĝi estos pli ĝuste – jes ja! *la efiko de la kaŭzo, kiun la paciento mem estigis per al ekscesoj, ĉe kiuj li plezuradis...* Sed, kiel vi havis la okazon ekscii, la patrina zorgado de Maria, sub la inspiro de la ora leĝo de Frateco, preskribita de tiu Senlaca amiko nin kondukanta al la elaĉeto, havigas al ili konstantan, sindonan helpon. Dum la reenkarniĝo, droninte en la ondoj de la surtera kulpelpago, ili daŭre restos sub nia dependeco, tiel same enhospitaligitaj kaj enskribitaj en nia Departemento, vizitataj kaj kuracataj de niaj kuracistoj kaj gardistoj, kiel se ili ankoraŭ ĉi tie loĝus... kaj ĝuste ĉi tien ili revenos post la fino de tiu terura ekzilo, al kiu ni ilin preparis.”

Plu daŭris nia vizitado al la kuracistaj kabinetoj interne de la konstruaĵo. Sed dumire Frato Johano enirigis nin en tiujn malsanulejojn, kie restis tiuj, kiuj ekde sia eniro en la Sinistran Valon, daŭre restis poseditaj de impresa prostracio. Deprimite de ĉiaspecaj ekscesoj, ĉefe tiaj de seksa naturo, iliaj animaj fakultoj degeneris kaj ilin reduktis al tia neordinara situacio – senduba atesto pri la kvalito de la instinktoj, de kiuj ili lasis sin regi!

Kuŝantaj en litoj, kiujn la superega boneco de Jesuo al ili permesis okupi, laŭ la amoplenaj dispozicioj de la leĝoj de Karitato, kiuj inspiradis ĉiujn servojn en la Kolonio, ili restis izolitaj de la ceteraj en vastaj, plenplenaj ejoj, kaj apartenis al ĉiuj sociaj klasoj kaj naciecoj sub la jurisdikcio de la Kolonio. Turmentaj inkubsonĝoj tenadis ilin en konstanta maltrankvilo, sed malgraŭ tio, ili ne sukcesis vekiĝi el sia angora apatio. Nekapablaj moviĝi kaj sin esprimi, por vortigi la turmentojn, kiuj kirliĝadis en iliaj cerboj, nur malfortajn ĝemojn ili eligadis mikse kun naŭzaj tordiĝoj, kvazaŭ ili estus infektitaj de nekonata viruso.

Kortuŝite, ni preterpasis inter la litovicoj, ilin rapide rigardante laŭ la indikoj de nia klera mentoro, kiu ilustris la impresan prezentadon per la alloga parolo, kiun li tiel bele scipovis uzi.

"– Se via spirita vidpovo estus sufiĉe disvolviĝinta – li plu klarigadis – vi konstatus, ke teruraj emanaĵoj eliĝas el iliaj mensoj, vidigante bildojn kaj scenojn malnoblajn kaj hontigajn, kiel rezulton el iliaj diboĉaj moroj, el iliaj agoj kontraŭaj al la dececo kaj al la moralo, ĉar eksciu, ke tiel la agoj faritaj de l' homoj, kiel ankaŭ la pensoj eliĝintaj el iliaj mensoj, neforviŝeble stampiĝas en ilia spirita strukturo por poste elaperi antaŭ niaj okuloj, per bedaŭrindaj vidaĵoj, kiam ili, spite al la Leĝo, sin ĵetas en ĉi tiun flankon de la vivo! En tiuj litoj troviĝas ĉiaspecaj sinmortigintoj: – ekde tiuj, kiuj ekprenis la fatalajn armilon aŭ toksaĵon, ĝis tiuj, kiuj pereis pro siaj propraj fikutimoj! Ilin unuigas la plej abomena altiriĝemo, nome la malsupereco de karaktero kaj sentoj!..."

Efektive! Kvankam ni ne povis vidi la menciitajn mensajn bildojn, kiel iam en la Sinistra Valo, kiam ni priskribis tiujn rilatajn al la perforteco de la sinmortigo, ni tamen ekvidis nigregajn vaporojn, kiuj, kvazaŭ densaj nuboj, eliĝadis el iliaj cerboj per dikaj ondoj kaj disiĝis tra la medio, kiun ili ja nebuligis, envolvante la ĉambrojn en peza krepuska duonombro, kvazaŭ tie regus eterna nokta mallumo... kaj tio estas la samo kiel aserti, ke por tiuj kompatindaj viktimoj de si mem ankoraŭ ne ekbrilos la konsola aŭroro, kiu antaŭ ni jam bildiĝis ĉe la horizontoj de la estonteco. Cetere, kial ne tiel okazi, se tie kolektiĝis grandaj krimuloj kontraŭ la moralo, turmentistoj kiuj la plej multe koruptis kaj malfeliĉigis la proksimulon, homaj monstroj milfoje satiĝintaj de la afliktegoj, kiujn ili faligis sur la koron kaj la destinon de aliuloj?!... Kiel ne infektiĝi de mallumo la ilin ŝirmantaj ĉambroj, se la mallumo, kiu ilin ĉirkaŭis, fontis de ili mem, ĉar ja ĉe ĝiaj faldoj ili ĉiam plezuregis, ĝin ili estigis kaj ekscitis, per ĝi ili sin regale nutradis dum sia socia kaj intima vivo, kaj ĝin ili faris pli densa per la akrega apogeo de l' sinmortigo?!... Tie ni ilin vidis tiaj, kiaj ili iam estis sur la Tero: galantaj, delogemaj, flatemaj, hipokritaj, mensogemaj, senmoralaj, multfoje levitaj al la plej altaj sociaj rangoj, voluptamaj, drinkemaj, nekredantaj al Bono, nekredantaj al Dio, servantoj de la malbono, sklavoj de la besta naturo, treniĝantaj en la koto de la instinktoj ĉe la nivelo de l' vermoj, forgesintaj, ke ili estas kreitaj de Dio kaj al Dio iam devos prezenti kalkulon pri la misuzo de la libereco, en kiu la Kreado tenas la homan estaĵon! Sed nun, ili restis nuligitaj, stigmatizitaj de hontiga pasinteco, kies bildo ilin persekutadis kiel akuzanta fantomo kaj atestis pri ilia mizera stato, la sola, kiun ili devas elteni kiel rezulton el sia maldeca konduto!

Rimarkinte nian intereson, la klariganto daŭrigis, fidele plenumante la peton de Teokrito, ke oni al ni permesu instruiĝi:

"– La reenkarniĝo estos la sola korektilo sufiĉe energia por kuraĝige stimuli iliajn malvigligitajn fortojn. Ĉi tie ili nur tre malforte asimilos la tonikajn emanaĵojn senĉese disverŝatajn

en la malsanulejoj, ĉar ankoraŭ tre dikaj estas la tavoloj el malpuraĵoj, envolvantaj iliajn fakultojn, por ebligi aliajn bonfarajn helpojn, kiel okazas al aliaj internuloj en nia Instituto.

Same kiel iliaj samsortuloj en ĉi tiu fako, ili ofte estas kondukataj al la Tero cele al rebonigaj kontaktoj ĉe mediumoj morale kapablaj el si mem elradii emanaĵojn, kiuj bonefike kunhelpus por ilia vekiĝo...

"– Kaj kiam ili reenkarniĝos?... Kiaj ili sin montros en la socio, en kiu ili iam vivis?..."– neatendite demandis la ekslernanto de Coimbra, kun la grandaj okuloj flamigitaj de intereso.

"– Kiam malpli intensa fariĝos ilia prostracio, ni ilin kondukos al nova reenkarniĝo, kion ili efektive ne konscios, kaj kio signifas, ke ili ne kapablos ion peti por la nova ekzistado, (ĉar krome al ili mankas koncernaj meritoj), partopreni en la aranĝoj por la grava batalo, en kiu ili ludos la ĉefan rolon – bonkore klarigis la servanto de Maria. – Tial, nur ni, la direktantoj de la Frenezulejo, krom ankaŭ la fakuloj de la Departemento de Reenkarniĝo, decidos pri la paŝoj, kiuj ilin koncernos, laŭ la justeco de la leĝoj starigitaj de la Kreinto kaj la preskriboj de la amoplena karitato de la Savanta Majstro, kiu ĉiujn malfeliĉulojn celas helpi, mildigante ilian suferon per Sia nepereema dolĉeco, al kiu Majstro ĉiuj servantoj ŝuldas submetiĝon, obeon kaj respektegon!

Kia do funebraspekta legio kulpelpage migros sur la scenejojn de la Tero kune kun miaj kompatindaj pacientoj! Mi ankoraŭ ne povas precizigi detalojn. Sed miaj scioj pri spiritaj aferoj permesas al mi en ĉi tiuj antaŭvidi intelektajn malfruiĝintojn, frenezulojn, epilepsiulojn, eble surda-mutulojn kaj eĉ blindulojn – kaj ĉiuj portos la bedaŭrindajn signojn de la abomenindaĵo, al kiu ili sin donis, en grado konforma al la faritaj krimoj!"

"– Ĉu tiu ĉi puno ne estas tro severa, respekteginda S-ro direktoro?... se ni konsideras la principon, laŭ kiu la tuta homaro

eraras per ĉiutaga pekado?... mi malrezignacie demandis, dum antaŭ mia interna vidado elvolviĝis bildoj similaj al la klarigaj rimarkoj de la eminenta moralinstruisto, bildoj kiujn mi iam ĉiutage konstatis en la surteraj scenejoj."

"– Ne tiel kredu, mia amiko! – li serioze rediris. Vi prefere pripensu, kion mi elvolvis rilate la leĝojn pri kaŭzo kaj efiko, kiujn la Superega Leĝdonanto starigis, celante averti, kiel la homojn tiel ankaŭ la Spiritojn, pri la eraroj, kiujn ili faras kontraŭ la harmonia regado de la ceteraj leĝoj. Konsideru la punon, kiun al si mem trudas la diboĉulo: malobeinte tiujn leĝojn, li falis en tian situacion, ke li suferas ilian resalton, ĉar la radilumajn fakultojn donitajn de la Eternulo al siaj kreitoj neniu makulos pro fia misuzo sen tio, ke neeviteblaj sekvoj lin dolorige atingus! Ĉar Bono estas la superega fundamento de la Vivo, en kian situacion do sin metos tiu, kiu ĝin atencis, sin fordonante al la malbono, sin ĉiutage dekliniĝante de la natura, ascenda vojo al la Perfekteco, trenate de agoj kontraŭaj al tiuj, kiujn la Sinjoro difinis kiel normalan vojon por la nobla irado?... Ĉu vi do forgesas la larmojn, kiujn tiuj kompatinduloj verŝigis al siaj fratoj, al kiuj ili trudis turmentojn naskitajn de la egoismo kaj ceteraj fiaĵoj elfluantaj el iliaj nigraj koroj?... La kalumniojn, per kiuj ili vundis siajn viktimojn, ilin plezure senkreditigante ĉe la bonreputaciaj personoj?... La denuncojn, la malicajn kritikojn, la abomenindaĵojn, per kiuj ili ofte malhonorigis la respektindan personon de la proksimulo, uzante sian rezonkapablon kaj sian intelekton ekskluzive por malfeliĉigi la homojn kaj tiel fosante antaŭ si mem la abismojn, en kiujn ili nepre falegos?... Ĉu vi pensis pri la maldankoj kaj perfidoj truditaj al naivaj virinaj koroj, kiujn ili kaptis en siaj abomenaj ungegoj forĝitaj el sordidaj instinktoj?... pri la infana kaj junula senkulpeco, kiun multaj el ĉi tiuj monstre makulis?... pri la hontegindaj scenoj, kiujn ili ofte kreis kaj ludis dum la surtera ekzistado, portante korupton kaj perversecon al atestantoj de la videbla kaj nevidebla regionoj, malpurigante la fluidec-magnetajn emanaĵojn suprenfluantajn

de la Tero en la Nevideblan Mondon kaj nin superŝarĝante per maltrankvilo, ĉar ili tiel devigis nin plenumi lacigajn laborojn por rebonigo kaj purigo de la medio, por eviti la infektadon de niaj kolonioj?...

Ha miaj filoj! Kiel vi nun miregas, ke tiuj ĉi kompatindaj renaskiĝos limigitaj per nevenkeblaj mankoj, se el la ekzistado, al ili donita por progresi, ili faris armilon kontraŭ la sanktaj ordonoj de la kreinto de Ĉiuj Ekzistaĵoj mem, kiun ili tre, tre multe ofendis, ofendante sin mem kaj la proksimulon?!... Cetere, ili ne restos eterne ĵetitaj en tiuj abismoj plenaj de siaj malicaĵoj!...

La anomaliojn, per kiuj ili sin kovris, korektos la eduka doloro, ilin repacigante kun la Leĝo! Ho miaj amikoj, Dio estas la Senfina Pardonemo kaj deziras, ke Liaj kreitoj harmoniu kun la eterna beleco de Liaj leĝoj! Se ni do scias, ke tiuj leĝoj estas neŝanĝeblaj, ni ilin observu kaj respektu, por ne trinki la neeviteblan galon el la sekvoj, kiujn ni memvole estigos per niaj dekliniĝoj de la natura, luma vojo..."

Kiel ĉiam, mi mallevis la frunkton ĉe la nerefutebla logiko de tiu alia disĉiplo de la Nazareta Majstro...

..........................................................................................................

En la galerioj kaj antaŭĉambroj proksimaj al la sanktejoj, nome la kuracistaj kabinetoj, kie oni kompetente kaj karitate aplikadis la mildigajn emanaĵojn, ni vidis, ke flegistoj iris kaj reiris, subtenante malfortikajn kaj timigitajn malsanulojn venintajn de tiu korto, kiun ni ĵus vizitis, kaj de aliaj lokoj, por ricevi la bonefikan kuracadon. Ni rimarkis, ke la "distranĉitoj" estas objekto de speciala kompato, pro tio ke ili povis nur tre pene moviĝi. Laŭ la informoj de Frato Johano, kiu donis gravajn klarigojn pri ĉio, kio aperis antaŭ ni, tiuj estos paralizuloj, denaskaj malsanuloj, kiuj ekde la infanaĝo prezentos impresajn nenormalaĵojn.

Efektive! Iliajn teniĝojn malhelpis ekstremaj perturboj ĉe iliaj vibroj, kiujn la terura memmortiga ŝoko disigis; iliaj gestoj

estis pezaj, seninteligentaj, kvazaŭ ilin senmovigus la ombroj de la batoj kaj rebatoj, tragike refiguriĝintaj en la spegula sentivo de ilia astrala korpo! Ili ploradis senĉese, kvazaŭ plorado estus degenerinta en kruelan kutimon truditan de la intenseco de ilia turmento. Kvankam ĉiam malkvietaj pro la dolorega aflikto de konstanta malbonfarto, ili tamen estis obeemaj, ne inklinaj al blasfemado kiel ordinare okazas ĉe tre malfeliĉaj sinmortigintoj.

Forlasinte la sanktejojn, kien ni efektive ne eniris, ni atingis vastan salonon, ian specon de simpla kaj impresaspekta aŭditorio, kie moralinstruaj lecionoj estis donataj de juna servanto, kiu en antaŭlonge pasinta ekzistado tre digne portis la malbelan, franciskanan ordenveston, sed kies animo lumiĝis per la virtoj lernitaj ĉe la elaĉeta instruoj de la Testamento de l' Dia Sendito, al kiu lia patrono tiel fidele servadis.

Uzante tiun karakterizan dolĉecon, ja distingiĝan trajton de la karakteroj formitaj de la vera kristana inicado, tiu nova legiulo simplavorte prezentis, kiel iu konsilanta aŭ instruanta ĝian observadon, la ideon pri Dio kaj Lia patreco super la tuta kreaĵaro, krom ankaŭ la misio de Lia Sendito kaj ties vastaj sekvoj bonfaraj al la homaro.

La invito al preĝado, al interna individua memekzameno, estis ĉiutage ripetata kaj kontentige pravigata, antaŭ ol oni eniris en la kabinetojn por la fluideca purigado aplikata de la sindonaj psikistoj. Ĉi tiuj estis la ĉefaj rimedoj tiam provataj por kuracado de la malsanuloj, ĉar ili celis la mensan reedukiĝon, estis ekzercoj kondukontaj la pacientojn al posta starigo de fluoj harmoniaj kun la bonfaraj fortoj de la Supro; kaj tiel transcenda instruado estis simplamaniere donata, sub la gvido de metodoj kompreneblaj por tiuj perturbitaj mensoj kaj sub la inspiro de dolĉa, frateca karitato, kies parfumo penetris ĝis la fundo de niaj animoj kortuŝitaj ĉe la vido de tiel noblaj koroj, kiuj sin fordonadis al amoplena helpo al la proksimulo!

La juna laboranto, sincera, humila en sia netaksebla karitata klopodo, ne vidis en tiuj naŭze malbelaj kondamnitoj, al kiuj li

servadis, estulojn makulitajn de hontindaj kulpoj, nek en ili atentis la abomenan astralan korpon de iamaj diboĉuloj, kiuj metis siajn noblacelajn sensojn sub la regadon de malpuraj ĝuoj. Kion li vidis kaj kompateme amis, kun la deziro servi kaj altigi, tio estis fratoj malpli aĝaj ol li, pri kiuj la Devo ordonis, ke la pli aĝaj ilin helpu surgrimpi la krutaĵojn de la progreso; tio estis animoj destinitaj al gloriĝo en la Lumo, bezonantaj gvidon sur la longa vojo, en kiu ili faros la dornan ascendoj al la Sublima Fokuso, generanto de la Vivo!

"– Ĉu ni povas informiĝi ankaŭ pri la *démarches*[1], koncernantaj tiujn kamaradojn kaj celantajn tiun gravan okazaĵon, nome ilian revenon al materia korpo?!... – denove petis la doktoro el Coimbra, kiun tre forte interesis ĉiaj aludoj al tiel delikata temo kiel la reenkarniĝo sur la Tero, ĉar senĉese afliktis lian konsciencon fortaj intuicioj pri la urĝega bezono, ligita al lia kazo, ree loĝi en homa korpo por liberiĝi, per la kulpelpago, de la krimo farita kontraŭ la sendefenda persono de tiu, kiun li amis.

"– Jes, mia juna amiko – pozitive respondis la afabla gvidanto –, estos eble kaj eĉ nepre necese informi vin pri ĉiuj klopodoj koncernantaj tiun gravan temon, kiu vin tiel profunde interesas. Sed ne koncernas ĉi tiun sekcion liveri al vi pli vastajn klarigojn, ĉar en la Instituto funkcias Departemento komisiita por la ĝeneralaj servoj rilataj al la reveno al la korpaj ekzistadoj. Certe vi iam vizitos ĝin.

En tiu Departemento, vi vidos, ke pro sia neordinara graveco elstaras la laboratorioj, en kiuj estas farataj planoj por la grava okazaĵo, desegnoj kaj mapoj rilataj al la korpoj, kiujn estonte loĝos la kulpuloj, kies protekto estas al ni provizore konfidita. Se iu bezonas renaskiĝi kun difektita envolvaĵo, aŭ ekhavi dum la ekzistado ian malsanon, ekzemple la blindecon,

[1] France: dispozicioj, necesaj paŝoj, antaŭaranĝoj. – *(Noto de la Trad.)*

aŭ ankoraŭ dum ĝia kurso suferi akcidenton kaj fariĝi kripla, tiucele la desegno de lia mapo prezentos la necesajn indikojn, ĉar la signo de lia estonta kriplaĵo jam stampiĝis sur lia perispirita organismo. Kaj tiel okazas, ĉar lia mensa, vibra stato, sub la premo de la konsciencriproĉoj, sugestie stampis en la potenca sentivo de tiu subtila organismo la volon fariĝi kripla, blinda, muta, ktp., cele al la elaĉeto de la pasinteco, same kiel okazas al vi mem, kara frato Sobral, kiu nun tiel forte impresiĝas pro la afero de viaj propraj manoj...

Memkompreneble, pri la preparo de tiaj skizoj nepre sin okupos teknikistoj konsciantaj la gravecon de la tasko al ili komisiita, kio atestas, ke temas pri Spiritoj meritantaj la plenan konfidon de la direktoroj de tiu ĉi Kolonio.

Elfinite, la skizoj estos senditaj al la direkcio de la analizaj kabinetoj, kiuj plenumos siajn servojn en konformeco kun la elaĉetaj urĝbezonoj de la koncernato, pesante la justecon de liaj meritoj kaj sin subigante al la devigaj malavantaĝoj de la malmeritoj, ĉio en akordo kun la konkludoj antaŭe faritaj de la sekcio “Programado de Provoripetoj”. Kio permesos malpliakrigi la mizerojn de la elprovado, tio estos laŭleĝe konsentita al la kulpulo renaskiĝonta sur la Tero. Ankaŭ en tiu alia flanko de la vivo liaj moralaj fortoj kaj lia rezistkapablo same estos kompensitaj.

Konvenas akcenti, miaj karaj amikoj, ke la reenkarniĝo estas plej alta oportuno, kiun la Superega Patro donas al Siaj Kreitoj, por ke ĉi tiuj progresu kaj nobliĝu, sin preparante por la heredaĵo, kiu al ili estas rezervita en la gloro de Lia regno. Tiel preskribas la leĝo. Kaj neniu atingos sian senmortan destinon, ne paŝinte sur la ŝtupoj de la renaskiĝoj, sur la Tero aŭ aliaj planedoj! Sed en la okazo, se ribelema animo malŝparis longan tempon, misuzante tiun donon per evidenta malobeo al la Milda Leĝo, kiu al li tiomfoje konsentas tiun saman oportunon, tiam ĝi fariĝas dono ankoraŭ pli valora, ĉar ĝenerale tiaj okazoj fontas el la propeto mem de la Elaĉetanta Majstro, kiu la Superegan

Kreinton petegas pri novaj etapoj de elprovado, por ke la ribelulo povu rehonorindiĝi...”

“– El viaj klarigoj, respektinda frato, mi devas konkludi, ke, ĉar la surtera fizika korpo estas sanktega konfiditaĵo, ja vera ĉiela donaco, la enkarnuloj do agus multe pli inteligente, se ili kondukus sian vivon konforme al la valoro de la ricevita donitaĵo, kondutante kun respekto, pripensemo kaj prudento dum la tempo, kiam ili devus profiti la moralajn avantaĝojn, kiujn al ili havigus la estado sur la planedo?... kaj ĝuste tial, ke ili evitigus al si ripetadon de kulpelpagaj ekzistadoj, nepraj kaj dolorplenaj, rezultantaj el la malobeado al tiuj respektegindaj leĝoj, al kiuj estas submetita la Universa Vivo?...”– mi intervenis iom nekontenta.

“– Ja tiel estas, mia amiko! Tiel oni povus evitigi al si multajn dolorojn! – rediris la direktoro de la Frenezulejo. – Kaj se la surtera fizika korpo estas sanktega konfiditaĵo, kiun la homo devas respekti kaj protekti, ĝin kiel eble gardante kontraŭ malpuraĵoj kaj difektoj, do la fizika-astrala, nome tiu, kiun vi nun portas, tia ne malpli estas!... kaj nia Animo-Intelekto, Konscienco, Prudento, Sento, unuvorte la Memo, estas esenco mem de la Kreinto, ero de Li, sparko eliĝinta el Lia Superega Esto!

Tiel vi komprenos, miaj karaj amikoj, ke ni ĉiuj estas respektegindaj temploj, ĉar ni havas la gloron porti Dion en ni, kaj ke, ĉu sur la Tero kiel homaj estaĵoj, ĉu en la Nevidebla Mondo, kiel liberaj Spiritoj, ni ŝuldas amon kaj respektegon kiel al ni mem, tiel ankaŭ al niaj similuloj, konsciante, ke ĉiuj kreitoj estas perfekte egalaj antaŭ sia Kreinto, tre amataj gemoj en la eterna juvelujo de Tiu, kiu estas la Superega Kaŭzo de la Vivo! De tio certe originas la baza dia leĝo:

*“– Ami Dion super ĉio kaj la proksimulon kiel sin mem.”*

Sekvis longa paŭzo, dum kiu la lojala servanto atentis neprokrasteblajn devojn rilatajn al sia funkcio kaj ni restis

penseme silentaj, kiel eble observante la afliktoplenajn figurojn de tiuj kompatindaj internuloj, kiuj montriĝis al nia rigardo. Pli proksime al la mentoro, Mario Sobral, malkvieta kaj interesita, rompis la silenton, milde parolante:

"– Al mi plaĉus, se eble, daŭre aŭskulti viajn teknikajn klarigojn, respekteginda frato..."

La malnova servanto de Jesuo ridetis kaj, konsentante la humilan peton per amika gesto, plu parolis, denove altirante nian atenton:

"– Sed, kiel mi diris, estas okazoj, kiam nia Gardistino ne konsentas la reenkarniĝon tia, kia ni ĝin planis. Tiam ŝi komplezas nin per la favoro de sia inspiro por programado pli ĝusta, konforma al la stato de la koncernato. Sed, kiel ajn la afero estas, la planoj, celantaj la okazaĵojn de unu enkarniĝo, nepre estos rigore studataj, registritaj, provataj kaj reviziitaj, ĉiam konformaj al la plej egalpeza justeco... kaj tiel plenumiĝas la altesprima, senmorta sentenco, kiun la Dia Majstro sankciis kaj kiu ankaŭ klarigas ĉiujn grandajn kaj nesolveblajn problemojn afliktantajn kaj elrevigantajn la homaron:

*"– Al ĉiu laŭ lia faro."*

Ordinare la aspiranto mem al la reenkarniĝo elektas la travivotajn provojn, la akrajn dornojn, kiuj ŝirpikos al li la tagojn de la ekzistado, dum kiuj al li konvenos ripari la sekvojn de sia kulpa pasinteco. Li mem petegos la Gvidantajn Potencojn pri novaj oportunoj, kiuj al li permesu atesti sian penton kaj deziron komenci regeneran marŝon, kiu al li donus la okazon sin korekti el la malvirtaj impulsoj lin trenintaj al la malbona konduto... kaj tiajn atestojn li povos plenumi kiel en relative sana korpo, en la okazo se lin superregas ekstremaj moralaj suferoj, tiel ankaŭ en korpo kripla aŭ katenita al nekuraceblaj malsanoj, depende de la pligravigaj motivoj de la kulpo, de la akumulitaj malmeritoj...

Tiamaniere, la paciento mem kunlaboros en la skizo de la planoj por sia estonta korpo kaj en la programado de l' ĉefaj,

neeviteblaj okazaĵoj, kiujn li nepre travivos kaj kiuj ja estos logikaj efikoj nedisigeblaj de liaj kulpoj. Sed por tio li ĉiam ricevos helpon de siaj sindonaj mentoroj.

Ne tiel tamen fariĝos koncerne la internulojn de ĉi tiu hospitala fako. Miaj kompatindaj zorgatoj ne troviĝas en la kondiĉoj por ion meminiciate provi. Ilia reveno al la karno estos do la plenumo de unu preskribo de la Granda Leĝo, kiu konsentas novan oportunon al la kulpulo ĉiam, kiam li fiaskis en la lasta oportuno... Ĝi estos impulso al la progreso, la decida medikamento, kiu ilin kondukos al la stato de resaniĝantoj kaj signos la aŭroron de elaĉetaj etapoj en iliaj destinoj...”

Konsternita ĉe tiel profunda kiel delikata tezo, kiu, kiel mi klare komprenis, plenigus multajn volumojn, mi ankoraŭ plu demandis, dum ni, pensante pri la reveno, nin direktis eksteren:

“– Pardonu mian insistadon, respekteginda frato direktoro... Sed la ĵus elvolvita temo, pro la intenseco kaj profundeco de la rezonoj, kiujn ĝi elvokas, kaj pro la nesuperebla surprizo, kiun ĝi kaŭas al pensulo, ne nur entuziasmigas sed ankaŭ sincere kortuŝas... Ĉu al ni estus eble ankoraŭ nun ekzameni iujn el tiuj planoj, eĉ antaŭ ol ni preparos tiujn nin koncernontajn?... Kiaj ili estas?... Aŭ ĉu tiel nobla laboro devas resti kaŝita al profanaj okuloj?...”

Kaj mi efketive sentis min kortuŝita, eĉ timigita, memorante, ke ankaŭ mi estas kulpulo, ke mi min mortigis por eskapi el la blindeco, ke laŭ ĉiuj signoj la plano por la estonta korpo de la kompatinda Mario prezentos manmutilon kaj ke io flustradis en mian kapon, ke mi denove fariĝos blinda, iel ajn blinda!

Frato Johano certe perceptis la angoron ombrantan al mi la menson kaj la koron, ĉar, respondante, li prenis esprimon de senkompara boneco:

“– Estas eksterdube, ke tiel gravan servon oni ne faros publike, por amuzi videmulojn, kiuj ankaŭ ĉi tie troviĝas. Sed la ĉambroj povos akcepti vizitantojn, se la koncernaj aŭtoritatoj al tio rajtigos. Mi ne dubas, ke vi iam tien eniros, ĉar tiel postulas

la neceso havigi al vi instruadon... Penu ne senkuraĝiĝi antaŭ la perspektivoj de la estonteco, mia amiko! Kontraŭe, konfidu la nesupereblan dolĉecon de nia Amata Majstro kaj Sinjoro, kiu estas la senduba Gvidanto de niaj destinoj... Vi ankaŭ memoru, ke Tiu, kiu faris la saĝajn leĝojn regantajn la Universon, ankaŭ scios vin fortigi por la venko super si mem!...”

..........................................................................................................................

Ĉio spiris dolĉecon ĉirkaŭ la Hinda Pavilono, en kiu ni ĵus alvenis. Al niaj oreloj sonoris la mildaj invitoj por la nokta meditado. Tio estis la solena horo, kiam la Kolonio sin okupis per la komunikiĝo kun sia grandanima protektantino, Maria el Nazareto...

Miaj rememoroj ankoraŭ registris, ke en tiu vespero niaj preĝoj estis pli mildaj, pli humilaj, pli puraj...

# Ĉapitro IV
## **Denove Hieronimo kaj familio**

“Ve al la mondo pro la faliloj! ĉar estas necese, ke venu faliloj, sed ve al tiu homo, per kiu la falilo venas!

Jesuo-Kristo
**La Nova Testamento.**[1]

Ankoraŭ frue, Karlo de Canalejas venis al la Hinda Pavilono por nin forkonduki, kaj, post koregaj salutoj, diris al ni:

“– Miaopinie nia hodiaŭa programo devas komenciĝi de la Izolejo. Tie loĝas via amiko Hieronimo de Araŭĵo Silvejra, kaj vi profitos la okazon por fari al li la viziton, kiun vi de longe projektas. Li certe sentos sin konsolita de via ĉeesto kaj vi certe estos plenuminta dolĉan devon de solidareco kaj frateco.”

La Izolejo situis ne tre malproksime de la ĉefa konstruaĵo, en kies ĉirkaŭaĵo troviĝis nia loĝejo.

For de la vido etendiĝis la altebenaĵo, kie sidis la centro de tiu grava Departemento, envolvita en sia trista mortotuko el nebuloj. Laŭlonge de la irataj vojoj elstariĝis bedoj de lilioj kaj blankaj rozoj, verŝajne la floroj pli konformaj al tia melankolia retiriĝejo. Ni ricevis la impreson, kvazaŭ la Hospitala Departemento kaj tiu de Viglado estus bukolikaj kvartaloj de iu

[1] Sankta Mateo, 18:7.

granda urbo, kies eĥojn la distanco al ni ne permesus aŭdi. Kaj ni intime konversaciis, preskaŭ ne konsciante, ke ni ne plu estas homoj sed ja Spiritoj demetintaj siajn karnajn vestojn.

La direktado de la Izolejo, same kiel la traktado havigata al la pentintoj, egalis tiujn de la ceteraj vizititaj fakoj, nome ilin inspiris plej prava justeco, frata kaj amoplena karitato.

Efektive, trans tiuj grandegaj muroj, al kiuj ne mankis eĉ la baro de levponto, ricevis azilon tiuj niaj kompatindaj kolegoj, ĉe kiuj la doloroj truditaj de senkuraĝeco aŭ ribelemo superis la suferojn de l' pento pro la farita malbono. Ĉe tiuj afliktitaj, nekonsoleblaj koroj, la pento limiĝis al la neeltenebla, malĝoja konkludo, ke la memmortigo servis por nenio alia, ol plivastigi kaj plilongigi la suferojn, kiujn ili antaŭe opiniis neelporteblaj, krom ankaŭ havigi al ili interalie la senkuraĝigan, elrevigan konstaton, ke ili restas vivaj, sed apartigitaj for de ĉio, kion ili plej amas. Oni povas eĉ aserti, ke la Izolejo speciale destiniĝas al la sentimentalaj kazoj... ĉar estas sciate, ke la ekstrema sentimentaleco prezentas gravegan komplekson, estas morala malsano, povanta naski la plej bedaŭrindajn rezultojn. Ni tie efektive trovas la plej diversajn kazojn de sentimentala memmortigo, ĉe kiu la kondamniton skuas vera, kvankam senbrida, sento de la koro, ekde la amanto anhelanta pro pasio kaj ĵaluzo pri la feliĉo veninta al la ĝoja rivalo, ĝis la familiestro konsternita pro seneliraj malfacilaĵoj, aŭ la patro premata de malĝojo ĉe la ĉerko de tiu adorata estaĵeto, kiu estis la kialo de lia feliĉo!

Ĝenerala bedaŭro regis la etoson de tiu fako de la Hospitalo Maria el Nazareto. Senŝanĝe nekontentaj, ĝiaj gastoj prezentis la karakterizan signon de la homoj pri ĉio senrezignaciaj kaj senpaciencaj, kaj kiuj, krom tio, lasis sin regi de la doloro, sen provi ian penon por ĝin venki, prefere ĝin retenante ĉe si per la troigo de ia malsaneca kaj ridinda sento kaj serĉante novajn motivojn de suferado per pezaj memsugestoj, kiuj ilin senĉese venenadis.

La interna direkcio de la Izolejo, same kiel tiu de la Turo, estis konfidita al katolika pastro, ne al unu el tiuj ĉarmaj inicitoj, kiujn ni jam kutimiĝis vidi direktantaj la servojn de la Kolonio.

Cetere, la tuta skipo da internaj helpantoj konsistis el katolikaj religiuloj, escepte de la klinikistaro, kiu konsistis el inicitaj psikistoj. Malgraŭ tio, la plej gravan funkcion, nome tiun de direktanto, konsilisto kaj edukisto, okupis sacerdoto, sed li ankaŭ iniciĝis pri la altaj sekretaj doktrinoj, estas eminenta Spirito konkerinta distingindajn meritojn antaŭ la Leĝo, ĝuanta altan estimon ĉe la Legio de la Servantoj de Maria, kaj krome okupanta honoran rangon en la legio de sciencistoj, kiuj estris la Korektan Instituton Maria el Nazareto.

Tie la disciplino estis efektive monaĥa, ĉar estis urĝe, ke tiuj obstinaj nekontentuloj kaj ribelemuloj liberiĝu de sia altiriĝemo al la personaj mondumaj pasioj, al la malpuraj, kapricemaj forlogiĝoj, kiuj ilin ruinigis. Koncernis la institucion, kiu ilin gastigis, eduki ilin por rezignaciado en la malfeliĉo, por la definitivaj decidoj, por la neprokrasteblaj rezignoj, krom ankaŭ ilin repacigi kun la vera kristana kredo, kiun ili ĝis tiam rifuzis koni en la lumo de la ĝusta kriterio.

Ĉiuj ricevis edukon sur la Tero, bazitan sur la romkatolikaj principoj. En iliaj koroj kaj mensoj, en la religiaj konceptoj direktantaj iliajn pensojn, ne estis loko por aliaj principoj krom tiuj de la Romkatolika Eklezio, kiujn ekde la infanaĝo ili kutimis obei. Fanatikaj kaj kapricemaj sentimentaluloj, mense malvigligitaj pro la neglekta rifuzo rezonadi pri altaj temoj, ili miksis la malsanecajn, al ili esence proprajn antaŭjuĝojn kun la religiaj konkludoj de la katekismoj, pasie sin fordonante al ĉio, kion la katolikaj tradicioj penetrigis en la ne multe maturiĝintan intelekton de la homaro. Multaj eĉ ne havis ian difinitan kredon. Nekredemaj, eĉ malpiaj, ili neniam atentis la flankon religian aŭ dian de la aferoj. Kutimiĝintaj al la Eklezio pro malpenemo kaj tradiciemo, nur en ĝi ili rekonis la rajton gvidi konsciencojn, sufiĉan saĝon por plenumi la servojn de katekizado.

Estus do karitate, ke la reedukado de tiaj mensoj fariĝu en etoso identa al tiu, kiu al ili inspiris konfidon kaj respekton.

Tiucele, la pastro mem parolos al ili pri la Evangelio de Vero, por ke ili lernu, ke super ilia dogmema fanatikeco ŝvebas la eterna lumo de realaĵoj, kiujn ili bezonas agnoski por ĝuste adori la Kreinton! La pastro mem konigos al ili la astralmondan vivon, ilin instruos per observoj kaj eksperimentoj, forbalaante el iliaj cerboj tiujn stultajn supozojn, al kiuj ili malpeneme sin konformigis, kaj forŝirante antaŭ ilia kompreno la vualojn de la vera sciado, por ke ili proprasperte konkludu, ke tiel en la sino de la Religio kiel ankaŭ en tiu de la Scienco povos brilegi la flamo de tiu Fido, kiu kondukas la koron al la Supro, ĝin purigante per la ĉiam vigla Amo de Dio!

Eksciinte nian deziron revidi unu amikon tie internigitan, post la vizito, kies detalojn ni ne rakontos pro ilia simileco kun tiuj de la ceteraj vizitoj, Pastro Mikelo el Santeremo, estro de la komunumo, bonkore kaj ridetante ekkriis kun ĝojo:

"– Bone vi agis, venante ĉi tien, miaj filoj!... Mi vin dankas pro la amika interesiĝo pri iu sortkunulo tiel konsolbezona kiel ĉi tiu. Viziti malsanulon, rekuraĝigi per sia konsola ĉeesto la kompatindan malliberulon, kiu malĝojas pro la angoro el kruelaj rimorsoj, estas meritplena faro, aprobita de la Dia Modelo, amiko de malriĉuloj kaj senhavuloj... Hieronimo ekĝojos... Mi tuj sendos voki lin..."

Dum li parolis, ni en li rekonis la religiulon, kiu konsolis la ekskomerciston de vinoj en la memorinda vespero, kiam ĉi tiu vizitis sian familion antaŭ proksimume tri jaroj! Frato Teokrito, kiel ni certe memoras, kunvokis lin por helpi la ribelemulon, laŭ ties peto mem, kaj ekde tiam Hieronimo restis sub la protekto de tiu kompetenta konsilisto.

Dum ni atendis la ĉeeston de nia malfeliĉokunulo, la direktoro de la Izolejo klarigis:

"– Via amiko eniras transiran fazon, preparan al lia resaniĝo.

La cirkonstancoj, kiuj lin ĉirkaŭas, vidigos al vi la tipon de la ceteraj internuloj de nia edukejo, ĉar la Izolejon interesis tiuj kazoj havantaj plimalpli la saman originon, kiel ja okazas en la ceteraj servoj de nia Institucio.

Venkinte la apation, al kiu lin puŝis liaj senutilaj ribeloj, rezultintaj el korŝiraj elreviĝoj, li estos preparita por ripeti la travivaĵojn, ĉe kiuj li fiaskis.

Li nun sin trovas sub severa prizorgado, kiel ĉiuj al ni konfiditaj, ĉar lia perispirita envolvaĵo, same kiel lia menso, bezonas profundan kuracadon. La kuracistaron komisiitan por servado en ĉi tiu fako koncernas la traktado de la unua, kiu resume konsistas en specialaj magnetismaj aplikoj; sed la duan, nome la menson, ni traktas per procedoj inspirataj de la statuto de nia Legio, kiu ĉi-okaze aplikas la reedukadon, ekskluzive moralan kuracadon, ĉar la malbono, kiu malfeliĉigas Hieronimon, same kiel tiu, kiu vin turmentas, malaperos nur per la individua reboniĝo de la paciento, kaj tion li mem efektivigos en sia interno...

La malsaneca pasio, kiun li malprudente nutris por la edzino kaj la filoj, servis kiel instrumento por la gravaj kulpelpagoj de liaj karuloj, laŭ la debetaj registroj de la Leĝo de Justeco, kiu regas la homajn destinojn! Hieronimo amis egoisme, malmodere, fermante sian koron kontraŭ ĉia ebleco de helpo, kiun al li povus havigi la prudento kaj la klara rezonado... kaj, kiel vi certe scias, ni devas ĉiam konscii, ke eĉ ne siajn proprajn filojn, la homo devas ami kaprice, laŭ la blindaj impulsoj de la pasio!

Certe lia sindono al la familio havigos al li meriton antaŭ la Superega Leĝodonanto. Sed pli honoraj estus liaj laŭroj se li estus inicinta siajn karulojn en la veran kulton al Devo, anstataŭ esti ilin regalintaj per lukso kaj mondumaj ĝuoj, neglektante ilian moralan edukadon, kio ja devintus esti lia unua zorgo, eĉ se li baraktus kontraŭ la batoj de malfavora malriĉeco, ĉar ĉiuj kreitoj de la Sinjoro estas utilaj kaj ĝuste por helpi ilian progreson kaj

bonan edukon Dio havigas la patran aŭtoritaton al la enkarniĝinta homo. Se li tiele agus, plenumante la sanktan devon de honesta kaj antaŭzorgema patro, Hieronimo evitigus al si la amarecon de embarasaj situacioj, pri kiuj li respondecas pro sia drama memmortigo... Jen li alvenas... Li mem rakontos interesajn aferojn...”

Tiel ja okazis. Akompanate de religia helpanto nomata Frato Ambrozio, la ekskomercisto el Porto eniris la ĉambron, en kiu ni lin atendis, kaj emocie sin ĵetis en niajn brakojn.

“– Dankon, karaj amikoj! – li ekkriis – ke vi tiel ĝentile memoris mian humilan personon! Via vizito min dolĉe kortuŝas! Se vi scius, kiel teruraj estas miaj afliktoj!...”

Ni lin korege brakumis, esprimante dezirojn por lia persona feliĉo, ĉar ĝis tiam ni nenion alian kapablis esprimi aŭ deziri al amikoj.

Al ni ŝajnis, ke Hieronimo multe ŝanĝiĝis. Ni renkontis lin serena, kun manieroj penetritaj de ĉarma ĝentileco, kian ni antaŭe ne trovis en li. Kaj ni pensis, ke la Izolejo, sub la direktado de virtoplenaj Spiritoj de malnovaj pastroj, certe havas la mision ankaŭ altigi la nivelon de la societa bonedukiteco, laŭ sia karaktero de morala internulejo!

Ni ardis el la deziro pridemandi la malonovan samsortanon el la Sinistra Valo, rikolti novaĵojn pri liaj malfeliĉaj filoj, kiuj, envolvitaj en la morno de larmoj kaj suferoj, restis sur la Tero. La timo agi maldiskrete tamen nin detenis, kio plilongigis la silenton post la salutoj. Sed la mentoro Santaremo, konante la sincerecon de niaj motivoj, kondukis nin al feliĉa oportuno.

“– Ni parolis pri vi, kara Hieronimo... Viaj amikoj deziras ekscii, ĉu vi sentas vin pli bonfarta kaj konsolita en la amo de Dio, ĉar ili baldaŭ forveturos en alian regionon de nia Kolonio. Veninte por adiaŭi vin, ili tre dezirus kunporti la impreson, ke ili lasas post si amikon sur la vojo al vera reboniĝo...

Ni aplaŭdis, konfirmante tiujn asertojn per la instigo, ke al li mem ni nin montras rezignaciintaj kaj esperplenaj por la estonteco, kaj ni aldonis:

"– Protektate de amikoj tiel sindonaj kiel tiuj, kiujn ni trovis ekde kiam oni venigis nin ĉi tien, ni sentus nin eĉ feliĉaj, se ne kruelaj estus la suferoj, kiuj nin persekutas pro la malhonoro, per kiu ni malnobligis al ni la animon..."

La malnova kunulo mallevis la frunton kun kortuŝa humileco kaj denove parolis:

"– Vi pravas, miaj karaj amikoj! Ja estos eble! Al ni estos eble atingi la kompletan kvietiĝon per submetiĝemo kaj fido, kiuj nin kondukos al rezignacio... Sed mi ne kredas, ke ni povos frue fariĝi feliĉaj, ĉar ne per memmortigo la homo renkontos tiun diinon Feliĉo, kiu des pli malproksimiĝas ju pli grandaj estas la ribelemo kaj la necedemo de la koro, kiu ĝin aspiras! Mi ja deziris, ke la memmortigo por eterne estingu mian memon. Sed tiel ne estis!... Kaj ĉar tiel ne estis, mi komprenis, ke al mi restus nur kurbiĝi antaŭ la neeviteblo alfrontante rezignacie kaj kuraĝe la amaran situacion, kiun mi mem estigis! Mi ŝuldas al la bonvolemo de Frato Santaremo, al liaj konsiloj kaj al la vere providencaj reguloj de ĉi tiu edukejo, la aliiĝon, kiu en mi fariĝas. Kiel vi, ankaŭ mi trinkis el la suferkaliko, englutis multajn amaraĵojn elkriante blekojn de malespero kaj blasfemojn de damnito! Sed hodiaŭ mi sentas, ke mi estas alia persono, kiun la fido al la amo de la Superega Estaĵo relevis el la ruinoj de plej pereiga nekredemo, ĉar tia nekredemo portis la maskon de la hipokrita falsa fido, de la ŝajna virto, kiuj sin esprimis per konvencia parademo, kiu, kvankam plaĉa al la socio, tamen ne utilas eĉ por konvinki tiun, kiu ilin ŝajnigis, des malpli por fari lian animon merita antaŭ la Kreinto!...

Mi iel povus esti feliĉa, miaj amikoj, sub la prizorgado de tiuj noblaj, bonegaj instruistoj, konsolita, kia mi efektive estas, de ilia senlaca karitato, konvinkita ke min koncernas luktoj kaj

devoj, preta ilin konscie alfronti. Sed el mia krimo rezultis doloregaj sekvoj, sekvoj de vasta amplekso, kiel por mi tiel ankaŭ por la miaj! Mi vidas min superŝarĝita per neperfektaĵoj... tial mi tute ne povas senti min ĝoja ie ajn, ĉar viva kaj arda pento turmentas miajn horojn, postulante tujan elpagon por ke sereneco denove regu mian koron kaj tiel permesu al mi fari novajn, honorajn kaj noblajn entreprenojn... nome ĝuste la malon de iamaj faroj!

Mi devas konfesi al vi, ke, kiel komercisto bankrotinta, ruiniĝinta, trompinta la konfidon de honestaj firmaoj, kun kiuj mi tenis rilatojn, de bankaj institucioj, kies honorindecon mi ne sufiĉe ŝatis, kaj eĉ de la urbaj aŭtoritatoj, ĉar grandajn malprofitojn mi kaŭzis kiel al fisko, tiel ankaŭ al la dogano, pro tio, ke mi ne malofte kontrabandis – mi devas konfesi, ke pro ĉio ĉi mi forte hontas, ĉar mi faris nenian klopodon por honore eliri el tia reto el malnoblaĵoj; mi tiel hontas, ke mi likvidis tiajn ŝuldojn, min kaŝante sub la makabra iluzio de la memmortigo, ke ruĝeco malaperos de sur mia vizaĝo nur tiam, kiam mi povos denove esti komercisto, por ilin elpagi persone, digne kaj honeste! Ho miaj amikoj, kielan hontegindaĵon mi faris antaŭ la socio! Mi ŝuldas kaj ne pagis! Mi fraŭdis la sanktegajn rajtojn de la Patrujo, de la benata lando, en kiu mi vivis! Mi havas ŝuldojn nelikviditajn, pagotajn pruntojn, kaj multajn, tre multajn debetojn kaj bilojn!... kaj nenion mi ĝis nun elaĉetis! La pezo de tiu malhonoro faris el miaj tagoj senĉesan turmentadon, sen paroli pri la malfeliĉoj, kiuj pro mia malzorgeco trafis miajn filojn!...”

“– Sed feliĉe la Leĝo de Saĝa Providenco havigas al la erarinta Spirito honorajn rimedojn, por ke li liberiĝu de tiel ĝenaj kaj hontigaj situacioj, kiel ĉi tiu, kaj Hieronimo, en ne malproksima estonteco, povos elpagi siajn ŝuldojn, reakiri la aprobon de sia konscienco, travivante novajn spertojn kaj oportunojn dank' al la reenkarniĝo, kiu al ĉiu estas donita kiel rimedo de progreso kaj rehonorindiĝo... kaj li sentas sin tre

kuraĝigita por la nova migrado...”– interhelpis frato Santaremo, haltigante tiun korelverŝon humiligan por la parolanto.

“– Mi estas tre ĝoja, ke mi vidas vin konsolita kaj preta elbatali honoran venkon, kiu forkaŝu de vi la sengloran vidon de tiu gravega falo, kiu ankaŭ vin trenis en la malfeliĉon, amiko Hieronimo!... La ĉielo voju, ke centobliĝu la fortoj de via animo, same kiel la miaj multobliĝas ĉe ĉiu nova frapo de mia doloro... ĉar ankaŭ mi sentas min kuraĝigita por la plej krudaj travivaĵoj, se nur formalaperos de miaj intimaj vidaĵoj la tragika fantomo de la rimorsoj pro mia monstra krimo”– vibre parolis Mario Sobral, kiun ekskuis impresa tremo, pro kiu liaj manoj agitiĝis, kvazaŭ li penadus por forskui de ili ion, kio lin ĉagrenus kaj afliktus.

“– La preĝado, kiun mi lernis praktiki, el ĝi farante bonfonton nepre necesan al mia kompatinda animo, gvidate de la fekundaj admonoj de Frato Santaremo – daŭrigis la ekskomercisto el Porto –, la fervoraj petegoj, kiujn mi lernis adresi al Maria – nia Patrino kaj Gvidantino – havigis al mi la bezonan paŭzon por rekolekti la pensojn dispelitajn de la malespero kaj ilin fikse teni ĉe klara rezonado... kaj tio estis la ora ŝlosilo por solvi multajn problemojn, kiujn mi rigardis nesolveblaj...

La antaŭvidita sorto de miaj malfeliĉaj filoj, kiuj mi tiel multe amis, la konduton de Zulmira, kiu sin prostituis kaj senhonoriĝis – nekapabla, kiel mi, sinoferi al Devo, por honeste venki la malfacilajn cirkonstancojn de la mizero – estis faktoj, kiuj min konsternis ĝis frenezo kaj blasfemado, aliigante mian animon en sovaĝan, rabian kondamniton, kian ne egalus afrika sovaĝbesto! Sed la preĝo, humila kaj konstanta, kiel rekomendis la bona konsilanto, korektis tiun anomalion; kaj, iom post iom, mi reakiris prudentoklarecon, kaj al mi ŝajnis, post kiam mia animo sereniĝis, ke mi restis dum jarcentoj droninta en la abisma mallumo de la neprirespondeco! Sed eĉ tiel, la situacio de miaj filoj, kiel vi certe memoras, kaŭzis al mi nekonsoleblan suferadon!...”

Ĉe la flamo de tiuj elvokoj, Hieronimo revigliĝis. Nia grupo restis tre atenta, en agordita vibrado kun la rakontanto. Kaj tiel vivaj kaj sugestiaj estis la koloroj, per kiuj li sciis priskribi la lin koncernantajn okazaĵojn, tiel ardaj estis la esprimoj elsenditaj de la vibroj, per kiuj li tradukis la subtilaĵojn de la memoro, ke ni kredis revidi kun li la rakontatajn epizodojn. Kaj ni ilin prezentos al la leganto, kvazaŭ ni ilin estus efektive ĉeestintaj.

"– Iun tagon, ĉe vesperiĝo, – plu diris la malliberulo de la Izolejo –, mi troviĝis preskaŭ tute sola, malĝoje vagante sur la melankoliaj stratoj de tiu vastega parko, kiun vi nun vidas... Proksimiĝis la dolĉa, emocia momento de la Anĝeluso. La religia pieco – konsolo kaj espero de l' senrimedaj malfeliĉuloj – subtile penetris la plej profundajn angulojn de mia memo, portante mian penson al la patrina sino de Maria, plej bonkora Patrino de l' pekuloj kaj afliktitoj... Vi certe scias, ke la momento, kiam oni salutas Marian, estas fidele respektata de ŝiaj legianoj, memorata per sinceraj elmontroj de danko en tiu ĉi Kolonio, kiu fondiĝis, kreskis kaj donis bonegajn fruktojn de amo kaj karitato, – por tiel uzi la esprimojn, kiujn mi aŭdas de miaj bonkoraj instruistoj –, sub la nobla ŝirmo de ŝia protektado.

Ankaŭ strebante al enmemiĝo, mi eksidis sur la herbotapiŝo. Kun la koro pulsanta je fido, mi atendis la solenan momenton de la preĝo, kiun tuj anoncis dolĉaj melodioj, etendiĝantaj de la Templo ĝis la plej foraj lokoj de ĉi tiu loĝejo – eĥoj de la vibroj de la plej altaj estroj de ĉi tiu Kolonio, komunikiĝantaj kun la superaj spiritaj sferoj – por tiel ankoraŭ uzi la esprimojn de la mentoroj de ĉi tiu domo...

Ĉi-foje mi preĝis, kiel neniam antaŭe mi faris! Mi petegis la amoplenan Patrinon de nia Elaĉetinto pri helpo kaj korfavoro al miaj filoj! Ke ŝi propetu Jesuon, Nian Sinjoron, ke Li protektu la kompatindajn infanojn, kiujn mi forlasis al la senkompataj batoj de la malfeliĉo! Mi nomis Gretan, mian plej junan filinon, ĵetitan en la koton de la strataj kloakoj pro la orfeco, en kiun ŝin pelis mia memmortigo! Mi memoris Albinon, ĵetitan, ankoraŭ

junaĝan, en karceron pro tio, ke li ne havis patron, sufiĉe dignan por malfermi al li vojojn per nobla orientado, ĉar mi! mi! kiu estis lia patro, kiu antaŭ Dio kaj la socio min devontigis al la nobla misio de patreco, mi senhonoriĝis kaj lin senhonorigis per la malbonaj ekzemploj, postlasitaj kiel sola kaj malvirtiga heredaĵo! Mi kripetegis pri ŝia patrina interveno en la afliktan situacion de ambaŭ eĉ se pro tio miaj suferoj devos daŭri nedifinitan tempon! Mi proponis al ŝi, kiel ateston pri mia danko pro ĉia ajn bonfaro, kiun ŝia dolĉa Patrina kompatemo havigus al ili, la rezignon pri ili, ĉar mi bone komprenis, ke mi ne meritas la sanktan mision de patreco! Mi de ili por ĉiam disiĝus, se tio estus necesa... sed kondiĉe ke Greta, sub ŝia patrina protekto, estu forkondukita el la Ribejra Kajo kaj Albino ne konduku sian malesperon ĝis enfalo en memmortigon, ke li prefere rezignacie elportu la karceron, la ekzilejon, kie li poste – kiu scias? – povos rehonorindiĝi!...

Frato Ambrozio, gardisto komisiita kolekti nin ĉe noktiĝo, trovis min banata en larmoj. Plian fojon mi rakontis al li miajn malfeliĉojn, lin sciigante pri la petegoj, kiujn mi ĵus adresis al Maria. Li diris al mi dolĉajn konsolajn frazojn, plenigante per esperoj mian dolorantan koron, kaj dum li min afable subtenis por la reveno al la komunumo, li konklude admonis:

"– Vi devas persisti en viaj petegoj, mia kara Hieronimo! Faru tion fervore kaj kuraĝe, energie altigante, kiel nur eble, la gradon de via vibrado, por ke viaj petoj, kiuj nun estas tre pravaj, harmonie reeĥu en la superaj spiritaj sferoj, kie brilas, elradiante florojn de helpon kaj benoj, la amoplena karitato de la dolĉega Gardistino de nia Legio. Sed mi ankaŭ konsilas al vi la komunan preĝadon, kiu unuigus viajn pensojn al aliaj mensoj, por ke viaj fortoj, ankoraŭ senspertaj, revigliĝu kaj kresku ĉe la fervoro de aliaj koroj... ĉar via nuna preĝado estas tre grava en sia karaktero de mesaĝo adresita al Maria... Pri tio mi informos nian bonkoran konsilanton."

Efektive, en la sekvinta mateno Frato Mikelo el Santeremo faris al mi diskretan viziton, invitante min partopreni, kune kun aliaj afinaj kolegoj, en liaj privataj kunsidoj, por ke ni, en frata unuiĝo, petu la favorojn, kiujn mi deziris koncerne tiujn faktojn min plej afliktantajn, ĉar estas ja juste, ke ili min helpu, ne nur pro tio, ke mi estas disĉiplo en la internulejo sub ilia direktado, sed ankaŭ ĉar, super ĉio alia, estus karitate helpi la suferanton, devo, kiun ili ĝoje plenumos pro la justeco de miaj aspiroj rilate al miaj karuloj.

Kaj tiel ja okazis.

Sub murmurantaj frondaroj, en iu izolita angulo de la vastega parko, kiam la melodioj de la ĉiutaga saluto al Maria envolvis per mildaj sugestoj la harmonian kvietecon de la vesperkrepusko, Frato Santaremo altigis sian fidelan penson kaj humile transsendis per sentoplenaj preĝoj mian peton al la ĉiela Sinjorino. Tiel, mi plurfoje lasis mian animon treniĝi sur la luma vojo strekita de la virtaj mensoj de miaj bonegaj konsilantoj, kaj mi sekvis, kun fervoraj konfido kaj espero, la esprimojn, kiujn el la profundo de siaj koroj ili eldiris por mia bono. Tiuj simplaj kaj dolĉaj kunvenoj, farataj en granda sekreto, sinsekve ripetiĝis, bonfaraj kaj varmaj, kelke da fojoj. La karmemoraj nomoj de miaj filoj tie estis ĉiutage eldirataj! Kaj kiel konsole estis al mia kortuŝita Spirito aŭdi, ke al ili karitate aludis tiuj amemaj sekvantoj de la indulgema Majstro kaj Sinjoro, kiu, eĉ levita sur la malhonora kruco, klopodis por regeneri la pekulojn, kompatante iliajn grandajn mizeraĵojn!... Kaj dolĉa espero, humila pacienco, respektema rezignacio penetris ĉiujn angulojn de mia memo, kiel sunradio anoncanta halelujan en la angoraj mallumoj post ŝtorma nokto!

Post paso de kelkaj tagoj, mi havis la surprizon esti vokita al la kabineto de la Frato Direktoro. Mi prezentis min maltrankvila kaj kortuŝita, ĉar jam de multe da jaroj mi kutimis rigardi ĉion ĉirkaŭan kiel ĉagrenojn. Sed la Direktoro min tuj trankviligis, montrante al mi malgrandan pergamenrulaĵon, ian specon de

"papiruso" strukturita per radioj de kunpremita lumo, kaj min samtempe informante pri la afero:

"– Antaŭ ĉio, kara Hieronimo, danku la Sinjoron Ĉioindulgan kaj Ĉiokompateman! Viaj preĝoj al Maria renkontis sukceson antaŭ la eternaj kaj seneraraj leĝoj!... Jen ĉi tie la respondo de nia Aminda Sinjorino kaj Gardistino, kiu, honore al sia Respekteginda Filo, konsentas la intervenon, pri kiu vi petegis Ŝin!... De la templo, kie servas la direktantoj de nia Kolonio, kaj kien venas la instruoj de la Plejsupro, niaj gvidantoj sendas ĉi tiujn instrukciojn, iaspecan programon celantan viajn filojn Albino kaj Margareta... Ĉar ĝi jam portas la subskribon de Frato Teokrito, ni ankoraŭ hodiaŭ povos komenci la taskon..."

Konsternita pro la neatenditeco de la novaĵo, mi en tiu momento nenion respondis, sed lasis mian animon tuj esprimi, en la kaŝiteco de la penso, mian dankon al la Dio Bona, al la Dio Korfavora, kiu senprokraste permesis la kontentigon de miaj tiamaj plej fortaj deziroj!

Mi prenis al lumbrilan pergamenon, ĝin plurfoje turnadis en la manoj, ne kuraĝante malruli ĝin. Sed la direktoro mem, per la boneco esence propra al li, donis al mi sian helpon, ĝin zorgeme disvolvante...

Temis pri kvar apartaj folioj, kiuj en liaj manoj stellume scintilis. Per bluaj literoj, kvazaŭ la iluminitoj de l' Templo utiligus filamentojn de la blua ĉielo por transigi la sublimajn inspirojn, kiujn ili ricevis por bonfara helpo al la suferantoj, esprimiĝis la ordonoj de la Grandanima Sinjorino celantaj definitan helpon al mi!

Estis decidite, ke mian kompatindan Gretan, kiel ankaŭ Albinon, oni alkonduku al urĝahelpa servo tenata de ĉi tiu Instituto, sur la Tero, aŭ en ties proksimeco, por ke ambaŭ submetiĝu al speciala magnetisma kuracado celanta la psikan reekvilibron de la nerva kaj mensa sistemoj, ĉar ĉi tiuj streĉe implikiĝis en la dornoj de la malvirta medio, en kiu ili vivis, kaj difektiĝis pro la intenseco de l' batoj en la luktoj, kiujn ili tenadis

en la ĉiutaga elprovado. Ke la kompatinduletoj ankaŭ ricevu konsilojn, admonojn, instruojn, ĉar kion ili la plej multe bezonas, tio estas la lumigado de la propra memo. Kaj ke ambaŭ estu envolvitaj en karitata vibrado de amo, simpatio kaj protekto, ĉar la Superega Spirita Mondo prenos sur sin la respondecon estigi la kondiĉojn favorajn al la okazaĵoj...

Sed mi devas konfesi al vi, bonkoraj amikoj, ke mi ĝis nun tre malmulte komprenas tiajn aferojn... Mi ilin rekontas, kiel iu, kiu scias pri fakto, ĉar li ĉeestis ĝin, sen tamen havi kapablon por la necesa analizo...

Koncerne Marietan kaj Arindan, mi trankviliĝu: – ambaŭ estas honestaj, laboremaj, kaj estas alkonformiĝintaj al siaj situacioj. Oni tamen klopodu por helpi la malfeliĉan edzon de la unua – *por kiu mi ne preĝis dum miaj fervoraj petegoj,* sed kiun ne forgesis la Aminda Patrino de la Sinjoro Jesuo –, ĉar li fariĝis sklavo de malsuperaj forlogiĝoj, kiuj lin transformis en hejman tiranon. Streĉan vigladon oni tenadu ĉirkaŭ li, ĉar li obeeme cedos al ĉia bonfara influado. La Spiritojn, kiuj lin obsedas, oni malliberigu kaj alkonduku al siaj respektivaj spiritaj komunumoj... kaj ĉio tio havigos al li novajn helpojn kaj oportunojn...”

“– Ni vidas, ke tre malfacila estas la laboro komisiita al la Izolejo, de ĉiuj el vi postulanta plej streĉajn klopodojn kaj ĉiam pli grandan bonvolemon – interrompis Roberto de Canalejas, kiu ankaŭ videble interesiĝis pri la afero. – Ĉu vi jam komencis tiun rebonigan agadon?...

Frato Santeremo, al kiu li sin turnis, ridetante alpaŝis kaj kontentigis ĉies pravan scivolon.

“– Jes – li diris –, kaj kun tre bonaj sukcesoj, ĉar la Patrino de la Patrinoj mem aŭspicias tiajn regenerajn okazojn... kies bonegajn sekvojn ni klare antaŭvidas...”

“– Mi vin petas, Frato Santeremo, klarigojn pri la plenumado de tiel dorna kiel nobla tasko”– rediris la juna doktoro.

"– Plej plezure, mia juna amiko, ĉar ni konstatas, ke ni parolas al sinceraj, noblaj amikoj, kiuj eĉ povos nin helpi per sia frata simpatio...

Kiel nepre devus okazi – plu parolis la nobla religiulo –, mi prenis sur min la direktadon de tiu entrepreno, laŭ la ordonoj de la Frato Direktoro de la Departemento, estante certa, ke la interveno de nia nobla Protektantino, same kiel la grandanima helpo de niaj superuloj en la Templo, ne forlasos nin al la nedecidemo de nia neperfekteco.

En tiu mateno mem, al la direkcio de la Departemento estis sendita peticio pri komisio de volontuloj por la malfacilega entrepreno, ĉar vi certe scias, ke en nia fako la partopreno en tiaspecaj taskoj ne estas deviga. Kiuj laboros en la eksteraj servoj, tiuj sin memvole prezentos, respondante al la anoncata speciala alvoko... ĉar cetere ja ĉiuj servantaj en nia Kolonio estas volontuloj...

Ricevinte senprokrastan konsenton, mi amike traktis kun la altvaloraj kunlaborantoj, kiuj sin prezentis, ĉiuj havantaj intereson kaj bonvolon por la afero de Bono. Estis decidite ke, antaŭ ol pretigi la definitivan planon, ni vizitos la koncernajn personojn por studi ĉiujn flankojn de la afero kaj ilin kompari kun niaj ebloj. Tiele ni agis ĝis la nokto de la tria tago, kiam post la omaĝo, kiun ni en ĉiu tago plej dankeme faras al nia Gardistino, ni ĉiuj kune forveturis direkte al la Tero...

Estis la plenluno. La dolĉa, melankolia lumo de tiu humila fratino de la Tero verŝis mildan helon sur la tristajn vojojn de la malsupera transmondo, kiujn ni devis trairi. Por la vojaĝo ni uzis la malrapidan levitacion, ĉar la pezaj reginoj, de ni trapasotaj, neebligus rapidecon, krom se ni farus grandan penon, kio neniel konvenus, ĉar ni bezonus energiorezervojn por la plenumotaj servoj.

Ho miaj karaj amikoj! – daŭrigis la malnova sacerdoto kun neesprimebla dolĉeco. – Ni ne povis nin deteni de emociskuo, vidante la konturojn de la malnova urbo Porto, envolvita en la

vualoj de la atmosferaj ondoj, kiuj faris ĝin kvazaŭ inundita de subtila torento de maldensaj fumnebuloj antaŭ niaj okuloj de Spiritoj, por kiuj la vakuo estas sencomanka vorto!

Nia klera frato, Grafo Ramiro de Guzman, kiu, kiel vi scias, estras la misiajn ekspediciojn ekster nia Kolonio kaj kiu, kiel ĉiam, estis la volontulo kiu unua pretis akcepti nian alvokon al tiu ekstra tasko, regalis nin per eta ekskurso tra la urbo, kiun ni tiel multe amis, ĉar ankaŭ li vivis en Porto, loĝis sub tiuj amikaj tegmentoj, kies firstojn kaj fenestrajn vitraĵojn ni nun distingis, kisataj de la mildaj scintiloj de la lunlumo...

Ni serĉis Margaretan Silvejra en la ĉirkaŭaĵoj de la Ribejra Kajo. La amika Doŭro milde plaŭdis, kaj ĝia poezieco reaŭdiĝis en niaj oreloj de portugaloj, por kiuj la dolĉaj rememoroj pri la malnova naskolando – kiu denove estos nia naskolando en sekva reenkarniĝo – ankoraŭ ne estingiĝis, malgraŭ nia longa restado en la Spirita Patrolando, nome la Spaco!...”

“– Kaj Hieronimo sendube partoprenis en tiu grava ekspedicio, ĉu ne?!...”– mi scivolege demandis.

“– Ho ne! Tio ne estus prudenta! Ni devis evitigi al li la ĉagrenon de kruelegaj realaĵoj... kaj krom tio Hieronimo, anstataŭ helpo, estus al ni vera malhelpo...

Sed mi detenos min, karaj amikoj, priskribi la malĝojigan scenon, en kiu Greta ludis la ĉefan rolon! Vi tamen prezentu al vi unu el tiuj fidomoj por diboĉo kaj malĉastado, da kiuj bedaŭrinde tiom multe ekzistas sur la Tero, klasigitan de la polico kiel lastrangan, kvazaŭ povus ekzisti fikutimoj malpli hontigaj ol aliaj! Imagu la tie regantan senpudoron, la diboĉon, la obscenajn forlogiĝojn de la instinktoj malaltigitaj kaj malnobligitaj de la morperverseco – kaj vi faros al vi palan ideon pri la infero, el kiu ni devus forpreni Margaretan Silvejran – ĉar tion ordonis la Superaj Spiritaj Sferoj kiel respondon al niaj petegoj!

Sed kiel ni tion efektivigu?

Ĉe la bedaŭrindaj scenoj antaŭ niaj okuloj, angorplena abomeno provis superregi niajn animojn, por kio ni bezonis

vigladi per mensa komunikiĝo kun niaj direktantoj el la Templo kaj el la Plejsupro, por ke niaj voloj ne malfortigu la mision.

Torturata per kruelaj brutalaĵoj, insultata de l' malhonorado, katenita al la mizera trunko de situacio nesolvebla por ŝia sensperteco, Greta aperis al ni kiel la granda viktimo de iu nova Kalvario, kie ankaŭ mankis la kuraĝigo, la helpo de bonaj koroj, kiuj pretus al mildigo kaj konsolado! Ni vidis ŝin, malgraŭ ŝia intima abomensento, kiun ni ja tuj rekonis, submetita al la fiaj kapricoj de senkompataj turmentantoj, kiuj devigis ŝin drinki glasegojn da vino, ŝin kruele toksante kaj ebriegante! La mizera virino, duonnuda, ĉar ŝiajn vestojn, sorbigitajn de vino, disŝiris la brutalaĵoj trudataj de ŝiaj turmentantoj; kun taŭzitaj haroj kaj freneza rigardo pro la alkoholaj deliroj; kun buŝo ŝaŭmanta, tordita de ridindaj grimacoj, ankaŭ estis devigata danci laŭ la sono de tedegaj gitaroj, kantante plej furorajn kanzonojn por amuzi siajn malnoblajn turmentantojn. Sed ne povante konvene ludi tiun rolon por sia bedaŭrinda stato, ŝi estis senkompate vangobatata de tiu, aŭ alia persono, dum la samaj brutalaj manoj ĉiam ankoraŭ disŝiradis ŝiajn vestojn.

Memorante, ke la instrukcioj, ricevitaj el la Plejsupro, rekomendis, ke ni urĝe forprenu la kompatindan junulinon el tiu fimedio, mi senhezite faris tujajn disponojn, uzante ekstremajn rimedojn.

Al lernanto de la Viglado, kiun mi prenis kun mi, ĝuste unu el tiuj, kiuj komencis sian memregeneran ekzercadon per bonfaraj servoj al la proksimulo, mi montris la mizeran junulinon kaj diris al li:

– Estos necese ŝin forpreni de ĉi tiu loko... La Supera Spirita Mondo rekomendas tujan helpon al ŝi... Dormigu ŝin, mia amiko, utiligante, per forta magnetisma malŝargo, fluidecajn elementojn de la ĉeestantoj... Faru, ke ŝi aspektu grave malsana... kaj senprokraste forpelu tiujn fiulojn, kiuj ŝin kruele traktas...

Tiu lernanto scipovis agi kun ia lerteco, malgraŭ siaj modestaj scioj kaj sia malgranda morala progreso. Antaŭ ne

longe li estris legiojn kontraŭajn al Bono kaj Amo. Sed de kelka tempo li konvertiĝis al sincera lernado pri Lumo kaj Vero kaj nun fariĝos obeema laboranto, sub la gvidado de noblaj Spiritoj kapablaj konduki lin al kompleta regeneriĝo. Tiuj Spiritoj helpis lin ne nur instruiĝi sed ankaŭ morale altiĝi, kaj cele al tio ili donis al li la oportunon de rehonorigaj servoj. Li nomiĝas Ozorio kaj memkompreneble ankoraŭ troviĝas sub nia prizorgado. Iam li vivis en la brazila internlando, kie li praktikadis afrikajn ritojn kaj magiojn.

La rezulto el mia ordono senprokraste aperis.

Alproksimiĝinte al la kompatinda fiŝvendistino de la Ribejra Kajo, li ĉirkaŭbrakis ŝin ĉe la genuoj, kvazaŭ li lin lazus. La kompatinda junulino ekŝanceliĝis kaj apogis sin sur proksima benko. Preskaŭ seninterrompe tiu sama "emanaĵfluigo" ripetiĝis ĉe la brusto kaj, tuj sekve, ĉirkaŭe de la frunto, ĉe la tuta kapo! Greta peze falis sur la plankon, kaptita de impresaj konvulsioj, kaj, almetante la manon sur la bruston, ŝi plende ĝemadis. Sen interrompi la taskon al li komisiitan, kaj dum mi disdonis aliajn rekomendojn al la ceteraj volontuloj, Ozorio alproksimiĝis al unu el la kunmanĝantoj perpleksigitaj de la incidento kaj flustris ion en lian orelon kun varmo kaj emocio, celante sukcesi en sia tasko. La homo teruriĝis kaj kun timego ekkriis, estigante nepriskribeblan panikon inter la diboĉuloj:

– Ho ve! La kompatinda mortas pro nia kulpo!... Ni forkuru, antaŭ ol aperos la policanoj!...

Kunpuŝiĝante, ili tumulte elpafiĝis, lasante la malfeliĉan viktimon de tiom multaj brutalaĵoj sub la dependeco de la probablaj karitataj sentoj de la mastro de tiu fidomo.

Efektive, Margareta konvulsie baraktadis, kvazaŭ ŝi agonius. Celante bonfari al ŝi per la tiumomente disponeblaj balzamoj, mi kaj miaj sindonaj helpantoj ĉirkaŭis ŝin. Necesas tamen rimarkigi, ke nek mi nek miaj helpantoj estis eĉ perceptataj de ŝi aŭ de la ceteraj ĉeestantoj en la materia sfero, ĉar nia stato de elkarniĝintaj Spiritoj faris nin nevideblaj por ili.

Dume la junulino suferis la nervan efikon de tiu kruda magnetisma malŝargo, ja necesa pro ŝia bedaŭrinda stato. Kortuŝitaj de ŝia suferado, ni aplikis kvietigajn balzamojn. Iom post iom ŝi kvietiĝis kaj perdis la konscion, sed ĉiam ankoraŭ restis sterniĝinta sur la ŝtonplanko de la diboĉejo, kaj dume la drinkejmastro, terurita pro la okazaĵo, sendis voki kuracistan helpon kaj petegis por ŝi liton en la domo, ĉar necesis kaŝi la veron koncerne tiun aferon tial, ke, pro la eksterleĝeco de sia komerco, li ne volis implikiĝi en policajn aferojn.

Kio koncernis nin, la servantojn de Maria, ni deziris, ke ŝi restu en hospitalo, tute ne en karcero! Tial ni malebligis la ĉeeston de policanoj kaj samtempe klopodis serĉi la helpon de iu kuracisto, kies karitato inspirus al ni konfidon.

Post kelkaj minutoj alvenis la kuracisto, kiu, trovinte ŝin grave malsana pro la forta alkohola toksiĝo, faris homamajn disponojn, ĉar ni lin envolvis en harmonia fluo de kompatemaj sugestoj...

Kaj tiel, kiel ni deziris kaj ja estis necese, post la dramecaj ombroj de tiu decida nokto, la filino de ĉi tiu nia zorgato eniris en modestan hospitalon kie estis sufiĉa kompatemo por gardi ŝin dum la tempo kiam ni, gvidate de la noblaj inspiroj de Maria, klopodos por antaŭzorgi ŝian estontecon...”

“– Se nia Hieronimo ne devis partopreni en la ekspedicio, ĉar oni volis ŝpari al li la ekscion pri tiel doloraj amaraĵoj, kial li estas informita pri la okazaĵoj?!... Ĉu vi, mia amiko, ne sentas vin ĉagrenita, ŝokita de tiuj raportoj?... Ĉefe tial, ke ilin aŭdas fremduloj?...” mi kuraĝe, esplorcele demandis.

“– Efektive mi sentas min ĉagrenita, kaj tiel ne povis ne esti... Cetere, ĉagreno kaj bedaŭro estas al mi konstantaj kunuloj... Malgraŭ tio, la suferado kaj la instruado, kiujn mi ĉi tie ricevas, sufiĉe helpis min por nun pli bone rezoni ol iam ajn... Konvenas konsideri, kara S-ro Boteljo, ke, se Frato Santaremo al vi priskribas tiujn min koncernantajn okazaĵojn, tiel estas ĉar vi ĉi tien venis por celado instruiĝa, krom ankaŭ

tial, ke vi estas sinceraj, afinaj amikoj, kapablaj je frataj agoj celantaj ne nur mian bonon sed ankaŭ de miaj karuloj! Ne de hodiaŭ datiĝas nia alligiteco... mi bone memoras, ke kortuŝa amikeco interligas nin ekde la mizeraj travivaĵoj en la Malbenita Valo...”

“– Jes! – interrompis la klarvida instruanto –, li en oportuna okazo devus esti informita pri ĉio, kvakam pro karitato konsilindus lia foresto for de la loko de la okazaĵoj... Li ja povis nenion nescii, ĉar li estis la kaŭzinto de ĉio, kio rezultis el la forlasiteco trudita al la familio, kaj ankaŭ ĉar urĝis pripensi tiujn gravajn okazaĵojn cele al starigo de planoj por la estontaj riparadoj...”

La incidenton sekvis mallonga paŭzo, kiun Hieronimo mem rompis, dirante:

“– Mi petegas vin, respekteginda Frato Santaremo, plu instruadi miajn samsortanojn pri la sinsekvo de mia persona dramo, ĉar mi ĝin opinias ege signifa, kiel vi jam multfoje atentigis, por ankaŭ aliajn personojn edifi kaj instrui...”

“– Jes, mia filo, mi estas certa, ke al iliaj animoj estos plej edife aŭdi la nun rakontatajn epizodojn... – pacience konsentis la pastro, kies bonvolema rideto dolĉigis la ĉagrenon kaŭzitan de mia impertinenteco. – La vivo de ĉiu el ni enhavas grandiozajn, sublimajn instruojn, se nur ni penos ĝin kompreni en la lumo de la diaj leĝoj regantaj la homajn destinojn...”

Li momente eksilentis, kvazaŭ li kunligus rememorojn, kaj daŭrigis:

“– Kiam Margareta Silvejra falis sur la plankŝtonojn de la drinkejo, ni prizorgis forkonduki ŝian Spiriton – duone kaj dumtempe eliĝintan el la karna portaĵo – al la Urĝahelpa Servo, kiun la Instituto tenas en la proksimeco de la surtera globo.

La tieaj servoj estas diversaj kaj konstantaj, kiel en la interno de la Kolonio. Multaj enkarniĝintaj malsanuloj estas tie resanigitaj de la transmonda medicino, multaj homoj forkliniĝintaj de la

Devo estas ricevintaj en tiuj gastamaj ŝirmejoj novajn fortojn kaj kuraĝon por korektiĝi kaj sekve regeneriĝi, kaj multaj koroj larmantaj kaj afliktitaj tie ricevadas konsolon, konsilojn, estas realproksimigitaj al Dio, savitaj el la memmortigo, remetitaj en la agadprogramon, por kies plenumo ili naskiĝis sed de kiu ili deflankiĝis.

Tien oni kondukis la Spiriton de Margareta, kiu submetiĝis al rigora ekzameno. Niaj fratoj, komisiitaj por tiu tasko, konstatis, ke ŝia fluideca organismo – la perispirito – troviĝas en malbona stato, urĝe bezonanta severan kuracadon. Dume ankaŭ la karna korpo estis ekzamenata de la surtera fakulo, nome la kuracisto asistanta ĉe la hospitalo, en kiun ĝi estis transportita en komata stato.

Ni interkonsente decidis, ke favore al la estonteco de Margareta Silvejra, tiu letargia stato daŭru tiom da tagoj, kiom necese por la urĝega morala helpo, kiun postulis la premeco de la situacio. Ĝuste tial, plej streĉan atenton, plej skrupulan zorgadon ni dediĉis al ŝia fizika-materia korpo, en kiun ni transigis vivofortojn necesajn al konservado de la sano. Cetere, la junulino ne estis ĝustadire malsana sed nur toksita de la deviga alkoholdrinkado. Ŝiaj organoj estis en normala stato, escepte de la nerva sistemo, kiu suferis la sekvojn de la dolora nenormaleco de ŝia vivo. Ŝiaj pli gravaj suferoj, kies naturo postulis sindonan prizorgadon, estis moralaj, kaj pro tio la kuracistoj de la hospitalo en Porto, kies kuŝis ŝia karna portaĵo, tenis ŝin sub observado, konfuzitaj pro tia stranga letargia stato.”

Frato Santeremo dummomente sin interrompis, demandante, ĉu interesas nin la daŭrigo de la rakonto. Ni unuvoĉe petegis de li ne ĉesi ne nur pro tio, ke nin forte interesas la sorto de la kompatinda junulino, ĉar dum multe da jaroj aŭdante la patron paroli pri ŝi, ni nun tutkore amas ŝin, sed ankaŭ pro tio, ke nin profunde tuŝas la koncerna moralinstruo, kiu en nian animon penetras kun fortaj reeĥoj. Aliflanke, Hironimo mem instigis lin rakonti la okazintaĵon, kio ja estis la plej bona kuraĝigo al la rakontanto.

La bonkora konsilanto dankis per afabla rideto kaj daŭrigis. dume nia atento fariĝis pli streĉa.

"– Sciu, miaj amikoj, ke Greta ne nur ne estis malnobla, sed ja nevolonte konformiĝis al malvirto. Ŝi eĉ ĝin abomenis kaj sopiregis liberiĝi de ĝi. Ŝia dolorplena kazo prezentis teruran kulpelpagon, bedaŭrindan kaj neeviteblan sekvon de arbitraj agoj, kiujn ŝi mem faris en antaŭaj enkarniĝoj, kaj kiuj tra la jarcentoj kriegadis pri justeco kaj riparado, ne nur en la faldoj de ŝia konscienco sed ankaŭ en la harmoniaj kodoj de la Superega Leĝo, kiu tute ne konformiĝas al ia ajn deflankiĝo de la rekta vojo!".

" – Ĉu vi povus resume konigi al ni la agojn, kiujn la Spirito de tiu junulino faris en antaŭaj enkarniĝoj, donintajn kaŭzon al la grava situacio, kiun ŝi nun travivas?"– mi kuraĝis, peti, instigate de la sincera deziro lerni.

"– La studo de la Leĝo de Reenkarniĝo estas profunda kaj delikata, mia amiko, sed ankaŭ simpla kaj facile komprenebla, ĉar ĝi prezentas al ni la ŝlosilon klarigantan multajn problemojn, kiuj turmentas la homaron kaj kiuj laŭŝajne montriĝas nesolveblaj. En la estonteco vi faros ĝin en vi mem, relegante la paĝojn de la libro de l' konscienco... Sed ĝis tiam tute ne estos nekonvene, kontentigi vian naturan scivolon, ĉar vi ja profitos konante unu plian el ĝiaj multoblaj flankoj.

Jes, miaj amikoj! La profundeco de la diaj leĝoj estas kapturna kaj povas eĉ timegigi la malmulte progresintajn Spiritojn ankoraŭ ne ekzercitajn por ilia kompreno! Sed la justeco elstaranta el tiuj leĝoj elverŝas tiom da saĝo kaj tiel grandan korfavoron, ke la teruro aliiĝos en respektoplenan admiron post pli prudenta kaj detala esploro!

Kiel ajn nekredebla kaj malagrabla tio ŝajnas al vi, miaj filoj, en antaŭaj surplanedaj vivoj, tio estas, en pli ol unu surtera ekzistado la Spirito, kiun vi nuntempe konas sub la nomo Margareta Silvejra, reenkarniĝadis en viraj korpoj! Tiu Spirito, kiel viro – ĉar la Spirito ne estas submetita al la regado de la

sekso, kia oni ĝin komprenas sur la Tero – misuzis sian liberecon, la prerogativojn, kiujn la surtera socio konsentas al la viroj malprofite de la spiritaj valoroj, kaj makulatencis sanktajn devojn! Kiel viro, li malhonoris respektindajn hejmojn, malvirtigis konfidemajn virinojn, disverŝis sur sia vojo la galon de prostituo, malfeliĉigis kaj ruinigis destinojn, kiuj ŝajnis rozkoloraj, dolĉe karesatajn esperojn!... Sed... Venis iam la tago, kiam la Superega Leĝo, *kiu deziras ne la morton de malvirtulo, sed ke la malvirtulo deturnu sin de sia vojo kaj restu vivanta*[1] – detenis lin daŭrigi la abomenegindan malrespekton kontraŭ Ĝia Suverena Povo! Ĝi forprenis lian liberecon, havigis al li favorajn oportunojn por ke li reboniĝu el la anomalio kaŭzita de liaj multaj maljustaĵoj, devigante lin renaskiĝi en inaj karnaj vestoj cele al tio, ke li gustumu la saman galon, kiun li trinkigis al aliaj homoj kaj ankaŭ ŝparu al si mem valoran tempon de la kulpelaĉeta programo, submetiĝante al la severa reĝimo de elpago per punoj samspecaj kiel la turmentoj iam truditaj de lia misuzita libervolo! Li reenkarniĝis kiel virino por lerni, ĉe la malfeliĉo esti perfidita en sia ĉasteco, fifamigita, malhonorigita, forlasita, la impresan lecionon, ke ne senpune oni malobeas eĉ unu solan el la ordonoj preskribitaj en la supro de Sinajo kiel plej alta honorkodo por la homaro, kies ĉefa celo nepre estu la sublima praktikado de amo al Dio kaj al la proksimulo!”

Maltrankviliga ĉagreno estigis sentojn de teruro en nia menso surprizita de tiu sciigo. Ni ektremis kaj sentis, kvazaŭ glacia ŝvito elgutus el nia haŭto. En tiu momento ni vive rememoris, ke ni estis viroj, ke niaj konsciencoj vidigis al ni ne nur anĝelajn agojn koncerne tiun gravegan aferon. Malgraŭ tio, fidele konservante enradikiĝintan disputemon, miskutimon, kiu timige obstine akompanis min eĉ en la transtombaj regionoj, mi ardvoĉe parolis, konfuzita kaj senrevigita:

---

[1] Jeĥezkel, 33:11. – *(Noto de la Trad.)*

"– Se tiel okazis, kiamaniere Hieronimo fariĝis respondeca pri la malfeliĉoj de la filino?..."

"– Ha mia amiko! Sufiĉus eta dozo da rezonado por kompreni, ke eĉ tiel la konscienco de la kompatinda patro ne ĉesos lin severe akuzi!..."– vespiris la sacerdoto inicito. – "La faliloj venos, sed ve al tiu homo, per kiu la falilo venas"– asertis nia Saĝa Majstro kaj senkompara edukisto, ĉar se li tiel agis, tio estis tial, ke li efektive ne harmoniis kun la justaj ordonoj de la Superega Leĝo! Margareta Silvejra certe devis plenumi iujn riparojn, sed malfeliĉe la memmortigo de ŝia patro, kiu metis ŝin en forlasiteco, estis la provilo, kiu ŝin ĵetis en tiun bedaŭrindan situacion! La teruran ŝuldon ŝi povus elpagi kun la paso de l' tempo, ne nepre en la nuna ekzistado, sed en oportuna okazo. La libervolo de ŝia patro, kiu lin kondukis al tiu fatala eraro, nome la memmortigo, akcelis okazaĵojn, pri kiuj li ja ne bezonus respondi por ne suferi la efikojn de konsciencriproĉo! Kion vi diros, kara amiko, pri homo, kiu, kaŭzinte la tragikan morton de amata estulo, tamen ne intencis murdi lin kaj eĉ abomenegis la ideon vidi lin morta?!... Ĉu li ne suferus?... Ĉu li ne pasigus la reston de sia vivo mordata de rimorsoj, suferanta, por ĉiam malĝoja?!... Greta sendube devis elaĉeti la pasintecon. Sed ne necesus, ke la falilo sur ŝia vojo naskiĝu el la sekvoj de ago farita de la neantaŭzorgemo de ŝia patro mem!..."

Desapontita, mi silentis, kaj dume Frato Santaremo daŭrigis:

"– Ĉar la juna fiŝvendistino ne plezuris ĉe la malvirto, sed kontraŭe suferis pro sia humiliga situacio, sopiratendante la savan horon por liberiĝi, estis al ni facile helpi ŝin releviĝi, konvinki ŝin regeneriĝi, ŝin direktante al sekura celo.

Dum la sestaga restado en la ripozdomo de tiu Spirita Servo, mi tenis longajn konversaciojn kun ŝi, ĉar cele al la solvo de tiu ampleksa dramo mi estis komisiita funkcii kiel konsilanto kaj hierarkia peranto de la veraj Spiritaj Gvidantoj, kiuj laboras favore al la regeneriĝo de la pentanta junulino.

Tie interniĝinte, ŝi estis kondukita al ia kabineto konforma al la naturo de la konversacioj, kiujn konvenus tenadi kun ŝi. Tio estis iaspeca parolejo, en kiu magnetaj ondoj de plej alta kvalito faciligis la retenadon de miaj vortoj en ŝia konscienco, ĝustacele efikante sur ŝian memoron kaj tiamaniere farante, ke ŝi kolektu, en la delikataj tavoloj de la subkonscio, ĉiujn miajn rekomendojn, kiujn al ŝi konvenus, post vekiĝo, rememori en la oportuna okazo. Tiel efektive fariĝis, sed ŝi ne konsciis, ke ŝi simple plenumis rekomendojn donitajn al ŝia Spirito dum la letargio, en kiu dronis ŝia fizika korpo, ĉar vekiĝinte ŝi memkompreneble ĉion forgesis!

Mi unue admonis Margaretan al preĝado. Mi igis ŝin preĝi, kion ŝi faris banata en larmoj! Mi konatigis al ŝi la preĝon kiel savrimedon, elaĉetan lumon kapablan forpreni ŝin el la mallumoj, en kiuj ŝi baraktis, kaj konduki ŝin al rehonoriga situacio. Kiom al mi permesis la mallonga disponebla tempo krom ankaŭ la neordinara cirkonstanco, kiun mi devis estigi, mi havigis al ŝi rudimentojn de moralreligia edukado, kiujn ŝi neniam antaŭe ricevis, al ŝi parolante pri la devoj truditaj de la Superega Kreinto en Liaj Leĝoj kaj ankoraŭ al ŝi rememorigante, ke en la amo de la Dia Krucumito ŝi ne nur trovos animfortecon por deloki la montojn el maljustaĵoj, kiuj tenadis ŝin sklavigita al la malsupereco, sed ankaŭ balzamojn sufiĉe efikajn por mildigi la galon, kiu malfeliĉigis ŝian vivon. Mi inspiris al ŝi esperon, novan viglon, kuraĝon por dua etapo nepre necesa en ŝia destino, konfidon al la Ĉiela Amiko, kiu ĉiam etendas kompateman kaj protektan manon al la pekintoj, ilin subtenante; por ke ili sin mem renovigu... kaj mi konvinkis ŝin pri tio, ke, se ŝi, kiel virino, estis malfeliĉa, tamen ŝia animo enhavas valorojn, kies dia origino postulas de ŝia volforto noblajn kaj heroajn agojn, kapablajn konstrui ŝian rehonoriĝon antaŭ ŝia konscienco kaj antaŭ Tiu, kiu el Si mem eltiris lumerojn por al ni doni la Vivon!

Fidele plenumante la rekomendojn, kiujn de la Templo ni telepatie ricevis, mi admonis ŝin klopodi por forlasi Porton aŭ

eĉ Portugalujon! La restado en la naskiĝloko neebligus al la volo reagi cele al ŝia korektiĝo... ĉar ŝi bezonis eĉ forgesi, ke ŝi iam vivis en la Ribejra Kajo! Ŝi devis elfosi, per heroa peno de sia bonvolo, ian abismon inter si kaj la nigra pasinteco, por komenci novan etapon en sia vivo. Estis nepre necese, ke ŝi fidu sin mem, rigardante sin bona kaj forta por venki la batalon kontraŭ la malfeliĉo!... ĉar la Ĉielo ja havigos al ŝi favorajn okazaĵojn por ŝia reboniĝo! Brazilo estas gastama lando, amika al malfeliĉuloj, kaj tiel ĝiaj havenoj kiel ankaŭ la koro de ĝiaj filoj estas sufiĉe grandanimaj por ŝin akcepti sen konsideri apartaĵojn de ŝia pasinteco... Ŝi do preferu la ekzilon en la brazila lando, ĉar la ekzilejo poste transformiĝos en hejman komfortejon... kaj ankaŭ tial, ke la Spirito estas universala civitano, havanta la infiniton kiel veran patrolandon, pro kio li komprenos, ke la homo, kie ajn li troviĝos, ĉiam estos en sia Patrolando, kiun li devas konstante ami kaj servi, ĝin honorante kaj glorigante por ĝin konduki ĝis altaj moralaj celoj! Ŝi forgesu la pasintecon! Kaj, kun animo kaj koro turnitaj al la Kompatema Eternulo, atendu la agadon de l' tempo, la donacojn de la estonteco: – ne mankos al ŝi la ĉiela prizorgado en ŝia regenera elprovado!”

Ni kortuŝite aŭdis, taksante la valoron de tiu tezo, ja sufiĉe vasta por ampleksi ĉiujn, kiuj implikiĝis en la samaj eraroj. Sed ni tenis nin silentaj, dum la nobla edukisto, kies parolo fariĝis pli kaj pli milda laŭgrade kiel li entuziasmiĝis en sia ĉarma prelego, daŭrigis post momenta paŭzo:

“– Konvenis veki Margaretan, tio estas, revenigi ŝian Spiriton al tiu sankta templo, nome la karna aparato, lin rekonduki por ke li daŭrigu la taskojn al li truditajn de la ekzistado.

Ĉar ŝi efektive ne estis malsana, ŝia vekiĝo fariĝis nature kaj milde sub nia zorgema protekto, kvazaŭ ŝi rekonsciiĝus post longa kaj bonfara dormo. Kuracistoj kaj flegistoj konfesis sian konsterniĝon. Sed la junulino elmontris bedaŭron, ke ŝi revenis al la materia vivo, kaj pro tio verŝadis abundajn larmojn.

Neretenebla angoro pezis sur ŝia koro. Ŝi tute ne kapablis rememori tion, kio okazis al ŝia Spirito dum tiu sestaga magnetisma dormo. Nur svaga tenersento vibrigis en la fundo de ŝia memo dolĉan kaj misteran, por ŝi nedifineblan resopiron...

Post kelkaj tagoj en angora atendado, ŝi decidis forveturi al Lisbono serĉe de sia fratino Arinda, pri kiu ŝi scias, ke ŝi servas en bonreputacia hotelo.

Sed la situacio de la malfeliĉa junulino montriĝis malfacila. Ŝi ne disponis rimedojn por fari la vojaĝon. Ŝia makulplena pasinteco, ŝia malbona reputacio malpermesis al ŝi dungiĝi ĉe honestaj domoj kiel servistino. Sed ĉirkaŭ la malfeliĉuloj ĉiam troviĝas anĝeloj-protektantoj pretaj por ĝustaokaze interhelpi kaj rebonigi situaciojn, kiujn oni rigardas nesolveblaj. Koncerne Gretan, la Ĉiela interveno, por havigo de la necesaj veturrimedoj, manifestiĝis pere de ŝiaj kompatindaj kunulinoj en la malsanulejo, kiuj, vidante ŝin ofte ploranta eltiris de ŝi la konfeson pri la dolora situacio. Malriĉaj, humilaj, bonkoraj, suferantaj, kaj, ja ĝuste pro tio, en la plej bonaj kondiĉoj por kompreni la aliulajn malfeliĉojn, tiuj bonaj virinoj kotizis inter si, postulis helpon de siaj edzoj kaj parencoj kaj, post nemultaj tagoj, Margareta ekhavis tion necesan por translokiĝi al la Regna ĉefurbo.

Arinda gastigis la fratinon, pardonis al ŝi la pasintajn malprudentaĵojn, fine komprenante ke tiel bedaŭrindan dramon naskis pli ĝuste nescio kaj mizero, ol vera malico, ĉar Arinda ne havis filozofian klerecon por duonvidi, en la okazaĵoj travivataj de la pli juna fratineto, tiujn spiritajn antecedentojn, kiujn mi ĵus malkaŝis al vi.

Ŝi dungigis Gretan en la hotelo, tenante ŝin proksima al si. Ŝi tiamaniere provis kapabligi la fratinon por la hejma mastrumado, celante trovi por ŝi, en la estonteco, lokon en familia medio. Sed efektive, miaj amikoj, la filino de Hieronimo vojaĝos al Brazilo pli frue, ol oni atendis... En tiu hotelo nuntempe gastas portugala familio, kiu loĝas en San-Paŭlo, la

granda brazila industria centro. Vizitante sian naskolandon, ili ekskursas en la ĉefurbo, kiun nur nun ili havis la okazon ekkoni... Margareta, sub la gvido de sia fratino, ilin servas kompleze kaj bonvoleme... Ekestas simpatioj de ambaŭ flankoj... La junulino estis ĵus invitita forveturi al Brazilo kun la familio, kiel servistino... Arinda intervenis, komprenante la profitojn, kiuj el tio rezultos... Greta plezure konsentis... kaj post kelkaj tagoj definitive finiĝos tiu nigra paĝo de ŝia ekzistado kaj ŝi komencos novajn spertojn per novaj oportunoj de progreso kaj realigoj...”

Ni korpremataj nin rigardis, unu la alian, kvazaŭ ni spertus neordinaran kormalŝarĝon, kaj kortuŝite longe rigardis Hieronimon, kiu partoprenis en la turmentoplena, ĵus aŭdita odiseado, kun la terura prirespondeco, antaŭ la dia leĝo, ke li mem ĝin kaŭzis per tia malprudenta ago, kia la sinmortigo! Sed la eksa vinkomercisto, kun mallevita frunto, enmemiĝis en profundajn pensojn.

Subite, meze en la solena silento sekvinta la kortuŝan rakonton, iu kompatema voĉo, elmontranta karesan tonon, demandis kun sincera interesiĝo:

“– Kaj Albino, Frato Santaremo?... La Ĉielo kompreneble ankaŭ rezervis por li ian donacon, ĉu ne?...”

Tio estis Belarmino, kies bonkora animo, inklina al la revirtiĝo, jam prezentis la plej bonajn kaj plej solidajn sentojn de frateco inter ĉiuj el nia grupo.

“– Albino?!... – ridetante respondis la nobla sacerdoto, kvazaŭ absorbita de agrabla rememoro. – Albino statas tre bone, multe pli bone ol la fratino!... La izolo en karcero inklinigis lin al meditado, igis lin mature pripensi, instigante lin al serĉado de Dio helpe de la elaĉetaj flugiloj de la suferado!

Same kiel ni agis kun lia fratino, ni en nia ripozdomo havigis moralinstruon al Albino, kiu facile akceptante niajn admonojn, baldaŭ rezignaciis pri la dolora situacio, komprenante, ke li suferis justan punon, ĉar li ja kulpis en la socio! Li sin fordonis al legado kaj edukaj studoj, sub la rekta gvidado de elita animo, al kiu ni

havas plenan konfidon kaj kiu nun vivas enkarniĝinta sur la Tero – unu nia fidela agento kaj sincera peranto – t.e. iu mediumo, kristana inicito pri la Tria Revelacio, kun la nomo Fernando...

Nu, ankoraŭ dum la servoj plenumitaj en la jam menciita Urĝhelpa Fako, al tiu nia kara peranto estis donitaj instrukcioj pri tio, kion li devos fari por nin helpi ĉe la afero de la junulo, ĉar la sindona Spirito de Fernando al tiu loko estis forkondukita dum lia korpo restis en profunda dormo. Tiucele, Fernando, kiu profesie laboras en la polica inspektejo, kiom nur eble klopodas, kiel adepto de la Tria Revelacio, por praktiki la instruojn de la Dia Misiisto. El inter la multenombraj bonfaroj, kiujn li efektivigas kiel spiritisto-kristano, ni elstarigas lian intereson pri prizonuloj kaj kondamnitoj, kiujn li klopodas por helpi kaj servi kaj al kiuj li portas, en ĉiu sia vizito, radion de amo. Li enverŝas esperon en iliajn senfortiĝintajn korojn kaj kvietigas ilian internan ribelemon per la frata kaj bonfara dolĉeco de sia inspirita parolo, el kiu ŝprucas edifaj klarigoj mildigantaj ilian soifon al justeco kaj protekto!

Albino sentis sin altirata de tiuj mildaj esprimoj, kiuj al li malkaŝis la dolĉecon de la Evangleio de la Dia Regno kaj anoncis ian novan mondon, ian novan eraon ekaperontan en lia vivo de senprotekta junulo! La grandaj, revemaj okuloj de Fernando, kvazaŭ ili reflektus la fonton de Lumo, kiu heligis lian animon de elektito de la Ĉielo, forte impresis la filon de Hieronimo, kiu konfuzita kaj regata de neordinara simpatio, konfidis al li la turmentoplenan historion de sia vivo! Nia kara agento sincere kortuŝiĝis kaj, konsolante la junulon, donis al li, laŭ niaj rekomendoj, moralreligian edukon sub la inspiro de la Tria Revelacio, kio ŝparis al ni grandajn klopodojn rilate al la juna malliberulo...

Tiel Albino, en la soleco de sia karcero, povis rekte ricevi niajn kuraĝigojn, ĉar, dank' al la kompatemaj klopodoj de tiu servanto de la Sinjoro kaj al la bonvolemo de la pentinto mem,

ĉi tiun ni povis senpere alparoli, prenante lian manon kaj al li diktante edukajn instuojn, kiujn li tiel multe bezonis por fortikiĝi cele al la elaĉeta vojirado! Kaj Albino mem, banata en larmoj kaj intime promesanta konstantan bonvolon en la estonteco, skribadis, kion ni intuicie flustris al li en la penson!

Sed ne limiĝis al tio la vera frateca sindono de nia kara Fernando.

Li havis rilatojn de socia amikeco ĉe la Palaco de la Bezonoj. Per siaj klopodoj li altiris la atenton de Ŝia Moŝto, la Reĝino Amelia, al la malfeliĉa filo de nia sinmortiginto. Li komprenigis al ŝi, ke temas pri senprotekta orfo, kiun nesperto kaj malicaj delogoj malfeliĉigis sed kiun oni ankoraŭ povos helpi, farante el li homon utilan al la socio, per iom da protekto kaj frata subteno.

Ĉi tie, en la Instituto, oni scias, ke la Spirito de tiu nobla damo estas grandanima, kompatema, ĉiam strebanta al senerara konduto. Aliflanke, laŭ la instrukcioj de la Plejsupro, al la morala kaj spirita progreso de Albino ne estus necesa la karcera elprovado ankoraŭ daŭronta tri jarojn. Tial ni nuntempe kunhelpas en la klopodoj de Fernando, kiu fidele agas sub nia inspiro, celante kiel eble plej frue atingi la projektitan translokiĝon de la malliberulo en Afrikon, kie, kiel decidite, li vivos en libereco...”

“– Pardonon, respekteginda Pastro Santaremo! Miaopinie preferindus, ke Albino estu sendita eksterlanden... Ekzemple, en Brazilon, la duan patrolandon de la portugaloj, kie al ni tiom plaĉus vivi kaj ankaŭ morti, se ni forlasus Portugalujon... Kompatinda Albino! En Afrikon!... Negastama kaj kruda lando!...”– naive kuraĝis malkonsenti Mario Sobral, ne taksante la nekonvenecon de sia parolo.

“– Ne, mia juna amiko! Albino ankoraŭ bezonas resti sub la gardado, ĉu surtera-polica, ĉu spirita, de tiuj, kiuj prizorgas lian estontecon. En Brazilo li renkontus tro da faciligoj, kiuj povus lin ellogi el la pieco, en kiu li konserviĝas ekde kiam li konis Fernandon kaj akceptis la grandiozan Spiritan Sciencon! Li ĝuus

troan liberecon, tial la granda brazila demokratio ne estas la loko por li konvena en la nuna tempo... Tie li lasus sin treni de malutilaj forlogiĝoj ĝuste tiam, kiam, komencante sian regeneradon kaj sub la pezo de tiom da ŝuldiĝoj, li ankoraŭ troviĝas tre malforta por venki la multajn kaj tre grandajn tentojn, kiuj antaŭ li leviĝus en tiu malavara lando. La sovaĝa Afriko estos pli favora al liaj spiritaj interesoj! Estos pli karitate sendi lin tien, ol en mediojn malfavorajn al la revirtiĝo, kiun li devas provi profite al siaj senmortaj destinoj!

Ni do atendas la horon, kiam li estos forsendita en Lourenço Marques aŭ en iun alian lokon en Afriko...”

Konsiderante, ke la okazaĵoj rakontitaj de la elokventa kaj elvokiva parolo de la konsilanto de l' Izolejo nepre afekcios la afliktitan koron de tiu memmortiginta patro, al li samtempe havigante turmentajn rememorojn kaj revigligajn esperojn, mi lin sincere gratulis pro la bela sukceso de liaj preĝoj kaj ankaŭ ĝoje laŭdis la amoplenan sindonon de la Virgulino el Nazareto, kies interveno rebonigis situaciojn, kiujn oni supozis senrimedaj. Kaj mi konkludis per demando, kies respondo montriĝis al mi tiel interesa, ke mi ne detenos min de la deziro ĝin aldoni al ĉi tiuj notoj kiel finon al tiu ĉi ĉapitro. Lin frate brakumante, mi demandis al Hieronimo, dum miaj kunuloj de la karavano ŝajnis aprobi mian agon per amikaj ridetoj:

“– Kaj nun, kara Hieronimo, post kiam solviĝis la plej urĝaj problemoj, kiuj vian vivon kovris per amataj ombroj, ĉu vi ne sentas vin pli serena por prizorgi vian estontecon, kiu, kiom mi komprenas, jam estas tre kompromitita de la konstantaj afliktoj kaj malbonefika senpacienco, en kiuj vin tenis la resopiro pri la amataj gefiloj?... Ĉu vi ne ĝojegas, sciante, ke la heredinto de via nomo baldaŭ povos honeste servi al la socio, ĉar lia koro enlasis la ĉielan lumon de religia kredo, kiu samvaloras kiel beno de la Ĉiopova, certiganta al li gloran estontecon?... Ĉu vi ne ridetos rezignacie, sciante, ke via blonda Greta estas akceptita en la sino de respektinda familio, tiel respektinda, ke ĝin honore

distingis la atento de la Virgulino, de kiu vi petis konduki ŝin al porĉiama rehonoriĝo?... Jes, Hieronimo, vi ja ĝojegas! Kaj pro tio, mia amiko, ni ĉiuj vin gratulas!...”

Nur tiam li levis sian malĝojan vizaĝon, larmotone respondante:

“– Jes, amiko Kamilo! Tiel grandaj kaj profundampleksaj estas la bonfaroj, kiujn mi ricevis pro la helpo donita al miaj plej karaj amatoj, ke el ĉiuj esprimoj de mia koro neniu estos sufiĉe elokventa por pruvi al la Sankta Patrino de mia Savinto la dankon, kiu plenigas mian bruston per tenera emocio... escepte se, pro ankoraŭ pli granda korfavoro, mi fariĝos protektanto de orfoj kaj forlasitoj kaj al ili evitigos la falon en la samajn abismojn, en kiuj mi vidis dronintaj miajn karajn infanojn!

Kuraĝigas min la espero, ho Kamilo, ke unu tia miraklo efektiviĝos! Ĉar mi lernis ĉe miaj sindonaj majstroj en ĉi tiu gastama domo, ke la Spirito vivas sur la Tero sinsekvajn ekzistadojn, ke li naskiĝas kaj renaskiĝas en homaj korpoj tiomfoje, kiom necese, por ke lia animo disvolviĝu sub la beno de Dio! Mi do esperas, ke mi ĝuste tion iam efektivigos sur la Tero, en alia homa formo! Se ni, kiel mi nun varme kaj sincere agnoskas, posedas senmortan animon progrese irantan al Dio, mi elmontros mian dankon al la Ĉielaj Potencoj, fondante, dum mia reenkarniĝo sur la Tero, orfejojn, amoplenajn kaj gastamajn internulejojn, kristanjan hejmojn, kie orfaj infanoj trovu ŝirmon kontraŭ tiuj dramaj situacioj, en kiujn mia memmortigo ĵetis miajn sendefendajn gefilojn!... Jes ja! Konsolita, dankema, esperplena, mi ja estas! Sed ankoraŭ ne ĝojega, ĉar ĝena lavango da pagotaj ŝuldoj ardigas al mi la konsciencon, ĝin bruligante per la senkompata fajro de milmotiva rimorso! Ho, mi ne akuzas Zulmiran, ĉar mi ankaŭ sentas min kulpa pri ŝia abomeninda falo! La senrimeda malriĉeco, la akumuliĝintaj necesbezonoj, la torturanta malsato estis turmentegistoj, kiuj ŝin persekutis kaj vekobatis, ŝin trovante nepreparita por la necesa rezistado ĉe la ĉiutaga batalado kontraŭ la malfeliĉo, ĉar la kompatinda,

ricevinte senaman edukadon en la gepatra domo, estis de mi, kiu ŝin tiel multe amis, kutimigita al ekscesa malutila komforto, al la ruiniga senokupeco, kiun ĉiam naskas misuzata mono! Se mi, la viro, kiun koncernis la sankta devo prizorgi la estontecon de la familio, nome eduki la idaron, ĝin defendante kaj honorigante, pereige fiaskis, ĝin forlasante en la malfeliĉego, kaŝante min malantaŭ memmortigo por eviti la honorigan lukton, ĉar mi tute perdis la kuraĝon por elplenumi mision, al kiu eĉ la malsuperaj estaĵoj de la Kreaĵaro sin donas ame, dolĉe kaj ĝoje; se mi, la natura ĉefo, kiu, antaŭ homoj per la Edziĝo kaj antaŭ Dio per la Patreco, devontigis min konduki la familion al la sanktejo de la Honoro kaj Feliĉo, ĝin forlasis en la viva fajro de la mondaj maljustaĵoj, kaŝante min en tombo elfosita de tia malkuraĝula ago, kia la memmortigo – kiu alia do plenumus la devon, kiu nur min koncernis?!... Kion povus fari la kompatinda Zulmira, se mi, agante malpli noble ol ŝi, eĉ min mortigis, por evitigi al mi la plenumadon de netransigeblaj devoj?!... Ho! Por venki la malfeliĉon, defendante kaj honorigante siajn kvar neplenaĝajn gefilojn, Zulmira bezonus esti edukita en la lumo de noblaj principoj, sub la inspiro de alta kristana orientado, kiel ja tiomfoje asertis Frato Santaremo, vidante min suferanta kaj ĉagrenita pro ŝia konduto! Ho kompatinda Zulmira, kiu tamen, kiel mi, eĉ ne sciis, ĉu ŝi efektive estas dia kreitaĵo!... malgraŭ la religia afektado postulata de la hipokrita kaj hereza socio, en kiu ni vivis! Preĝado estas mia konsolo, same kiel la studoj, kiujn mi nun faras kun la intenco ricevi novan surteran korpon... Kaj pro ĉio ĉi, mia amiko, mi dankas Dion, ĉar tio jam prezentas multon por mi, kiu absolute nenion faris por meriti tiom da korfavoro...”

“– Ĉu vi povus, Frato Santaremo, doni al ni kelkajn informojn pri la kondiĉoj, en kiuj efektiviĝos la novaj spertoj de nia kara Hieronimo?”– mi demandis, altirata de la sinsekvaj instruoj rezultintaj el tiuj faktoj.

“– Tio postulos simplan rezonadon, mia amiko, altireblan por ĉiu diligenta lernanto.

Farinte, en la surtera socio, neripareblajn erarojn, ni devos, post la reveno en la Spiritan Patrolandon, prepariĝi por reiri, en postaj reenkarniĝoj, al la scenejo de niaj kulpoj, cele al tio, ke ĉe la ripeto de la pasintaj provoj *ni havu konduton kontraŭan al tiu, pro kiu ni fiaskis*. Surbaze de tiu regulo, ĉe ĉi tiu kazo ni nepre vidos mian zorgaton denove renkonti la financan ruiniĝon, la komercan malhonoriĝon, kia la mondo rigardas la bankroton de komerca entrepreno; la malriĉecon, la senkreditiĝon – ja la motivojn, kiuj lin iam puŝis en la memmortigon – por ke li pruvu sian penton kaj la moralajn valorojn, kiujn al li akirigis la amara transtomba travivaĵo. Por ke tiel estu, la ruiniĝo nepre devos efektiviĝi, malgraŭ liaj klopodoj por ĝin eviti kaj malgraŭ lia honesteco; sed tute ne pro la senzorgo, kiun li ĵus elmontris, kaj pro kiu li disperdis en ĝuoj kaj mondumaj vantaĵoj la riĉaĵon, kiun la Superega Disdonanto konfide pruntis al li, kiel pli vastan rimedon por lia progreso kaj la progreso de liaj similuloj... Restos ankoraŭ la grava demando rilata al la familio, kiun li forlasis en dorna situacio, deflankiĝinte de la sankta devo lukti por ĝin defendi... La konscienco lin konsilos koncerne la apartaĵojn de tiel delikata riparado, laŭ liaj sentoj mem, ĉar li posedas sian liberan volon. Sed la elaĉetaj luktoj, la amaraj provoj, la dramoj, kiujn li travivos en la kadro de la neprokrasteblaj riparoj, estos intensigitaj de malfortika stato de lia sano, organa kaj morala, de nedifineblaj malsanoj, kiujn la homa scienco ne kapablos forigi, ĉar ilin kaŭzos malsanigaj refrapoj de la vibroj de la perispirito, traŭmatisme trafita de la memmortigo, sur la nerva sistemo de lia estonta fizika-materia envolvaĵo. Estas eble, ke eĉ surdeco kaj parta paralizo, kiu povos afekcii la vidan aparaton, markos lian estontan reenkarniĝon... ĉar li preferis sin mortigi disŝirante sian aŭdaparaton per pulvarmila pafaĵo... kaj vi scias, miaj amikoj, ke la astrala korpo – la Perispirito –, estante, kia ĝi fakte estas, viva kaj duonmateria organismo, nepre sentos la brutalan efikon de memmortigo... kaj tiel li modelos sian

naskiĝontan korpon, ankaŭ suferante en la menso la efikon de tiuj samaj difektoj...”

...........................................................................................................................

Ni adiaŭis Fraton Santaremo kun larmoj pendantaj en niaj okuloj. Ni ne havis esprimojn por danki la ĝentilecon de la donitaj klarigoj. Ni brakumis Hieronimon kaj foriris, bedaŭrante la gravecon de tiu lin premanta situacio, ĉar, malgraŭ ĉio, kion ni ĵus eksciis, la kompatinda kamarado estis nenio alia ol soleca malliberulo en la Izolejo, de kiu li ne povus eliri eĉ por viziti siajn gefilojn, escepte nur por instruiĝi en la limo de siaj kapabloj kaj sub la severa gardado de la mentoroj. Saturita de pezaj, ŝokaj vibroj, li povus, per sia kontakto kun la amataj karuloj, ilin infekti per angoraj sugestoj kaj treni en ruinigajn situaciojn.

“– Vi devas fini ĉi tiun serion da vizitoj per mallonga haltado en la Departemento de Reenkarniĝo – konsilis la maljuna Doktoro de Canalejas –, ĉar post kelkaj tagoj vi realigos vian malnovan revon, nome revidi la Patrujon kaj la iaman hejmon...”

Atendis nin malgranda veturilo. Super ni fermiĝis la grandega levponto kaj ni eliris en la vastegan kampon bunte kovritan de lilioj. Nedifinebla maldolĉo afliktis niajn korojn, kaj mi mem esprimis la impresojn de ĉiuj miaj kompatindaj kunuloj, eldirante:

“– Adiaŭ, kompatinda Hieronimo! Mi ne scias, ĉu ni nin revidos, antaŭ ol nin disigos la granda kaj neevitebla reenkarniĝcela vojaĝo!... La Ĉiela Bonfaranto kompatu vian Spiriton, lumigante per la favoroj de Sia patra indulgemo la vojon, sur kiu vi migrados ĉirkaŭita de dornoj kaj elreviĝoj! Via historio estas ankaŭ nia historio, mi ĝin bone scias!... Kiam la nobla Frato Santaremo ilustris viajn problemojn per sia klariga kaj signifa parolo, mi bone konsciis, ke li karitate celas averti nin pri la malfacilaj momentoj, kiuj ankaŭ nin atendas...”

# Ĉapitro V
## Preparaj paŝoj por reenkarniĝo

> “Vere, vere, mi diras al vi: Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio”
> “Ne miru, ke mi diris al vi: Vi devas esti denove naskitaj.”
>
> JesuoKristo
> **La Nova Testamento**[1]

La Departemento de Reenkarniĝo situis en la ekstremo de la Korekta Kolonio Maria el Nazareto, estante samlima kun la ĝustadire spiritaj regionoj, aŭ eduka sfero. Tion oni facile komprenas, se oni konsideras, ke, venante tiel el la malsupera, kiel ankaŭ el la regenera regiono de la Kolonio, ofte frapas je ĝiaj pordoj grupoj da aspirantoj al la gravaj elprovadoj en la karno, t.e., en la surplaneda reenkarniĝo.

Tiu grava fako konsistis el la jenaj sekcioj, kiuj, kvankam interdependaj, plenumis apartajn funkciojn:

1 – Azilo.
2 – Analizejo (Sekreta kabineto, nealirebla por vizitantoj).
3 – Programado de la retravivotaj provoj.
4 – Esplorado.

---

[1] Johano, 3:3 kaj 3:7

5 – Planado de la surteraj fizikaj korpoj.

6 – Laboratorio por malgrandigo (Sekreta kabineto, nealirebla por vizitantoj).

Tiam komencis aperi la virina elemento, ĉar granda parto el la laborantoj kaj funkciuloj, kiuj tie oferis siajn fortojn, konsistis el Spiritoj altiĝintaj en la spirita hierarkio tra konstanta reenkarniĝado en virinaj korpoj. Sed la ĉefaj komisioj, kiel ankaŭ la ĝenerala direktado de la Departemento ĉiam ankoraŭ apartenis al inicitoj el tiu brila, al ni jam konata plejado.

Kiam ni transiris ĝiajn limojn, difinitajn de muroj netrapaseblaj por nerajtigitaj vizitantoj, la milda sunlumo havigis al ni agrablan surprizon, vidigante la unuajn kolorajn tonojn, kiujn ni povis percepti post kvarjara hospitaliĝo.

Ni kun miro konstatis, ke temas pri movplena urbo, en kiu staris grandiozaj konstruaĵoj laŭ rafinita hinda stilo. La legenda Hindujo, kun siaj tiel pensaltigaj sugestoj, aperis en tiuj ĉarmaj, pitoreskaj avenuoj, ŝajne invitantaj al meditado, al studo, al la nobla kulturado de la sanktaj aferoj rilataj al la Spirita Mondo kaj al la destinoj de la Animo!

En tiuj palacoj, ĉirkaŭitaj de kolonoj aŭ ornamitaj de tipaj kupoloj, same kiel en la domoj, graciaj kaj elvokivaj, ja ĉarmaj miniaturoj de la palacoj, en kiuj loĝis servantoj sin fordonantaj al la Elaĉeta Afero de la Majstro el Jerusalemo, regis la solena, nepriskribeble bela etoso de tiaj Transmondaj Sferoj, en kiu laboradas elitaj animoj, kies idealo estas la observado de la Superega Leĝo, la servado al Jesuo kaj la protektado al la humilaj kaj malfortaj. Ŝajnis, ke tie troviĝas la vera hinda civilizacio, nome tiu, kiun nur duonvidis en siaj ekstazoj la inicitoj de la antikvaj sekretaj sanktejoj, kiun oni neniam komprenis kaj kies principojn oni ĝuste tial neniam sekvis sur la Tero!

Ni sentis nin bone. Ĝojigaj emocioj komunikis konsolon kaj esperon al niaj animoj. Kaj por akcenti nian ĝojon, brilis la

bela Suno, kunligante en la samaj dolĉaj esprimoj de beleco parkojn kaj ĝardenojn, lagojn kaj fajrerantajn kaskadojn, la domaron kaj la horizonton etendiĝantan ĝis la senfino, ĉion karesante per mildaj tonoj, kvazaŭ ĝia orfluideska lumo filtriĝus tra maldensaj vualoj, maldikigante la volumenon de la belega paroramo en tia maniero, ke ĉio aspektis kvazaŭ farita el delikatega porcelano...

Gvidate de niaj karaj amikoj de Canalejas, ni eniris en la belan konstruaĵon kie sidis la centra administracio de la Departemento.

La boneco kaj la ĝentileco de la emineta inicito-direktoro, Frato Demetrio, decidis havigi al ni eĉ lokan instruanton, kapablan doni informojn konformajn al nia kompreno, kiel lernantoj pri la spirita vivo. Tiu estis juna virino, kies ridetanta kaj alloga vizaĝo tuj inspiris al ni konfidon. Pri tiu aminda persono, ni povis ekscii nenion pli, ol ke dum sia lasta surtera migrado ŝi nomiĝis Rozalia kaj vivis en Portugalujo.

La kompanio de Karlo kaj Roberto ne plu estis necesa. Ili do nin transdonis al la zorgado de Rozalia kaj adiaŭis por plenumi pli urĝajn taskojn, promesante reveni por nin rekonduki al la Pavilono, en kiu ni loĝis.

La sinjorino kolektis nin ĉirkaŭ si kaj en la mezo de la grupo ŝi sciigis, dum ĉiuj malsupreniris la ŝtuparon de la konstruaĵo:

"– Miaj karaj amikoj, mi komencos la malgrandan taskon al mi komisiitan de nia kara ĉefo, Frato Demetio, asertante al vi, ke al mia koro estos ege plaĉe kunlabori por via instruiĝo, same kiel mi farus al amegataj fratoj. Mi sentas, ke en viaj mensoj ekfloras laŭdinda deziro esplori por lerni kaj progresi. Tial mi aŭguras al vi kompensan estontecon en nia institucio, kies celo estas servi por altigi la proksimulon bezonantan amon kaj helpon! Sed mi detenas min de ĉia gratulo, kiu ja estus antaŭtempa. Mi prefere esprimas la deziron, ke la Supro al vi donu Sian korfavoran subtenon, kiel helpon por ke vi tenu vin je viaj nunaj streboj..."

Ni plej ĝoje dankis kaj plu iris sur unu el tiuj grandiozaj avenuoj borderitaj de tufoj el foliriĉaj kreskaĵoj, tra kiu nin haste preterpasis funkciuloj kaj laboristoj, plenigante la medion per intensa movado.

La juna sinjorino plu parolis, kaj dume ia sentebla fluo de supereco emanis el ŝia persono kaj penetris en nian internon, vekante tiujn plej bonajn esprimojn de respekto kaj estimo, kiujn ni povis prezenti:

"– Kiel vi konstatos, neniu, akceptita en ĉi tiu Instituto kiel kelkatempa zorgato kaj bezonanta retravivi surterajn provojn, povus ĝin efektivigi sen unue interniĝi en nia Departemento por staĝo, kies daŭro varias inter unu kaj du jaroj, laŭ lia stato, antaŭ ol oni faros la necesajn paŝojn rilatajn al la korpo, kiun li devos animi. Ĉiutage venas ĉi tien Spiritoj sopiregantaj pri reveno al la scenejo de siaj propraj faloj, maltrankvile strebantaj al riparado de sia pasinteco, kies rememoro ilin afliktegas, al elpago de siaj kulpoj, al ripetado de sia intima dramo, por sukcesi forskui de si la premegantan rimorson, kiu frakasas ilian konsciencon – ja sangantaj fantomoj, katenitaj al la malhonora sekvo de la memmortigo!

Ricevinte la aprobon de la Templo al la celata reenkarniĝo, aprobon kiun la Templo siavice jam estis ricevinta de la Plejsupro, kie ŝvebas la Supera Direkcio de la legio, la aspiranto sin prezentos en la direktejo de la Departemento. De tie oni lin unue sendos al la Azila Sekcio kie oni enskribos la registrojn pri lia surtera vivo kaj en kies internulejo li estos akceptita sub la patraj zorgoj de gvidantoj, kiuj ekde tiu tago lin fidele subtenos kaj senkondiĉe, senlace akompanos dum lia kulpelpaga "via crucis"[1] en la surteraj scenejoj.

Post tiu unua paŝo, venos la vico por la fakuloj de la sekcio de Analizo, kiuj esploros la karakterizajn inklinojn de tiuj

[1] Latine: vojo de la kruco. Figursence: suferplena vivo.

internuloj, ilin detale ekzamenante el psikologia vidpunkto. Ilia animo, ilia memo, la plej kaŝitaj faldoj de ilia konscienco estos profunde esplorataj de tiuj saĝaj laboristoj de la Sinjoro, kiuj, estante ĉiuj superaj incitoj de tiu brila legio, senescepte kompetentas pri la delikata tasko. Tiucele, uzante siajn superajn magnetismajn kapablojn, ili devigas sian pacienton transturni la foliojn de la grandega libro de la Animo, revidi en ĉi tiu sian pasintecon kaj tiel sin montri tia, kia li ja estas, ĉar eksciu nun, – se vi tion ankoraŭ ne scias – ke ĉiuj kreitoj portas sian propran historion skribitan per neforviŝeblaj karakteroj sur la meandroj de la memo, pro kio ili povas, en difinitaj cirkonstancoj, ĝin detale reaperigi kaj elmeti por aliula ekzameno, ĉu li restas ligitaj al la karno, ĉu ili de ĝi liberiĝis...

Sed la internuloj de la Frenezulejo prezentas escepton. Ĉi tiuj bedaŭrinde reenkarniĝos tiaj, kiaj ili statas! Por bonfari al ili, eblos provi nenion alian, krom ilin revenigi al la karno, kiu tiuokaze efikos kiel terapio nepre necesa por korekti la ĝeneralan malordon de iliaj vibroj kaj tiamaniere estigi kondiĉojn por novaj estontaj provoj. Tiu terapio, mildigata de la ĉiutagaj preĝoj, kiujn, de ĉi tie, en simpatiaj, dolĉaj, bonfaraj fluoj, oni faros por ili, prezentas ĉion, kion tiuj malfeliĉuloj povas ĉi-momente ricevi, malgraŭ nia granda deziro vidi ilin serenaj kaj feliĉaj!

Post kiam finiĝis la analiza studo pri la karaktero de ĉiu internulo, tiuj samaj fakuloj ellaboras raporton, plendetalan kaj rigore ekzaktan pri siaj konstatoj, kaj transigas la kazon al la sekcio de Programado de Retravivotaj Provoj.

Laŭ ĉio dirita, vi certe komprenis, ke tiuj analizoj estas nepre necesaj ĝuste pro tio, ke ili liveras la materialon por programado de la estonta ekzistado. La meritoj kaj malmeritoj de la reenkarniĝonto, liaj pli gravaj pasintaj faloj, kiuj ĝuste pro sia graveco postulas urĝan riparadon; la mildigaj favoroj, kiun oni povas konsenti al ili, unuvorte la plektadon de la planita ekzistado oni faros helpe de la dirita esplorado. Sed necesas klarigi, ke tiel grava laboro alprenas du distingiĝajn formojn, kiuj estigas

senteble diferencajn procedmanierojn. Ĝi estos malfacila, postulante multajn provojn, suferigajn eĉ por la operacianto mem, se la kondamnito al la karna karcero devenas de la malsupera regiono de la Kolonio, t.e. de la hospitalaj departementoj aŭ de la malliberejoj de la Turo; sed ĝi male konsistos en simpla revizio pro teknikaj kialoj, kontrola konstato nepre necesa al la raportoj, se la aspiranto estis internulo de la Instituto mem, t.e. de la regenera regiono, en kiu funkcias la reedukaj staĝoj, la Inica Lernejo, ktp, al kiuj vi estas baldaŭ sendotaj. Sed en ĉiuj okazoj, tiun laboron multe faciligos la informoj donitaj de la Templo kaj la helpo de la Gvidantoj-misiitoj senditaj de la Superaj Sferoj, sen kies ĉeesto oni faros nenian reenkarniĝcelan provon.

Post kiam oni difinis la programadon, skizis la elaĉetajn aŭ riparajn luktojn de la reenkarniĝonto, laŭ liaj fortoj por morala eltenado – fortoj disponeblaj por la venko –; post kiam oni antaŭvidis la entreprenojn, kiujn li povos efektivigi krom ankaŭ la elaĉetoj; la verkojn, kiujn li kapablos fari; la faciligojn, kiujn li renkontos survoje, ja justajn efikojn de meritoj antaŭe konkeritaj; aŭ la malfacilaĵojn, kiuj, por lia propra bono lin kontraŭstaros dum la ekzistado, kiel justa sekvo de malmeritoj, kiujn li kuntrenas el sia malbona pasinteco; post kiam, fine, oni definitive starigis la scenejon de la vivo, kiu lin atendas en surtera reenkarniĝo, kiu al li tiel konvenas, kaj kiun la pekinto mem forte deziras, skurĝate de pento, – tiam tiun belegan laboron, veran, saĝe planitan epopeon, oni sendos al la ĉefdirekcio de la Kolonio, kiu ĝin ekzamenos.[1]

[1] Oni devas ne tiri absurdajn konkludojn el tiuj klarigoj. Antaŭ ol enkarniĝi, la Spirito povos elekti, ekzemple, la provon de malriĉeco, ĉe kiu ili submetiĝos al la travivaĵoj rilataj al la grado de malriĉeco, kiu konvenos al lia ekzistado. Oni sekve ne deduktu, ke en la transtomba vivo estis detale difinitaj ĉiuj apartaĵoj kaj akcidentoj de la antaŭvidita malriĉula vivo. Se la reenkarniĝonto devas blindiĝi aŭ mutiliĝi, tio okazos sen la neceso indiki, en la programado farita antaŭ lia reveno al karna korpo, la akcidenton aŭ malsanon, kiu ĝin metos en la konvenan elprovadon. Ĝuste tion oni deduktas el la baza verkaro de la Spiritisma Doktrino. – *(Noto de la mediumino)*

En iuj okazoj, necesos fari plibonigojn, kiuj povos preskribi, aŭ la malpliigon de provoj, prokrastante ĝis malproksima estonteco la solvon de kelkaj problemoj, kiel aldonon de favorkoreco, aŭ la pliigon de riparoj en malpli longa tempo, depende de la ĝeneralaj fortoj de la zorgato! Sed tiaspecajn preskribojn oni nur ordonos, eĉ la Templo mem, se oni pro tio estas rajtigitaj de la Plejsupro. Ĉar, tamen, la misiistaj Gvidantoj de la pentinto, krom ankaŭ la fakuloj de la Departemento de Reenkarniĝo estas altrangaj Spiritoj el la virtoplenaj sferoj de la Transmondo, posedantaj vastan sciadon kaj ricevantaj gloran inspiradon por servi al la afero de la homa elaĉeto, tial iliaj programoj estas ĝenerale aprobataj de la Superega Direkcio de la Legio, al kiu ni apartenas kaj kiu, pere de la Templo, rajtigas la preparon de la surtera fizika korpo cele al la elprovado sur la krusto de la planedo...”

Haltinte sub la foliriĉaj arboj starantaj laŭlonge de la avenuo, sur kiu ni iradis, ni plenatente aŭdis tiajn instruojn kaj memoris la informojn, entenatajn en iuj antikvaj libroj, pri lecionoj donitaj de Pitagoro, Sokrato kaj Platono al ĉirkaŭstarantaj disĉiploj, antaŭ kurteno da platanoj en Atenaj parkoj, lecionoj, kiuj pli-malpli baziĝas sur analogaj principoj.

Enpensiĝa, Belarmino, kiu sorbadis la parolojn de Rozalia kun videbla entuziasmo, intervenis:

“– El viaj asertoj ni sekve induktu, mia sinjorino... mia fratino, ke la dramoj de la homa vivo, la malfeliĉoj, la tragedioj, kiuj ĉiutage skuas la mondon, farante el la homaro kvazaŭ ian ludilon de superaj, blindaj fortoj, estas direktataj de neretenebla fataleco?!...”

Kun ĉarme simpla rideto, la klarvida servantino de Maria responde korektis kaj dume mansignis, invitante nin supreniri la ŝtuparon de impona konstruaĵo ĉirkaŭita de kolonoj kaj prigardata de allogaj puntformaj vicoj de florplenaj arbedoj kaj foliriĉaj arboj, kaj sur kies portikoj legiĝis ĉi tiu simpla surskribo: – *“Internulejo”:*

"– Ne, mia amiko! La saĝo montras, ke la homaron de povas direkti ia blinda, abomena fatalo! Vi devus pli ĝuste kompreni, ke tio, kion vi nomas fatalo estas nenio alia, ol efiko de kaŭzo, kiun la homo mem estigis per la implikaĵo el siaj agoj, kiam sur la Tero li vivis malproksime de bono, moralo kaj devo, aŭ en la Transtombo, kiel Spirito deflankiĝinta for de la Leĝo, brutiĝinta en la mallumo, kiun li amasigis ĉirkaŭ si, ĉar ja li mem, per siaj bonaj aŭ malbonaj agoj, difinas la naturon, konsolan aŭ punan, de sia propra estonteco! La fatalo ja regas, se vi tiel preferas, sed ne blinde, reduktante la homaron al nura ludilo; ĝi estas la logika sekvo, inteligente korekta, de kulpaj devojiĝoj, trudita de lia libervolo post kiam li preferis la eraron al la avertoj de la prudento kaj konscienco! Ĉar temas pri punkorektado, tiu situacio ĉesos en la momento, kiam ĉesos la kaŭzo, kiu ĝin originis, nome la malsupera trajto de malico, kiu inspiris la faritajn agojn. Tiel, ankaŭ la programoj, kiujn oni ĉi tie ellaboras, celante la estontecon de la kulpinto, ne enhavos la detalojn, la ĉiutagajn agojn, kiujn li devos plenumi dum la aktivecoj de la surtera vivo, same kiel oni ne pripensos la apartaĵojn al li necesajn por ke li trafu la neeviteblan! Ni nur enskribos la ĉefajn punktojn, nome tiujn, kiuj prezentas riparojn, decidajn travivaĵojn, sinsekvojn, ĝuste respondantajn al la logiko de la antaŭaj okazaĵoj, tio estas, de la Kaŭzo! La kulpelpago tiele radikas en la pekula konscienco, kiel efiko de la rimorsoj, de la bezono progresi post krima pasinteco, ke *li mem, sub la impulso de sia libera volo, ĝin efektivigus, eĉ se ĝi ne estus programita laŭ la kriterio de niaj raportoj.* Konvenas tamen, ke ni tiel procedu, ĉar, lasita al si mem, li glitus al malutilaj ekscesoj, estigante ruinigajn situaciojn.

Krom tio, ankaŭ registriĝos liaj kapabloj por meritaj faroj, kiujn oni povos eĉ eksplicite, montri... ĉar al neniu Spirito, enkarniĝinta aŭ ne, nur pro tio, ke li restas sub la jugo de la elprovado, oni rajtas neebligi, ke li konstruu sian progreson, sin dediĉante al noblaj entreprenoj favore al la bono de la

proksimulo. Sed en la karno li estos libera efektivigi, aŭ ne, tiujn entreprenojn, kiujn li promesis realigi, antaŭ ol reenkarniĝi, kiam estis difinitaj la linioj de lia estonteco. Li ja estos libera, sed en la okazo se li dekliniĝos de tiu sindevontigo, tiam lin afliktos intensa bedaŭro, kiam transmonde li konscios, ke, ne plenuminte la vorton donitan al siaj Gvidantoj, li forĵetis la glorkronon de meritoj, kiuj al li povus multe mallongigi la dornan vojon de la retravivotaj provoj... Kiel vi vidas, mia amiko, temas ne pri fatalo, sed ja pri harmonia kunĉenado de "kaŭzoj" kaj "efikoj..."

Ni eniris vastan antaŭĉambron, kies pordojn, neniam fermitajn, kovris, kiel sola baro al la interno, diskretaj kurtenoj el delikatega ĉielblua ŝtofo. Impresa silento daŭre vekis nian atenton, igante nin kredi, ke la impona konstruaĵo dronas en soleco. Sed sugestia, delikata aromo havigis neesprimeblan ĉarmon al ĝia plenalloga interno, en kiun milde blonda lumo penetris tra graciaj ogivoj girlanditaj per blankaj rozoj. Samfloraj bukedoj diskrete ornamis la lokon, vidigante, ke la ornamadon inspiris ina gusto.

En angulo de la salono, elstaris kvazaŭa tribuno, eltranĉita en formo de duonluno. Sinjorino kun nedifinebla aĝo, nin ekvidinte, tuj stariĝis kaj lasante ekaperi bonkoran rideton sur siaj lipoj, salutis nin per ĉi tiu signifoplena esprimo, dum ŝi venis renkonte al ni kaj ĝentile etendis sian dekstran manon:

"– Estu kun vi la paco de la Dia Majstro!"

Rozalia nin afable prezentis al ŝi.

"– Mi vin atendis, miaj amikoj! Frato Teokrito ĉimatene komunikiĝis kun mi kaj sciigis, ke vi bezonas mallongajn informojn pri ĉi tiu fako... Mi mem akompanos vin tra la interno de nia ŝirmejo... nome ĉi tiu Azilo, kiu iam vin ĉiujn gastigos, ĉar estas neniu, kiu post interniĝo en tiu ĉi Kolonio, ne devus transpasi ĝian sojlon..."

Ŝi estis religiulino. Ŝia neĝblanka vesto, kvazaŭ nuancita de orpalaj forforeskoj, kiujn oni kredus venantaj de la lumo

verŝiĝanta sur tiun ĉarman lokon, estis tre bela kaj similis la tunikon de legenda virgulino glorita de rava religia poemo.

Mi ne pensis ekscii, al kiu kongregacio apartenis, dum sia surtera vivo, tiu ĉarma sinjorino, kiu nun, en la spirita mondo, sin montris, por nia surprizo, kiel funkciulinon de helpa Kolonio por regenerado de sinmortigintoj, kunlaborante, apud eminentaj incitoj pri la Sekretaj Doktrinoj, en la servoj de la Kultivejo de l' Sinjoro. Sed mi ja scias, ke ŝi certe honoris sian humilan ordenveston en la plenumado de nobligaj surteraj taskoj, veston, kiun ŝi nun sublimigas en la Transtombo, kiel ano de frata, modela kongregacio, en kiu ŝi merite rajtus direkti, kiel fidela kristanino, kia ŝi ja estas, unu el ĝiaj plej gravaj fakoj, nome tiu Internulejo!

Ĝentila kaj bonkora, ŝi invitis nin al mallonga ripozo, donante al ni, kiel ankaŭ al Rozalia, po unu el siaj belaj rozoj, kaj dume ŝi parolis, ridetanta kaj simpla, kiel gracia knabino:

"– Kiam mi vivis, enfermita kaj kvieta, en la Monaĥinejo de Sankta Maria, en la tempo de mia surtera ekzilo, mi kultivadis rozojn dum miaj distrohoroj, kiam iu aŭ alia malsanulo ne bezonis miajn servojn trans la muroj, kiuj min izoligis... Tio estis la sola distro, kiun mi ĝuis en la mondo el ombroj, dum mia lasta migrado sur ĝi! Mi alparoladis la rozojn, same kiel la ceterajn florojn! Mi ilin komprenis, edukis, nutradis, kvazaŭ ili estus al mi tre karaj pensohavaj estuloj, kun ili mi amuziĝis kaj al ili mi faris konfidencojn, deponante en iliajn bonodorajn korolojn la larmojn, kiujn el mia koro elverŝigis la suferoj naskitaj de elreviĝoj kaj teneraj resopiroj! En la komunumo ne licis posedi eĉ besteton, ian birdeton, nome ion ajn, kio povus deturni la inklinon kaj la atenton de la internulinoj for de la aŭsteraj devoj, al kiuj ili estis ligitaj, aŭ for de la intima kontemplado, ĉe kiu ili senŝanĝe devus resti, celante purigi al si la karakteron kaj la sentojn por tute harmonii kun la diaj efluvoj... Eĉ tiujn florojn mi kultivis ne por mi, sed por la komunumo... Sed ĉar mi sekvis la regulojn starigitajn de Francisko el Asizo, tial mi estis certa, ke nenion

malbonan mi faras, dediĉante iom el mia inklino ankaŭ al la delikataj floroj, elkreskantaj el miaj bedoj... kaj de tiam mi kutimis al ili... kiuj tute ne malhelpis min harmonii kun la sferoj de Amo kaj Bono, ĉar mi ja daŭre kultivas ilin en la tuta pleneco de la spirita vivo, neniam ilin forgesante...”

Forte impresita de la ĉarmoj radiantaj el la virga religiulino, Belarmino prezentis demandon, kiun mi opiniis maldiskreta kaj tre nekonvena.

“– Jes – li parolis –, mi vidas, ke vi ankoraŭ kultivas rozojn en ĉi tiu transtomba regiono... Sed mi sentas min konfuzita... Ĉu do tia afero estas ebla, fratino...?”

“–... fratino Celestina... por al vi servi, kara frato Belarmino! Kiel do?!... Ĉu vi ne vidas la florojn ĉi tie?... Kiel ĝi do ne estus ebla? Ho! kial oni ne kultivus florojn en la Transtombo, se ĝuste ĉi tie, kaj ne sur la materiaj mondoj, troviĝas la vera modelo de la Vivo, kiu kun ĉiu tago fariĝas pli riĉa pro la progreso de ĉiu el ĝiaj loĝantoj?!... Ĉu ekzistas io sur la Tero, rilata al la Bono kaj Belo, kio ne estus pala rememoraĵo de la Spirita Patrolando, portita de la kondamnitoj al la karna karcero?... Ĉu la Vivofluidaĵo, kiu ĝermigas la surterajn florojn kaj kreskaĵojn, ilin parfumante, beligante, ĉarmigante, ne estas la sama, kiu fekundas kaj animas la kvintesencon, kaj ties derivaĵojn, de ni utiligatajn en ĉi tiuj regionoj?... Ĉu la Dia Artisto, kiu ornamis la Teron per tiom da belaĵoj ne estas tiu sama, kiu vivigas kaj beligas la tutan Universon?...”

Ni dankis la delikatan donacon, kiu ŝajnis lumi kaj vibri, saturita per nekonataj magnetaj principoj. Ni enspiris la subtilan aromon, kiu plenigis la salonon, kaj dume ŝi pasigis nin al vasta galerio subtenata de majestaj kolonaroj. Ĝi aspektis kiel klaŭstro. Ambaŭflanke viciĝis klasikstilaj pordoj, kaj de supre la sama heleco, fluideca kaj dolĉa, lumis per blondaj tonoj, inspirante ĉe ĉiu paŝo konfidon kaj ĝojon.

La ĝentila sinjorino nin alkondukis al iuj el tiuj pordoj, kaj enirante ni surprize konstatis, ke ili apartenas al vastaj dormejoj. Ŝi klarigis:

"– Kiam ĉe la internulo de ĉi tiu Kolonio pozitive montriĝas la bezono kaj la tempo por reveni al lernado en la karno, cele al kompletigo de la ekzistado interrompita de la memmortigo, tiam li prezentiĝas en la Departemento de Reenkarniĝo, akompanate de la mentoroj, kiuj lin gvidas, kaj portante la necesajn rekomendojn kaj rajtigojn, elsenditajn de la direkcio de la Departemento, en kiu li staĝis inter ni.

El la kabineto de Frato Demetrio li estos sendita al ĉi tiu sekcio, en kiu li ekloĝos kiel internulo. Ni lin gastigos kun amo kaj ĝojo, penante fari lian staĝon kiel eble plej konsola kaj kuraĝiga... ĉar sinmortiginto ordinare estas tristemulo, kiun nenio ĝojigos, nekonsolebla estulo, kiu, konsciante sian baldaŭan revenon sur la surteran arenon en plej afliktaj kondiĉoj, pli forte angoras post kiam li transpasas la sojlon de ĉi tiu sekcio...

Ĉi tie li restos dum la preparoj por la granda vojaĝo. Liaj timoj, liaj meditoj pri la estontaj travivaĵoj, kiam li estos denove metita en karnaj vestoj, pliintensiĝos kun ĉiu minuto, ĉar, anstataŭ nescio, kontraŭe klaran konscion li havas pri tio, kio lin atendas en la areno, kie li devos ludi la heroan rolon de estulo nepre bezonanta kapabliĝi por la konkero de si mem, por atingi la regionojn de la vera Bono! Tiu korpremateco, kiu pliintensiĝas laŭgrade kiel konkretiĝas tiuj preparoj fariĝas vere angora, verŝigante oftajn larmojn el lia koro disŝirita de pento, timo, resopirado... ĉar ekde la tago, kiam aspiranto al reenkarniĝo transigas la sojlon de la Internulejo, li adiaŭas la Kolonion aŭ la Instituton, la majstrojn, kiuj lin instruis, la kunulojn kaj amikojn, kiujn li tie havigis al si, por ilin revidi nur post kiam finiĝos lia ekzilo... Estas ja vere, ke, reenkarniĝinte, li ne restos apartigita disde ĉi tiuj, kiel oni unuavide povus supozi. Kontraŭe, li ĉiam ankoraŭ estos objekto de la atento de ĉiuj, kiuj lin prizorgis dum la interniĝo en la Kolonio, ĉar lia restado en la materia kampo ne malpliigos ilian respondecon pri li, nek signifas, ke li estas malligita disde la Kolonio. Li ja povos ĉiam ankoraŭ veni ĉi tien por ricevi konsilojn, instruojn, konsolon de siaj iamaj

mentoroj, dank' al la dormo, kiu por tio ebligos al li relativan liberecon; kaj tion li nepre faros, ĉar li ankoraŭ restos sub nia prizorgo, kiel internulo en ĉi tiu Instituto, kaj ĉar ankaŭ la travivota reenkarniĝo estas nenio alia, ol unu el la rimedoj, kiujn ni disponas por la edukado nepre necesa al lia reboniĝo kaj al tio, ke li reprenu la normalan vojon al la glora konkero de la Progreso!

Sed... tiuj Spiritoj scias, ke, preninte sur sin la pezan ŝarĝon el surtera ŝlimo, ili ne plu ĝuos sian iaman mensklarecon, forgesos la ĉitiean fratan kunvivadon, la bonfaran benplenan ĉeeston de tiuj, kiuj estis al ili kvazaŭaj protektantaj anĝeloj kaj kiuj al ili sekigis la larmojn el malfeliĉo. Ĝuste tial ili angoras kaj suferas!

Mi kaj miaj asistantoj prigardos ilin ĉi tie, en la Azilo, helpante ilin readaptiĝi al la surteraj aferoj, vekante en ili la amon al la ekzistado sur tiu malavara planedo, kiun la Saĝo de la Ĉiokompatema tiel riĉe dotis kaj kiun nur la malprudentaĵoj de la homo, faris malmilda kaj sendanka!... ĉar estas grave ne forgesi, ke la sinmortiginto seniluziiĝis pri la vivo en la surtera socio, li ĝin malamas kaj volus ligiĝi al alia, kiu plibone respondus al liaj intimaj aspiroj! Multaj, terurite de la kulpelpagaj perspektivoj, kiujn nur ĉi tie ili plendetale ekkonas, pentas pri sia intenco kaj, pro senkuraĝiĝo, petas pri ioma prokrasto de la tempo de ilia naskiĝo, kaj tio estas al li konsentita. Plorante, ili estas rekondukitaj al sia deveno, transdonitaj al siaj lokaj protektantoj, kaj tie ili restos senprogresaj ĝis ili decidis fari la solan paŝon kiu al ili povos efektive ebligi pli bonan estontecon: – la reenkarniĝon!

Sed interniĝinte ĉi tie, ili ne restas senokupaj, atendante, ke iu por ili preparu la estontan surteran loĝejon. Kun siaj instruantoj ili klopodas por la preparaj paŝoj al sia reenkarniĝo, kunlaboras en la penigaj esploroj por elekti gepatrojn plej konvenajn al la naturo de la elprovado, al kiu ili devas submetiĝi antaŭ la sanktegaj leĝoj, kiujn ili iam malobeis, ĉar la memmortigintoj ĝenerale reenkarniĝas, por elpagi siajn kulpojn,

ne en la rondo de siaj plej amataj estuloj sed ja ekstere; ili studas, sub la orientado de la gvidantoj-misiistoj, la planadon de siaj surteraj aktivecoj, lernante, en iaspeca praktika leciono, pere de inteligente moviĝantaj bildoj similaj al teatraj aŭ kinematografaj scenoj, disvolvi tiujn aktivecojn, ilin realigi, rebonigi kaj konduki al ilia heroa celo, per ĝusta kaj prudenta agado; ili regule vojaĝas al la Tero, ĉiam akompanate de siaj bonkoraj protektantoj, por restado dum kiu ili provos orientiĝi rilate al la kutimoj, al kiuj ili devos adaptiĝi laŭ la medioj, en kiuj ili kuntrenos sian hontindan kondamnon, ĉar al ili ja konvenas rezignacii pri tia situacio antaŭ ol droni en la karnon, por ne senti tro arda la ŝanĝon de la kutimoj alprenitaj dum la kunvivado kun ni; kaj post kiam estas finitaj tiuj esploroj kaj elektita la familia rondo, ili ankoraŭ restos ĉe la estontaj gepatroj, penante altiriĝi de ili, ilin pli funde koni, adaptiĝi al iliaj manieroj, precipe se al ili trudiĝas, kiel puno aŭ necesa kondiĉo de progreso, renaskiĝi en malfavora medio, kie dum ĉiuj tagoj de sia vivo ili havos ĉirkaŭ si nur iamajn malamikojn de pasintaj ekzistadoj, Spiritojn fremdajn kaj pro tio indiferentajn al la malfeliĉoj, kiuj ilin skuos...”

“– Tio signifas, mia fratino, ke la aluditaj esploroj...” mi demandis, profitante mallongan paŭzon de la elokventa kunparolantino.

“–... rilatas al serĉado de iu familio, de iu hejmo, ĉefe de gepatroj sufiĉe karitataj por en sian sinon akcepti fremdan idon, kiu al ili ja estos motivo de konstantaj zorgoj, pro tio, ke li estas kondamnita al la doloraj elprovoj ligitaj al la reenkarniĝo de sinmortiginto! Ekzistas, miaj amikoj, eĉ doloraj, malfacile solveblaj kazoj! Ĉi tiujn prezentas tiaj malfeliĉeguloj, kiujn vi vidis en la Frenezulejo. Ili devas resti ĉi tie, en la Azilo, tiel longe ĝis oni trovos gepatrojn por ili, ĉar, kiel vi scias, tiaj Spiritoj, krom esti nekapablaj por kunlabori kun la mentoroj por sia propra afero, ankaŭ statas tiel malbone, ke al ili eblos renaskiĝi nur en materia envolvaĵo senfortigita de nekuraceblaj malsanoj, nekomprenebla

por normalstata enkarniĝinto, kio estos suferiga elprovado por la akceptontaj gepatroj! Kiel oni jam klarigis al vi, multaj el tiuj malfeliĉuloj revenos al la surplaneda vivo kiel paralizuloj, mensdebiluloj, eble surdmutuloj, nekuraceblaj malsanuloj, ktp, ktp, kaj rajtos aliri nur tiujn rondojn, kie gepatroj devas kulpelpagi per akraj elprovadoj. Tiuokaze, iliaj gvidantoj kaj sindonaj mentoroj starigas kun tiuj, kiuj povas fariĝi gepatroj kaj kiuj sin kompromitis per gravaj ŝuldoj antaŭ la Dia Justeco, kortuŝajn interkonsentojn, ekstremajn kontraktojn, kiel jena, laŭ kiu:

"– Ili konsentu akcepti tiujn malfeliĉulojn kiel filojn, ilin subtenante dum ilia kulpelpaga "via crucis", ĉar ĉi tiuj bezonas la reenkarniĝon por rekonsciiĝi el la torporo, en kiun ilin ĵetis la memmortigo, kaj tiel havigi al si pli bonan situacion.

"– Ili faru tiel sanktan karitaton pro amo al la Dia Ŝafido, oferita en la supro de Kalvario pro tio, ke li multe amis la pekulojn kaj deziris rekonduki ilin al la jubilo de la Senmorta Vivo, kaj rekompence la Superega Leĝo de Amo al la Proksimulo aljuĝos al ili la meriton de l´ Bonfaro kaj al ili donos honorajn oportunojn por efektivigi negrandajn verkojn sur la vojo de evoluado cele al kompensaj, feliĉaj situacioj.

"– Ili konsentu provizore fariĝi agentoj de la Legio de Maria, ŝirmante en sia amika hejmo iujn el ĝiaj zorgatoj nome tiujn plej malfeliĉigitajn de peka pasinteco, ĝis finiĝos ties necesa elpago, kiu ja estas la sola restaĵo el la terurega aventuro de l´ memmortigo!... Ĉar la Leĝo ordonas, ke Karitato kovru amason da pekoj... tial ili, la gepatroj, kiuj ankaŭ pekis kontraŭ la superregado de la Neerarema Leĝo, kvitiĝus el multaj kulpoj per tiu sublima virto, kiun ili ja povus praktiki, servante al la sanktaj decidoj de la Kreinto!

Sed, miaj amikoj, se unuj karitate konsentas plenumi tiel honoran kiel amaran taskon, aliaj tamen ilin rifuzas, preferante elpagi siajn ŝuldojn ĝis la lasta lepto, ol kontribui per siaj penoj por tio, ke unu el tiuj malfeliĉuloj riparu la sekvojn de sia makabra ago sub la ŝirmo de ama kaj digne konstruita hejmo. Konsciante,

ke al tio ili ne estas leĝe devigitaj, ili preferas travivi la malglataĵojn de siaj propraj elprovoj havante ĉarman, sanan idaron, ol mildigi ilin per ricevo de kompensaj kaj malavaraj oportunoj tamen kondiĉitaj al tia sublima karitata faro, nome fariĝi gepatroj de malgrandaj nenormalaj monstroj, kiuj al ili havigus nur ĉargrenojn kaj zorgojn...”

“– Kaj kiel do reenkarniĝos tiuj mizeraj malfeliĉkunuloj, ho Ĉiela Dio?!... Kiel ni reenkarniĝos, ni, al kiuj ĉio mankos, eĉ gepatroj?...”– mi demandis, impresita kaj maltrankvila, memorante, ke mi sendube revenos blinda al la karno, Mario sen la manoj, Belarmino malsana kaj malfeliĉa ekde la lulilo...”

“– Vi ricevos novajn informojn, miaj karaj fratoj, en la Sekcio de Esplorado! Sed nun mi daŭrigu la viziton en tiuj ĉambroj, kiuj ankaŭ vin iam gastigos, kiam vi komencos viajn elaĉetajn klopodojn...”

La Azilo similis grandegan internulejon kaj konsistis el kvar tre distingiĝaj fakoj, kvakam ili prezentis inter si nenian diferencon laŭ sia interna aranĝo.

En la unua kolektiĝis Spiritoj devenintaj de tiuj malpli malfeliĉaj regionoj de la Kolonio, nome la internuloj kaj lernantoj en la Instituto, jam inicitaj pri la ĝustadira Spirita Scienco. En la dua restis la internuloj de la Hospitalo Maria el Nazareto krom ankaŭ tiuj de la Izolejo, kiuj preferis tujan reenkarniĝon. La tria gastigis la malliberulojn de la Turo kaj la kvara estis destinita al tiuj de la Frenezulejo. La saman loĝadon oni havigis al la virinoj sed en aparta konstruaĵo situanta sur tereno apuda al la nia.

Celestina ebligis al ni ĉion plendetale esploradi. Tie oni faras registron pri la reenkarniĝonto: lia nomo, la loko de reenkarniĝo, la naskiĝdato, la nomo de la lando, la tempo de lia surplaneda ekzistado ktp, ktp; ĉio pri li tie restas modele arkivita!

La internuloj tie ligiĝas per samaj zorgoj, estas orientataj de senlacaj asistantoj, kiuj ĉion provas por ilin venkigi en la luktoj de la surtera elprovado. Kien ajn ilin alvokus iliaj bezonoj,

– ĉu al la Tero, ĉu al la kabinetoj por Analizo, en kiuj ili submetiĝas al la jam priskribita delikata operacio; ĉu al la sekcioj de Programado de Retravivotaj Provoj aŭ de Esplorado –, ĉiam ili nepre devas reveni al la Azilo, ĉies komuna koncentriĝa punkto ĝis la fino de ilia preparado kaj kien ili denove revenos post la fino de la planita korpa ekzistado. Tiu preparado ofte daŭras iom pli longe, escepte por la zorgatoj de la Frenezulejo, kiuj revenas al la materia kampo post mallongaj klopodoj limiĝantaj ekskluzive al la esplorado.

Post la fino de tiuj penigaj preparaj paŝoj, komenciĝas la etapoj de efektivigo. Tiam la direkcio de la Departemento elsendas ordonojn al la direktoro de la Laboratorio por Malgrandigo, ke ĉi tiu komencu la magnetan operacion necesan al la renaskiĝo kaj la koncernan altiriĝon al la feto, kies biologiaj elementoj jam disvolviĝas en la fekundigita ovolo, en la sanktejo de la patrina ventro. Ĉi tiu fariĝas do nenio alia ol kontinuaĵo de tiu Laboratorio, iaspeca provizora aŭ krizokaza fako de la Departemento de Reenkarniĝo, super kiu vigladas la teknikistoj komisiitaj por tiu grandioza servo kaj la spiritaj gvidantoj de la Spirito, kiu sub tia premo kaj kun la normalaj vibroj reduktitaj muldas sian korpon proporcie kiel progresas la gravedeco. Oni ankaŭ klarigis al ni, ke la ideala muldilo difininta la formon de la elkreskanta feto estas ĝuste tiu astrala korpo, kiun ni tiam portis sur ni – nome la perispirito –, kio donis al ni vastan komprenon pri la stato de nia estonta korpo, strukturota sub la malsaneca magnetismo de vibroj fontantaj el grandaj malfeliĉeguloj, kiaj ni estas. Tiujn klarigojn ni efektive jam pli frue ricevis de niaj paciencaj mentoroj!

Oni ne permesis al ni eniri en la “Laboratorio por Malgrandigo” nek en la kabineton de Analizoj, sed oni informis al ni, ke la interniĝo en la Laboratorion ne sekvigas, ke la kondamnito restus ligita al ĝi. Kontraŭe, potencaj magnetaj fluoj, fontantaj el la diaj, nemezureblaj fortoj, kiuj subtenas la Universon, peladas lin al la korpo, kiun li devas loĝi, estigante

inter ambaŭ reciprokan altiriĝemon kaj samtempe harmoniigante lian perispiriton al la perispirito de tiu, kiu konsentis, volonte aŭ devigite de iu dispozicio de la Granda Leĝo, fariĝi lia patrino kaj tiel kun li suferi kaj plori pri la dramaj kaj neeviteblaj sekvoj de memmortigo, de gravaj kaj malhonoraj kulpoj! Ke dum la tempo de tiu sinaltirado, kiu fariĝas malrapide, laŭgrade kiel progresas la gravedeco, la kondamnito iom post iom perdas la kapablon rememori sian pasintecon pro tio, ke lia astrala korpo suferis malgrandigon necesan al la muldado de la feto, kio ankaŭ fariĝas dank' al la vibracia kaj magneta efiko de la psikistoj, sin okupantaj pri la delikata operacio, sur la volon kaj la mensajn vibrojn de la paciento. Ke, proporcie kiel antaŭeniĝas la gravedeco en la patrina ventro, liaj vibroj, ĉiam pli premitaj, plej profunde enpuŝas en la astralan organismon liajn pensojn kaj rememorojn, la vivajn impresojn de la doloraj dramoj de li travivitaj en la pasinteco, el kio rezultas la Forgeso, vera aldono de Favorkoreco trudita de la Superega Leĝdonanto, kiu kompatoplene konsideras la malfeliĉegojn, kiuj okazus, se la homoj kapablus libere rememori la verajn kialojn de sia renaskiĝo sur la Tero en bedaŭrindaj kondiĉoj, ofte luktante kaj plorante de la lulilo ĝis la tombo! Ke, tien enirinte, li ekspertas en sia afliktita memo ian antaŭagonian staton, facile kompreneblan pro la konfuziteco reganta ĉiujn liajn fakultojn, lian menson, liajn vibrojn! Ke tia stato, tre dolora por iu ajn Spirito, fariĝas abomeneginda por memmortiginto, ĉar lia astrala organismo troviĝas turmentege skuita de la ŝoko, kiun al li trudis la violento de la memmortigo kaj kies muldiĝon li spertos nur multajn jarojn poste, kiam okazos la natura, malrapida malligiĝo el la magnetaj katenoj lin kuntenantaj la la korpo, al kiu li estas ligita ekde tiu operacio en la Laboratorio. Ni ankaŭ eksciis, ke tiu tuta epopeo, inda je la Dia Kreado, havos sian plenumon faciligita kaj siajn perspektivojn malakrigitaj, se la paciento elmontros sinceran penton pri sia malbona pasinteco krom ankaŭ bonvolon kaj humilecon por ripari faritajn erarojn kaj

progresi celante la honoran aprobon de sia konscienco, ĉar tiam lia volo fleksibliĝos sub la protekta agado de la sindonaj Gvidantoj, kiuj tutcerte klopodos por elirigi lin venkinta kaj rehonoriĝinta el iu malbela implikaĵo el faloj kaj krimoj kontraŭ la Neerarema Leĝo de la Ĉiopova!

Tiel vizitinte ĉiujn fakojn, ĉiam ricevante, ĉu de Fratino Celestina, ĉu de Rozalia, ĉu de unu aŭ alia estro de kabineto, altvalorajn klarigojn, ni alvenis al la ĉambroj destinitaj al la Programado de Retravivotaj Provoj, kies celon ni kontentige prezentis en ĉi tiu ĉapitro. Ni nun aldonos, ke, enirinte la komfortan konstruaĵon, en kiu funkciis tiu sekcio, ni estis kaptitaj de agrabla surprizo: ĝia funkciularo konsistis el sinjorinoj, el kiuj unu estis junaj, eĉ tre junaj, apenaŭ elirintaj el la infaneco, dum aliaj troviĝis jam en plena matureco aŭ eĉ atingis respektindan maljunaĝon! Aktivaj, klarmensaj, perfekte kapablaj por la alta komisio al ili konfidita, ili konsultadis notojn venintajn de la kabinetoj de la Analiza sekcio kaj la ordonojn de la Templo kaj kompetente skizis la fekundan planon de la ekzistado, kiu konvenus al ĉiu zorgato de la Kolonio revenonta al la Tero en karnaj vestoj. Sed ilin direktis inicitaj saĝuloj kaj la spiritaj Gvidantoj de ĉiu el ili, kiujn ili obeadis kvazaŭ filoj. Kiel jam dirite, ni vidis, ke multaj el la aspirantoj mem kunlaboradis en la farado de tiuj planoj, kiuj prezentus nenion alian ol ekstreman ĉenon de liaj kulpelpagoj, la angorplenajn tagojn, kiuj el iliaj premegataj koroj eltiros ardegajn larmojn; la decidajn atestojn, kiujn ĉiu kulpulo bezonas prezenti al si mem por senpezigi la konsciencon el la malhonoro, kiu ĝin mallumigas, ĉefe sinmortiginto, kiu pli ol ĉiu alia, restas nekonsolebla antaŭ la abismo de li mem elfosita.

Mi ne povis min deteni. Antaŭ ekzemplero de tiuj planoj – vera savogvidilo, kiu el la pekulo, se ĉi tiu ĝin observos, faros idealan homon, konvertiĝintan al la sublima scienco pri la Devo –, mi demandis, min turnante al unu el la kompetentaj teknikistoj, kiuj direktis la gravan fakon:

"– Kaj ĉu ni ĉiuj, la sinmortigintoj, perfekte plenumos, reenkarniĝinte, unu tian programon?..."

La eminenta psikisto, ne malkaŝante ian melankolian esprimon, ridetis kaj samtempe respondis:

"– Se ĉio al vi ĵus prezentita, mia amiko, devenas de ia kaŭzo, estas memkompreneble, ke ĉi tiun kaŭzon oni devas korekti, por ke la respektivaj efikoj harmoniu kun la neerarema leĝo reganta la kreaĵaron! Se estas plenumenda programo, tio signifas, ke la Supera Justeco povis ĝin proponi kaj ke, pro tio, ĝi estos observata malgraŭ ĉiuj interesoj kaj sinoferoj! La leĝaro, kiu fundamentas la principojn de ĉi tiu institucio, estas la sama, kiu movas la Absolutan Universon! Tio estas la kaŭzo, kial niaj decidoj konformas al la plej perfekta justeco, kio estas la samo kiel diri, ke la pentinto ne povos ne rigore plenumi tian programon, ĉar ĝi ekzistas ĝuste tial, ke li mem ĝin estigis per sia malbona konduto! Ĝi do kunekzistas kun li! Ĝi troviĝas en li, kiel konsista parto de lia personeco! Li nepre bezonos plenumi ĝin por liberiĝi de la multego da ombroj, kiujn ĝia malobservo verŝas sur lian animon! Cetere li povos ĝin observi, ĉar li tiucele disponas ĉiujn eblecojn! Se li ne ĉiam tiel agas, tio estas tial, ke li denove deflankiĝis de la bona vojo! Tiuokaze li trenos sur sin novajn respondecojn kaj ripetos du, tri, kvar fojojn sian surplanedan migradon, por ke li povu elpagi, ĝis la lasta cendo, siajn ŝuldojn kontraŭ la Superega Leĝo, laŭ la averto de la Eminenta Majstro!..."

Ĉe tio ni adiaŭis la ĝentilan florkultivistinon kaj, forlasinte la sekcion pri Programado de Retravivotaj Provoj, ni direktis nin al tiu pri Esplorado.

Grandnombra funkciularo tie donis sian kunlaboron, sub la direktado de unu estro kaj pluraj subestroj, ĉar la tieajn taskojn devis plenumi komisionoj el du ĝis kvar personoj krom unu direktanto, kiuj estis komisiitaj prepari eblecojn por la renkarniĝo de difinita grupo da enaziliĝintoj.

Sed, kiel sciate, mankis laboristoj. Tiel ni tie trovis, donantajn sian altvaloran helpon ankaŭ al tiu Departemento, iujn personojn, kiujn ni jam konis en aliaj lokoj, nome Teokriton mem, kiu gvidis malgrandan esplorkaravanon konsistantan el liaj disĉiploj Romeo kaj Alcesto, kies laboroj disvolviĝas, kiel ni scias, sur la krusto de la Tero; la Grafon Ramiro de Guzman, estrantan alian komisionon, al kiu apartenis la du Canalejas; Olivieron de Guzman, la eminentan edukiston ĉe la Turo, kune kun Pastro Anselmo; Frato Johano, respektegindan pro sia impresa orienta teniĝo, krom multaj aliaj efike prudentaj kaj kleraj por la plenumo de sia grava komisio.

Ni kortuŝe rekonis la nenegeblan bonvolemon de tiuj servantoj de la Milda Nazaretano, kiuj laŭ la ekzemplo de la tre amata Majstro – kiu ne disdegnis aperi sur la Tero en homa formo, celante la instruadon de la kreitoj konfiditaj de la Superega Patro al Lia Prizorgo – ankaŭ malplialtiĝis, retenis siajn vibrojn, materiiĝis, fariĝis densaj kaj preskaŭ homnaturaj por servi al la afero iniciatita de Tiu neforgesebla kaj nesuperebla Majstro! Mirigis nin la fakto, ke de ili ni ricevadis tre esprimoplenajn elmontrojn de frateco, dum niaj animoj, kortuŝitaj, murmuretis al nia komprenado, ke ni devas respondi al tiel amaj zorgoj per deca obeema sintenado kontraŭ tiel noblaj instruantoj. Frato Teokrito deturnis nin de tiaj pensoj venante al ni kaj nin salutante, kaj tuj poste li kun rideto demandis:

"– Laŭ mia observado, amikoj, vi multe profitas el la instruoj, kiujn oni al vi havigas ĉi tie... Mi estas informita, ke vi pri ĉio interesiĝas, kio min bonege impresas, ĉar ĝi antaŭvidigas kompensan ŝanĝon en viaj destinoj... Kion vi induktas el ĉio, kion vi ĝis nun observis?..."

Nun estis Belarmino de Queiroz e Souza, kiu esprimis la ĝeneralan opinion:

"– Ni induktas, plej eminenta frato – li varmosente diris –, ke se ni, kiel homoj, sciintus tiajn aferojn, ni tre probable estus evitintaj la memmortigon, lasante nin konduki laŭ reguloj

kontraŭaj al tiuj, kiuj nin ruinigis!... Kio min aparte koncernas, mi konscias, ke mi estos forta antaŭ la sekvoj, kiujn mi devos alfronti laŭlonge de mia destino... ĝis mi kovros la deficitojn, kiuj makulas al mi la konsciencon! Ho kara Frato Teokrito! Kvankam mi suferas, mi tamen sentas, ke mi nun estas alia homo... tio estas, alia Spirito! En mia memo eklumis torĉoj de neestingeblaj esperoj, kiuj min potence fortigas kaj rekuraĝigas, instigante min ekmarŝi cele al la estonteco, kia ajn ĝi estos! Pozitive scii, ke mi *Ekzistas*, ke mi *Estas*, ke mi *Estos,* konvinkita pri tio, ke eĉ ne unu solan el miaj plej sanktaj inklinoj, el miaj aspiroj kaj idealoj, el miaj klopodoj por riĉigi miajn intelektajn kaj moralajn provizojn, mi iam ajn perdos disfrakasitajn inter la fina punkto de ĉia ekzistaĵo; certa pri tio, ke la Eterneco estas mia sankta heredaĵo, kiun mi laŭleĝe plenrajtas pro tio, ke mi, kiel Spirito, havas dian originon; kaj konvikita pri tio, ke mi devos trapasi la sinsekvon de l' tempoj progresante senĉese, riĉigante miajn fakultojn per atributoj, kiuj min honore kondukos al grandiozaj sferoj de la Spirita Vivo, per la konkero de mi mem cele al la konkretigo de la dia idealo – jen por mi raveganta feliĉo, kiu igos min forgesi sinoferojn kaj larmojn, venki lacecon, alfronti ĉiujn krimajn sekvojn de la pasinteco, kaj nur zorgi pri la konkero de la estonteco, eĉ se mi por tiu celo devos supreniri dolorajn, afliktoplenajn kalvariojn! Kiel homo, mi neniam konceptis la eblecon, ke mi iam fariĝos la heroo de tiel sublima epopeo! Mi estas preta por lukti, Frato Teokrito! Lukti kaj suferi, por lerni, konstrui kaj venki! Mi scias pri tio, kio min atendas ĉe la batoj de la ekzistadoj sinsekvontaj dum mia irado! Mi scias pri la amaraj horoj, kiuj skuos la potencojn de mia animo en la daŭro de la jarcentoj fluontaj dum mia evolua marŝo. Sed tio ne gravas! Ne gravas! Mi estas nemortema! Kaj se iu Ĉiopova Dio destinis min al la Eterneco, tio celas ja la efektivigon de sublima idealo, kies reala perfekteco nealireblas por la ankoraŭ mallarĝa kompreno de kondamnito en Korekta Kolonio; sed

tute ne porĉiaman pekadon kaj suferadon, ĉar la Ĉiopova Kreinto ne sin kontentigus havigi al sia idaro tiel nesufiĉajn agrimedojn!... Ho respekteginda Teokrito! Mi ankoraŭ sentas min tre malprogresinta! Mi ankoraŭ ne liberiĝis eĉ de la baciloj, kiuj formordis mian lastan animalan organismon, de mi detruitan antaŭ ol la viruso de la terura tuberkulozo ĝin tutan putrigis, ĉar mi senkuraĝiĝis vidante ĝin naŭzaspekta kaj abomeninda! Mi scias, ke al la Tero mi devos tre baldaŭ reveni, malriĉa, orfa, ankoraŭ tuberkuloza, premota de ĉiutagaj elreviĝoj, kiel kondamnito, kiu ne ĝuos la varmon de eĉ unu sola iluzio! Mi scias tion! Sed mi estas preta por ĉion venki! Mi eĉ ĝojas pro la severeco de tiu Superega Justeco, ĉar la nerefutebla logiko, kiu ĝin proklamas, ankaŭ montras, ke ĝi fontas el saĝo imponanta per la forto de la Rajto! Kaj pro tio, mi klinas min antaŭ ĝi, rezignacie kaj respektoplene!...”

Teokrito ridetis, bonvoleme almetis sian desktran manon sur la ŝultron de la parolinto kaj diris kun patra tono:

“– Vi havas brilan, flaman parolon, mia kara Belarmino!... kaj dum vi paroladis, mi pensis pri tio, kiel admirindaj estis la prelegoj, kiujn vi faris dum viaj klasikaj lecionoj pri Dialektiko!... Persistu ĉe tiel belaj kiel edifaj decidoj – jen mia plej sincera deziresprimo... ĉar tiamaniere la vojoj de la progreso, kiun vi nepre devos efektivigi, estos ebenigitaj kaj facile trapaseblaj!... Sed ne lasu vin tro entuziasmiĝi pro la brilego de la dia panoramo de la Vivo, kiu jam multajn antaŭ vi blindigis... La evoluado de la Spirito direkte al la Lumo estas sendube bela kaj grandioza. La vivo de l' homo, laŭ ties senĉesa celado al la plibona ĝis la dia supro, estas glora epopeo honoranta tiun, kiu ĝin travivas! Sed peniga estas tiu irado, mia amiko! La vojo estas semita per dornoj kaj erikoj, kiuj postulas de la migranto al la Lumo la plej aktivajn energiojn, la plej edifajn sinoferojn! Mi konstatas, ke vi estas sincera idealisto instigata de nobla bonvolemo, kaj tio multe ĝojigas min! Sed la sola entuziasmo kondukos neniun al efektiva venko, sed ja al riskoplena aventuro! Konsideru la neceson, ke

vi provizu vin per solidaj moralaj armiloj por la tumulta vojaĝo, kiun vi devos fari por supreniri la unuan ŝtupon de tia senmezura evolua spiralo, kia estas via destino, kaj kiu ŝtupo estos nenio alia ol via proksima ekzistado en la surtera scenejo... En via lasta enkarniĝo vi estis la unuenaskito de bonreputacia familio, en kies sino ne mankis al vi protektaj zorgoj kaj respekto! Vi estis klera homo, vivanta senzorge meze de diversaj ĝuoj kaj komfortaĵoj, kiujn al vi havigis la oro kaj la sendubaj prizorgoj de tenera, sindona patrino... Malgraŭ ĉio tio, vi tamen fiaskis, ne eltenante eĉ la suferojn de fizika malsano, elprovado komuna al la tuta homaro! Pensu nun, mia kara Belarmino, pri tio, kia estos via vivo se vi, kiel vi deziras, fariĝos orfa, malriĉa, malsana, se vi ĝuos nenian konsolon, nenian esperon kaj estos persekutata de neforigebla malfeliĉo!... Ĝi ja estos ia epopeo, ne malgranda nek senigita je sublima grandiozeco, kiun vi travivos kaj venkos – ĉar vi volas venki! – jes, ia epopeo, ĉar ĝi estos elaĉeta kalvario, kiun vi irados digne kaj rezignacie, sen ribeloj nek blasfemoj kontraŭ la Providenco, kiuj ja paligus vian venkon aŭ eĉ ĝin nuligus!... Necesos, Belarmino, tre necesos ia alia, krom la entuziasmo!... kaj konvenas, ke vi prepariĝu, antaŭ ol komenciĝos la batalo..."

Mario, kiel ĉiam maltrankvila, alproksimiĝis:

"– Ĉu vi bonvolus aŭskulti min dum momento, Frato Teokrito?..."

"– Tute preta, mia filo! Parolu ĉion kun konfido..."

"– Temas pri tio... mi volas preni decidon... mi jam prenis ĝin... sed mi bezonas helpon... mi sentas min iom senkonsila..."

"– Daŭrigu, Mario, mi tion bone scias..."– kortuŝite kuraĝigis la direktoro de la Hospitalo Maria el Nazareto.

"– Frato Teokrito! Kiu rekte respondecas pri mi en ĉi tiu Korekta Kolonio, kie mi gastas kiel internulo?..."

"– Mi mem, Mario"..."

"– Des pli bone, ĉar mi tiel esperas renkonti faciligojn por la projektoj, pri kiuj mi entuziasmas... Sinjoro... Frato... Mi vin

petegas, kompatu min, mi ne eltenas plu! Konsentu mian revenon en la surteran socion, mi volas denove esti homo! Mi volas senŝarĝigi min el la ofendoj, kiujn mi mem faris kontraŭ mia familio!... kontraŭ mia patrino, ho Dio de l' Ĉielo, kiun mi kovris per ĉagrenoj de l' lulilo ĝis la tombo; kontraŭ mia edzino, kiun mi perfidis kaj forlasis al la ĉiutagaj sortoŝanĝoj! Kontraŭ miaj filoj, kiujn mi forpuŝis kaj forgesis... kaj kontraŭ Eŭlina... Mi volas liberiĝi de la obseda premo, kiun sur mian memoron faras la rimorso pri mia krima konduto kontraŭ tiu kompatinda virino! Mi bezonas forgesi, Frato Teokrito, ho, super ĉio forgesi, por ĝui kelkatempan pacon, serenecon, dum kiu mi disvolvu mildigocelajn klopodojn kapablajn kvietigi la angorojn, kiuj boligas al mi la konsciencon! Ĉion mi volas provi, por ke mi ankaŭ progresu – ĉar la Leĝo instigas la tutan Kreaĵaron al senĉesa progreso, laŭ la instruoj, kiujn ni ĉi tie ricevas. Mi volas kulpelpagi kaj ripari!

La humiligita kaj malfortika bildo de Eŭlina, sendefenda sub mia brutaleco, baraktanta en malhumana strangolado inter miaj manoj, absorbas miajn fakultojn, obsedas al mi la pensojn, frenezigante la plej intimajn fibrojn de mia memo! Kaj mi bezonas forskui de mia menso tiun satanan bildon, por ke la pardono de la Ĉielo povu prirosi per esperoj mian nekonsoleblan konsciencon! Mi volas suferi, Frato Teokrito! La tragika turmento en la Sinistra Valo ne sufiĉis! Mi tie baraktis ne pro Eŭlina sed pro mi mem, travivante la disonancajn fazojn de mia memortigo! Mi surgenue promesis al la dolorplena, agonianta ombro de Eŭlina, ke mi denove estos homo, ke mi trenos ekzistadon, de la lulilo ĝis la maljunaĝo kaj la tombo, senigita je tiuj manoj, kiuj ŝin strangolis!... Mi mem trudos al mi tian punon, kiel pruvon pri mia sincera pento! Ĝin trudas al mi ne Dio, la Sinjoro! Ĝin postulas ne la Leĝo: estas mi, kiu meminiciate petegas la Ĉiokompateman Patron ĝin konsenti al mi, kiel superegan konsolon al mia malfeliĉo de perfidinto kontraŭ Lia Leĝo de Amo al la Proksimulo; kiel ekstreman oportunon por

ke mi rehonorindiĝu antaŭ mi mem, ĉar la morto estas ĥimero tromploganta la nesingardulojn, kiuj sin ĵetas en la densejon de memmortigo! Jes! Mi vivos sen la manoj, kiujn mi uzis por murdi kompatindan, sendefendan virinon. Resaltu kontraŭ min la krimon kontraŭ Eŭlina! Kaj mi fariĝu tiel sendefenda, sen la manoj, kiel Eŭlina, en tiu abomeneginda nokto, estis senforta kaj konsternita de mia kruelegeco! Mi kredas, Frato Teokrito, ke nur tiel mi trovos faciligon por poste alfronti la ceterajn ŝuldojn kaj ilin pagi kun la patra helpo de mia Dio kaj Kreinto!...”

La eksbohemiano el Lisbono larmegante paroladis, kiam nia nobla spirita protektanto kortuŝite kaj serioze rimarkigis:

“– Ĉu vi jam mature pripensis la amplekson de la ŝuldiĝoj, kiujn vi alfrontos ĉe tia reenkarniĝo, mia kompatinda Mario?...”

“– Jes, Frato Teokrito!”

“– Mi efektive konstatas, ke vi estas sincera kaj forta por tiu kulpelpago kaj plene pentas vian kulpan pasintecon! Tio sendube prezentas la konsilindan vojon por la solvo de via afero, drastan rimedon, kiu vin malpli lante kondukos al la rehonorindiĝo, kiun via konscienco postulas! Sed pripensu, ke vi ankaŭ estas sinmortiginto kaj ke, pro tio, la malbona stato de via nuna organismo, de via fluideca envolvaĵo, kiu funkcios kiel muldilo de via estonta karna strukturo, nepre trudos al vi, ĉe la renaskiĝo, ian malsanan korpon, debiligitan de malordoj nekuraceblaj en la materia, aŭ surtera, vivo...”

“– Mi ja tion volas, Frato Teokrito!... Ĉio, ĉio estos preferinda al tiu turmentega rimorso, kiu tenas min katenita al la infero, brulkonsumanta mian animon!... Kiel homo, kiam ĉio mankos al mi kaj la malfeliĉoj min skurĝados, mi almenaŭ havos ian konsolon, kiun la Favorkoreco de la Ĉioindulgema konsentos al mi kiel ekstreman almozon pro mia senrimeda situacio: la Forgeson!...”

Kortuŝite, la bela inicito promesis tujan interesiĝon pri lia peto kaj patrece aldonis:

"– Post kiam finiĝos la instruado, kiun ni ĉi tie havigas al vi, vizitu min, Mario, en mia Departemento, por ke ni interkonsentu pri la preparoj por tiel delikata entrepreno..."

Tuj poste li invitis nin aliĝi al la grupo, kiu, sub lia direktado, esplorserĉos rimedojn por la jam ordonita kaj programita reenkarniĝo de iuj el liaj zorgatoj, kiuj tiel submetiĝos al tiu plej bona terapio ankoraŭ sub lia prizorgo, kvankam multaj el ili jam estis ligitaj al la Hospitalo Maria el Nazareto. Sed ni partoprenos kiel simplaj observantoj, ĉar nia stato ne permesis al ni ian ajn kunlaboron.

Ricevinte jam la koncernajn instrukciojn, preta por komenci la dornan komision, la sindona servanto de Maria sin turnis al ni kaj parolis:

"– Ni ankoraŭ disponas multe da tempo, ĉar la min koncernantaj laboroj plenumeblas nur en la nokta silento. Iru do ripozi, miaj karaj amikoj, ĝis mi sendos voki vin, por ke ni aliru la difinitan lokon, ĉar ni revenos nur tre malfrue en la nokto..."

Roberto kaj Karlo alproksimiĝis kun la celo rekonduki nin al la pavilono, en kiu ni loĝis. Rozalia adiaŭis, promesante renkontiĝi kun ni en tiu sama loko, en la sekvanta tago, por daŭre plenumi la rekomendojn de nia tre amata protektanto, Frato Teokrito.

# Ĉapitro VI

## “Al ĉiu laŭ liaj faroj”

“Vere mi diras al vi, ke vi neniel eliros el tie, ĝis vi pagos la lastan kodranton.”

Jesuo-Kristo
**La Nova Testamento.**[1]

Kun emocio ni forlasis, ĉirkaŭ la noktomezo, la Hindan Pavilonon, obeante la alvokon, kiun nia patra amiko sendis pere de ambaŭ Canalejas.

Ĝis tiam ni ankoraŭ ne eliris nokte. La severa disciplino de la hospitalaj domoj, kiel vera korekta metodo, trudis al ni la devon enfermiĝi je la sesa vespere, kaj al internulo neniel estis permesite restadi ekster la muroj de sia loĝejo post tiu horo. Escepton povus ordoni nur la direktoro de la Departemento, kiu tre malofte kaj ekskluzive por instruaj celoj tion faris.

La lokoj, kiujn ni trapasos ĝis la kvartalo de la Viglado, same kiel la ceteraj fakoj kaj Departementoj, ne estis mallumaj, kontraŭe heligis ilin ia sistemo de lumigado komparebla kun neniu alia samspeca. Al ni estis nekomprenebla la naturo de tiu lumo, kiu etendiĝis tra la vastaj aleoj inter arboj kovritaj de nebulo. Sed ni poste venis al la konkludo, ke temas pri elektro mem, oportune utiligata en la astrala medio. Sed efektive, tiu heleco, kvankam modera, diskreta, iriziĝis ĉe la vesperroso,

[1] Sankta Mateo, 5:25 kaj 26

estigante kristalecajn efektojn tre rimarkindajn, eĉ belajn, sur la neĝkoloran eksteraĵon de la loko.

Atendis nin veturilo, el tiuj ordinare uzataj de la internuloj por la loka cirkulado. Alveninte en la sidejo de la Viglado, ni vidis, ke multenombra karavano pretas forveturi kaj ke en ĝi partoprenas lancistoj kaj milicianoj certigantaj la ĝeneralan bonordon. Dum kelka tempo ni sentis, ke la veturilo glate glitadas, estigante nenian malkomforton. Kaj tiela estis ĝia ordinareco, ke ni neniel konscius la veran naturon de ĝia movoforto.

Subite la veturilo haltis kaj unu gardisto afable invitis nin eliri, kion ni faris kun ĝojo kaj scivolo.

Ni troviĝis en vasta korto ĉirkaŭita de potencaj muroj, kiu, malgraŭ la malfrua horo, prezentis viglan cirkuladon de piedirantoj, elkarniĝintaj kaj eĉ enkarniĝintaj. Ĉi tiuj sin montris en siaj astralaj envolvaĵoj, dum la materiaj korpoj restis en la litoj, ripozante ĉe reboniga dormo. En la fundo, la konstruaĵo grandega, riĉe lumigita, tute blanka kaj brilanta ĉe la heleco de potenca lumilaro, ŝajnis al ni ia hotelo aŭ publika oficejo destinita al nokta funkciado. Vere temis nur pri iu fako de la Kolonio, kvartalo necesa pro la diverseco de servoj plenumataj de tiu grava institucio, ia translokebla krizokaza fako, pri kiu al ni parolis la estro de nia Departemento kaj kiu al ni ne estis tute fremda, ĉar pri ĝi ni aŭdis aludojn, kiam ni eksciis la aferon de Greta Silvejra. Milicianoj de la Leĝo gardostaris ĉe la enirpordegoj kaj ankoraŭ etendis la vigladon al la ĉirkaŭaĵoj.

Ĉiu grupo da karavanuloj disponis en tiu konstruaĵo apartajn fakojn, en kiuj ili instalis laborkabinetojn. Alveninte la lokon destinitan al Teokrito, ni konstatis, ke ĉiu fako, ja estis ia laborkabineto kun ties diversaj aparatoj, ankaŭ ekzistantaj en la Kolonio, kaj sekreta parolejo.

Teokrito venigis al si Romeon kaj Alceston kaj dum li invitis nin sidiĝi sur la komfortaj foteloj, per kiuj estis meblita la antaŭĉambro, li transdonis al ili du adresojn, kun jena instrukcio:

“– Antaŭ ĉirkaŭ du horoj la sinjorinoj, kies adresojn mi al vi konfidas, dronis en reboniga dormo. Alportu ilin ĉi tien, sed ne antaŭ ol provizi ilian fizikan korpon per magnetaj rezervoj... Penu kune alkonduki ankaŭ iliajn edzojn aŭ konkubojn... Ĉi tiu rekomendo tamen ne estas nepre plenumenda...”

Teokrito disponigis al ili helpantojn prenitajn el la gardantaro mem de la Fako krom ankaŭ milicianoj por la necesa sekureco, kaj ilin ambaŭ forsendis kun kuraĝigaj vortoj. Tuj poste li sin turnis al ni kaj, sidiĝinte apud ni, komencis viglan konversacion.

Ni sentis nin tre feliĉaj. La ĉeesto de tiu alloga persono, kies demokrataj sintenoj nin tiel multe ĝojigis, efikis sur nian memon per tiel dolĉaj kaj bonfaraj impresoj, ke ni sentis nin revigligitaj kaj ravitaj. Ia natura timemo malhelpis, ke ni lin alparolu antaŭ ol li sin turnus al ni, sed li, konstatinte la sciavidon naĝantan en niaj pensoj, nepetate ĝin kontentigis, bonvoleme kaj ridetante, per tre utilaj klarigoj:

“– Mi bone konscias la demandemon, kiu ekde la hodiaŭa antaŭvespero ekscitas vian scivolon, ja laŭdindan ĉe tiu okazo, ĉar mi rekonas, ke el viaj pensoj radias la nobla strebo la lernado. Dum ni atendas la revenon de miaj karaj disĉiploj el sia misio, ni profitu la okazon por malgrandaj rimarkoj. Do demandu min, mi estas je via dispono.”

Estis Mario, kiel ĉiam, kiu la unua kuraĝis, ĉar, kiel ni scias, li agitiĝis ĉiufoje kiam li aŭdis aludojn pri la Tero kaj la renaskiĝo en ties scenejoj:

“– Jes, mia amiko! Mi ne venigus vin ĉi tien, krom por liveri al vi kelkajn informojn pri nia esplorlaboroj. Romeo kaj Alcesto iris al la insulo Sankta Mikelo kaj al iu vilaĝeto en la brazila Nordoriento – lokoj kie la malfeliĉo pro necesbezonoj atingas amplekson neimageblan por la feliĉaj loĝantoj de la civilizitaj regionoj – serĉe de du niaj fratinoj, kies nomoj estas

enskribitaj en niaj registroj kiel respondecaj pri grandaj krimoj en la pasinteco, kaj kiuj nuntempe klopodas morale releviĝi pere de ekzistadoj kun severaj elprovoj pri pento, rezignacio, humileco kaj pacienco... Miaj disĉiploj kondukos iliajn Spiritojn ĉi tien, ĉar pro la malfrua horo iliaj materiaj envolvaĵoj dronas en profunda kaj reboniga dormo. Ĉi tie ni provos interkonsenti kun ambaŭ pri la ebleco, ke ili fariĝu patrinoj de du kompatindaj internuloj de la Frenezulejo, por kiuj la sola rimedo mildigi sian situacion estas reenkarniĝi en familio obskura kaj suferanta, ĉar nur tiel ili sukcesos liberiĝi de la hontigaj ombroj, de kiuj ili lasis sin infekti...”

“– Laŭ niaj observoj, tiuj malfeliĉuloj renaskiĝos en tre malfacilaj kondiĉoj, ĉu ne?...” impresite intermetis Belarmino.

“– Efektive, frato Belarmino! – li daŭrigis. – Ili troviĝas en tiel malfavora situacio, ke antaŭ ol sin submeti al la ĝustadiraj elprovoj, kiujn ili nepre ripetos ĉar de tiuj provoj ili sin fortiris per konscia kaj tute respondeca memmortigo, ili povos animi nur malsanan, difektitan karnan envolvaĵon – al kiu ili altiriĝas pro siaj agoj –, kaj vivos dum la tempo, kiu kompletigus ilian lastan surteran ekzistadon, interrompitan de la memmortigo antaŭ la difinita momento. Tiamaniere ili malakrigos siajn vibrajn malordojn kaj havigos al si kapablon kaj trankvilon por ripeti la fiaskintajn provojn... sed tio postulos duan surteran travivaĵon, nome novan reenkarniĝon, kiel oni facile konkludos... Ni jam antaŭe konsultis plurajn sinjorinojn, en aliaj similaj regionoj, ĉu ili volonte inklinus al la karitato akcepti malsanajn filojn pro amo al Bono kaj respekto al la sublimaj principoj de la Universala Frateco. Sed bedaŭrinde neniu el ili lasas sin gvidi de moralaj principoj sufiĉe altaj por konsenti servi al la Dia Afero volonte kaj abnegacie! Tial la reveno de tiuj suferantoj en la mondon de kulpelpagoj prokrastiĝis, kvankam estis nepre urĝe mildigi ilian situacion per tiu ekstrema rimedo! Tiam la ĉefdirekcio de la Instituto sendis al ni informojn pri tiuj du menciitaj sinjorinoj, kiuj ambaŭ estas kapablaj alfronti la dornan komision tial, ke ili ŝuldas grandajn riparojn al la Leĝoj de la Kreaĵaro!...”

“– Ni supozu, Frato Teokrito, ke ambaŭ rifuzos?...” mi demandis, fidela al la acida pesimismo, kiu min ankoraŭ ne forlasis.

“– Ĝi ne estos probabla, mia kara Kamilo, ĉar temas pri du animoj, kiuj forte pentas sian malbonan pasintecon kaj kiuj nun, humilaj, obskuraj, nur strebas al rehonorindiĝo per sinofero kaj abnegacio! Mi ricevis la komision konvinki ilin volonte akcepti la delikatan kaj heroan taskon. Sed se ili rifuzos, la Dia Providenco, enkorpigita en la Leĝo reganta la kampon de la Kaŭzoj, rajtos trudi al ili tiun komision, kiel elprovon, cele al riparado de iliaj malbonaj faroj, ĉar ambaŭ estas Spiritoj, kiuj, en antaŭaj surteraj ekzistadoj, miskondutis kiel patrinoj, krime malŝatante la sublimajn funkciojn de la Patrineco, senvivigante, en sia propra ventro, la karnajn envolvaĵojn destinitajn al Spiritoj, kiuj devus per ili renaskiĝi, – kelkaj por plenumo de brilaj misioj –, kaj bedaŭrinde neglektante la protekton kaj prizorgadon al tiuj samaj filoj, kiujn la Providenco al ili iam konfidis... Nun, dronintaj en la mallumo de l' krimoj, kiujn ili faris kontraŭ la Dia Leĝaro, malŝatante la Naturon, la Moralon, la Edzecon, la aliulajn rajtojn kaj ankaŭ sin mem; malliberigitaj, unu en la soleco de insulo, kiun ŝi neniam povos forlasi, kaj la dua en la krudeco de rigorklimata internlanda regiono, ambaŭ, anstataŭ ricevi filojn misiohavajn, inteligentajn, rigardatajn de la Astrala Mondo kiel noblaj kaj dignaj kaj, ĝuste pro tio, utilaj kaj estimataj – kiaj ili nepre estus en la surtera socio – devos kontraŭe elpagi la faritajn infanmurdojn, klinante sin super mizerajn lulilojn, en kiuj *ĝemos, per grincado de la dentoj,* aliaj Spiritoj, kulpaj, rigardataj kiel grandaj krimuloj en la Spirita Mondo, aliiĝintaj, pro la renaskiĝo, en naŭzajn monstraĉojn, sed al kiuj ambaŭ devos sin dediĉi kiel patrinoj: amoplenaj, paciencaj, rezignaciaj, pretas por sinofere defendi la frukton de siaj ventroj kiel ajn misformaj ili estas!...”

Post ĉagrena silento, dum kiu, per aflikta rezonado, ni ĉiuj perdiĝis en konfuzaj konjektoj, Belarmino ankoraŭ alparolis, pravigante sian malnovan renomon kiel profesoro pri dialektiko:

"– Bonvolu diri al ni, Frato Teokrito: ĉu la Leĝo trudas al ni reenkarniĝi inter fremduloj?... kiel filoj de gepatroj, kies Spiritoj estus al ni tute fremdaj?... Ni opinias, ke tia korekta rimedo estos ekstreme dolora!..."

"– Jes, mia amiko, ĝi sendube estas dolora! Sed ne pro tio ĝi ne estos justa kaj saĝa! Tio ĝenerale okazas ne nur al sinmortigintoj, sed ankaŭ al tiuj, kiuj kulpis kontraŭ la familio, iel ajn suferigante la koron de tiuj, kiuj ilin amis! Kaj la memmortiginto, malrespektinte sian propran familion, kontraŭ kiu li, per sia ago, kaŭzis akran doloron, ofendinte per efektiva malŝato la sanktan Hejmon, kiu lin amis, kaj tiel perdinte la meriton ricevi novan, afinan familion, ja kreis al si la doloran bezonon repreni korpan ekzistadon ekster tiu familia rondo, kiu al li estis kara. Estas tamen okazoj, kiam li povas reveni en amprotektan medion, nome se iamaj malnovaj karuloj denove travivas la surterajn elprovojn en la sama tempo, kiam li devos reenkarniĝi, kaj se ĉi tiuj konsentos lin akcepti por helpi en lia kulpelpago... Kiel ajn tamen, li renaskiĝos en medio konforma al la speco de lia travivota elprovado. Estas aliaj, ne maloftaj okazoj, ja la plej doloraj, kiam ili devas rekomenci la lernadon en la karno, kiun ili evitis, inter malamikaj Spiritoj, kio estos multe pli suferiga, ol se li ĝin farus inter nuraj fremduloj... Cetere, ni konsideru, ke ĉiuj kreitoj estas fratoj pro sia spirita origino kaj tial necesas, ke tiaj aferoj fariĝu laŭ la sublima leĝo de Amo, kiu devas altiri kaj nedisigeble unuigi ĉiujn filojn de la sama Kreinto kaj Patro!..."

Intertempe, eniris la kuriozan kabineton du kompatindaj internuloj de la Frenezulejo, kiujn subtenis asistantoj de Frato Johano. Ili malĝoje preterpasis, senatentaj al ĉio ĉirkaŭa, kun svaga, sencela rigardo, treniĝaj paŝoj kaj esprimo de nedifinebla angoro! Kondukite al la parolejo, ili tien eniris kun Teokrito kaj malaperis el nia vidado. Forfluis kelke da minutoj. Dume la asistantoj de Frato Johano, en respekta teniĝo, atendis novajn ordonojn en tiu salono mem kie ni troviĝis. Ni ne kuraĝis eldiri

eĉ ian nuran silabon. La silento superregis la vastan, kuriozan Fakon, kaj ia neklarigebla timo detenis nin de plua interparolo.

Subite ia movado ekestis ekstere, kvazaŭ fariĝus io tre grava... kaj Romeo, Alcesto, Karlo kaj Roberto, kune kun aliaj helpantoj, eniris la salonon kondukante du sinjorinojn, du virinojn de plej humila socia rango, kiujn lancistoj skortis kvazaŭ gravajn arestitojn!

Ni ilin scivole ekzamenis. Unu, maldika, delikata, ŝajne malsanema kaj malfortika, rebildiganta en sia astrala organismo la vestojn kutime uzatajn ĉiutage en la materia ekzistado, estis portugalino, aĝis ne pli ol dek ok jarojn, kaj la ĝenerala aspekto supozigis, ke temas pri ĵus edziniĝinta virino. Ŝin akompanis, humile kaj respekteme, la edzo: iu fiŝkaptisto! La alia, bruna, vigla, timema kaj nervoza, videbla estis la brazilanino, memoriganta la klasikan egiptan tipon, kun la nigraj kaj glataj haroj surŝultre disliberigitaj, elstaraj vangostoj, enigma esprimo sur la belaj, kavaj kaj lumaj okuloj, en kiuj pendantaj larmoj ŝajnis signi nekonsekvencajn afliktojn! Ŝi venis sola, ne estis edzino! La trompo de deloginto lasis ŝin sub la kapricaj sekvoj de malfeliĉa amsento, miskondukita kaj profanita de vira perfido – en socio, kiu ne pardonas al virino, ke ŝi lasis sin trompi de la viro, al kiu ŝi konfidis! – ĉion tion ni poste kompatoplene eksciis!

La tri estaĵojn kvazaŭ ŝirmis ia maldikega envolvaĵo ŝajne el kristalo, kies formo ekzakte respondis al ilia silueto, kaj el ĉiu pendis mallarĝa luma strio, kiu fore etendiĝis kvazaŭ ĝi estus ligita al ŝtipo de netrarompebla prizono[1]!

Teokrito ilin bonkore akceptis kaj traktis plej tenere, kaj enkondukis ĉiujn en la kabinetojn de la parolejo, kie jam troviĝis la zorgatoj de Frato Johano. Tuj sekve ni surpriziĝis de la ĉeesto de Frato Johano mem, kiu ridetante alproksimiĝis. Kortuŝite

[1] Temas respektive pri la tego el vivofluidaĵoj, esence propraj al ĉiuj vivaj estaĵoj, kaj pri la fluideca ligilo kuniganta la Spiriton kun la materia korpo dum la enkarna vivo.

kaj respektoplene ni ekstaris je lia preterpaso, kaj de li ni ricevis afablan saluton. Kune kun Teokrito li penetris en la parolejon... kaj la silento denove regis en la salono.

Kvankam ni tie troviĝis por instruiĝo, ni tamen ne ĉeestis ion, kio sekrete fariĝis inter la laboristoj de Jesuo kaj tiuj kulpuloj bezonantaj elaĉeton. Sed hodiaŭ, skizante ĉi tiujn memoraĵojn – post kiam super tiuj scenoj pasis tridek jaroj – mi povos informi la leganton pri la drama epizodo okazinta en tiu respektinda loko, kiun ni tiam ne rajtis eniri, ĉar dum tiu longa tempo ni akiris solidan sciadon, ebligantan ke ni nun ĝin rakontu.

..........................................................................................................................

Teokrito kaj Johano penis konvinki la portugalan paron kaj la nordorientan brazilaninon pri tio, kiom multe ili gajnus, se ili perus la renaskiĝon de tiuj mizeraj malobeintoj al la Suverena Leĝo, kiuj bezonas korpan, surteran ekzistadon por mildigi la neelteneblajn suferojn ĝis nun travivitajn! Al la tri oni plendetale elvolvis la aferon kaj ankaŭ prezentis tiujn, al ili proponatajn kiel naskotajn filojn, laŭ la tuta drama realeco de la cirkonstancoj, en kiuj ili baraktis. La paciencaj ĉampionoj de la Frateco procedis kiel spertaj juristoj de la Superega Leĝaro, kompetente kaj noblacele elmontrante la subliman gravecon de la rekomendata projekto. La koncernatoj pri tiu grandioza karitata misio, nome akcepti kiel sanktan gardotaĵon tiujn filojn de Dio, kiuj bezonis fariĝi filoj de l' homo por rehonorindiĝi el la peko, tamen kontraŭstaris, rifuzante la impresan inviton:

"– Ho ne, ne! – ekkriis la humilaj portugalaj geedzoj. – Ni ne volas naski filojn malsanajn, kriplajn aŭ mensdebilajn! Ni geedziĝis antaŭ nur unu monato!... kaj nia plej kara revo estas, ke la bona Dio donu al ni, kiel unuenaskiton, la animeton de rozkolora, sana kerubo! Filojn ni ja deziras, sed fortikajn kaj gajajn... ĉe kiuj ni trovu konsolan protekton en la maljunaĝo!...

Kaj same neadis la brazilanino, baraktante pro honto antaŭ tia estaĵo kiel Teokrito, kiu konis ŝiajn plej sekretajn pensojn, ĉiujn ŝiajn farojn:

"– Ne, mia sinjoro, mi ne povas esti patrino, mi prefere elektus la morton! Kiel mi trenos tian honton antaŭ miaj gepatroj, la najbaroj, miaj karaj amikinoj?!... Ĉiuj min certe malŝatus... kaj eĉ "li" mem, mi bone scias! Paralizulon, kiel filon!... Ho Dio en la ĉielo, kiel lin eduki, lin elteni?..."

Sed elpaŝis Teokrito, helpata de Frato Johano, logika kaj serioza, inda defendanto de tiu Elaĉeta Idealo, kies ĉefo, mortinte sur kruco, montris al la homoj la subliman vojon de la abnegacio:

"– Se vi, kiel virino, eraris, neglektante la sesan ordonon de la Superega Leĝo, kiu preskribas al virgulino la respektindan devon teni ĉastecon ĝis la sanktega ligiĝo per Edzeco, vi do nepre bezonos rehonorindiĝi per abnegacia sinoferado, fidele observante aliajn preskribojn de tiu sama Leĝo, kiuj, pro la amplekso de sia efiko, povos nuligi vian malobeon al la supredirita ordono! Jen vi havas la oportunon, kiu nature sekvis el viaj agoj mem! Se vi neeviteble fariĝos patrino, ĉr la patrineco ja estas natura funkcio de la virino fekundigita por la dia tasko de reproduktado de la homa genro, vi do akceptu, por animi la argilon, kiu de vi naskiĝos, iun kompatindan, kulpan Spiriton, kia vi ankaŭ estas, kaj same kiel vi ankaŭ bezonantan rehonorindiĝi! Helpante lin releviĝi el la abismo, en kiun li sin ĵetis, vi akiros vian propran elaĉeton, kaj mi asertas al vi, mia fratino, en la nomo de la Dia Mesio, ke, se vi plenumos viajn patrinajn devojn sub la malŝatado kaj humiligado far la homoj, punante vin mem pro via eraro, la Ĉielo fortigos vin, por ke vi kontraŭstaru ĉiujn batojn kaj venku la elprovadon, akirante spiritan gloron pro viaj heroaj oferoj kiel patrino de mizera malsanulo, de kompatinda iama sinnmortiginto, bezonanta homon sufiĉe karitatan por lin ami kaj protekti, malgraŭ lia mizerego, homon, kiu, plenumante la favorkorajn decidojn de la Sinjoro, lin prizorge konduku tra la kulpelpagoj en nova karna migrado! Klinita super la malriĉa kaj humiligita lulilo de via filo, kiun malŝatos ĉiuj, sed ne vi nek la Dia Providenco; ame ridetante al la eta paralizulo, kiu sin tiros al vi kun malĝojaj, plenkonfidaj

okuloj, rekonante vian voĉon inter milo da aliaj kaj kvietiĝante ĉe viaj amoplenaj flustroj, vi, mia filino, ekhavos la bonfaran akvon, forlavontan la malhonoran makulon, per kiu vi malpuriĝis...”

Sed la alparolatoj kalcitris. Malgraŭ tio, Johano kaj Teokrito daŭre elmontris la avantaĝojn de tia sinofero, la meritojn, kiujn ili akiros antaŭ la Superega Leĝo, la ĉielan helpon pri kiu ili rajtos, la triumfan honoron, kiun al ili poste donos la Legio patronata de Maria, kiel plej altan premion pro la karitato farita al ŝiaj kompatindaj zorgatoj!

Dume, ĉi tiuj zorgatoj, kiuj ĉeestis la gravan interparolon kaj malfacile duonvidis tion, kio tie okazas, sentis strangan altiriĝon al la du sinjorinoj, agordiĝis kun la vibra tono produktata de iliaj mensaj kaj sentaj radioj, kaj oni eĉ povas aserti, ke la magneta altiriĝo, nepre necesa por la perkoncipa enkorpiĝo, ekde tiu momento ricevis la dian impulson ĝin firmigontan! Sed ĉar tiuj tri homoj, ploremaj kaj senrezignaciaj, ne kuraĝis veni al definitiva akordo, la du senlacaj instruantoj, petinte Romeon kaj Alceston pri kunlaboro, decidis utiligi pli drastan rimedon, kiu povus inklinigi ilin al volonta, akceptebla interkonsento.

Sub la efiko de la volo de tiuj du abnegaciaj laborantoj de l' Frateco, la du virinoj komencis revidi la scenojn de siaj pasintaj, surteraj ekzistadoj, arkivitajn en la nedifekteblaj tavoloj de la perispirita organismo: la nekonfesindajn agojn faritajn kontraŭ la Suverena Leĝaro malprofite al la proksimulo kaj sekve al si mem; la nigrajn krimojn, kies sekvoj postulis riparadojn kaj memkorektadon dum jarcentoj, ĉe larmoj fontantaj el milo da elrevigaj doloroj!

La portugala paro revidis sin kiel riĉaj nobelojn, kiuj, migrinte en Brazilon, ĝuadis de sklavigitaj brakoj la bonhavan staton, pri kiu ili fieris, malesperige turmentante mizerajn afrikanojn, kiuj kurbiĝis, malsamaj kaj lacegaj, sub la krudeco de ekscesaj laboroj, kaj kiuj ĉiutage spertis brutaĵojn pro novaj decidoj, kapricaj kaj senkompataj! La malfeliĉa nordorienta

brazilanino rekonis sin kiel virinon orgojlan pro sia beleco, kia ŝi ja estis en antaŭa surplaneda ekzistado, nerespekteman kaj vantan, kiu profanis la geedzajn devojn, rompate la ĵurojn konsekritajn sur la altaro de l' Edzeco kaj cetere rifuzante sian tributon al la sublimaj leĝoj de la Naturo, kiuj de ŝi postulis la plenumon de la Patrina Misio, rifuzo, kiu eĉ ŝin pelis al infanmurdo!

Horora defilo de abomenindaj kulpoj, de pereigaj eraroj, de malrespektaj, bedaŭrindaj faroj eliĝis el la profundaĵoj de la konscienco de tiuj kompatinduloj, kiuj reenkarniĝis celante la rehonorindigajn elprovojn kaj kiuj nun, kiel aldonan korfavoron de la Ĉiopova, ricevas la malavaran inviton helpi sin mem per la tre bonfara ago servadi kiel surteraj gepatroj al aliaj kulpuloj, kiuj, kiel ili mem, bezonas evolui kaj morale progresi! Kaj tiela estis la intenso de la revivigitaj scenoj, ke korŝiraj krioj aŭdiĝis en la salono, en kiu ni troviĝis, kio nin forte kortuŝis kaj surprizis.

Post kelka tempo denove regis silento. La pordoj remalfermiĝis kaj tra ili eliris ĉiuj, kiuj troviĝis en la sekretaj kabinetoj. Malĝoja, sed rezignacia, preta por plenumi sian bonfaran mision, la portugalino paŝis apud la edzo, kiu kunsentis ŝian submetiĝon al la neeviteblo. Dume, la brazilaninon, kiu ploradis ardantajn larmojn, rekondukis, per frata helpo, la maljuna de Canalejas kaj lia nedisigebla filo Roberto.

.........................................................................................................................

En la sekvanta tago, oni venis, jam en malfrua horo, forkonduki nin por daŭrigo de tiu instrucela vizito, kiun ni devis efektivigi antaŭ ol malligiĝi de la Hospitala Departemento.

Rekondukite al la centra sidejo de la vizitota Departemento, ni tie renkontis Rozalian, kiel ŝi mem promesis, kaj kiu nin servoprete atendis.

“– Hodiaŭ ni faros nian lastan ekskurson – ŝi informis. Frato Teokrito deziras konduki vin al la Tero, kiel kulminon de via instrucela promeno. Ĉar vi jam havas ideon pri tio, kio estas ia

"Esplorlaboro" celanta elekti medion favoran al la kondiĉoj, en kiuj ĉiu el vi enkarniĝos, tial mi vin kondukos al la Sekcio por Planado de Fizikaj Korpoj.

Vi certe scias, miaj amikoj, ke, antaŭ ol via reenkarniĝo estos definitive decidita, oni jam studis ne nur la medion sed ankaŭ la fiziologian staton de la estontaj gepatroj, nome ilian sanon, demandojn pri fizika heredeco ktp, ktp, ĉefe en tiuj okazoj, kiam la kulpa Spirito devas sperti kriplaĵojn, seriozajn, nekuraceblajn malsanojn, ktp. Nur post kiam ĉio ĉi tio estos difinita, oni skizos la planojn por la estontaj korpoj, kiujn planojn oni tute ne aranĝos sen la partopreno de la reenkarniĝonta Spirito nek, des malpli, de la scienculoj, komisiitaj de la Sinjoro kontroli tiun gravan entreprenon.

"– Estu bonvenaj en ĉi tiun domon, miaj amikoj! – ekkriis la sinjorino, kiu nin akceptis kaj al kiu nin prezentis nia ĝentila akompanantino. – Eniru konfide... Fratino Rozalia vin akompanos..."

Tuj poste ŝi kondukis nin en salonon de grandiozaj proporcioj, kiun ĉirkaŭis pordoj, kies arkadoj, ellaboritaj laŭ rafinita arto, estis vualitaj de longaj kurtenoj, lumbrilaj kaj simplaj kiel plej altkvalita silko.

Ni penetris en la internon tra unu el tiuj pasejoj, kaj tuj alpaŝis nin ridetanta, simpatia inicito.

Surprizite, ni konstatis, ke ni eniris lokon, kiu al niaj okuloj aspektis kiel Artkunvenejo, ia ĉarma kabineto, se ni tiel povas nomi atelieron de eminentaj artistoj, en kiu majstroj de la plastiko plenumis sublimajn taskojn, konsciante la respondecon, kiun al ili trandonis la Dia Providenco.

Pluraj ĉambroj viciĝis laŭ bela ronda perspektivo kaj ĉiuj rekte komunikiĝis inter si per grandiozaj arkadoj, kiujn desegnis altinspiraj arkitektoj laŭ la plej pura hinda konstruarto. Krom tio, ĉiu ĉambro komunikiĝis kun la ekstero per aparta enirejo, same kiel ĉe la antaŭĉambro antaŭ kiu viglis la gardisto.

En la unua fako de tiu mirinda vico da rondaj ĉambroj vidiĝis laboristoj klinitaj super notfolioj kaj gravaj dokumentoj necesaj por la efektivigotaj komisioj. Ilin liveris aliaj sekcioj, nome tiuj de Analizo kaj de Esplorado, krom ankaŭ de la Templo, kaj ĉiuj koncernis la plurajn aspirantojn al reveno en la materian, fizikan mondon.

Tio estis longa vico da stabloj por studo kaj laboro, aranĝitaj laŭ la formo de la ĉambro, tio estas, ronde, sub la impresa orblua helo, kiu malsuprenvenis de majestaj kupoloj memorigantaj pri malnovaj katedraloj. De la fenestroj, veraj perfektaĵoj de la arkitekturo, elstaris la vasta panoramo de la Departemento kun siaj ĝardenoj, kiuj koloriĝis je la milda lazuro de la ĉielo pompanta pro la helo de l' Suno, kiu, tien disverŝante la sanigajn elementojn de sia magnestismo, ŝajnis inspira beno lumiganta la menson de la artistoj.

Por la studado de la notoj venintaj de ekstere, instrukcioj estis sendataj al la sekcio por Modelado, instalita en la sekva ĉambro, cele al skizo de la estonta korpo tia, kiel ĝin difinis la instrukcioj, nome:

a) – mutilita ekde la naskiĝo;
b) – mutilota dum la ekzistado, pro malsano aŭ akcidento;
c) – trafota de seriozaj, nekuraceblaj malsanoj;
d) – normala.

kio do antaŭvidigis, ĉe ĉi tiuj lastaj, decidajn faktojn el la planado de la vojo irota de la paciento, kiuj alkonformiĝus al ĉiu kazo kiel kulpelpagoj aŭ elprovoj, ĉar estas grave ne forgesi, ke multaj el tiuj mizeraj enaziliĝintoj, niaj sortkunuloj, eble reenkarniĝos en normalaj materiaj envolvaĵoj, eĉ belaj kaj sanaj, ĉar tion postulis iliaj novaj spertoj, ĉe kiuj elstaros neeviteblaj, ekskluzive moralaj luktoj kaj suferoj.

En la sekva kabineto vidiĝis ankaŭ la skizoj de la antaŭaj korpoj, nome tiuj, kiujn la memmortigo malorganizis, detruis

antaŭ la normala tempo. Ili okupis oportunan lokon, facile alireblan por la observanto, kaj staris sur konvenaj piedestaloj, ĉar tiuj skizoj estis moveblaj statuoj, ja tre belaj, kiuj pro sia natureco kaj perfekteco sugestis la realan ĉeeston de la jam detruita envolvaĵo mem. Ili viciĝis laŭ jena lerte aranĝita ordo:

a) – la sendifekta envolvaĵo, kia ĝi estis antaŭ ol ĝin detruis la memmortigo.

b) – apude, sur fosforeska plato, informoj pri la stato de tiu envolvaĵo en la momento de la fatalaĵo, nome: – sanstato, kvanto da vivoforto, grado de la vibroj, mensa stato, grado de socia instruiteco, medio en kiu ĝi vivis, dato de naskiĝo, dato en kiu ĝi normale forpasus, dato de la memmortigo, loko de la fatalaĵo, speco de sinmortigo, ties kaŭzoj, nomo de la kulpinto;

c) – la organo trafita de la atenco, kies difekto kaŭzis la estingiĝon de la vivoforto provize tenata en la envolvaĵo, prezentis, en tiu skizo, la saman lezon, kiu difektis la materian korpon;

ĉ) – specialaj kazoj: sindronigo, mueliĝo pro dispremego, falego. Plastika reprodukto de la restaĵoj de la korpo, kia ĝin reduktis la memmortigo.

La impresa perfekteco de tiu ĉi reprodukto ŝokus ĉiun ajn alian observanton ne spertan kiel tiuj majstroj aŭ ne hardigitajn de l' doloro kiel ni.

Ĉi tiun ĉambron, kiu estus la plej bela kaj impresa, se tie ekzistus ia loko malpli interesa ol la ceteraj, sekvis tiu, en kiu oni preparis la skizojn de la generotaj korpoj kaj ties reenkarniĝo. Temis pri la sekcio de Modelado. Kvankam simila al la aliaj, ĝi tamen ekstaris pro la intenseco kaj delikateco de la tie plenumata laboro kaj pro la granda nombro da laborantoj. La desegnado de la petitaj mapoj aŭ skizoj severe observis la ricevitajn instrukciojn. Oni poste ilin sendis, por revizio kaj aprobo, al la Templo, al la sekcioj de Analizo kaj Esplorado kaj eĉ al la Azilo, kie la aspirantoj, kun la helpo de siaj mentoroj kaj apartaj

Gvidantoj, ilin longe ekzamenadis. Ne malofte la reenkarniĝontoj ilin aprobis ĉe angoraj larmokrizoj, sed ankaŭ estis okazoj, kiam ili petis pri prokrasto de la lastaj preparoj, celante ankoraŭ iom pli da fortoj kaj kuraĝo por alfronti la neeviteblan! Sed se la stato de la pentinto, ankoraŭ tro mizera, ne ebligis al li mensklarecon por la konvena ekzameno kaj aprobo, tiam la Templo kaj liaj Gvidantoj-misiistoj plenigis liajn mankojn, zorgante liajn interesojn kun justeco kaj amo, kiel konsciencaj advokatoj rilate al siaj klientoj.

Ni trairis la ĉambrovicon regataj de intensa kortuŝo, ĉion observante kun plej granda intereso. Krom nia bonkora Rozalia, ankaŭ akompanis nin, donante al ni altvalorajn klarigojn, la inicito respondeca pri la sekcio, nome Frato Klemento, kies klereco kaj progresogrado en tiu mondo, en kiu ni vivis, facile videblus laŭ la respondecoj, pri kiuj li estis komisiita.

“– Jes, miaj karaj amikoj, miaj fratoj! – admonis Klemento, dum li patrece nin kondukis de ĉambro al ĉambro, al ni elvolvante belegajn kaj konsolajn tezojn pri la Suverenaj Leĝoj, de kiuj li estis inda intrepretisto, tezoj kiuj liveris al mia kompatinda animo, nebuligita de la peko, tiom multe da klarigoj, ke mi ne detenos min de la deziro transkribi ilin sur ĉi tiujn senpretendajn, transtombajn paĝojn. – Jes, miaj amikoj, estu laŭdata la Superega Kreinto, Direktanto de la Universo, kies nesupereblaj saĝo kaj boneco levas nin el la miskomprenoj de l' eraro en la sublimajn vojojn de regenerado, tra la senĉesaj laboroj en la surplanedaj renaskiĝoj! Sur la Tero ankoraŭ multe mankas, por ke la homoj komprenu la subliman esprimon de tiu Leĝo, kiun efektive nur la Dia Penso kapablus starigi por al sia Kreitaro ebligi la venkon!

La nescio pri la altaj principoj gvidantaj la destinon de la homaro, la malvolonto ekhavi sciojn, kiuj ilin kondukus al la fontoj klarigantaj pri la Vivo, krom ankaŭ la antaŭjuĝoj esence propraj al la mensoj ankoraŭ sklaviĝintaj al malsupereco, baras al la homoj agnoski tiun vastan kaj gloran fundamenton de sia

propra evoluado, de sia spirita emancipiĝo! La scienculo, por ekzemplo, rigardata kiel duondio en la surteraj socioj, de kiuj li postulas ĉiajn honorojn kaj fikciajn glorojn, neniel ajn konsentos, ke la granda orgojlo, kiun li kuntrenas kune kun sia erudicio, povos lin poste kondamni al obskura, humila reenkarniĝo, dum kiu lia koro, seka kaj senfrukta koncerne la nobligajn virtojn, akiros la dolĉajn sentojn de la amo al la proksimulo, la delikatajn esprimojn de la vera frateco, kiun nur la respekto kaj la riverenca sinteno al la kristana idealo povos inspiri, dum la intelekto ripozas... La suvereno, la magnato, la klasoj surtere rigardataj kiel "privilegiitaj", kiuj senpripense misuzis la donojn, kiujn la Superega Sinjoro al ili havigis, celante, ke ili kunlaboru por la protektado al la homaro kaj la progreso de la planedo, ne konsentos, ke iliaj malprudentaj agoj, faritaj kontraŭ la diaj leĝoj, ilin kondukus al malfeliĉaj renaskiĝoj, dum kiuj ili spertos mizeron, sklavecon, humiligojn, senĉesajn, suferigajn luktojn, cele al tio, ke ili, per tiel penigaj provripetoj, kulpelpagu pro la indiferento aŭ pro la malico, kiun ili elmontris en la pasinteco, ne helpante la prematajn klasojn, la ĝeneralan bonstaton de la socio kaj de la lando, en kiu ili vivis, preferante la nenifaran memkomfortemon de egoismo al la frata solidareco, kiun la homoj ŝuldas, unuj al la aliaj! La blankhaŭtulo, ĵaluza pri ia raspureco, kiun la antaŭjuĝa koluzio de orgojlo kun vantamo kredigas al li kiel difavoran privilegion, ne konsentos omaĝi Universan, Dian Leĝon, povantan iam trudi al li la bezonon travivi novan enkarnan ekzistadon, dum kiu li portos envolvaĵon kun haŭto nigra, aŭ flava, bruna, mestizkolora ktp, ktp, kaj ankaŭ lin devigantan agnoski, ke ne lia provizora, cirkonstaca fizika-materia envolvaĵo, sed ja la Spirito bezonas blankpuriĝi kaj brili per sindonemaj virtoj kaj konkeroj mensaj, intelektaj, kiujn li povos akri en la sino de tiu aŭ de tiu alia raso! Ankoraŭ pli: ke nigruloj, blankuloj, flavuloj ktp, devenas de la sama Principo de Lumo, de la sama Eterna Senmorta Fokuso, nome la Superega Patro de la tuta Kreaĵaro!

Sed, miaj amikoj, malgraŭ la konsento aŭ malkosento de ĉiuj tiuj respektindaj surteranoj, malgraŭ ilia, kiel ankaŭ via, abomena sento kontraŭ la imperativo de tiu perfekta Leĝo, tamen ĝi nepre estas neevitebla kaj neŝanĝebla, kaj ĝuste tial ĉiuj homoj mortas en karna korpo por reaperi en iu spirita vivo kaj poste renaskiĝi en novaj homaj korpoj... ĝis al ili estos konsentite, pro la farita progreso, ekloĝi en pli feliĉaj planedoj – ankaŭ reenkarniĝintaj –, en kies socioj ili komencos novan etapon de progreso laŭ la ascenda skalo de la longa kaj glora prepariĝado al la Eterna Vivo! Sed ĉi tio daŭros jarmilojn super jarmiloj!...

Neniu homo do, same kiel neniu Spirito, povos eskapi el la nekontraŭstareblaj efikoj de tiu Leĝo, ĉu li ĝin malŝatas aŭ respektas, ĉar ĝi estas necesa al la tuta kreaĵaro kiel faktoro de ties progreso, de ties ascendo ĝis la Plibona, ĝis la Perfekteco!

En la Vinberejo de la Sinjoro – la Senfina Universo – ekzistas laboristoj specialiĝintaj pri la delikata laboro apliki tiun Leĝon. Koncerne la Teron, ili agas sub la gvido de la Ununaskito de Dio, al kiu estas komisiite la elaĉeto de la homa gento. Kaj kiel la homo ĉiutage rigardas la leviĝon de la Suno kaj ĝian subiron en la horizonto; sentas la blovadon de l' ventoj kaj vidas la plantojn kreski kaj fruktiĝi, la florojn elspiri siajn aromojn kaj la astrojn brilegi en la senfinaj spacoj, tute ne taksante la ampleksan kaj fortokonsuman laboron en ĉio ĉi implicita, kaj des malpli la sindediĉon, la sinoferadon, kiujn tiel sublimaj laboroj postulas de la legioj da nevideblaj servantoj, kiuj en la astrala mondo estas komisiitaj pri la konservado de la planedo, laŭ la altaj decidoj de la Ĉiopova Kreinto; tiel same li vidas milojn da renaskiĝoj de siaj simululoj krom ankaŭ de aliaj vivaj, organizitaj estaĵoj, ignorante la kortuŝan, ĉarman, dian epopeon, kiu al li estas donite rigardadi! Kaj tiel longe la homo kutimis al la vido de la diaj manifestiĝoj, kiuj lin ĉirkaŭas, ke li fariĝis kontraŭ ili indiferenta, ne donante al si la penon ĝui kaj laŭdi ilian grandecon, ilin rigardante kiel naturajn, eĉ ordinarajn aferojn,

kiaj ili efektive estas! kaj kiel ne esti tiel, se li mem dronas en la sino de la Dia Universo, kiel ido de la Dia Kreinto de Ĉiuj Ekzistaĵoj?!...”

Ni ĉion aŭdis kun granda plezuro, ne kuraĝante al ia ajn interrompo. Ĉio montriĝis al ni nova kaj tre emocia. Ni sentis nin malaltigitaj, hontigitaj antaŭ socio, pri kiu ni rekonis, ke ni al ĝi ne alkonformiĝas. Kaj ni miris, ke de ĝi ni ricevas tiel ĝentilan traktadon, tiel amikan atenton, kiajn oni al ni donis en ĉi tiu momento!

Ni altiriĝis de unu el la splendaj galerioj, en kiu viciĝis la belegaj mapoj-statuoj. Antaŭ ĉiu staris la tablo de la manipulisto. Pluraj inicitoj tie troviĝis, fidelaj al la nobla devo servadi al fratoj malpli spertaj pri la scienco de la Vivo, malpli progresintaj en la migrado al Dio! Kelkaj atente ekzamenis la detalojn de la bildo sub sia respondeco, aliaj studis notojn kaj instrukciojn, kaj aliaj ekzamenis la fotografion de mortrestataĵoj, skizante planojn por estontaj karnaj envolvaĵoj, sendotaj al la elprovado ktp, ktp. Kaj ĉiu el ili, aplikante por tiu eksterordinara tasko siajn maksimumajn atenton kaj bonvolon, igis nin koncepti la idealan bildon de la perfekta funkciularo, konscia pri la plenumota devo!

Ni alproksimiĝis al la statuoj. Temis pri reproduktoj de korpoj, kiaj ili estis antaŭ la memmortigo. Surprizite, ni rimarkis, ke tiuj senkomparaj modeloj estas animataj de movoj kaj vibroj, kaj tial montriĝis kiel ideala specimento por prezentado. Ni tiel vidis, ke tra la arterioj fluadis, kun la tuta viglo kaj impeto naturaj ĉe homa korpo, strio da lumruĝa likvaĵo, prezentante la sangon kaj ties normalajn funkciojn en surtera, materia korpo. Same kiel al sango, ankaŭ la visceroj konsistis el diafanaj, subtilegaj, lumfluidecaj substancoj, kvazaŭ por ilia formado estus necese kunpremi rebrilojn de la delikata lunlumo... La kartilagoj, la nerva plektaĵo, la karno same konsistis el delikatstrukturaj substancoj, respektive neĝblankaj, helflavaj kaj rozkoloraj, kio al la figuro donis esprimon de granda beleco!

Tie do troviĝis, majstre bildigita de veraj artistoj, de veraj anatomiistoj, laŭ ĉiuj siaj detaloj, la malgranda universo de la homa korpo!

Estis ĉambroj aparte destinitaj al la virinaj modeloj kaj kazoj. Cetere, dum niaj observoj, ni neniam trovis miksitajn servojn en iu ajn sekcio!

Post kelkaj minutoj, ni aŭdis, ke Rozalia ekparolas, elperfidante neordinaran emocion:

“– Efektive, miaj amikoj! Temas pri admireginda maŝino!... La surtera homo devus rigardi sin honorita kaj feliĉa, ke li ricevis de la nesuperebla boneco de la Kreinto la favoron fari sian surplanedan progreson uzante tian portilon!... En la Senfina Universo ekzistas materiaj mondoj, en kiuj la tie reenkarniĝintaj Spiritoj devas treniri progresetapojn en pezegaj materiaj korpoj, kiuj, kompare kun ĉi tiuj, estus rigardataj kiel monstraj...”

Ni silentis, konsternitaj, senkuraĝaj por malkonsenti per polemikoj, kiuj tiel plaĉis al ni pro nia nuna senscieco pri la interesega, avangarda temo... Sed la nobla instruanto intermetis, sin turmante al ni kun la kutima rideto:

“– Jes! Ĝi estas pli ol nura maŝino, miaj amikoj! Ĝi estas miniaturo de la Universo mem, kaj en ĝi ĉiumomente ripetiĝas grandiozaj fenomenoj, ĉar per sia naturo ĝi efektive reproduktas multajn kondiĉojn entenatajn en la strukturo de la Universo mem! Ĝi estas ia Templo!... la santktejo, en kiu estos enfermita la sanktega fajrero, emaninta el la Ĉiopova, nome la Senmorta Animo, por ke ĉi tiu per ĝi plibeliĝu kaj perfektiĝu tra sinsekvaj renaskiĝoj...

Rigardu la koron! Sentema kaj heroa organo, nelacigebla gardostaranto destinita al la plej noblaj servoj dum la reenkarniĝo, juvelejo, en kiu la Spirito havas la sidejon de la sentoj, kiujn li portas kun si jam de la spirita vivo!...

Ekzamenu la cerbon, miregindan aparaton, juvelon, kiun nur la Sublima Artisto povus koncepti, netakseblan trezoron,

kiun la homo ricevas ĉe la naskiĝo kaj sur kiun agos la spirita menso, ĝin utiligante por elklopodi novajn konkerojn! Ĝi ja estas alia miniatura universo, lumturo gvidanta la homan vivon, protekta kompaso meze de la mallumoj de l' surtera fizika enkarceriĝo!

Kaj la vidaparato?!... kiu kondukas en la cerbon la vidimpreson de la bildoj, ilin esprimante per percepto, kompreno, certeco, fakto?!... Ĉu ĝi ne inde egalas la unuajn?... En tiu altvalora lumtrezorejo koncentriĝos la sublimaj potencoj de la spirita vidpovo, harmonie kaj saĝe dozitaj, por ke la homo ilin konvene uzu dum la karna migrado kaj tiel facile efektivigu la entreprenojn, kiuj lin koncernos en la komuncela vivo de la homaj socioj...

Atentu, mi petas, tiujn anguletojn de la aŭdaparato, fantaziajn labirintojn elmontrantajn senduban harmonion kun la ceteraj kaj tiel bone dotitajn, tiel perfekte aranĝitajn, ke ili permesos al la surtera enkarcerigito percepti la plej delikatajn vibrojn, tiujn necesajn al lia progreso, al la plenumo de liaj taskoj kaj eĉ, en multaj okazoj, la subtilan esprimon de ia aspiro, de ia flustro, venantan de la nevideblaj sferoj!...

Sed ne nur tion. Jen la gustuma aparato, sidejo de la gustumado. Subtila, obskura, modesta, tamen tiu grava funkcio de la karna envolvaĵo, nepre necesa por la homa genro, ĉi tiun malavare helpas, partoprenante en la nutrado, fidele kunlaborante por la konservado de la altvalora materia korpo! Kiel grandioza ankaŭ montriĝas al la konscienca observanto la laboro de la lango, organo, kiu, krome, esprimas la penson de la enkarniĝinta estaĵo per la magio de la parolo! Ho, kiel la homo respektindiĝus, se tiun subliman aparaton li servigus nur al Bono, al Belo, al Vero! El la kompleksa strukturo de la lango eliĝas la vibroj elsenditaj de la penso, ebligantaj al la homaro interkompreniĝi per la parolo. Dank' al ĝia produktiva laboro aŭdiĝas la plej belaj esprimoj konataj sur la Tero, nome la dolĉaj ampromesoj, kiam la entuziasma koro, nobligita de altaj

sentimentalaj projektoj, flamiĝas per ardaj aspiroj; la ravaj harmonioj de liaj plej karaj poemoj, krom ankaŭ la teneraj lulkantoj de la patrina amo apud la lulilo, en kiu ekdormas la ridetanta kerubo... kaj la sanktega nomo de la Ĉiopova dum la fervoraj flustroj de la preĝo!...

Nenia senutila peco! Eĉ ne unu sola superflua linio, destinita al senaktiveco! Ĉiuj detaloj, kunmetantaj la grandiozan tutaĵon, estas esencaj, nepre necesaj al ĝia perfekta harmonio; ili sin kompletigas, interkonformiĝas, sin reciproke altiras, kunfratiĝas en majesta belo de sinsekvaj, heroaj aktivecoj, kaj ĉiuj dependas, unuj de la aliaj, por ke la gracia tutaĵo atingu sian subliman celon, favore al la ekvilibro de la Spirito, kiu en ĝi dumtempe loĝos, kvazaŭ sakrala lampo en alkonforma sanktejo!...

La Naturo, miaj amikoj, kiu estas la Volo de Dio manifestiĝanta per la potenca efiko de Lia Dia Magneta Povo, faris el la homa korpo luksan loĝejon de la Spirito Bezonanta reenkarniĝi por la lernado, kiu lin koncernas dum la surtera etapo... ĉar vi devas konvinkiĝi pri tio, ke la reenkarniĝo celas prepari la spiritan estaĵon por lia venko en la senmorteco, ne nur lin submeti al kulpelpago! Ĉi tiu estas nura sekvo de lia deflankiĝo de la vera vojo kaj ŝuldas sian ekziston ekskluzive al la prirespondeco de ĉies memo.

La definitiva stato de la homaj korpoj, destinitaj esti provizora loĝejo de tiu, kiu fontis el dia spiro, la formo naskita de la volo de la Sublima Artisto, pene ellaborita tra la jarcentoj, celas ja la belecon! La ekzisto de misharmonioj en la tuto devenas de tio, ke la Spiritoj, kiuj ĝin modelis por en ĝi ekloĝi, laborante por sia progreso aŭ por alia nobla celado, ja tion deziris, ĉu pro modesteco kaj humileco, ĉu pro oportuneco kaj timo al embarasaj situacioj, ĉar la korpa beleco, tiel admirata sur la Tero, montriĝas tamen kiel danĝera eco en la socia vivo pro la tentoj kaj ekscesoj, al kiuj ĝi elmetas la estaĵon. Ja ofte ĝin evitas, preferante ĝian malon aŭ la vulgarecon de ordinaraj trajtoj, tiuj, kiuj renaskiĝas por elpagi grandajn erarojn de la pasinteco, ĉar

vi sendube scias, ke ne estante natura stato, la malbeleco, la nenormaleco de trajtoj, fariĝas abomena, suferiga por tiu, kiu ĝin trenas, kaj pro tio ĝi efikas kiel elprovado!

Rigardu ĉi tiujn naturdimensiajn modelojn!... Por reenkarniĝi, iliaj mastroj ricevis tielajn, perfektajn korpojn el karno: belajn, provizitajn per vitalajn kaj magnetajn fortojn, certigantajn bonegan organan funkciadon, konstantan sanon, kapablecon por la ĉiutaga vivobatalo. Nenio mankis al iliaj okupantoj krom la volforto, la kuraĝo por lukti kaj venki! La helpon, kiun al la Naturo koncernis liveri por ilia venko, la Naturo ja liveris en la formo de karna envolvaĵo konvena al la speco de laboro, kiun ili devis plenumi, ia kvazaŭa armaĵo de alispecaj krucmilitistoj, kiuj celus spiritan venkon! Sed malgraŭ ĉiuj donoj de la Ĉielo, ili tamen ne nur fiaskis, malplenumante la devojn, kiuj ilin koncernis dum la reenkarniĝo, sed ankaŭ eĉ pereigis la altvaloran, tiel bone provizitan portaĵon, kiun ili ricevis kiel posedaĵon, ĝin detruante per la memmortigo!...

La klarigoj de la emineta fakulo de la Planado ĝene impresis al ni la konsciencon. Maldolĉa tristo invadis niajn plej intimajn fakultojn ĉe ĉiu nova eldirita argumento. Malgraŭ tio, ni lin volonte sekvis ĉe lia nova invito, ke ni alproksimiĝu al la tabloj, ĉe kiuj inspirataj anatomiistoj strekis mapojn pri naskotaj envolvaĵoj, kiujn baldaŭ renaskiĝontaj Spiritoj formos al si en la karno.

“– Ĉe ĉi tiuj stabloj – li daŭrigis detaleme – miaj helpantoj ellaboras planojn de korpoj por sinmortigintoj ŝarĝitaj per grandegaj ŝuldoj. Ĉi tiuj, antaŭ ol fiaski, ricevis materiajn aparatojn bone dotitajn laŭ ties tuta admirinda strukturo.

Ili misuzis sian bonegan sanon. Sano! Netaksebla havaĵo, kiun la homo preteratentas, ŝajnigante ne scii, ke ĝi estas dia helpo, kiun la zorgemo de la Plejalta havigas al la kreitoj, celante kuraĝigi ilin al la nobligaj laboroj, kiuj al ili ebligos konkeri la laŭrojn de la spirita progreso!

Montrante nenian respekton al la aŭtoritato de la Kreinto, tiuj niaj malfeliĉaj fratoj venenis siajn altvalorajn portaĵojn per ĉiaspecaj ekscesoj, ilin malrapide ruinigante per la alkohola trouzado, toksante per tabakfumado, malhonorigante per la seksaj diboĉoj, krom ankaŭ ilin brute traktante per la malmodera manĝegado, kio estigis stomakan misfunkciadon, hepatan ŝvelon, bedaŭrinde difektantajn, pro troa aktivado, la delikatan digestan aparaton, kiun vi tie vidas reproduktita, laŭ ties origina modelo, per tiuj statuoj, kiujn vi tiel admiris! Aliaj, ne kontentaj pri tiu malhonora malrespekto tiel al si mem, kiel ankaŭ al la Malavara Vivodonanto – kio per si mem samvalorus kiel efektiva memmortigo –, senkuraĝaj por elporti la sekvojn de tiom da malmodero, nome ian kanceron, la ofte turmentegan tuberkulozon, ian ulceron, la neŭrastenion, ia mensan malordon, halucinojn kaŭzitajn de la mizera stato de la nerva sistemo, la hipokondrion, univorte malsanojn fizikajn, mensajn kaj moralajn, kiujn ili mem kaŭzis al si – tiuj ja uzis same riproĉindan perforton... kaj kronis tiun amason da senpripensaĵoj per la kompleta eldetruo, per la bruta mortigo de la portaĵo, kiun al ili donis la patra boneco de Dio, turnante kontraŭ si vivodetruajn armilojn!

Jen tamen la rezulto, kiu ilin timegigas!

Ili ne mortis, ĉar la vera estaĵo ne estis tiu detruita sanktejo, sed ja la animo, kiu en ĝi loĝis! Kaj nun, pentantaj, turmentataj de la neevitebla doloro pro la konsciencriproĉoj, konvinkitaj pri siaj eraroj, ili revenas al la scenejo de siaj malprudentaĵoj por animi korpajn argilojn ne plu samajn kiel tiuj, kiujn ili memvole detruis, sed ja konformajn al la speco de kulpelpago, kiun ili mem difinis, kiel naturan sekvon de siaj pekoj...”

Ĉe tiu punkto ni sentis nin kvazaŭ lacaj de afliktiĝo, profunde melankoliaj. La konsterna realo radianta el tiuj planadoj, la etoso mem, envolvita per sugestoj aludantaj kulpelpagajn reenkarniĝojn, penetrigis en niajn korojn angoran premsenton, kiu nin senkuraĝigis ĝis aflikta maltrankvilo! Sed

la stato de korpremo kaj angoro fariĝis tiel ordinara en nia memo, ke ni eldiris nenian plendon, prefere silentis enpensiĝaj.

Frato Klemento invitis nin plue lin aŭskulti, ripozante sur komfortaj foteloj, kiujn li proponis al ni. Prenante lokon apud ni, la diligenta Frato rekomencis:

"– Vi sciiĝis de Fratino Celestina pri tio, kiel efektiviĝas via internigo en ĉi tiun Departementon, tial mi ne longe priparolos la aferon. Mi nur aldonos, ke ni respondecos pri vi dum la daŭro de via surplaneda ekzistado, tiu ja nenormala ekzistado, kiun vi trudis al vi mem ekster la programo difinita de la Dia Providenco; ni helpos vin en la malfacilaj momentoj de via arda kulpelpago; ni sekigos viajn larmojn en la kulminoj de via elprovado, enblovante novan kuraĝon en viajn korojn pere de bonfaraj sugestoj, kiujn ni ne ŝparos al vi; ni flustros, tra via intuicia senso ekscitita de la insida suferado, inspirojn por mildigo de la afliktoj, kiuj trafos vin; ni prizorgos vian sanon, vian fizikan staton, necesan al via restado en la surtera elprovado; ni viglos, ke ne pligraviĝu la provoj, kiujn vi nepre travivos, konsiderante la egoisman sintenon de la socioj, en kiuj vi devos atesti vian penton, socioj, kiuj povus tro malfaciligi al vi la venkon, amasigante ekscesajn dolorojn sur vian vojon jam mem prisemitan per erikoj kaj dornoj... Kaj ni rigardos elplenumita tiel ampleksan kiel dornan mision nur tiam, kiam, pro la fino de via kulpelpaga riparo de la memmortigo, ni tranĉos la fluidecajn ligilojn, vin katenantajn al la nature kadavriĝinta portaĵo, kaj vin rekondukos ĉi tien, en la Departementon, kiu vin iam transdonis al ni kaj kiu siavice atendos ordonojn de la Templo por vin sendi al novaj lokoj, kiuj al vi konvenos laŭrajte kaj laŭ natura altiriĝemo...

Sed neniam – ni ripetu – la reveno al la fizika-materia kampo efektiviĝos kontraŭ via volo. Pli longe vi povos daŭrigi vian restadon en ĉi tiu Kolonio, ĉar kontraŭ via volo vi ne reenkarniĝos. Eĉ ne la Suverena Leĝo trudos al vi novajn provojn en la surtera areno, ĉar unu el ĝiaj plej sublimaj dispozicioj estas

ne trudi al iu ajn la plenumadon de la Devo, sed al ĉiuj faciligi la eblecojn ĝin volonte observi! Kion ni nepre faros, celante kuraĝigi vin al la nobla entrepreno, tio estas vin konsili, penante konvinki vin pri la renaskiĝo, per rezonado kaj ekzameno de l' faktoj. Sed tiuj klopodoj efektiviĝos dum via restado en tiu Departemento, kiu vin akceptis, ne en ĉi tiu, kiel vi jam havis la okazon rimarki dum via instruiĝado.

Ĝenerale la sinmortiginto tamen troviĝas en tiel malbonaj kondiĉoj, ĉu fizikaj-astralaj, ĉu moralaj kaj mensaj, ke tre malofte ni devas penadi por decidigi lin al reenkarniĝo! Li mem ĝin sopirege deziras, klopodas por plifruigi ĝin, eĉ petegas ĝin de la Ĉiokompatema per ardaj preĝoj kaj, ne malofte, en maloportuna tempo, kio devigas nin malkonsenti kaj al li trudi prokraston, kiu ja ebligos pli grandan probablecon de sukceso...”

Nia respektinda instruanto permesis al si mallongan paŭzon, dum kiu li kontentigis kelkajn disĉiplojn, kiuj lin konsultis pri gravaj disvolviĝantaj servoj.

Ni plej atente lin observis dum la nemultaj minutoj de lia konversacio kun tiuj. Al ni ne prosperis distingi, kion ili pritraktis, sed ni rimarkis, ke li senŝanĝe konservas sur la delikata vizaĝo tiun ĉarman rideton, kiu verŝajne ja estus la karakteriza trajto de lia poreterne afabla estaĵo! Krom tio, Frato Klemento estis juna kaj dotita per granda pureco de linioj, kaj aspektis kiel tiu ideala modelo, kiu al la statuistoj de la antikva Grekujo inspiris tiujn ĉefverkojn, kiajn la homoj poste neniam plu kapablis produkti! Ŝajnis, ke li ankoraŭ ne havas tridek jarojn, kio nin forte surprizis pro la grava prirespondeco, kiu al li estis komisiita, ĉar tiam ni ne sciis, ke la Spirito estas libera de la aĝoefiko, ke li povas montriĝi kun la fizionomia aspekto, kiu plej karas kiel al lia koro, tiel ankaŭ al liaj rememoroj. Ni vidis lin vere aspektanta kiel homo, dignoplene vestita per la legia uniformo. Sed io, por ni nedifinebla, radiis el lia memo, atestante lian altegan spiritan rangon, malgraŭ lia karitata bonvolo tiel dense materiiĝi por nin konsoli kaj servi.

Reveninte al nia grupo, li daŭrigis, pacience kaj serioze:

"– El la tuta legio da pentantoj, kiuj ĉi tien transsojlis, mi esceptas el ĉi tiuj klarigoj la internulojn de la Frenezulejo. Ekscese afekciitaj, sub tre limigita vibropremo, ili reenkarniĝos sub la imperativo de la Leĝo, sed ankaŭ protektataj de la Patra Zorgo de tiu, kiu estas la Superega Amo por ĉiuj kreitoj! Ĉar ilia situacio ne ebligas, ke ili sin mem helpu, tial iliajn mankojn kovros iliaj Superaj Gvidantoj krom ankaŭ ĉiuj ceteraj sindone interesiĝantaj pri ili, kiuj rekte decidos pri ĉio, kio plej bone konvenos al la koncerna kompatinda zorgato, nekapabla uzi sian rezonadon kaj sian libervolon!..."

Li proponis al ni por ekzameno iujn mapojn, kiujn li prenis de unu el siaj disĉiploj kaj kiuj balanciĝe pendis inter liaj manoj. Temis pri skizoj por la estonteco, miniaturoj projektitaj por la venonta enkarniĝo, dum la naturdimensiaj statuoj vere prezentis tion, kio ankoraŭ devus esti funkcianta, ĉar ili bildigis la karnan figuraĵon detruitan de la memmortigo. Preninte tiujn miniaturojn, ni rimarkis, ke en ili ne troviĝas, eĉ desegne, imitaj trajtoj de la unuaj, sed ja pale malfortikaj figuroj, torturataj de impresaj simptomoj pri profunde intima malĝojo, karikaturoj signitaj per kruelaj malsanoj, kiel la paralizo, la blindeco, la demenco, ktp – kiuj tiom afliktas la homojn en ĉiuj surteraj sociaj klasoj!

Li irigis nin kun si ĝis unu el tiuj klasikaj modeloj, kiuj vidiĝis laŭlonge de la admirinda statu-galerio, kaj klarigis, ne sen vidigi signifoplenan esprimon de malĝojo, dum ni, konsternitaj, legis sur la piedestala plato ĉi tiun kuriozan surkribon:

"Vincento de Siqueira Fortes[1].

Reenkarniĝinta la 10an de Oktobro 1868.

Devus reveni en la Spiritan Hejmon sepdekkvarjara, tio estas, ĉirkaŭ la jaro 1942.

Mortigis sin en la urbo Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, en 1897, sin ĵetante antaŭ fervojan vagonaron kun la aĝo de dudek naŭ jaroj".

---

[1] Fikcia nomo. Ĉia similaĵo estas nura hazarda koincido.

“– Ĉu vi vidas ĉi tiun miniaturon? – daŭrigis Klemento, elstarigante unu el tiuj, kiujn ni ekzamenadis. – Ĝi reproduktas, per siaj misformaj linioj, la mensan kaj vibran staton, al kiu Vincento reduktiĝis pro sia malespera ago! Ĝi estas modelita laŭ la nuna stato de lia fizika-astrala organismo, kio samvaloras, kiel diri, ke li tiele statas ĝuste tial, ke li tia sin mem faris, ĉar la Leĝo kreanta la Belon ne trudas ĉi tiun draman, malbelan situacion al siaj kreitoj! Nun la kompatinda Vincento, same kiel multaj aliaj, kiuj troviĝas ĉi tie, nepre devas repreni novan karnan korpon, *denove naskiĝi, por kompletigi la tempon, kiu mankis, por ke ĝisfine daŭru la vivo, kiun li mem ĉesigis!* Estas ja urĝe, ke li reenkarniĝu post nur naŭjara restado en la Nevidebla Mondo, ĉar tiel grava estis la ŝoko, kiun al lia astrala organismo trudis la infera decido mortigi la karnan korpon, ke por havigi al si tiun komprenkapablon, kiu al li ebligus konvenan progreson, li nepre bezonas la ekzistadon en la karno, ja la solan terapion, kiel vi jam scias, sufiĉe efikan por revenigi lin al pli milda stato! Sed por reveni, li modelos la karnan argilon laŭ la perispirita muldilo, kiun li nun kuntrenas, kio signifas, ke li renaskiĝos malsana, turmentata de kruelegaj doloroj, nekuraceblaj en la materia vivo, nedifineblaj ekster la kampo de la psikaj leĝoj; skuata de nenormalaj vibroj, kiuj neebligos al li la ĝuon kiel de bona sano, eĉ se li heredos de siaj gepatroj fortikan korpan konstitucion, tiel ankaŭ de ĉia sento de paco kaj ĝojo! Kaj se lia konstitucio devenos ekzemple de gepatroj anemiaj, alkoholdrinkemaj, ktp, ktp, li eble estos paralizulo, aŭ mensdebilulo, aŭ tuberkulozulo ktp, ktp!”

“– Ĉu la malfeliĉegulo ne povus ankoraŭ plu restadi en la Frenezulejo, ĝis iel ajn malpliakriĝos tiel bedaŭrinda situacio, por ke li dum la reenkarniĝo ne estu elmetata al tiel dramaj kaj suferigaj cirkonstancoj?”– mi konsternite demandis.

“– Ho ne! Tia prokrasto absolute ne konvenus al liaj spiritaj interesoj! – denove klarigis la saĝa estro de la Planado. – Tia procezo estus tro longa kaj suferiga! Li ne posedas nek povos

akiri kapablojn por percepti la spiritan vivon dum li restos en tia stato! Li nepre bezonas reboniĝi ĉe la kontakto kun la vitalaj fortoj, kiuj, pro la memmortigo, nekonvene disiĝis en lia fizika-astrala organismo, al kiu ili estis ligitaj per potenca kemi-magneta-psika afineco. El tio rezultis ĉi tiu abomena efiko, ĉi tiu hontinda toksiĝo perispirita kaj mensa, ne antaŭvidita de la leĝo sed ja efektivigebla por tiu, kiu malŝatis la mensajn kaj moralajn leĝojn, inklinigantajn al la vera ideo pri Dio!...”

“– Sed... mia eminenta Frato!... Ĉu tia stato de la aferoj ja elmontrus la altgradan nivelon de la Ĉiela Justeco, pri kiu ni tiom esperis?... konsiderante tion, kion vi ĵus asertis, nome ke la Superega Amo de la Plej Alta Patro akompanos ĉi tiujn malfeliĉegulojn dum iliaj kulpelpagaj reenkarniĝoj?... Sed kion mi diras?... akompanos min, Belarminon, Marion, Johanon, ĉar ankaŭ ni estas ĉenitaj al tiu malfeliĉa legio?... Ĉu estas korfavoro en tio, ke la Providenco konsentas tiun amasiĝon da turmentoj, se la kaŭzo de nia perdiĝo en la densejoj de la memmortigo – ho ve, kiel kompatindaj ni estas! – troviĝas en la multoblaj malfeliĉoj, kiuj jam maldolĉigis al ni la ekzistadon?...” – mi mem esplordemandis, posedite de ekstrema angoro.

Frato Klemento bonkore ridetis, ne konsiderante miajn protestojn. Li simple respondis, per senafekta maniero, kiu nin ĉiujn konfuzis:

“– Ĉu vi forgesis, mia amiko, ke la tuta Universo estas regata de Neŝanĝeblaj Harmoniaj Leĝoj, kiujn ni devas peni koni kaj respekti, havigante al ni honoron per ties nobliga observado? Kial la enkarniĝintaj homoj tiom neglektas la devon sin mem studadi cele al pli ĝusta memkonado, klopodante por la respekto al si mem, donante al si la valoron, kiun ili ja indas kiel diaj kreaĵoj?... Tio, kion ni nun pritraktas, estas nura malobservo de tiuj Leĝoj... nenio alia ol simpla, logika sekvo de misharmonio!... ĝi estas ja tio, nome elpenso de l' homoj, por sin mem turmenti, ne konforma al tio, kion la Kreinto, celante lian feliĉon, preskribis per Siaj Harmoniaj, Neŝanĝeblaj, Perfektaj

Leĝoj... Cetere, ĉu ne estas ĝuste por malpliakrigi la suferon de la sinmortiginto, forprenante lin el tiu situacio neeltenebla por Spirito, ke la Leĝo lin puŝas al reenkarniĝo?... Kion do, laŭ via opinio, ni devus fari al Vincento aŭ al iu ajn el vi, sub la amoplenaj okuloj de la Ĉiela Kuracisto kaj laŭ la konsiloj de Lia Patrino, kiu nin ĉiujn gvidas?!... Por Vincento, la reenkarniĝo – laŭ lia stato kaj kiel ĝi ja estos – montriĝas kiel la medikamento konvena en ĉi tiu kazo! Reenkarniĝinte, li ĉiam ankoraŭ estos internulo de nia Instituto! kaj same restos hospitaliĝinta en la Frenezulejo, kiel nun! Same prizorgata de la kuracistoj kaj psikistoj de tiu Fako, krom ankaŭ sub la protekta viglado de la direkcio de la Hospitala Departemento, de la Departemento pri Reenkarniĝo, de la Ĝenerala Direkcio de l' Templo, krom ankaŭ de la asistantoj-misiuloj komisiitaj de la Supro! Tiu reenkarniĝo, kiu ŝajne vin teruras, estos kvazaŭa delikata operacio, la drasta rimedo antaŭvidita de la Granda Leĝo kaj celanta la reagon de l' Plibona sur la malsuperan, rimedo kiu tamen efikos kvietige kaj resanige, revigligante la vibrajn fortojn, reaktivigante fakultojn kontuzitajn de la kruela traŭmato!

Ĉu la Leĝo agas favorkore kaj ame – vi demandas –, permesante la revenon sur la surteran arenon en tielaj kondiĉoj?!... Ho, kiel vi kuraĝas imagi pli grandajn toleremon, protekton, favorkoron ol tiuj, pro kiuj la Plejalta konsentas novajn oportunojn al la granda pekinto – nomata sinmortiginto – por ke li povu releviĝi el la abismo, en kiu li sin ĵetis, sed releviĝi honore, sub la prizorgo de la Milda Nazareno, per la propra penado, per la nobledifa, fidela plenumado de la Devo?... Ĉu li estas senigita el siaj rajtoj kiel kreito de Dio, kiel Spirito evoluanta al la gloro de la Senmorta Vivo?!... Ĉu, kontraŭe, al li ne estas donataj altvaloraj oportunoj per la reenkarniĝo?... Ĉu li ne estas subtenata hodiaŭ, same kiel li estos morgaŭ, de la prizorgado de Jesuo Nazaretano, patre gvidata de Ties laboristoj, de la legianoj de Maria, kiuj lin helpos sur la dolora vojo al tiu kalvario, kiun li mem forĝis per la freneza ago kontraŭa al la Leĝo de

Dio?... Ĉu Spiritoj ŝvebantaj, kiel la Dia Kuracisto de la Animoj, en ĉielaj sferoj ne sin okupas pri li, petante la Ĉiopovan Suverenon pri novaj oportunoj, por ke li reboniĝu per justaj, noblaj agoj kaj tiel liberiĝu, kiel eble plej baldaŭ, de sia nuna, humiliga situacio?...

Li ja suferas, sed kiu ĝin kaŭzis?... Cetere, ĉu sufero ne estas grandioza leciono, haviganta saĝon per sperto?...

Kiu, sur la Tero, ne scias, ke la memmortigo estas eraro, kiun oni devas ne fari pro tio, ke ĝi kontraŭas la Naturon, la Leĝon kaj la Amon de Dio?!...

Ĉio sur la Tero ĝin malaprobas kaj kondamnas: la religioj, la prudento, la sento, la saĝo, la honoro! Kaj jen la kaŭzo: la komuna saĝo, per la penso, per la intuicio, konscias la bedaŭrindan mizeron, al kiu reduktiĝas la animo de sinmortiginto!

Al Vincento, kiel vi vidas, la Leĝo donis la sanktan rajton vivi sur la Tero en perfekta fizika-materia envolvaĵo, kiel ĉi tiu modelo sur la piedestalo!

Kion li tamen faris el tiu korpo?...

Li ĝin forĵetis, malŝate traktis, brute detruis!... Tiel malrespekte kvazaŭ li ĝin ĵetus kontraŭ la vizaĝon de Dio mem!

Sed tiu ofendo kontraŭ la Leĝo kostos al li tre kare!

Li elpagos la naturajn sekvojn de sia ago, riparos la malbonojn, kiujn li kaŭzis kiel al si, tiel ankaŭ al aliaj, en la okazo se lia malbona faro trafis iun krom li mem; li travivos amarajn sinoferojn kaj larmojn, kiel logikan sekvon de sia frenezaĵo, ĝis li havigos al si sufiĉajn vibrofortojn por ricevi de la Providenco la prunton de nova korpo simila al tiu, kiun li detruis, de alia templo, perfekta kaj sana, kun kiu li rekomencu la normalan evoluan iradon, interrompitan de la falo en la misvojojn de la memmortigo!

Cetere, li suferas. Sed... kiu igis lin suferi?... Kial li suferas?...

Kiu la ĉefa kaŭzinto de liaj suferoj?...”

Malĝoja kaj ĉagrenita, mi mallevis la frunton, preferante la silenton.

# Ĉapitro VII
## **Unuaj provoj**

"Kiom vi faris al unu el ĉi tiuj miaj fratoj la plej malgrandaj, tiom vi faris al mi."

Jesuo-Kristo
**La Nova Testamento.**[1]

Pasis du tagoj post tiuj ĵus rakontitaj okazaĵoj, kaj dum tiu tempo ni nin fordonis al seriozaj konsideroj pri ĉio, kion ni vidis kaj lernis dum la vizitoj en la Hospitalaj Departementoj.

Ni komprenis la lecionojn.

Nenian iluzion ni plu povus fari al ni, post kiam ni finstudis tiun spegulklaran kaj saĝoplenan biblion, kiun formis ĉiu el la vizititaj sekcioj!

Angorsento premis al ni la korojn! Kaj en la plumba atmosfero de la Hinda Pavilono, envolvitaj en nostalgio kaj soleco, ni vidis, ke larmoj banas al ni la vizaĝon! En la mateno de la tria tago, ankoraŭ tiu sama Roberto de Canalejas nin helpis forskui la deprimon, en kiun ni ekglitis, invitante nin promeni kun li tra la parko.

[1] Sankta Mateo, 25:40.

Per tiu ĉarma afableco, diskreta kaj senartifika, kiu lin karakterizis, li dum la irado avertis:

"– Senkuraĝeco ĉiam estas malbona konsilanto, kies inspirojn ni devas forpeli per ĉiuj niaj plej bonaj fortoj! Kontraŭstaru ĝin, miaj amikoj, turnante vian volon al la Superega Forto, de kiu emanas la energioj, kiuj nutras la Universon... kaj vi tuj eksentos, ke revigliga humoro revivigos al vi la kapablojn por daŭrigi la iradon...

Kiam vi sentos vin senkuraĝaj kaj malĝojaj antaŭ la neeviteblo, eklaboru! Serĉu en la oportuno de nobla kaj honesta agado la rebonigilon por la krizostataj fakultoj! Ni neniam estos tiel sensignifaj kaj senpovaj, ĉu sur la Tero kiel homoj, ĉu en la Nevideblo kiel elkarniĝintaj Spiritoj, ke al ni ne eblos servi al la proksimulo, kunhelpante por lia konsolo kaj bonstato. Anstataŭ enfermiĝi en ĉi tiu Pavilono, donante liberan kuron al turmentaj, senfruktaj pensoj, kiuj ja pligrandigas viajn suferojn, venu kun mi vizitadi tiujn viajn fratojn, multe pli suferantajn ol vi, kiuj ankoraŭ restas en la Hospitalo, enkarcerigitaj en tiu tenebra dramo, kiu iam ankaŭ vin envolvis... Ni revenu al la Hospitalo por revidi la amikojn, la kolegojn, la flegistojn, kiuj vin bonkore prizorgis kaj konsolis viajn korojn senkuraĝigitajn de la doloro, la kuracistojn, kiuj helpis vin forpeli el la menso tiujn obstinajn impresojn, kiuj malfortigis al vi la kuraĝon..."

Ni konsentis. La tutan tagon, akompanataj de Roberto, ni vizitadis novajn malsanulojn, eldiris solidarajn esprimojn al kompatindaj ĵusvenintoj el la Sinistra Valo, brakumis Joelon kaj la ceterajn sindonajn amikojn, kiuj nin sindediĉe prizorgis dum tagoj kaj noktoj, kies memoro estas plena je angoro, prezentis respekton kaj omaĝon al tiuj emimentaj psikistoj, kiuj tiomfoje sin klinis super niaj litoj, portante al ni karitatan kvietigon per la revigligaj energioj de siaj gloraj virtoj!... Kaj pro ĉio tio milda konsolado envolvis nian maltrankvilecon, lernigante al ni serĉi kvietigon al niaj suferoj en la kvietigado de aliulaj doloroj kaj en la varmo de virtaj koroj kapablaj nin kompreni!

Vespere, kiam ni pretis reveni al nia rifuĝejo, iu sendito de Teokrito komunikis al ni, ke en la morgaŭa tago ni devos atingi la sidejon de la Viglado por kolektiĝi al granda karavano forveturonta al la Tero.

Teokrito ne apartenis al la gvidistaro de tiu karavano, sed lian aŭtoritaton reprezentis la personoj de liaj noblaj disĉiploj Romeo kaj Alcesto, kiuj zorgos pri niaj interesoj kaj bezonoj dum niaj liberaj tempoj, kvankam ili tion devos fari kaŝite, por ne forpreni de ni la meriton kaj la prirespondecon. Sed Karlo kaj Roberto de Canalejas, Ramiro kaj Olivier de Guzman, Pastro Anselmo kaj aliaj amikoj, kiujn ni kutimis ami, apartenis al tiu multnombra grupo, komisiite, laŭ superaj ordonoj, pri la instrukcioj plenumotaj en la okazo se nia libertempa konduto kuntrenos la neceson de pli ampleksaj aktivecoj.

... Kaj kiam la unuaj pejzaĝoj de la naskolando malprecize konturiĝis inter la pezaj emanaĵoj de la atmosfero, la ploro ruliĝis el la profundaĵoj de mia memo per sanktega spiro de saŭdado, respekto kaj ĝojo!

Pasis jam dek ses jaroj, de kiam la karna portaĵo, kiun mi ricevis de la Patrino-Naturo kaj per kies netaksebla helpo mi devus prepariĝi por la radiluma regno de la Senmorteco, falis en hororaj konvulsioj, disfrakasita en la turpaj ungegoj de la memmortigo!

Dek ses jarojn en mallibereco, plorado, korŝiraj doloroj nepriskribeblaj laŭ ties vera esprimo!

Konfuzita, fremdiĝinta al mia propra naskolando, mi estis ekposedita de la neretenebla timo iradi sola sur la tiel konataj kaj sopirataj stratoj de Lisbono, Porto, Coimbra, kiujn mi tiom multe amis! Mi sentis min korpremita kaj malĝoja, konstatante, ke mi ĝuas liberecon. Niaj amikoj fortiriĝis de nia vidado, kaŝante sin en nevidebleco neatingebla por niaj kapabloj, kaj lasis nin al nia propra gvido, kvankam ili nin ne tute forlasis. Profundajn ŝanĝojn la longa fazo el transtombaj suferoj faris en mia interno, ĉar mi rekonis min timema kaj terurigita, denove starante fronte

al tiu societo, kiun mi samtempe amis kaj malŝatis; kiun mi jen skurĝadis en nebrideblaj koleroj, ĉe la konstato de ĝiaj makuloj, jen laŭdegis per kortuŝaj paĝoj elverŝiĝintaj el mia koro ĉiam vundita pro tre dramaj motivoj! Mi tiam memoris la malfavorajn etapojn teksintajn la ekzistadon, kiun ĵus detruis mia malespero kaj kiu, kvankam sen virtoj, kiujn mi ja ne posedis, tamen almenaŭ distingiĝis per la grado de malfeliĉeco, kiun ĝi kuntrenis!

Ĉe la vekiĝo de la subkonscio, kiun tiel dolĉe lulis kaj dormigis la kuracado en la Instituto Maria el Nazareto, vekiĝo kaŭzita de mia reveno en la scenejon de la pasinteco, la dramo, kiun mi travivis, malvolviĝis ĉe mia rememorado same akraguste kiel antaŭe, agitante la internaĵojn de la animo per la iamaj amaroj kaj ĉagrenoj! Mi memoris tiujn, kiujn mi amis, kaj tiujn, kiuj amis min, aŭ, almenaŭ, havis la devon min ami, kaj mi timis serĉi ilin!

La elreviĝoj, kiujn Hieronimo Silvejra suferis, ankoraŭ estis tre vivaj en mia memoro, ke mi malprudente kuraĝus same ekscitiĝi de ili, vizitante, sen sufiĉe da pripenso, la malnovan hejmon, la geamikaron, la parencojn, pri kiuj mi ekhavis nur svagajn informojn kaj de kiuj mi ricevis nenian elmontron de resopiro per bondeziroj envolvitaj en la fervoro de tiu preĝo!

Mi tiam profitis de la amika inklino de Belarmino, kiun mi ekkonis en la tagoj de malfeliĉo, petegante, ke li ne forlasu min, ke ni prefere restu kune dum niaj iroj kaj revenoj... ĉar Mario foriris serĉe de informoj pri la edzino kaj la filoj, pri kiuj li ĝis nun eksciis nenion en la Nevidebla Mondo!

La ekinstrutisto pri lingvoj lasis sin regi de la samaj impresoj. Li restis silenta kaj enpensiĝa, dum mi lasis liberan esprimiĝon al mia penso, ĝin ĉial vortigante.

Kun li mi revenis al la malnova hejmo, kiu vidis lin naskiĝi kaj kreski; kie li ĝuis la aman kunvivon kun la familio, kiu lin tiel estimis; kaj en kies tapetitaj ĉambroj la figuro de lia nekonsolebla patrino ŝajnis ankoraŭ moviĝi en freneza stato, ekde tiu momento kiam ŝi vidis lin mortanta kun tratranĉitaj manradikoj. La ĉarma

bieneto jam ne apartenis al la familio Queiroz e Souza, nek tie troviĝis la amoplena oldulineto, kiun li nun, kun rimorsoj elspirantaj el la profundaĵoj de la animo, aflikte serĉadis, nekonsolebla ke li neniam ekhavis sciigojn pri ŝi dum lia tuta esto ardis je sopirado!... Mi tiam vidis la eksinstruiston pri Dialektiko ekplori antaŭ la kameno, genuiĝinta ĝuste sur la loko iam okupita de la balancoseĝo de la maljuna sinjorino, de kiu li nun petegis pardonon pri la kruela ĉagreno kaŭzita al ŝia dolĉa patrina koro; petegis, en aflikta kaj kortuŝa plorado, ŝian resopiratan ĉeeston, eĉ se nur dum momento, por ke en lia brusto mildiĝu la akra doloro de saŭdado, kiu tordadis al li la animon!

Kvazaŭ senkonsola pilgrimanto, li ŝin serĉadis en ĉiuj lokoj, pri kiuj li supozis, ke ŝi tie sin trovas. Sed la amoplena maljunulino, por kiu la vivo, la ĝojo kaj la feliĉo koncentriĝis en li, troviĝis nenie! Sed jen konsterna ideo montris al li la lastan eblecon: li sin direktis al la familia tombo, kie kuŝis la cindroj de liaj prapatroj... Certe tie ankaŭ troviĝos lia patrino...

Efektive! La adorata nomo tie estis, gravurita sur la tombŝtono apud lia propra nomo...

Belarmino genuiĝis ĉe sia propra tombo kaj, banata per larmoj, preĝis por la patrino.

Vesperiĝis, kiam ni silente malsupreniris la herbkovritan deklivon de la tombejo. Mi kiom eble provis rekuraĝigi la karan amikon, kaj dum ni vagadis sur la stratoj, mi rimarkigis, penante montriĝi al li konfida kaj konsola:

“– Estas facile konkludi pri la destino de via respekteginda patrino, mia amiko! Ŝe certe ne kuŝas enfermita en tiu putraĵplena kaĝo el marmoro, diseriĝante kun la lastaj materiaj elementoj, kiuj tie restas... ĉar nek vi mem tie troviĝas!... La prudento montras, ke, ĉar ni estas eternaj, ankaŭ tia ŝi estas... kaj ke ŝi, same kiel ni, sin trovas en loko konvena al ŝia eksterkorpa ekzistado, tute ne en ia tomba fosaĵo...”

“– Jes! mi jam pensis pri tio, Kamilo... Sed kie ŝi estas?...

En kiu loko de la Nevidebla Senfino?... kaj kiakaŭze mi, estante ankaŭ nemortema, neniam, neniam plu renkontis mian karan patrinon?... Kial mi ŝin neniam vidis reflektiĝi en la potencaj aparatoj de nia malsanulejo, per telepatia vizito?... Ĉu mi iam revidos ŝin?...”

“– Pardonon, Belarmino... Iam ŝajnis al mi aŭdi vin sciigi, ke via respektinda patrino same konfesis materialismajn kredojn kiel vi?...

Kiel vi do volus, ke ŝi preĝadu por vi reflektiĝante en la sentivo de iu mezurilo de spiritaj vibroj, se uzi la klarigojn de niaj karaj amikoj el la Kolonio?... Ni prefere demandu D-ron de Canalejas aŭ nian Roberton, kie ŝi troviĝas... Kio min koncernas, mi neniel dubas la eblecon, ke vi ŝin revidos! Se ĉio, kio nin envolvas, de post kiam ni venis en la transtomban vivon, imponas per la justeco de la logiko, do tiu sama logiko kondukos vin al la patrino, pli aŭ malpli frue...”

“– Jes, ni ankoraŭfoje demandu la doktorojn de Canalejas... Kiom da fojoj mi jam faris ĝin, tamen ambaŭ evitis definitivajn respondojn?!... Sed... kie ni ilin trovos nun?... Neniun adreson ili lasis kun ni!...”

“– Ni do atendu, ĝis ni ilin trovos... Ni estu paciencaj... amiko de Queiroz e Souza! Post dek ses jaroj da mirigaj malfeliĉoj, mi kredas, ke mi lernis rudimentojn de tiu sublima virto nomata Pacienco!...”

“– Mi tamen, amiko Kamilo, estus preferinta ne reveni Portugalujon... Mi sentas min maltrankvila kaj malĝoja...'

Malgraŭ ĉio, ni estis lacaj kaj strebis al ripozo.

Kie tamen trovi ŝirmon?!...

La dececo, la respekto al aliulaj hejmoj detenis nin engastiĝi en fremdaj domoj... Koncerne la malnovajn amikojn, ne povante nin vidi, ili tial meritis des pli da respekto, ĉar ni ne volis partopreni ilian intimecon kiel maldiskretaj entruduloj.

Kutimintaj al la komforta disciplino de la Instituto, ni daŭre iradis sur la stratoj de la urbo premataj de la sopiro pri tiu dolĉa ŝirmo. Neretenebla malĝojo nebuligis al ni la korojn, dum la krepusko ĉirkaŭen elverŝis nostalgion, plipezigante la ombrojn kaj la impresojn, kiuj nin konsternis.

Belarmino sugestis, ke ni engastiĝu en iu preĝejo, kies navo, plenplena je kredantoj, klare invitis al eniro. Mi tamen ĝin forpuŝis, min fidele tenante je malnova neakordigebleco kun la pastraro. Multaj lokoj pro tio estis memoritaj, sed, ilin proponinte, ni tuj sekve ilin forĵetis...

Subite, kvazaŭ la frata zorgemo de Teokrito nin observus per tiuj magnetaj speguloj, sekvante niajn paŝojn same kiel li agis kun Hieronimo, savanta ideo prilumis al mi la menson kaj mi plenĝoja ekkriis:

Fernando!...

Jes, Fernando de Lacerda! la neforgesebla protektanto, kies karitataj pensoj pri amo kaj paco, disfluantaj en preĝoscintilado, tiom da fojoj min vizitis en la terura senkonsoleco de tiu malluma rifuĝejo, en kiu mia animo elpagis la trokuraĝan malrespekton antaŭtempigi la decidon de la Justa Leĝo!

Jes, Fernando! la bonega koro, kiu, senlace kaj kompateme, ĉiam ankoraŭ min allogis per siaj konstantaj mensaj vizitoj, siaj amplenaj brakumoj aliiĝintaj en bonfaran radiadon el novaj preĝoj, ke mi konkeru novajn, pli feliĉajn tagojn en mia destino!...

Ni ja sciis, kie loĝas tiu malnova amiko, kie li plenumas sian honestan laboron, kaj kie li prefere kunvenas por siaj sciencaj kaj kulturaj eksperimentoj, al kiuj, kune kun ĝentilaj kamaradoj, li oferadis siajn plej bonajn energiojn, ĉar ni jam vizitis lin tiam, kiam la unuan fojon ni malsuprenvenis al la Tero. Ni do direktis nin al lia domo, kie ni diskrete kaj humile engastiĝis, okupante iun subtegmentan ĉambron, ian "mansardon", speciale adaptitan, por tiel diri, de la Nevidebla Sfero por gastoj de nia klaso.

Kelktaga restado ĉe Fernando kaj liaj kolegoj estis sufiĉa por mia readaptiĝo al la surteraj okazaĵoj kaj alkonformiĝo al la socia vivo. Sed tio fariĝis ne sen grandaj ĝenoj al mi, kiu sincere sopiradis la trankvilan kaj lojalan kunvivadon en tiu nevidebla socio, al kiu mi jam kutimis.

Mi senrezerve faris konfidencojn al tiu altvalora mediumo, tiel amata en nia Instituto. En la dolĉa ŝirmo de tiu "mansardo", mi kolektis ideojn kaj decidis plenumi iun programon, celante efektivigi la rekomendojn de Teokrito. Mi, antaŭ ĉio, revenu al miaj malnovaj amikoj, kolegoj, eldonistoj kaj eĉ kontraŭuloj por al ĉiuj informi, ke la memmortigo ne fortranĉis al mi la vivon, eĉ ne la inteligenton kaj la agpovon. Mi tiam ekskribis, per la cerbo de Fernando, en amikaj konversacioj, kiuj multe konsolis min, kaj uzante lian manon kvazaŭ ganton, kiun mi ŝovus sur mian propran manon, longajn leterojn al iamaj amikoj, kiujn la morto ne forgesigis al mi; sincerajn kaj verajn informon pri miaj impresoj, penante identigi min per tiu literatura stilo de ĉiuj konata. Sed mia iniciato entenis jam nenian vantamon! Mi prefere celis krei kondiĉojn por estontaj, pli ampleksaj raportoj. Mia intenco estis, antaŭ ĉio, anonci al tiu societo, ke mi estas viva, tre viva kaj pensanta, malgraŭ la neimagebla tragedio, kiun la tombo kaŝis al la malfortikaj homaj okuloj! Mia deziro estis montri min al tiu sama socio, kiu iam konis min, reĝojigi ĝin per la feliĉega novaĵo, ke ankaŭ ĝi, kiel mi, estas nemortema; fine, konscience averti ĝin pri la danĝeroj ekzistantaj en la mallumaj kaptiloj forĝitaj de tiu monstro – la Memmortigo!

Sed... malgraŭ la bonvolo, kiu min posedis, kaj la sindonemo de tiu malavara amiko, kiu al mi havigis netakseblan helpon, mi travivis la elreviĝon kaj honton esti forpuŝita de la plimulto el tiuj, al kiuj mi deziris servi, min prezentante al ili kiel pensantan individuon, vivantan inteligenton, normalan kaj sendependan, malgraŭ la fakto, ke mi estis nevidebla. Malgraŭvole mi venigis grandajn ĉagrenojn sur la kompatindan Fernandon, kiun mi kontraŭe deziris vidi respektata kaj honorata

pro lia mireginda kapablo facile transsendi la penson de forpasintaj animoj: efektive li fariĝis objekto de tro akraj kaj maljustaj kritikoj, sendankaj insultoj, tro pika mokado!

Ĉagrenite, mi desapontiĝis. Malgraŭ mia bonvolo, al mi ne eblis defendi la noblan amikon, ĉar oni malvolontis aŭdi mian voĉon. Neniom valoris tiom da tre interesaj novaĵoj, kiujn mi portis el la neĝblankaj transtombaj regionoj, celante surprizi malnovajn rivalojn en la literaturo; tiom da tre impresaj dramoj kaj rakontoj, riĉigontaj eldonistojn, kiuj sendube rekonus min laŭ tiu al ili tre konata stilo! Mi vidis min devigita al silento, ĉar tre malmultaj agnoskis mian revenon!

Sed la kunvivado kun Fernando kompensis al mi la malvenkojn sur aliaj kampoj, ĉar grandan edifon mi ricevis de la oftaj konversacioj kun li, al kiu mi esprimis plej grandan amikecon, ĉiam pli kreskantan dankemon pro la simpatio, kiun al mi, same kiel al miaj kamaradoj, li senŝanĝe elmontris.

.................................................................................................................

En iu suna vespero, unu monaton post nia alveno en Portugalujo, kiam la dolĉa aromo de l' oleandroj miksiĝis al la alloga odoro de la riĉaj fruktarbejoj, dissemante vivon kaj ravon en la serena atmosfero, mi, per senpripensa kaj temerara iniciato, revenis, sola kaj enpensiĝa, al la Bieneto de S...

Doloraj rememoroj leviĝis, kvazaŭ obsedantaj koboldoj, ĉe ĉiu paŝo sur la duonvarma, herbokovrita vojo... kaj dume la Pasinteco, iom post iom trudiĝante, forskuadis el mia memoro la cindrojn de la forgeso, kiujn la dolĉaj ĉielaj favoroj disŝutis sur miajn dolorojn, kiuj tiel reviviĝante, denove ŝiradis al mi la koron!

La malnova domego al mi ŝajnis nuda. Ĝiajn ĉambrojn mi eniris, unu post alia, sub la mensa kaŭstikeco de obstinaj angoroj. Ombroj de abomenegindaj amaraĵoj kovris al mi la menson, ĝin regresigante ĉe ĉiu revekiĝo de la rememoroj estigantaj strangan retrospektivon pri mia vivo, tiel riĉa je suferigaj, elrevigaj

epizodoj! Reala panoramo de mia ekzistado, kun ties ĉiutagaj luktoj kaj prirespondecoj, mirakle rebildiĝis en mia konscio superekscitita de tiu fenomeno nomata memvola introspekto, nerezisteble devigante min refoje sperti, suferi kaj tute revivigi ĉion, kio antaŭe min afliktis kaj premegis al mi la animon! Kaj agonia ŝvitado elgutadis el la subtilaj internaĵoj de mia astrala memo, vidigante al la konscienco la aboslutan mankon de meritoj, kiuj, en tiu delikata momento, konsolus min per honoraj favoroj! Ŝajnis, ke la epizodoj elvokitaj de la emocioj sorbiĝintaj de la medio, en kiu mi iam vivis, pensis, agis, kaj kiun mi saturis per venenaj mensaj emanaĵoj, pligrandiĝis antaŭ mia ĉimomenta hipersentiveco, aliiĝante en tiranajn fantomojn, kiuj min deprimis, se ili ne povis min akuzi!

La neelportebla hejma kunvivado, kiun iam ĉeestis tiuj malnovaj muroj; ka konstantaj malpaciĝoj kaj malkonsentoj, kiuj faris el mia vivo ian ŝtorman oceanon; la morna pezo de pensoj, kiujn difektis mania nekontenteco, trenita de neŭrastenia temperamento ĝis absoluta nerva malordo; la konsternaj tenebroj, kiuj konfirmiĝis, estingante la lumon al miaj blindiĝantaj okuloj; la longe intencata decido cele al la fatala finiĝo; la ekstrema malespero; la fina falo en la abismon; ĉio ĉi miregige leviĝis el la internaĵoj de mia memo, sub la pezaj sugestioj de tiu malbeninda medio, kiu vidis la lastajn tagojn de mia homa ekzistado! Kaj – ho grandioza fakulto, kiu tiel premias kiel punas la konsciencon, laŭ la agoj impresintaj ties sentivon! – mi revidis, sentante iliajn efikojn, eĉ la lastajn scenojn, tio estas, la makabrajn stertorojn de la morto detruinta, antaŭ la ĝusta tempo, tiun portaĵon, kiun la dia zorgemo konfidis al mi kiel sanktan deponon, por la honora riparado de ia abomenega, honteginda pasinteco!

Senkonsila, trafita de konsterna krizo, mi perdis la memoron pri la nuno, lasante min interniĝi en la veprejojn de la pasinteco, kvazaŭ min ekposedus infera retrospektiva frenezo, kaj mi damne ekblekis, kiel iam en tiuj sinistraj konvulsioj, ululante kaj ĝemante,

blasfemante kaj verŝante la satanan ploron de tiu, por kiu ne plu estos espero pri konsolo, ia halto por ripozi kaj pripensi!... Kaj se iu tie ankoraŭ loĝus, aŭ preterpasus la ĉirkaŭaĵojn, povante, per disetendo de siaj psikaj kapabloj, percepti la tragedion, kiun mi tiam rememoris, tiu asertus, ke dek ses jarojn post mia morto li ankoraŭ sentis ke mi tie ĉeestas, plorĝemante kaj tondre blekante pro nebrideblaj doloroj!

Kiam mi rekonsciiĝis el tiu malbeninda kolapso, Romeo kaj Alcesto, per tenera zorgo, verŝadis sur mian frunton kvietigajn emanaĵojn el siaj bonegaj magnetaj fortoj, kiuj revigligis al mi la animon kvazaŭ bonfara roso sur velkinta, malfortika kreskaĵo!

La lunhela ĉielo montris, ke multajn horojn mi pasigis en tia stato, freneziĝinta en la fajra regiono de la Pasinteco, ĉar jam estis nokto, la foraj steloj trembrilis beligante la firmamenton!

Mi trovis min ripozanta sub la freŝeco de aromaj arbaretoj, kaj la malnovaj branĉplektaĵoj de proksima vinberĝardeno sciigis, ke mi ankoraŭ troviĝas en la Bieneto. Nekredebla ĉagreno ŝiris al mi la koron, dum larmoj ruliĝis, mildigante la premon, kiu sufokis mian bruston.

Mi petegis la eminetajn Gvidantojn pri la aparta favoro min rekonduki al la Hinda Pavilono, ĉar tie mi sentus min sekura, ŝirmita kontraŭ ĉia kaptilo de mia menso taŭzita de pasintaj malprudentaĵoj. Portugalujo kun siaj amaregaj rememoroj, Lisbono, la malnova Porto – la Tero entute – ĉio afliktis mian Spiriton, inklinigante lin reveki ombrojn kaj sufefojn, kiujn mi deziris, bezonis forgesi! Sed oni tion ne konsentis, profite al mia morala reboniĝo, ĉar la noblaj mentoroj asertis al mi, ke mi ion devos entrepreni en tiu medio, kiel ateston pri la akiro de la kapablo rezigni kaj abnegacii cele al novaj esploroj en la spiritaj regionoj, kiujn ĝis tiam nek mi nek miaj kamaradoj efektive atingis, malgraŭ la abomensento trudita de tiuj turmentaj lokaj rememoroj!

Ĝislarme kortuŝita, mi tiam eldiris ardan preĝon, timigite antaŭ la pezaj prirespondecoj, kiuj min superŝarĝis:

"– Noblaj kaj karaj mentoroj, bonvolu do montri al mi, kion mi povas provi por malakrigi la moralajn torturojn, kiuj, venenante miajn energiojn, malfortigas al mi la volon! La revekiĝintaj rememoroj, la etoso, la elreviĝoj, la sentimentala forgeso, en kiun mian memoron ĵetis tiuj, al kiuj mi plej konfidis, estas ĉagrenoj, kiuj suferige ŝiras mian koron, superekscitante mian sentemon ĝis konsterna grado!... Helpu, ke mi scipovu ĝuste agi, realigi ion meritan, sufiĉe honoran por al mi permesi la ĝuon de ia faciligo kaj efika konsolo! Konsilu min!..."

Eldirinte tiun petegon, kaj dum la belaj figuroj de ambaŭ junuloj ĉiam pli kaj pli diafaniĝis, maldensiĝante sub la opalecaj radioj de la kreskanta luno, kiu donis romantikan tonon al la pejzaĝo, mi aŭdis, ke oni al mi respondas per demando:

"– Kiajn admonojn Roberto faris al via grupo, en la antaŭtago de via malsupreniro por plenumi ĉi tiujn instrukciojn?..."

"– Ha jes, mi memoras... Ni provu kvietigi la fakultojn taŭzitajn de la suferado... portante balzaman helpon al suferantoj en pli krizaj situacioj... kaj ni serĉu revigliĝon ĉe la bona kaj sinceraj amikoj, kies koroj, prilumitaj de la brilo de puraj virtoj, estus sufiĉe fortaj por de ni forvarmigi la froston de l' senkuraĝeco kaj gvidi niajn pasojn al multpromesaj vojoj..."

"– Vi do faru tiel... Roberto vin plej ĝuste konsilis..."

Mi tiam kolektis ĉiujn al mi disponeblajn fortojn, trudis serenecon al la sensoj skuitaj de la emocioj, altigis mensajn energiojn, rememorante la petojn al la Nazareta Majstro, kaj ankaŭ preĝis, fervore kaj humile, petnte pri helpo kaj protekto.

La ĉirkaŭa soleco min teruregis. Mi rigardis la sinistran domaron, kaj abomenaj emocioj instigis min foriri tre malproksimen, tien kie al mi eblus forgesi la tragedion, kiun ĉio tio rememorigis al mi! Mi rapidigis miajn paŝojn kaj malproksimiĝis... sed, transpasinte la malbenindajn sojlojn, mi ekvidis, ke al mi estas rezervita kompensa surprizo, certe la respondo al tiu petego adresita al la Dia amiko:

Atendante min, tie troviĝis Ramiro de Guzman kaj Roberto de Canalejas!

"– Dio estu laŭdata!"– mi ekkriis, per elverŝo de profunda dankemo...

Kaj plenkonfide mi iris kun tiel altvaloraj akompanantoj, kiuj, min karitate rekondukinte al mia modesta surtera loĝejo, senprokraste foriris.

..........................................................................................................................

Longe pripensinte, ni ekdecidis agi laŭ la inspiro de iamaj konsiloj, admonoj kaj ekzemploj de niaj gardistoj kaj instruantoj, kaj organizis kvazaŭan "klasasocion", celante plani kaj realigi agadon, kiu kontraŭbatalus la ideojn pri memmortigo, la malsanecajn inklinojn elmontrantajn tiun inferan dispozicion, kiu infektis la diversajn sociajn tavolojn, al kiuj ni nun povis reveni kiel nevideblaj estaĵoj. Sed tiel ampleksa entrepreno levis kontraŭ ni malfacilajn barojn... kaj se ne estus la efikaj helpoj de la luma gvidantaro, kiu nin inspiris, ni certe atingus nenian kontentigan rezulton.

Komence ni volis nin vidigi kaj komprenigi al la homoj, gajni ilian konfidon pere de atestoj, sinceraj kaj detalplenaj, pri la realeco de la mondo, en kiu ni vivas, ĉu pozitive pruvante nian identecon, ĉu per aliaj al ni eblaj apartaj rimedoj. Ni volis starigi kun ili seriozajn amikajn rilatojn, interesajn kaj instruajn konversaciojn, ian konstantan liveradon de novaĵoj, kion ni rigardis plej utila al la tuta homaro, ĉar ĝi celis averti ilin kontraŭ la nekonata danĝero, kiun la memmortigo reprezentas por la surtera socio. Tre malmultaj tamen estis tiuj, kiuj konsentis akcepti niajn tiel sincerajn manifestiĝojn, kaj el ili preskaŭ ĉiuj estis al ni fremdaj, eĉ loĝantaj ekster Portugalujo! Sed plejofte okazis, ke post grandaj, lacigaj penoj en la klopodo krei cirkonstancojn favorajn al la dezirata celo; post sinsekvaj tagoj ĉe penigaj provoj kun mediumoj, kiujn ni kun premata koro trovis tie kaj aliloke, jen oni akceptis nin malagnoske kaj nin

krude kaj ŝoke forpuŝis tial, ke nia poezio aŭ prozo transtombaj al ili montriĝis misfiguritaj pro manko de nia iama stilpureco, kvazaŭ ni ne estus devigitaj superi fortorabajn malfacilaĵojn prezentatajn ne nur de tiuj perantoj sed ankaŭ ĉefe de la senkompata kaj postulema sekvantaro, kiu ilin ĉirkaŭas. La kritikoj, per kiuj ili nin akceptis, esprimiĝis per mokoj kaj ofendaj sarkasmoj, nekonvenaj ĉe edukitaj karakteroj, kaj ili nin forpelis kiel senokupulojn kaj nebonvenulojn de la Astrala Mondo, nin malŝate rigardante kiel mistifikulojn kaj malbonintenculojn! Se ni provis rakonti la surprizajn travivaĵojn spertitajn sur la flankvojoj de la memmortigo, aŭ priskribi la transmondan vivon per ĉiuj fortaj koloroj de l' neantaŭviditeco, ĉar ni rigardis kiel solidaran devon admoni senprudentulojn al singardemo, ili tiam forklinis sian atenton de la seriozaj, edifaj temoj kaj permesis al si demandi nin pri trivialaj aferoj, kiuj nur ilin interesis kaj pri kiuj ni, tute ne sciante respondi, hontis peti helpon de niaj noblaj instruantoj, nur por al tiuj homoj montriĝi agrablaj. Ili preferis pritrakti frivolaĵojn kaj malsuperajn temojn, plej ofte maledifajn, kio nin elrevige malĝojigis, ordinare verŝigante al ni larmojn, ĉar la tempo pasadis kaj ni nenion enskribis, noblan kaj meritigan, en la aŭsteran libron de la Konscienco!

Dum tiu klopodado por atingi la revatan celon, jen ekposedis nin la arda deziro translokiĝi al Brazilo. Ni sciis, ke tiu frata lando prezentas vastan kaj oportunan kampon por tiu ekzerciĝado, kiun ni intencis efektivigi, kaj en ĝi ni certe renkontos multe malpli da antaŭjuĝemo ol kiel ni spertis en nia Patrolando. Ankoraŭ eĥis en nia memoro la bela seanco, kiun, en iu nokto, ni ĉeestis en la postregionoj de la ŝtato Minas Gerais, kien nin ope kondukis la sindonaj edukistoj de la Instituto. Kaj nun, ni volis provi la kontakton kun la brazilanoj, ĉu ni atingos ion pli pozitivan. Sed kiel procedi, por iri tien?!...

Estis ĉiam ankoraŭ tiuj senlacaj legianoj, kiuj respondis al la ardaj helpopetoj, adresitaj de niaj sopiregantaj mensoj, per komuna preĝado, al la Sublima Karitato, de kiu ili estis indaj

reprezentantoj. Per facila transportado sub sia protekto, ili nin kondukis al la dezirata loko, helpante nin per novaj instrukcioj en sekura ŝirmejo, kiu nin gardus kontraŭ malagrablaj surprizoj. Temis pri honormerita institucio, registrita en la Spirita Mondo kiel deponejo de superaj inspiroj, servanta kiel modelo por ĉiuj ceteraj, kiuj strebus disvolviĝi en la lando de la Sankta Kruco, sin dediĉante al la studado kaj praktiko de la sekretaj doktrinoj kaj al la bonfaraj agoj karakterizantaj la verajn kristanajn inicitojn.

Ni do komencis nian malfacilan, penigan agadon.

Ĉiujn disponeblajn rimedojn ni tiam ekprovis, celante utiligi la brazilajn mediumojn por efektivigi la deziratan, respektindan kaj sanktegan projekton! Humilaj, obeemaj, afablaj, amemaj, sinceraj en sia strebo al servado, multaj el ili povintus esti cirenanoj por nia suferado, mildigante nian kalvarion el viparoj kaj spertoj. Ni ĉion faris por utiligi iliajn kapablojn en literaturaj laboroj, per kiuj ni volus pruvi al Dio nian penton pri la malobeo al Liaj Leĝoj.

Sed, ho ve, la torturo de la idiomo!

Kial la brazilanoj, ho Dio en la Ĉielo, idaro nia, samgentaj, eĉ samsangaj kiel ni, tiom dekliniĝis de la kulto al la nacia lingvo?!... Kaj kial la homoj ne provus almenaŭ kapabliĝi por la uzo de iu universala idiomo, kiu tiel al ni, Spiritoj, kiel ankaŭ al ili, ebligus brilajn komunikiĝojn?!... kion do ni povus produkti, utiligante tiajn mediumojn, kiaj ekzistas en Brazilo!...

Mi memoris, ke Roberto iam avertis min pri la baroj, kiujn mi renkontus provante komunikiĝi kun la homoj, kaj mi nun ilin agnoskis sendubaj, veraj!

Invadis min senkuraĝeco, kaj profunda malĝojo minacis renovigi deprimajn ĉagrenojn, malvigligante al mi la animon, kiam en iu nokto, dum ni kunvenis en nia ŝirmejo ĉe tiu grava brazila institucio, konsiderante tion, kio nin tiel maltrankviligis, jen ni estis surprizitaj de la vizito de Fernando, kies karna vestaĵo profunde endormiĝis en lia domo en la malnova kaj amata Portugalujo, ĉar jam estis malfrua nokto. Enlitiĝante, li preĝis

por ni, impresite de niaj oftaj aperoj al sia eksterordinara mediuma kapablo. Kaj certe impulsita de karitataj inspiroj el la eterecaj regionoj, li baldaŭ nin trovis por ankoraŭfoje nin kompateme helpi per sia senŝanĝa servemo.

Ekestis tiam amika kaj utila konversacio ĉe la favora silento de tiu grava asocio. Li invitis nin al pli ofta utiligo de la bonfara rimedo de preĝado, por tiel starigi, per li, pli rektajn komunikkanalojn kun niaj mentoroj, por de ili pli pozitive ricevi la inspiron permesatan en la koncerna okazo, ĉar ni estis kvazaŭ lernantoj, kiuj elmetus al provado la ricevitajn instruojn, celante novajn estontajn oportunojn. Li ree proponis sian komplezan helpon por niaj projektoj, vidante nin maltrankvilaj antaŭ la malfacilaĵoj, kiuj leviĝis kontraŭ ni. Li ankaŭ admonis, ke ni ĉiam ankoraŭ ion diru al la mondo pere de lia kapablo kaj neniel venkiĝu de la tumulta voĉbruado de kontraŭuloj kutimintaj al malsaĝa kritikado. Por tio li, kiel ĉiam, disponigis al ni siajn purajn psikajn kapablojn, en kiuj ni reflektiĝis kvazaŭ en spegulo! El sia bonfara koro li sukcesis elĉerpi konsilojn kaj admonojn, per kiuj li malakrigis la angoran teruron, kiu nin korpremis ĉe la penso pri fiasko en la malfacilaj ekzamenoj, al kiuj ni estis laŭdeve submetataj. Kaj li aldonis, sincere kaj kortuŝite, dezirante puŝi nin sur la rektan vojon:

"– Se, anstataŭ viaj ĝisnunaj vanaj iniciatoj, vi serĉus rimedojn por labori kiel agantoj de la vera Frateco, kiun tiel fruktodone ekzemplis la Dia Modelo de Amo, vi certe jam estus venkintaj, disdonantaj feliĉigajn bonfarojn, kiuj neniel tenus viajn animojn en tiela stato de morozo kaj tempesta angoro.

La Karitato, miaj amikoj – permesu, ke mi tion rememorigu al vi –, estas la bonfara elaĉetanto de tiuj, kiuj dekliniĝis de la vojo strekita de la Providenco! Ĝuste tial la saĝa Rabeno el Galileo ĝin prezentis kiel superegan instruon al la homaro, kiun Li vidis apartiĝinta de la Lumo, ĉar ĝi ebligas pli facilan kaj rapidan aliron al regeneriĝo!

Estas jam tempo, ke vi abnegacie pripensu la Dian Mesaĝon, portitan de Jesuo, kaj saturu la profundojn de via estaĵo per kelkaj gutoj el ĝiaj senmortaj, senkomparaj esencoj!

Riparante la momentan agon, kiu vin ĵetis en la abismon, vi povos ĝin plenumi, servante samtempe al vi kaj al via proksimulo.

Svarmas en la surteraj sociaj tavoloj, kiel ankaŭ en la transmondaj, doloraj nepre solvendaj problemoj, kvietigendaj perturboj, senfine diversspecaj malfeliĉoj, akregaj suferoj, kiuj, afliktante la homaron, postulas la fratan kunhelpon de ĉiu bonvolema koro por esti elpagitaj, konsolitaj!

En la hospitaloj, en la karceroj, en la modestaj domoj, kiel ankaŭ en la luksaj palacoj, ĉie troviĝas mensoj mallume premataj de nekompreno kaj malespero, koroj renversitaj de la perforta intenseco de la elprovoj kaj de la nesolveblaj, ĉi-jarcentaj problemoj! Ĉie ajn, kie nekredemo embuskis, kie pasio ekregas kaj kie malfeliĉo kaj doloro miksiĝas kun ribelemo aŭ senkuraĝeco; kie honoro, moralo kaj respekto al si mem kaj al aliulo ne gvidas la konduton, kaj kie fine la vivo fariĝis fonto de besteco kaj egoismo, latentas la ebleco de falo en tiujn mallumegajn abismojn, en kiuj vi baraktadis, kaptitaj de rabiaj konvulsioj!

Klopodu por ilin lokalizi: ili troviĝas ĉe ĉiu paŝo! Admonu la pekulon, en nomo de via sperto, ke li sin detenu!... kaj montru al li, kiel balzamon al liaj ĉagrenoj, tiun saman, kiun vi iam, kiel homoj, disdegnis, kaj kiun vi hodiaŭ agnoskas kiel la solan kvietigilon, la solan forton kapablan relevi la homon el la malfeliĉo, por lin honorindigi je la mireginda lumo de la rezignacio ĉe tiuj nobligaj luktoj, el kiuj li eliros kiel venkinto, kiaj ajn estos la lin skurĝantaj elreviĝoj: la Amon al Dio! La submetiĝon al la Neevitebla! Fariĝu konsolantoj, klopodante praktiki Bonfaradon, flustrante kuraĝigajn kaj konsolajn sugestojn al la koro de afliktitaj patrinoj, de junuloj senesperiĝintaj pro antaŭtempaj disreviĝoj, de malfeliĉegaj virinoj ĵetitaj en la

koton, kies suferoj tre malofte renkontas aliulan kompaton, kiuj suferas izolitaj en la dornejo de siaj propraj senprudentaĵoj, ne kuraĝante elpeti por si mem la patran amemon de Dio, pri kiu, same kiel la ceteraj homoj, ili havas sanktegan rajton! Ĉiuj ĉi kreitoj bezonas la protektan kuraĝigon de la sentemaj, bonintencaj koroj, eĉ se nur per la luma donaco de ia preĝo! Vi do havigu ĝin al ili, ĉar vi ankaŭ ĝin ricevis de servemaj, amoplenaj animoj, viam vi dolorkrie baraktadis en la mallumo, kiu vin surprizis post tiu tragedio, en kiun vi lasis vin enretiĝi! Rakontu al ili tion, kio okazis al vi kaj admonu ilin travivi ĉiujn bedaŭrindajn situaciojn, kiuj ilin deprimas, kun la pacienco kaj kuraĝo, kiuj mankis al vi, por ke ili ne trasuferu tiujn dramajn okazaĵojn, kiuj vin frenezigis trans la limoj de la materia vivo!

... Kaj se vi eble trovos mediumojn, kies vibra strukturo konformiĝas al la via, ne faru al vi zorgojn pri viaj iamaj laŭroj, kiuj aŭreolis vian nomon en la homaj societoj. Tiu gloro enfalis kun vi en la profundegaĵojn de la pasinteco, kiun vi ne sciis laŭdeve honorigi! Evitu la vantan plezuron identigi vin en viaj paroladoj aŭ psikografiaj komunikaĵoj pere de mediumoj. Eĉ asertante grandajn veraĵojn, vi ne estus tiaj samaj, kiaj vi iam estis, kiel cetere vi ĝin nun ne estas! Viaj nomoj kovriĝis per tre glora populareco sur la tero, por ke la Tero senproteste vidu ilin reaperi en la socio tra la mensa filtrilo de humilaj, senfamaj mediumoj!...

Vi do preferu, nepre preferu la sanktigajn procedojn de la Karitato, diskreta kaj humila!... kaj vi frue renkontos, tra la irotaj vojoj, la floradon de tre dolĉaj ĝojoj...”

Ni lin aŭdis plej plezure kaj kun granda intereso. Fernando, eĉ parolante per sia astrala korpo, dum lia karna vestaĵo dormis en Portugalujo, ŝajnis inspirata de iu el nia sopirata Kolonio, kiu interesiĝis pri nia sukceso. Ni eĉ plurfoje rekonis en lia parolo, samtempe energia kaj tenera, la dolĉajn esprimojn de Teokrito, la patran akĉenton, simplan, amoplenan, de la malproksima amiko, kiu nin ne forgesis... kaj larmoj ruliĝis el niaj okuloj, dum profunda resopiro plenigis niajn korojn...

En la sekvanta tago, ni ekdecidis viziti hospitalojn, malsanulojn ĝenerale, prokrastante aliajn iniciatojn rilatajn al servoj por helpo al la proksimulo, kiujn oni proponus al ni. Nia grupo entute konsistis el tridek Spiritoj, kaj ni interkonsentis dividiĝi en tri apartajn grupojn, tiel sekvante la metodojn uzatajn en nia astralmonda ŝirmejo.

Kun miro ni konstatis, ke la kompatindaj malsanuloj, en siaj litoj de suferado, ne nur perceptis, sed ankaŭ eĉ nin nature aŭdis dank' al la somnolo, en kiu ilin tenis la graveco de ilia malsano, la febro kaj la malstreĉeco de la fluidaĵoj ilin ligantaj al la korpa portaĵo. Kiom nur eble, ni portis al tiuj animoj, malliberigitaj en la karna kaĝo, la mildigon de nia kunsento, jen inspirante al ili rezignacion pri la nuno kaj esperon pri la estonteco, jen provante, per ĉiuj disponeblaj rimedoj, malpliigi la moralajn kaŭzojn de multaj el tiuj ĉagrenoj, kiujn ni vidis duobligantaj iliajn suferojn.

Belarmino, kiun la tuberkulozo puŝis al dizerto el la materia vivo, preferis sin turni al tiaspecaj malsanuloj por inspiri paciencon, esperon kaj kuraĝon al tiuj, kiuj per ĝi forviŝas komplikajn ŝuldojn de pasintaj ekzistadoj aŭ ruinigajn sekvojn de senprudentaĵoj faritaj en la nuno mem. Mi, kiu estis malriĉega, kiu preferis senŝarĝiĝi el la devo ĝisfine treni la vivon, tra la dornoplena vojo de blindeco, min ĵetante en la satanan aventuron de memmortigo, mi estis malgraŭvole pelita de la pento, serĉadi ne nur en la hospitaloj tiujn, kiuj blindiĝis malgraŭ ĉia kuracado, sed ankaŭ sur la stratoj kaj vojoj kompatindajn blindulojn kaj mizerulojn, por ilin helpi kiel konsilanto, flustrante en iliajn pensojn, kiel al mi tion permesis la renkontitaj malfacilaĵoj, la grandan konsolon de la Radiluma Moralo, kiun mi konis ĉe tiuj eminentaj amikoj, kiuj min helpis kaj konsolis dum tiu hospitala interniĝo, per kiu min gardis la favoro de la Superega Sinjoro! Kaj mi multfoje konstatis, ke mi sukcesas, ke koroj trafitaj de senkuraĝeco kaj konsterno revigliĝas ĉe miaj sinceraj kaj ardaj telepatiaj admonoj! Johano d' Azevedo, la

kompatindegulo, kiu malnobliĝis en la mallumo de hontindaj spiritaj sekvoj, sklaviĝante al la fikutimo hazardludi; kiu ĉion oferis al la abomena potenco de ludkartoj kaj ruleto: havaĵojn, sanon, dignon, honoron, eĉ la propran vivon, krom ankaŭ la spirita paco, revenis, afliktita kaj korpremata, al tiuj diboĉejoj, en kiuj li morale sin mem difektis, por proponi avertojn kaj prudentajn konsilojn al aliaj kompatinduloj regataj, kiel li iam estis, de tiu pereiga forlogiĝo, ĉiel klopodante por fortiri de la abismo almenaŭ unu el tiuj malfeliĉuloj, petegante la Supron pri fortoj, helpo de la mentoroj, pri kiuj li estis certa, ke ili sin dediĉas al la laboro forturni de la memmortigo tiujn nesingardulojn, kiuj lasas kapti de sennombraj pereigaj cirkonstancoj.

Sed ankoraŭ pli akraj estis la atestoj de la malfeliĉa Mario Sobral!

Afekciita de la iamaj kutimoj, lia menso trenadis lin en bordelojn, malgraŭ la pento, de kiu li sentis sin penetrita, kaj tiel postulis de li riparojn malfacile plenumeblajn por iu Spirito, heroajn klopodojn, kiuj lin ofte pelis al perfortaj, neesprimeblaj suferoj, verŝigante al li ardegajn larmojn! Ni vidis lin en la maltrankviliga penado por deadmoni la senprudentan junularon de ilia obstinado en la malbona konduto, al kiu ili lasis sin sklavigi, kaj tiucele li rakontadis al unuj kaj aliaj, per paroladoj en nekonvenaj lokoj, siajn proprajn malfeliĉojn, sed oni lin tute ne atentis, ĉar kie malĉasto tenas sian pereigan superregadon, tie ne estas perceptataj la transmondaj intuicioj, kaŭze de tio, ke la ekscitado de la bestaj instinktoj, infektitaj de abomene malpuraj toksoj, materiaj kaj psikaj, efikas kiel baroj, kiujn nenia estulo en lia stato kapablos forigi por tiel sin komprenigi!

Poste ni etendis tiajn provojn al la malliberejoj, ankaŭ sukcesante en la ombra silento de l' karceroj, kie rimorsoj elkoviĝas ĉe la efiko de pripensado... Kaj fine ni invadis privatajn domojn serĉe de suferantoj, inklinaj al memmortigo, kiuj akceptus niajn deadmonajn avertojn en formo de bonfaraj

inspiroj. Estis okazoj, kiam la sola disponebla rimedo estis enblovi la penson pri preĝo kaj fido al la Superega Potenco, instigante tiujn, al kiuj ni nin turnis, virinoj ĝenerale, al pli intensa dediĉo al siaj kredoj. Sed ni suferadis, ĉar la laboro estis tro peniga, tro ampleksa por nia malforteco de pentintoj, kies sola merito kuŝis en la sincereco de nia agado, en nia bonvolemo por la revirtiĝa penado!

Tiel okazis, ke ni vojaĝis en la landinternon de Brazilo, provante kiom eble averti kontraŭ tiu pereiga inklino, kiun niaj Gvidantoj malĝoje konstatas en la impulsiĝema karaktero de la brazilanoj, inklino, kiu rezultigis maltrankviligajn statistikojn pri memmortigo!

Ni tiucele vizitis la mornajn etendaĵojn de la kruda Nordoriento, respekte kliniĝante antaŭ la heroa enlandulo, kiu en senĉesa, malfacilega luktado kontraŭ la mizero pro tiea eterna sekeco, neniam malfidas sian Dion nek la estontecon, ĉiam esperante pri la aŭroro de pli bonaj tagoj, de iu kompensa Patrujo, kiun li efektive nur trovos en la Transmonda Vivo!

Dum la tre instruaj migradoj, kiujn ni karavane faris, ni ricevis gravajn lecionojn, kiuj profunde penetris niajn korojn, lumigante niajn mensojn per novaj kaj fekundaj konceptoj filozofiaj. Reprezentantoj de la spirita direktado de la Sanktakruca Lando, kiel la eminenta, bonkorega Bezerra de Menezes, kaj la dolĉa poeto de la Sinjoro – Bittencourt Sampaio – instruadis nin, kune kun niaj mentoroj, pere de fekundaj ekzemploj ĉerpitaj en la ĉiutaga vivo de multaj brazilanoj, super kiuj ni ploris de kompato kaj pento, ĉar ni havis la okazon ĉe ili ekzameni specojn de malfeliĉoj kaj suferoj, kompare kun kiuj, la niaj, nome tiuj, kiuj nin pelis en malesperon, estis nenio alia ol farsaĵoj de sentimentalaj bohemianoj... Tamen, nordorientanoj, amazonianoj kaj eĉ indiĝenoj de la necivilizita regiono de la lando ĉion rezignacie elportis, eĉ la indiferentecon de siaj pli feliĉaj sampatrujanoj, per la kuraĝa sintenado de tiu, kiu scias kredi, kiu scias esperi!

Sed ni konstatis, kun bedaŭro, ke Mario Sobral iom post iom malproksimigis la eblecon de alia tuja estonteco, krom tiu, kiun li mem elektis, cetere la solan, al kiu li sentis sin altirata: la senprokrasta reenkarniĝo por pezaj kulpelpagoj en familia medio konforma al lia mensa stato!

Mario ofte malatentis la devon partopreni en la instruaj kunvenoj kaj karavanoj prezidítaj de la asistantoj, ne ĉeestis la karitatajn ekspediciojn por vizitado al suferantoj, forgesante sanktajn devojn, kiujn al li konvenus plenumi favore al sia propra reboniĝo! Ŝajnis, ke ĉe la kontakto kun la surtera socio li lasis sin brutigi de la malnovaj mondumaj allogoj, forgesante la Hospitala Departemento. Li sentis sin altirata de tiuj filokoj, por kiuj li iam havis preferon. Kaj je preteksto provi konverti delogitojn kaj senprudentulojn al bonmora konduto, li grave kompromitiĝis antaŭ la observantaj Gvidandoj, tiele reagordiĝante al la pasinteco, ke ni antaŭsentis ĉirkaŭ li la eblecon de renaskiĝo en la brutaj sferoj de la malvirto! Jam plurfoje lin kompateme avertis Alcesto kaj Romeo, provante konvinki lin pri la danĝereco de tiu prefero por siaj elaĉetaj taskoj.

Bedaŭrinde, la pasia amo al Eŭlina, kiu lin malfeliĉigis sur la Tero kaj perturbis en la Tansmondo, alkroĉis lin al la pretenda deziro provi, memore al ŝi, antaŭtempe relevi el la kotejo de l' malvirtoj aliajn homojn defalintajn de la piedestalo de la Devo!

Nia staĝo sur la Tero estis kvazaŭa ekzameno por kapabliĝo al novaj kursoj. Ni ĝuis liberecon de agado, malgraŭ la fakto, ke ni ne laboris senprotekte kaj tre relativa estis la libereco al ni permesata.

Ni sukcesis en la ekzamenoj sed Mario donis motivojn por malaprobo.

# Ĉapitro VIII
## Novaj direktoj

> “Ne maltrankviliĝu via koro; vi kredas al Dio, kredu ankaŭ al mi. Ĉe la domo de mia Patro estas multe da loĝejoj.”
>
> Jesuo-Kristo
> **La Nova Testamento.**[1]

Antaŭ du monatoj finiĝis nia staĝo en la surteraj regionoj. Reveninte al la Instituto Maria el Nazareto, ni denove enloĝiĝis en la pavilono apuda al la Hospitalo, kie ni loĝis depost nia forpermeso. Sed ankoraŭ ne prosperis al ni intervidiĝi kun Frato Teokrito por ekkoni lian opinion pri la maniero, kiel ni kondutis memstare, kaj ja tio nin plej zorgigis, krom ankaŭ la decidoj de la ĝenerala direkcio pri nia estonteco.

Kien ni iros?... Kio fariĝos el ni, post kiam ni disiĝos de Teokrito, de Roberto, de Karlo, de Joel, de tiu afabla elito de la Hospitalaj Departementoj?... Ĉu ni tuj reenkarniĝos, en la okazo se ni ne havigis al ni meritojn por pli longa spirita lernado?...

---

[1] Johano, 14:1, 2 kaj 3.

En iu el tiuj tagoj de maltrankvila atendo, nin surprizis la vizito de la malnova amiko Hieronimo de Araujô Silvejra.

Li alvenis en la Hinda Pavilono dum la mateno, akompanata de la asistanto Ambrozio, al kies bonkoreco li tiom multe ŝuldis. Li jam vizitis la Hospitalon por adiaŭi Teokriton kaj liajn helpantojn, en kies koroj li ĉiam trovis solidajn inklinojn, kaj nun li serĉis nin por reciproki niajn iamajn vizitojn kaj ankaŭ adiaŭi, ĉar ĝuste en ĉi tiu semajno li sin direktos al la Azilo por aranĝi la preparojn por sia proksima reenkarniĝo. Oni vidis, ke amarsento stampiĝas sur lia vizaĝo, donante al ĝi aspekton de evidenta malĝojo. Hieronimo neniam estis rezignacia! Ekde la Sinistra Valo ni lin konis, kiel unu el la plej senekvilibraj el nia misharmonia falango! Kortuŝite, mi sugestis, taksante laŭ la miaj la dornojn, kiuj lin pikvundas:

"– Kial vi ne iom prokrastas la revenon en la scenejon de la malfeliĉoj, kiuj iam ŝiris vin, amiko Silvejra?!... Kiom mi scias, la reveno, ĉe certaj kazoj, ne estas deviga... kio min koncernas, mi kiel eble plej longigos la restadon ĉi tie... escepte nur se postaj decidoj igos min ŝanĝi ĉi tiun direkton..."

Sed la decidoj, kiujn li faris post nia lasta vizito en la Izolejo estis sendube tre seriozaj kaj gravaj, ĉar li respondis kun ardega viveco:

"– Absolute ne konvenas al miaj personaj interesoj pli longe prokrasti la plenumon de la devo... kion mi diras?... de la verdikto, kiun mi mem eldiris en la tago, kiam mi komencis dekliniĝi de la Suverena Leĝo reganta la Universon! Mi estas plene preparita de miaj noblaj mentoroj, Frato Santeremo kaj Frato Ambrozio, por tiu entrepreno, kiu al mi trudiĝas pro miaj ĉi-momentaj krizaj bezonoj. Post longa konsiderado, mi venis al la konkludo, ke mi efektive devas kiom eble plej frue preni novan homan ekzistadon, ĉar miaj eraroj estis gravaj, multnombraj estis miaj ŝuldiĝoj, kiuj nun, ŝarĝinte mian maltrankvilan konsciencon per ekscesaj kulpoj, devigas min el ĝi forviŝi la malhonorajn makulojn, kiuj ĝin nigrigas, kio povos

efektiviĝi nur tiel, se mi revenos en la scenejon de miaj dekliniĝoj de la leĝo por denove entrepreni – sed en honora maniero – tion saman, kion en la pasinteco mi ruinigis, inkluzive de mia materia korpo!”

“– Ĉu vi per tio volas diri, ke vi renaskiĝos en la urbo Porto mem?...”– ni ĥore demandis.

“– Jes, amikoj! Dio estu laŭdata!... Mi renaskiĝos en Porto mem, kiel antaŭ nelonge... Mi reaperos por la materia vivo en biendomo! Mi denove estos bonhava persono, administros financajn kapitalojn, miajn kaj aliulajn, duan fojon alfrontos la neflekseblajn tentojn blovotajn de fiero, vantamo kaj egoismo!... Mi altiĝos en la opinio de miaj proksimuloj, kiuj rigardos min kiel honorindan gravan personon... Mi fariĝos tia sama, kia mi estis hieraŭ!... Sed oni ne plu konos min sub la malhonora nomo Hieronimo de Araŭĵo Silvejra, ĉar alian mi ricevos ĉe la naskiĝo por kaŝi la honton, kiu sekvas miajn paŝojn... Kaj ĉion ĉi mi faros kiel kulpelpagan provon, la teruran provon posedi riĉaĵojn, pli danĝeran kaj timigan ol la mizero, ĉar ĝi la plej malfacile havigas meritojn al la kompatinda, kiu ĝin travivas!

Ĉe la rando de nova lulilo por ankoraŭfoje esti homo kaj elpagi malonovajn kulpojn, mi ĝislarme kortuŝiĝas konstatante la patran bonecon de la Ĉiopova, kiu konsentas al mi la favoron reveni sub la protekto de l' Forgeso, de la naskovesto de nova karna armaĵo, kun nova nomo, por ke mian iaman malhonoron ne rekonu kaj malbenu la socio, en kiu mi vivis kaj por ke mi, konfidplena kaj fortigita, povu provi rehonorindiĝi antaŭ la Universa Leĝo, kiun mi ĉiel malobeis, kaj antaŭ mi mem!... Ĉar estu certaj pri tio, amikoj: la honto pro la malhonoro ankoraŭ ruĝigas al mi la spiritan vizaĝon, kiel en tiu fatala tago, kiam mi, intencante liberiĝi de tiu malhonoro, ĵetis min en la memmortigon!...”

“– Impresas min via argumentado, Hieronimo! Kun ĝojo mi konstatas, ke ne vanaj estis la klopodoj de Frato Santaremo kaj Frato Ambrozio rilate al via situacio...”– intervenis Johano d' Azevedo.

' – Jes, – mi interhelpis, kortuŝita kaj avidanta elfosi novaĵojn, kiel notojn por miaj projektitaj memoraĵoj. – Mi rimarkas, ke seriozaj ŝanĝoj mirakle efikis sur vian pensmanieron... Sed de kiu familio vi renaskiĝos?!... Ni ankoraŭ memoras multajn riĉajn familiojn tie ekzistantajn..."

"– Eĉ se mi scius, mi kara S-ro Boteljo, mi tion ne povus malkaŝi al vi! Miaj zorgantoj informis al mi, ke tiu tre subtila entrepreno efektiviĝas en sanktejo de nepenetreblaj sekretoj, ĉar la Grandanima Leĝo ne permesas, ke ia ajn maldiskretaĵo perturbu la bonan iradon de la plenumiĝonta aranĝo... Laŭ klarigoj de Frato Ambrozio, ni maksimume nur ekscios pri la loko, kien ni migros... ĝis nia interniĝo en la Azilo, kiam ĉio klare montriĝos al ni..."

"– Sed mi iam ĉeestis rendevuon de du reenkarniĝontoj el la Frenezulejo kun iliaj estontaj gepatroj... kaj mi aŭdas de iuj el niaj gardistoj, ke multajn detalojn koncernatajn la aferon oni povos liveri, eĉ al la homoj..." mi kolerete objektis, rememorante viziton en la Urĝahelpa Fako de la Kolonio, kiun mi faris kun la ekspedicio de la Departemento de Reenkarniĝo.

Interhelpis Frato Ambrozio, aŭtoritate konfirmante la asertojn, kiujn ni aŭdis de tiu jam nun estonta kapitalisto de la urbo Porto:

"– Jes! Por la celo de kolektivaj studoj aŭ personaj klarigoj, kiuj rezultigus edifajn efikojn, krom ankaŭ kiel premion al la sincereco de intencoj aŭ al la sindono en la laboro, oni permesos certajn malkaŝojn pri tiu delikata afero, eĉ al nefakuloj! Ĉefe al la homoj estas donitaj multe da koncernaj informoj, kiuj servu al ili kiel stimulo al progreso kaj eĉ kiel konsolo dum iliaj akraj riparadoj. Sed nenion pozitivan oni konsentos, ĉu inter ni, ĉu inter la homoj, por nura kontentigo de scivolo. Interniĝinte en la Azilo, la reenkarniĝonto ricevos informojn pri ĉio, kio lin koncernas, kio al li estas utila kaj necesa.

Vi do aludas tiun okazaĵon en la urĝahelpa Fako?... Sed, kiuj estas tiuj personoj?!... Iliaj nomoj?... Iliaj loĝadresoj?... Sole

nur la insulo sub la portugala flago!... la regiono en la vastega brazila nordoriento... Ni konfesu, mia amiko, ke la sanktega sekreto ne estas malkaŝita, ĉu ne?...”

Mi mallevis la frunton, venkita, dum Belarmino, interesoplena, sin turnis al la malnova amiko Hieronimo:

“– Kaj ĉu vi fidas, ke vi sukcese rehonorindiĝos?...”

“– Sincere, jes! Kvankam afliktas min la penso reprodukti, agon post ago, en pligravigaj cirkonstancoj, tiun ekzistadon, en kiu mi fiaskis! Mi tamen kredas, ke mi estas tiucele preparita ĉar kontraŭe mi ne plu ricevus de miaj superaj gvidantoj la permeson daŭre klopodi ĉe tiu al mi konsentita oportuno, la sola, kiu povas min rebonigi! Cetere, mi kara profesoro, nenion pli mi sukcesos atingi en la Nevideblo, se mi ne gajnos la triumfan liberiĝon de miaj grandegaj ŝuldoj! Estas al mi nepre necese kompreni, ke mi mem malfeliĉigis mian familion! Ke mi ĵetis en la pereigajn torentojn de la mizero aliajn familiojn, kies ĉefoj helpis min per siaj havaĵoj kaj sanktaj laboroj, kiujn mi malŝatis en mia freneza malmodero de ludisto kaj diboĉulo! Estas ankaŭ necese rememori, ke mi fraŭdis la Patrujon, krimo, kiun abomenas, ĉiu honesta homo, kaj per kiu mi kompromitis funkciulojn, kiuj bonkore klopodante por helpi min, donante al mi pluan limtempon por mia rekreditiĝo, ne agis laŭdeve, tio estas, ne registris proŝuldajn deprenojn, ne denuncis min ĉe la tribunalo, ne deklaris mian bankroton! Ĉiuj tiuj malbelaĵoj, ho Belarmino, pezas sur la pesilo de mia konscienco vekita de la pento! ĉar temas pri krimo farita sub la inspiroj de malsincereco, de neglekto, de morkoruptiĝo, de senpripensa nerespondeco, de manko de amo al Bono! Mi tiele enretiĝis en la sinistraj motivoj de memmortigo, ke mi nun sentas min katenita al la pasinteco per tiu insida ĉeno, kiun, por ion entrepreni en la spiritaj regionoj, mi devas rompi, revenante al la scenejo de miaj kulpoj, por noble ripari kion mi malsaĝe detruis!”

Ĉar neniu el ni kuraĝis lin interrompi, la vizitanto daŭrigis, dum peza malĝojo ombris niajn korojn:

"– Mi ne plu havos filojn kun mi! Ĉar mi ne ĝisfine zorgis pri la familio, forlasante en la mezo de la vojo la honoran komision estri la Hejmon, kiun la Ĉielo al mi donis, celante altigi min per akiro de meritoj, tial mi kreis al mi tiun situacion, ke dum la venonta ekzistado mi ne havos la eblon fondi familion kaj denove esti patro!

Sed malgraŭ tio, celante kompensi la malbelan konduton kontraŭ Zulmira kaj miaj gefiloj, mi promesis al Maria, la bonega patrino de mia Savinto, kies patrina bonvolo regeneris Gretan kaj Albinon, ĉiel klopodi dum la surtera vivo por protekti georfojn, iel ajn konstrui ŝirmejojn por la infanaro kaj fariĝi zorganto de tiuj kompatinduletoj, kiel mi agus kun filoj, kiujn mi mem naskigus! En tio ja konsistos mia idealo dum tiu kulpelpaga ekzistado, en kiun mi baldaŭ eniros..."

"– La Ĉielo volu, ke vi starigu viajn orfejojn, antaŭ ol la financa ruiniĝo baros al vi la estontajn eblecojn, amiko Hieronimo!"– mi interrompis, surprizita de la kuraĝo, kiu montriĝis en liaj asertoj.

"– La Ĉielo volu, amiko!... ĉar antaŭ aŭ post la financa ruiniĝo, kiu min atendas en la surtera kulpelpago, mi nepre fariĝos protektanto de multe da orfoj: la larmantaj figuroj de miaj gefiloj, kiujn mia antaŭtempa morto ĵetis en senprotektecon kaj malfeliĉon, estas neforviŝeble stampitaj en mia konscienco, kaj de mi postulas indan elaĉeton, kia ajn estos mia ofero!..."

Frato Ambrozio denove interrompis per zorga klarigo:

"– Jes, la Ĉielo volu, ke, ĉu en la apogeo de la financa bonhavo, ĉu en la prosperkrepusko, liaj pensoj kaj lia volo ne dekliniĝu de tiu rehonoriga vojo, kiun li decidis laŭiri. Nun nian pentinton instigas la plej bonaj intencoj. Sed la sukceso de la projektitaj entreprenoj dependos de lia volforto, de lia sintenado ĉe la bonaj decidoj, kiujn li faris. Ordinare la Spirito, reenkarniĝinte, lasas sin iluzii per la trompemaj logoj de la medio, al kiu li estas elmetita, forgesante honorajn devojn, kiujn li prenis sur sin en la Transmondo kaj kiujn al la forgesinto tre multe

konvenus plenumi en maniero konforma al ilia graveco... Sed se lin konstante impulsos firma strebado al venko, superreganta la ruinigajn influojn de l' monduma egoismo, li tial nepre starigos harmonian telepatian komunikfluon kun siaj nevideblaj mentoroj, kiuj klopodos lin antaŭenigi pere de noblaj, kvankam diskrete kaŝaj inspiroj, helpante lin laŭ la leĝo de solidareco, kies celo estas la frata unuiĝo de la tuta Universo...”

“– Ni supozu, ke Hieronimo malplenumos la promesojn, kiujn li faris antaŭ la reenkarniĝo... Kio okazos?...”– mi demandis, alkroĉita al la acida kriterio de pesimisma raportisto.

“– La konscienco lin konstante maltrankviligos, kaj poste, reveninte en la Spiritan Mondon, li hontos, ke li ne honoris sian vorton, krome komprenante, ke li nepre devos plenumi ĝin en nova surtera migrado... Sed ni esperas, ke tio ne okazos ĉi-afere. Hieronimo disponas la ĉefan faktoron ebligontan la efektivigon de lia promeso: la bonan volon, teneran amon al la forlasita orfo...”

Subite, meze en la mallonga silento, kiu tuj poste ekregis, Belarmino, kies delikatajn sentojn la leganto jam havis la okazon observi, turnis atentan rigardon al la estonta kapitalisto de la urbo Porto kaj amike demandis:

“– Kiujn sciigojn vi portas al viaj amikoj pri via Greta?... Ĉu ŝi ja transloĝiĝis al Brazilo... Kaj pri Albino?... ankoraŭ en la malliberejo?... ĉu Ŝia Reĝina Moŝto vere interesiĝis pri li?...”

“– Ha jes!... – ekkriis la nekonsolebla sinmortiginta patro, kvazaŭ oni vibrigus afliktajn akordojn ĉe la plej sentivaj fibroj de lia koro. – Mi ja estis al vi dononta ĝojigajn novaĵojn!... Kiel vi scis, mi neniam plu povis viziti ilin, ĉar tion ne permesis mia morala stato pasia kaj tre inklina al maldiskretaĵoj... Sed oni certigis al mi, ke Greta, alveninte en Brazilo, edziniĝis kun samlandano digna kaj honesta, kiu al ŝi proponis lojalan korinklinon kaj bonreputacian nomon! Dio estu laŭdata! Kiel bonfaras al mia animo doni al vi ĉi tiun sciigon!... Koncerne Albinon, li estas komercisto, kvankam modesta, en Lourenço

Marques, regule korespondadas kun sia amiko Fernando, kiu lin tre edife konsilas, kiu ĉiel klopodis por havigi al li honestajn vivtenajn rimedojn, kaj kiu krome instruas lin pri la Scienco de la Spiritoj, de kiu li estas fidela adepto. Antaŭ iom pli ol unu jaro Albino edziĝis kun bela portugal-afrikana brunulino... kaj nun li estas patro de du ĉarmaj, ĵusnakitaj ĝemelinoj!...”

“– Kvankam vi ilin ne vizitas, tamen vi ilin vidas, ĉu ne?...” – mi demandis, kunsentante la resopiron travidiĝantan en liaj esprimoj.

“– Jes, amiko Boteljo! Mi ilin vidas dank' al la aparatoj de Frato Santeremo. Kaj estas kvazaŭ mi ilin vidus de proksime kaj al ili parolus, ĉar tio estas al mi permesita... Koncerne Zulmiran, malfeliĉan komplicon de miaj senprudentaĵoj, ŝi finas sian mizeran vivon sub la protekto de la du malpli junaj filinoj, kiuj ne rifuzis – dank' al Dio – ŝin helpi, kiam ŝi ilin serĉis. Ŝi provis malhelpi, ke Greta forveturu al Brazilo, sed ne sukcesis. Kompatinda Zulmira! Kiel mi amis ŝin, ho Dio! Mi estis la kaŭzinto de ŝiaj faloj! Ankaŭ al ŝi mi ŝuldas kompensojn, kiujn mi poste prizorgos kun la helpo de la Ĉielo...”

Post du tagoj, Roberto de Canalejas denove vizitis nin kun invito de Frato Teokrito, ke ĉi-nokte ni ĉeestu solenan kunsidon okazontan en la sidejo de la Hospitala Departemento. Temis, laŭ informo de la juna Canalejas, pri adiaŭa ceremonio, dum kiu ni estos malligitaj disde la zorgado de la Departemento kaj deklaritaj kapablaj por sekvi novajn vojojn cele al la riparadoj konstruontaj nian progreson.

El la kvartalo apudaj al la Hospitalo venis malnovaj zorgatoj por ĉeesti la gravan eventon, kiu ĉiujn profunde interesis. Facile kompreneblas, ke tie la movado estis intensa, dum tiu krepusko, kiam ĉiuj fakoj de la granda Departemento sendis grupojn da Spiritoj, kiujn oni rigardis jam kapablaj alfronti aŭ bezonantaj la terurajn luktojn de kulpelpaga reenkarniĝo pro tia krimo, kiu prezentas la plej gravan kulpon de kreito antaŭ sia Kreinto!

La unuan fojon ni eniris la sidejon de tiu Departemento, kie Teokrito tenis kabinetojn por direktado kaj laborado, kaj tie nin surprizis ĝia majesta interno, kiu, kiel la ceteraj, prezentis la klasikan portugalan stilon, de grandioza, sobralinia beleco.

Alveninte, ni estis ĝentile kondukitaj al vasta kaj modela kunsidoĉambro, simila al tiuj parlamentaj. Kiel en amfiteatroj, la lokon de la paroladtribunoj okupos al granda publiko, tio estas, ni mem, la zorgatoj, dum la direktoroj lokiĝos plankonivele. Super tiu scenejo, al kiu ankaŭ ne mankis grandiozeco, svebis neordinara lumpaleco, kiu ŝajne enverŝiĝis de la ekstero, irizante la medion per mirindaj blankbluaj gradiĝoj.

La ĉambro iom post iom pleniĝis. La lokoj rezervitaj al la sekcioj estis rigore apartigitaj per dividlinioj, pro kio la benkovicoj, aŭ tribunoj, fariĝis kvazaŭ grandaj loĝioj destinitaj al malsamaj sociklasoj. Se tie tamen la diferenco ne estis socia, ĝi sendube estis morala kaj vibra, kio signifas, ke la grupoj, okupantaj la loĝiojn, perfekte harmoniis, prezentante la saman gradon en la skalo de respondecoj, de meritoj kaj malmeritoj.

Dume la estroj de la diversaj fakoj en la granda Departemento staris apud sia direktoro, nome Teokrito, ĉe la honortribuno lokita sur la planko de la salono. Asistantoj kaj gardistoj siaflanke akompanis la internulojn en la loĝioj, al ili frate egaliĝante kiel modestaj spektantoj.

Tiel ni rimarkis, inter la unuaj la ĉeeston de Pastro Anselmo, edukisto de la legio el sinmortigintoj-obsedantoj arestitaj en la Turo; de Frato Mikelo el Santaremo, la abnegacia konsilisto de la Izolejo; de Frato Johano, la respekteginda maljunulo, pacienca kaj karitata gvidanto de la malgaja legio el la Frenezulejo. Ĉiuj sidis apud la direktoro de la Departemento, kiu mem respondecas pri la Hospitalo Maria el Nazareto. Sed liaj asistantoj restis kun ni, escepte de Romeo kaj Alcesto, kiuj, kiel inicitoj, okupis pli altan ŝtupon en la spirita hierarkio, malgraŭ sia rango kiel disĉiploj de Teokrito.

De malproksime ni povis klare distingi, ĉe la arĝenta helo verŝiĝanta de majesta volbo, kelke da malnovaj kamaradoj, kiel Hieronimo, kapkline enpensiĝa; kiel Agenor Peñalva, kiun Pastro Anselmo kaj Olivier de Guzman konvertis, post tridekokjara pacienca penado, kaj kies peza, severa mieno kvazaŭ esprimis malkonfidon, angoran, ombran antaŭvidon, nedifineblan timegon.

Sed la grava ceremonio disvolviĝis en sublima simpleco. Nenia signo aŭ trajto de neantaŭviditeco surprizis nian scivolon avidan je la surtera, maledifa sensacio. La Ĉielo volu, ke iam la enkarniĝintaj homoj, respondecaj pri la gravaj problemoj, maltrankviligantaj la homaron, lernu de la Spiritoj tiun simplecon, kiun ni tiam havis la okazon observi, kaj al ĝi inkliniĝu, kiam ili kunvenos por festi aŭ decidi! Temis tamen pri gravega kunsido, en kiu oni decidos pri la destino de centoj da kreeitoj, kiuj nepre devos forlasi la vojon de eraroj por rekte direktiĝi al Dio!

Efektive, Teokrito ekstaris, lasante elradii el sia delikattrajta, preskaŭ diafana vizaĝo, amoplenan rideton al siaj zorgatoj, kvazaŭ tre fratan saluton, kaj post afabla mansigno, li komencis enblovi novajn vivstrebojn en niajn animojn, rejunigajn fortojn por la estonta batalado, kiun li baldaŭ antaŭvidigos al ni:

"– Ni vin salutas, plej amataj disĉiploj! karaj fratoj en Jesuo-Kristo! Kaj en Lia altega nomo ni al vi deziresprimas la gloran konkeron de la Paco!"

La voĉo de la eminenta direktoro aŭ la vibroj de lia nobla, al ni bonfara penso, kiun ni komprenis kvazaŭ lian voĉon mem, atingis nin dolĉe kaj flustre, preskaŭ sekrete. Sed la multenombra ĉeestantaro lin klare aŭdis sen perdo de eĉ unu sola vortero. Hispanoj poste asertis, ke en tiu nokto la oratoro parolis en ilia patra lingvo kaj eĉ uzis esprimojn kutimajn en iliaj hejmoj, de ili konatajn ekde la infanaĝo, kio ilin forte emociis. Sed ni, la portugaloj, malkonsentis, ĉar kion ni aŭdis, tio estis la bona, klasika portugala lingvo de Coimbra; dum la ĉeestantaj brazilanoj

asertis, ke ili aŭdis mildan, dolĉan parolmanieron de sia lando, kun ties propraj akĉento kaj prononco, kiu tiom malplaĉas en Portugalujo[1]...

Kaj sincera raviĝo plenigis la tutan ĉeestantaron per mildigaj emocioj...

Dume li daŭrigis:

"– Al vi ne fremdas, miaj amikoj, la motivo de ĉi tiu kunsido. Ĉi tie skiziĝas via estonteco, la vin atendanta destino estos aranĝita laŭ plano, kiun vi devos ne nur koni sed antaŭ ĉio prepari kaj aprobi!

Depost la tago, kiam la pordoj de ĉi tiu Korekta Kolonio, laŭ ordonoj de la supro, malfermiĝis, por ke ni vin akceptu kaj gastigu, vi vivas inter la alternativoj de iu hospitalo-prizono. Sed ja viaprofite ni tiel agis, por ke viaj malfeliĉoj ne estu pli fundaj, ne pli akraj fariĝu viaj kompromitiĝoj pro mispaŝoj sur la vojo de pereigaj malprudentaĵoj, kiuj vin fatale trenus en jarcentojn da gravegaj kulpoj, se ne estus la kompatoplena interveno de la Senmakula Paŝtisto, kiu ekiris por vin serĉi, sopirante revenigi vin al Sia ŝafejo. Kaj hodiaŭ mi venas al vi por komuniki, ke tiuj samaj pordoj, kiuj fermiĝis post vi, vin malliberigante pro imperativoj de severa protektado kaj gardado, nun malfermiĝas, redonante al vi la liberecon! Vi estas liberaj, miaj fratoj, je la zorgado de la Hospitala Departemento! Ĉio, kion ĉi tiuj hospitaloj kaj malliberejoj devis provi por vin helpi en la kriza situacio, en kiun vi implikiĝis, estas farita! De nun novaj provoj trudiĝas al vi dum via irado, novaj laboroj kaj vivkondiĉoj postulas de vi klopodojn kaj strebojn, pri kiuj ni sincere deziras, ke vi ilin disvolvu sen malfervoro nek timo... ĉar vi jam bone komprenis, ke neniam! neniam vi mortos! neniam vi povos malaperi de antaŭ vi mem, aŭ de antaŭ la Kreaĵaro aŭ de la Universo! Kaj tiel okazas, ĉar vi emanis el la Eterna Fluidaĵo de la Dia Menso,

[1] Eĉ inter la elkarniĝintoj, nur tre progresintaj Spritoj povas produkti tielan telepatian fenomenon.

en vi pulsas la Eterna Vivo de Tiu, Kiu al vi donis la gloron, ke Li vin kreis similaj al Li, kio signifas, ke vi estos tiaj, kia Li estas: vivantaj tra la tuta Eterna Tempo!

Konsciu, ke, havante la Eternan Vivon, vi estas vokitaj al glora celo en la sino de la Eterna Patrujo, kie la Superega Sinjoro de la Universo tenas la brilon de Sia Gloro!

Kial do kalcitri kontraŭ via dia origino?! Kial malaltiĝi ĉe obstinega malobeo al la neŝanĝeblaj leĝoj de la kreado, se ĝuste ĉe ties observado la homo trovos ne nur la verajn motivojn por senti sin honorigita, sed ankaŭ la feliĉon, por kies posedo li tiom klopodas kaj revas, kaj la ĝojon, la pacon, la senmortan gloron?!... Por kio utilis via memmortigo?... Nur por evidentigi al vi mem la gradon de via nescieco, de via malsupereco, dum vi pretendis posedi vastan sciadon kaj sciencon; nur por etendi viajn ĉagrenojn ĝis amplekso netaksebla por via penso, kiam al vi estus pli milda, ĉar ja merita, la submetiĝo al la ordonoj de la leĝo, kiu permesas la ĉiutagajn ĉagrenojn kiel instigon al la Spirito, ke li progresu kaj disvolvu tiujn sublimajn fakultojn, kiujn li latente posedas.

Tiu amara leciono, miaj amikoj, servu al vi kiel sperto! La larmoj verŝitaj de viaj animoj, nekonsoleblaj ĉe tiu realaĵo, kiun vi mem daŭre travivas, neforviŝeble stampiĝu en viaj konsciencoj kiel edifa averto por la venontaj tagoj, kiam vi, refarante spertojn, en kiuj vi fiaskis, efektivigos viajn sublimajn provojn por rehonorindiĝi!

Parolante al vi pri la libereco, kiu al vi estas laŭleĝe donita, ni aludas la rajton, kiun vi havas memstare zorgi pri viaj interesoj, tio estas, direkti proprainiciate la vin atendantan destinon! Jes! Vi estas liberaj por elekti tion, kio viaopinie plej konvenas al vi! Dum via restado ĉi tie, vi ricevis taŭgajn instruojn, kiuj al vi ebligas kriterian elekton:

Ĉu vi volas tuj reveni al la Tero por surmeti novan karnan veston, vi, kies prudento, konvene instruita, rigardas la reenkarniĝan kuracadon imperativa, nepre necesa, ja la sola

kiu vin kondukos al la definitiva resaniĝo el tiuj kompleksoj, kiuj vin tenas dronintaj en marĉoj de senrimedaj ĉagrenoj?...

Vi ĝuas liberecon por tiel agi, ĉar por tio vi ja estas preparitaj!

Ĉu vi preferas resti kaj dum kelka tempo kun ni kunlabori, prokrastante la tempon de la neevitebla reveno al la terglobo, ĉu por lerni servadi kiel ano de nia milicio, ĉu por disvolvi amokapablojn ĉe la lernado de frata katekizado al obsedantaj legioj, kiuj turmentas la Teron kaj la malsuperan Nevideblan Mondon, aŭ ĉe komplezema servado en niaj hospitaloj, vin dediĉante al flegado, nome al karitata bonfarado, frata konsolado, viglado, ktp?...

Vi ja rajtas ĉi tion elekti!

Nia kampo de agado estas intensa kaj tre vasta, kaj en la vicoj de nia institucio estos bonvena la volontulo, kiu amante la Sinjoron, respektante Liajn leĝojn, strebante al laborado kaj servado, kaj, se ankoraŭ nesperta, submetiĝante al niaj principoj kaj al nia direktado, deziras kunlabori por la gloro de Bono kaj Justeco!

Observu Joelon, kiun vi tiom multe amas: ĉi tien li eniris en samaj kondiĉoj, kiel vi. La amo de Jesuo transformis lin en pacaman ŝafidon. Kaj malgraŭ la granda amplekso de tio, kion li devos travivi sur la Tero, kiel sekvon de sia malfeliĉa ago dum la migrado, en kiu li devus triumfi, tamen kiom da amo li kapablas doni al siaj suferantaj fratoj, kiom da noblaj, meritplenaj bonfaroj li disdonas al tiuj, kiujn oni konfidis al lia gardado!...

Ĉu vi deziras resti ĉi tie, nenion provante por via propra bono, vagante de unu Departemento al alia, observante faktojn, fermitaj en senelira rondo de neproduktiva rigardado, aŭ vivi inter la malsupera Nevidebla Mondo kaj la Tero, riskante danĝerajn tentojn, senokupaj kaj senutilaj, kiel astralaj almozuloj, ne entreprenante ion ajn meritan, kvankam nekapablaj fari malbonon, ĉar malbonaj vi ja ne estas?...

Tion ni ankaŭ ne oponos, kvakam ni, per ĉiuj fortoj de niaj animoj kaj la tuta sincera deziro de niaj koroj, al vi konsilas,

ke vi tiel ne agu, ĉar tio rezultigus tre gravan difekton al via situacio, nenecesajn afliktojn, kiuj, kreskante ĝis neelportebla intenseco, superŝarĝus vin per amaraj malbonoj, per necertecoj kaj respondecoj, kiujn al vi tre konvenus eviti!...

Aŭ, alie, ĉu vi deziras plilongigi vian restadon inter ni, celante iniciĝi en la superan sciencon pri la Vivo, vizitante preparajn kursojn pri la Vera Inicado, kiun al vi eblos akiri nur post la kulpelaĉetoj, al kiuj vi vin devontigis antaŭ via Konscienco?

Estu bonvenaj, amikoj! Kaj lernu de la Majstro super la majstroj la bazan instruadon, kiu mankas al vi! Akceptu, en Lia Nomo, la elementojn, kiuj vin fortigos, por ke vi plenumu la idealojn de Amo, Justeco kaj Vero!

Multaj el vi, ĉeestantaj ĉi tiun kunvenon, kapabliĝis por tiu prepara kurso. Sed por aliaj la horo ankoraŭ ne venis. Iliaj konsciencoj flustre montros al ili la irotan vojon, tiel evitigante al ni la ĝenon eldiri iliajn nomojn. Sed neniu estos devigita akcepti la ĵus faritan inviton, eĉ ne tiuj, kiuj kapabliĝis. Ili akceptos se ili volos, libere kaj spontane...”

Diskreta murmuro trakuris la ĉeestantaron. Ĝi esprimis nian admiron al la karitata subtileco de la aplikita procedo, kiu ne permesis al iu ajn el nia falango sin opinii posedanta ian ajn superecon, ĉar ni ja ne povis reciproke taksi la admonojn de niaj konsciencoj. Tiu procedo ankaŭ forigis la supozon pri ia prefero flanke de la mentoroj. Post paŭzo, Teokrito daŭrigis:

“– Al vi estos donita limtempo de tridek tagoj, por ke vi meditu kaj decidu pri tio kion vi ĵus aŭdis; ĉar, kvankam vi de longe ricevis detalajn klarigojn kaj instruadon por mem preni la decidon, kiu al vi konvenas, tamen la toleremo ordonas, ke ni vin antaŭgardu, donante al vi ankoraŭ kelkan tempon por meditado pri la estontaj provoj.

Dum tiu tempo vi rajtos ĉiutagan akcepton en la sidejon de la Departemento, en la okazo se vi deziros informojn, pliajn klarigojn, kiuj aparte koncernos vin... kaj vi povos sen ia ĝeno elverŝi vian koron antaŭ tiu, kiu ĉi tie vin akceptos, ĉar li parolos

en la nomo de la Dia Paŝtisto kaj ankaŭ ĉar li vin konas laŭ ĉiuj viaj apartaĵoj kaj subtilaĵoj de viaj karakteroj, povante legi en via animo kvazaŭ en facila libro! Krom tio, vi estas invititaj al la kunvenoj, kiuj por vi efektiviĝos en tiu sama loko, kaj en kiuj ni pritraktos ĉion, kio ĝenerale povas vin eduki, instrui kaj revigligi por tiu estonteco, al kiu vin pelas viaj personaj altiriĝemoj. Post la fino de tiu limtempo, vi komunikos viajn decidojn al la estraro de la fako, al kiu vi estas ligitaj, kaj ĉi tiu siavice, sub nia kontrolo, prizorgos konduki vin al tiu destino, kiun vi *memvole* elektis!”

Tiel simplan, kiel gravan parolon, sekvis la unua elvolvo pri la devoj, kiuj nin koncernos kiel Spiritojn pentintajn kaj strebantajn al revirtiĝo. Ĝi estis la unua el tiu serio da prelegoj, al kiuj ni estas invititaj. Teokrito mem estis la preleganto. Li parolis patre kaj konsileme, sen pasiaj oratoraj ekzaltiĝoj, sed penetrigante ĝis la kerno de niaj animoj profundajn konsiderojn pri al malsuperaj trajtoj de ĉiu el ni. Oni povus aserti, ke li, profunda konanto de la kompleksoj, en kiuj nia memo implikiĝis, havas la celon helpi, ke ni ilin rekonu, mezuru, detale esploru, por tiel nin kuraĝigi al kontraŭbatalo. Kaj en tiu memorinda nokto ni de tie foriris konsolitaj, fortikigitaj de bonfara espero... Tien ni multfoje revenis por aŭdi lin disvolvi la plej altajn konceptojn, kiujn ni povus kompreni, pri la Vivo, la Leĝoj de la Universo, la plej grandiozaj moralaj rezultoj el la plenumado de Devo, el la observado de Justeco, el la farado de Amo kaj Frateco, el la obeado al Prudento, al Moralo, krom ankaŭ al ĉiuj ceteraj principoj de Bono!

Post la fino de la limtempo difinita de la internaj regularoj, granda movado ŝanĝis la kvietan mienon de la Hospitala Departemento kaj de la Turo. Grupoj da internuloj transiris la neĝkolorajn aleojn de l' parko, akompanataj de siaj mentoroj, direkte al la sidejo de la Departemento, por komuniki al la plej alta aŭtoritato en tiu nobla institucio siajn definitivajn decidojn, faritajn post plej profundaj pensoj kaj analizoj pri sia propra situacio, kun la helpo de la sindonaj konsilistoj kaj edukistoj kaj sub la gvidado de Teokrito mem.

Agenor Peñalva, same kiel pluraj aliaj arestitoj en la Turo, sinmortigintoj-obsedintoj, kiuj iam, ĉu kiel enkarniĝintoj, ĉu poste kiel malsuperaj Spiritoj, semis malordon, larmojn, sennombrajn malfeliĉegojn; krom ankaŭ Hieronimo de Araŭĵo Silvejra, Mario Sobral kaj aliaj, deklaris preferi tujan reenkarniĝon, ĉar tre pezaj estis la ĝenoj de la rimorsoj, la afliktaj perspektivoj de la pasinteco, kiuj obsedis iliajn mensojn per neelteneblaj turmentoj, ilin senpovigante por ĉia ajn alia provo. Ili urĝe bezonis la kulpelaĉeton, por havigi al si ripozon ĉe la provizora forgeso en la klopodoj por sia surtera reedukiĝo. Nur poste, jam pli serenaj, ili pensos pri pli ampleksaj entreprenoj. Multaj aliaj strebis al provtempo en la aktivecoj de la Viglado, kie ili povus ion lerni kaj tiel gajni iom pli da forto, ĉar estante senkuraĝaj kaj hezitemaj, ili ankoraŭ timis la kontakton kun la karno, suspektante la proprajn malfortaĵojn. Kelkatempa partopreno en la heroaj karavanoj, ĉe la taskoj por helpo tiel al la mizeruloj de la Sinistra Valo, kiel ankaŭ al tiuj de la Tero, dum kiuj ili praktikus la bonfaradon, – pli sekure, laŭ sia propra opinio –, preparus ilin kaj al ili montrus pli vastajn horizontojn en la kampo de Frateco! Mi, Belarmino, Johano d' Azevedo krom iuj malmultaj al ni tre afinaj, ĉiuj el la Hospitalo Maria el Nazareto, altirate de la grandiozaj instruoj de la eminenta direktoro de la Departemento, okaze de liaj admirintaj lecionoj, kaj post multe da zorgaj esploroj en nia memo, nin prezentis al li kaj komunikis, ke, se ni meritus la honoran favoron daŭre sekvi la vojon preparan al la Inicado, malgraŭ la malmeritoj, pri kiuj ni scias, ke ili ŝarĝas al ni la konsciencon, ni tion preferus, ĉar logis nin la perspektivo atingi tiun Scion, kiun li antaŭvidis al ni.

"– Estu bonvenaj, amikoj! – jen lia respondo. – En la morgaŭo mem vi povos preni vian novan direkton... Kial plu prokrasti?... Vi tamen ne plu restos sub mia dependeco... Elplenumiĝis la misio, kiun pri vi oni al mi konfidis, ĉar vi devos antaŭeniĝi sub la gvidado de novaj mentoroj... Sed nin ĉiam ligos la dolĉa inklino, kiu naskiĝis en niaj Spiritoj dum la tempo, kiun vi pasigis ĉi tie..."

Ĉar ni estis certaj, ke en la tuj sekvanta tago ni forlasos la Hospitalan Departementon kaj disiĝos de la bonkoraj amikoj, kiuj nin tiom konsolis en nia malfeliĉo, tial profunda malĝojo ombris al ni la korojn. Sed ni ĉiuj sciis, ke restado en hospitalo estas provizora, ordinare mallonga.

Ni ekpaŝis al la adiaŭoj, komencante per la Hospitalo mem, najbara al ni. Joel, brakumante nin kun rideto dum unuminuta paŭzo en la taskoj, kiuj ĉimatene montriĝis multoblaj pro la alveno, post ne multaj horoj, de nova aro da kondamnitoj prenitaj el la Valo, parolis al ni, ankoraŭfoje nin konsolante:

"– Ne pensu, ke vi estos disiĝintaj de ni... Ni nepre intervidiĝos multajn fojojn... Paciencon, miaj amikoj, paciencon..."

Karlo kaj Roberto, kiel ĉiam, pretis nin akompani dum tiuj adiaŭaj vizitoj. Ni revidis kaj brakumis ĉiujn noblajn mentorojn, la amikojn senlacajn en sia sindono, al kiuj ni tiom dankŝuldis pro la amindaj konatecoj, kiujn ni havis la honoron fari ekster nia Departemento, kaj kiuj tradaŭros la tempon, solidiĝante en porĉiamaj inklinoj!

Ni troviĝis en la Departemento pri Reenkarniĝo, akompanataj de la afablaj servantinoj, Fratinoj Rozalio kaj Celestina, kiam tien eniris pluraj kandidatoj al matrikulo en la Azilo. Estis kortuŝe ilin observi, pripensantaj la pereigajn dramojn, kiuj ilin tiel rapide pelas en la severan sed elaĉetan estontecon! Ŝajnis, kvazaŭ ili estus damnitoj forpelitaj el la Paradizo pro manko de altiriĝemo por en ĝi pli longe resti: malgaja elmigro de kondamnitoj al la inferoj pro plej gravaj malobeoj al la Leĝoj de la Sinjoro Ĉioindulga kaj Ĉiokompata!

Ĝi efektive estis ĉio tio! Ĝi estis legio da pentintoj, kiuj, meze de la luktoj en la malkompreniĝoj de la surteraj provoj, purigos la konsciencon makulitan de la peko, baptante ĝin per la elaĉeta fajro de la suferado, kaj sekve ĝin liberigante el la malhonoro!

Duope formante longan vicon, ili supreniris la ŝtuparon de la Departementa sidejo kaj baldaŭ malaperis en ĝian internon... Kaptitoj de abomena pasinteco, katenitaj al la nigreco de siaj mensoj, nekapablaj, pro siaj korŝiraj rimorsoj, por ia ajn provo, antaŭ ol ili travivos kulpelpagan reenkarniĝon, ili iris kun klinitaj kapoj, malgajaj, korpremataj, donante la impreson, ke ili sin submetas al tiu akra puno nur tial, ĉar alian vojon ili ne trovis, kiu al ili rehavigus la spiritan honoron, la internan serenecon, krom tiu providenca rimedo al ili montrata de la korfavora Leĝo: denove fariĝi homoj! Reboniĝi en la surplanedaj luktoj per la rehonorigaj provoj por plenumo de la Devo!

Konsterna timego tremigis al ni la plej sentemajn fibrojn, kiam ni ekvidis la grupon kondukatan de Frato Johano, la direktoro de la Frenezulejo! Nekapablaj rezonadi per si mem, ili sin direktis al la reenkarniĝo pelate de la imperativa bezono de ia pliboniĝo, de ioma progreso; kaj nur la tre malmultaj kulpomildigoj, kiujn ili eble rajtis, same kiel iliaj evidentaj malmeritoj, krom ankaŭ ilia bedaŭrinda vibrostato, povus difini la kondiĉojn de la celata reenkarniĝo. Frato Johano, la bonkora Teokrito, la fakuloj de la Departemento pri Reenkarniĝo, la ĝenerala direkcio de la Kolonio, ĝiaj plej altaj Gvidantoj – ĉiuj saĝe inspirataj de la Justeco kaj Korfavoreco de la Superegaj Leĝoj de la Ĉiopova Kreinto –, estis ĝuste tiuj, kiuj helpis ilin en ilia nekapableco klare distingi por libere elekti sian estontecon, kaj por ili interkonsente difinis tion, kio al ili plej konvenos, tiucele ricevinte la permeson de la Elaĉetanta Majstro-Jesuo!

Ni ne povis reteni niajn larmojn, ekvidante Hieronimon kaj Marion, niajn kompatindajn kamaradojn kaj samsortulojn depost la nigraj malesperoj en la Sinistra Valo. La unua, deprimita, tenis la kapon klinita sur la brusto, kvazaŭ rezignacia kondamnito en la ekstrema momento. Li tiel absorbiĝis en la afliktaj ondoj de siaj pensoj, ke de malproksime li ne vidis nin! Sed la dua montriĝis ridetanta kaj kuraĝa, kun taŭzitaj haroj, same kiel en la unua fojo, kiam ni lin vidis; lia brusto, maltime

levita, kvazaŭ spitis la estontajn luktojn, kaj li rigardis antaŭen, kvazaŭ revemulo, kiu antaŭvidus la honoran apogeon de entrepreno pene komencita inter la oferoj postulataj de la Racio kaj la larmoj verŝitaj de la Koro, ambaŭ flamantaj pro sincera pento, kiun necesos forviŝi! Nin ekvidante, li amike mansignis adiaŭon, kiu ŝajnis la lasta, dum vibro de nepriskribebla hororo premis niajn animojn: la malfeliĉulo signis per du mizeraj brakstumpoj, kie ne plu estis la manoj; ĉi tiuj tamen elstare montriĝis, alfiksitaj al lia kolo, kvazaŭ ili rememorigus la violentan morton pro strangolado, same kiel li faris al la malfeliĉa Eŭlina!

"– Ĉi tiu nepre venkos – profetis Fratino Celestina, enpensiĝa. – Lia baldaŭa surtera migrado estos severa kalvario, kiun nur travivas la kuraĝaj pentantaj animoj! De la lulilo ĝis la tombo li renkontos nur larmojn kaj akrajn dolorojn! Li treniĝos sen esperoj nek konsoloj, mutilita, malsana, humiligita, mokata, perfidita de sia patrino mem, kiu lin forpuŝos ekde la naskiĝo, ĉar sian korpon li ricevos nur en tiuj koruptaj medioj, en kiuj li iam malvirtiĝis... Sed, ho mia Dio, necesas, ke tiel estu! por ke li repacigu kun sia propra konscienco kaj retrovu la harmonion kun la natura progreso, kiel ĉiu kreito sin direktanta al Dio! Tion li tiel bone komprenis, ke li mem skribis la al si konvenan verdikton kaj ĝin transdonis al Frato Teokrito, ke ĉi tiu ĝin sendu al la ĝenerala direkcio por la aprobo de ties Plej Alta Gvidanto, nome de Maria, estrino de la Legio, al kiu ni apartenas... Mario trudis al si, same kiel tiom multe da niaj fratoj vivantaj sur la Tero, akregan kulpelpagon, kiel severan kaj decidan elaĉeton!"

... Kaj ĉe la vesperkrepusko de la sekvanta tago ni forlasis la Hospitalan Departementon...

Modesta veturilo, kiun ni rekonis aparteni al la tipo plej uzata en la interno de la Kolonio, alvenis por nin forkonduki. Silente kaj kortuŝitaj ni prenis niajn lokojn kaj konsolate de la ĉeesto de Romeo kaj Alcesto, kiuj devis nin akompani al nia nova loĝejo, ni rimarkis, ke dum la veturilo milde glitadis, la pejzaĝo koloriĝis per ĉarmaj perlamotaj nuancoj, floroj ekaperis

en polikromia gajo rande de la zorge kulturitaj ŝoseoj... kaj la unuaj domaroj de grandioza hinda urbego montriĝis al niaj surprizaj okuloj, kiuj tiam kredis, ke ili sonĝas!

Dio estu laŭdata! Estis ja vere, ke ni progresis!

# TRIA PARTO
# **LA UNIVERSITATA URBO**

## Ĉapitro I
## **La Loĝejo de la Espero**

La unuan nokton ni pasigis en korprema atendado. Niaj ĉambroj rigardis al la ĝardeno, kaj de la ilin ĉirkaŭantaj pintarkoj ni vidis la vastan horizonton de la urbo inkrustsimile ornamitan per graciaj pavilonoj kvazaŭ el perlamoto, de kies laŭboj, ilin pitoreske garnantaj, eliĝis delikataj parfumoj de miriadoj da arbedoj kaj vivofreŝaj floroj, kiuj ne plu montriĝis enue neĝkoloraj, kiel en la Hospitala Departemento.

Ĉio supozigis, ke ni gravitis, laŭ niaj altiriĝemoj, al ia Universitata Urbo, kie novaj etapoj de studo kaj lernado malfermiĝos por ni, laŭ niaj deziroj.

Dum ni promedadis, antaŭ niaj interesataj okuloj etendiĝis milda kaj alloga pejzaĝo, kie grandiozaj konstruaĵoj, rafine ellaboritaj laŭ ideala stilo, kiu sugestus la modelon de ia civilizacio neniam aperonta en la surteraj regionoj, igis nin pripensi la eblecon, ke nevideblaj nebuloj, irizitaj de same nevideblaj palbriloj, servis kiel inspiro al artistoj por krei tiujn allogajn kupolojn, tiujn esprimoplenajn filigranojn, la pitoreskan ĉarmon de tiuj balkonoj invitantaj la poetan menson al longaj revoj serĉe de la Idealo! Grandegaj avenuoj etendiĝis inter majestaj arbaretoj kaj dolĉe krispiĝantaj lagoj, kies bordojn ornamis bonodoraj, florplenaj tufoj. Kaj en vico, kvazaŭ neforgesebla bildo de ia feinurbo, staris la Akademioj, en kiuj la mizerulo, malŝatinta la

sanktegan provtempon de surtera ekzistado, devos kapabliĝi por la decidaj, nepre necesaj personaj reformoj, kaj tiel, post nova reenkarniĝo, dum kiu li elmontru la akiritajn valorojn ĉe tiu lernado, sin prepari por iam esti akceptita en la veran Inicadon.

Mi ne permesos al mi la provon priskribi la ĉarmon elradiantan el iu kvartalo, kie la kupoloj kaj turoj de la konstruaĵoj ŝajnis filigranoj, kiuj, kvazaŭ roskovritaj, diskrete trembrilis, kaj al kiuj la radioj de la Reĝo-Astro, kune kun vapornebuloj el ravkoloraj gasoj donis nuancojn, kies belecon mi ne povas kompari al io ajn konata!

Sed en ĉio elmontriĝis solena supereco, elspiranta grandiozajn sugestojn neimageblajn por la enkarniĝinta homo.

Malgraŭ tio, ĝi tamen ne estis privilegiita loĝejo! Ĝi situis je nur unu grado super la malgaja hospitala azilo!...

Kortusitaj, ni haltis antaŭ tiuj Lernejoj, kiujn ni devos frekventi. Sur iliaj frontoj elstaris la afiŝoj sciigantaj pri la lernotaj objektoj:

– Moralo, Filozofio, Scienco, Psikologio, Pedagogio, Kosmogonio kaj eĉ ia nova idiomo, kiu ne estus nura plia lingvo, uzota sur la Tero kiel intelekta superfluaĵo de riĉuloj, frivola ornamo de personoj sufiĉe bonhavaj por havigi al si la privelegion lerni ĝin. Tute ne! La idiomo, kies prezento nin tre surprizis, estas la definitiva *Idiomo*, kiu en la estonteco streĉos la rilatojn inter homoj kaj Spiritoj, faciligante ilian interkomunikiĝon, ankaŭ forigante la surterajn barojn kontraŭ la homa interkompreniĝo kaj kontribuante por la kunfratiĝo planata de Jesuo el Nazareto:

“Nur unu lingvo, nur unu flago, nur unu paŝtisto!”

Tiu idiomo, kies manko ĉe la brazilaj mediumoj neebligis al mi dikti verkojn, kiel mi deziris, kio faris al mi pli penigaj la klopodojn por rehonorindiĝi, havis nomon harmoniantan kun la dolĉa konsolo, kiu lumigadas niajn mensojn, kaj similan al tiu de nia urbo: *Espero*. Tie troviĝis, apud la ceteraj, la majesta

konstruaĵo, en kiu oni instruas ĝin kaj la fratajn idealojn por kiuj ĝi estis kreita! Al ni konvenis do ĝia lernado, por ke dum la reenkarniĝo, portante ĝin stampita en la profundaj anguloj de la animo, ni ne neglektu ĝian uzadon sur la Tero.

La bonfara freŝo de la mateno portis al nia flarsenso dolĉegan odoron, pri kiu ni asertus, ke ĝi venas de sangokoloraj diantoj, kiujn al la portugalinoj tiom plaĉas kultivi en siaj bedoj, de delikataj glicineoj ekscititaj de la saniga matenkrepuska roso. Kaj, kvazaŭ kantante en la malproksimo, birdoj fajfis tenerajn melodiojn, tiel kronante la ĉarmon de tiu sceno.

Ni alvenis vespere, kiam la steloj ekbrilis, radiante lumajn karesojn.

Romeo kaj Alcesto prezentis nin al la direkcio de nia nova loĝejo kaj tuj poste adiaŭis, deklarante elplenumita sian mision pri ni. Ne sen profunda emocio ni ĉeestis la foriron de tiuj bonkoregaj junuloj, al kiuj ni tiom multe ŝuldis kaj kiujn ni kortuŝite brakumis. Sed ridetante ili rimarkigis:

"– Ni ne estos apartigitaj. Vi nur ŝanĝis vian ĉambron en la sama hejmo. Ĉu la Senfina Universo mem ne estas la hejmo de la kreitoj de Dio?!..."

Frato Sosteneso estis la estro de la Urbo Espero. Li alparolis nin grave, diskrete, bonkore, sed ni ne kuraĝis rekte rigardi lin:

"– Estu bonvenaj, miaj karaj filoj! Jesuo, la sola Majstro, kiun vi vere trovos ĉi tie, inspiru al vi la konduton dum la nova etapo, kiu hodiaŭ skiziĝas por vi. Konfidu! Lernu! Laboru! – por ke vi povu venki! Ĉi tiu loĝejo apartenas al vi. Vi do nun vivas en hejmo, kiu ja estas via, kaj en kiu vi havos fratojn, filojn de la Eternulo, kiel vi! Maria, kun la aprobo de sia Plejeminenta Filo, ordonis ĝian fondon, ke ĝi havigu al vi honorajn rimedojn pro via nepre necesa revirtiĝo. En ŝia patrina amo vi trovos subliman subtenon por forviŝi la nigrajn erarojn, kiuj vin deklinis de la paŝosignoj de la Granda Majstro, al kiu vi ŝuldas prefere amon kaj obeon! Al vi konvenas do rapidigi vian marŝon, regajni la tempon perditan! Mi esperas, ke vi scios inteligente kompreni viajn proprajn bezonojn..."

Ni nenion respondis. Larmoj malsekigis al ni la palpebrojn. Ŝajnis, kvazaŭ ni estus timemaj knaboj, kiuj la unuan fojon troviĝus solaj kun la maljuna kaj respektinda, ankoraŭ nekomprenata instruisto. Tuj poste oni kondukis nin al la Internulejo, en kiu ni de nun ekloĝos. Tie ni pasigis la nokton kaj matene ni eliris por promeni.

Tie kaj tie, tra la parkoj ornamantaj la urbon, ni renkontis grupojn da lernantoj aŭdantaj siajn majstrojn sub la dolĉega poezieco de branĉoriĉaj arbetaroj, atentaj kaj ravitaj, tiel same kiel iam sur la Tero la disĉiploj de Sokrato aŭ de Plantono, sub la murmurantaj platanoj de Ateno; aŭ kiel la inicitoj de la granda Pitagoro; aŭ kiel la mizeruloj de Galileo kaj Judeo, la suferantoj de Kapernaumo aŭ Genesareto, ravitaj de la neesprimebla magio de la mesia parolo!

Sinjorinoj iradis sur la aleoj, akompanataj de severaj gardistinoj kiel Marie Nimiers, kiun ni poste pli intime konos; aŭ nepenetreblaj kiel Vincenta de Guzman[1], juna religiulino de la malnova Ordeno de Sankta Francisko, fratino de nia iama protektanto, Grafo de Ramiro de Guzman. Ŝin ni ekamis tuj kiam ni eksciis pri la nepereema inklino, kiu ŝin ligas al tiu sindona servanto en la Sekcio pri Rilatoj kun la Tero.

Absorbitaj, ni permesis al nia imago longe flugi, trenata de la sugestoj, lasante, ke en nia menso flagru multoblaj impresoj, kiam jen iu plej delikate tuŝis mian ŝultron, estigante en mia sentivo la mildan emocion de infankareso, kiu min kvazaŭ vekis el longa torporo. Mi turnis min, kaj tiel same agis miaj pli afinkarakteraj kunuloj, kiuj nun reduktiĝis al Johano kaj Belarmino, ĉar la ceteraj eniris kiel internuloj en la Azilon.

[1] Personoj de rakonto aldonita al la raportoj, kiujn la vera aŭtoro de ĉi tiuj paĝoj skribis en la daŭro de dudekjara mediuma verkado, sed kiun la kompilinto decidis ne prezenti en ĉi tiu volumo, rezervante ĝin por nova literatura provo laŭ spiritismaj kriterioj.

Du virinoj staris apud ni kaj nin invitis por honorkunsido, al kiu estis vokita la ne multenombra grupo alveninta en la hieraŭa tago. Ili informis, ke ni estos prezentataj al niaj novaj mentoroj, nome tiuj, kiuj al ni havigos definitivan edukon. Al ili ni estos transdonitaj kiel al veraj Gardantoj, kiuj nin patre prizorgos ĝis finiĝos tiu kurso pri renovigaj spertoj, kiun ni nepre urĝe faru dum venonta surtera enkarniĝo.

La unua el tiuj virinoj, ĝuste tiu min tuŝinta, estis delikata, blonda junulino, kiu aĝis ĉirkaŭ dek kvin jarojn kaj havis nerezisteblan ĉarmon. Sed ŝi portis kuriozan veston, pro kio ni ne povis deteni nin de impertinenta observado: blanka tuniko ĉetalie zonita, blua mantelo surmetita laŭ la antikva greka modo kaj malgranda girlando el rozetoj orname sidanta sur ŝia ebura frunto. Oni kredus, ke temas pri anĝelo, al kiu mankas la flugiloj. En la unua momento mi supozis, ke min kaptas nova formo de halucino, kiu, transportita el la Valo de l' Damnitoj en la Urbon de l' Espero, havus la povon krei la malon de la turpo, nome la agrablon kaj la belon. La junulino havis la poezian, imponan nomon Rita de Kasja de Forĵas' Frazan', deksilaba verso supoziganta, ke dum sia lasta surtera etapo, travivita en la portugala lando, ŝi apartenis al aristokrata familio. Post paso de kelke da tagoj, ne retenante mian deziron ekscii la kialon de ŝiaj kuriozaj vestoj, mi vidis ŝin malĝoje reagi al mia maldiskreteco, kaj jenan klarigon ŝi donis al mi:

"– Oni min tiel entombigis, aŭ pli ĝuste, oni tiel vestis mian karnan korpon, kiam mi ĝin forlasis en la lasta surtera ekzistado. Tiel kara al mia koro estis la reveno en la Nevideblan Mondon, malgraŭ la tragedio, kiun ĝi kaŭzis al estulo de mi tre amata, ke mi retenis en la menso la memoron pri mia lasta surtera tualeto..."

La dua, alta, same blonda, eble demetis sian lastan korpan vestaĵon ne malproksime de la aĝo kvindekjara, ĉar ŝi ankoraŭ konservis la mensajn trajtojn, kiuj pravigis tiujn rimarkojn. Simpatia kaj alloga, ŝi tre ĝentile etendis al mi sian dekstran manon kaj sin prezentis en maniero al ni tre ĉarma:

"– Mi estas certa, ke vi jam aŭdis pri mi... Mi estas Doris Mary Steel da Costa... kaj mi venis de surtera ekzistado, en kiu tre plaĉis al mi esti la patrino de mia kompatinda Joel... via amiko el la Hospitala Departemento."

Ni sentis nin ravitaj kaj ne trovis frazojn sufiĉe esprimivajn por vortigi la emocion, kiu nin tiam posedis. Respektoplene ni kisis la manon, kiu al ni estis tiel demokratie etendita, sed ni ĝin faris sincere, sen tiu afektado, al kiu ni delonge estis kutimintaj...

En la difinita horo, fratinoj gardistinoj komisiitaj pri la internaj servoj, nin enkondukis en la kunsidoĉambron, lokitan en la centra sidejo de tiu alia Departemento.

Nia klaso, kiu konsistis el ĉirkaŭ ducent pekuloj, estis unu el la plej multnombraj tiam loĝantaj en la Urbo, kaj al ĝi apartenis granda grupo da brazilaj virinoj venintaj el diversaj sociaj tavoloj de la Tero, kio nin tre mirigis kaj igis konstati, ke la statistikoj pri sinmortigoj inter virinoj en Brazilo multe superas tiujn en Portugalujo. Tiun gravan kunsidon prezidis Frato Sosteneso, la Estro de tiu urbo.

Ĝin komencinte, li admonis nin al mensa omaĝo al la Kreinto, kion ni faris, kiel al ni nur eble, per intima preĝo, sed penetritaj de sincera respekto. Ĉe lia dekstro troviĝis maljunulo, kies neĝkolora barbo, ĝistalia kaj akute finiĝanta, donis al lia persono tielan respektegindan aspekton, ke ni, emociplene kredis, ke ni troviĝas en la ĉeesto de unu el tiuj patriarkoj, pri kiuj parolas la sanktaj skriboj, aŭ de iu hinda fakiro spertiĝinta pri virtoj kaj sciencoj pere de la plej aŭsteraj disciplinoj. Maldesktre, alia inicito vekis nian atenton per sia klasika, hinda tipo, estigante en nia animo apartan altiriĝemon. Tiel respekteginda kiel la unua, lia persono tamen montriĝis malpli aĝa, prefere respegulante maturecon, kaj la potenco de lia mensa ekvilibro stampiĝis en la viveco de lia vizaĝo, kiun li permesis al ni klare observi. Malpli proksime, iu junulo, preskaŭa adoleskanto, pli forte altiris nian atenton, ĉar li troviĝis ne en la loko rezervita por la adjunktoj sed ja okupis alian majstran

katedron. Kun belega vizaĝo kaj eksteraĵo por tiel diri anĝela, lia hebrea profilo radiis tiel impresan dolĉecon, ke ni inklinis prefere supozi, ke temas pri ia apero, el tiaj abunde menciitaj en la orientaj libroj, se ĉio nin ĉirkaŭanta ne estus la esprimo de nekontestebla realo. Li estis dekstre de Sosteneso, apud la maljunulo.

Ĉe signo de Frato Sosteneso, komenciĝis la kontrolvokado de la pacientoj. Niaj nomoj, enskribitaj en dika matrikullibro, kiun ni subskribis ĉe la alveno, resonis, unu post alia, eldiritaj de la potenca voĉo de iu adjunkto, kiu apud la honortribuno kvazaŭ sekretarioficis en la kunsido. Kaj aŭdinte niajn nomojn, ni timeme respondis kvazaŭ novicaj lernantoj, dum la resonado ilin ripetadis pli transe, en la ĉambroj kaj galerioj, tra la malproksimaj aleoj kaj parkoj de la urbo etendiĝanta inter floroj kaj grandiozaj pavilonoj, por ilin eternigi, kiu scias? –, per eĥado tra la Spaco kaj Tempo Senfinaj!...

Ĉiuj ĉeestis, kaj la direktoro ekstaris por la honorparolado:

"– Nun, miaj karaj amikoj, komenciĝas nova etapo en via ekzistado kiel kulpintaj Spiritoj! El inter tiom da suferantoj, kiuj kun vi venis en ĉi tiun Kolonion, vi estas la solaj atingintaj la nepre necesajn kondiĉojn por la luktoj en la spirita lernado, kiu al vi havigos solidan bazon por la konkero de personaj meritoj en la estontaj tagoj. Vi estos matrikulitaj en niaj lernejoj, ĉar vi jam prezentas la necesan moralan kaj mensan disvolviĝon, dum kiu vi povos definitive ripari la eraron, kiu vin pereigis.

Kiel vi de longe certe komprenis, vi ne estas neabsolvindaj kondamnitoj, al kiuj la Leĝo trudus ekstremajn punojn, vin eterne restigante en via malsupereco, forlasitaj al viaj nunaj nekonsoleblaj afliktoj, kaj tiel vin tenante ekstere de la harmonio nature konforma al ĉiu estaĵo kreita de la Eterna Amo! Tute male, ni nun komunikas al vi, ke vi rajtas multon esperi de la patra boneco de la Ĉiopova Kreinto, ĉar tiu sama Leĝo, kiun Li starigis kaj kiun vi malobeis per via malrespekta ago de malutila

ribelemo, donos al vi ĉiuj la eblon rekomenci la provon interrompitan de la memmortigo, havigante al vi honoran rimedon, kiu al vi certigos la rehonorindiĝon.

Sed vi neniom scias pri la Spirita Vivo, kaj ja estas urĝe, ke vi konatiĝu kun ĝi. Ĝis nun viajn provtempojn transmondajn vi pasigis en malsuperaj regionoj de la Nevideblo, kie vi malmulte profitis el morala vidpunkto pro la bestnatura kiraso, kiu envolvas viajn mensajn vibrojn aparte alforĝitajn al la regno de la sensoj. Alvenis tamen la tempo, antaŭ ĉirkaŭ unu jarcento, ke rigoraj disciplinoj haltigu viajn senĉesajn malprudentaĵojn kaj vin forprenu el la erariga rondo, en kiu vi memvole restis, por lumigi al vi la aŭroron de via elaĉeto kun Jesuo, elaĉeto vin kondukonta al la vera celo, kiun, kiel kreitoj de Dio, vi nepre devas atingi!

Multaj el vi, kvankam estinte sur la mondo kleraj klarmensaj intelektoj, kiuj imponis al la juĝo de la surtera socio, tamen ne konas la plej elementajn spiritajn principojn kaj eĉ kondukis sian indiferentecon ĝis la ekstremo ilin nei kaj kontraŭbatali, kiam vi konstatis, ke ili ornamas la karakteron de la proksimulo. Pro tio vi devas fari ĉe ni iun kurson, kiu celos vian moralan-mensan-spiritan reedukiĝon, ja nepre mankantan al vi, ĉar viaj dispozicioj por tiel nobla entrepreno respondis la malesperajn alvokojn de viaj nunaj suferoj!

Se vi ne estus farintaj tiun aŭdacan senpripensan agon, malobeante neŝanĝeblajn, al vi ankoraŭ nekonatajn leĝojn, vi certe hodiaŭ ĝuus la gloron de grandioza venko, la rekompencon pro la plenumado de la Devo, la kapablecon por novaj lernokursoj. Sed la memmortigo, kiu al vi ne donis la morton, ĉar la morto ja estas fikciaĵo en ĉi tiu Universo viva kaj regata de eternaj leĝoj starigitaj de la saĝeco de la Eterna Kreanto; kiu havigis al vi nek ripozon, nek forgeson, nek neniiĝon, ĉar ĝi atingis sole nur la fizikan-surteran korpon, neniel tiun spiritan, kie sidas via vera, eterna personeco; la memmortigo, kiel ni diras, forprenis de vi la tutan meriton, kiun vi eble havis, vin ĵetante en malfeliĉegan situacion, el kiu ne povos eliri antaŭ

ol vi efektivigos definitivajn riparojn. Kaj mi avertas vin, miaj amikoj, ke ĉe viaj klopodoj por atingi la deziratan celon pli ol unu jarcento pasos super la larmoj, kiujn vi verŝos pro la sekvoj de via abomeneginda ago de malrespekto al vi mem kaj al Dio!

Sed la instruoj, kiujn ni donos al vi, multe kontribuos por via venko super vi mem. Vi tamen ne eliros el ĉi tie, por alflugi pli feliĉajn sferojn, ne antaŭe ricevinte de nia Instituto, aŭ de viaj Konsciencoj, la atestojn pri reboniĝo, kiuj al vi permesos translokiĝi en la normalajn spiritajn loĝejojn laŭ la gradaj ŝtupoj de la evoluo. Kaj tiaj atestoj, miaj amikoj, estos donitaj al vi nur post tiu reenkarniĝo, en kiun vi baldaŭ dronos, nur post kiam finiĝos la kurso, kiu ĉimomente komenciĝas...”

Sekvis mallonga paŭzo, kiu al ni donis la impreson, ke novaj dispozicioj ekvibrigas la fibrojn de niaj animoj. Sin turninte al la tri apudsidantaj kunuloj, la oratoro daŭrigis, eble pli forte kaptante nian atenton:

“– Jen viaj edukontoj. Ili estas kvazaŭ gardanĝeloj, kiuj kliniĝos super vi kaj viaj destinoj, subtenante vin dum via dornoplena irado! Ekde nun, ili vin akompanos dum ĉiuj tagoj de via vivo, kaj konsideros elplenumita sian mision ĉe vi nur tiam, kiam vi, jam gloritaj pro la observado de la Leĝo, kiun vi iam malobeis, ankoraŭfoje revenos el la Tero en ĉi tiun azilon, por ricevi ian kvazaŭan pasporton al alia spirita regiono kaj tiel repreni la normalan evoluan iradon, interrompitan de la memmortigo.

La titoloj de tiuj majstroj, al kiuj vi nun estas transdonitaj en la nomo de la Ĉiela Paŝtisto, radikas per virtoj kaj meritoj en tre malproksima pasinteco kaj multfoje elmontriĝis en sanktigaj atestoj.

Jen, dekstre de mi, Epaminondo el Vigo, kiu en brila ascendo, ekde la antikva Egiptujo ĝis la ombraj tagoj de la Mezepoko, en Hispanujo, servadas al la Vero kaj gloradas Dion, kaj kies triumfoj daŭre sin sekvas ĝis hodiaŭ en la Spirita Mondo.

En la apostolaj tempoj, kiam, kiel disĉiplo de Simono Petro, li gloris la Dian Majstron, Epaminondo havis la superegan honoron suferi la martiran morton de la cirko de Domicio Nerono. En Hispanio, sub la malluma regado de la leĝoj truditaj de la Sankta Ofico, li brilis kvazaŭ savanta stelo, montrante sublimajn vojojn tiel al malfeliĉuloj kaj persekutatoj, kiel ankaŭ al multaj koroj strebantaj al la dia idealo, kies paŝojn li lumigis per la torĉo de sciencoj nobligitaj de amo kaj de la respekto al la Evangelio de la Senpeka Ŝafido, sciencoj, kiujn antaŭ tre longe li iris rikolti, dum piaj pilgrimoj, en la sanktaj arkanoj de la antikva, saĝa Hindujo, kiu sur la Tero restas kiel la gardantino de senmortaj veroj! Sed ĝuste tial, ke li brilis meze de la mallumoj, oni lin denove oferis, tamen ne plu ĵetante lian kadukan korpon al la malsategaj sovaĝbestoj sed lin bruligante en publika ŝtiparumo, kie li ankoraŭfoje pruvis sian nepereeman sindonon al la Sinjoro Jesuo el Nazareto!

Jen, maldekstre, Souria-Omar, iama majstro de la antikva inicado en Aleksandrio, filozofo en Grekujo tuj post la alveno de Sokrato, kiam senmortaj lumoj ekbrilis por la popoloj, ĝis tiam tenataj for de la altspiritaj scioj, kiujn oni konservis en sekreto por ekskluziva posedo kaj uzo de saĝuloj kaj kleruloj. Same kiel tiu eminenta antaŭulo de la Granda Majstro, Souria-Omar instruis la Sekretan Doktrinon al disĉiploj apartenantaj al la plej modestaj sociaj tavoloj, al senhavuloj kaj malfeliĉuloj; kaj sub la bonfara ombro de frondoriĉaj kverkoj, aŭ sub la poezia dolĉeco de la platanoj, li sorbigis al ili instruojn plenajn de la dia grandiozo, ilin ravante per la feliĉo pense altiĝi al la Eterna Dio, Kreinto de Ĉiuj Ekzistaĵoj, al tiu Dio nekonata, kies figuro ne viciĝis en la kolekto de la ŝtonaj altaroj de la antikva Helaso... Poste, jen li reenkarniĝinta en Judujo mem, altirata de la senkompara figuro de la Majstro super la majstroj, penadante, per faroj humilaj, obskuraj, sed grandanimaj kaj puraj, sekvi la lumajn piedsignojn de la Ĉiela Paŝtisto! Jam grandaĝa, li renkontis, tuj post la ŝtonumado de Stefano, la kruelajn

persekutadojn en Jerusalemo. Stoika, fortikigita de nerompebla fido, li suferis longan martirecon en la sinistra fundo de malnova karcero; ĉar oni lin rigardis kiel multescian viron kaj, pro tio, danĝeran, nocan al la fariseaj interesoj, oni lin torture blindigis; oni lin martirigis per bategado kaj doloregaj mutiloj, ĝis li pereis malŝatata de la socio, nerekonebla por sia propra familio, sed glorata de la Altega Majstro, pro kies amo li ĉion eltenis humile, amoplene kaj danke. Same kiel Epaminondo, Souria-Omar turnis sian menson, jam de multe da jarcentoj, al la altaj esprimoj de la Spirita Vivo, lia animo fervore baptiĝis en la sankta fajrejo de la Dia Scienco kaj de la amo al Dio! Hodiaŭ li aktivas en tiu regiono de afliktoj, en kiu ni troviĝas, materiiĝinta ĝis tia grado, ke vi lin vidas sub la aspekto de lia lasta korpa formo, tamen ne pro tio, ke al li mankus lumoj kaj meritoj por alflugi aliajn regionojn harmoniajn kun lia progreso, sed ja ĉar, estante fidelaj al la principoj de la kristana inicado, kiujn ili observas super ĉiuj ajn aliaj reguloj, ambaŭ preferas protekti per siaj prizorgado kaj amo tiujn pli malfeliĉajn kaj senkuraĝajn, ilin abnegacie kondukante al la elaĉeto, inspirataj de la ekzemplo de tiu Ĉiela Princo, kiu forlasis sian regnon el gloroj por sin dediĉi, per konstanta sinoferado, al la bono de siaj surteraj ŝafoj...

... Kaj jen Hanibalo, miaj karaj filoj! Junulo, kiu persone konis Jesuon el Nazareto dum ties neforgeseblaj predikoj tra la suferanta Judujo! Hanibalo de Silas, unu el tiuj infanoj de la grupo, kiun Jesuo karesis, kiam elmontrante la karakterizan teneron, per kiu li denove envolvis la ankoraŭ ŝanceliĝemajn ŝafojn, li ekkriis:

*“Lasu la infanojn veni al mi, ĉar el tiaj estas la regno de Dio...”*

Hanibalo, kiu instruos al vi la kristanajn lecionojn tiel same, kiel li aŭdis ilin de la Rabeno mem, kiun li amas kun la raviteco de fervora, entuziasma idealisto, ekde tiu sia fora infaneco travivita en la Oriento!

Li asertas, ke dum la Sinjoro predikadis sian belegan Doktrinon de Amo, klarigaj bildoj, mirinde precizaj kaj neesprimeble ĉarmaj, subite ekaperis antaŭ la vidado de la bonvolema aŭskultanto, ĉion nekonfuzeble komprenigante, ĉar ili stampis en la plej kaŝaj anguloj de lia memo la ekzemplon, kiun li neniam forgesos! Ke ĝuste pro tio la granda Sendito povis, per sia parolo, tenadi malsategantajn amasojn en neŝanĝebla kvieto, dum longaj horoj, superregi ribelemajn hordojn, ravi aŭskultantojn, konvinki la korojn, kiuj, aŭ adorkliniĝis ĉe lia pasado, timantaj kaj konfuzitaj, aŭ por ĉiam kaptiĝis de Lia Doktrino, ravitaj kaj fidelaj. Sed la malpiuloj, kies malvirtaj mensoj malagordis al la diaj vibroj, nenion perceptis, nur aŭdis rakontojn, kies sublimo restis por ili ne atingebla, ĉar iliaj animoj estis tute infektitaj de la pereiga viruso de la malbonvolo! Unu el tiuj bildoj, certe la plej bela el ĉiuj, kiujn la Amata Majstro kreis por instrui siajn perditajn ŝafojn, ĉar ĝi prezentis Lin mem en Lia gloro de Ununaskito de la Plej Alta, estis sufiĉa, por ke Saŭlo el Tarso transformiĝu en fervoran subtenanton de la Elaĉeta Doktrino, per kiu Li honoris la mondon!

Hanibalo kreskis, viriĝis, ĉiam sentante sin envolvita en la nepereemaj radioj de la Dia Paŝtisto, kiuj ja neniam forviŝiĝis el lia memoro. Li laboris pro Lia Idealo, ripetis ĉi tie kaj aliloke, kion li aŭdis de la Sinjoro aŭ de liaj Apostoloj, sed li preferis instrui la infanojn kaj la junulojn, rememorante la nesuperebla dolĉecon, kun kiu Jesuo alparoladis la infanaron. Li vojaĝis kaj suferis persekutojn, insultojn, humiligojn, maljustaĵojn, ĉar cetere estis socie bonguste kritiki la adeptojn de la Nazaretano, ilin ofendi, persekuti, mortigi! Kaj veninte en Romon, Hanibalo estis glorita per la martireco pro amo al la Ĉiela Sendito: lia karna korpo estis bruligita sur unu el tiuj fostoj por festa iluminado uzitaj en la fama ornamaranĝo de la Neronaj ĝardenoj, kiam li aĝis tridek sep jarojn! Sed ĉe la torturo de la rezina fajro, eble la plej kruela, kaj la konsterno pro la kaptiĝo en la sublima atesto, li, kiu sin opiniis senvalora, neinda je tiel alta honoro, ankoraŭfoje

revidis la bordojn de la belega Tiberiada aŭ Genesareta Lago, la simplajn kaj pitoreskajn vilaĝojn de Galileo, kaj tie Jesuon dolĉe predikanta la ĉielan Bonan-Novaĵon per tiuj rave belaj bildoj, kiuj ĉe la ekstrema horo montriĝis ankoraŭ pli belaj kaj fascinaj antaŭ la animo de humila kaj fervora adepto. Dume Lia voĉo dolĉe ripetadis, kvazaŭ lastŝmira kiso, kiu benus lian animon, destinante por li la gloron de Senmorteco:

*"Venu al mi, benataj de Mia Patro, stariĝu dekstre de mi..."*

Sincera amanto de la Bona Novaĵo de la Senpeka Ŝafido, li al vi instruos tiun Bonan Novaĵon, ĉar por li vi estas kiel infanoj nenion sciantaj pri ĝi... Kaj tion li faros same kiel li ĝin lernis de la Neforgesebla Majstro: – per klarigaj bildoj, kiuj al vi kiel eble plej fidele prezentu la ĉarmon, kiu lin por ĉiam entuziasmigis kaj alligis al Jesuo.

Por specialiĝi pri tiel sublima rimedo de mensa konversacio, al la sindona Hanibalo estis necesaj sinsekvaj ekzistadoj de rezignacioj, laboroj, sinoferoj, multoblaj kaj dolorplenaj spertoj sur la vojo de la progreso, ĉar nur tiel li povus disvolvi en siaj fakultoj tiel altvaloran kapablon. Sed li sukcesis, ĉar en lia koro neniam mankis la strebon al la venko, li neniam forgesis al glorajn tagojn de la mesiaj predikoj, la momenton, porĉiaman en sia Spirito, kiam li sentis, ke la Ĉiela Kuriero metas sian dekstran manon sur lian malfortikan, infanan kapon, kaj eldiras la neforgeseblan inviton:

*"Lasu la infanojn veni al mi..."*

Efektive, Hanibalo estis tiucele preparata ekde tre malproksimaj tempoj!

Li vivis en la tempo de Elija, honorante la nomon de la vera Dio! Poste li iniciĝis pri la grandiozaj misteroj de la Sciencoj, laŭ la antikva egipta skolo. La respekto kaj la sindono al la Vera Dio kaj la nerompebla espero pri la alveno de la elaĉetonta Dia Mesio de tiam iluminis lian menson per la lumo de neniam paliĝontaj virtoj!

Malgraŭ tio, li, senlaca laboranto, post la martirigo en Romo ankoraŭ renaskiĝis sur la planeda krusto. Sorĉe regis lin potenca, neretenebla deziro sekvi la Majstron, respondi al Liaj diaj alvokoj. Tial li spertis novajn persekutojn en la tempo de Hadriano kaj ĝojegis pro la venko de Konstanteno!

De tiam li aparte sin dediĉis al protekto kaj edukado de infanoj kaj junuloj kiel katolika pastro en la Mezepoko, li pli ol unu fojon fariĝis gardanĝelo por infanoj forlasitaj, forgesitaj de la despoteco de tiamaj nobeloj, farante el ili virojn utilajn kaj valorajn por la socio, virinojn honestajn, inklinajn al la kulto de la Devo kaj de la Familio! Kaj Hanibalo tiele zorgis pri la infanaro kaj junularo, tiel intense fiksis siajn mensajn energiojn sur tiuj ĉarmaj, mildaj vizaĝetoj, ke lia menso stampis sur lian vizaĝon ĉiaman aspekton de ĝentila adoleskanto, tiel ke, kiel vi vidas, li ŝajnas ankoraŭ esti tiu knabo, kiun la Nazareta Majstro karesis en Judujo, antaŭ preskaŭ du mil jaroj!...

... Sed unu tagon, gloran por lia Spirito de amoplena kaj fidela servanto, rekta ordono venis de la altaj, lumaj sferoj, kiel favorkora rekompenco konsentita pro lia multjarcenta abnegacio kaj amo:

"– Iru, Hanibalo... servigu viajn talentojn al la Legio de Mia Patrino! Helpu per Miaj instruoj, kiujn vi tiel amas, tiujn, kiuj, sub via prizorgado, sin montras pli bezonantaj lumon kaj forton... Prefere celu tiujn, kies mensoj svenis ĉe la punsuferoj de la memmortigo... Ilin mi delonge konfidis al la gvidado de Mia Patrino, ĉar nur la patrina sento estos sufiĉe karitata por ilin altigi al Dio! Al ili instruu Mian Parolon! Veku ilin, rememorigante al ili la ekzemplojn, kiujn mi postlasis! Per Miaj instruoj, lernigu al ili kiel ami, servi, regi la pasiojn, ĉi tiujn bridi per la forto de la Scio; kiel trovi la elaĉetan vojon ĉe la plenumado de la Devo, kiun mi difinis por la homaro; kiel pacience suferi, ĉar sufero estas preludo de gloro, potenca helpilo de l' progreso... Malfermu por ili la libron de viaj rememoroj! Elvoku la tempon, kiam vi aŭdis mian parolon en Judujo... kaj lumigu ilin per la heloj de Mia Evangelio, ĉar al ili nur tio mankas!...

Tia li do estas, miaj karaj filoj, modesta, malgranda kiel adoleskanto, sed brulanta per la senmorta flamo de la inspiro, per kiu lin gvidas la nevelkema boneco de la Plej Alta Majstro... Al li mi konfidas vin!"

Intensa emocio regis niajn animojn, elvokante el la profundo de nia esto efektivan senton de admiro al tiuj tri figuroj, kiujn oni prezentis al ni kaj kiuj tiel streĉe ligiĝos al niaj destinoj dum tempo, kiun ni tute ne povus antaŭkalkuli. Sed al ni ankaŭ estis apartamaniere prezentita la distingiĝa figuro de la Nazareta Majstro. Efektive, Li ĝis nun montriĝis al nia penso pli kiel ideala sublimo, nekomprenebla por la homa menso, ol kiel reala persono, kiun la ceteraj kreitoj povus kompreni kaj imiti. Tiuj tri majstroj tamen estis Liaj samtempuloj. Ili konis Lin, aŭdis Lin paroli. Ili eĉ konversaciis kun Li, ĉar ja rimarkindas, ke tiu Dia Majstro neniam rifuzis interparoli kun iu ajn, kiu Lin serĉus! Unu el tiuj majstroj spertis sur la kapo la dolĉan karesadon de lia mano. Kaj tiele konata, tiele vidata, tiele amata, Jesuo-Kristo altiri al Si nian atenton.

Multaj el la ĉeestantaj internuloj mallevis sian frunton. Aliaj lasis flui silentajn diskretajn larmojn, kiuj rososimile elverŝiĝis sur liajn animojn, kvazaŭ agrabla, fervora bapto! Post plua, nelonga silento, Sosteneso daŭrigis, kiel zorga orientisto:

"– Tempoperdo ja neniel praviĝas, ĉar la malŝparo de kelkaj minutoj en la benata laboro de l' progreso povus rezultigi en la estonteco malfacile ripareblajn malbonaĵojn. Tial ni ankoraŭ hodiaŭ faros iajn aranĝojn utilajn al vi. Vi denove estos dividitaj en homogenajn, dekopajn grupojn, kaj, kiel en la Hospitalo, viroj restos apartigitaj disde vivinoj. Nur okaze de la lecionoj aŭ en la tagoj difinitaj por la distraj kunvenoj, vi povos intervidiĝi kaj interŝanĝi ideojn. Tiel estos, ĉar vi ankoraŭ lasas vin regi de ĉagrenaj, materiaj forlogiĝoj, de perturbaj, mensaj ekscitiĝoj, kiujn konvenas superregi. Viaj pensoj devos kutimiĝi al higiena disciplino por kiel eble plej frue konformiĝi al la noblaj manifestiĝoj de la Spirito, al streboj, kies celo harmoniu kun la leĝo de Dio!

Kun ni vi ekzercos vin por altigi vian menson al la Senfino, sed por tion atingi nepre necesos, ke vi liberiĝu de malsuperaj impulsoj. La pensado pri sekso estas unu el la plej ĝenaj baroj kontraŭ la mensaj konkeroj! La seksaj inklinoj premas la volon, tumultigas la energiojn de la animo, paralizas ties fakultojn, trenante ĝin en pezan, malsuperan vibradon, kiu malplifruigas ĝian eniron en la veran spiritan staton. Pro tio, tiel longe ĝis vi atingos sufiĉan progreson, estos saĝe trudi al vi tiun apartigon, ja bonan konsiliston, kiu igos vin forgesi, ke vi antaŭ nelonge estis viroj kaj virinoj. Ni ankaŭ admonas vin al tio, ke nun vi devas strebi al la spirita amo en viaj rilatoj, al la frata, nepereema sento, dia inklino esence konforma al la spiritaj impulsoj. Malgraŭ tio, estuloj, kiuj jam edukiĝis por la noblaj inklinoj de la animo, kaj kiuj sur la Tero vivis en inaj korpoj, estas komisiitaj gvidi vin, plenumante taskon samtempe edukan kaj familian. Elektitaj el inter nia gardistina skipo, ili rolos kvazaŭ guvernistinoj, kiuj vin helpos por via efektiva adaptiĝo al la spirita medio, kiun vi vere ne konas, ĉar ĝis nun viaj transmondaj spertoj fariĝis nur en la malsuperaj regionoj de la Nevidebla Mondo, kio ja ne estas la sama afero... Ili aŭskultos viajn konfidencojn, vin konsolos per siaj konsiloj kaj spertoj, kiam laceco kaj eblaj resopiroj minacos vian kuraĝecon; ili atentos viajn petojn, ilin transsendos al la estraro de ĉi tiu Urbo, tiamaniere tenante ĉirkaŭ viaj koroj la dolĉajn, sanktegajn sentojn pri Familio, kaj evitante, ke vi, post longa apartiĝo, ilin forgesu, ĉar tiajn sentojn, kiaj ili manifestiĝas sur la Tero, vi nepre bezonos tial, ke sur ties scenejoj vi ofte reenkarniĝos por refondi hejmojn, kiujn vi ne ĉiam kapablis respekti, kaj por praktiki instruojn, kiujn en la spirita mondo vi lernos de viaj majstroj, komisiitoj de Jesuo. Ĉe vi ili plenumos la rolon tiel de patrinoj, per sia ama prizorgo, kiel ankaŭ de fratinoj, per siaj interesiĝo kaj sindono!

Kiel vi vidas, la tutan helpon, kiun la Leĝo permesas en via bedaŭrinda situacio, havigos al vi la nobla direkcio de tiu vin gastiganta Korekta Kolonio, kies statuto, bazita sur la Altega

Doktrino de Amo kaj Frateco, havas kiel celon eduki por altigi kaj elaĉeti!

Antaŭen do, karaj amikoj kaj fratoj! kuraĝaj kaj decidemaj, por la batalo, kiu vin liberigos de la gravaj sekvoj de vi mem naskitaj en horo de malfeliĉa, senpripensa inspiro!

.........................................................................................................................

En salono situanta tuj vice al la kunsidĉambro, ni konatiĝis kun la Gardistaj Virinoj, nobla korporacio el legianinoj, kiu sin ekzercis ĉe sublima lernado cele al estontaj virinaj taskoj, plenumotaj sur la Tero, kaj tiun ekzercadon ili faris ĉe ni, siaj suferantaj fratoj, bezonantaj instruadon kaj konsolon. Tie ili atendis siajn protektatojn por la necesa prezentado. Nu, la grupo, kiun detempe de la hospitalo konsistigas mi, Berlarmino de Queiroz e Souza kaj Johano d' Azevedo, kaj al kiu nun riĉige aldoniĝas aliaj afinaj lernantoj, brazilaj kaj portugalaj, ricevis, kiel estontajn “bonajn geniojn”, tiujn sinjorinojn antaŭe nin kondukintajn al la kunsido, el kiu ni ĵus eliris, nome Doris Mary kaj Rita de Kasja. Ravite de la efektivaĵo, ĉar nekontraŭstarebla simpatio al ili jam alligis niajn Spiritojn, ni emociplene konfesis la ĝojon, kiu nin regis, kiam al ambaŭ ni kisis la bonkore etenditan dekstran manon.

Sen perdo de tempo, ni estis kondukitaj al grandioza konstruaĵo, en kiu funkciis la kursoj de Filozofio kaj Moralo, unu el tiuj admirindaj palacoj starantaj sur la belega Akademia Avenuo. Kiam ni eniris la klasĉambron, milda emocio vibrigis la dolorajn fibrojn de nia esto. Tio estis vastega, duoncirkla salono, kies komfortaj benkoj estis samforme aranĝitaj, kaj sur kies fundo luma ekrano kun grandaj dimensioj altiris la atenton de la vizitanto. Ĉe tiu ekrano, en la mezo de la salono, staris la katedro de la profesoro, kiu gvidos la kurson al ni proponatan. Ni rimarkis, ke tiu aparato ne estas fremda al ni. Jam pli ol unu fojon ni ĝin vidis en la hospitalaj fakoj. Sed ĉi tiu ŝajnis perfektigita, kun malpli pezaj linioj kaj malsamaj dimensioj.

Mildaj, blankebluaj kolornuancoj saturis la medion, en kiun ni la unuan fojon penetris, per la impresa ravo de la sanktejoj. Ni neniam antaŭe tiel profunde konsciis la sensignifon de nia personeco, kiel tiam, enirinte tiun neordinaran amfiteatron, kie la detalo, kiu la unua altiris nian atenton, estis la sublima invito de la Sinjoro el Nazareto, skribita super la ekrano per brilegaj literoj:

*"Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos. Metu sur vin mian jugon, kaj lernu ĉe mi, ĉar mi estas milda kaj korhumila; kaj vi trovos ripozon por viaj animoj. Ĉar mia jugo estas facila, kaj mia ŝarĝo estas malpeza."* [1]

Sed jen softa tintado de sonorilo vekis nian atenton. Ekaperis la majstro: – Hanibalo de Silas, al kiu ni estis prezentitaj antaŭ kelke da minutoj. Lin akompanis du adjunktoj, Petro kaj Salustio, adoleskantoj kiel li, afablaj kaj ĉarmaj, kiuj tuj komencis la preparojn por la grava tasko. Pensoj tumulte kirliĝis en la kaŝitaj faldoj de mia konscienco, lasante, ke karaj rememoroj el la infanaĝo agrable emerĝu en la koron... kaj mi vidis min denove malgranda, emociiĝa kaj timema, kiel iam, kiam la unuan fojon mi staris antaŭ la maljuna majstro, kiu al mi konatigis la unuajn literojn de la alfabeto...

La adjunktoj ligis al la seĝo, kie Hanibalo jam sidis, nepercepteblajn, lumajn fadenojn, kaj tenis funkcipreta kvazaŭan diademon, kiun ni trovis simila al tiu vidita en la Turo okaze de la instruado de Agenor Peñalva. Konstateblis la altgrada homogeneco de la ĉeestantaro, pro la reganta harmonio kiu estigis ĉe ni neesprimeblan bonstaton. Kvankam ni estis suferantaj, ekscititaj, afliktitaj kaj korprem ataj, ni tamen silentigis plendojn kaj personajn zorgojn, atendante la sekvon de ĉi tiu momento!

[1] Sankta Mateo, 11:28, 29 kaj 30.

Sur la podion pli venis ses aliajn inicitoj, kiuj eksidis sur duoncirkle dismetitaj kusenoj, dum Hanibalo restis en la mezo kaj malproksime staris Petro kaj Salustio.

Hanibalo stariĝis. Ŝajnis, ke patrinaj kisoj kvazaŭrose tuŝas niajn mallumajn animojn. Blovoj el espero mistere flustris en niajn korojn, longe sufokitajn de la senespero, kaj sopirĝemetoj elspiriĝis, kvietigante abomenajn angorojn. Kvazaŭ himnon religian, ni aŭdis forajn notojn kaj harmoniojn de kortuŝa melodio, kiuj antaŭenigis niajn Spiritojn, forigante el la medio ĉiajn ajn restaĵojn el malsuperaj zorgoj ankoraŭ flugantaj en la atmosfero. Ni instinkte lasis nin kapti de profunda kaj stranga respekto, kiu eĉ randumis la timon. Ektremoj, neniam antaŭe sentitaj, trakuris nian psikan strukturon, ĝin dolĉe varmigante, dum stranga larmoŝprucado refreŝigis al ni la pupilojn bruligitajn de la arda plorado pro malfeliĉo! Estis evidente, ke preparaj magnetaj ondoj portiĝis en la melodio de tiu mirinda himno, kiu unuigis niajn mensojn ĉe la lulado de sorĉe ravaj akordoj, igante nin agorde vibradi en harmonia stato de koncentriĝo de pensoj kaj voloj.

Meze en tomba silento, en kiu ni ne distriĝis eĉ de la ĉagrenoj fontantaj el niaj malbonoj, la voĉo de Hanibalo, samtempe grava kaj karesa, aŭdigis tra la ĉambro kortuŝan inviton:

"– Ni preĝu, miaj fratoj! Antaŭ ol provi ian ajn noblacelan entreprenon, konvenas al ni plenumi la honoran devon prezentiĝi al Dio Plejalta pere de la mensaj fortoj de nia Spirito, por lin omaĝi per nia respekto kaj lin peti pri liaj diaj benoj..."

Liaj pupiloj, lumantaj per la flamo de lia menso, penetris la intimon de niaj koroj, kvazaŭ ili levus, el la internaj ombroj de nia esto, la ĉiomon de niaj pensoj, celante ilin priverŝi per lumo. Ni havis la perfektan impreson, kvazaŭ tiu fajrelĵeta rigardo estus vivaj torĉoj lumigantaj, unu post alia, niajn timemajn fruntojn, konsternitaj antaŭ tiu supera psika forto, al ni sondanta la intimajn faldojn de la memo!

Bonkora, li pluparolis, kvazaŭ en harmonia preludo:

"– La preĝo, miaj karaj fratoj, estos al vi potenca fortikaĵo kapabla teni viajn pensojn serenaj ĉe la tempestoj venontaj el la provoj kaj revirtigaj streboj, nepre necesaj por la progreso, kiun vi celas. Se vi lernos altigi la menson al la Senfino, per la mildaj kaj simplaj esprimoj de sincera kaj inteligenta preĝo, vi ekposedos la oran ŝlosilon, kiu malkaŝos al vi la sekreton de la bona inspiro. Preĝante, vin prezentante, konfidemaj kaj respektoplenaj, antaŭ la Superega Patro, kio por ĉiu el ni estas devo, vi de Li ricevos fluon da nekonataj energioj, kiuj al vi havigos la necesan heroecon por la luktado ĉe la ĉiutagaj laboroj, luktado karakterizanta tiujn, kiuj strebas antaŭeniĝi sur la vojo de progreso kaj lumo! Per la preĝo, bone sentata kaj komprenata, vi iom post iom lernos penetri per la penso en la regionojn lumigitajn de la ĉielaj heloj, de kiuj vi revenos kun menso pli klara por plenumi la plej penigajn taskojn!

Kaj ja celante enkonduki vin en tiun fruktodonan vojon, mi invidas vin kune kun mi etendi la penson tra la Senfino... Ne gravas, ke la bruliga rememoro pri faritaj krimoj pezas sur via konscienco, nek ke, pro tio, malhelpoj ĉe la korelverŝo baras al vi la necesan liberiĝon. Kio estas necesa, urĝa, neprokrastebla, tio estas voli ekprovi kaj, forte revigligitaj de la plej granda kuraĝo, kian vi kapablos elĉerpi en la profundaĵoj de via esto, strebi al irado sur la rekompencaj vojoj de la preĝo... ĉar sen la prepariĝo en tiu inica kurso pri mensa komunikiĝo kun la altaj spiritaj sferoj, kiel vi en ilin penetros por via reboniĝo?!"

Kaj Hanibalo ekpreĝis, altirante niajn mizerajn pensojn en tiujn mildajn vojojn, kiuj disdonas konsolajn balzamojn, revigligajn fortojn! Dum li preĝis, etendiĝis fosforeska strio, radianta opalkoloran lumon, kiu, ampleksante la ĉeestantaron, ĉiujn envolvis kvazaŭ per mirinda kiso el benoj. La himno akompanis, milde, sordine, la vortojn plenajn de fido, kiujn Hanibalo eldiris... kaj dolĉegaj impresoj balzamis la ankoraŭ dolorantajn vundojn de la pasinteco...

Hanibalo de Silas sidiĝis en la mezo de la duoncirklo formita de tiuj ses kunhelpantaj inicitoj. Petro kaj Salustio surmetis la lumdiademon sur lian frunton, ĝin ligante al la speguleca ekrano per tiuj arĝentaj fadenoj, de ni jam konataj. Dum solena minuto de enmemiĝo kaj mensa streĉo, la majstroj, kies agadon ni spektis, harmonie koncentris sian volon, kaj tuj poste la ĉefinstruisto komencis elvolvi sian gravan lecionon.

Pro la amplekso de tio, kio okazis ne nur en tiu tago, sed ankaŭ en la sekvantaj, dum tiuj neforgeseblaj lecionoj; pro ties decida influo sur nian destinon, nian moralan kaj mensan disvolviĝon, kaj pro la graveco de la tiam uzata pedagogia procedo, al ni absolute nekonata, ni dediĉos specialan ĉapitron al ĝia elvolvo, tamen konsciante, ke malgraŭ nia bonvola penado, ni sukcesos prezenti al la leganto nur tre palan ideon pri ĝi:

# Ĉapitro II
## **“Venu al mi”**

Hanibalo komencis, priparolante la urĝan bezonon, ke ĉiu el ni, same kiel la tuta homaro, ĉu el la fizika-surtera regiono, ĉu el la mezaj kaj malsuperaj sferoj de la Nevidebla Mondo, reedukiĝu sub la gvido de la fekundaj kristanaj principoj. Per mallonga analizo kontraŭdiranta ideojn, kiujn multaj el ni konfesis, li asertis, ke ne el superstiĉa mistikemo nek el miraklaj, nenormalaj faktoj, konsistas la grandioza epopeo de Kristanismo, kiu ne limiĝis inter la Betlehema sankta stalo kaj la Kalvaria dramo, sed ja etendiĝis de la Sferoj el Lumo ĝis la surteraj ombroj, en konstanta efikado per faroj patosaj, pozitivaj, sublimaj, kiujn nur la blinda nescieco rifuzas ĝuste taksi. Kontraŭe, laŭ lia aserto, Kristanismo, universala doktrino kies origino sidas sur la Eternaj Leĝoj mem, havas esence praktitkajn principojn, kies celo estas la morala reboniĝo de la homo, favore al si mem kaj al la socio, en kiu li devos vivi dum sia longa evoluirado, survoje al la altiĝo de la homaro antaŭ la Saĝaj Leĝoj de la Kreinto. Li rimarkigis, ke la surteraj homoj kovris per ombroj la instruojn de la Altega Majstro, ilin envolvis en abomenajn komplikaĵojn, difektis la brilon de ĝia primitiva

esenco per ennovaĵoj kaj artifikoj, konformaj al sia persona malsupereco, tiele kripligante la veron, de kiu tiuj instruoj estas la plej alta esprimo. Li asertis, kun impresa ardo, kiun ni ne kredus ekzisti en adoleskanto, ke nur la grandiozaj kaj altruismaj instruoj de la edukaj doktrinoj prezentitaj de la Plej Eminenta Profesoro, Jesuo el Nazareto, ebligos al ni, same kiel al la homaro, la nepre necesan revirtiĝon, nin preparante por al akiro de nova kaj alta Moralo, por la plenumo de noblaj agoj, povantaj malkovri, por niaj mizeraj koroj, vastegajn horizontojn de kolektiva kaj individua reboniĝo, de vera progreso en la ascenda skalo kondukanta al la riĉegeco de la Senmorta Vivo! Ke, tute egale ĉu ni estas kleruloj, erudiciuloj, geniuloj, al ni neniom utilos tiel brila titolaro, se ni daŭre ignoros la principojn de la Moralo de la Kristo de Dio, de kies aplikado fontas la gloro de la eterna feliĉo, ĉar Klereco sen Amo kaj Frateco rikoltas sian fikcian gloron nur en la sino de la surteraj scioj...

Li poste komunikis, ke lia unua leciono konsistos en la prezentado de lia persono al ni, liaj disĉiploj; klarigis, ke necese estos al ni lin intime koni, por ke liaj ekzemploj servu al ni kiel stimulo sur la dorna vojo, sur kiu ni devos elpagi grandajn ŝuldojn, ĉar ĉiam estos bona pedagogio, ke la mentoro prezentu siajn proprajn ekzemplojn al siaj disĉiploj, kaj krome por ke ni lernu lin ami kaj konfidi, fariĝu liaj amikoj kaj lin rigardu sufiĉe inda esti aŭskultata kaj respektata; ankaŭ necese estos, ke ni povu, en unua analizo, konstati ĉe li mem la nepereemajn trajtojn de karaktero rebonigita de la amo de la Bona Paŝtisto, elaĉetita per tiuj instruoj, kiujn niavice ni devos ekkoni por releviĝi el la ombroj de la malpieco, en kiuj ni restas, ĉar estas vero, ke ni tute ne konas la Kristanismon postlasitan de la Nazareta Majstro, ke ni ne estas kristanoj sed ja kontraŭuloj de la Kristo, ribelintaj ŝafoj, kiuj efektive ne konas sian Paŝtiston!

Kaj la juna Hanibalo rakontis al ni sian vivon! Ne nur pri la lasta ekzistado, travivita en la itala lando dum la nigraj tagoj de la Mezepoko, sed ankaŭ pri la pluraj surteraj migradoj, el kiuj

konsistas lia evoluirado, pri siaj eraroj kiel progresanta Spirito, kia li ja estas, pri siaj elaĉetaj luktoj ĉe la sinoferoj kaj la larmoj de l' riparoj, pri liaj streboj al la Bono, pri la senlacaj laboroj, kiuj al li havigis meritojn sub la inspiroj de la vera pento pri la tempo perdita, laboroj ĉiam pli kaj pli ampleksaj, penigaj, pri la taskoj kaj misioj, tiel en la Spirita kiel ankaŭ en la Materia Mondo, per kiuj li pruvis la efikon de la faritaj progresoj, sian sindonon al Jesuo Nazaretano, al kiu li alligiĝis per tiel fervora amo, ke jam nenio povus ĝin ombri aŭ malpliintensigi!

Sed estis kun mirego, ke ni aŭskultis la parolon de Hanibalo, esprimatan per bildoj kaj scenoj aperantaj sur tiu mirakla ekrano apuda al li. Tiamaniere, dum li parolis, tie reale reproduktiĝis liaj surteraj migradoj kun tiel vera klareco, ke ni kredus esti en ili partoprenintaj tra la aĝoj relevitaj el la sekretaj tenejoj de liaj pensoj, ĉar potenca sugestio superregis niajn fakultojn, ilin ligante al la volo de la mentoro kaj de liaj ĉeestantaj asistantoj, kaj igante nin forgesi, ke ni estas nenio alia ol nuraj lernantoj, kiuj tie ĉeestas la enkondukon en la unuan lecionon! Efektive pli realeca, pli perfekta kaj sugestia ol la nuntempa kinematografo, pli konvinka ol la teatraj scenoj, kiuj tiom absorbas kaj ravas la spektanton, ĉar ja temis pri la vivo mem, natura, homa, reale travivita, la retrospektiva projekcio de la penso de Hanibalo grade aperis sur la ekrano, sed eĉ ĉi tiun ni ne plu konsciis, ĉar ni distingis nenion alian krom la entuziasmigaj faktoj, kiuj stampiĝis en niaj mensoj kvazaŭ stimulo al estontaj iniciatoj! Kiam ĉesis la drama defilo, la bela, adoleskanta instruisto montriĝis al nia rigardo kiel amata estulo, de kiu ni neniam volonte disiĝus! Kio rezultis el tiu pensoelvolvo, tio estis, se tiel diri, ia kunligiĝo de niaj animoj kun la lia, ĉar ja la plej viva inklino nin altiris al li, tiel konformigante niajn sentojn al liaj noblaj kaj frataj deziroj.

Malgraŭ tio, rimarkante nian konfuzitecon, ĉar nin surprizis tiu okazaĵo, por kies kompreno ni ne portis sufiĉe da konoj en niaj intelektaj provizoj, la majstro plu parolis, post kio li finis sian laboron en tiu tago:

“– La scenoj, kiujn vi ĵus spektis, glite fluantaj sur tiu reprodukta ekrano, kiu estas nenio alia ol eksterordinara, al vi nekonata spegulo, kaj sur kiu mi lasis reflektiĝi mian animon; tiuj scenoj, karegaj disĉiploj, prezentis miajn rememorojn, kiujn mi vekis, senmankaj kaj vivantaj, el la plej profundaj faldoj de la Konscienco!

Ĉiuj filoj de la Plejalta, travivante siajn ekzistadojn, tiel la surplanedajn kiel ankaŭ la transmondajn, registras en la kaŝaj anguloj de la animo, en la profundaj tavoloj de la Konscienco, la tutan grandiozan epopeon pri la travivitaj migradoj, siajn agojn, siajn farojn, kaj eĉ elsenditajn pensojn! Ilia longa kaj tumulta historio estas en ili mem gravurita, same kiel la historio de l' globo, sur kiu ni jam vivis, estas ne nur skribita en la geologiaj tavoloj sed ankaŭ por eterne konservita, fotografita, same arkivita en la lumaj ondoj de la etero, tra la Senfina Tempo! Siavice, la astrala korpo, kiun ni nun portas kiel Spiritoj liberaj de la karna korpo – delikatega kaj fidela aparato, kies mirindan strukturon vi ankoraŭ ne kapablas kompreni –, registras, kun egala klareco, tiujn samajn elementojn amasigitajn de la konscienco kun la kreskado de l' tempo, ilin arkivas en siajn sekretajn angulojn, ilin reflektas aŭ elsendas laŭ la okazaj bezonoj – ĝuste tiel kiel mi nun faris –, kaj por tio nur sufiĉas la agado de la edukita volo! Nu, se vi estus edukintaj viajn animkapablojn, se, krom frekventi Universitatojn kaj klerigi intelektojn vi, kiel surteraj homoj, ankaŭ estus kulturintaj la altvalorajn spiritajn donojn, tiam vi, krom foriĝi la eblecon de pereo pro memmortigo, vin altigante al sferoj tre superaj al tiuj, en kiuj ĝemas la pasioj kaj frenezoj kondukantaj al memmortigo, vi nun kapablus kompreni miajn mensajn esprimojn sen la helpo, por tiel diri materia, de tiu aparataro, kiu fotografis kaj vivigis miajn pensojn kaj rememorojn, ilin reproduktante tiaj, kiaj ili estas registritaj en la sekretaj libroj de mia Spirito!

Tio, kion vi ĵus vidis, estas delikatega operacio, postulanta sinoferon de tiu, kiu ĝin provas. Miaj idealofratoj, ĉi tie ĉeestantaj

kaj miaj disĉiploj liveris al mi magnetajn fluidaĵojn necesajn al la korpigo de la imagoj kaj al la reproduktado de la sonoj, por ke ne tro streĉa estu mia penado; kaj, envolvitaj en medio saturita de specialaj ondoj, de supera magnetismo, kiu estas nia ĉefa elemento, vi mem al vi sugestiis la konvinkon, ke kun mi vi travivis miajn ekzistadojn, dum la vero estas, ke vi nur spektis la elvolviĝon de la pasinteco registrita en mia esto... Mi profitas la okazon por al vi komuniki, ke vi baldaŭ travivos tiujn samajn spertojn, nome ke vi eltiros el vi mem la pasintecon, kiu en vi ankoraŭ dormas, ĉar tiuj spiritaj kapabloj, kiuj ĉe la normalaj estaĵoj facile vekiĝas tuj post ilia eniro en la transmondon, en vi restas brutigitaj pro la frakasaj reefikoj propraj al via stato de sinmortigintoj... Sed ne min koncernos orienti vin ĉe tiu akra kaj dolora retrospektado...

La kono, kiun, per la ĵus spektita okazaĵo, vi akiris, kono ja ordinara, eĉ tre vulgara en la spiritaj regionoj, iam riĉige aldoniĝos al la surteraj intelektaj, sciencaj konkeroj, por la gloro de l' homo, en la kadro de la Transcenda Psika Scienco. Sed ĝis tiam la homo devos moraliĝi, disvolvi altvalorajn spiritajn kapablojn, pri kies ekzisto li nun ne scias, ĉar nur tiamaniere li fariĝos inda je tiel sublima akiro kaj ĝin ne utiligos kiel instrumenton de krimado kaj kontentigo de malnoblaj pasioj, samkiel li agis kun aliaj sanktaj aferoj, kiujn li ĝis hodiaŭ estas ricevinta!

Sur la Tero mem, tiu spirita kapablo, kies netaksebla valoro ankoraŭ restas nekonata por la ordinaraj intelektoj, estis aplikita kun la alta celo eduki la unuajn kristaniĝintajn amasojn. Estus malfacile komprenigi la subliman gravecon de la Evangelio de la Regno al simplaj, malkleraj personoj, uzante nur la flamon de la elokvento, la magion de la parolo. La Nazaretano, posedanto de netaksebla psika potenco, de la plej granda mensoforto, kian ni povas imagi, aŭdigante siajn ĉarmajn lecionojn, kreis kaj konkretigis la respondajn scenojn, prezentante al la ravitaj aŭskultantoj belbrilegajn internajn viziojn, kiujn lia

potenca kaj fekunda penso senĉese elradiadis. Sed sendube ne ĉiuj aŭskultantoj kapablis lin kompreni. Eĉ inter tiuj elektitaj por helpi lin en lia elaĉeta misio, iuj lin ne komprenis. Sed la aliaj, por kiuj Li reprezentis la senmakulan lumon de la Vero, nome la simplaj, la suferantoj soifantaj justecon kaj esperon, la bonvolemaj, kiuj seniĝis je vantamo, kiujn jam ne regis la egoismo de la jarcento, kaj kiuj pli-malpli agordis kun Li, tiuj sekvis la kreivajn ondojn de Lia luma penso kaj ĉiel ensorbis la ilustritan instruadon. Ankaŭ same Liaj disĉiploj, parolante pri Li, nekonscie projekciis rememorojn kaj ideojn, kiujn kunlaborantaj Spiritoj, komisiitaj por ilin helpi, rikoltis kaj tuj konkretigis, per potencaj sugestoj, por la vido de la sincera, bonvolema aŭskultanto, kiu tiel ne nur aŭdis rakonton sed ja ĝin spektis, kvazaŭ li ĉeestus la sublimajn farojn de la Neforgesebla Majstro.

Kaj same tiel, karaj disĉiploj, ni faros niajn prelegojn pri la Doktrino postlasita de la Dia Instrutisto, ĉar laŭ tre alta inspiro agis la direkcio de ĉi tiu Kolonio, adoptante tian metodon por la instruado al siaj internuloj, metodon kiu neebligas personajn interpretojn, erarajn argumentojn, sofismojn aŭ interpolojn!"

.......................................................................................................................

Ekde tiu tago ni regule vizitadis la lecionojn de Hanibalo, tiel definitive komencante nian moralan edukiĝon en la lumo de la superaj doktrinoj elvolvitaj de la senmorta parolo de la Dia Mesio.

La profesoro komencis, priparolante la kaŭzojn de la veno de Jesuo sur la Teron. Rava defilado de civilizacioj iom post iom trapasis sur la magia ekrano, elmontrante al nia surprizita atento la plej fekundan pritrakton de la homaj bezonoj, el kiuj multaj ni jam havis la okazon konstati! La majstro prelegadis, kaj liaj rakontoj, liaj majstraj elvolvoj, liaj pli ol konvinkaj, ja nekontraŭstareblaj ekzemploj, lia parolo entuziasma kaj arda elŝiris el la polva krilo de la mortintaj jarcentoj, de la

formalaperintaj aĝoj kaj eĉ de la nuntempo, imagojn kaj scenojn, realajn motivojn, individuajn aŭ kolektivajn ekzemplojn, kiuj, sub la magneta varmo de lia superreganta volo, unuiĝinta al la volo de liaj kunhelpantoj, reviviĝis antaŭ ni, ebligante, ke ni ilin ekzamenu kaj studu sub la klariga kriterio de liaj instruoj.

Tiamaniere ni komencis superan kaj allogan kurson de Filozofio kaj Kompara Analizo. Kaj estis rave, bele, kortuŝe, kun nia eminenta instruisto, relevi el la silento de la jarcentoj, la sociojn forpasintajn en la sinsekvo de la aĝoj, iliajn morojn, iliajn falojn, iliajn heroaĵojn, iliajn venkojn! Al nia komprenpovo montriĝis, ekde sia komenco, la vivo de la homaro, kio al ni liveris la plej belan studon, kiun ni kapablus imagi, la plej fekundan instruon, kiun niaj mensoj povus enpreni, ĉar temis ja pri la grandioza historio de la progreso de la socioj luktintaj sur la krusto de l' planedo, de la amasoj, kiuj tie komencis sian moralan kaj mensan disvolviĝon, kiuj multfoje naskiĝis kaj renaskiĝis kaj poste foriris por pli altaj fazoj en aliaj loĝejoj de la Universo, tiel cedante kokon al aliaj amasoj, aliaj homaroj, siaj fratoj, kiuj siavice ankaŭ luktis, tra la renaskiĝoj, senĉese laborante por la sama progreso, allogitaj de la sama celo – la Perfekteco!

Sed, dum tiaj lecionoj, tiom multaj estis la esplorendaj malfeliĉoj, tiomaj la suferoj, la premaj situacioj, la neklarigeblaj problemoj, la konsternaj kompleksoj naskitaj de l' egoismo kun siaj multoblaj, pasiaj trajtoj, tiom intensaj la luktoj de la homaro nekonscianta sian propran celon, ke ni ne povus resti indiferentaj, kvazaŭ malvarmsanga observanto, kiu esplorus nuran kadavron. Kiel konsista parto de la surtera socio, de tiu malfeliĉa, malpia kaj suferanta homaro, kiu ignoras Dion pro amo al malnoblaj pasioj, ni kunsentis tiujn malfeliĉojn, ĉar ankaŭ ni ilin spertis, kaj pro tio peza aflikto ensorbiĝis funde en niajn animojn, estigante neesprimeblajn angorojn, menshalucinajn statojn neimageblajn por la homa penso, same kiel sanktegajn aspirojn al io, kio nin liberigus el la faŭkanta mallumejo, kiu nin englutis...

Sed iam, dum leciono en milda, harmoniplena tago, kiam en nia interno pulsadis svagaj sentoj de espero, kvazaŭ benataj promesoj enverŝus ĝojon en nian memon, Hanibalo prezentis al ni la neforgeseblan figuron de la Milda Rabeno el Galileo, per siaj rememoroj rebildigitaj sur la magneta ekrano kun la vivaj kaj allogaj koloroj de la realo! Kaj la grandioza epopeo de Kristanismo, ekde la humila staltrogo en Betlehem aliiĝinta en ĉielan lulilon, estis majstre prezentitaj per studoj fekundaj por nia menso, kiu nur tiam komencis lerni la sanktan abocon de la elaĉeto! La scenoj priskribitaj de la preleganto, kiu tiel bone konis la tempon, kiam alvenis la Bona Novaĵo de la Regno de Dio, detale prezentis, kun impresa klareco, la neforgeseblajn predikojn de la Dia Sendito, liajn instruriĉajn paroladojn animatajn per la vivaj koloroj de tiuj supre diritaj bildoj, liajn lecionojn brilegantajn per la plej nobla kaj pura moralo, kiuj, kvankam aŭdigataj en la atmosfero de la humila kaj premata Judujo, tamen resonis tra la plej foraj regionoj de la mondo, kiel konstantaj, amoplenaj invitoj al revirtiĝo por starigo de la regno de la vera Bono, kiel mildaj alvokoj al la socia kaj individua kunfratiĝado cele al la konkretigo sur la Tero de ia ideala Patrujo, kies normojn de regado Li proponis per Sia perfekta parolo, per Sia senprecedenca ekzemplado en la praktika vivo, same kiel per la nepereema brilo de tiu ora Doktrino, kies celo estas la morala edukado de la homo, lia altigo por la gloro de senkrepuska vivo, de la Vivo Eterna en unuiĝo kun Dio! La alloga figuro de la Ĉiela Sendito gravuriĝis, se tiel diri, ankaŭ en niaj mensoj, per ĉarmaj, neforviŝeblaj trajtoj, farante el niaj koroj sincerajn amantojn de Kristanismo, inklinajn, sub ties bonfaraj inspiroj, al la moralaj konkeroj, ĉar dum Hanibalo rakontis faktojn, rememorante kortuŝajn okazaĵojn, dum lia parolo vibradis per sonoraj ondoj da fekundaj komentarioj, ekstraktante fundamentajn instruojn nepre necesajn por nia lumigado, ni vidis la scenejojn, kie efektiviĝis la grandioza agado de la Granda Majstro, kaj lian senkomparan figuron, kiu, per potencinflua

parolo, plenumis la subliman apostoladon! Ni havis la konvinkan impreson, ke ni lin aŭdas eldiranta la Predikon sur la Monto, dum la aromaj ventetoj, kiuj dolĉe ondadis en la supro de la monteto, flirtigis al li la mantelon, taŭzante liajn harojn... Aliajn fojojn ni lin vidis en Tiberiado, ĉe la bordoj de la samnoma lago, en la urboj de Judujo aŭ en la malriĉaj vilaĝoj de Galileo, kvazaŭ ankaŭ ni lin sekvus kiel anoj de tiu popolamaso avidanta liajn konsolajn parolojn, liajn dolĉegajn favorojn!... Kaj al ĉiuj lokoj Hanibalo nin kondukis por lin aŭskulti kaj de Li mem lerni eniri la vojon al nia urĝa reboniĝo: tien, kie li konversaciis kun sekvantoj, amikoj kaj disĉiploj; en la Templon, kie Li klarigis al la tiamaj ekzegezistoj la orajn principojn de sia Bona Novaĵo; ĉien, kie Li resanigis, helpis, protektis, konsolis, admonis, edukis, elaĉetis! Sed Hanibalo tion faris pacience, komentariante kiel instruisto saĝa, kiu skrupule prizorgas la klarecon de la elvolvitaj temoj cele al la bona kompreno de la lernantoj... Ni tiam ankaŭ eksciis, ke ne nur la Tero ricevis la ĝojigan anoncon pri la Bona Novaĵo, per lia parolo bonfara kaj elaĉeta. Ankaŭ la malsuperan Nevideblan Mondon Li vizitis, ĉar Li estis sufiĉe pova por iri kien ajn Li volus kaj videbliĝi laŭ sia plaĉo. Ĉar ja temis pri regiono, kie la moralaj suferoj kaj ruiniĝoj nekontesteble estas pli intensaj kaj profundaj ol tiuj surteraj, ankaŭ tien Li venis kaj konvertis Spiritojn restintajn dum jarcentoj en la mallumo de senscieco aŭ sur la deklivo de la forgeso, same kiel Li sur la Tero konvertis la homojn, al ĉiuj etendante sian fratan, elaĉetan helpon! Hanibalo ankaŭ klarigis, ke la surtera mondo ne konas grandan parton de liaj instruoj, ĉar multaj el la intense brilaj aspektoj de la vivo, kiun Li elvolvis, estis detruitaj, forpuŝitaj de la malsincereco aŭ de la vantama neklereco de l' homoj! Sed li asertis, ke jam sonis la horo, kiam lia Grandioza Doktrino devas konatiĝi al ĉiuj sociaj tavoloj! Tiucele jam estas disvastigata al la homaro, en la nomo de la Elaĉetanto, la Tria Revelacio de Dio... kaj ni mem, kiel Spiritoj, estas invititaj kunlabori en tiu grandioza movado kondukata de la Majstro, provante alparoli

la homojn, por ĉion al ili malkaŝi, ĉar la tiel nomata Tria Revelacio estas nenio alia ol detala, klare videbla interŝanĝo de ideoj inter la Spiritoj kaj la homaro, subordigita al la reguloj tiel de la Universala Scienco kiel ankaŭ de la Altega Moralo de la Kristo de Dio mem!

Post la fino de la Kalvaria dramo, ni ekkonis la ardegajn luktojn de la disĉiploj por disvastigi la revirtigan Testamenton de la Majstro, la martiriĝon de la humilaj, abnegaciemaj kristanoj, ĉiam inspirataj de la imanenta forto de l' fido... kaj la rezultintan reboniĝon de la homoj, kiuj lasis sin gvidi de tiuj regeneraj, edukaj principoj! Ni studis, analizis, esploris ĉion, kion al nia menso eblis kompreni koncerne la Doktrinon de Jesuo el Nazareto. Multajn volumojn, kun enhavo kompleksa, subtila, ni bezonus verki por informi la leganton pri la profundeco kaj amplekseco de tiu senkompara Doktrino, kiu originas el la dia penso mem kaj kiu, estante nenio alia ol la Leĝo starigita de la Kreinto de Ĉiuj Ekzistaĵoj, iam envolvos en siaj nepereemaj brilegoj ĉiujn kampojn de aktiveco de la surteraj kaj spiritaj socioj!

Ni sentis nin altirataj kaj ravitaj. Nur tiam ni komprenis la kialon de la subita transformiĝo de tiu Maria el Magdala; de tiu Saŭlo el Tarso, vazo elektita de la Ĉiela Mesio; kaj kio antaŭe al ni ŝajnis ia mito, legendoj imagitaj de mistikaj orientanoj, tio trudiĝis al ni kompreno kiel logika, nekontestebla fakto, nepre ekzistinta tiel, kiel ĝi fariĝis kaj ĝin rakontis la tradicio! Tiel prezentita al nia kompreno, nome nature, simple, senigita je la misteroj, per kiuj la homoj obstine celas eklipsi lian grandecon, la Ĉiela Sendito konvinke imponis al ni kiel efektiva, plej alta Majstro, la Senkompara Gvidanto, sindona al la supera idealo de la homa regenerado per Amo, Justeco, kaj Laboro! Kaj ni lin sufiĉe komprenis kaj amis por akiri Fidon kaj Esperon, virtojn nepre necesajn al la progresanta Spirito, mankantaj de jarcentoj al la sentoprovizoj de niaj koroj!

Tiu mirinda kurso postulis, kaj de niaj bonvolemo kaj streboj, kaj de la abnegaciemo de nia spirita mentoro, longajn

jarojn da sindono kaj senlacaj studoj, krom ankaŭ da ekzemplado kaj praktikado, ĉar ja esence praktika estas la Mesia Doktrino, kio senŝanĝe konfirmiĝas ĉe la ĉiutaga vivo de la adepto. Tiun kristanan inicadon oni skrupule havigis al ni, celante evitigi al ni motivojn kaj okazojn por estontaj dekliniĝoj sur la kampo de la Moralo!

Sed la vojirado montriĝis peniga, tro longa por multaj el niaj kunuloj, kiuj maltrakviliĝis antaŭ la dorna, konstanta, sed al ili nepre necesa penado. Ni tamen atingis fazon de nia spirita ekzistado, kiam ni ne plu povus halti premataj sub la dentaĵoj de la senkuraĝeco. Ni kontraŭstaris la minacojn de la malforteco, de la kruela angoro, kiu nin sieĝis, komprenante, ke nepre necesas daŭrigi malgraŭ la sennombraj luktoj nin atendantaj en la faldoj de la estonteco, dum la protektanta voĉo de la Konscienco atentigis al ni, ke kun la helpo de la respekteginda Majstro el Nazareto ni ekhavos ĝustajn provizojn por tiu irado skiziĝanta antaŭ la timema kompreno de pentintaj kulpuloj kiel ni!

*“Venu al mi ĉiuj, kiuj suferas, kaj mi vin ripozigos...”*

Kaj obeante al tiu dolĉa, nekontraŭstarebla alvoko, ni antaŭeniris sur la vojo... Jesuo-Kristo, Dia Elaĉetanto de la malfortaj, ribelemaj animoj, plenumis sian promeson: altiris nin per siaj sublimaj instruoj, kolektis nin en sian ŝafejon kaj konvinkis nin persisti ĉe liaj konsiloj, al ni ĉiutage pruvante, per la mirakla transformiĝo estiĝanta en nia animo, sian karitatan zorgon por deturni nin de la malfeliĉo kaj nin konduki al la elaĉeto!

Entuziasmoplenaj pro tiu alloga kurso, kiu nin tiom konsolis, ni forgesis niajn dolorajn dramojn, la frenezajn pasiojn, kiuj nin malfeliĉigis, ni forgesis la Teron kaj ĝin memoris nur dank' al aliaj studoj, al kiuj oni alterne kondukis nin por pliefikigi nian preparadon, ĉar, kiel supredirite, ni havis praktikajn lecionojn por pruvi la efikecon de la teoria lernado, antaŭ ol la realaj provoj de ia nova surtera enkarniĝo gajnigos al ni la venkon ĉe la regeneraj luktoj.

Ne malofte, dum tiuj entuziasmigaj lecionoj, pri kiuj ni ĵus skizis palan raporton, ni ricevis la viziton de aliaj iamaj majstroj de la inicado, kiuj, prezentite de nia profesoro, elvolvis konceptojn kaj konsiderojn pri la kristanaj doktrinoj kaj reguloj kun ravanta kaj sublima fervoro! Ni tiam ekkonis novajn motivojn por la lernado, tute ne malpli belajn nek malpli agrablajn, ol tiuj, kiujn oni al ni ĉiutage instruis.

Estis ja vero, ke ni vivas kiel malliberuloj. Ankoraŭ ne estis permeso, ke ni eliru el la Kolonio krom eskortate en grupoj da lernantoj, sed ankaŭ ne malpli vere estis, ke ni vivas en la sino de elita rondo, en la societo de plejado da edukistoj kaj intelektuloj kies nobla moralo superis ĉion por ni imageblan! Kaj ĉar ni komprenis, ke tia mallibereco estas al ni bonfara donaco helpanta nian progreson, tial ni ĝin rezignacie akceptis kun pacienco kaj bonvolo.

Ĉiutage, ĉe la vesperkrepusko, oni al ni permesis distriĝi en la granda parko de la Universitato. Ni kunvenis en homogenaj grupoj kaj konversaciadis, priparolante niajn vivojn kaj nian tiaman situacion. Niaj bonaj guvernistinoj, la gardistinoj de ĉiu grupo, kaj eĉ niaj fratinoj el la Virinaj Departementoj, ofte partoprenis en tiuj distriĝoj, kio al ni ebligis multe vastigi la rondon de niaj amikrilatoj. Post dekjara internula loĝado en la Instituto de la Urbo Espero, estus malfacile rekoni en ni la iamajn furiozajn, tragikaspektajn figurojn de la Sinistra Valo, tiujn ridindajn idiotojn, kiuj ĉiumomente reproduktis la malfeliĉigan agon de la memmortigo kaj ties satanajn impresojn! Lulate de la Espero, kvietigite de la ĉarma magio de la Amo de Jesuo, kies instruoj inspiradis al ni novajn provojn por progresi, ni montriĝis kiel estaĵoj, kiujn oni povus rigardi normalaj, se ne estus la konscio, kiun ni havis de nia propra malsupereco kiel fuĝintoj el la Devo, fakto, kiu nin tre afliktis kaj hontigis kaj faris nin malindaj antaŭ nia propra juĝo, ne meritantaj la helpon, per kiu oni nin ĉirkaŭis!

Ĉe la Anĝelusaj preĝoj ni ofte ankoraŭ troviĝis en la parko. La krepuska ombro fariĝis pli intensa en nia Urbo kaj superreganta nostalgio envolvis niajn sentojn. De la Templo, lokita en la Regiono de la Harmonio, kie ofte restadis la direktoroj kaj edukistoj de la Kolonio, venis la invito al la omaĝoj, kiujn en tiu momento konvenus fari al la Protektantino de la Legio, al kiu ni ĉiuj apartenis – Maria el Nazareto. Tiam, tra la plej ombraj lokoj de la Kolonio, resonis dolĉaj akordoj, mildegaj melodioj kantataj de la gardistinoj. Estis la horo, kiam la ĝenerala direkcio dankis la Eternulon pro la favoroj konsentitaj al ĉiuj vivantaj sub la amika ŝirmo de tiu korektejo, laŭdante la senlacan zorgadon de la Bona Paŝtisto pri siaj ribelemaj ŝafetoj, nun protektataj de la Legio de Lia amoplena, kompatema Patrino. Estis ankaŭ la momento, kiam el la Supro venis ordonoj, reguligantaj la intensajn servojn, kiuj disvolviĝis sub la respondeco de la sindonaj laborantoj de la Legio. Sed oni ne devigis nin al preĝado. Ni ĝin farus nur se ni volus. Sed ni neniam aŭdis, ke en la Urbo Espero iu lernanto aŭ internulo rifuzis danki la Nazaretan Majstron aŭ lian bonegan Patrinon, kun larmoj de sincera emocio, por la farovoj konsentitaj de ilia netaksebla protektemo!

La tenero de tiu preĝo, kies simplecon egalis nur ĝia sublimo, vekis en niaj mensoj la plej agrablajn rememorojn pri la pasinta ekzistado: – ni revidis, sub la potenco de karaj impresoj, la dolĉajn, sopiratajn tagojn de la infaneco, la karesajn figurojn de niaj patrinoj – kiuj al ni lernigis la mildan saluton de la Ĉefanĝelo al la Virgulino el Nazareto. Kaj la neforgeseblaj vortoj de Gabrielo, plenaj de adoro kaj respekto, resonis en la profundaĵoj de nia "memo", saturitaj de la sopira impreso pri la patrina prizorgo, kiun dum la surplaneda vivo ni neniam sciis ĝuste taksi. Ni ploradis! Kaj tre korŝiraj resopiroj pri la Familio kaj la naskolando, pri la hejmo, kiun ni malŝatis kaj funebrigis, pri la amikoj kaj karaj estuloj, kiujn ni vundis per la dizerto el la vivo, enverŝiĝis en nian eston, nin emigante al grandaj

setimentalaj bedaŭroj, kvazaŭaj novaj fazoj de doloraj rimorsoj. Tiam ni ekpreĝis tie mem, envolvitaj en la kvieteco de l' parko, aŭ kolektiĝintaj en iu difinita loko. Ni preĝis, sentante, en ĉiu tago, la kison de bonfara konsolo revigliganta niajn animojn, kvazaŭ favorkoraj balzamoj refreŝigus niajn konsciencojn, elviŝante el ili la tro ardajn vundojn, malfermitajn en nia estaĵo per la abomenegaj ungegoj de la memmortigo, kiu nin malaltigis kaj malfeliĉigis antaŭ ni mem! Kaj intermikse kun tiu refreŝigo, jen imponis la nepra bezono, ke ni fariĝu indaj je tiu korfavoro, kiu nin tiom protektis – la bezono de atestoj, kiu al Dio pruvus nian senmezuran bedaŭron, ke ni agnoskas nin, kiel gravajn malobeintojn de Liaj Grandiozaj Leĝoj.

# Ĉapitro III
## “Homo, konu vin mem!”

Aliajn kursojn, ne malpli gravajn por nia reedukiĝo, ni ankaŭ faris, krom tiu pri la Moralo starigita de la eminenta Nazareta Majstro. Unu el ili rilatis al la Universa Scienco, kies rudimentojn oni tiam konigis al ni – du jarojn post kiam ni komencis nian kurson pri la Kristana Moralo –, pere de profundaj studoj, de analizoj tiel cerbostreĉaj kiel sublimaj! Kaj en la kadro de tiuj analizoj montriĝis la neceso, ke ni studu nin mem, ke ni lernu intime koni nin mem! Delikataj memekzamenoj efektiviĝis kun detaloj kaŭzantaj teruron al nia orgojlo kaj al nia vantamo, nocaj pasioj kunhelpintaj por nia falo en la abismon. Kaj ĉar la klasoj estis ambaŭseksaj, ni samtempe duoble instruiĝis per tio, ke ni ankaŭ esploradis la karakteron, la konsciencon, unuvorte la animon, kiel de niaj kunuloj, tiel ankaŭ de niaj malfeliĉokunulinoj, kio al ni havigis altvaloran konadon de la homa animo!

La profesoro de tiu grava studobjekto estis la respekteginda edukisto Epaminondo el Vigo, Spirito kies morrigideco, nekontesteblaj virtoj kaj nerompebla energio al ni trudis, pli ol respekton, veran senton de teruro! Antaŭ li, senigitaj je la maskoj

de ĉiaj ajn senkulpigoj, kiujn elpensas akomodemaj sofismoj, ni sentis la hontigan pezon de la nin karakterizanta malsupereco, la malhonoron pro tiu ĝena situacio, ke ni respondecas pri malnoblaj eraroj, ĉar la potencojn de nia animo superregis la konvinko, ke ni estas nenio alia, ol ribelemaj estaĵoj, kies malsaĝeco trudas al abnegaciemaj laboristoj de la Transmondo konstantan sinoferadon, celantan levi nin el la mallumo, en kiun ni nin ĵetis. Nu, la honto, kiu vipadis niajn Spiritojn en la ĉeesto de Epaminondo, estis nova, neatendita sufero, de naturo absolute morala sed ja tre intensa, kiu aperis en tiu dua fazo de nia stato de sinmortigintoj prepariĝantaj por novaj riparaj entreprenoj.

La eminenta edukisto helpis nin foliumi nian propran kosnciencon, ĝin malvolvante ĝis la rememoroj pri la sinsekvaj, de longe pasintaj surteraj migradoj! Kiam li sondis niajn animojn, ilin penetrante per rigardo fajreranta pro psikaj fortoj, kvazaŭaj baterioj de nekontraŭstareblaj energioj, tiam potencaj skuoj ŝancelis la profundaĵojn de nia esto, dum niajn sensojn turmentegis la aflikta deziro pri plej hasta fuĝo, kiu nin kaŝus de antaŭ li, kiel ankaŭ de ni mem! Dum Hanibalo de Silas, per la konsola dolĉeco de la Evangelio, bruligis en ni la bonfaran torĉon de fido al la estonteco, heligante niajn vivojn per la esperdonaj eblecoj de elaĉeto, Epaminondo elŝprucigis larmojn el niaj koroj, renovigis angorojn, nin devigante studi en la vastega libro de la Animo, trenante nin en suferstatojn, kies intenseco kaj terurega komplekseco, absolute neimageblaj por la homa menso, igis nin atingi la randojn de la frenezeco! Tial ni timis lin, kaj ĉiam regataj de forta terursento, krom la nebrideblaj angoroj, ni ĉiutage supreniris la ŝtuparojn de la Akademio, por lerni de li la rudimentojn de tiu timiga disciplino, iam ankaŭ postulata de la antikvaj inicitoj en la Lernejoj de Filozofio kaj Sciencoj de Egiptujo kaj Hindujo: la agnosko de sia malsupereco kiel metodo de morala altiĝo pere de la memedukado.

Sed tiuj lecionoj estis tiel necesaj al nia psika disvolviĝo, kiel tiuj de Hanibalo! Ili ja estis ties daŭrigo, kiel ni poste elmontros.

Ankoraŭ trian kurson ni faris, kies celo estis la praktika aplikado de la principoj lernitaj en la studoj kaj observoj kadre de la supre menciitaj kursoj. Sed anstataŭ prepari nin por ia "profesia praktiko", laŭ la surtera lingvaĵo, tiu tria lernado, celanta praktikan observadon de la Providencaj Leĝoj, kiujn ni dum jarcentoj malobeadis, kaj havanta kiel mentoron Souria-Omar, ĝenerale efektiviĝis ekster la sanktejo, tio estas, ekster la Lernejo, prefere sur la krusto de la Tero kaj en la malsuperaj regionoj de nia Instituto.

Ni ripozis ĉiudimanĉe. Ni ankoraŭ estis individuoj, kies spiritaj kapabloj, malmulte disvolviĝintaj kaj krome afekciitaj de la vibra traŭmato de l' memmortigo, ne permesis senhaltan laboradon, kian plenumadis niaj sindonaj instruistoj, kiuj neniam restis senokupaj. Ni tial ripozadis, eĉ amuziĝadis, partoprenante en fratecaj kunvenoj okazigitaj de la gardistinoj, aŭ vizitante, en amikaj karavanoj, aliajn Departementojn de la Kolonio, malsuperajn al la nia, por revidi malnovajn amikojn kaj iamajn majstrojn, kiel Teokrito, kaj tiel helpi kaj konsoli fratojn pli malfeliĉajn ol ni, loĝantajn tiujn de ni jam konatajn fakojn. Sed eĉ tiel ni ne tute interrompis nian laboradon. Ni ĉiam ankoraŭ lernis! Ni kreskigis nian scion, ricevante, en tiuj kunvenoj, rudimentojn de la Transcenda Klasika Arto, pri kiu elstare kompetentis ne nur niaj majstroj, sed ankaŭ aliaj, kiuj nin karitate vizitadis, kaj eĉ niaj gardistinoj mem, kiuj kun ili provis novan manieron servadi al Dio kaj al la Kreaĵaro, nome pere de l' Belo, de la belverkado!... ĉar konvenas rimarkigi, ke niaj majstroj, krom scienculoj, ankaŭ estis estetikuloj, enamiĝintoj al la Superega Beleco, kiu originas de la Eterna Artisto!

Ni do vidu, en kio konsistis la tiel gravaj kiel timegigaj lecionoj de la eminenta mentoro Epaminondo el Vigo, kiu, kiel

ni scias, estis majstro pri inicado en antikvaj Lernejoj de la Sekreta Doktrino, en Hindujo kaj Egiptujo.

..........................................................................................................................

La Lernejo de Sciencoj de la Universitato de l' Urbo Espero estis instalita en unu el la ĉarmaj palacoj de la Akademia Avenuo.

Transpasinte la sojlon de tiu konstruaĵo, majesta kaj severa laŭ la arkitekturaj linioj, ni ricevis la impreson, ke tie oni adoras Dion per ĉiuj fortoj de la Racio, de la Logiko kaj de la Scio! Blovoj de nevortigebla konvinko skuis la potencojn de niaj animoj, donante al ni la intuicion pri nia propra malgrandeco antaŭ la Saĝo, dum fortaj emocioj trudis al ni neordinaran respekton al la Nekonataĵo, kiun ni tie renkontos, tiel puŝante nin ĝis la randoj de la teruro! En tiuj okazoj ni memoris Hanibalon. Tio venigis al nia penso la dolĉegan figuron de la Nazareta Majstro, kiun oni en la tuta Kolonio titolis Majstro super la Majstroj, la Plej Eminenta Rektoro en la Spirita Mondo! Kaj ni rekuraĝiĝis, certaj, ke ni troviĝas sub lia zorgo, efektive ŝirmitaj en lia ŝafejo, de Li mem amataj kaj protektataj.

Tute identa al la Sanktejo kie oni instruis la Sciencon pri la Evangelio, tiu alia templo prezentis la nuran diferencon, ke, la supron de tiu ekrano, nepre necesa en ĉiuj lecionoj por la kaptado de la vibroj de l' penso, videble ornamis, per diamanteca brilradiado, la fama greka admono:

"Homo! Konu vin mem!"

Ĉi tiun admonon sekvis ne malpli fama, kristana sentenco, kies profundeco kaj sublimeco ankoraŭ revolucios la surteran mondon kaj ties sociojn, ĉar temas pri ia ordono de la Dia vorto koncernanta la laborojn, kiuj efektiviĝos sub la inspiro de liaj Leĝoj:

*"Neniu povos eniri en la regnon de Dio, se li ne estos denove naskita."*

Evidentiĝis, ke la nin gvidantaj edukistoj subordigos siajn metodojn al la principoj starigitaj de Jesuo el Nazareto, kiun ili sen ia dubo respektegis kiel gvidanton kaj estron de tiu movado, elpetita ne nur por nia bono sed ja por la bono de la tuta homaro. Ke ili estas kristanoj de alta morala rango, ni do neniel dubis, kiel ankaŭ estis tute eksterdube, ke, estante, kiel ni poste povis konstati, filozofoj, scienculoj, esploristoj, sociologoj, eminentaj pedagogoj, ili ĉerpis, en la sublima Lernejo de Moralo kaj Frateco starigita de la Kristo de Dio, modelojn kaj metodojn por praktiki, inter la enkarniĝintaj homoj kaj la evoluantaj Spiritoj, siajn noblajn kapablojn.

Impresitaj de ĉio, kion oni al ni permesis observi, ni iafoje sentis kapturnon, pripensante la realecon de la vivo, kiun ni trovis en la transmondo, malgraŭ nia iama opinio, ke nenio plu ekzistos, post iam la lasta surŝuto da tero kaŝus nian senvivan korpon antaŭ la homaj okuloj!

Sed jam de la komenco antaŭsentante gravajn okazaĵojn, kiuj nin mem koncernos, ni aŭdis diskretan kaj impresan sonoriltintadon, kiu averte altiris nian atenton. Solena silento ekregis en la salono. Oni povus diri, ke ĉiuj pensoj plektiĝis en fratan uruiĝon de homogenaj sentoj, dum harmoniaj, fluidecaj ondoj verŝiĝis de la Plejsupro, kvazaŭ ŝprucado de lumigaj benoj, protektante, inspirante la komenciĝontajn sanktegajn laborojn.

Epaminondo el Vigo stariĝis.

Je la unua fojo ni "aŭdis" lian voĉon!

Energia, pozitiva, sentima, grandioza, la parolo de la nova majstro, de tiu, kiu iam alfrontis la torturon de ŝtiparumo pro amo al la altaj idealoj de la Vero, disaŭdiĝis en la vastega salono, vibrante sub la nin ŝirmantaj volboj, kvazaŭ por ĉiam gravuriĝante en la faldoj de niaj animoj kaj vekante ties kapablojn por novaj konkeroj, moralaj, mensaj, intelektaj kaj spiritaj!

Malfortika, modesta, respekteginda pro la longa barbo, kiu senmakule blankis de transcenda lumeco, tiu maljunulo, kiun oni al ni prezentis antaŭ du jaroj kaj kiun ni supozis senile

malforta, nun montriĝis antaŭ nia surprizita rigardo en virenergia agado, kiel giganto de l' parolarto, elvolvante la principojn de ia, al ni ĝis nun nekonata, Renoviga Doktrino, kies fundamentoj sidas sur la Universa Scienco!

Li komence klarigis, ke ni efektive devas unue lerni la moralajn instruojn de la elaĉetanta Evangelio, por ke, sub la ĉarma influo de ĝiaj savantaj lecionoj, ni ekhavu sufiĉan, nepre necesan kriterion por ricevi aliajn instruojn, kiuj, sen tiu moralevangelia reedukiĝo, donus rezultojn sterilajn, nulajn, eĉ malutilajn! Sed la dia moralo de Jesuo, iamaniere elpurigante al ni la menson, sekve nian karakteron, je multo el la malico saturanta niajn fakultojn, preparis, dum tiu dujara, senlaca lernado, nian “memon” por nun ricevi la daŭrigan materialon de la kurso, kiu nin kapabligos por la definitiva morala releviĝo! Ke, pro tiu cirkonstanco, nur nun al ni estas permesite ekrilati kun li, Epaminondo. Ke, sub lia gvidado, ni faros neprofundan, rapidan, por tiel diri, preparan kurson pri la Universa Scienco, nomata, en antikvaj epokoj, – Sekreta Doktrino –, kaj tiam instruata nur al homoj kun menso tre klera kaj forta, kiuj do kapablis, per pruvado de siaj virtoj, penetri la diajn misterojn, kiuj nepre restas kaŝitaj antaŭ vulgaraj, pigraj aŭ vantamaj animoj! Ke, en antikvaj tempoj, antaŭaj al la alveno de la Ĉiela Sendito, tiuj sekretaj instruoj estis malkaŝataj nur al homoj, kiuj, dum minimume dek jaroj, donus la plej rigorajn atestojn pri morala kaj mensa bonfarto; kiuj, dum sama tempo, elmontrus senduban intiman renoviĝon, tio estas, regadon super pasioj, instinktoj, ĉiaspecaj deziroj, emocioj, per Volo lumigita tiel de la sanktaj aspiroj al Bono kiel de la atestoj pri la Virto. Sed li klarigis, ke, por la descendo de la Indulgema Majstro el la Lumaj Sferoj en la ombrojn de la Tero kaj en ties malsuperajn spiritajn regionojn, tiu sekreta instruado populariĝis, ĉar lia Doktrino, penetrante la koron de la homo, lin kapabligus al pli vastaj flugoj sur la kampo de la psika scienco! Des pli ĉar la mesia Doktrino portis al la homaro aliajn konojn, repuŝitajn de la homoj, per

kiuj Li malkaŝis la senmortajn principojn de tiu Scienco! Ke, de tiam, diaj dekretoj ordonis, ke oni diskonigu tiun sekretan doktrinon al ĉiuj surteraj kreitoj, kiel ankaŭ al Spiritoj loĝantaj en la malsuperaj spiritaj regionoj ĉirkaŭaj al la planedo, ĉar la Superega patro, kompatante la homajn suferojn naskitajn de la nescieco, deziris, ke ĉiujn Liajn filojn lumigu la radioj de la Eternaj Veroj! Ke pro tio la senditoj de la Lumo komencis intensan lukton akran kaj senĉesan, daŭrantan jam preskaŭ du mil jarojn, kontraŭ la instigantoj al malnoblaj pasioj, kaj ke jam ĉiujn rimedojn utiligis la laboristoj de la Mesio por instrui la ribelemulojn pri la Ĉielaj Veraĵoj, kiujn ili obstine rifuzas akcepti! Kaj ke, ĝuste pro tio, novaj dekretoj venis de la Plejsupro, ke tiun Instruadon oni pli malkaŝe diskonigu, kiel eble plej efike kaj plej klare, ne nur al unu aŭ du bonvolemaj homoj, sed al la tuta homaro, same kiel al ĉiuj elkarniĝintaj Spiritoj, kiuj deziros ĝin lerni, ĉu virtaj, ĉu pekemaj, ĉar estis tuj proksima ia rigora apartigo, fare de la Providenco, tiel inter la homoj, kiel ankaŭ inter la Spiritoj apartenantaj al la surteraj sferoj, ĉar la planedo baldaŭ akuŝos siajn valorojn kaj forpelos en malsuperajn mondojn tiujn, kiuj de du mil jaroj restas nekorekteblaj, kaj konservos en sia sino nur *tiujn mildajn kaj pacemajn*[1], tiujn bonvolemajn, por ke ne nur en la mondo, sed ankaŭ en ties spiritaj kontinentoj, ekestu tiu erao de progreso, pri kiu revis la Galilea Majstro kaj en kiu regos tiu frata socialismo starigita de la oraj principoj de lia Doktrino! Ke, ĝuste pro tio, oni al ni ankaŭ instruos la rudimentojn de la Sekreta Doktrino, kaj ne pli ol la *rudimentojn*, nome tion sufiĉan, ke ni fortikiĝu por sukcesi en la riparado, kiun ni ŝuldas al la Leĝo, ĉar ni ankoraŭ estas tre malfortaj, kun la mensoj traŭmatizitaj de la violenta ago, kiu transiris la limojn de la Natura Leĝo, kaj kun karakteroj difektitaj de tia eksceso, ke dum sinsekvaj jarcentoj ni dronis en la hontindeco de malnobla konduto! Ke la instruado de tiu Doktrino

[1] Sankta Matero, 5:5 – Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la Teron.

estos laŭgrada, proporcia al niaj kapablecoj, kaj pro tio oni dividis nin en homogenajn grupojn. Ke la tutan Sekretan Doktrinon konas nur la Sinjoro Jesuo el Nazareto, kiu estas unuigita kun la Dia Patro, kaj liaj Anĝeloj, legio da liaj helpantoj, iaspecaj ministroj, kiuj estas unuigitaj kun Li! Ke la instruado de tiu Doktrino komenciĝis sur la Tero, po etaj porcioj al la homoj dronintaj en la ombroj de la Origino, ĝis, laŭ senlime kreskanta progresio, la Infinita Sino de Dio, kaj ke ĝuste pro tio oni tiun Doktrinon nomis Universa Scienco. Ke ni, mizeraj sinmortigintoj, plej malaltrangaj civitanoj de l' Universo de Dio, parioj de la transmondaj socioj, por kiuj ĉiam necesis fondi rifuĝkoloniojn –, estas invititaj lerni de tiu luma legio de la Vero, ĉar ĝuste la nescio pri tiuj instruoj kondukis nin, falo post falo, al tia malfeliĉega ekstremo, kia la memmortigo! Kaj fine, li, Epaminondo, en la nomo de Jesuo Nazaretano, al kiu ni ŝuldas la restarigon de niaj animoj por la elaĉeto, kaj en la nomo de Maria, lia Patrino, al kiu ni ŝuldas la ĝis nun ricevitan protekton, admonis nin al rigora ekzerciĝo cele al estonta, severa iniciĝo en la misteriojn, ĉar de nia bona volo, de nia braveco en la praktikado de la nuna instruado, dependos la estontaj sukcesoj. Ĝisrave vibranta kaj fekunda, kiel la leganto povas facile konstati, tiu oratoraĵo kaptis nian sinceran intereson kaj vekis en ni veran admiron, pro kio ni intime aklamis la instruiston, tuj post kiam li finis sian gradiozan antaŭparolon. Samtepe aŭdigante sian parolon en brila, klasika portugala lingvo al portugaloj kaj brazilanoj, kaj en pura, vigla hispana lingvo al hispanoj, Epaminondo el Vigo elokventis per tonoj jen mildaj kaj melodiaj, jen vibrantaj kaj fortaj, kvazaŭ nin delektus literatura himno, kiu ankaŭ povus muzike impresi, se tiel volus Epaminondo. Ravite, mi, Berlarmino, Johano kaj brazilaj amikoj Raulo kaj Amadeo, aliĝintaj al nia malnova grupo apenaŭ ni alvenis en la Urbo Espero, tuj sentis nin altirataj de la nova mentoro kaj sopirantaj al la novaj lecionoj. Kaj ni supozis, ke samaj impresoj regas la ceterajn kolegojn, ĉar ni rimarkis, laŭ la ĝoje ridetantaj mienoj, ke vera intereso kaptas la ĉeestantojn.

Sed la scienca lernado normale disvolviĝis, alterne kun tiu antaŭe komenciĝinta, krom ankaŭ kun la praktika instruado en la lecionoj de la eminenta Souria-Omar.

Kaj jen okazis, ke la respektinda maljunulo ĝuigis al ni la ravon vidi la naskiĝon kaj la malrapidan, brilan disvolviĝon de la Terglobo mem! Kion ni konis supraĵe (permesu, ke mi tiel min esprimu antaŭ la grandiozeco de tio, kion oni al mi spektigis) laŭ la fakoj de la surtera Scienco, nome Geologio, Arkeologio, Geografio, Topografio, tion la eminenta instruisto elmovis el la volvaĵoj de la jarmiloj kaj revivigis kiel nuntempan okazaĵon per vivantaj scenoj, realaj faktoj, kvazaŭ ni estus efektive ĉeestintaj al la naskiĝo kaj evoluo de tiu malavara stacio de l' sunsistemo, iam nin gastigonta kaj protektonta dum nia ascendo al la Infinito, kaj nin helponta por la perfektigo de tiu dia ĝermo pulsanta tiel en ni, Homoj, kiel ankaŭ en ĝi mem! Ni ĉion vidis: la flamegantan fajreron, la ĥaosan mallumon, la teruregajn pluvegojn kaj diluvojn, la grandajn kataklismojn estigontajn oceanojn kaj riverojn, la mirindan aperon de la kontinentoj kaj la naskiĝon de la majestaj montaroj, ĉenoj el granito eternaj kiel la globo mem, tiel konataj kaj amataj de tiuj, kiuj evoluas sur la Tero: la Alpoj, fieraj kiel potencaj monarkoj, spitantaj la aĝojn, la sveltaj Pireneoj, la respektegindaj Himalajo kaj Tibeto, la ombra, majesta Mantikejro; ĉiuj, aperante, en diversaj epokoj, antaŭ niaj ravitaj okuloj, eltiris larmojn el niaj animoj, kiuj timeme adorkliniĝis antaŭ tiom da beleco, grandiozo kaj majesto! Sed antaŭe, en splenda sinsekvo da miregindaĵoj, montriĝis la furiozo de la elementoj, celanta la disvolviĝon de la malgranda ĉiela kontinento, la tumulta oceano skuanta, en teruregaj konvulsioj, la sinon de la naskiĝanta mondo, kiu dronis en soleco, la kataklisma frakaso de ventoj kaj ŝtormoj, pri kio neniu povas havigi al la homo ian kvazaŭan ideon... krom ankaŭ la unuaj signoj de movo kaj vivo en la vastegaj profundaĵoj de la tumultantaj akvoj, la vegetaĵaro, grandioza kaj terura pro la giganteco de siaj dimensioj... la monstraj dinosaŭroj, la lagartoj

kun formo kaj forto neimageblaj kompare kun la korpa delikateco de la homo, la mastodontoj, la Prahistorio!

Tio estis libro konsterna, grandioza, mireginda, pri la Dia Epopeo de la Kreado, aŭdiganta iajn nemultajn akordojn de la Senmorta Simfonio tra la Infinito de l' Tempo, en la Eterneco de l' Ekzistaĵoj! Kaj en tiu libro ni literumis la abocon de la Inicado, laŭgrade kaj pacience, iufoje kun entuziasmo, kiu randumis la ravitecon; alifoje banataj per larmoj ĝislime de l' timo, sed ĉiam kun avida raviĝo, sopiregante pliajn konojn, bedaŭrante, pli ol iam antaŭe, pro niaj tre malvastaj kapabloj kiel sinmortigintoj, kiuj al ni ne permesis duonvidi eĉ la trionon de tiu nobla programo propanata de la Naturo!

Nepriskribebla defilado de genezaj periodoj ĉiutage prezentiĝis al nia observado, por kleriga, morale supera analizo, rezulte de kio ĉiam pli kaj pli radikiĝis en nia Spirito la amo, la respektego al Tiu Superega Kreiva Estaĵo, kiun ni antaŭe negis, je kiu ni ne kredis laŭlonge de la jarcentoj, sed kiun ni nun dankis, sentante nin teruritaj kaj malsuperegaj antaŭ lia Grandeco, kvankam feliĉegaj, ke ni estas liaj filoj, heredontoj de lia eterna gloro!

Jen nun montriĝis la flaŭro kaj la faŭno, grandegaj laŭ la diverseco de la specioj: pli frue la geologiaj tavolaroj, riĉaj je allogoj kaj ĉarmoj, plenigante la sinon de la globo per konsterna abundo da mineraloj; poste la senlima laboratorio de la planedo, kun siaj mirindaj infuzorioj, siaj provizejoj de vivo, kreaĵoj, specioj, unuvorte de riĉaĵoj nekontesteble diaj, kaj ĉio je la dispono de la Homo, ĉio kreita por li, sed kion li volas ignori, vivante, kiel li ja vivas, droninta, dum la jarmiloj, en la mallumo de la besteco, kaj tiel restante nekapabla ekposedi tiun paradizon, kiun por li la Sinjoro imagis kaj kreis per la tuta delikateco de sia senfina Patra amo, per la tuta forto de sia potenca menso, kiel Superega Kreanto!

... Kaj jen alvenis, en lecionoj ĉiam intersekvaj kaj lerte dividitaj, la erao de la Homo, la formiĝo de la rasoj, la pleja

gloro de l' planedo, nome ke ĝi fine loĝigos la dian eron, kiu iam nepre respegulos sian Kreinton, laŭ lia bildo kaj simileco!

Dum longaj, seninterrompaj jaroj, ni legis tiun miregigan libron, kies intensa grandiozo ordinare kaŭzis al ni kapturnojn, malbonfarton, trudantajn la neceson, ke ni ĉerpu novajn mensajn energiojn ĉe la kuracistoj komisiitaj por nia prizorgo. Epaminondo mem plej sindone klopodis por nia resaniĝo... Kaj hodiaŭ, baldaŭ revenonte al la scenejoj de tiu planeda stacio, kiun ni nun konas ekde ĝia naskiĝo, ni konstatas, ke ni ankoraŭ nenion lernis, ke ni nur literumis la abocon de la materia, surtera vivo!

Sed kiamaniere Epaminondo kaj liaj helpantoj povis prezenti tiajn lecionojn, vidigante en la nuno tion, kion la jarmiloj forglutis en la pasinteco?!... Kiel rebildigi, kun tiel potenca realeco, ke ni teruriĝis, la primitivajn eraojn de la planedo, la periodojn ruinigitajn de la Tempo?!...

Ni ĉiuj ja vivas en la plena Eterneco, ni estas civitanoj de la Infinito, kaj ĉe la Eterneco nur ekzistas la nuntempo, sen krepuskoj, sen mankoj! Ĝi, la Eterneco, enas en la estanteco, ĉar ĝuste tio ĝin karakterizas!

El la lumaj ondoj de la nevidebla etero, nome el la arkivoj de l' infinito kiel ankaŭ el la sanktegaj tenejoj de la Eterneco, Epaminondo elĉerpis la grandiozan materialon por siaj lecionoj. La eterniĝintajn bildojn, retenatajn en la vibraj ondoj de la luma etero, la reproduktaĵon de tio okazinta sur al Tero ekde ĝia kreado, konservita, fotografita, gravurita en la vibroj de la Lumo, kiel pejzaĝo sur fragila sapveziko, tiuj magoj de la Transcenda Scienco apartigis, kaptis kaj al ni vidigis pere de procedoj kaj aparatoj, pri kie sentivo kaj magneta potenco jam hodiaŭ la homo ne estas tute senscia. Epaminondo ja povus, komunikiĝante kun iu samranga kiel li, priparoli la pasintecon sen la helpo de aparatoj. Sed por ni ili estus nemalhaveblaj, se nur la sindona mentoro ankoraŭ pli malaltigus siajn proprajn kapablecojn por fari sin pli komprenebla, kaj samtempe

pliintensigus la niajn, nin ĝissufere premegante, kio estus tute nenecesa. Efektive, skipo da magoj specialistoj en tiu fako kaj artistoj spertaj pri la parolo kaj la sugestio traesploradis la eteron per siaj kapabloj de transcenda-scienca altirpovo, serĉe de tio, kio konvenus. Helpe de potenca sugestiado ili ĉion projekciis sur la sentivan ekranon kun tiela perfekteco, ke ni havis la impreson, kvazaŭ la prezentitajn okazaĵojn ni estus reale vidintaj! Tia procedo por kaptado de imagoj, de okazintaĵoj, ja ordinara en la Nevidebla Mondo, iam estos atingebla por la homo kaj al li permesos eĉ esplori interajn sferojn de la transmondo! Unu sola afero plifruigos al la homaro tian konkeron de la Scienco: – la superregado de la Moralo en ĝiaj socioj, la potenco de la Virto!

Mi ne povos ne mencii tian subliman spektaklon, kia la harmonia irado de la astroj, kiu al ni ankaŭ estis montrita en la kadro de tiuj studoj. Sed ĉi-cele oni aplikis ne la limigitajn procedojn utiligeblajn en malvasta akademia ĉambro: oni ekskursigis nin en la Spaco, kaj, kiel universitatanoj farantaj praktikan kurson, ni vojaĝis tra la Infinito. Niaj limigitaj fortoj tamen ne permesis al ni rigardi la splendon de la stelaj mondoj en ties mirinde grandioza tutaĵo. Kiel stimulon, oni al ni nur havigis pli malpli proksimumajn vidojn de tiu splenda majesto, pere de aliaj aparatoj speciale distinitaj al la astronomia observado. Niaj observoj kaj studoj tial limis sin je la konado de niaj sunsistemaj fratoj kaj ebligis al ni fari la plej belajn akirojn, al kiuj ni povus aspiri en nia nuna stato, kio jam tre multe nin ĝojigis kaj kontentigis... Kaj tiel okazis ĝis ni iam transiris al la studado pri ni mem, nome pri la Animoj, kiel gemoj de la ĉiela juvelujo, estontaj ornamaĵoj de la universa Kortego, sur kiu stampiĝis la sankta sigelo de la Superega Penso kaj por kiu ĉio, senescepte ĉio, estis imagita kaj kreita de la Amoplena Patro, kiu, nenion bezonante, nur deziras, ke ni nin reciproke amu!

Dum la kurso, la majstro konvinke eksplikis al ni la trioblan naturon de la homo, praktike pruvante sian tezon per esploraj

analizoj pri ni mem kaj pri aliaj animoj, kio alportis al ni surprizojn iafoje tre akrajn por niaj enradikiĝintaj orgojlo kaj antaŭjuĝemo. Tiun saman studon ni duonvidis en la Hospitala Departemento, kie la azilito lernis rudimentojn pri sia spirita naturo, sen tamen atingi tiujn detalojn, kiujn oni al ni konigis en la urbo Espero.

Li pruvis la realecon de la sinsekvaj ekzistadoj, ĝiajn leĝojn, ĝiajn bonfarajn rezultojn, ĝian subliman, instruan celon, ĝian nepran neceson por la glora evoluado de la estaĵo! Li montris al ni la dornan vojon de la Spirito ĉe tiu sublima ascendo al la Supro, klopodanta ĉe la renaskiĝoj kaj renoviĝoj en karnaj korpoj, ĉe transtombaj provtempoj, ĉe seninterrompa laborado en ambaŭ Sferoj!

Sed ne sen emocioj, iafoje tre ŝokaj, ni vidis, dum tiuj studoj, malfermiĝi antaŭ ni la kampojn de la Spirita Vivo, kiun nur tiam ni sufiĉe klare ekkomprenis, ĉar ĝiaj realaĵoj, ne malofte tre amaraj, renversis malnovajn filozofiajn konvinkojn, detruis enradikiĝintajn, akomodemajn antaŭjuĝojn, ŝanĝis sciencajn konceptojn, kiujn ne nur la tradicioj sed ankaŭ la blinda orgojlo de la materiisma fanatikeco al ni admonis konservi kaj omaĝi!

Celante pli ĝustan konadon de certaj apartaĵoj de la homa personeco, ni tiam karavane ekskursis kun niaj mjastroj por efektivigi praktikajn studojn. Souria-Omar estis la ĉefinstruisto pri tiu nova lernobjekto, kaj lin helpis klarmensaj, same kompetentaj asistantoj. Ni vizitadis la Hospitalajn Departementojn, observante, kvazaŭ medicinaj studentoj, la strukturon de la spiritaj korpoj de niaj fratoj tie loĝantaj kiel internuloj. Por tio kunhelpis Teokrito, kiu ĉion al ni faciligis kaj kiun frate asistadis niaj amikoj Roberto kaj Karlo de Canalejas. Ni regule malsuprenvenis al la Tero, kiun dum sinsekvaj jaroj ni vizitadis por staĝaj deĵoroj, po kelkaj horoj en tago, en hospitaloj kaj kuracdomoj, dum kiuj ni studadis la okazojn de elkarniĝo, ĉiam sub la gvido de eminentaj fakuloj de la Spirita Patrolando. Samcele ni vizitadis privatajn loĝejojn kaj eĉ prizonojn, serĉe de kondamnitoj al la mortpuno, ĉar ni devis riĉigi la menson per

analizoj pri ĉiuj specoj de tiu fenomeno, nome la disiĝo de Spirito disde sia provizora karna envolvaĵo, tiel ĉe la feto elpuŝita, pro antaŭtempa akuŝo aŭ pro abortigo, el la patrina genera organo, kiel ankaŭ ĉe tiu kondamnita de la homa justeco al penduma morto! Ĉiu karaktero, ĉiu personeco, ĉiu speco de malsano, same kiel la speco de morto ebligis la akiron de novaj konoj pere de sublimaj, detalaj studoj! Memkompreneble, ni neniam alestis ian okazon de murdo aŭ katastrofo. Ni ĉiam alvenis post la efektiviĝo de la drama okazĵo, ĝustatempe por rikolti la koncernan klarigon. Ni ofte devis plenumi la doloran devon ĉeesti suferigan disiĝon, envolvitan en la afliktoj de teruregaj reefikoj, interne de la muroj de iu tombejo! Kaj tie Souria-Omar, genia instruisto, inda ke disĉiploj lin aŭskultu kun sinklina respektemo, elvolvis siajn majstrajn lecionojn! Kaj ĉe la susurado de l' branĉaroj, kie nokte pepadis delikataj birdetoj, kortuŝe revantaj pri la tagiĝo, aŭ sub la solena ombro de l' majestaj, foliriĉaj cipresoj, en la silento de nokto stelpunktita, same kiel en la brilegoj de la Reĝo-Astro, ni rikoltis la klarigojn de la malnova majstro el Aleksandrio, komprenante tiun miregindan fenomenon, nome la elkateniĝon de Animo el la ĝin enfermanta armaturo por reveno en la liberecon de la spiritaj regionoj! Sed multfoje, dum tiuj grandiozaj spektakloj, ni ne povis fortiriĝi de vivaj suferigaj impresoj! La lernado inkluzivis la observadon de multaj aliulaj malfeliĉegoj, ekstremaj suferoj, neimageblaj afliktoj, mizeroj kaj malesperoj, ĉe kiuj fluadis niaj larmoj, niaj brustoj dolore spiregadis, niaj koroj kompateme emociiĝis. Sed ja estis necese, ke ni lernu, ĉe tiaj spektakloj, regi la emociojn, kvietigi tiel la mensajn fortojn kiel ankaŭ la sentojn, prefere penante pripensi kaj tiel klopodi por helpi kaj rebonigi situaciojn, ne perdante altvaloran tempon en senfrukta lamentado kaj senrezulta plorado. Tiaj impresoj atingis sian klimakson, kiam trudiĝis al ni la observado de antaŭtempaj elkarniĝoj en okazoj de memmortigo! Tiam la frenezo, kiu iam nin atakis, elvenis el la profundaĵoj de niaj animoj, kien ili estis repuŝitaj, kaj kontraŭ

nia volo elŝprucis, afliktante nin kiel fantomo de paseo fariĝanta nuno! La abomena tono de niaj iamaj rabioj kreskis ĉe la febro de turmentaj rememoroj, nin konsternante kaj ĵetante en kolektivan halucinigon! En tiaj okazoj, niaj Gardantoj ekagis kaj helpis nin per siaj tutaj energio, karitato kaj saĝo, kvietigante niajn emociojn, vigle repuŝante niajn halucinajn histrionaĵojn, vipante, per la bonfara aplikado de siaj fluidecaj terapioj, la mensajn ekscitiĝojn kaŭzitajn de la rememoroj, ĝis denove superregis la estanteco!

Tiel okazis, ke ni revenis en la Sinistran Valon kiel anoj de la helpkaravanoj, por daŭrigi la subliman lernadon. Tie plorante super sama malfeliĉego kiel la nia, ni havis la okazon vidi niajn fratojn dronintajn en tia sama ekstrema situacio, kian ni tiel bone konis, kaj kun niaj majstroj ni ilin ekzamenis, por kontroli, ĉu ili troviĝas en la kondiĉoj esti transportataj al la konvena Departemento en la Kolonio. Ni ilin kompateme alparolis, kuraĝigante, konsolante, sed ni pasis nerimarkate, de ili ne komprenataj... Tiel ni eksciis, ke ni iam estis same prizorgitaj de aliaj Spiritoj, tion ankaŭ ne konsciante pro nia mizera stato...

Pri ĉiuj scioj, kiujn ni iom post iom akiradis, ni devis mem ellabori notojn, prezenti ekzemplojn per tezoj, kiuj tre honorigus la surterajn edukejojn, en la okazo se ili volus adopti tiujn samajn instruojn por klerigo kaj analizo de siaj lernantoj; ekstrakti analizojn, unuvorte ĉion, kio pruvus nian progreson en la iniciĝo pri psikismo. Por tio oni havigis al ni belegajn albumojn, kajerojn kaj librojn lumbrilajn kiel stelflokoj, kaj eĉ delikategajn aparatojn, pri kies funkciado ili ankaŭ instruis nin, ke ni ankaŭ lernu projekcii por aliaj la ekzemplojn de ni mem elpensitajn aŭ eĉ tiujn analizojn ekstraktitajn el la ekzemploj, kiujn la majstroj donis okaze de praktikaj lecionoj sur la Tero aŭ en alia loko de nia Kolonio. El tio fontis mia novelverkado kaj la sopirego dikti verkojn al la mediumoj, ĉar tio estis permesata en la kadro de la praktikaj lecionoj, kondiĉe ke tiaspecaj laboroj ricevu la aprobon de la superuloj; de tio ankaŭ venis nia sinofera penado por, dum

ĉirkaŭ tridek jaroj, ion skribi, kio samtempe montrus al Dio nia danko pro la multo, kiun al ni permesis Lia Favorkoreco, kaj la deziron rakonti al niaj malfeliĉofratoj, malliberigitaj en la surtera suferado, tion, kion la Transmondo rezervas al ili. Por tia celado ne necesus, ke ni estu literatoroj, ĉar la lernado ĉe niaj mentoroj edukis nian sentemon, ekvilibrigante al ni la menson en tia maniero, ke ni vere povus servi al la nin envolvanta vero!

Tiuj transcendaj studoj postulis multan diligenton kaj sindonon, ĉar vastegaj estis la kampoj de esplorado kaj grandiozaj estis la ĉiutage prezentitaj temoj.

Konvenas elnombri la tre interesajn objektojn, kiujn ni studadis kaj esploradis tiel vaste kiel al ni permesis niaj mensaj fortoj:

– Planeda genezo aŭ Kosmogonio – Prahistorio
– La evoluado de la estaĵo
– Senmorteco de la animo
– La triobla naturo de la homo
– La animaj fakultoj
– La leĝo pri la sinsekvaj ekzistadoj en surteraj, karnaj korpoj, aŭ reenkarniĝo
– Psika Medicino
– Magnetismo – Elementoj de transcenda magnetismo
– Kristana Moralo
– Psikologio – Surteraj civilizacioj

Alterne sekvante la lecionojn pri la Evangelio, tiaj studoj havis intiman rilaton al ili, kio igis nin pli bone kompreni kaj respekti la subliman personecon de Jesuo Nazaretano, kiun ni de tiam rigardis, laŭ la ekzemplo de niaj instruistoj, kiel la superegan mentoron de la Inicado, ĉar efektive, penante instruiĝi pri la Scienco, ni en ĉiuj konsultitaj kompendioj trovis lecionojn, klarajn instruojn, agojn kaj ekzemplojn de tiu Granda Majstro, kiuj montriĝis kiel plej alta esprimo de saĝo kaj vero, nesupereblaj modeloj, gvidiloj nin invitantaj al plua irado, por ke ni atingu la

celon gardate kontraŭ la dekliniĝoj kaŭzataj de la trompo kaj de la falsaj interpretoj.

Kiel ni jam pli ol unufoje klarigis, niajn studojn pliriĉigis la praktiko kaj la ekzemplado. Sed tiu apartaĵo, kiu eĉ kuntrenis farojn de ni efektivigotajn dum la nepre necesa renaskiĝo en nova karna korpo, ne ĉiam kaŭzis ĝojon al nia koro. Kontraŭe ĝi ofte afliktis, eltirante el niaj brustoj korŝiregantajn larmojn, kaj eĉ travivigis al ni nigrajn statojn de malespero, kiuj nin senkuraĝigis kaj malsanigis. Krizaj situacioj, hontigaj ĝenoj amasiĝis super ni, kiel ni vidos, sed tiel malagrablajn rezultojn ni ne povus eviti, ĉar ĉio estis sekvo de la malsupera moralprovizo, kiun ni kunportis en la Transtombo.

Jam en la unua leciono, fininte sian brilegan paroladon, la respekteginda Epaminondo el Vigo faris admonon, kiu neniam plu elviŝiĝos el nia animo:

"– Neniu provo por morala reboniĝo estos efika, se nin daŭre katenos la nekonado de ni mem! Estos nepre necese, ke ni unue esploru, kiu ni estas, de kie ni venis, kien ni iros, por ke ni konvinkiĝu pri la valoro de nia propra personeco, kaj por ties morala altiĝo ni klopodu, dediĉante al ni mem ĉiom da konsidero kaj plej multan ŝaton. Ĝis nun, miaj karaj disĉiploj (diference de Hanibalo, kiu nin karese nomis fratoj, Epaminondo nur permesis ceremonian, disciplinan titoladon), vi blinde iradas en viaj migradoj sur la Tero kaj restadoj en la Transmondo, moviĝante en senelira rondo, sen scioj nek virtoj, kiuj povus vin puŝi al kontentiga progreso. Dronintaj en la malsuperaj materiaj deziroj, pasive pelataj de la blindaj impulsoj de la plej nocaj pasioj aŭ brutigitaj en la obskura gango de la instinktoj, vi ignoradas, pro malbonvolemo aŭ krima indiferenteco, ke nian eston la Ĉiopova altigis per Siaj propraj atributoj, kiujn ni devas kulturi sub la benoj de l' progreso tiel longe ĝis ili ekfloru kaj fruktu en la pleneco de la triumfo, al kiu ni nepre estas destinitaj!..."

Tion dirite, li montris al unu el la pentintoj pli proksime sidantaj kaj enirigis lin en la rondon, kie staris lia katedro kaj kunsidis, koncentriĝintaj kaj silentaj, liaj asistantoj.

La hazardo, aŭ la klarvideco mem de la mentoro, igis ĉi tiun elekti nian kungrupanon Amadeo Ferrari, romdevenan brazilanon, naskiĝintan en la interna regiono de la Ŝtato San-Paŭlo, kiu, kiom ni en tiu momento eksciis, mortigis sin trideksepjara, kredante, ke al li estos eble eskapi tiel el hontiga aresto pro iaj senprudentaĵoj, kiel ankaŭ el minaca kancero, kiu ekŝveligis lian gloton. Epaminondo starigis lin antaŭ si kaj per aŭtoritata tono lin demandis:

“– Via nomo, kara disĉiplo?...”

Subita premsento ekregis la ĉeestantaron, ilin avertante, ke io tre grava trafis ilin. Ni volis forkuri, sendevigante nin el la terura lernado, kiu al ni subite montriĝis tro grandioza, tro delikata, ke al ĝi ni fordoniĝu por ĉiam! Ni havis la intuicion, ke ni neeviteble travivos okazaĵojn, kiuj signos novan fazon de niaj destinoj, kaj ni ektimis! Epaminondo el Vigo tiam aperis al ni kvazaŭ nepetegebla juĝisto, kiu nin trenos ĝis antaŭ la timinda tribunalo de nia konscienco, kaj lia respekteginda persono al ni inspiris teruron, dum la dolĉa, afabla figuro de Hanibalo de Silas, kies esperdonaj prelegoj pri la Bona-Novaĵo nin tiel funde konsolis, bildiĝis en nia imago, kaŭzante profundan resopiron al lia milda parolo tenere rememoriganta la sublimajn farojn de la Milda Nazaretano. Sed la maljunulo nin admonis, per altvalora, energia averto, surprizante nin per la kapablo senmanke ekkoni la impresojn estiĝintajn en niaj mensoj:

“– Memoru, ke la Sinjoro Jesuo el Nazareto, kiun vi nun elvokas, estas la Granda majstro nin inspiranta, kaj ke ja sub Lia aŭspiciado ni havigas al vi la Sanktajn Instruojn, kiuj altigos viajn Spiritojn ĝis la konkero de estontaj meritoj, ĉar Li mem estas la superega estro de nia Lernejo kaj donanto de nia Scienco!...”

Li sin turnis al la atendanta paciento kaj rediris:

“– Via nomo, do?!...”

“– Amadeo Ferrari...”

"– Kie vi loĝis antaŭ ol veni en ĉi tiun regionon?..."

"– En la urbo XXX, en Brazilo..."

"– Kial vi provis eskapi vian destinon, kies celo devas esti la unuiĝo kun Jesuo, nia Elaĉetinto, kiun destinon vi forĵetis en la iluzion de memmortigo?!... Ĉu vi ne sciis, ke vi tiel faras krimon kontraŭ Dio, efektive kontraŭ vi mem, ĉar ni sendube portas en ni fajrerojn de la Kreinto?... Ĉu vi do kredis, ke vi povos detrui la elementojn de Vivo en vi ekzistantajn, de tiu Vivo, kiu estas eterna ĝuste tial, ke vi ĝin ricevis de la Eterna Kreanto?..."

Videble ĝenata, Amadeo elturniĝis per sofismo, la sola rimedo, kiu al li venis en la menson ĉe tiu delikata situacio:

"– Feliĉe, sinjoro, tio estas nura premsonĝo... ia halucino... Kvankam mi ĝin deziris, mi tamen ne povis min mortigi, ĉar mi estas viva! Viva! Viva! Dio estu laŭdata, mi estas viva!"

Sed kun konsterna sereneco, kiu nin incitus se ni ne estus sincere inklinaj akcepti la instruadon, la saĝa maljunulo insistis:

"– Mi refaras mian demandon, Amadeo Ferrari: – Kial vi deziris formalaperi tiel de antaŭ vi mem kiel ankaŭ de antaŭ viaj similuloj, se ĉirkaŭ vi la poemo de l' Universo prikantis la sanktegecon de la devoplenumado, same kiel la subliman belecon de la homa ekzistado, kiu kapabligas la Animon por la Senmorta Vivo?"

"– Sinjoro... Tiel okazis, ĉar... mi senkuraĝiĝis... jes... mi... Sed ĉu mi devas respondi ĉi tie, en alesto de ĉi tiu tuta spektantaro?... Ĉu mi do denove troviĝas antaŭ tribunalo?..."

"– Ja ekzistas ia tribunalo, antaŭ kiu vi ĉiuj staras, nome via konscienco, kiu komencas vekiĝi el la longa letargio, kiu de jarcentoj tenas ĝin katenita al la plej bedaŭrindaj sekvoj! Estas nepre necese, ke mi, rajtigita de la superegaj povoj de mia kaj via Elaĉetinto, vin orientu cele al tio, ke vi, sondante vian konsciencon, lernu liberiĝi de la orgojlo, kiu de multe da jarcentoj vin blindigas kaj tiel malebligas, ke vi konu vin mem kaj sekve la suverenecon de la Leĝoj regantaj la destinojn de la homaro!"

“– Sinjoro, la mizero, la malsano, la senkuraĝeco estis la kaŭzoj... Mi faris gravan eraron ĉe tiuj tiel doloraj cirkonstancoj... Al mi montriĝis neniu alia rimedo, krom fari, kion mi ja faris... La aresto... la malsano...”

“– Kaj ĉu tiu ago – sinmortigo – forlavis la makulon, per kiu vi iam malpuriĝis?... Ĉu vi rigardas vin senkulpigita, honesta, digna, post tiu ago?...

“– Ho ne! Mi ne povis eskapi el la respondeco pri miaj faroj! Mi sentas min maldigna, ke mi senrajte uzis sumojn al mi konfiditajn... kvankam mi per tio celis reakiri la sanon, ĉar pro la nigra minaco de kancero mi senkonsiliĝis, ĝuste tiam kiam tre baldaŭa edziĝo fariĝis la pravo de mia ekzisto... La sumo estis granda... mi estis bankoficisto... karcero aŭ morto... Kancero, ŝtelo, ĉar tio ja estis ŝtelo... La ruiniĝo de la revo pri amo! Mi preferis la memmortigon! Mi konscias, ke tio estis grandaj krimoj... Sed mi ankoraŭ sentas min konfuzita, kvankam mi lastatempe multe instruiĝis... Ho, kial mi estis metita en tiel mizerajn cirkonstancojn?... Konfuzo kirlas mian menson... Teruregaj intuicioj flustras al mi pri pasinteco, kiu min plenigas per timego... Ho Jesuo el Nazareto! Indulgu min!... Mi tremas kaj ŝanceliĝas... Mi ne bone komprenas...”

“– Vi ja komprenos, Amadeo Ferrari! Estas nepre necese, ke vi komprenu!”

Epaminondo mansignis al du asistantoj, kiuj atendis liajn ordonojn. Ĉi tiuj sidigis la pentinton antaŭ la speguleca ekrano kaj poste surmetis al li diademon egalan al tiu, kiun la majstro uzis por siaj prelegoj.

Sincera religia etoso regis en la salono. Ni sentis, ke tuj malkaŝiĝos al nia kompreno grandioza, sanktega mistero, kaj kortuŝite kaj timeme ni atendis, dum bonfaraj influoj envolvis tiun sanktan, de ni travivatan momenton.

Epaminondo sin turnis al la kunsidantaj disĉiploj kaj admonis:

"– Estu atentaj! La historio de ĉi tiu via frato estas ankaŭ via historio! Liaj faloj prezentas nenion alian, ol la falojn de la homaro mem, en la ĉiutaga batalado kontraŭ siaj pasioj! Ĝuste pro tio, vi devas ne komenti, kion vi ĉi tie spektos. Prefere atentu la lecionon, kiun oni al vi donos kiel ekzemplon, el kiu vi eltiros la koncernan moralon por ĝin al vi mem apliki... ĉar al vi estos utile memori, ke vi ĉiuj estas defalintaj animoj, kiujn per la inicado pri principoj de nobla, elaĉeta moralo, oni klopodas enkonduki en la templon de la Devon!"

Li ekstaris kun brakoj levitaj al la Senfino en preĝoteniĝo kaj fervora koncentriĝo. Liaj asistantoj lin ĉirkaŭis por mense kunhelpi liajn intencojn. Ekestis potenca fluideca fluo, envolvanta en fortaj ondoj la kunsidantajn pekulojn, kiuj restis atentaj kaj respektemaj. Subite aŭdiĝis stranga ordono en energia tono, kiu ne permesus elturniĝon!

Epaminondo el Vigo trudis al Amadeo Ferrari la revenon en la pasintecon, tio estas, detalan memekzamenon kun pririgardo al liaj faroj dum pasintaj surteraj migradoj, por ke li komprenu en ĝia tuta pleneco la kialon de la laste travivitaj doloraj cirkonstancoj, pri kiuj li ne rezignaciis kaj por kies solvo li ankoraŭ pli multe ŝuldiĝis per malhonesta konduto kaj per memmortigo!

Tiel okazis, ke, en retrospektiva direkto, deire de la memmortigo al la komenco de lia vivo, ni lin trovis en tre malsamaj kondiĉoj! Estis ja vere do, ke radikis en antaŭa enkarniĝo la kaŭzoj de tiu malriĉeco, kies malpliakrigo spitis ĉiujn liajn klopodojn, ĉar Amadeo ja estis obstine laborema kaj volforta; de tiu kancero, kiu lin torturadis per nevenkeblaj ungegoj kaj malrapide formordis al li la langon kaj la gorĝon; de tiu amrifuzo, kiu konsumis liajn lastajn fortojn, lin definitive senigante je la deziro pluvivi!

Forŝoviĝis la kurteno de la nuno... Leviĝis la unua vualo de la konscienco, por ke, en la scenejo de alia surtera ekzistado, malkaŝiĝu ampleksega dramo, kies sekvoj atingis ne unu aŭ du

personojn sed ja tutan kolektivon, al kiu apartenis heroa, suferplena raso!

Amadeo Ferrari aperis al ni tia, kia lin montris lia menso, nome kiel transportisto de negraj sklavoj, el Angolo en Brazilon, en la jaro 1840... Tiam li havis la portugalan naciecon, de kio venis la altiriĝemo inter li kaj ni. Per multaj sinsekvaj vojaĝoj li riĉiĝadis ĉe tiu abomeninda komerco, ne ŝparante al si penojn en la fia ambicio reveni al la metropolo kiel milionulo, kaj tiucele li trudadis sennombrajn turmentegojn al la mizeruloj, kiujn li forrabis en ties patrolando kaj vendis kiel sklavojn al liaj malnobluloj, komplicantaj kun li en la samaj frenezaj ambicioj! Sub la regado de sovaĝaj, malhumanaj inklinoj, li satiĝis je la brutala traktado kontraŭ la negroj, kiujn li skurĝigis pro plej sensignifa aŭ eĉ pro nenia kulpo, al ili trudante punojn, kies kruelegeco kriegis al la ĉielo, kiel malsato kaj soifo, torturado kaj apartigado disde la familio, ĉar jen li ĉi tie vendis gefilojn, tie la patrinon, aliloke la patron... kiuj denove renkontiĝis nur en la Transmondo tial, ke multaj el tiuj malfeliĉeguloj mortis pro nostalgio kaj resopirado al amataj estuloj! Iam en sia bieno li seksperfortis junan negrinon apenaŭ elirintan el la infanaĝo. Kaj ĉar la malfeliĉa patro de la mizerulino, maljuna sesdekjara sklavo, en momento de ekstrema malespero, freneza de doloro antaŭ la kadavro de la filino, kiu per la morto celis kaŝi la ŝin obsedantan honton, laŭte riproĉis lian malnoblan agon, lin akuzante pri la memmortigo de la junulino, Amadeo ordonis al kruelegaj submastroj bruligi la langon de la maljunulo per ruĝarda fero ĝis li falis tute senforta, en la konvulsioj de la agonio...

Dum ni instruiĝis per la grandioza leciono, la paciento vidis sin tia, kia li estas: portanta malnoblajn pasiojn, plurajn neperfektaĵojn, grandajn malmeritojn, kaj li senbride baraktis, kaptita de nepriskribeblaj konvulsioj, senkuraĝigita antaŭ la hontego, kiun al li kaŭzis la konscienco, konsternita pro la torturantaj rimorsoj.

"– Kompatu min, Sinjoro! – li kriegadis, esprimante doloron kaj penton, ripetante la varmkoran peton lin kondukintan al tiu kulpelpaga ekzistado, kiun efektive li krime interrompis, lasante sin impliki en konsternajn kompleksojn. – Malfeliĉega kaj mizera mi estas! Konsentu, ke mi ankoraŭfoje revenu en la homan naturon kaj vidu mian langon same kiel miajn buŝon kaj gorĝon detruiĝi muelitaj de ia ajn malbono, difektitaj tiel same kiel mi iam difektis tiujn de la malfeliĉa sklavo Felicio... Donu al mi la mizeron, Sinjoro! Mi suferu la turmenton de la malsato, de la soifo, kaj mi eĉ ne kapablu paroli por ne ellasi plendojn! Ĉiuj foriru de antaŭ mi kun naŭzo, lasante min sola elviŝi tiun malhonoran makulon, kiu min malaltigas antaŭ mi mem!..."

Sed la nobla mentoro silentigis la pekulon, fluigante sur lin balzamajn, kvietigajn emanaĵojn. Kaj kvazaŭ responde, li poste klarigis:

"– Estas ja certa, neevitebla, via reveno al la kulpelpagaj reenkarniĝoj, Amadeo Ferrari! Ĉar tio prezentas la benatan oportunon por ke kulpuloj elaĉetiĝu! Denove la malriĉeco, la kancero, la ĵurrompo... sed ĉi-foje ŝarĝitaj per la neesprimeblaj suferoj, kiujn memmortigo kuntrenas... ĉar vi ja ne volis laŭdeve submetiĝi... Sed estas nepre necese, ke vi ne faru al vi iluziojn: vi bezonos pli ol unu kulpelpagan reenkarniĝon por ripari la pligravigajn sekvojn de la ĵus rememoritaj agoj..."

Dume la leciono plu malvolviĝis, kies fino ankoraŭ pli terurige konsternis nin:

Pasis la jaroj post la morto de la maljuna sklavo...

La ĉiopova sinjoro lin, kiel ankaŭ la ceterajn, forgesis, plene ĝuante la luladon de la fortuno... Li revenis feliĉa al Eŭropo, riĉiĝinte pro "honesta laborado", ŝatata kaj respektata pro la multaj havaĵoj kunportitaj el la Lando de la Sankta Kruco...

Sed... unu tagon oni lin prifunebirs: – solenaj ceremonioj, kortuŝaj kantoj, profunda malĝojo, doloraj larmoj kaj multe

da floroj... ĉar ĉion ĉi tion povis aĉeti la malŝatinda, malnoble akirita oro!

Jen leviĝas antaŭ li la Transtombo! Sonas la sankta horo de la realo, de la senmanka plenumiĝo de la Nekoruptebla Justeco! Kaj ni vidis lin baraktanta, perdita en la sino de la afrikaj savaĝregionoj, persekutata de abomena legio da nigraj fantomoj soifantaj justecon, kiuj de li postulis respondecan kalkulon pri siaj malfeliĉegaj samlandanoj, kiujn li por ĉiam sklavigis kaj de ili disigis for de ties naskolando! Tio estis patroj perdintaj siajn filojn, kiujn li forsendis malproksimen... Patrinoj senigitaj je siaj etaj infanoj, kiujn li vendis kiel malŝatindan varon! Filinoj malhonorigitaj kaj oferitaj for de la gepatroj, filoj kiuj, anstataŭ patrinajn karesojn, ricevadis la senkompatan skurĝadon de siaj mastroj! Ĉiuj postulis de li kalkulon pri la suferitaj turmentoj! Lian Spiriton ili malliberigis en la sino de hororaj arbaroj, kie ili lin turmentegis, lin terurigante per la reprodukto, ekstraktita el lia memo, de la kruelaĵoj, kiujn li faris al ĉiuj! La silento de la arbaro, kiun nur hororaĵoj interrompis; la senŝanĝa mallumego, la blekado de l' sovaĝaj bestoj, la senĉesa akuzado de la rimorsoj, la kolero kaj la ululado de la fantomoj, alternante kun ĉiuj aliaj kaŭzoj de timego, fine frenezigis lin. Tiam oni lin forlasis, tute senprotekta, kiel kaptitaĵon de li mem, de la fiaĵoj, kiujn li faris kontraŭ siaj fratoj, kiuj, kiel li, estas filoj de la sama Kreinto kaj Patro, havas la saman Senmmortan Esencon! Malsato, soifo, mil nepre kontentigendaj bezonoj kuniĝis pro lin ankoraŭ pli suferigi, ĉar li ja restis katenita al bestecaj instinktoj kaj malsuperaj inklinoj... Li malespere vagadis, kaptita de la plej absurdaj halucinoj, turmentegata de la menso, kiu sin nutris nur per malbono! Al ĉiu petego, kiun li provis eldiri, aŭdiĝis, kiel sinistra respondo, la plorado de la sklavoj mortantaj pro resopiro, disigitaj for de siaj karuloj! Se iu petego pri indulgo ellasiĝis, ĉe la konfuziteco de l' frenezo, tiam lin trafis la sono de vipado sur la nuda dorso de la negroj sklavigitaj en lia Bieno aŭ sur la profanita brusto de mizeraj sklaivnoj, kiuj mamsuĉigis liajn filojn, ĉi tiujn

ame nutrante, dum por iliaj filoj oni rezervis malsaton kaj malbontrakton! Ĉe unu lia rimorsa plorĝemo, aŭdiĝis la agonia lamentado de iu, kiu mortiĝis ĉenligita al la biena pilorio... ho! la lasta kriego de tiuj mizeraj suferantoj, kiuj naive sin ĵetis en la akvujojn, en la rivertorentojn, terurpelataj de la kruela traktado!...

Tiam Amadeo foriĝis en freneza kurado tra la sovaĝaj densejoj, kaptita de la plej konsterna spirita frenezo! Sed kien ajn li sin turnis, ĉu kuregante sub la jarcentajn branĉarojn de majestaj arbaroj aŭ en kotajn marĉojn, ĉu irante sur dornoplena vojo aŭ en danĝera liandensejo, ĉie li renkontis siajn viktimojn plorantaj, agoniantaj, malesperantaj...

Sed iun nokton, post multe da jaroj, kiam li, sub la plena regado de la teruro, sentis sin lackonsumita, jen li vidas, en iu vojeto subite malfermiĝanta antaŭ li, la sklavon Felicion venanta renkonte al li kaj portanta brilegan torĉon, kiu heligante la mallumegan vojon, ebligis al li sin orienti... Felicio, pasante malrapide, mienis serene, grave, ne plu turmentate de ruĝarda fero, sed ja kompateme, kun la dekstra mano etendita por lin restarigi:

"– Venu, "Nhonhô" [1], stariĝu... Ni foriru de ĉi tie..."

Li sekvis Felicion... Kaj dum la disvolviĝo de tiu intensa dramo, ni komprenis, ke la maljuna sklavo pardonis sian iaman torturinton, propetis la Dian Indulgemon por li... kaj venis por provi liberigi lin el la manoj de tiuj, kiuj ne pardonis lin...

Kaj ĉion ĉi ni emociplene spektis, kvazaŭ ni mem estus travivintaj tiujn scenojn, dank' al eksterordinaraj, profundaj kapabloj, kiujn la homo ankoraŭ ne konas, esence propraj al la ne enkarniĝinta Spirito, kapabloj, kiuj igas ĉi tiun suferi, senti, kompreni, impresiĝi, kortuŝiĝi, ĝoji ktp, ĝis plej alta grado, kiu fulmobate mortigus la enkarniĝintan estaĵon, se al ĉi tiu eblus provi atingi ĝin. Dum tiu dramo disvolviĝis, la majstro eldiris

[1] Brazila karesnomo por sinjorido. Elparolu "njonjo". – *(Noto de la Trad.)*

konsiderojn, per kiuj elmontriĝis la psikologiaj trajtoj de la prezentitaj personoj, kaj tiel li saĝe instruis la admirindan tezon sub la inspiro de tiu Sankta Scienco, pri kiu ni tiam iniciĝis! Kaj kiel finon al tiu serio da mallongaj paroladoj motivitaj de la spirita pasinteco de Amadeo, li, severa kaj flamanima, per tiu energia tono tiel bone karakterizanta karakteron, kiu alfrontis la torturon per fajro pro amo al la Vero, aldonis:

"– La brazila socio, miaj karaj disĉiploj, suferas hodiaŭ kaj ankoraŭ suferos dum spaco da tempo, kiun ĝi povos plilongigi aŭ malgrandigi, la sekvojn de maljustaĵoj, kiujn en plena kristana erao ĝi permesis efektiviĝi en sia sino. Mi aludas, kiel vi bone komprenas, la sklavigon de homoj, kiujn ĝi traktis pli rigore ol la malsuperajan bestojn, por havigi al si la ĝuadon kaj regadon de la pasioj! Ĉar tio estis krimo ne individua, sed ja kolektiva, tial la kolektivo elpagos kaj riparos la grandan malhonorigon, la grandan turmentadon truditan al raso, kiu bezonis la fratan protekton de la kristana civilizacio, por ankaŭ gloriĝi per la promesdona edukado inspirita de la Bona-Novaĵo de l' Regno de Dio! Sub tiu ĉielo portanta la grandiozan simbolon tiel de la Inicado, kiel ankaŭ de Kristanismo – nome la Krucon –, ankoraŭ aŭdiĝas, dolorplene resonante en la Spirita Mondo, la korŝiraj kriegoj de miloj da turmentataj koroj, kiuj dum la pasado de la jardekoj afliktiĝis kiel viktimoj de tiela humiligo! Ĉiam ankoraŭ eĥas, en la delikatja ondoj de la etero, kie sidas la spiritaj sferoj protektantaj la homajn sociojn, la tragedia bruado de la skurĝoj, per kiuj rabiaj, satanaj submastroj batadis sendefendajn virojn kaj virinojn, kies larmoj, senmanke rikoltitaj de la Nekoruptebla Justeco de la Ĉiopova Eternulo, estis poste, konforme al Lia leĝo, disverŝitaj sur tiun saman kriman kolektivon, ke ĉi tiu siavice ilin trinku dum estontaj suferoj cele al tio, ke ĝi elpuriĝu el siaj malicaj kaj malhonoraj faroj! Pro tio la granda sudamerika Lando nuntempe baraktas kontraŭ kompleksaj problemoj, ĝiaj socioj travivas dolorajn luktojn en sia propra sino, trafitaj de akumuliĝintaj malbonoj, kiuj ilin konsternas. Iliajn elstarajn

poziciojn nun okupas la hieraŭaj opresatoj, dum forlasitaj al la indiferenta traktado de la pli favorataj klasoj, kurbigitaj sub la premo de kolektivaj suferoj, restas la iamaj nesingardemaj fieruloj, kiuj en la oportuna tempo ne sin nutris per la ekzemploj de la Ĉiela Sendito, malŝatante la saĝan konsilon frate konduti kontraŭ siaj simululoj, la singardan sintenon semi amon por rikolti favorkorecon en la tago de la Ekstrema Juĝo! Kaj tiel ili restos ĝis la Ĉiela Voĉo de la Senditoj de l' Sinjoro ilin kvietigocele konduku al la sublima laboro de la propra repaciĝo pro amo al la Kristo de Dio! Ho vi, disĉiploj, kiuj vidas la dramojn – iaman kaj nunan – travivitajn de Amadeo Ferrari! Ho vi, kiuj spektis lian paseon kaj lian nunon, kronitan per kontraŭefika memmortigo, pri kiu li ankaŭ donos respondecan kalkulon al la Sinjoro de la Vivo kaj de la Ekzistaĵoj! Sciu, ke inter la sklavoj, kiuj sub la ĉielo de la Sublima Kruco ploraids, kurbigitaj sub ekscesa laboro, malsataj, ĉifonvestitaj, malsanaj, tristaj, sopiregantaj, senesperaj antaŭ premego, laceco kaj krueleco, ne ĉiuj portis en sia interno la karakterizaĵojn de la malsupereco, kiel ĝin multfoje pruvis fidindaj atestintoj; ne ĉiuj prezentis primitivajn karakterojn! Multnombraj legioj da eminentaj romianoj el la imperio de l' Cezaroj; da orgojlaj patricioj, da fieraj militistoj, da aŭtoritatoj el la kortegoj de Diokleciano, Hadriano kaj Maksenco, dolore pentintaj la amason da monstraj maljustaĵoj faritaj en nomo de la Forto kaj la Povo kontraŭ pacamaj adeptoj de la senpeka Ŝafo, petis pri reenkarniĝoj en la malgaja kaj malfeliĉa Afriko, por atesti pri siaj novaj streboj pere de decidaj kulpelpagoj kaj tiel skurĝadi la senmezuran orgojlon, kiun la potenca romia gento akiris per siaj falsaj gloroj ĉe la malŝata nuligado de aliulaj digno kaj rajtoj! Ĉiam ankoraŭ kuraĝaj kaj fortanimaj, ili petegis pri novaj konkeroj! Sed nun la batalo estos kontraŭ ili mem, kontraŭ la noca orgojlo, kiu ilin ruinigis! Ili petegis pri karna maskovestiĝo en nigraj envolvaĵoj, kvazaŭaj elaĉetaj armaĵoj, kiuj al ili malebligu ĉian reagon kaj permesu hisi en siaj konsciencoj la blankan pacostandardon,

respektegindan flagon signantan la riparadon de la malbono! Kaj la sklavigintoj de tiom da popoloj kaj dignaj generacioj; la malhumanaj mastroj de la surtera mondo, kiuj ridegis dum la turmentatoj ĝemadis; kiuj sin regaladis per la turmentego kaj la senkulpa sango de la kristanoj, elviŝis en la Afrika sklaveco la makulon, kiu al ili nigrigis la Spiriton!

De tio venas, miaj karaj disĉiploj, la dolĉa, eĉ sublima rezignacio de tiu afrika gento ĉial inda je nia admiro kaj respekto; la heroa pasiveco, kiu ne ĉiam radikis en la neklereco aŭ en la senkapableco pro malmulta progreso, sed ankaŭ fontis el la arda kaj sublima strebado al la spirita rehonorindiĝo! Kaj sciu ankaŭ, ke la sklavo Felicio, kiun vi ĵus rigardis kiel simbolon inter ĉiuj, sin elaĉetinte, kiel multaj aliaj, el serio da abomenaj kulpoj, kiujn li faris kiel aŭtoritato sub la ordonoj de Hadriano, revenis, post sia senŝuldiĝo ĉe la afrika gento, al Romo, kiel Spirito, denove aliĝis al sia malnova itala legio kaj...”

Neretenebla murmuro de konsterna surprizo skuis la konfuzitan kunsidantaron el pekuloj, kiam Amadeo Ferrari falis sur la genuojn, ellasante krion, pri kiu ni ne kapablus distingi, ĉu ĝi estis ankaŭ pro surprizo, aŭ hororo, aŭ ĝojo, honto aŭ ia ajn alia nedifinebla sento, kiun spertas nur estuloj en liaj bedaŭrindaj kondiĉoj, dum intensega ploro lin skuadis per nepriskribeblaj konvulsioj:

Ĉe signo de Epaminondo, flanka prodo silente malfermiĝis, kaj Felicio, serena, gravmiena, ekaperis kaj alpaŝis sian iaman sinjoron en pasintaj ekzistadoj... Terurigite, Amadeo, kiu nun jam reakiris la memoron pri sia tuta spirita pasinteco, rigardis lin kun timemaj okuloj... Sed malrapide kaj neperceptele Felicio transformiĝis sub la efiko de la volo, kiu facile agas sur la figuron de la spirita envolvaĵo, kaj nun li sin montris kun sia nuna eksteraĵo de Romulo Ferrari, la patro de Amadeo!

Realiĝinte al la legioj, al kiuj li apartenis, Felicio reenkarniĝis inter ili, celante daŭrigi sian iradon direkte al la definita elaĉeto, sub la aŭspicioj de tiu Milda Nazaretano, kies adeptojn li

persekutis en la tempo de Hadriano! Tiam komenciĝis pro li nova fazo de progreso, dum kiu li ricevis novan nomon. Ankoraŭ juna, li translokiĝis al la Lando de la Sankta Kruco, pelate de nedifinebla altiriĝemo, kie li fondis familion kaj kompateme konsentis fariĝi la patro de sia iama turmentinto...

Nun li sendube ĉiam ankoraŭ helpos Amadeon forviŝi el la konscienco novan kulpon, nome la memmortigon!

Kiam ni, enpensiĝaj kaj silentaj, eliris el la Sanktejo, kie, kiel unua leciono, al ni estis malkaŝita tiel sublima mistero, resonis en la intimaj faldoj de nia Animo ĉi tiu profunda, nepriskribebla impreso:

– Ho Dio Favorkora! Laŭdata vi estu, ke Vi al ni donis la Leĝon de Reenkarniĝo!...

# Ĉapitro IV
## La “malnova homo”[1]

Ni multfoje revenis al la Tero, en kies socioj ni restis, kun malgrandaj intertempoj en la Transmondo, ekde la komenco de la jaro 1906. Tien vokis nin multoblaj devoj. La Tero prezentis vastan kampon por niaj pli fruktodonaj spertoj, ĉar, devante renaskiĝi ankoraŭ multajn fojojn en ties arenoj, grandan utilon ni havigus al ni, praktikante inter niaj fratoj per la homaro la instruojn, kiujn ni grade ricevis okaze de la Transmondaj laboroj. Tiel, sub la zorgo de Hanibalo de Silas, sed praktike gvidataj de la jarcenta sperto de Souria-Omar, ni plivastigis la servojn de bonfarado, komenciĝintajn sub la direktado de Teokrito, multobligante la klopodojn pro helpi suferantajn korojn sub la dolĉaj inspiroj de la mesiaj lecionoj, ĉu ni ilin trovus ankoraŭ katenitaj al la karno, ĉu dronintaj en konstanta luktado en la Nevidebla Mondo. Ni servadis tie en la fakoj por urĝa helpo de la Kolonio, kiel ankaŭ en la Hospitalo Maria el Nazareto kaj ties filioj; aliĝis al karavanoj por helpo al kompatindaj sinmortigintoj, kiuj perdiĝis en la solejoj de la malsupera Nevidebla Mondo aŭ en surteraj abismoj, persekutataj de legioj da obsedantaj Spiritoj;

[1] Efesanoj, 4:22.

sekvis niajn majstron el la Viglado, de kiuj ni lernis, kiel ĉasi timegindajn ĉefojn de mistifikemaj legioj, kiuj, persekutante mizerajn mortemulojn, ilin multfoje instigis al memmortigo; ofte vizitadis kunvenojn aranĝitajn de disĉiploj de Allan Kardec, kun kiuj ni kunlaboris proporcie kiel ili ĝin permesis al ni; helpis multajn suferantojn, kiuj, kvankam ne konantaj la spiritismajn ideojn, tamen vere bezonis helpon; envenis prizonojn kaj hospitalojn; penetris en mornajn regionojn de la brazila kaj afrika landinternoj, celante kuraĝigi kaj materiale helpi malfeliĉajn kaptitojn de malbona spirita pasinteco, kiuj tiam luktadis ĉe revirtigaj provoj en karnaj envolvaĵoj difektitaj de la lepro, humiligitaj de la demenco aŭ stampitaj per mutilo; kaj ni eĉ invadis la domojn de la surteraj altranguloj, kie ankaŭ svarmis la eblecoj de intensaj doloroj aŭ de danĝeraj okazoj por la peko de l' memmortigo, malgraŭ la fiktivaj gloroj, kiuj ilin ĉirkaŭis! Kaj ĉien, kie troviĝis viŝendaj larmoj, lacaj koroj refortigendaj, aŭ admonendaj animoj, kiujn la suferoj ŝancelis kaj senkuraĝigis, tien nin kondukis Hanibalo de Silas, celante konigi al ni la instruojn de la Modela Majstro, per kiuj ni lernos praktiki la subliman apostoladon de la Frateco!

Ĉu malkaŝaj, pere de la mediuma kunlaboro organizita por superaj celoj, ĉu kaŝitaj, obskuraj, pere de diversaj agadoj, kiujn ne eblas rakonti en ilia tuteco, niaj aktivecoj multobliĝis dum multaj jaroj sur la diversaj kampoj de la Karitato; kaj, kvankam pli ol unu fojon spitemaj afliktoj surprizis nin ĉe la kontakto kun aliulaj afliktoj, ni tamen ankoraŭ pli multajn fojojn ricevis dolĉajn konsolojn, konsciante, ke nia bonvolo kunhelpis por tio, ke ies aŭ alies larmo sekiĝis, ke unu aŭ alia mizerulo envolvis siajn proprajn afliktojn en la sanktajn inspirojn de la Espero, ke tiu kaj tiu alia koro varmiĝis ĉe la sanktega lumo de Amo kaj Fido, kiujn ni same lernis respekti!

Post ĉiu leciono de la Evangelio de l' Sinjoro, elvolvita de la juna profesoro, post ĉiu studita ekzemplo de la Neforgesebla Majstro, sekvis niaj atestoj ĉe la praktikado inter la homoj kaj la

malfeliĉaj suferantoj, same kiel analizoj helpe de temoj, kiujn ni poste devis disvolvi kaj prezenti al ekzamenkomisiono, kiu siavice kontrolis nian progreson kaj komprenon pri la lernobjekto. Tial ni ofte verkis tekstojn bazitajn sur noblaj temoj inspiritaj de la Evangelio, de la Moralo, kiel ankaŭ de la Scienco, nome romanojn, poemojn, raportojn ktp, ktp. Tiujn laborojn ni rajtus dikti aŭ malkaŝi al la homoj, en la okazo se ili estus aprobitaj, tio estas, se, pro sia karaktero eduka kaj instrua, ili estus utilaj al la homa revirtiĝo. Tion ni farus helpe de mediuma perado, en la kadro de ia filozofia kredo, aŭ de sugestoj kaj inspiroj blovataj en iun ajn seriozan menson kapablan kapti niajn ideojn pri moraligaj aŭ instruaj temoj. En okazo de malaprobo, ni devus ripeti la provojn tiel longe, ĝis ni sukcesos plene konformigi la temon ne nur al la Vero, kiun ni kredis, sed ankaŭ al la esprimoj de la Arto, kiujn ni ne povus preterlasi.

La tagoj dediĉitaj al tiuj ekzamenoj havis festan karakteron en la tuta Urbo Espero. Kiel veraj konkursoj pri ia Sankta Arto nome tiu pri Bono, tiuj kunvenoj elspiris ian ĉarmon, superantan ĉian koncepton, kiun ni iam faris al ni pri la belo! Tiam la gardistinoj klopodis por ornami la lokojn per dekoracio, kiu ankaŭ prezentis aranĝojn kaj efikojn de transcendaj lumoj, nepriskribeblaj por la homa lingvo, dum eminentuloj de nia Kolonio, nome Teokrito, Ramiro de Guzman kaj Hanibalo de Silas, sin montris kiel artistoj portantaj superegajn talentojn, tiel en literaturo kaj muziko kiel ankaŭ en la bildiga retoriko, tio estas, en la mensa prezento, pere de imagoj, de siaj propraj verkoj. El aliaj najbaraj sferoj descendis frataj karavanoj por doni artisman kaj konsolan brilon al niaj provekzamenoj. Figuroj, kies nomoj sur la Tero estas eldirataj kun respekto kaj admiro, bonkore ĉeestis por kuraĝigi nin al la progreso, kreskigante en niaj tre humilaj koroj la deziron daŭrigi la esperdonajn batalojn. En tiaj kunvenoj ne mankis eĉ la genia instigo de tiaj figuroj, kiel Viktoro Hugo kaj Frederiko Ŝopeno. Ĉi tiu lasta estis rigardata, en la Spirita Patrolando, kiel sinmortiginto pro sia

malzorgo kontraŭ la propra sano, kaj ambaŭ, same kiel multaj aliaj, kies nomoj ankaŭ surprizus la leganton, konkretigis la magion de siaj pensoj, plipotenciĝintaj pro la akiroj dum longa restado en la Transmondo, pere de kreaĵoj neesprimeblaj por la nuntempa konceptado de l' homo! Ni tiel havis la okazon aŭdi la grandan komponiston, – kiu sur la Tero travivis pli ol unu karnan ekzistadon, ĉiam dediĉante siajn plej bonajn mensajn energiojn al la Arto, al la Beletro – esprimi sian muzikon pere de imagoj kaj rakontoj, en konsterna varieco de temoj, dum la genio de Hugo montris, per netakseble belaj kaj instruaj lecionoj, la mensan realecon de siaj literaturaj kreaĵoj! La potenca kreivo de tiu intelekto, kiun la Tero ankoraŭ ne forgesis kaj kiu al ĝi denove revenos por servado al la Vero laŭ surprize mirinda inspiro, en vera artisma misio por la gloro de Tiu, Kiu estas la Superega Belo, ravis ĝislarme nian sentemon, levante nin en adoradon al la Dia Estaĵo eble samfervore kaj samaltire kiel faris Hanibalo de Silas kaj Epaminondo el Vigo per la Evangelio de la Elaĉeto kaj de la Scienco. La penso de la granda Hugo, kiun vivigis la efiko de la realo, konkretiĝis en tia maniero, ke ni povis ĝuste ekkoni la belegajn nuancojn de liaj emociaj vibroj transformiĝintaj en ravajn temojn rilatajn al la epopea progreso de la Spirito per surteraj migradoj kaj restadoj en la Nevidebla Mondo, kio montris, ke ankaŭ li kunlaboradis por nia reedukiĝo. Tiam surprizis nin la sciigo, ke la genio de Viktoro Hugo manifestiĝis sur la Tero jam de multe da jarcentoj, komence en Grekujo, poste en Italujo kaj Francujo, ĉiam lasante post si luman strion je supera kulturo kaj Arto. Pro tio, lia Spirito estas honorata de multaj generacioj kaj al li plenmerite apartenas la gloro, kiu lin kronas en intelektaj sferoj. Kaj Ŝopeno, nekontenta animo, kiu nur nun komprenis, ke ĉe la humila ĉarpentisto el Nazareto li trovos la sekreton de la sublimaj idealoj, kiuj povos lin satigi, prezentis al ni, per miregindaj esprimoj de ravega muziko, transportata el la magio de l' sonoj en la splendon de l' konkreta realo, la draman poemon pri siaj surteraj migradoj, el kiuj unu

okazis antaŭ la alveno de la Granda Sendito, jam dediĉita al la Arto, dum kiu li kulturis la Beletron kiel neforgesebla poeto, vivante, en plena imperio de l' forto, en la cezara Romio!

De nia flanko, la plenumotaj provekzercoj devus same esprimi niajn mensajn kreaĵojn per imagoj kaj scenoj, kiel procedis niaj mentoroj kun siaj lecionoj kaj ankaŭ niaj ĝentilaj vizitantoj. Por tiu celo ni disponis la helpon de teknikistoj komisiitaj por la delikata tasko, ia skipo da eminentaj sciencistoj konantaj la sekreton pri la kaptado de la penso en tiujn supre diritajn transcendajn aparatojn. Kelkaj mediumoj, ĝuantaj la plenan konfidon de nia Instruisto, estis kondukataj, sub la protekto de siaj Spiritaj Gardantoj, en tiujn seancojn, kaj tie ili malfacile duonvidis tion, kio al ni montriĝis laŭ sia tuta beleco! Por ili tio estis kvazaŭ ia stimulo al la mediuma laborado, al kiu ili sindevontigis antaŭ la reenkarniĝo, la instruado apartenanta al la reedukprogramo konvena al ilia progreso kiel interpretistoj de la Nevidebla Mondo, kaj ia rimedo malpli komplika por ilin prepari al tiuj plenumoj, kiujn ni celis kiel lernantoj. Tiam flamigis nin sankta entuziasmo pro tio, ke ni rigardis kiel facilan taskon malkaŝi al la homoj tiujn novaĵojn, kun kiuj ni konatiĝis, ĉar ni estis konvinkitaj, ke oni tuj bonvole akceptos niajn klopodojn por sincere informadi. Sed ni ne prenis en kalkulon tiun konsternan embarason, nome la malmultan deziron flanke de la mediumoj, sincere sin dediĉi al la kristanaj idealoj, kiujn ili supozas defendi, tamen restante malvolontaj por eĉ unu sola rezigno; malinklinaj al la altaj studoj nepre farendaj por ĉiu, kiu sin rigardas inicito; moligitaj en la senintereso pri la revirtigo de si mem kaj de siaj similuloj, pri kiuj ili havas la sanktan devon ilin ŝirmi kontraŭ la nescieco pri la spiritaj aferoj, ĉar por tia celo ili ja estas dotitaj per konvenaj kapabloj; kaj, pro malagordiĝo al si mem kaj al la lumaj sferoj, ili esprimas nenion alian ol efikojn de siaj propraj mensoj, personajn opiniojn, kun la konvinko, ke ili interpretas la penson de la Spiritoj, dum en multaj okazoj la vero postulas aserti, ke ili nenion faris por meriti

tiun altan komision, eĉ ne moraligis sian propran menson! Tial ni kun profunda malĝojo atestas sur ĉi tiuj paĝoj, kiujn ni skribis kun la plej fervora deziro esti utilaj, pri la bedaŭro de ĉiuj, kiuj, laborante en la Transmondo por la bono de la homaro, konstatas la malzorgemon de la plimultaj mediumoj, iliajn tre malfortajn penojn por kontraŭstari tiel la logojn, kiel ankaŭ la nenifaremon proprajn al la materia vivo, dekliniĝante de la urĝa devo seniĝi je multaj inklinoj malutilaj al la sublima mediuma misio, de kiuj la dolĉega parolo de la Bona Paŝtisto ankoraŭ ne sukcesis ilin liberigi! Kaj ni profitas tiun digresion por elstarigi la fakton, ke ja la mediumoj mem bedaŭrinde malfaciligas la agadon de la instruantaj Spiritoj de nia planedo, ĉar multaj mediumaj aparatoj, bonegaj laŭ sia fizika-psika strukturo, falglitas en ostracismon kaj neproduktivon koncerne seriozajn rezultojn, dum ĉirkaŭe akumule pligrandiĝas la servoj de la Sinjoro por manko de bonaj surteraj laborantoj kaj la homoj baraktas en la mallumo, en plena jarcento de lumo, irante sencele pro manko de spirita pano, malsatante la lumon de la Scio, soifante tiun Vivan Akvon, kiu povus sensoifigi al ili la animon senkonsolan kaj tristan pro la amasigo de malfeliĉoj!

...........................................................................................................................

Du plej gravaj okazaĵoj absolute ŝanĝis certajn detalojn de iu situacio, kiu daŭre restis malklara kaj senvolva, kvankam ilin apartigis la intertempo de du jaroj.

Estis unu el tiuj festaj tagoj, kiam oni enlasis vizitantojn.

En la hieraŭo, oni antaŭsciigis nin, ke la internuloj ricevos la viziton de siaj karaj "mortintoj", nome familianoj, karuloj jam elkarniĝintaj. Sed, senatentaj al tiu movado, ni ĝin supozis, kiel aman elmontron destinotan al tiuj pli malnovaj ol ni en la lernado ĉe la Instituto. Ni tial limigis nin je la espero, ke iun tagon ankaŭ venos nia vico revidi la niajn.

Bonkoraj kaj karitataj kiel ĉiu virino, kies morala edukado estis inspirita de la dia idealo, la gardistinoj aranĝis la parkojn

por la granda akcepto okazonta en la sekvanta tago, tiucele utiligante la tutan kapablecon, kiun ili posedis, kaj kun artisma talento ili kreis lokojn dolĉegajn por nia sentemeco, intimajn angulojn, kiuj nin ravis, ĉar ili elvokis niajn plej karajn rememorojn tiel el la infaneco kiel ankaŭ el la junaĝo, kiam la malesperoj de la ekzistado ankoraŭ ne trinkigis al ni la fatalan kalikon de amaraĵoj. Tiajn kreaĵojn ili proponis al ni kiel agrablajn surprizojn, ke en ili ni povu akcepti niajn alvenantajn parencojn kaj amikojn. Starigitaj sub la libera ĉielo, tio estas, dissemitaj sur la parkoj kaj ĝardenoj, kiuj abundis en la urbo; ĉe la bordo de serenaj lagoj, sur la deklivoj de ĉarmaj montetoj, kiuj ŝajnis trembrili pro milda irizado ĉe la nedifinebla reflekto de multkolora lumetado, tiaj lokoj ne longe daŭris, provizore ekzistis nur dum la tempo, kiam ni ankoraŭ bezonus komprenemon kaj konsolon. Multaj el ili rebildigis la patran domon, tiun sanktan lokon, en kiu pasis nia infaneco kaj ekfloris niaj vivospiroj, niaj unuaj esperoj, kaj kiun tiel varme rememoris kaj sopiris tiu, kiu nur mallumon kaj malesperon renkontis, translokiĝinte en la Transtombon. Unuj memorigis pri scenejoj konstruitaj ĉe la dolĉeco de la geedza amo: ia angulo de ĉambro, ia florplena verando, dum aliaj prezentis certan pli karan pejzaĝon de la naskolando: iun gracian ponton, impresan lokon de plaĝo, iun konatan aleon, kiun ni multfoje trairis en la protektata brako de niaj patrinoj...

Estis do en la scenejo de la domo, en kiu mi naskiĝis, ke mi havis la neesprimeblan ĝojon revidi mian karan patrinon, kiun ankoraŭ kiel infano mi vidis morti kaj esti entombigita. Kiel iam, mi kisis al ŝi la manojn kaj plorĝemante min ĵetis en la protektajn brakojn de mia maljuna patro, faciligante la bruston el sopirego, kiu neniam elviŝiĝis el mia koro ĉiam turmentata de nekomprenemo kaj mil aliaj malfavoraj motivoj.

Mi revidis mian edzinon, kiun la morto forprenis el mia destino dum la plena revado pri feliĉa geedzeco, kaj kiun mi de longe estus povinta renkonti en la Nevidebla Mondo, se mi ne

ribelus per tiel pereiga ago! De ĉiuj mi ricevis karesajn admonojn, altvalorajn konsilojn, elmontrojn de ĉiama korinklino, kaj mi rimarkis, ke neniu de mi postulis kalkulon pri la malordo, kiun la pasioj kaj la suferoj trudis al mia vivo! Mi ilin akceptis kvazaŭ ni troviĝus en la iama surtera hejmo: la samaj mebloj, la sama interna dekoracio, la sama aranĝo de la hejma domo, kiun mi tiel bone konis... ĉar Rinjo de Cassia kaj Doris Mary ĉion laŭcele preparis, por ke en mia koro daŭru senfine la sanktegaj impresoj pri la veraj familioligiloj! Ambaŭ poste asertis, ke mi mem nekonscie liveris la elementojn por tia realigo, ĉar niaj majstroj, kiuj, krom instruistoj kaj edukistoj, ankaŭ estis veraj agentoj de la Karitato, ekzamenante niajn pensojn kaj plej karajn rememorojn, malkovris tion, kio plej agrable tuŝus al ni la koron, kaj ĝin sciigis al la gardistinoj pere de respondaj mapoj kaj vidaĵoj, celante kiel eble plej konsolan reprodukton, ĉar ni bezonos plenan serenecon, kiel eble plej trankvilan mensostaton, por plej multe profiti el la farota lernado! Por nia pli granda surprizo, niaj karuloj aldone klarigis, ke nenion ili povos fari helpe al ni pro la delikata situacio kaŭzita de nia memmortigo, situacio simila al tiu de surtera kondamnito, al kiu la leĝaro reganta en lia lando trudas vivmanieron alian, ol tiu de la ceteraj civitanoj. Tiam mi multe da larmoj verŝis, kaŝante mian hontoplenan vizaĝon en la kompateman bruston de mia patrino, kies edifaj konsiloj min refortigis, revivigante en mi la esperon pri malpli akraj tagoj por mia konscienco! Kaj dum ĉiuj kolektiĝis ĉe la bonodoraj arbokurtenoj, sub florplenaj baldakenoj memorigantaj pri la fruktoĝardenoj kaj kortoj de mia naskodomo, mi, lulata de la ama protekto de miaj neforgeseblaj gepatroj, multfoje ĝuis dolĉajn kunvenojn kun multaj membroj de mia familio, kiuj, same kiel mi, jam estis forpasintaj! Siavice, miaj malfeliĉo-kunuloj ĝuis la samajn rajtojn, ĉar tie estis nek specialaj favoroj nek privilegioj, sed nur rigora justeco bazita sur la leĝoj de altiriĝemo kaj spirita sameco.

Kaj fine Belarmino de Queiroz e Souza povis renkonti sian patrinon, kiun li amis per sia tuta koro kaj kiu lin neatendite vizitis en la posttagmezo de tiu sama tago. Ŝi sciigis al li, ke la surprizo vidi lin perei pro memmorigo trafis ŝin per profunda kaj nekonsolebla doloro, kiu nekuraceble difektis al ŝi la sanon, ĉar post duona jaro, neniam rezignaciante ĉe la malfeliĉo perdi lin en tiel tragedia maniero, ŝi ankaŭ mortis! Ke plej afliktaj elreviĝoj trafis ŝin post la forpaso, ĉar, kredante, ke ŝi atingos la absolutan forgeson en la sino de la Naturo, tamen montriĝis, ke ŝi postmorte restas vivanta kaj konsumita de ĉagrenoj tial, ke ŝi posedas neniajn mensajn kaj spiritajn kapablojn, kiuj rajtigus ŝin eniri la feliĉajn aŭ konsolajn regionojn de la Nevidebla Mondo. Ke ŝi vane lin serĉis en tiuj ombraj regionoj, kie ŝi vagadis premata de pereigaj konfuzoj, baraktante inter la surprizaj efikoj de la orgojlo kaj egoismo, kiuj karakterizis ŝian personecon, kaj la pento, ke ŝi malŝatis la dolĉajn elverŝojn de la amo al Dio, preferante la absolutan gvidon de la Materiisma Scienco, ĉar la konscienco al ŝi asertis, ke ŝi grandparte respondecas pri la malfeliĉego de sia filo tial, ke ŝi mem, kiel patrino nekredanta la diajn idealojn, kiel patrino neantaŭzorgema kaj orgojla, kies aspiroj restis en la limoj de la mondumaj ĝuoj kaj pasioj, formis lian karakteron, infektante lin per tiu sama mensa viruso, kiu ilin ambaŭ trenis en tiel bedaŭrindajn moralajn falojn! Sed ke, fine submetiĝinte al la prudento, dank' al la disciplinoj de la eduka doloro, ŝi laboris, luktis, rezignacie suferadis dum multe da jaroj en la Spaco, preĝadis sincere konvinkita pri la Vero ekzistanta en la ideo pri Dio kaj Ties Leĝoj, kaj tiel, ankaŭ pro tio ke oni konsideris ŝian ardan aspiron al korektiĝo kaj progreso, ŝi ricevis la permeson, kiel favorkoran konsenton de la Superega Estaĵo, kiun ŝi nun agnoskas respekteme kaj kortuŝe, revidi sian filon!

... Kaj Doris Mary kaj Rinjo de Cassia havigis al ambaŭ la dolĉan konsolon resti en karega, resopirata loko: la malnova biblioteko en la domego de la familio Queiroz e Souza; ĝia fajrokrepitanta kameno; la malgranda fotelo de Belarmino, en

kiu li sidis ĉe la sino de sia patrino kiel iam en la tempo de la infanaj jaroj...

La dua fakto, kiu, kvankam okazinta du jarojn post la unua, montris decidan vojon al mia Spirito, estis la konado, kiun mi ekhavis pri mi mem, elfosante en la granda libro de mia animo la rememorojn pri la pasinteco, kiujn mi de longe malkuraĝe tenis sufokitaj pro tio, ke la konscienco malvolontis ilin tute kaj detale ekzameni. Tiel, kelkajn tagojn post la unua leciono pri Sciencoj, donita de Epaminondo el Vigo, venis mia vico ekstrakti el la profunda sekretejo de mia esto la memoron pri la pasintaj ekzistadoj, dum kiuj mia Spirito luktadis por progresi, memoron, kiun mia orgojlo forpuŝis, sentante timegon antaŭ la perspektivoj, ĉirkaŭe leviĝantaj. Sed Epaminondo, decideme kaj aŭtoritate, ne konsentis prokraston en la ĝusta momento al mi difinita. Mi do eksidis sur tiu seĝo, kiu al ni ŝajnis esti la respekteginda tribunalo de la Superega Justeco, kiam ni, en tiuj teruraj momentoj, devis rekte rigardi la klarmensan instruiston. Kiel ĉiam, absoluta silento regis en la salono. Nur la mensaj vibroj de Epaminondo, esprimataj per korekta parolo, plenigis la respektindan atmosferon, kie sanktegaj misteroj de la Ĉiela Scienco malkaŝiĝis por lumigi niajn Spiritojn ombritajn de nesciado. La ĉeestantoj certe sciis, kiaspecan individuon mi ĵus pozis en Portugalujo, kun enradikiĝinta orgojlo, kiu al mi difektis la karakteron, ĉar tiel malbonan moralan ŝarĝon mi ankoraŭ trenis kun mi, ĝi ankoraŭ obstine sieĝis min, malgraŭ la mizera stato, al kiu mi estis reduktita. Sed kion eble ne ĉiuj sciis, ĉar temas pri io, kion tiu sama orgojlo tre malofte al mi permesis malkaŝi, tio estas la fakto, ke mi ĉiam estis malriĉega, ĉiam akre luktadis kontraŭ la malfeliĉo pro konsterna mizero, kiu ne sole ne indulgis min sed ankaŭ defiis ĉiajn ajn rimedojn, kiujn mia menso elpensis por ĝin mildigi; kaj ke, por eskapi el la malfeliĉego de l' blindeco, kiu super miaj senrezistaj okuloj etendis densan ombrovualon, reduktante min al tia plej senkompata mizero, kia, miaopinie, povus ekzisti en la mondo, mi ĵetis min en tiun

satanan aventuron, kies doloraj sekvoj kondamnis min al la nunaj, de ĉiuj konataj, cirkonstancoj.

La asistantoj delikate preparis min, kiel ja konvenus al la juĝoto, kiu fronte al la tribunalo de la Konscienco sin mem ekzamenos, sin mem juĝos sen la akomodaj malgravigoj de la homaj vidpunktoj kaj elturniĝoj, ĉar li ja vidos tion, kion li mem lasis gravurita en la vibraj arkivoj de sia animo pere de ĉiu ago, kiun li faris dum sia ekzistado, ĉu kiel Spirito enkarniĝinta, ĉu kiel elkarniĝinto.

La majstroj ĉirkaŭis min, ĵetante sur la fakultojn de mia malsupera esto potencajn fluidecajn elementojn kun la celo min kompateme helpi. Tio estis, kvazaŭ kuracistoj operacius al mi la animon, vidigante ties anatomian strukturon, por ke mi mem ĝin ekzamenu kaj, malkovrante la originon de la akregaj malbonoj, kiuj min persekutadis, ne plu akuzu la Providencon!

Angoraj intuicioj aŭguris malesperon en mia interno. Mi certe estus banata per frosta ŝvito, se mia envolvaĵo ankoraŭ estus el karno. Sed aflikta sento de teruro tute malkuraĝigis min kaj mi provis kontraŭstari, antaŭvidante la malhonoran situacion, kiu min atendis inter la ĉeestantoj. Verŝajne nereteneblan ploron, mi petegis, kun la intenco esti aŭdata nur de Epaminondo:

“– Sinjoro, pro kompato! Indulgu min!”

“– Ne hezitu! – li respondis per tiu aŭtoritata, al li karakteriza tono, dum liaj paroloj, de ĉiuj aŭdataj, resonis en la amfiteatro. – Por efektivigi tiun internan renoviĝon, kondukontan la animon al la elaĉeto, ni bezonas apogi nin sur la plej vigla kuraĝo! Sen decidemo, sen heroeco, sen braveco ni ne sukcesos progresi, ni ne aliros la gloron! Memoru, ke la timemuloj estas punataj de la propra malsupereco, en kiu ili volonte restas, de la ilin ĉirkaŭanta malhonoro! Memoru, ke ja via rehonorindiĝo trudiĝas, ĉiufoje kiam la doloro vin sieĝas, kiam la sufero dolore vibrigas la fibrojn de via esto! Estu do forta, ĉar la Plej Alta Kreinto premias la bravajn animojn per la ĝojo de l' Venko!”

Mi rezignaciis sub la influo de tiu potenca menso, intime vokante la patrinan helpon de Maria el Nazareto, kiun mi lernis respektegi depost kiam mi eniris la bonfaran Instituton, kaj rememorante, ke ni estis azilitaj sub ŝia amoplena zorgado.

Tiam, post la submetiĝo de mia volo al la volo de tiuj min protektantaj mentoroj, io okazis en mia esto, kion mi efektive ne kapablus priskribi! Mi vidis, ke Epaminondo kaj lia skipo da asistantoj proksimiĝas al mi kaj min envolvas en strangajn lumfaskojn. Nevenkebla sveno trudis vertiĝon al mia cerbo, kvazaŭ el la sanktaj potencoj de mia "memo" leviĝus eksterordinaraj eĥoj, eksterigante el la tenejoj de la animo, por ilin revivigi antaŭ mi, la longan serion de miaj surplanedaj ekzistadoj, kiujn mi travivis havante jam prirespondecon kaj libervolon! Memkompreneble, la intensaj dramoj travivitaj sur la Tero nepre daŭris dum miaj restaĵoj en la Nevidebla Mondo inter la reenkarniĝoj, ĉar ili estas nedisigeble ligitaj al la sekvoj de la agoj faritaj dum la surtera vivo. Mi havis la eksterordinaran kaj gradiozan impreson, ke mi troviĝas antaŭ mia "memo" – aŭ antaŭ mia duoblaĵo –, se mi tiel povas min esprimi, kvazaŭ mi starus antaŭ spegulo kaj spektus tion, kio en mia menso sinsekve aperis per konsterna reviviĝo! La nekontraŭstarebla parolo de la instruisto resonis, kvazaŭ superreganta trumpetvoko, tra la interno de mia Spirito kvietigita de la volonto obei, kaj invadis ĉiujn angulojn de mia Konscienco kvazaŭ ŝprucado de ondegoj, kiuj transsaltante digojn kaj sin ĵetante per nebridebla impulso, inundus senhelpan regionon:

"– Mi ordonas al vi, ho Animo kreita por la gloro de la elektiteco en la Dia Sino: Revenu al la punkto de deiro kaj ekstudu en la libro, kiun vi portas en vi mem, la lecionojn al vi proponatajn de la sperto! Kaj de vi mem lernu plenumi la Devon kaj respekti la Leĝon de Tiu, kiu vin kreis! Poste skizu, vi mem, la planojn de kulpelpagoj kaj revirtiĝo, kiuj al vi konvenos, por ke al vi mem vi ŝuldu la gloron, kiun vi konstruos kaj kiu vin kondukos, en elaĉetaj flugoj, al la Eterna Sino, de kiu vi iam deiris!..."

Mi sentis, ke min iom post iom envolvas impresa torporo, kvazaŭ ĉio ĉirkaŭ mi kapturne turniĝus... Dikaj ombroj, kvazaŭ minacantaj nuboj, envolvis mian frunton... Mia penso foriĝis de la amfiteatro, de la Urbo Espero, de la Korekta Kolonio... Mi jam ne distingis Epaminondon, eĉ ne konis lin, kaj tute ne memoris pri miaj malfeliĉo-kunuloj... Sed mi ne endormiĝis! Mi restis konscia kaj rezonis, konsideris, pripensis, agis, kio vidigis, ke mi konservas absolutan regadon de miaj fakultoj... malgraŭ ke mi retroiris la vicon da rememmoroj amasiĝintaj dum la jarcentoj!... Mi do perdis la konscion pri la nuno kaj dronigis la Konsciencon en la Paseon...

Tiam mi sentis min vivanta en la tridek-tria jaro de la kristana erao! Sed mi ne nur rememoris: – mi ja travivis tiun epokon, troviĝis en ĝi, kiel fakte okazis!

La antivka sankta urbo de la judoj – Jerusalemo – travivis febrajn momentojn en tiu varma, sunplena mateno. Posedis min satana ĝojo, dum mi iradis tien kaj reen sur la stratoj svarmantaj per fremduloj, estigante tumultojn, blovante klaĉaĵojn, disvastigante maltrankviligajn famojn, instigante al malordo, ĉar estis la granda tago de la Kalvario kaj oni sciis, ke ia revoluciulo nomata Jesuo el Nazareto, kune kun du aliaj kulpuloj, estis kondamnita de la Cezaraj reprezentantoj al morto sur la kruco. Mi alkuris al la Pretorio kun la certeco, ke de tie eliros al la tortura loko la kondamnito, kiun la judoj tiom malbenis. Mi estis mizera, malriĉa kaj malica, ŝuldis favorojn al multaj judoj en Jerusalemo, manĝis el la restaĵoj de iliaj tabloj, vestis min per la ĉifonoj, kiujn ili donis al mi. Tial, antaŭ la Pretorio, mi freneze aklamis la vilan, naŭzaspektan figuron de Barabaso, sed ĉe la ekstrema provo de la Prokonsulo por liberigi la nazaretan ĉarpentiston mi postulis ties ekzekuton, blekegante kiel rabia demono, ĉar al mi plaĉis ĉeesti tragediojn, ebriiĝi per aliula sango, spekti la malfeliĉon, vundante tiujn sendefendajn kaj senkulpajn, kiujn mi malŝatis, ilin rigardante kiel senkuraĝulojn... Kaj vidi tiun delikatan junulon, tiel belan kiel

modestan, pacience supreniranta la danĝeran deklivon sub la senkompata ardegeco de l' Suno, surŝultre portanta la pezan lignon, trafata de la skurĝoj de la krudaj soldatoj el Romo, kiujn ĉagrenis la devo sin elmeti ĉe tiel peniga supreniro al la plena tagmeza varmo, estis spektaklo, kiu perfekte agordiĝis al la maliceco de mia karaktero kaj kiun mi nepre ne povus ne ĉeesti!...

Sed, rerigardante la paseon, la konscienco, kiu en si retenis tiun okazaĵon, ekabomenis ĝin per furioza sinakuzo. Mian frunton, konsterne pezigitan de la rimorso, banis kvazaŭa pasteca ŝvito el teruro kaj agonio, kaj mi eligis frenezan kriegon, sentante, ke ĝi resonas tra ĉiuj anguloj de mia Spirito:

"– Ho Jesuo Nazaretano! Mia Savinto, mia Majstro! Mi estis freneza, freneza! Mi ne plu rigardas min, kiel Vian malamikon! Pardonon! Pardonon, Jesuo!..."

Ardega ploro bruligis al mi la animon kaj mi kalcitris, repuŝante la amaran memoron pri la pasinteco. Sed la eminenta majstro, vigle atenta kaj zorgema pri la progreso de sia protektato, tuj poste admonis:

"– Antaŭen, Animo, dia kreaĵo! Daŭrigu, sen perdo de l' kuraĝo, ĉar nepre necesas, ke el la legado, kiun vi faras en vi mem, vi eliru strebanta al servado al tiu Majstro, kiun vi hieraŭ priĵetis per ŝtonoj..."

Mi ne povus ne cedi al la vibra impulso, kiu min puŝis en la sondadon de tiu malproksima pasinteco, ĉar min potencis, per siaj voloj kompateme kuniĝintaj por mia bono, Epaminondo kaj liaj helpantoj. Kaj mi daŭrigis la hontigan rememoradon:

Jen mi staras, kun malica intenco, antaŭ la Pretorio. Mia malhumana parolo ŝparis nenian insulton kontraŭ la Nazaretano. Kun sovaĝa obstino, mi lin akompanis sur lia dolora vojo, blekante ofendajn sakraĵojn kaj trivialajn mokojn; kaj mi konfesas, ke mi ne agresis lin per ŝtonoj aŭ per mia murda brako nur tial, ke lin ĉirkaŭis severa gardo. Tiel estis, ĉar mi sentis min malsupera kaj mizera ĉie, kien ajn portis miaj

aventuroj. Mi nutris envion kaj malamon kontraŭ ĉio, kion mi konstatis aŭ rigardis supera al mi! Malbela, vila, abomeninda, mutilita ĉar al mi mankis unu brako, malbonmora, ambicia, el mia koro elgutiĝis la viruso de malico. Ĉion, kion mi rigardis bela kaj nobla, mi malbenis kaj persekutis, konsciante mian senpovecon ĝin atingi!

Aliĝinte al la longa, procesie iranta homamaso, mi komencis malrespekti per fiaj kalumnioj kaj naŭzaj sarkasmoj lian suferantan kaj humilan Patrinon, anĝelon protektantan per neesprimebla kordolĉo la homojn ekzilitajn en la surteran suferadon, jam tiam tiun saman Marian, kompateman kaj konsoleman, kiu nun min patrine ŝirmis per ĉielaj zorgoj! Kaj poste, per sinsekvo da sinistraj, teruraj agoj, jen mi daŭre ludas la abomenan rolon de turmentegisto: denuncante kristanojn al la Sinedrio, persekutante, spionante, meminiciate turmentante kiom mi nur povis; miksiĝante kun la rabiaj hordoj de la kruda popolaĉo; perfidande la “sanktulojn de la Sinjoro” pro la simpla plezuro malici, ĉar mi havis nek la rajtojn nek la zorgojn, kiuj igis la hebrean genton supozi, ke, ekstermante la kristanojn, ĝi defendas nacian heredaĵon: mi ne estis ido de Izraelo! Nekredanto kaj aventuristo mi venis de malproksime, de la fora Gallujo, forkurinta el mia tribo, kie mi estis mortkondamnita pro la duobla krimo de perfido al la Patrujo kaj hommortigo, kaj nur hazarde, dum la lasta monatoj de la apostolado de la Savinto, mi alvenis en Judujo!

Al mi do estis donita la plej favora okazo por regeneriĝi, sed mi ĝin forĵetis, ribelante kontraŭ la “Lumo, kiu brilis en la mallumo...”

Dume la tempo fluadis, trenante min en senĉesajn luktojn. Reenkarniĝoj sin sekvis tra la jarcentoj. Mi apartenis al la mallumo... kaj dum la interspaco de du ekzistadoj mi plezuris ĉe la malsuperaj sferoj de la besteco!... Ripetitajn invitojn al revirtiĝaj penadoj mi ricevis en ĉiuj lokoj, kien puŝis min la fluo de la vivo, ĉu kiel homo, ĉu kiel Spirito seniĝinta je la karna

vestaĵo, ĉar ankaŭ en la malsuperaj spiritaj regionoj resonas la dolĉo de la Evangelio kaj la sublima figuro de la Krucumito estas montrata kiel nobla, imitinda ekzemplo! Sed, blindigite de malbonvolaj instinktoj, kiel ja okazas al multaj aliaj, mi fariĝis surda... Kaj mi asertas al vi, ke mi eĉ ne klare perceptis la diferencon inter la enkarniĝo kaj la restado en la Transmondo, ĉar mi ĉiam ankoraŭ troviĝis en tiu sama stato de besteco! Hodiaŭ mi scias, ke la imanenta leĝo de Progreso, kvazaŭ saĝa kaj ne kontraŭstarebla magneto, altiris min al novaj eblecoj en karnaj korpoj, sub la orientado de sindonaj laboristoj de la Sinjoro, trudante, ke mi renaskiĝu kiel homo cele al tio, ke la frapoj de la kulpelpago kaj la senĉesaj luktoj propraj al la surtera vivo, krom ankaŭ la neeviteblaj suferoj rezultantaj el la stato de neperfekteco, tiel de la planedo kiel ankaŭ de ties homaro, iom post iom disvolvu al mi la kapablojn de la animo bruligita de la morala malsupereco. Sed en la tempo, kiam tio okazis, mi nenion kapablis percepti, kaj al mi la homa ekzistado kaj la intertempo en la Transmondo ŝajnis unu sola kaj sama afero!

Sed mi ankaŭ travivis, laŭlonge de la jarcentoj, grandajn malfeliĉojn.

Kiel obstina krimulo, ekskluzive sin fordonanta al malbonfarado, mi memkompreneble suferis la refrapon de miaj agoj, kies efikoj reflektiĝis en la stato mem de mia persono. Iafoje mi ascendis al la pintoj de fameco en la surtera, socia skalo, kio tamen ne signifis, ke mi fariĝis virta, ĉar senbrida ambiciemo min regadis! Tiaj ambicioj, abomenindaj kaj malhonorigaj, tamen puŝis min al bruaj moralaj faloj, kaj mi ĉiam pli kaj pli baraktis en la marĉo de l' malmeritoj, pezigante mian Konsciencon per novaj konsternaj ŝuldoj!

Sed miaj revenoj en la karnon ĉiam okazis inter la kristanaj popoloj. Estas tre verŝajne, ke en la Transmonda vivo, disciplina kaj laborplena, la Spiritoj grupiĝas laŭ gentoj aŭ kolonioj, sub kies protekto ili edukiĝas kaj progresas kaj de kiuj ili malligiĝas nur tiam, kiam ili finis normalan evolustadion, nome

post kiam ili akiris sciadon, kiu al ili permesus ŝanĝojn produktivajn kaj utilajn por sia bono kaj por la bono de aliuloj. Fakte mi ĝis nun neniam vivis ekster Gallujo aŭ Iberujo.

La ideo pri regeneriĝo enŝoviĝis al mi en la menson, flustrate en miajn orelojn dum la fluo de l' tempoj, ĉu mi troviĝis homkorpe sur la Tero, ĉu mi dronis en la spirita ombro propra al la estaĵoj de mia malalta klaso. Ĝin akceptinte kun profitama kalkulo, mi ekklopodis solvi la pezajn malfacilaĵojn, kiuj tra la jarcentoj persekutadis mian destinon, per tiu kristana doktrino, kiu onidire tiom da bonoj havigas al tiu, kiu per ĝi lasas sin gvidi. Sed kion mi absorbiĝinta en mia intima malsupera mondo, ne povis kompreni, tio estis la alta celo, morala kaj filozofia, de tiuj invitoj aŭ konsiloj, kiuj konstante ripetiĝis ĉirkaŭ mi en ĉiuj lokoj, surteraj aŭ transmondaj, kien la vivo min portis... kaj pro tio mi esperis de la Granda Doktrino nur personjan profitojn, misterajn aŭ supersticajn povojn, per kiuj mi atingu la kontentigon de milo da kapricoj kaj pasioj...

Tamen, ĉia aludo pri tiu Nazareta Majstro, kies virtoj estis modelo por la regeneriĝo de la homaro, kaŭzis al mi mensperturban ĉagrenon, kvazaŭ ĝenaj resonoj ekvibrus en mia interno, dum malagrabla fluo ekestis en mia konscienco, kiu ŝajnis timi esplorojn pri tiu delikata afero. Trudiĝis do la konkludo, ke dum mia inteligento kaj intelektaj konoj ampleksiĝis ĉe la vivobataloj kaj la malfeliĉoj sub la potenca efiko tiel de la mempenado, kiel ankaŭ eĉ de la ambicioj, tamen la koro restadis inerta kaj frosta, kaj la animo brutigita antaŭ la noblaj konkretiĝoj de Bono, Moralo kaj Justeco!

La unua duono de la 17a jarcento trovis min en bedaŭrinde ruiniga situacio, forlasita en malluma surtera karcero, malgraŭ tio, ke mi ankoraŭ loĝis la nevideblan mondon.

Kia naŭza krimaro kaŭzis tian punon, tiel humiligan por la digno de Spirito liberiĝinta de la karnaj katenoj?... Kiajn abomenajn motivojn mi donis al la leĝo de altiro kaj afineco, ke la stato de mia menso kaj de mia konscienco agordiĝis nur al la

mallumo de haladza, turmentega karcero en surtera malliberejo?...

Estas konvene, ke vi, leganto, eksciu, kion mi faris en tiu tempo...

# Ĉapitro V
## La kaŭzo de mia blindeco en la 19a jarcento

Fluis la unuaj jardekoj de la 17a jarcento, kiam mi renaskiĝis en la ĉirkaŭaĵoj de Toledo, la antikva kaj nobla ĉefurbo de l' Visigotoj, kiun la amikaj, plaŭdaj akvoj de la malnova Taĥo randiras kvazaŭ nelacigebla gardisto...

Mi riskis novan renaskiĝon en la krutaj surteraj scenejoj serĉe de favoraj okazoj por neprokrastebla lernado, kiu liberigu mian Spiriton dronintan en malfacilaĵoj kaj tiel malpligrandigu la ŝuldon de la konscienco antaŭ la Neŝanĝebla Leĝo, ĉar mi nepre bezonis la elprovon de rezignacio ĉe malriĉeco, de regenera, pasiva humileco, de submetiĝo antaŭ amoperfido, pri kiu mi estis debete enskribita en la registroj de la Paseo, krom ankaŭ de plena fordoniĝo al la Familio.

En tiu tempo mi apartenis al malnova domo de senmoniĝintaj nobeloj, tiam persekutataj pro nesolveblaj kontraŭaĵoj, nome politikaj kaj religiaj interbataloj kaj malkonsentoj kun la Reĝo.

Mi eliris el la plej frua juneco ankoraŭ analfabeta, baraktante en la pezaj laboroj de la terkultivado. Mi paŝtadis ŝafojn, plugadis la teron kiel mizera servutulo, dividante mian tempon inter pluraj taskoj sub la severa rigardo de mia patro, kruda provinca nobelo,

kies senmezura religia fiero, inspirita en la Reformacio, lin faligis en la reĝan malfavoron, ĉar lin suspektante pri malfideleco al la katolika kredo, oni tenadis lin sub viglado; homo ja rigora tiel kontraŭ la familio, kiel ankaŭ kontraŭ la servistaro, kvazaŭ estro super siaj feŭdoj. Sed la streĉaj laboroj, min katenantaj al la agrokulturaj respondecoj, ankoraŭ pli intensigis en mia interno la strangan sopiremon, kiu igis min temperamente malĝoja, ĉar en la profundo de mia animo tumultis senbridaj ambicioj tute nepravigeblaj ĉe junulo en tiel malfavoraj kondiĉoj. Mi revis nenion alian, ol forlasi la kamparon, ribeli kontraŭ la patra despoteco, fariĝi homo klera kaj utila kiel miaj kuzoj loĝantaj en Madrido, el kiuj multaj estis militistoj. Kovritaj per gloroj kaj ordenoj, dum aliaj apartenis al la potenca Kompanio de Jesuo kiel doktaj reprezentantoj de la Eklezio, kiun mi rigardis la sola justa kaj vera, malkonsente kun la opinio de la gepatroj, kiuj ĝin malŝatis. Mi enviis tiun riĉan, potencan parencaron kaj sentis min kapabla por la plej pezaj oferoj por atingi ilian socian rangon.

Iun tagon mi malkaŝis al mia patrino tiun aspiron, kiu kreskadis kun la aĝo kaj faris min nekontenta kaj malfeliĉa. La kompatinda virino, kiu, same kiel la filoj kaj servistoj, ankaŭ suferis la premadon de la hejma tirano, prudente konsilis al mi, kvazaŭ inspirita de la Ĉielo, moderigi tiajn dezirojn pro obeo al la principoj de la Familio, kiujn mi renkontis ekde mia naskiĝo, kaj krome ŝi ankaŭ obĵetis, ke mia restado en la patra domo estas nepre necesa pro tio, ke la sukceso de la terkultivado ne povas malhavi la spertan kunlaboron de la unuenaskito kaj estonta familiestro. Malgraŭ tio, pro mia insistado, ŝi propetis ĉe la sinjoro kaj patro, ke li konsentu pri mia instruiĝo, kio havigis al mi krudan traktadon kaj punojn neimageblajn ĉe patra koro! Pro la rezultinta indigno mia aspiro pli intensiĝis ĝis nekontraŭstarebla obsedo, kiun nur per grandega streĉo mia impetema kaj ribelema temperamento sukcesis bridi.

Mi petis helpon de la distrikta parokestro, pri kiu mi sciis, ke li estas homo komplezema kaj literaturamanto. Al li mi

rakontis la suferojn, kiuj min humiligis, konigante mian deziron scipovi legi kaj skribi kaj kiom eble instruiĝi. Li konsentis afable kaj abnegacie kaj komencis lernigi al mi ĉion, kion li scias. Kaj ĉar li estis homo klera, kun potenca intelekto, mi plenspire ensorbis la lecionojn, kiujn li karitate donis al mi, ĉiam elmontrante tielajn mensklarecon kaj bonvolon, ke la nobla instruisto ĉiam pli kaj pli zorge sin dediĉis, ravita de la intelektaj latentoj de sia lernanto. Sed konsentante mian peton kaj plej helpeme komprenante ties motivojn, li ne informis mian familion pri tiu fakto. Mian vizitadon en la parokestra domo oni interpretis kiel helpon al la parolo por al kulturado de la tero, komplezon, kiun mia patro ne kuraĝus rifuzi pro timo al repagoj kaj denuncoj.

Unu tagon, post kiam mi longe trostreĉis al mi la menson serĉe de ia solvo por tio, kion mi rigardis kiel mian malfeliĉon, naskiĝis el la obstinaj cerbumadoj de miaj ambicioj la bedaŭrinda ideo fariĝi pastro. Tio estus, mi pensis, sekura kaj facila rimedo por atingi tiujn min allogantajn celojn... Ne temis efektive pri nobla alvokiĝo al la diaj idealoj, nek pri strebo por servadi al Bono kaj Justeco per edifa apostolado, ĉar en la religiaj praktikoj, miaj kaj de mia patrino, ne partoprenis la vera kredo al Dio nek la respekto, kiun oni devas havi al Liaj Leĝoj! Al la parokestro, mia malnova majstro, mi sciigis pri tiu projekto, kiun mia pretendema ambicio rigardis laŭdinda. Sed li surprizis min, bonkore kaj digne konsilante, ke mi evitu fari la sakrilegion profiti la sanktan protekton de la Dia Ŝafido por la kontentigo de personaj pasioj, kiuj, tumultante en mia koro, ombris al mi la juĝon... ĉar li, havante klaran vidon de mia karaktero, tre bone komprenis, ke nenia vera inklino altiras min al tiel delikata ofico.

"– La Evangelion de la Sinjoro, mia filo – li iam finadmonis, post unu el la saĝaj paroladoj, per kiuj li kutime prezentis la gravajn respondecojn pezantajn sur la konscienco de pastro –, oni devas servi kun arda amo al la bono, per konstanta rezignaciado, dum kiu ni multfoje mortos tiel por ni mem kiel ankaŭ por la mondo kaj ties pasioj; per ĉiam aktiva, senlaca kaj

renoviga laborado por la aliula bono kaj por la gloro de la Vero, laborado distingiĝanta per la vera honesteco, sendependeco kaj solidareco, sen ia ajn persona intereso, ĉar la servanto de Jesuo devas senkondiĉe fordoniĝi al la Idealo, rezignante pri propraj opinioj kaj deziroj, kiuj ja neniom valoras antaŭ la reguloj kaj principoj de lia doktrino! Ĝi estas vojo malglata, prisemita per erikoj kaj obstakloj, per senĉesaj elprovoj, sur kiun la pilgrimanto verŝos larmojn kaj konstante vundiĝos ĉe doloregaj ĉagrenoj! Florojn li nur rikoltos poste, kiam li povos prezenti al la Altega Sinjoro de la vinberejo la altvalorajn talantojn[1] konfiditajn al lia zorgo de obeema kaj laborema servisto...

*"Se iu volas veni post mi* – Li mem tion asertis –*, li abnegaciu sin, kaj levu sian krucon, kaj sekvu min!"* [2]

Ekster tio, mia kara filo, la servado de ambiciulo nur celas la kontentigon de liaj personaj ambicioj, kaj li, ŝajnigante servadon al la Sinjoro, de Li ja malproksimiĝas per siaj riproĉindaj agoj!

Ĉu vi ne sentas inklinon al la rezignoj nepre sin trudantaj ĉe tiu honora tasko?... Restu do trankvile sur via loko, bonvoleme servante al la proksimulo, kiom vi nur povas, eĉ se nur en via familio, kaj tiel vi agos ne malbone...

Ĉu vi ne sentas vin vere preta submetiĝi al la ordonoj de Tiu, kiu oferis Sin mem sur la traboj de Kruco?... Vi do ne trofruigu la aferojn, provante alfronti respondecojn tiel vastajn kaj pezajn, ke ili povos endanĝerigi vian spiritan estontecon! Revenu, filo, al viaj civitanaj devoj, strebante ĉe ĉiu via paŝo al noblamora konduto... Reiru al via vilaĝo, paŝtu vian brutaron, klopodu forpuŝi senprudentajn ambiciojn, ĉar per tio vi konkeros pli da meritoj, ol se vi perfidus oficon, por kiu vi ankoraŭ ne estas preparita... Plugu plej ame la amikan teron, ĝoje zorgante pri la regiono, kiu vin lulile akceptis... kaj disŝutante en ties

---

[1] Sankta Mateo, 18:24.
[2] Sankta Mateo, 16:24.

malavaran sinon la malgrandajn, fruktodonajn semojn, vi tre frue komprenos, ke Dio restas kun vi, ĉar Liajn benojn vi ĉiam vidos renovigitaj en la bongustaj fruktoj de viaj fruktoĝardenoj, en la blondaj spikoj de la tritiko nutronta vian tutan familion, en la sanodona lakto, kiu fortikigos la karnon de viaj filoj... Vi prefere fondu vian hejmon! Eduku filojn en la respekto al Dio, en la kulto al la Justeco, en la abnegacio de la Amo al la proksimulo! Estu, vi mem, amiko al ĉiuj vivantaj ĉirkaŭ vi, ne forgesante viajn plantarojn kaj viajn amikajn brutojn, kiuj al vi servadas tiel bone kiel ankaŭ viaj servistoj, ĉar ĉio ĉi ja estas sublima pastra misio, estas sanktiga servo al la Sinjoro de la Vinberejo...”

..............................................................................................................................

La ideo pri edziĝo rapide anstataŭis la malnovajn aspirojn, ĉar la konsiloj de la nobla servanto de la Evangelio funde penetris mian koron. Sentime kaj pasie mi fordoniĝis al tiu nobla celo kun granda korardo kaj ĝoje prepariĝadis por ĝin atingi. Sed pro la delikata situacio, en kiun mi metis min en la patra domo, neharmonie kun la temperamento de mia patro, kiel ankaŭ pro la konsterna malriĉeco, kiu malhelpis al mi la agadon, mi tenadis en sekreto la projektojn pri edziĝo terene ellaboratajn de la koro, kiu lasis sin freneze enamiĝi...

El inter la multaj junulinoj, kiuj beligis nian vilaĝon per la gracieco de siaj personaj ĉarmoj kaj per la moralaj kvalitoj, kiuj ilin signis kiel neforgeseblaj rekomendoj, mi distingis unu nevivon de mia patrino, kiun mi de longe admiris tamen ne kuraĝante eksterigi, eĉ al mi mem, la ardajn sentojn, kiuj flamigis mian bruston kiam mi vidis ŝin kaj kun ŝi interparolis.

Maria Magda estis ŝia nomo. Ŝi estis svelta, bela, ruĝvanga, havis longajn harplektaĵojn, nigrajn kaj parfumitajn, kaj dolĉe allogajn okulojn. Kiel mi, ŝi ankaŭ estis filino de senmoniĝintaj nobeloj, sed kun la sola avantaĝo, ke ŝi ricevis bonan edukon, hejman kaj eĉ socian, dank' al la favora komprenemo de siaj gepatroj.

Mi ekamindumis ŝin kun ardo, kaj tuj de la komenco forte enamiĝis, kiel nature ĉe karaktero kruda kaj ribelema. Mi sentis, ke ŝi reciprokas, sed mi ne suspektis, ke tiu okazo, kiun mia revemo rigardis nekontraŭstarebla, fariĝis nur dank' al la soleco de vilaĝo izolita en la ĉirkaŭaĵoj de Toledo, kie mankis galanta junularo! Mi ekamis la junan Magdan kun senbrida fervoro kaj en ŝiajn manojn mi kuŝigis mian destinon. Volonte mi por ĉiam rifuĝus en la dolĉeco de honeste fondita hejmo, praktikante la avertojn de mia nobla konsilanto. Sed la malfeliĉo min gvatis, trenante kontraŭ mi fortajn tentojn ĉe la neprokrasteblaj elprovoj, tentojn, de kiuj mi ne povis liberiĝi pro la temperamento difektanta al mi la karakteron, pro la nesubmetiĝemo de vundita orgojlo, kaj pro la ribelemo, kiu ekde la lulilo superregis miajn sintenojn ĉe iu ĉagreno aŭ ia simpla kontraŭaĵo!

Maria Magda, kun kiu mi sekrete interkonsentis pri geedziĝo en oportuna okazo, forlasis min, preferinte junan madridanon, kuzon de mia patro kaj kaŝitan adepton de la Reformacio, kiu vizitis nian modestan domon por tie pasigi la someron! Li estis eleganta, dudekkvinjara militisto, al kiu bone alaspektis la longaj haroj, la glatbrilaj, zorge aranĝitaj lipharoj, kiel konvene al oficiro de la Reĝa Gardistaro; krom ankaŭ la spado kun orbrila pomelo, la gantoj el ŝamo kaj la flirtanta, bonodora mantelo, kiu donis al li la aspekton de heroo! Li nomiĝis Hiacinto de Ornelas y Ruiz kaj pretendis esti, aŭ efektive estis, provinca grafo, heredonto de bonaj teroj kaj bona riĉaĵo. Inter lia figuro senkonteste eleganta, lia financa supereco, kaj mia ombra, kruda eksteraĵo de nesperta, malriĉega terkulturisto, la elekto ne estus malfacila por junulino, kiu ankoraŭ ne atingis la dudekjaran aĝon!

Hiacinto de Ornelas ne revenis sola al sia luksa loĝejo en Madrido!

Konsentinte kunligi sian destinon al tiu de Hiacinto per la sankta ligo de la Edzeco, Maria Magda forlasis la vilaĝon, de mi por ĉiam disiĝis, ridetanta kaj feliĉa, profitante, por perfidi mian

dignosenton, el la sekreteco de niaj projektoj, ĉar niaj gepatroj nenion sciis pri tio, dum mi, humiligita, kun koro sanganta pro neeltenebla morala turmento, vidis mian estontecon senrimede malbonigita en la daŭro de tiu ekzistado kaj tial fuŝis la celon de tiu reenkarniĝo, forgesante konsilojn kaj avertojn de abnegaciemaj amikoj pro la senrezignacio kaj ribelemo, kiuj estis karakterizaj trajtoj de mia personeco!

Mi ĵuris eternan malamon kontraŭ ili ambaŭ. Rankorema kaj ĵaluzema, mi al ili deziris ĉiaspecajn malfeliĉojn, dum venĝoprojektoj instigis mian menson al obstina elpensado de malicoj, kio faris mia ekzistado ian inferon sen balzamoj, ian dezerton sen esperoj! Mia vilaĝo fariĝis malaminda! Kie ajn mi troviĝis, tie estis al mi, kvazaŭ mi vidus la gracian figuron de Magda kun ties nigraj harplektaĵoj balanciĝantaj laŭlonge de ŝia korpo... Nekonsolebla sopirado min deprimis kaj profunde humiligis! Mi hontis antaŭ la vilaĝaj loĝantoj pro la perfido, kiu min trafis. Mi rigardis min objekto de ridindigo, montrata de malnovaj amuzkamaradoj, kredante, ke mia nomo cirkulas inter pikmokaj klaĉadoj, ĉar multaj jam malkovris mian sekreton. La laboro ne plu altiris min, kaj la kampo fariĝis por mi netolerebla, humiligante min per la rememoro pri la eleganta eksteraĵo de la rivalo, kiu de mi forrabis la revojn pri fianĉiĝo! Kompatemaj amikoj vane konsilis al mi elekti alian kunulinon por mia destino, asertante, ke tiu fakto, kiu min tiel profunde atingis, estas ordinara okazaĵo en la vivo de iu ajn homo malpli rigora kaj kolerema. Sed mi, pasia kaj tro sentimentala, forstrekis la edzecon el miaj aspiroj, enfermante en mian indignantan koron la sopiron pri tiu mallonga enamiĝo, kiu faris min malfeliĉa.

Tiam denove flustre enŝoviĝis en mian penson la malnovaj inklinoj al pastreco, kiujn mi akceptis kun entuziasmo, preta ne plu lasi min ensorĉi de la kantileno de iu ajn. Mi trovis grandan trankvilon kaj konsolon en la ideo servadi al la Eklezio tiel longe kiel ĝi min helpus altiĝi el mia humilega socia rango. Efektive tio ne estus malfacila: kvankam mankis financaj rimedoj, tamen

ekzistis respektinda nomo kaj bonreputaciaj parencoj, kiuj al mi ne rifuzus sian helpon por la realigo de tia granda projekto. Mi ankoraŭ apogis min al la arda espero, ke mi venkos, ke mi fariĝos ekstara, ke mi ajnarimede okupos altan pozicion, celante superi Hiacinton socie kaj aŭtoritate, por lin subigi al mi kaj samtempe humiligi Marian Magdan, devigante ŝin pensi pri mi eĉ se nur por min malami!

La morto de mia respekteginda patro faciligis la efektivigon de miaj novaj projektoj. Mi forĵetis la motivojn, kiujn mia patrino elmetis por min reteni en la mastreco super la bieno, kiel anstataŭanton de la forta mano kiu forpasis. Nekvietigebla ekscitiĝo frenezigis miajn tagojn. Abomenaj ideoj tenadis mian cerbon en konstanta stato de agitiĝo kaj angoro, kaŭzante en mia esto ian komplekson malfacile solveblan en la daŭro de unu sola ekzistado! Sub la senĉesa premo de halucinaj inkuboj, mi sonĝis, en sinsekvaj noktoj, ke mia maljuna patro, kiel ankaŭ aliaj forpasintaj amikoj, revenas el la transtombo por admoni, ke mi detenu min de tiu plano celanta la estontecon kaj preferu honeste ekzinigi iun el miaj iamaj kamaradinoj de la infanaĝaj tempoj, ĉar tia estas la pli digna vojo al tio, ke mi havigu al mi trankvilecon de konscienco kaj senduban feliĉon. Sed la resento kontraŭ Magda, kiu min malemigis al novaj amindumaj iniciatoj, rapide neniigis la impresojn, kiujn por mia bono provis tiuj respektegindaj spiritaj amikoj, celante evitigi al mi la plenumon de novaj, bedaŭrindaj kulpoj antaŭ la Leĝo de la Providenco!

Mi tre facile fariĝis pastro!

La Kompanio de Jesuo, fama pro sia potencado super ĉiuj brancoj de la societoj regataj de la romkatolika principaro, kiel ankaŭ pro siaj faroj kaj entreprenoj, kiuj ne ĉiam distingiĝis per obeo kaj respekto al la rekomendoj de ĝia sublima patrono, kies nomon ĝi uzis kaj misuzis – havigis al mi netakseblan helpon, vere grandvalorajn avantaĝojn! Sub ĝia protekto mi brile kaj rapide instruiĝis, kiel mi ja tiom deziris ekde la infaneco! Mi avidege ensorbis la klerigmaterialon, kiun oni donis al mi en la

komunumo, rimarkinte miajn flamajn ambiciojn kaj kiel facile mi fariĝus instrumento subigebla por la fera potencado de iliaj ungegoj! Tio estis, kvazaŭ mia intelekto nur rememorus la proponitajn lernaĵojn, ĉar tre granda estis la asimilforto de miaj fakultoj! Mia dankemo siavice ne havis limojn! Mi ligiĝis al la Kompanio per ĉiuj fortoj de mia arda animo. Mi obeis la superulojn kun fervora zorgo, al ili kontentige servante, eĉ antaŭplenumante iliajn dezirojn! La interesojn de la Eklezio, kiel ankaŭ tiujn de la dirita organizaĵo, mi lernis obei kaj servi super ĉiaj ajn ceteraj interesoj, kiel ja tiel bone konvenus al vera jezuito!

Mi ne parolos pri la dia idealo. Al ĝi mi ne aliĝis, ĝin mi ne pripensis por edifi al mi la animon, per la helaj lumoj de Justeco kaj Devo. Mi ankaŭ ne lernis ami Dion aŭ servi la Elaĉetantan Majstron en la komunumo, al kiu mi aniĝis.

Sendube ekzistis en la Kompanio de Jesuo eminentaj servantoj, kiuj laŭ la nivelo de sia kristana agado egalis la unuajn kunlaborantojn de la mesia apostolado. Sed kun tiuj mi ne kunsentis. Mi ilin ne konis kaj ilia vivo tute ne vekis mian intereson. De tiu potenca religia organizo, kia estis la Kompanio de Jesuo, mi nur deziris la socian pozicion, kiun ĝi al mi povus havigi kaj kiu al mi kompensus la obskurecon de mia deveno; kiel ankaŭ la mondajn plezurojn, la frenezan kontentigon de la orgojlo, de la malnoblaj ambicioj, de la malŝatindaj vantaĵoj, ĉar la ĵurrompo de la adorata fianĉino sufokis en la naskiĝo miajn honestajn projektojn!

Pro tio, nome por havigi al mi tiun tutan malŝatindan provizon, mi servadis kun freneza zorgo al la celoj de la Inkvizicio! Mi persekutis, denuncis, kalumniis, klaĉe malpacigis, mensogis, kondamnis, torturis, murdis! Kaj tiela estis la frenezo, kiu min ekkaptis, ke mi denuncus mian propran patron, trenus lin antaŭ la tribunalon kiel agenton de la Reformacio, se li, sub la protekto de la ĉiela favorkoro, ne estus jam transdoninta sian animon al la Kreinto! Sed mi ĉion faradis ne pro ekstrema maliceco de

karaktero: mia intenco estis servadi al la superuloj, famigi la idealon de la Kompanio, pruvi per konstanta kaj senkondiĉa sindono la dankemon, kiu regis mian pasian animon pro la al mi donita subteno! Mi mem estis viktimo de tiu institucio, ĉar konstatante mian submetiĝemon, mian dankemon pro la ricevitaj favoroj, la ĉefaj superuloj ekspluatis tiujn sentojn, min instigante al la plenumo de abomenaj krimoj, ĉar ili estis certaj, ke mi ne povos elturniĝi. Se, anstataŭ ĉi tiuj, mi estus elektinta iun franciskanan komunumon, mi certe estus ricevinta edukon, kiu el mi farus kredantan animon, ke kapablan por tiaj fiaĵoj. Mi almenaŭ estus kutimiĝinta al mordececo, al respekto al la nomo de la Kreinto, al interesiĝo pri la aliulaj malfeliĉoj kaj ties forigo. Sed la Kompanio de Jesuo, malgraŭ la sublima nomo, kiun ĝi prenis kiel inspiron, faris el mi ian maliculon, ĉar mi aliĝis ĝuste al ĝia politik-socia departemento, kiu tiom da ekscesoj faris sine de la socioj en la nomo de la religio!

Dum longa tempo mi ne forgesis miajn perfidintojn, sed mi ilin ne serĉis, ĉar min ne interesis ilia sorto. Efektive, ili translokiĝis al Nederlando, kie Hiacinto Ornelas devos plenumi certan militistan mision. Sed unu tagon la hazardo denove metis min antaŭ ili! Pasis jam longaj dek kvin jaroj, depost kiam lia malbenita vizito en la domo de miaj gepatroj transformis mian sentimentalan koron en malamfornegon. La profesiaj devoj, kiuj igis lin forlasi la Patrujon, nun lin revenigis en la kondiĉo de homo ĝuanta altegan reputacion, eĉ en la reĝaj salonoj, kaj enviindan socian pozicion. En lia ĉeesto, dum iu religia ceremonio, mi devis premi al li la manon, kion mi faris kvazaŭ al nekonato, tamen sentante, ke la koro tremadis en mia brusto, kaj ke la malnova rivaleco, la doloraj angoroj travivitaj en la pasinteco, tumulte boladis, antaŭavertante, ke, kvankam la amosento al Maria Magda malaperis, sufokinte min per la malhonoro de fia ĵurrompo, tamen la aperta vundo ankoraŭ sangadis, kriegante por venĝoj kaj repagoj!

Mi tiam penis observadi la vivon de tiu viro, kiun mi tiel forte malamis: liajn paŝojn kiel akcepto de la Reformacio, lian agadon pasintan kaj nunan, kion li faras, kion li celas, kiel li kondukas sian vivon, kaj eĉ apartaĵojn de lia ekzistado, dank' al sperta spiontaĉmento, kiun mi disponis kiel sindona agento de la Sankta Ofico. Hiacinto de Ornelas vivis feliĉa kun la edzino kaj ambaŭ sin reciproke amis per tenera kaj fidela sento. Ili havis infanojn, kiujn ili provis eduki laŭ la principoj de la bona moralo. Maria Magda, ĉarma, plaĉaltira virino, kiu imponis al la socio per nesuspekteblaj virtoj, elmontris la fieran kaj dignan belecon de la tridekjara aĝo, kaj mi, perturbita, frenezigita de milo da fia, pereigaj projektoj, vidante ŝin unuafoje post multjara foresto, eksentis, ke mi, male de mia supozo, ne forgesis ŝin, ankoraŭ amas ŝin, malfeliĉe por ni ĉiuj!

La malnova pasio, kiun la tempo malfacile retenis, ankoraŭ pli arde elŝprucis depost kiam mi ĉiusemajne revidis ŝin ĉeestanta diservojn en unu el la eklezioj de nia diocezo, penanta ŝajnigi sin bona katolikino por malkaŝi la verajn reformaciajn simpatiojn de sia tuta familio.

Mi provis allogi ŝin kaj nun ekkapti la amajn favorojn, kiujn ŝi iam rifuzis al mi, kaj sub la premo de tia intenco, mi ŝin vizitis kaj per troa flatado proponis al ŝi miajn servojn. Sed malgraŭ sinskevaj vizitoj, mi nenion atingis. Komprenante, ke mi estas tute forgesita, mi sentis, ke en mia sino la sentimentala furoro pliintensiĝis kvazaŭ subita kaj violenta erupcio de vulkano dorminta dum jarcentoj! Mi ekprovis dolĉan allogadon, rampante ĉe milo da agoj servemaĉaj, pasiaj, humiligaj. Ŝi tamen digne kontraŭstaris, pruvante absolutan seninteresiĝon pri la inklino, kiun mi metis antaŭ ŝiaj piedoj, kiel ankaŭ pri la sociaj avantaĝoj, kiujn mi povus havigi al ŝi. Mi provis delogi ŝin, komprenigante al ŝi la potencon, kiun mi disponis, la forton, kiun la kostumo de la Kompanio havigis al mi en la tuta mondo; la amason da favoroj, kiujn mi povus fari al ŝi kaj al ŝia edzo, eĉ garantiojn por praktiki sian religian kredon, ĉar mi scipovus

protekti ilin kontraŭ la malpermesoj de la leĝo, se nur ŝi konsentus cedi al miaj febraj amoprojektoj! Sed ŝi min repuŝis sen kompato nek timo, ŝirmante sin en la plej sankta edza fideleco, kiun mi ĝis tiam renkontis, kaj cetere lasante min konvinkita, ke pli faŭke ol iam antaŭe nun oscedas ekstrema abismo inter niaj destinoj, kiujn mi tiel forte deziris vidi por ĉiam unuiĝintaj!

Nu, Hiacinto de Ornelas y Ruiz, kiu sciis pri la pasia enamiĝo malfeliĉiginta al mi la ekzistadon, nun, vidante, ke mi sieĝas lian hejmon per amikaj afablaĵoj, facile komprenis la naturon de la intencoj, kiuj min instigadis. Cetere, mi ilin ne kaŝis. Kontraŭe, mi agis spiteme, ĉar por laiko la persono de jezuito, kiu krome servis kiel gento de la Sankta Ofico, estis ja netuŝebla! Sciiĝinte pri la okazaĵoj pere de la edzino mem, kiu de li provis ĉerpi fortojn kaj konsilojn por kontraŭstari miajn insidajn proponojn, Hiacinto, ne fidante al la povo de la parencaj ligiloj, pleniĝis per timo kaj, aranĝinte interkonsentojn kaj decidojn ĉe siajn superuloj, sin preparis por forlasi Madridon kaj serĉi rifuĝon por si kaj por la familio en eksterlando.

Sed mi ĝin malkovris ĝustatempe! Vivi sen Magda estus turmento, kiun mi jam ne povus elteni! Mi prefere fariĝus mizerulo, eĉ se ŝi min traktus per ankoraŭ pli konsterna malŝato, mi eĉ preferus, ke ŝi malamu min per sia tuta koro, se nur ŝi restus atingebla por miaj okuloj, se mi povus ŝin ofte vidi, se mi havus ŝin proksima al mi, kvankam nin vere disigas akraj, senrimede nevenkeblaj baroj!

Freneza, ĉar mi deziris la neatingeblon je kia ajn kosto, mi denuncis Hiacinton de Ornelas kiel hugenoton al la Tribunalo de la Sankta Ofico, celanta liberiĝi de li por pli facile ekposedi la edzinon! La denuncon mi pruvis per faktoj: libroj herezaj kontraŭ la Virga Patrino, kiuj ĉiam estis teruraj armiloj en la mano de denuncantoj por ruinigi la viktimojn de sia persekutado, ja teruriloj ne malofte forĝitaj de tiuj, kiuj denuncis mem; abunda, kompromita korespondado kun luteranoj el Germanujo; sekretaj interligoj kun adeptoj dissemitaj en la tuta lando, kiel ankaŭ en

Francujo; li sistema forestado en la konfesejo, la nomoj mem de liaj filoj, memorigantaj pri Germanujo kaj Anglujo, sed ne pri Hispanujo, kies atestojn pri bapto li ne povis prezenti, pretekstante, ke la koncernaj gravaj ceremonioj havis lokon en Nederlando! Sed ĉion mi pruvis ne pro zorgo pri la idealoj de religio, kiun mi rigardus inda je respekto, sed ja por venĝi min por la malŝato, kiun pro amo al li Maria Magda sentis kontraŭ mi!

Arestite kaj procesite, Hiacinto estis transdonita al mi laŭ ordono de miaj superuloj, kiuj al mi ne povis rifuzi la unuan tiaspecan peton, kiun mi prezentis al ili, pro la bonaj servoj de mi faritaj al la institucio.

De tiam mi sekrete tenis lin en haladza karcero, kie por la mizerulo komenciĝis longa serio da turmentegaj necesbezonoj, nepriskribeblaj angoroj kaj suferoj, kiujn ne povas imagi la menso de la nuntempa homo edukata sub la aŭspicioj de demokratiaj reĝimoj, kiuj, kvankam ankoraŭ tre neperfektaj, tamen ne plu kapablas precize kompreni la aplikon de la feraj, absurdaj leĝoj de la pasintaj epokoj! Ĉe li mi satigis la koleron tordantan al mi la koron, sentante, ke pro li min forgesis la amata virino! Mia nekonsolebla envio kaj la pereiga ĵaluzo, kiu min frenezigis dum tiom da jaroj, inspiris al mi kruelajn torturprocedojn, kiujn mi aplikis kun demona plezuro, rememorante la rozajn vangojn de Maria Magda, kiujn mi neniam kisis; ŝiajn belajn, karesemajn brakojn, kiuj alian viron – ja lin! – kaj ne min, tenere alpremis al ŝia busto! Malnoble kaj satane mi pagigis al Hiacinto de Ornelas y Ruiz, en la torturĉambro de la Inkvizicia Tribunalo, en Madrido, por ĉiuj kisoj kaj karesoj, kiujn li rabis de mi ĉe tiu virino, kiun mi amis ĝis frenezo kaj malespero!

Mi elŝirigis al li la ungojn kaj la dentojn; rompigis al li la fingrojn kaj elartikigis la pojnojn; brulvundigis la plandojn ĝisulcere, sed malrapide, pacience, per ruĝardaj lamenoj; distranĉe skurĝigis al li la karnon; kaj ĉion mi faris pretekste ke

mi antaŭsavos lin de proanatema kondamno en la inferon, devigante lin konfesi falsajn konspirojn kontraŭ la Eklezio, sub kies nomo mi min kaŝis por la farado de abomenaj malnoblaĵoj!

Sub la premo de frenezaj maltrankviloj, Magda venis al mi...

Plorante, ŝi petegis, ke mi ĉion ĉesigu pro kompato! Ŝi memorigis al mi sian proksiman parencecon kaj la fakton, ke ankaŭ Hiacinto estas mia parenco; la malproksimajn tagojn de nia ĉarma infaneco, travivitajn en la dolĉa kampara vivo ĉe la ĝojoj de la hejmo, kiam ambaŭ ĝuis la ŝirmon de preskaŭfrata intimeco...

Cinika kaj kruela, mi respondis, demandante, ĉu ŝi pensis pri ĉiuj tiuj ravaj detaloj de nia juneco, kiam ŝi, sola aŭ kun la helpo de Hiacinto, planis la abomenan perfidon, kiun ŝi suferigis al mi...

Ŝi parolis pri la filoj, kiuj restus sub la jugo de la akregaj rezultoj el tio, ke la patro estas akuzita de la Sankta Ofico; kaj des pli en la okazo se li mortos pro la longa aresto; kaj ŝi finis, petegante en larmoj pri la vivo kaj la libereco de la edzo, krom ankaŭ pri mia protekto por ke ili trovu rifuĝon en Anglujo...

Kaj vidante ŝin sub la kaprico de miaj decidoj, ĵetinte al ŝi en la vizaĝon la malamplenan galon verŝiĝantan el mia animo, mi parolis:

"– Via edzo revenos al vi, Maria Magda... sed ĉe unu kondiĉo, kiun mi neniel rezignos: Cedu! Estu mia! Konsentu kunligi vian ekzistadon al la mia, eĉ se kaŝite... kaj mi redonos lin al vi kaj plu kaŭzos al li nenian ĉagrenon!..."

La kompatinda ankoraŭ rezistis dum kelke da tagoj. Ĉiujn argumentojn, kiujn virta virino, fidela al la konscienco kaj al la siaj devoj, povus elvoki por evitigi al si la adulton, mia eksfianĉino prezentis, plorante kaj petegante al mia furioza avidego de malhumana kaj senskrupula deloganto, kun la celo deadmoni min de tiu malnobla decido. Sed mi restis nepetegebla kaj kruela,

kia ŝi mem iam fariĝis, kiam mi, malespere vidante min forlasita, petegis, ke ŝi min kompatu kaj ne perfidu mian amon por feliĉigi Hiacinton! Tiu virino, kiun mi tiel forte amis, kiu el mi estus farinta humilan, sklavan edzon, sovaĝigis min per ĵurrompo favore al alia viro! Kaj en ĉi tiu momento leviĝis el la profundaĵoj de mia psiko la malnovaj malicaj instinktoj, kiuj en Jerusalemo, en la jaro 33, igis min peti la kondamnon de Jesuo el Nazareto por la liberiĝo de la bandito Barabaso! Cetere, estis multe da kapricemo kaj vatamo en la motivoj, pro kiuj mi deziris la ruiniĝon de Magda; kaj dum la abomenegata paro trasuferis tiun korŝiran dramon, kiun la hodiaŭa homo ne povas kompreni krom per la koloroj de legendo, mi plezuregis ĉe la ĝojo venki ŝin per disrompo de ŝia feliĉo, kiu tiom ekscitis mian vunditan orgojlon!

Sed, kiam ŝi, kelkajn tagojn post nia interparolo, malsuprenirinte en la ĉambron de torturoj, rigardis la spektron, al kiu reduktiĝis ŝia bela musketoficiro, tiam la malfeliĉega fianĉino de mia junaĝo ne plu hezitis cedi al miaj abomenegindaj kapricoj! Mi ŝin intence kondukis tien, por lin viziti, ĉar mi komprenis, ke ŝia ŝanceliĝemo minacas longe daŭri!

Por mildigi la suferon de la edzo, ŝparante al li la ĉiutagajn, lin konsumantajn turmentojn; por konservi tiun vivon, por ŝi multe pli valoran ol ĉiuj ceteraj bonaĵoj, kaj kiun mia murda furiozo minacis detrui, la malfeliĉa edzino submetiĝis al la turmentisto, sin oferis, celante la liberiĝon, la vivon de la patro de siaj tre karaj filoj!

Malgraŭ tio, mia ĵaluzo pliintensiĝis ĉe la triumfo, ĉar mi sentis min pli abomenegata ol iam antaŭe! Mi intencis persvadi Magdan, ke ŝi por ĉiam ligiĝu al mia destino, malgraŭ ke mi al ŝi redonis la edzon. Sed ŝi, kiu sinofere cedis al miaj postuloj, celante savi lian vivon, ne povis kaŝi la malŝaton, la malamon, kiun al ŝi inspiris mia abomeneginda persono, kio fine kaŭzis al mi lacecon kaj koleron. Mi tial, lacekonsumita, ĉesis batali por ia neatingebla bono kaj rezignis la malsaĝajn aspirojn, kiuj min

frenezigis. Sed eĉ tiel mia menso, sub la inspiro de la potencoj de Malbono, planis sinistran venĝon, kiu, efektiviĝinte kun la plej abomeninda kruelego, kiu povus elŝpruci el la profundaĵoj de koro makulita de envio, resento, ĵaluzo kaj ĉiuj naŭzaj trajtoj de la malnobleco, en kiu ĝi plezuras, – kaŭzis tiujn malfeliĉegojn, kiuj de tri jarcentoj persekutas mian Spiriton kiel sinistra ombro de mi mem, kovranta mian destinon, malfeliĉegoj kies dolorajn epilogojn la estontaj jarcentoj ankoraŭ vidos!

Maria Magda petis min pri la vivo kaj la libereco de la edzo, kaj mi min devontigis ilin redoni al ŝi. Sed ŝi forgesis promesigi min redoni la edzon sendifekta, sen mutiloj. Tial mi *elpikigis al li la okulojn per ruĝardaj ferpikiloj, tiel lin barbare ruinigante, por ĉiam lin ĵetante en la malumon de nevortigebla turmentego,* sed tamen ne komprenante, ke ekzistas unu Ĉiopova Dio rigardanta, de la supro de Sia Justeco, mian abomenan agon, kiu ja gravuriĝis en la faldoj de mia konscienco, kvazaŭ reflektita en spegulo, por min akuzi kaj de mi postuli nenuligeblajn kulpelpagojn tra la jarcentoj!

Ho ve! Ankoraŭ hodiaŭ, tri jarcentojn post la efektiviĝo de tiuj bedaŭrindaj faktoj, ĉe la rememoro de tiel malluma pasinteco, dolorige ŝiras al mi la animon la bildo de tiu malfeliĉega edzino, kiu, irinte, je mia invito, akcepti la kompatindan edzon en la mallibereja korto, kaj konstatinte la amplekson de mia perverseco, faris nenion alian, ol rigardi min kun surprizo kaj poste ploregi surgenue antaŭ la blindigita edzo, brakumante al li la ŝaceliĝantajn krurojn, kisante liajn manojn kun nepreskribebla tenero, akceptante lin, difektitan kaj invalidan, kun senlima amo, dum mi, per mokaj ridoj, sarkasmis:

"– Mi redonis al vi, sinjorino, la vivon kaj la liberecon de via amato, ĝuste tiel kiel ni interkonsentis... Vi ne povos nei mian grandanimecon kontraŭ la iama ĵurrompinta fianĉino, ĉar, povante lin nun mortigi, mi lin remetas en viajn brakojn..."

Sed estis skribite, aŭ ja tiel mi deziris, ke Maria Magda daŭre supreniros akran kaj ŝtorman kalvarion, senrimedan en tiu

malfeliĉa ekzistado: Hiacinto de Ornelas y Ruiz, nerezignacia ĉe tiel bedaŭrinda kiel neatendita situacio, ne dezirante fariĝi malfeliĉiga ŝarĝo en la vivo de sia sindona edzino, kiu nun transprenis la estrecon de la familio kaj plej penegis en heroaj aktivecoj, forlasita de la amikoj, kiuj timis pro la suspektoj de tiu sama tribunalo juĝinta ŝian edzon; forlasita eĉ de mi mem, kiu seninteresiĝe rezignis posedi ŝin, laca de la vanaj provoj fariĝi amata; Hiacinto, dezirante ŝin mem kaj kaj siajn filojn savi de la religia persekutado, kiu fatale etendiĝus super ĉiuj liaj familianoj, sin mortigis du monatojn post sia liberiĝo, kaj por la sinistra ago li estis helpita de la pli juna filo, kiu, en la senkulpeco de sia kvinjaraĝo, transdonis al la patro la diskrete petitan ponardon, kies pinton li almetis al la gorĝo dum la alian ekstremaĵon li apogis sur la rando de tiu tablo, tiel metante finon al sia ekzistado!

Maria Magda, senkonsola kaj malfeliĉa, revenis kun la filoj en sian naskovilaĝon. De tiam, ĝis la momento, en kiu mi skizas ĉi tiujn paĝojn, mi neniam plu vidis ŝin, nek pri ŝi ricevis sciigojn! Kaj, ho mia Dio, jam pasis tri jarcentoj!...

.......................................................................................................................

Ne longe daŭris, kaj la pento komencis viglan reagon en mia mizeriĝinta esto. De tiam, mi ne plu ĝuis trankvilecon, eĉ por endormiĝi. Nepriskribebla stato de nerva superekscititeco tenis min en konstanta konfuziĝo kaj konsterniĝo, vidigante al mi, kie ajn mi troviĝus, la figuron de Hiacinto de Ornelas, turmentegita kaj blinda, kvazaŭ ĝi neforviŝeble gravuriĝus en mia memoro!

Mi eĉ asertas, ke mia strebo al pliboniĝo komenciĝis ĝuste tiam, kiam, transdoninte Hiacinton al lia edzino, mi ŝin vidis surgenuiĝi antaŭ li kaj kovri liajn manojn per kisoj kaj larmoj, donante al li, en la apogeo de malfeliĉo, la pruvon pri ia sublima sento de amo kaj kompato, kian mi ne kapablas kompreni! Ekde tiu momento, mi provis ne plenumi la nigrajn ordonojn de miaj superuloj, kio malrapide puŝis min al neobservado de la devoj

al mi komisiitaj, senigis min je la favoroj, kiujn mi ĝis tiam ĝuadis, kaj fine ĵetis min en dumvivan enkarcerigon! Mi do, de la dua duono de la 17a jarcento ĝis nun, komencis elpagi, ĉu sur la Tero kiel homo, ĉu en la Transtombo kiel Spirito, la krimojn kaj kruelaĵojn faritajn sub la ombro de la Sankta Ofico! Sincera pento, pri kiu, miaj amikoj, mi asertas, ke ĝi inspiras ĉiujn miajn agojn, kuraĝigas min alfronti ĉiaspecajn malfeliĉajn situaciojn, kondiĉe ke per ili elviŝiĝu el mia konscienco tiu hontiga makulo, ke mi uzis la sanktan nomon de la Dia Krucumito por la farado de krimoj. Rakonti, kiaj ĝis hodiaŭ estis la koncernaj elprovoj, la larmoj bruligantaj al mi la animon pentintan kaj senkonsolan, la konsternaj atakoj de turmentegaj rimorsoj, kiujn trudis la ekscitegita konscienco, kaj fine la serio da dramaj okazaĵoj, kiuj ekde tiam min persekutas – ja estus laciga, eĉ terura tasko, al kiu mi ne elmetos min. Cetere, necesus verki po kelke da specialaj volumoj por ĉiu koncerna fazo...

Sed fine, en la dua duono de la 19a jarcento – nur tiam – mi prepariĝis por la lasta fazo de la neeviteblaj kulpelpagoj: – la blindeco!

Mi devis iel ajn perdi la vidkapablon, pro tio fariĝi senpova por la propra vivteno, por la honora laboro, kaj tiel akcepti la aliulan helpon, des pli hontigan kaj humiligan al la senmezura orgojlo, kiun mi ankoraŭ ne povis estingi en mia ribelema karaktero, ju pli kompatema kaj dolĉa ĝi estus; mi ankaŭ devis korfrakase rezigni revojn, dezirojn, ambiciojn, kaj samtempe rigardi la bruan disfalon de miaj moralaj kaj intelektaj valoroj, de mia socia pozicio, rezignacie vivante, kun por ĉiam senlumaj okuloj, en senŝanĝa tenebro! Sed mi ankaŭ devis ĉion suferi digne kaj pacience, atestante bedaŭron pri la kruelaj agoj kontraŭ la iama rivalo, same kiel respekton kaj intimajn omaĝojn al tiu sama Jesuo, kies memoro mi multfoje ofendis!

Vi ĉiuj scias pri la malkuraĝo, kiu min ekposedis, kiam mi trovis min blinda! Mi havis neniajn fortojn por tiu terura elprovo en la kulmina horo de mia rehonorindiĝo! Ho, la imanenta

Justeco de la Kreinto, kiu lasas nin al niaj propraj respondecoj, por ke ni mem nin punu aŭ glorigu tra la interplektiĝo kaj sinsekvo, ruinigaj aŭ brilaj, de niaj faroj dum niaj sinsekvaj ekzistadoj! La saman teruron, kiun la blindeco sentigis al Hiacinto de Ornelas, mi ankaŭ sentis, post tri jarcentoj, komprenante, ke mi perdis la lumon de la okuloj! La moralaj turmentoj, la angoroj, la neelteneblaj humiligoj, la nekonsolebla malespero esti sub la kaprico de la mallumo, kiuj puŝis tiun mizerulon al tiu pereiga eraro, nome la memmortigo, ankaŭ akumuliĝis en mi kun tiel potenca ekscito, ke mi imitis lian agon kaj fariĝis, en 1890, memmortiginto, same kiel li ĉirkaŭ la mezo de la 17a jarcento...

Kaj ĉio ja tiel okazis. Ĉu prave, ĉu malprave, ĉu dubinde, tiele okazis... kaj kia ĝi estis, tia mi devis rakonti.

Ĉu el la interplekto de tiu horora intrigo oni komprenu, ke la Superega Leĝo de la Kreinto trudis al mi, kiel kulpelpagon, la memmortigon, ke mi suferu ĝiajn sekvojn?

Tute ne!

La Superega Leĝo, kies dispozicioj havas kiel bazon la superregadon de Amo, Frateco, Bono, Justeco, kiel ankaŭ de Devo kaj la tuta luma strio de ties gloraj sekvoj, kaj kiu krome antaŭzorgas kontraŭ ĉiuj eblecoj de misharmonio kaj diskriminacio, neniam starigus, kiel regulon, tiun kulpon, la plej gravan, kiun ĝi mem kondamnas! Kio okazis kun mi, tio estis pli ĝuste la logika efiko de kaŭzo, kiun mi mem estigis malobee al la Harmonia, Superega Leĝo reganta la Universon! Kondutante malharmonie kun ĝi, implikiĝante en pli kaj pli malnobligaj kompleksoj pro maldecegaj agoj faritaj dum la sinsekvaj korpaj ekzistadoj, mi fatale falus en la apogean malfeliĉegon, simile al la ŝtona bloko, kiu, ĵetite el la montosupro, rapide kaj neeviteble ruliĝas en la fundon de la abismo...

Ĉar fatalo ja estas nia kreaĵo, naskita de niaj eraroj kaj senpripensaĵoj laŭlonge de la aĝoj kaj de la tempo!

Ĉu vi, leganto, min kredas aŭ ne, tio tamen ne elstrekos la liniojn de la vero, kiun mi pale elmontris sur tiuj paĝoj: la malgaja

historio de la homaro, kun siaj ŝarĝoj el malfeliĉegoj, kiujn vi tiel bone konas, ĉiutage elvolviĝas antaŭ vi, pruvante, per identaj ekzemploj, tiujn, kiujn mi ĵus prezentis...

# Ĉapitro VI
## La ina elemento

Subtenata de la kompatemaj brakoj de Petro kaj Salustio, mi forlasis la templon, kie la sanktega mistero de tiom da surteraj migradoj leviĝis el la tenejoj de mia animo, donante al mi kiel ankaŭ al miaj kunuloj altvalorajn klarigojn. Tiu rememorado estis penega, malgraŭ la ĉeesto kaj la potenca kunhelpo de la eminentaj mentoroj, kiuj zorgis pri mi. La rememoroj pri la kulpa pasinteco, la suferoj, kiujn mi spertis tra la tempoj kaj kiuj nun emerĝis revivigitaj por taksado en la estanteco, min profunde konsternis kaj senkuraĝigis, kvazaŭ ili traŭmatizus al mi la sentojn kaj la fakultojn. Mi sekve ekmalsaniĝis, ĉar la mensaj fortoj, same kiel la sentoj, interpuŝiĝadis ĉe delikata kaj laciga proceso de persona psika memekzameno. Pro tio oni min kondukis en iun klinikan kabineton apudan al la loko, en kiu efektiviĝis tiuj operacioj, tiel strangaj kiel sublimaj. Du inicitoj plenumis tie sian tagdeĵoron, ĉar tiaj akcidentoj, kiel tiu de mi travivita, estis ordinaraj, eĉ ĉiutagaj, inter la disĉiploj, kies peka mensoprovizo ilin ĵetadis en nebrideblajn halucinokrizojn, kiuj kelkfoje randumis la demencon.

Bonkore min akceptinte en tiu fako, kie unu plian parfumon de la Karitato oni enspirigis al niaj feblaj, senkuraĝaj Spiritoj, la diligentaj servantoj de la Legio havigis al mi, ĉe tiu krizokaza

situacio, kvazaŭ balzaman magnetisman kuracadon, kiun sekvis, en la postaj tagoj, efikega, speciala psiko-klinika observado.

Post kelkaj tagoj, reveninte en la lumon de neneigebla realeco, tute konsciante mian veran personecon, mi mature pripensis kaj konkludis, ke la sola rimedo, per kiu mi iam atingos plenan rehonorindiĝon antaŭ la konscienco kaj la Superega Leĝo, kiun mi de longe malobeadis, estas – Reenkarniĝi! Jes, ankoraŭfoje renaskiĝi! Serene kaj digne suferi la provon perdi la vidkapablon, ĉe kiu mi antaŭ ne longe fiaskis, ĉar al ĝi mi ne submetiĝis, preferante min mem mortigi, ol trapasi la vivon sen la vidado; fari la malon de tio, kion mi faris antaŭe, nome ami la similulojn karitate kaj kompateme, protekti, helpi, servi la proksimulon, uzante ĉiujn disponeblajn, honestajn kaj bonfarajn rimedojn; iri, se eble kaj necese, ĝis abnegacia memoferado, sub la moralaj frakasaj sekvoj de mia amara pasinteco, por konkretigi sanktajn frujtojn de la Vera Bono, kiuj min helpus kompensi la iam dissemitan mallumon!

Nekontraŭstarebla malĝojo, eble ankoraŭ pli dolore ol ĝis nun, de tiu momento plenigis miajn horojn per novaj afliktoj; kaj la superregantaj, ĉagrenaj impresoj de ia rimorso, kiun nenio homa povas esprimi, neebligis al mi ĝui ian ajn formon de vera feliĉo!

Sed min revigligadis tiel la bonkoraj mentoroj, la rondo de la amataj amikoj, la afablaj, karitataj gardistinoj, kiel ankaŭ miaj kunuloj en luktoj kaj malfeliĉoj, ĉar la suferoj de unu respegulis la suferojn de la ceteraj; kaj ĉiuj donis siajn plej bonajn konsilojn kaj ekzemplojn, insiste kuraĝigante al la lernado, kiu iris sian normalan vojon, kaj nin tuj kondukante al la reeduka laborado sen atendi ĝis la taskoj plenumotaj dum la fizika-materia renaskiĝo, kiuj ankoraŭ eĉ ne estis skizitaj.

Nu, unu el la plej efikaj kuraĝigaj rimedoj, celantaj, ke ni rezignaciu pri nia situacio, estis ĝuste tiuj kunvenoj pri Arto kaj Moralo, pri kiuj ni jam havis la okazon paroli, kaj kiuj, kun la paso de l´ tempo, prenis specialan karakteron pro tio, ke ili servis

al nia individua reboniĝo per siaj ekzemploj, elmontroj kaj analizoj, kiuj al ni prezentis sekvindajn vojojn, imitindajn agojn ktp, ktp. Tiucele, en la parkoj de la Urbo, kies vastecon ni ĝis tiam ne povis taksi, ekzistis lokoj de ia impresa beleco neimagebla por la homa estaĵo, por la ideala supereco tiel de la tuto kiel ankaŭ de ĉiu detalo, por la elvokivaj nuancoj, altirantaj la penson en la regionon de la Harmonia Arto. Temis ĝustadire pri domoj, loĝejoj, kies arkitekturaj linioj kaj dekoracio superis ĉion, kion plej grandiozan kaj belan kreis la surteraj klasikuloj; pri miniaturaj urboj aŭ pitoreske belaj vilaĝoj kun graciaj lagoj borderitaj per bonodoraj flortapiŝoj; pri temploj dediĉitaj al la praktikado de Beletro kaj de Artoj ĝenerale, precipe de Muziko kaj Poezio, pri kiuj ni konstatis, ke ili tie atingas amplekson kapturnan, neimageblan pro ĉia surtera pensulo, kiel ekzemple ĉe Frederiko Ŝopeno, kiun ni havis la okazon vidi transfiguranta la magion de l' sonoj en ĉarman poezian verkon esprimatan per ravega sinsekvo da idealaj vizioj, kiuj translimis nian konceptadon pri la ideo de l' Belo kaj, verŝigante al ni larmojn de neniam spertita kortuŝo, kunhelpis por la vekiĝo de spiritaj kapabloj, kiuj en nia memo restis latentaj! Oni eĉ povus aserti, ke Muziko kaj Poezio estas la artoj preferataj de la inicitoj – se estus ebla la ekzisto de tiaj preferoj en tiaj mensoj, edukitaj laŭ la principoj de la plej alta Idealo, kiun ni povus koncepti. Kaj eĉ refiguraĵoj ekzaktaj, sed prezentitaj en sublima kvintesenca stato, senmakule kaj ĝisriverence plibeligitaj, ĉar fluidece strukturitaj sub la premo de voloj spertiĝintaj pri la superaj, grandiozaj konceptadoj pri Amo kaj Bono – de la pejzaĝoj elvokantaj la mesian pilgrimadon, de tiuj impresaj kaj ĉarmaj scenejoj, kie aŭdiĝis la unuaj melodioj de la senmorta voĉo, kiu malsuprenvenis el la Ĉielaj Regionoj por konsoladi la suferantojn kaj liberigi la ŝarĝitojn!

Tiel oni donis al ni la grandegan ĝojon iri laŭborde de la lago Genesareto, pilgrimi Tiberiason kaj aliajn karmemorajn lokojn, atestintajn la dian apostoladon de la Sinjoro; kaj tiaj estis la sugestioj saturantaj tiujn refiguraĵojn, ke ni havis la

impreson, kvazaŭ la Dia Amiko estus ĵus de tie foriĝinta, ĉar al ni ankoraŭ aŭdiĝis, en la menso, la dolĉa flustro de lia voĉo kvazaŭ elsendanta la lastajn akordojn, kiuj ŝajnis vibri en la aero, de la neforgesebla melodio, kiu de du mil jaroj tiel funde tuŝas la korojn de la nefavoritojn de la sorto:

*"Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos. Lernu ĉe mi, car mi estas milda kaj korhumila, kaj vi trovos ripozon por viaj animoj..."*

Ĉe tiuj grandiozaj elmontroj de amo kaj respektego al la Majstro, prezentitaj de la noblaj estuloj subtenantaj la belecon de la urbo, kiun mi loĝis, mi multfoje enabismiĝis en profundajn, kortuŝajn meditadojn, verŝante dolorajn, pentoplenajn larmojn ĉe la elvoko de tiu jaro 33, kiun mi nun povis facile rememori –, kiam, pacience, humile kaj rezignacie portante la krucon sur siaj ŝultroj, la Mesio, nun respektegata en mia koro, supreniris la deklivon direkte al la Kalvario, dum mi satane blekegadis, postulante lian tujan martirigon!

Ĉe la enirejo al ĉiu el tiuj lokoj vidiĝis la emblemo de la Legio kaj la nomoj de tiuj servantinoj, kiuj ilin imagis kaj konkretigis, ĉar konvenas rimarkigi, ke tiajn detalplenajn kreaĵojn efektivigis la ina elemento servanta en la edukaj laboroj de nia Instituto.

En la tagoj de tiuj kunvenoj, oni ĝuigis al la ĉeestantoj kaj speciale al la internuloj plej agrablajn momentojn de sublima lernado, dum kiuj al ni estis prezentitaj kortuŝaj ekzemploj de abnegacio, de sindono al la proksimulo, de humileco kaj pacienco, kiel ankaŭ de heroeco kaj morala valoro fronte al la malfeliĉo, kaj tiuj ekzemploj penetris nian internon kiel bonfara instigo al la progreso, al kiu ni bezonis strebi. Tiu lernado, kiun al ni proponis la entuziasmigaj lecionoj ĉerpitaj el la historio de la homaro, kun ties sennombraj luktoj kaj suferoj, venkoj kaj renobliĝoj, efektiviĝis sub la gvidado de niaj mentoroj kaj instruistoj mem aŭ de vizitantaj karavanoj, kiuj malsuprenvenis

al ni kun la frata celo kunhelpi por nia konsolo kaj progreso. Sed multajn intensajn dramojn, travivitajn de la sinjorinoj mem de la Viglado kiel ankaŭ de elstaraj personoj de nia Kolonio, kiel Ramiro de Guzman kaj ambaŭ de Canalejas, oni al ni permesis ekkoni kiel ekzemplon kaj averton, el kiuj grandan parton oni eĉ prezentis kiel imitindajn modelojn de konduto. Tiuj dramoj estis nenio alia, ol ilia rakonto pri siaj luktoj tenataj dum la progresocelaj elprovoj, ĉe la sinoferoj faritaj dum la enkarna ekzistado aŭ ĉe la senlacaj laboroj en la Spaco. Pri la donitaj lecionoj, oni poste petis nin prezenti nian opinion, fari konsiderojn kaj eldiri moralajn, artismajn komentariojn. En tiuj okazoj, ni rimarkis, inter multaj aliaj motivoj por nia reboniĝo sur la kampo de la Moralo, la surprizan fakton, ke la homon ĉirkaŭas la plej ĉarmaj esprimoj de ia Arto supera al ĉiuj ceteraj artoj, dum la absorbaj ĉiutagaj laboroj: – la glora Arto lerni disvolvi en si mem la spiritajn valorojn ankoraŭ latentajn en la profundaĵoj de lia animo!

Unu tagon, oni fine informis al ni, ke al niaj bonkoraj gardistinoj venis la vico prezenti la frujton de siaj lumaj meditoj, de sia sentemeco noble turnita al la superaj idealoj. Kiel nature, granda entuziasmo ekscitis nian grupon; ni emociiĝis pro la atendado, kaj en la difinita tago, regataj de neretenebla ĝojo, ni iris al tiuj lokoj kreitaj de niaj afablaj amikinoj, kies fratina sindono tenadis ĉiam hela en nia interno la flamon de la sanktega amo al la Familio, la altiriĝon al la hejmo, la respekton al ni mem.

Rita de Kasja estis poetino. Ŝia sentema temperamento de sincere fervora kredantino kaj ŝia ĉiama karaktero fortiĝinta en la ĉiutaga entuziasmo por la agoj de amo kaj sindono al la proksimulo, ĉu en la sino de la societo, en kiu ŝi spirite vivis, ĉu en la plenumado de la taskoj al ŝi komisiitaj en la surteraj regionoj, lasis sin gvidi de la vera inspiro. Ŝi mem venis en la internulejon peti pri nia ĉeesto kaj nin kondukis en sian loĝejon, kien ni eniris je la unua fojo. Temis pri delikata sanktejo, konstruita laŭ kortuŝaj inspiroj de ŝia granda filina amo, ĉar ŝi

ĝin konceptis laŭ la sanktigaj kaj rezignaciaj resopiroj pri siaj iamaj surteraj gepatroj, kiuj ŝin multe amis tial, ke Rinjo estis modelo de filino amema kaj milda, dankema kaj respektema! Al sia loĝejo en la Urbo Espero ŝi donis do la formon, detalplenan sed altigitan ĝis impresa beleco, de la gepatra hejmo, sub kies zorgoj ŝi vivis sian mallongan, lastan surplanedan ekzistadon, en Portugalujo, finiĝintan en la jaro 1790...

... Dolĉe falis la vespero. Mildaj nuancoj mikskolorigis per buntaj rebriloj la melankolian atmosferon de la Universitata Urbo, kiu aspektis kvazaŭ saturita de rebonigaj, lumbrilaj fluidaĵoj. Tiuj fluidaĵoj plibeligis la urbon, plenigis ĝin per paco, tiel emigante ĉiujn mensojn tie kolektiĝintajn al mildaj sentoj, agordante ĉiujn korojn al superaj taktoj.

Malgranda estis la nombro de la invititoj, kiujn la ĉarma estaĵo akceptos en tiu vespero. Ŝiaj zorgatoj, iuj pli intimaj amikoj kaj la majstroj inicitoj, kies ĉeesto estis nepre necesa – ĉar ankaŭ ŝi lernis ĉe la kontakto kun tiuj klarmensaj inteligentoj, kiuj nin edukadis – jen la tuta ĉeestantaro. Inter la amikoj ni rimarkis kun plezuro la aleston de ambaŭ de Canalejas, de Joel Steel, al kiu la knabino ŝajne dediĉis fervoran, fratan amon, kaj ankaŭ de Ramiro de Guzman.

Post kiam ĉiuj kolektiĝis, la juna poetino invitis nin en iun agrablan angulon de la ĝardeno, kie la lastaj radioj de la Reĝo-Astro, harmonie miksiĝante kun la mediaj fluidaĵoj, konkretigis ravegan nuancon, kio al ni, mizeraj estaĵoj nekonantaj la fascinajn temojn ordinarajn en la spirita mondo, ŝajnis eltranĉaĵo el la ĉielo tien transplantita kiel ĉarma kaj konsola beno. Ni eniris en ĉambron kun vastaj kaj komfortaj dimensioj, veran sonĝoregionan miraĵon, kies gracieco kaj dolĉa beleco estis mildaj atestaĵoj pri la nobleco de ties aŭtorino, knabino kies menso, kvankam tre progresinta, plezure konservis la delikatan sentemon de la dekkvinjara aĝo. Temis pri malgranda subĉiela salono, girlande ornamita per grimprozujoj, kies aromo delektis, ekscitante la senton pri la Belo, la fervoron pri la plejbono.

Artisme originalaj foteloj duonronde viciĝis, gracie antaŭemigante la lokon, kvazaŭ tie estus atendataj anĝeloj aŭ feinoj por elita kunveno, dum en la supro la dolĉe blua firmamento lasis elflui la foran helecon de la planedoj kaj multkoloraj sunoj, ankaŭ kunelverŝante la brilegan harmonion de sia ĉiela beleco.

Iu harpo, kiu ŝajnis strukturita per orbrilegaj esencoj, tre belaj kaj diafanaj, elstare sidis apud malgranda tablo de sama konsisto, artisme tajlita kvazaŭ filigrana juvelo, kaj sur ĉi tiu iu libro – ja granda albumo – fluideca ĉarmaĵo, lumanta kiel eta blua stelo, tuj altiris la atenton de la ĉeestantoj.

Lokinte la gastojn en la foteloj, Rinjo de Cassia eksidis ĉe la tablo, dum ni, ŝiaj zorgatoj, okupis la unuan vicon. La ĝentila guvernistino prenis la libron kaj ĝin malfermis. Ĝi estis la plej nova kolekto de ŝiaj poeziaĵoj, puraj kreaĵoj de ŝia menso, turnita al superaj idealoj, sur la kampo de la nobla kaj laŭdinda versarto. La lumaj literoj, kvazaŭ sub la efiko de nedifinebla, sankta magnetismo, scintiladis kvazaŭ ili estus faritaj el strioj kisataj de la rebriloj el foraj steloj, kiuj kun ni ĝuis la harmonion de la vesperkrepusko.

La juna amfitrionino petis fraton Ramiro de Guzman, ke li ŝin akompanu per la harpo, kion li ĝentile konsentis. Klasikaj akordoj de milda melodio ondadis tra la florplena, parfumita ĉambro, donante tamen la impreson, ke tuta orkestro aŭdiĝas ekskluzive dank' al la sugestia subteno de la dia muzikilo.

Kaj jen, en la harmoniplena silento de la bela Universitata Urbo, sub la flora baldakeno de la lumbrilaj rozoj kaj la splenda beno de la steloj, Rinjo ekdeklamis siajn poeziaĵojn. Kaj ni, kiuj en tiu tempo apenaŭ agordiĝis al nia loĝloko; kiuj, malgraŭ tio, jam estis ricevintaj ĉarmajn lecionojn pri Moralo, Filozofio kaj Scienco, ni en tiu momento ankaŭ estis regalitaj per neniam antaŭe viditaj bildoj de nepriskribebla literatura beleco, ĝis tiam neimageblaj por niaj mensoj! Rinjo legadis el sia albumo. Sed ŝia supera legado, ŝia deklamado, pli ol mirinda – ja dia! –, kun

artisma tono, el vibroj, kies kortuŝega dolĉeco neebligis, ke oni ĝin priskribu en homa lingvo, ĝuigis neimageblajn raviĝojn kaj emociojn, dum de Guzman kompletigis la fascinpovon de la verko per akordoj de ia pura, grandioza muziko!

Spirito jam kapabliĝinta sekvi la vojon de senhalta progreso, Rita de Kasja de Forĵas' Frazan', kies nomo estis mem poezio, ankaŭ estis unu el tiuj malmultaj gardistinoj, kiuj plene scipovis krei scenojn el siaj pensoj, ilin kunordigi, vivigi, kaj al ili doni moralan, pedagogian formon, tiel konkretigante, per unu sola mensa laboro, la belon de la Arto, la moralon de la Leĝo, la Utilon de atentokapta leciono montranta al ĉiu la sanktan devon servadi, per siaj mensaj kaj intelektaj kapabloj, al la idealo de Vero! Ni, kiuj formis la ĉeestantan dekopan grupon da kulpuloj, ja kulturis Beletron dum nia enkarna ekzistado sur la terglobo. Sed neniu el ni sciis nobligi tiun subliman doton, kiun al ni havigis la senĉesa laborado de la Penso, ĝin servigante al la morala altigo de niaj legantoj. Ni maksimume servadis al niaj monaj interesoj, al niaj vantamo kaj orgojlo, kontentiĝante per tio, ke ni sentis nin kiel privilegiulojn, meritantajn specialan pozicion super ĉiuj ceteraj homoj. Ni efektive nur produktis banalaĵojn destinitajn al la forgeso, aŭ en malpli bona okazo, venenintajn, per eraraj teorioj, la impresiĝeman menson de iu aŭ iu alia leginto, tiel frivolan kiel ni, kiu niajn opiniojn prenis serioze.

Sed jen, en la transtombo, knabino apenaŭ dekkvinjara montriĝis al ni kiel modelo de moraligita intelektulo, instruis al ni kiel labori por nia propra kaj por aliula elaĉeto, samtempe kulturante tion plezuran kaj belan kaj tiel donante al ni utilan lecionon, kiu, penetrinte la subtilajn faldojn de nia menso, nin konfuzis kaj hontigis, ĉar ni rememoris, kiel ni misuzis niajn intelektajn valorojn.

Dum la gracia poetino deklamis, legante en sia stelkolora albumo, el ŝia ebura frunto eliĝis lumaj ondoj, kiuj radiante en la tuta rozornamita ĉambro, ĝin envolvis en siaj dolĉegaj vibroj

kaj ĉion saturis per sia sugestia potenco. La scenoj pentritaj per la delektaj, muzikplenaj versoj, korpiĝis ĉirkaŭ ni, prezentis vivon kaj moviĝon, trenante nin en la nedifineblan iluzion, ke ni ĉeestis ĉiujn scenejojn kaj okazaĵojn kaj spektas, kvazaŭ fabelaj kunludantoj, la elegiojn aŭ la epopeojn, la dolĉajn amintrigojn, majstre rakontatajn per la plej belaj kaj perfektaj poemoj, kiujn ni ĝis tiam povis ĝui! La poezia heredaĵo, kiun la Tero honoras kiel senmortan trezoron postlasitan de la genioj, kiuj ĝin vizitis, donus nur palan ideon pri tio, kion ni ĉeestis ĉe tiu balzama verperkrepusko en la urbo Espero! La versoj prefere kantis la Naturon, tiel sur la Tero kiel en la Spaco, krom ankaŭ tiu en aliaj loĝataj planedoj jam de ŝi zorge studitaj, laŭdante per ravaj inspiroj aŭ glorante per la dolĉaj tonoj de preĝo la verkon de la Dia Saĝeco, kiun ĉiam envolvas la miregindaj esprimoj de Belo kaj de Perfekteco!

Ĉi tie estis la miregindaj maroj kaj oceanoj, kiujn la poetino dum sia deklamado lerte bildigis al ni, vidigante ties esence propran belecon. Sur la sekvanta paĝo troviĝis la majestaj ordoj al la imponaj, fieraj montoj, eternaj monumentoj de la Naturo glorantaj la Kreaĵaron, riĉaj deponejoj de netakseblaj valoroj, ja sanktaj juvelujoj, kie la Ĉiopova kaŝas trezorojn tiel longe ĝis la homoj per si mem fariĝos indaj je ilia posedo, kiel heredontoj de la diaj havaĵoj! Plue la superabundeco de la praarbaroj, nekonataj mondoj, antaŭ kiuj la filistraj homoj timuliĝas kaj regresas, sed kiuj la idealiston kortuŝas kaj revigligas, inspirante fervoran respekton al Dio. La praarbaroj! Sanktejo fekunda kaj vivoabunda kiel la oceano, en kies sino miriadoj da estaĵoj komencas sian multjarmilan evoluan ascendon al la kulminaj suproj de la Ekzistado, estaĵoj, kiuj, same kiel la tuta Kreitaĵaro, baptiĝas en la vivigaj benoj de la Eternulo, kiu ilin kondukas per la absoluta perfekteco de siaj leĝoj! Sed ankoraŭ pli: – sur sekvanta paĝo floradis elegioj prikantantaj la celadojn de l' homoj por sin elaĉeti; emociaj, ĉarmaj historioj de amikoj de la poetino mem, kiuj suriris vojojn de sinofero por atingi feliĉajn poziciojn

en la spirita skalo!... Ĉe la ravega poezia elano de Rinjo, niaj mensoj vibris agorde kun ŝi, kaptis ŝiajn emociojn, kiuj penetris en niajn spiritajn fibrojn kaj efikis kvazaŭ balzamoj kvietigantaj al ni la konstantajn ĉagrenojn, kiuj nin deprimis. Tio estis, kvazaŭ ni ĉeestus kun ŝia penso en tiu tuta impona kreaĵo de ŝia imago: navigante sur maroj senmezuraj, grimpante grandiozajn montojn por ekvidi ravajn horizontojn; flugante en stelplenaj spacoj, dronante en la irizita etero por ekstaze rigardadi la harmonian iradon de la astroj; kunludante dramojn kaj okazaĵojn elokvente rakontatajn per tiuj altaj, sublimaj esprimoj, kiujn nur la poezio povas ĝuigi al ni!

Vere la prezentitaj temoj ne estis fremdaj al ni.

Ŝi nur parolis pri tio, kio jam troviĝas en nia sciprovizo. Ĝuste tial ni povis ĝisrave ensorbi la grandiozan belecon, kiu de ĉio radiadis. Sed ŝiaj superaj analizoj elmontris karakteron neniam antaŭe konatan, sin prezentante kiel sensacian novaĵon al niaj spiritoj dronintaj en nure homaj konjektoj, ĉar kion ni nun vidis, tio estis la altesprima arto, per kiu oni povus prikanti la dian verkon! Kiam silentis ŝia voĉo kaj la sonoj de la harpo malfortiĝis ĉe la lastaj akordoj, ni, kiuj jam de longe perdis la emon rideti, lasis radii el nia konsolita koro la bonan rideton de edifa ĝojo. Ŝi mem nin alparolis:

"– Kiel vi ja komprenis, miaj karaj fratoj, mi provis aligi la ideon pri la dieco al miaj humilaj verkoj. Mi invitis vin, ankaŭ kiel zorgantino pri la disvolviĝo de la moral-religia sento en viaj koroj, por al vi rememorigi, ke vi, kiel homoj, forgesis kroni viajn literaturajn kreaĵojn per edifaj konkludoj pri la pompoj, kiujn la Universo malkaŝas al la vera pensulo... Dio sin montris al viaj okuloj en la senkomparaj miregindaĵoj de la Naturo! Vi povus lin glori, farante el viaj verkoj oferaĵojn kaj laŭdon al la Vero, tiel helpante aliajn homojn, malpli klerajn ol vi, ankaŭ trovi la Dian Penson dissemitan en la glora historio de la Kreaĵaro!... Sed vi preferis la detruan negativismon, la senenhavajn teoriojn kaj analizojn, la pure homajn konceptojn,

saturitajn per antaŭjuĝoj kaj tial destinitajn al la forgeso, ĉar eĉ vin mem ili ne sukcesis edifi kaj prepari por venko sur ajna kampo!... Kion mi prezentis ĉi-vespere, tion vi rigardis kiel la plej altan kaj subliman literaturan formon por vi koncepteblan. Sciu, tamen, ke por ni ĝi nur estas la komenca punkto, simpla aboco de arto, ĉar mi estas nenio alia ol nura lernantino, humila kaj ankoraŭ hezitema, pri la Universa Scienco...”

..............................................................................................................

Mi ne finos ĉi tiun ĉapitron, antaŭ ol informi la leganton pri la aktivecoj de la Virinaj Departementoj. Ĝis nun mi nur pritraktis la memmortigon de viroj. Sciu, tamen, ke tre malmulton mi aldonos al tio jam priskribita en tiu ĉi volumo, celante nur rimarkigi pri certaj apartaĵoj rilataj al la instruado kaj intima edukado, iel malsamaj koncerne tiujn Spiritojn devontajn renaskiĝi en inaj korpoj por renovigi fiaskintajn klopodojn aŭ ripari gravajn kulpojn malhonorajn tiel por la sekso kiel ankaŭ por la persono, kiu ilin faris.

Estante Spiritoj, ĉiuj homoj egale respondecas pri siaj agoj, konformaj aŭ ne al la dispozicioj de la ĉion reganta Superega Leĝo, kio estas la samo kiel diri, ke niaj fratinoj, la virinoj, kiuj lasas sin posedi de la malespera ideo pri memmortigo, estas trafeblaj por la samaj efikoj de tiu sinistra kaŭzo, kiun ili mem estigis per ago de sia propra volo, efikoj jam sufiĉe montritaj sur ĉi tiuj paĝoj. Ili do respondecas pri siaj agoj, pensoj, mensaj statoj tiom, kiom ni, la viroj. El tio oni konkludos, ke ilia bona aŭ malbona morala provizo decidige influos la staton, en kiun ili falos pro la memmortigo, stato per si mem mizera kaj tial nepre evitenda per la kontraŭago de la morala kuraĝo antaŭ la ordinaraj sortobatoj kaj per la rezignacio ĉe la neeviteblo. Nu, dum nia praktika lernado, kies respondeca instruisto estis la eminenta majstro Souria-Omar, – admirinda estulo, kies reenkarniĝoj, ampleksinte ĉiujn surterajn sociajn kampojn, havigis al li ne nur vastajn sociologiajn sciojn sed ankaŭ

neordinaran sperton psikologian –, tiu majstro, kies lecionoj havis ekskluzive praktikan karakteron, iam kondukis nin al tre interesaj observoj okaze de vizito en la lokoj, kie estis azilitaj niaj malfeliĉo-kunulinoj, kompatindaj virinoj, kiuj, rifuzinte la noblan rolon ekzempli la sublimajn virtojn en la mondo, lasis sin treni en tiun saman abismon de senbridaj pasioj, kiu nin englutis. Ni memoru, ke, veninte de la Sinistra Valo, ankoraŭ ĉe la Departemento de Viglado kaj okaze de nia enmatrikuligo kiel zorgatoj de la Legio de la Servantoj de Maria, ni apartiĝis de ili pro la neceso translokiĝi al la fakoj destinitaj al nia reboniĝo. Viroj kaj virinoj do submetiĝis al la spirita rebonigo en apartaj departementoj, kiuj tamen estis direktataj de samaj nomoj, sub la aŭspicio de la sama institucio.

Ni neniam antaŭe kunvivis kun la sinmortigintaj virinoj. Sed transloĝiĝinte en la Universitatan Urbon, ni renkontis ilin, ĉar tie multaj sinmortigintaj sinjorinoj ankaŭ faris saman reedukan lernadon kaj, kiel ni, tie devis loĝi ĝis sia reveno en la enkarnan ekzistadon, kvankam ili ĉiam ankoraŭ vivis apartigitaj de ni.

Klara, freŝa mateno ornamis per orbluaj tonoj la vastajn avenuojn de la urbo Espero, kiuj tiam prezentis neordinaran movadon. Temis pri multnombra grupo da studentoj, kiuj foriris kun siaj mentoroj por instrucela vizito en la Virinaj Departementoj situantaj en la alia ekstremo de la Kolonio. Pro la vojaĝo, ni ĝuis staton de efektiva ĝojo, revigligitaj de la neesprimebla altirforto de tiu distinginda kompanio, kiu nin honoris per sia protekto, ĉar ankaŭ Hanibalo de Silas, Epaminondo el Vigo kaj pluraj gardistinoj partoprenis en la karavano.

De jam precize dek jaroj ni vivis kiel internuloj en la Urbo Espero. Ni ne plu treniĝe piediris sur la grundo nek devis, kiel iam, helpi nin per ia veturilo... Ni ja progresis! Ni fariĝis malpli densaj, malpli atingeblaj por la planeda altirforto. Ni lernis ŝvebi en la spaco, translokiĝi, per impulso de la volo, en mildaj flugoj, kiuj nin multe plezurigis, en la ĉirkaŭaĵoj de nia Kolonio, kie

ĉio, kvazaŭ ni estus en la gepatra domo, fariĝis al ni pli facila. Tio estis por Spirito la normala maniero de translokiĝo, sed kiun al ni longe neebligis nia mizera situacio de kondamnitoj.

Sed por aliri la Virinajn Departementojn ni ekmarŝis deire de la limoj inter la Viglado kaj la Hospitalaj Departementoj, ĉar tie, en la grandioze bela, limiga avenuo staris la markoj indikantaj la direktojn al la diversaj fakoj, el kiuj konsistis la soleca Korekta Kolonio de tiu transira spirita regiono.

Enirinte en la Virinan Hospitalan Departementon, ni havis la surprizan impreson, ke ni troviĝas en nia Departemento mem, nome en tiu, kiu ĉe nia alveno nin akceptis, ĉar ambaŭ estis tre similaj inter si! Ili havis la samajn fakojn, kiel la Izolejo, la Frenezulejo; prezentis similajn karakterizojn koncerne la moralan kaj mensan staton de la pekulinoj, saman aranĝon en la interna strukturo de la kvartalo! Sed kvankam la direktantaro de ties fakoj estis la sama, ĉar tie Teokrito estis la ĝenerala direktoro de la hospitaloj, Frato Johano estris la Frenezulejon, Pastro Mikelo el Santaremo gvidis la servojn en la Izolejo kaj Pastro Anselmo respondecis pri dependaĵo de la Turo, tamen la internaj funkciuloj, kiel flegistoj, gardistoj kaj gvardianoj ne estis tiuj samaj, kun kiuj ni konatiĝis en la viraj fakoj. Tiajn funkciojn tie plenumis fratinoj, kiuj pri meritoj kaj virtoj neniom malsuperis al siaj kolegoj en la Vira Departemento. Male, tie troviĝis, altruisme klopodante por instrui, konsoli, gardi, prizorgi kaj direkti la internajn aktivecojn de tiu kvartalo, virinaj figuroj tiel respektindaj kaj virtaj, ke, ne sen forta emocio saturanta nian spiritan sentemon, ni ilin rememoras kaj provas portreti sur ĉi tiuj paĝoj. En la unua momento, kiel ankaŭ laŭlonge de la sinsekvaj konkludoj, al kiuj niaj observoj nin kondukis, unu grandioza vero imponis al niaj okuloj, nin ĝislarme kortuŝante, dum en nia memo estiĝis justa respekto al la virino, kiun ni de tiam rigardis kun pli alta estimo, pli granda bonvolemo: – ĉar fakte la Spirito multfoje reenkarniĝinta por virinaj taskoj kaj misioj pli rapide kaj efike akiras la solidajn kaj elaĉetajn virtojn, morale

progresante dum malpli longa tempo! Estas do nepre necese konfesi, ke la funkciulinoj de la inaj departementoj, asistantaj la inicitajn ĉefojn, portis moralajn kaj spiritajn kvalitojn multe pli altajn, ol tiuj de niaj amikoj de Canalejas, Joel Steel, Frato Ambrozio, k.a., al kiuj ni tiom ŝuldis pro ilia senlace zorga protekto. La klinikistaro, kiu, kiel ni scias, konsistis el inicitaj scienculoj, estis la sola vira grupo, kiu tie plenumadis laborojn, sed tiel diskrete, ke oni ilin vidis nur dum ilia mallongedaŭra agado, pro kio ili montriĝis al niaj kunulinoj en la Kolonio same enigmaj kiel ili iam estis al ni. Ni neniam sciis iliajn nomojn, nek iam aŭdis la tembron de iliaj voĉoj! Sed kiom da komplezaj servoj ni ŝuldis al ili! Kiom da ĉielaj benoj ili altiris sur nin por mildigi niajn intimajn dolorojn, dank' al la fekundaj, psiko-magnetaj povoj, kiujn ili posedis! Kiel sindone ili klopodis por nia reboniĝo, kvietigante la ekscitecon de niaj mensoj per la efiko de potencaj fluidecaj balzamoj, refreŝigante la ardon de tiuj sovaĝaj refrapoj, kiuj dum tiom da jaroj turmentis al ni la perispiritojn afekciitajn de la memmortiga bato!

Ridetante, frato Teokrito akceptis nin en la sidejo de la Departemento kaj permesis al ni la viziton en la hospitaloj. En tiu momento ni memoris la tempon, kiam, sub lia direktado, ni estis multfoje vizititaj de similaj karavanoj, kaj, ankaŭ ridetante, ni nun komprenis tiun pasintan okazaĵon...

Tie estis unu vicdirektorino komisiita transigi la ordonojn de la inicitoj al la funkciulinoj, kiuj, sub ŝia estreco, plenumadis noblajn, edifajn laborojn. Ŝi nomiĝis Hortensa de Queluz, aspektis tridekjara kaj de ŝia mieno radiis impresa beleco, atestanta pri la serena ekvilibro de ŝiaj pensoj turnitaj al Bono kaj pri la harmoniaj vibroj de ŝia menso solidiĝinta per nekorupteblaj principoj. Ŝi bonkore proponis al ni sian kompanion, kaj dum ni mildmove iradis sur la longaj avenuoj kovritaj de tiu al ni bone konata neĝblanka tegaĵo, kiu tie, kiel ankaŭ en nia iama hospitala kvartalo, prezentis la karakterizan trajton de la tre densaj spiritaj regionoj, Hortensa de Queluz

paroladis, elmontrante profundan konadon de la virina karaktero.

"– Mi unue vin kondukos, laŭ la rekomendoj de viaj majstroj, al unu el la plej tragikaspektaj lokoj en nia Instituto, kie vi vidos la neimageblon refrapanta per neatenditaj efikoj sur niajn kompatindajn krimajn fratinojn... Estas utile rimarkigi, miaj fratoj, antaŭ ol viaj mentoroj komencos la al vi necesan instruadon, ke la plimulto el la surteraj virinoj bedaŭrinde ankoraŭ ne komprenas la veran celon de sia reenkarniĝo, la rolon de la virino en la harmonia kunvivado de la surteraj popoloj, en la sino de la homaro, al kiu ŝi, kiel ankaŭ la viro, devas servadi! Kutiminte al malŝato kaj malnobla traktado tra la jarcentoj, la surtera virino fine konformiĝis al la malsupereco, sen kuraĝo por leviĝi, sur la vojo de l' virto, el la ĝis nun elportata malhonoro... kaj en tia grado, ke ankoraŭ nun, kiel iam antaŭe, ŝi restas ĉe sklava submetiĝo al la viroj, malkredante la superajn idealojn, ne prepariĝante por plenumi la celojn de la Kreinto, ankoraŭ pli malaltiĝante pro tio, ke ŝi pensas fariĝi egala al la viro, imitante ties pasiojn kaj malnoblajn agojn, kio efektive malhonorigas la reprezentantojn de la vira sekso kaj implikas la inan en labirinton da malmeritoj antaŭ la Superega Leĝo. De tio venas la malfeliĉoj superregantaj la virinojn, kiuj certe restus senrimedaj se la Providenco, per siaj leĝoj indulgaj kaj saĝaj, ne starigus necesajn korektadojn, kiuj ĉiam celos ŝian justan kaj rapidan rehonorindiĝon sur la kampoj de la Spirita Moralo!... Sed rigardu per viaj propraj okuloj... Viaj mentoroj scios elekti la materialon por la hodiaŭa leciono..."

Ni alvenis en la Frenezulejo, kie nin akceptis religiulino. Ŝi estis Vincenta de Guzman, la nobla fratino de nia amiko el la Viglado.

Post la prezentadoj kaj salutoj, Hortensa nin rekomendis al la fratino Vincenta, kiun ŝi rajtige komisiis konduki nin en tiujn lokojn malpermesatajn por ordinaraj vizitantoj, ĉar nun temis pri programita instruado al universitataj lernantoj, kaj post

tio ŝi foriris. Afabla kaj delikata, la juna religiulino, kiu respondecis pri la laboro en la foresto de frato Johano, kondukis nin en pitoreskan, agrablan korton de grandaj dimensioj, al kiu rigardis multnombraj kadritaj fenestroj apartenantaj al sekretaj ĉambroj, aŭ pli ĝuste, al individuaj ĉeloj, kie konvulsie baraktis sinmortigintaj virinoj atakataj de la plej abomena formo de demenco, kiun mi povis observi dum mia longa restado en la transtombaj regionoj. Malesperaj krioj, teruraj ĝemoj plenigis la lokon per tragikaj vibroj, farante ĝin naŭza kaj sinistra, kiel veran loĝejon de frenezuloj! Malgraŭ la tempo pasinta ekde nia eniro en tiun bonfaran Kolonion, ni rememoris la Sinistran Valon kaj profunde miris, ke ankaŭ tie ni aŭdas la nigran ĥoron propran al tiu malluma regiono. Sed neniun demandon ni faris, ĉar ni estis certaj, ke la klarigoj venos en la ĝusta tempo.

Efektive, kvazaŭ ŝi komprenus nian intereson, la religiulino mem forigis niajn dubojn, dum ŝi kondukis nin proksime al la fenestroj, por ke ni rigardu la internon de la diritaj ĉambroj, ĉar neniel eblus al ni tien eniri:

"– Tiuj sinmortigintaj virinoj prezentas la plej altan gradon de respondeco pri sia krimo, kaj tial ili kuntrenas por la estonteco plej grandan nombron da malutiloj kaj devos laŭlonge de l' tempo alfronti turmentegajn situaciojn, kiuj postulos jarcentojn por aliiĝi kaj tute reboniĝi! Ĉi tiuj kompatindulinoj, miaj karaj fratoj, lasis sin sklavigi de sinistraj kompleksoj disvolviĝantaj laŭ tiel malfeliĉigaj sinsekvoj, ke, el morala vidpunkto, ili kvazaŭ similas al tiu, kiu, dronante en kotejo, pli kaj pli enkotiĝas ĉe malhonoriga baraktado por sin liberiĝi... Unu karakterizaĵo de tiuj teruregaj kompleksoj estas la hontiga motivo, kiu ilin forŝiris el la surtera ekzistado antaŭ la tempo difinita de la natura leĝo... Multaj, krom tio, malŝatis la leĝojn de la Edzeco, perfidis la moralon de la edza ligo, forgesante, ke, antaŭ ol reenkarniĝi, ili promesis tiel al la Leĝo, kiel ankaŭ al siaj Spiritaj Protektanoj, fariĝi fidelaj zorgantinoj pri tiu sankta institucio, la Familio, edukante siajn filojn laŭ la leĝoj de la Devo kaj Justeco,

klopodante por fari el ili civitanojn utilajn al la Patrujo kaj al la homaro, sekve al la Dia Idealo kaj al la Leĝo de Dio! Nu bone! Kun tielaj ŝuldoj pezantaj sur la konscienco, kiel malobeo al la Superega Leĝo, ili profanis ne nur la sanktan ligon de l' Edzeco sed ankaŭ la leĝojn de la Kreado, rifuzante la mision de la Patrineco kaj sin fordonante al la surteraj pasioj kaj malvirtoj, ĉar ili preferis indiferente neglekti la plenumadon de sanktegaj devoj, lasante sin regi de la pereiga vantamo propra al koruptiĝintaj sociaj klasoj kaj irante sur la vojoj de la morala malsupereco! Ili elpuŝis el sia ventro, sin deturnante de la noblaj kaj sublimaj devoj de la Patrinceo, la embriiĝantajn korpojn destinitajn por provizora loĝejo de kompatindaj Spiritoj, kiuj devis elpagi ŝuldojn, vivante kun ili en la sama familio, kaj kiuj pro tio urĝe bezonis esti de ili mem naskitaj cele al progreso sur la familia kaj socia kampoj. Per tiaj krimoj, multfoje faritaj, ili nuligis benatajn transmondajn klopodojn de sindonaj laboristoj de la Vinberejo de l' Sinjoro, kiuj la subliman programon por reenkarniĝo de Spirito, bezonanta progresi, plej zorge preparis, por ke la sukceso kronu ilian penadon. Plej grave estas, ke tiajn krimojn ili efektivigis post kiam la reenkarniĝanto jam estis ligita al sia nova, formiĝanta korpo, tio estas, ili plene konsciis, kion ili faras, kaj tial efektivigis abomenindajn infanmurdojn! Tiel, post tiom da plej gravaj krimoj kontraŭ la Prudento, la Konscienco, la Devo, la Moralo, kaj ankaŭ kontraŭ la pudoro esence propra al la virina karaktero, ili antaŭtempe forlasis sian karnan korpon, mortis en la fizika-materia mondo, malhonore atencinte la sanktajn rajtojn de la Naturo. Aliaj, post malvirta, malnobla konduto, pro kiu, per krimaj agoj, sekiĝis en ili la sublimaj naskofontoj propraj al la homa estaĵo, akiris, kiel naturan sekvon, bedaŭrindajn malsanojn kiel tuberkulozon, kanceron, naŭzajn infektojn ktp, ktp, kiuj ilin antaŭtempe forsendis en la nevideblan mondon. Tiel ili ne nur pereigis la karnan korpon, sed ankaŭ difektis sian spiritan estontecon kaj la pacon de sia konscienco, makulante sian fizikan-astralan

envolvaĵon – la perispiriton – per malhonorigaj stigmatoj, kiel vi povos konstati, kaj ankaŭ ĉirkaŭante sin per vibroj tiel misharmoniaj kaj pezaj, ke ĉi tiuj ĝin tute misformis kaj reduktis al malnobla bildo de ŝiaj mensoj...”

Timante pro tio, kion ni vidos, ni alproksimiĝis, dum la fratino de Ramiro de Guzman daŭrigis:

“– Ili apartenas al ĉiuj sociaj surteraj tavoloj, sed ĉi tie ili egalas per sama malsupereco, morala kaj mensa! Sed la plimulto devenas de la altrangaj klasoj, kun pligravigoj nesolveblaj en la daŭro de du, tri aŭ pli da jarcentoj... ĉar mi bedaŭras aserti, miaj fratoj, ke kelkaj el ili, por liberiĝi de la ungegoj de tiela honto en malpli longa tempo, nepre trovos sin antaŭ la terura neceso kelkatempe vivi en mondoj malsuperaj al la Tero, ĉar ne senpune la homo aŭdacos kontraŭstari la diajn decidojn, sin fordonante al tiel senglora batalo kontraŭ la Superega Leĝo!...”

Ĉe unu signo de la zorgema laboristino, ni esploris la internon de la ĉeloj, sed tuj retropaŝis kun gesto de teruro.

Souria-Omar alproksimiĝis, devigante nin preni teniĝon noblan kaj respekteman, dum Vincenta retiriĝis en angulon de la korto.

Ni revenis al la observado, kaj dum la mentoro klarigis, instruante la sciencon per la praktika ekzameno de tio, kion ni vidis kaj kies amplekso enteniĝus en tuta volumo, antaŭ niaj spiritaj okuloj elstariĝis la mizeraj figuroj de la infanmurdistinoj, ankaŭ rigardataj kiel sinmortigintoj.

Ho Dio Ĉioindulga! Kial ekzistas tiaj monstraĵoj en la sanktega lumo de la Universo, kiun Vi kreis, por ke en ĝi gloriĝu la Homo, ke per ĝiaj impulsoj li progresu en Amo, Virto kaj Saĝo, ĝis li Vin respegulos laŭ Via bildo kaj simileco?!... Kiaj abomenaj kaj naŭzaj formoj tiam montriĝis al niaj timemaj okuloj de Spiritoj dezirantaj literumi la unuajn vortojn de la majesta libro de l' Vivo?!... Kiel la virino, delikata kaj bela estaĵo, ornamita per nekontesteblaj ĉarmoj kaj logoj, povis morale malaltiĝi en

tia grado, ke ŝi falis en tiel mizeran situacion?!... Kion ni efektive vidas tie?... Ĉu ja virino tio estas?!!! Ĉu ia primitiva monstro?...

Ne! Tie ni vidas – jes ja! – Spiriton malobeintan plej subliman kaj respektegindan leĝon de la Kreinto, nome la leĝon de reproduktado de la specioj por la grandioza celo de la Progreso! La dian leĝon de generado!

Nigraj, distaŭzitaj figuroj, kvazaŭ envolvitaj en ĉifonoj, prezentantaj la tragikan bildon de la Ruino, baraktadis kontraŭ mil turmentantaj ombroj, kiuj ĉirkaŭ ili plenigis la ĉelon. Sur iliaj korpoj, nigrigitaj de mensaj malpuraĵoj, distingiĝis makuloj similaj al ulceroj, sur kiuj montriĝis impresaj bildoj kvazaŭ strekitaj per fajro aŭ sango! Ni streĉis la atenton, ĉe signo de la instruisto, por pli bone observi. Temis pri la mensa reprodukto de homaj embrioj, kiuj, iam disvolviĝinte en iliaj generaj aparatoj, estis tamen forpuŝitaj el la sankta patrina naskejo pro ago de malobeo kontraŭ la Naturo kaj la dia patreco, sed kies bildoj restis gravuritaj sur la perispirito de la malfidela patrino kiel mensa registro de krimo farita kontraŭ estulo sendefenda kaj meritanta ĉian protekton kaj maksimuman sindonon!

Plurajn el tiuj krimaj estuloj misformis tri, kvin aŭ dek etaj bildoj, kiuj tre difektis ilian vibradon, trudante al ili absolutan mensan malordon. Bedaŭrindaj scenoj, fidelaj reproduktoj de la menso, kiu sin nutris ekskluzive per la nocaj malnoblaj pensoj; voluptaj rememoroj, abundegaj pruvoj pri konduto kontraŭa al la Moralo svarmis en tiu sinistra loko, ĝin transformante en loĝejon de abomeneginda, freneziga kolektivo! La mizerulinoj luktadis, senhalte baraktadis, penante forpeli la makabrajn viziojn, kiuj fontis el iliaj pensoj mem! La estaĵetoj, kiujn ili iam murdis en siaj ventroj, ĉirkaŭe flugetis, sendite de la perispiritaj retrofrapoj en la vibrajn ondojn de la menso, kiuj disradiante kaj reflektiĝante per admirinda, sublima konscienca mekanismo, punis la kulpulinon laŭ la proceso de tute naturaj leĝoj, kiujn ili mem agigis per siaj krimaj faroj! Tiuj estaĵetoj similis al muŝoj senĉese zumantaj ĉirkaŭ mizera kancerulo, lin perturbantaj ĝis

la frenezo pro la neeviteblaj mensmalordoj rezultintaj de tia agado! Kelkaj el tiuj virinoj cetere montriĝis plene obseditaj de la Spiritoj kiuj devus loĝi en tiuj detruitaj korpoj. Ne pardoninte iliajn malnoblajn agojn, malutilajn por siaj urĝaj spiritaj bezonoj, tiuj estuloj ekpersekutis ilin per malamaj, indignoplenaj turmentoj, kiujn faciligis la altiriĝemo inter la perispiritoj de patrino kaj ties ido dank' al la naturaj magnetaj ĉenoj ekzistantaj en la procesoj de la karna renaskiĝo. Ili ja ankoraŭ restis ligitaj al siaj patrinoj, kvazaŭ en la transtombo daŭrus la gravediĝo komenciĝinta en la surtera-homa stato kaj kiun la infanmurdo interrompis! Ĉi tiaj virinoj ŝajnis esti fabelaj monstroj kaj nenia homa esprimo povus priskribi ilian hidan aspekton! Laŭ la klarigoj de la eminenta profesoro, por elpagi sian fatalan, abomenegan eraron, ili renaskiĝos neresanigeble frenezaj, celante reĝustigi siajn malordigitajn vibrojn, ĉar tiaj situacioj estas senrimedaj en la spirita mondo. Ili estos abomenaj, misformitaj, malsanaj, monstroj, kies grado de nenormaleco eble igus la homojn dubi la Saĝecon de iu Ĉiopova Dio, sed kiu male al ili prezentas tre belan elmontron de Lia Saĝo! Aliaj virinoj estis elĵetotaj *en la eksteran mallumon, kie ili plorados kaj grincados per la dentoj* tiel longe, ĝis ili povos liberiĝi de la plej granda malhonoro, kiu malaltigus la Spiriton de virino antaŭ ŝia Kreinto kaj Patro! Sed tiu *ekstera mallumo* estis nenio alia, ol la terura restado en planedoj malsuperaj al la Tero, la hontiga ekzilo de tiu, kiu ne indis akcepton ĉe la civilizitaj socioj de planedo altiĝonta sur la vojo de l' progreso cele al Frateco kaj al Moralo!

Konsterne teruritaj antaŭ ĉio, kion ni vidas kaj aŭdas de la mentoro, kaj ne sen surprizo, ni rimarkis, ke la Virina Frenezulejo prezentas kazojn profunde pli dolorajn kaj gravajn, ol iuj ekzistantaj en la sama fako por viroj, ĉar ĉi tiujn la unuaj superas pro siaj pli tragikaj sekvoj!

Ni sentis nin forte impresitaj antaŭ tiom da mizero por ni neimagebla malgraŭ tio, ke ni ankaŭ estis kulpaj Spiritoj! Ni ja preferus la dolĉan instruadon de Hanibalo, plenan de la milda

magio de la Evangelio kaj de la ravaj vizioj pri la mesia apostolado... Sed ĉar ni prenis la firman decidon progresi, tial lernado estis al ni nepre necesa. Ĉio do, kion ni tie vidis, prezentis rimedon por reedukiĝo, sperton al ni riĉigantan la menson kaj la koron!

Unu el la lernantoj elmovis demandon naĝantan en la ceteraj mensoj:

"– Ni memoras, ke ĉi tiujn ni ne vidis en la Sinistra Valo... Ĉu ilia stato ne pli ĝuste konformas al tia loko?..."

"– Ĉu vi supozas, ke ja ĉiujn kulpulojn la leĝo devigos resti en unu sola, difinita regiono de la Nevidebla Mondo? – bonvoleme klarigis la mentoro. – Aŭ ĉu vi ne scias, ke ili ankaŭ treniĝas en la malsupraj tavoloj de la surteraj socioj, ĉe tiuj malvirtaj medioj, de kiuj ili altiriĝis eĉ antaŭ sia elkarniĝo?... Ĉu ilia infero, la ardego brulvundanta al ili la konsciencon, ne prefere troviĝas en la fornegoj de la rimorsoj, kiujn ili mem bruligis en siaj mensoj?...

Ne! Ĉi tiuj, kiujn vi nun vidas, ne estis en la Sinistra Valo tial, ke la eniro de sinmortiginto en tiun regionon jam signifas, ke li emas al reboniĝo laŭ koncerna normala proceso... Sed ĉi tiuj malfeliĉaj fratinoj, absolute afinantan al la mallumo, kun la konscienco makulita de teruraj ŝuldoj kaj de longe vivantaj en kompanio de estuloj malnobliĝintaj en la farado de malbono, al kies inspiroj ili alkroĉiĝis per samnaturaj mensaj ligiloj, – envolviĝis, post la fizika morto, en ties malutilajn vibrojn, restante ĝis nun en tia stato. Tiaj ili restos tra la estonteco tiel longe, ĝis akregaj kulpelpagaj provoj, ekzistadoj riĉaj je laboroj por la vera bono malfaros la ligilojn, kiuj ilin sklavigas al la malbono, kaj elpurigos iliajn konsciencojn el tiu tuta sinistra materialo, kiu ilin nun malbeligas... Estas ja vere, ke eĉ en sia nuna bedaŭrinda situacio ili statas pli bone ol iam antaŭe. Ili almenaŭ ĝuas la sindonan protekton de fidelaj amikoj de Bono kaj la ŝirmon de sekura loko, kie ilin ne plu turmentos la iamaj malicemaj kunuloj de malbonfarado, nek la malamikoj, kiuj de longe sekvas iliajn

pasojn kvazaŭ korvoj priflarantaj putraĵon. Multaj el ĉi tiuj malfeliĉulinoj estis postmorte kondukitaj de la perversa legio, kies kompanion ili meritis pro siaj frenezaj agoj, en sinistrajn lokojn de la Nevideblo kaj de la Tero mem, kie ili estis submetitaj al kruelaĵoj kaj hontigoj neimageblaj, nepriskribeblaj! Estas kazoj, ĉe kiuj la estuloj, kiujn ili devis naski sed kiujn ili forpuŝis, kaŭzante gradajn malutilojn kaj suferojn, kuniĝas kun tiuj malicaj Spiritoj ilin ĉirkaŭantaj por ankaŭ puni ilin per abomeneginda venĝado. Aliaj virinoj, altiritaj de malnovaj inklinoj, longe restadis en surteraj lokoj de volupto kaj diboĉo, kie ili bestece vivis, mense sklavigitaj al malŝatindaj instinktoj. Ankoraŭ aliaj, senesperaj, malicemaj, proksimiĝis al enkarniĝintaj virinoj akceptantaj ilian influon por al ĉi tiuj sugesti la faradon de tiuj samaj krimoj, kiuj iam ilin faligis, agante kiel perfektaj demonoj sub la inspiro de la plej malnoblaj sentoj de envio kaj ĵaluzo, ke ili jam ne portas karnan envolvaĵon! Paroli pri la lacigaj laboroj, al kiuj sin devontigas la laboristoj de la Sekcio de Eksteraj Rilatoj kaj ceteraj volontuloj, por liberigi ilin de la ungegoj de tiela malhonoro, estas superflue en ĉi tiu momento, ĉar pri tiuj laboroj vi jam havas ian ideon dank' al via kunlaborado en la servoj de la Viglado, kunlaborado kiu, kiel vi scias, estas parto de la lernado, kiun vi devas fari ĉe ni. Ili reenkarniĝos tiaj, kiaj ili nun sin trovas, kaj estas jam faritaj ĉiuj necesaj paŝoj por ilia reveno al la enkorpa vivo. Ĉar ilia stato ne permesas al ili ian ajn elekton, tial la Leĝo, por ke ili konkeru pli bonan situacion, trudas al ili la revenon en la karnon en kondiĉoj konformaj al ilia grado de prirespondeco, aŭ pli ĝuste, la malmerito akumuliĝinta pro la sinsekvaj eraroj ilin pelas en terurajn kulpelpagajn enkarniĝojn, kaj tio signifas, ke per sia iama krimado ili mem konstruis tiun sorton el mallumo, larmoj kaj kulpelaĉetoj, el kiu ili tute ne povos eskapi! La kompleksoj, kiujn ili amasigis sur sin estas nekuraceblaj en la transtombaj regionoj, kaj, pro sia urĝa bezono de reboniĝo en siaj vibroj, ili renaskiĝos en ia ajn surtera familio same travivonta dolorajn kulpelpagojn aŭ sufiĉe kristana kaj

agnegacia por la karitata ago ilin akcepti pro amo al Dio... kio ja ne estos tiel facila...”

La ceteraj fakoj de la Frenezulejo, kiel ankaŭ tiuj de la Izolejo kaj de la Turo, prezentis al nia ekzameno dramecon egalan al tiu jam montrita en supraj raportoj, tial ni detenos nin de priskriba ripeto. Sed el ĉio pruviĝis granda kaj bela vero: la virino estas spirite tiel respondeca antaŭ la Leĝo kiel la viro, ĉar, krom virino, ŝi estas super ĉio Spirito, kiu devos altiriĝi de Bono, Justeco kaj Lumo per volonta plenumado de la noblaj kaj sanktigaj taskoj al ŝi komisiitaj de la Kreinto, se ŝi ne volas kulpi pri tiuj samaj malmeritoj kaj ŝuldoj!

Sed ni trovis en la Virina Departemento ian sekcion ne ekzistantan en la viraj loĝkvartaloj, kiun gravas priskribi. Ĝi estis la Internulejo por Junulinoj – kiel ĝin nomis la bonaj gardistinoj –, iaspeca modela edukejo por sinmortigintaj junulinoj, kies sinistran agon kaŭzis senprudentiĝo, sentimentala aŭ ne, amaj disreviĝoj ktp, ktp. Ĉar tia fako ekzistis tiel en la hospitalaro kiel ankaŭ en la Urbo Espero, mi konkludis, ke la koncernaj internulinoj, ekde sia eniro en la Kolonion, ne vivas en kuneco kun la ceteraj pacientinoj. Sed kiuj, dum sia restado en la hospitalaj fakoj, submetataj al severa psika kuracado fare de tiuj samaj abnegaciaj kuracistoj, kiuj nin prizorgis, atingis vibran reboniĝon sufiĉan por transloĝiĝi en la edukejojn de la Universitata Urbo, tiuj ricevis la gvidadon de virtaj inaj Spiritoj, komisiitaj ilin prepari por la reveno al la surtera elprovado, kie ili refoje provos plenumi devojn, kiujn ili ĵus malŝatis per la grava krimo de memmortigo, kaj kie ili ankaŭ devos sin doni al taskoj propre koncernantaj la virinan zorgemon. Tiu instruado disvolviĝis do sub la gvido de tiuj samaj majstroj, kiuj ni edukis, kaj kiuj ankaŭ kondukis la lernadon pri kunlaboro kun la internaj kaj eksteraj servoj de la Kolonio, kiel ni jam informis. Unuvorte, tiuj junulinoj intruiĝis ĉe Virina Akademio, kie ili devis lerni la veran rolon, kiun la virino devas plenumi en la surteraj socioj, nome la rolon de virino virta kaj kristana, ĉar ĝuste la dekliniĝo

de tiu devo kaŭzis la forlogiĝon, el kiu rezultis la timiga krimo, en kiun ili sin ĵetis! Sed el la Frenezulejo neniam eliris grupoj por vizitadi la kursojn de tiu Akademio, same kiel tre malmultajn internulinojn la Izolejo sendis partopreni en tiuj gravaj lernadoj. Ĝenerale tiuj grupoj estis malgrandaj kaj, same kiel ĉe la viroj, ili venis de la Ĉefa Hospitalo. Sed de la Internulejo por Virinoj ĉiam venis la plimulto de la lernantoj en la diversaj kursoj en la Universitata Urbo.

# Ĉapitro VII
## **Lastaj trajtoj**

Ĝuste de antaŭ kvindek du jaroj mi loĝas en la spirita mondo. Ĝin enirinte per la violento de memmortigo, ankoraŭ nun mi ne ĝuas la feliĉon kaj la intiman pacon, kiuj estas senmorta konkero de la justuloj kaj obeantoj al la Leĝo. Dum tiel longa tempo mi propravole prokrastis la plenumon de la sankta devo renaskiĝi en la fizika-materia kampo vestita en la armaĵo de nova korpo, kio nun jam tre maldolĉigas miajn tagojn, kvankam mi tiel agis celante ankoraŭ sorbi, ĉe la noblaj instruistoj, tiun edukan materialon, de kiu mi, droninte en la karno, ricevos sufiĉan protekton por venki ĉe la grandaj bataloj, kiujn mi alfrontos por konkeri mian moral-spiritan rehonorindiĝon.

Multon mi lernis dum tiu duonjarcenta internula loĝado en la Korekta Kolonio, kiu min ŝirme gastigis dum tiu tempo, kiam pli ardaj estis la larmoj verŝitaj de mia animo, pli doloraj la stiletoj pikintaj mian ŝanceliĝeman koron, pli akraj kaj senkuraĝigaj la elreviĝoj, kiuj surprizis mian Spiriton trans tombo elfosita de tia freneza ago, kiel la memmortigo! Sed se mi ion lernis pri tio, kion mi ne sciis kaj ja tre bezonis por rehonorindiĝi, mi tamen ankaŭ tre suferis kaj ploris, klinita super la perspektivo de la respondeco pri miaj agoj! Eĉ ĝuante la konsolan kunvivadon kun tiom da sindonaj amikoj, tiom da mentoroj

zorgemaj pri la progreso de siaj zorgatoj, mi tamen verŝadis korŝiregan ploron, dum ofte la senkuraĝeco, tiu malbeninda, opresa hidro, provis haltigi miajn klopodojn plenumi la planon, kiun mi mem starigis al mi.

Sed mi lernis respekti la ideon pri Dio, kio ja estis al mi potenca ŝildo, min helpanta en la batalo kontraŭ mi mem. Mi lernis preĝi kaj tiel konversacii kun la Amata Majstro sur la lumaj kaj konsolaj flugiloj de la vera kaj pura preĝalvoko. Mi multe laboris, ĉiutage klopodante, dum kvardek jaroj, helpe de la superbelaj lecionoj de virtaj kaj saĝaj majstroj, por ke el la nekonataj profundaĵoj de mia esto la bela figuro de la Humileco aperu kaj kontraŭbatalu la figuron pereigan kaj malican de la Orgojlo, kiu dum tiom da jarcentoj tenadas min en la dornejoj de la malbono, rampanta en la malsuperaj sferoj de la besteco! Sub la karitata influo de la legianoj de Maria, mi ankaŭ komencis legi la unuajn literojn de la dia alfabeto de Amo. Kun tiuj legianoj mi kunlaboris en la servoj de helpo kaj prizorgado al la proksimulo, dediĉante min al la suferantoj en tia grado, pri kia mi neniam kredis, ke mi ĝin atingos! Gvidate de tiuj noblaj estuloj, mi batalis por la bono, aktivis tiel en la spiritaj laborkampoj alireblaj por mia tre humila kapableco, kiel ankaŭ en la materiaj sferoj, kie al mi estis eble kunhelpi por ke la trankvilo denove lumu en multaj patrinaj koroj, por ke sur multe da infanaj vizaĝetoj, belaj kaj ĉarmaj, denove aperu la rideto post tagoj kaj noktoj da angora atendado, dum kiuj ili paliĝadis pro febro aŭ tusado kaj bronkito. Eĉ en la koro de gejunuloj, senesperaj pro la malamika realo, mi povis lumigi la benatan lampon de la Espero, kiu hodiaŭ gvidas miajn paŝojn, ilin deturnante de la perfida kaj danĝera vojo de l' senkuraĝeco, kiu ilin pelus en tiujn samajn, al mi konatajn abismojn! Mi do brave laboris, dum kvardek jaroj, ĉe miaj tre amataj Gardistoj! Mi servadis ne nur al Bono, ekzerciĝante pri la fratama konduto, sed ankaŭ al Belo, lernante ĉe eminentaj artistoj kaj virtuozoj honori la Veron kaj respekti la Leĝon, oferante al la Arto tion,

kion plej bonan kaj noblan mi povis ĉerpi en la sinceraj profundoj de mia animo.

Malgraŭ ĉio, mi neniam sentis min trankvila kaj kontenta pri mi mem! En mia esto ekzistas malpleno, kiu malaperos nur post mia renaskiĝo en la karno, nur post kiam mi atestos antaŭ mi mem, ke mi tute plenumis la devon, ne komplete faritan dum mia lasta surtera migrado, kiun la memmortigo mallongigis! La dolora rememoro pri tiu Hiacinto de Ornelas y Ruiz, kiun mi malfeliĉigis, pro envio kaj ĵaluzo, per senrimeda blindeco, restas neforviŝebla, sin trudante al la sentemaj fibroj de mia esto kiel tragika stigmato de nekonsolebla Rimorso kaj tiel postulante de mia destino egalan punon, tio estas – la blindecon, ĉar tiun ekstreman elprovon fariĝi blinda mi nuligis, ĉe la unua okazo al mi donita de la Providenco, per la memmortigo, kiun mi rigardis kiel rimedon por eskapi sed kiu tamen igis min konservi tiun ŝuldon en la konscienco!

Mi jam de longe devus esti reenkarniĝinta. Kion al mi estis permesite lerni en la Akademio de la Urbo Espero, tion al mi havigis la grandanima direkcio de la Kolonio, kiu starigis nenian baron kontraŭ la longa lernado, al kiu mi strebis. Eĉ vastajn konojn pri la psika medicino mi akiris ĉe la majstroj dum la lecionoj pri Scienco kaj plenumado de taskoj en la malsanulejoj de la Hospitalo Maria el Nazareto, kie mi servadas de antaŭ dek du jaroj anstataŭe al Joel, kiu foriris por novaj surteraj spertoj submetiĝonte al elprovado, kiun, kiel sinmortiginto, li ŝuldas al la Leĝo. Tia kapableco donos al mi la eblon iam fariĝi "sanigiva mediumo", kiam mi denove loĝos sur la krusto de la planedo, kie troviĝas tiom multaj kaj tre gravaj formoj de sufero, skurĝantaj la homaron kulpan pri konstanta pekado!

Sed mankis al mi la frata idiomo de la estonteco, tiu netaksebla trezoro de la homaro, kiu ĉi tiun envolvos en brakumo unuigonta rasojn kaj popolojn, kiuj interfratiĝos por la konkero de la sama idelao: – la progreso, la harmonio, la civilizacio lumigita de Amo! Ĝia lernado, kiel cetere ĉiuj aliaj plenumotaj

taskoj, estis nedeviga, sed la inicitoj ĝin aparte rekomendis al ni, reliefigante ĝian trean gravecon, ĉar tiu idiomo, kies simbola nomo estas la sama kiel tiu de nia Universitata Urbo, nome, Espero – (Esperanto) –, solvos eĉ transtombajn problemojn, permesante al la superaj Spiritoj efike kaj brile komunikiĝi pere de literaturaj kaj sciencaj verkoj, kiujn la surtera mondo emas ricevi el la nevideblo en la estonteco – helpe de mediumoj, ankaŭ akirintaj tian kapablon kun la celo bone servi al la imperativoj de la misio, kiun, en la nomo de la Kristo kaj pro amo al la Vero kaj al la elaĉeto de la homaro, ili devos plenumi.

Nu, treege konvenis al miaj personaj ĝeneralaj interesoj kaj aparte al tiuj spiritaj la akiro, en la nevidebla mondo, de tiu nova kono, nome la idiomo "Esperanto". Reenkarniĝinte, kaj ĝin portante gravurita en la lumaj fibroj de mia perispirita cerbo, mi oportunokaze ricevos la intuicion relerni ĝin ĉe la surteraj majstroj. Oni cetere sciigis al mi, ke mi estos mediumo en la proksima ekzistado kaj devos, dum tiu nova enkarniĝo, labori por la disvastigo de la ĉielaj veraĵoj inter la homaro, malgraŭ la fantomo de blindeco min atendanta sur la vojoj de la estonteco. Mi profunde meditis tiel pri la utilo, kiun la konado de ia universala idiomo portos al la homoj kaj al la Spiritoj, kiel ankaŭ pri tio, kiom multe mi mem, kiel mediumo, povos produkti favore al la idealo de Frateco – la sama idealo de la Kristo –, se mia intelekto ekposedos tian trezoron! Kaj ricevinte permeson por fari ankoraŭ tiun kurson, mi matrikuliĝis en la koncerna Akademio kaj fervore min dediĉis al la nobla lernado.

Tiu Akademio prezentis ne nur unu plian konstruaĵon starantan en la longa Akademia Avenuo, kie majestaj palacoj viciĝas, imponante kiel majstraj kreaĵoj de pura arto; ĝi ja estis juvelujo, kies arkitektura beleco instigas pensulon al revado kaj raviĝo! Ĝi ankaŭ estis, kiel la ceteraj konstruaĵoj, ia templo, en kies majesta interno, sub la plej altaj inspiroj de la Espero, ministroj de l' Bono, senlace aktivantaj por la feliĉo kaj progreso de la homaro, ĉiam fervore omaĝas la Universalan Fratecon.

Situanta ĉe unu fino de la ĉefa arterio de la nobla kaj gracia Transmonda urbo, la Akademio staris sur altaĵeto ĉirkaŭita de ĝardenoj, kies riĉaj bedoj multoble vidiĝis en delikatnuancaj koloroj, elspirante parfumoferojn al la freŝa aero, kiu saturiĝis per agrablaj, puraj esencoj. Florplenaj boskoj, fantazie mikskoloritaj per kvazaŭ diafanaj verdflavaj tonoj, jen sveltaj, kun gajaspektaj branĉaroj, jen frondoriĉaj, ornamitaj per ridantaj girlandoj, kie dolĉaj ventetoj ĉantis kortuŝajn plendojn, vicigis la aleojn kaj malgrandajn placojn de la ĝardeno, havigante al tiu ĉarma loko la grandiozan idealecon de la medioj kreitaj sub la brila inspiro el plej altaj sferoj.

Ne sen ia sento de neordinara emocio, kiu vibrigis la plej subtilajn fibrojn de mia Spirito, mi malrapide supreniris la ŝtuparojn kondukantajn al la ĉefa aleo, akompanate, en tiu unua fojo, de Petro kaj Salustio, kiuj, reprezentante la direkcion de la universitata movado de la urbo, funkciis kvazaŭ lernejaj inspektoroj.

Malproksime, la konstruaĵo dolĉe brilis kvazaŭ strukturita per la smeraldaj tonoj de ia delikata esenco de la Astralo. Ŝajnis, kvazaŭ la rebriloj de la Reĝa Astro, kiu tre delikate enŝoviĝis en la horizonton de nia urbo kaj milde glitis laŭ la zimborioj kaj la puntaj, graciaj kornicoj, ĝin envolvus en ĉiutagajn benojn, varmigante, per kisoj de frata instigado, la genian ideon, kiun en ĝia interno kulturadis ia plejado da kleraj estuloj, fervore strebantaj al la progresigo de la homaro, al efektivigo de transcendaj entreprenoj tiel en la surteraj, kiel ankaŭ en la transmondaj socioj. Sed tiu konstruaĵo estis la sola brilanta per smeraldaj kaj flavaj tonoj, diference de siaj samspecaj najbaroj, kiuj lumis je bluaj kaj blankaj nuancoj. Ĝiaj linioj ne respegulis la klasikan hindan stilon, sed prefere sekvis la gotikan kaj eĉ similis iujn famkonatajn konstruaĵojn en Eŭropo, kiel la Kolonja Katedralo, per siaj dividaĵoj kaj entajloj ĉizitaj kvazaŭ filigranaj juveloj, per siaj turoj gracie montrantaj al la supro meze en flamaj brilegoj, kiuj ŝajnis ondoj transsendantaj senĉesajn

inspirojn al la ekstero. La interno ne desapontis, ĉar ĝi prezentis tion, kion plej belan kaj grandiozan mi povis ĝuvidi en la Urbo Espero. Pro tio, ke ĝi similis al ia katedralo, kun surprizaj lumefektoj kaj ia trajto de la plej rafinita fluideca arto, kian mi kapablus koncepti, oni tuj komprenis, ke ĝiaj konstruintoj ne estas orientanoj kaj des malpli inicitoj; ke ili ne apartenas al la legio sub kies zorgo ni reedukiĝis; ke temas, pli ĝuste, pri transplantita aktiveco de aliaj legioj, ia kvazaŭa speciala ambasado kun sidejo en aliaj regionoj sed plenumanta altan mision inter ni, kaj kies celo sen ia dubo ankaŭ estas altruisma.

Efektive! Demandite de mi, Petro kaj Salustio respondis, ke temas pri unu filio de la granda transmonda Esperanta Universitato, kun sidejo en pli alta sfero, kiu disradias inspiron ne nur al siaj reprezentantaj organizoj en la Nevidebla Mondo, sed ankaŭ al tiuj sur la Tero, kie jam komenciĝis rimarkinda movado pri tiu noblega idealo inter la intelektuloj kaj pensuloj de ĉiuj surteraj rasoj!

Ĝi ankaŭ ne estis, diference de la ceteraj Lernejoj en nia urbo, direktata de inicitoj pri la Sekretaj Doktrinoj. Iliaj direktoroj, tiel sur la Tero kiel ankaŭ en la Transmondo, estis neŭtralaj koncerne filozofiajn principojn kaj religiajn kredojn ĝenerale. Ili pli ĝuste estis eminentaj renovigantoj, idealistoj klopodantaj por plibonigi la komercajn, kulturajn kaj ceterajn sociajn rilatojn, kiuj tiom interesas la homaron. Tie ni rimarkis la distingiĝajn figurojn de grandaj pasintatempaj reformatoroj, donantaj sian altvaloran kunlaboradon por la bela idealo. El ili, kelkaj vivis sur al Tero aŭreolitaj de sendubaj virtoj kaj enskribis siajn nomojn en la Historio kiel martiroj de la Progreso, ĉar ili noble kaj heroe klopodis, en pluraj surteraj ekzistadoj, por la plibonigo de la homa vivo kaj por la interfratiĝo de la socioj. Surprizita, mi tie trovis brilan plejadon da intelektuloj de la tuta Eŭropo, aliĝintaj al tiu movado, el kiuj distingiĝis la granda Viktoro Hugo, se mencii nur unu reprezentanton de la franca lando, ĉiam ankoraŭ genia kaj diligenta, uzanta siajn ampleksajn energiojn por la

disvastigo de tia netaksebla trezoro ĉe la homaro. Ĝuste tial, preninte lokon en la vasta salono por la unuaj lecionoj, mi sentis min forte altirita de tiu nova kaj admirinda legio da servantoj de la Lumo.

Jam en la lernoĉambro, kie dolĉe smeraldaj nuancoj kombiniĝis kun la oraj filigranoj de la fluideca, subtila arkitekturo, al ĝi havigante sugestoplenan ĉarmon, mi ne povis deteni min de la surprizo konstati, ke, koncerne la lernantaron, la virinoj nombre superas la virojn. Kaj dum la tuta daŭro de tiu interesa kurso, mi povis rimarki, kiel fervore la virinoj, miaj ĝentilaj kunlernantinoj, sin dediĉis al tiu grava akiro, nome konservi en la faldoj de la perispirita cerbo la spiritajn elementojn de idiomo, kiu, dum la enkarna ekzistado, servos al ili, en la estonteco, kiel konsola balzamo, bonfara kampo de laborado, kiu pli vastajn horizontojn malfermos tiel al ilia menso kiel ankaŭ al ilia koro, havigante al ili ankoraŭ pli riĉajn rimedojn por mildigi krizajn situaciojn, formovi obstaklojn, solvi problemojn, kiujn ili eble renkontos sur la vojo de la estontaj neeviteblaj riparoj kaj elprovoj! Kaj kiom da puregaj kaj dolĉaj inklinoj estiĝis dum tiu supre dirita lernado?!... Ĉe la karesa kunvivado kun miaj esperantistaj samidealanoj, al kies vibroj, ĝemelaj de l' miaj, mi ekde la unuaj tagoj agordis la kordojn de mia esto, mia animo pleniĝis per neesprimebla ĝojo, mia koro larĝe malfermiĝis por enlasi la plej vivan kaj konsolan Esperon pri pli feliĉaj tagoj por la estontaj surteraj socioj, en kies sino ni ankoraŭ multfoje renaskiĝos survoje al la supraj regionoj de l' Progreso!

Kiel ĉe la krusoj de la iamaj majstroj, Hanibalo kaj Epaminondo, en la unua lernotago en la Akademio de Esperanto estis majstra prezentado de sinsekvaj surteraj civilizacioj. Iliaj malfacilaĵoj, el kiuj granda parto restas ĝis nun nesolvita, kaj multaj el iliaj plej gravaj problemoj estis analizitaj antaŭ niaj atentaj okuloj per bildoj klarigaj kaj sinsekvaj, kiel ĉe kinematografo, kiuj montris la homaron baraktanta kontraŭ la ondoj, ĝis hodiaŭ ne kontraŭstareblaj, de multoblaj idiomoj kaj

dialektoj. Kaj tiuj malfacilaĵoj estis tie rigardataj kiel unu el la plagoj malfeliĉigantaj la turmentatan homaron, ja embarasantaj ĝian spiritan estontecon, ĉar eĉ en la Nevidebla Mondo oni batalas kontraŭ malhelpoj kaŭzataj de la lingvodiverseco en la transiraj aŭ malsuperaj regionoj, kie svarmas la malpli evoluinta, aŭ ankoraŭ tre materieca, spirita elemento. Detaloj, disvolviĝoj, surprizaj sekvoj eĉ en la hejmo, senkuraĝigaj baroj kontraŭ la plivastiĝado de la rilatoj, kaj eĉ de la amo, inter la nacioj, la popoloj kaj la individuoj – ĉio estis majstre ekzamenita ekde la unue aperintaj civilizacioj sur la planedo ĝis la 20a jarcento, kiun mi ne atingis en la materia sfero. Kaj poste, la simpligo de tiuj situacioj, la forigo de tiuj malfacilaĵoj, la aŭroro de senbara progreso ankaŭ bazita sur la klareco de unu idiomo, kiu, same kiel la Frateco kaj la Amo, fariĝos universala posedaĵo kuniganta ideojn, mensojn, korojn kaj klopodojn en unu solan ĝeneralan movadon, por glora konkero: – la ĝenerala disvastiĝo de la kulturo, la unuiĝo de la popoloj por la triumfo de la komuneco de celoj, por la feliĉo de l' homoj!

Ni ekliterumis la vortojn, kiujn oni al ni gracie kaj artisme prezentis per vivaj, inteligentaj bildoj. Ĉi tiuj montriĝis en mirindaj sinsekvoj da legaĵoj, liverante al ni tion necesan por ekposedo de la sekretoj, kiuj iam ebligos al ni eĉ flue paroladi antaŭ distingindaj kunvenantaroj. Temis ja pri albumoj, aŭ inteligentaj, moviĝemaj libroj kvazaŭ animitaj de ia stranga fluidaĵo, al ni instruantaj la konversacion, la skribon, fine la tutan brilan esprimpovon de idiomo, kies iompostioma registriĝo en nia intelekto estigos en ni, dum la nova enkarna vivo, la eksplodon de brilaj intuicioj en la momento, kiam ni ekinteresiĝos pri tiu afero! Kaj el la glora supro de tiu konkero montriĝis al ni tielaj perspektivoj, ke ni sentis nin trioble ligitaj al la tuta homaro: per la amaj ligiloj de la Doktrino de l' Kristo; per la beno de Scienco lumiganta al ni la korojn; kaj per la celo, al kiu nin tiras la uzado de idiomo, kiu estonte igos nin senti, ke ni troviĝas en nia propra hejmo, tute egale ĉu ni loĝas en nia Patrolando, aŭ en aliaj

landoj sur la plej diversaj regionoj de la terglobo, aŭ eĉ en la nevidebla mondo!

Nu, la agado de la Esperantista Ambasado en nia Kolonio ne limiĝis al la instruado de lingvaj konoj ebligantaj al ni interfratiĝi kun la surteranoj, kun kiuj ni devos kunvivi sur la regionoj de la planeda krusto en proksima estonteco.

Iam kaj iam, de pli altaj sferoj malsuprenvenis interfratigaj vizitgrupoj kun la nobla celo kuraĝigi siajn samideanojn ankoraŭ enkarcerigitajn en la malbonaj sekvoj de iama krimado. Tiuj vizitoj al nia Akademio, kiuj estis veraj kongresoj, pritraktis, en brilaj kunvenoj, la interesojn de la Afero, la aktivecojn celantajn la venkon de la Idealo, la oferojn kaj luktojn de multaj anoj de la nova movado por ties disvastigo kaj progreso! Tiam ni havis la okazon taksi la kunlaboradon de tiuj eminentaj figuroj, vivintaj sur la Tero, kies nomojn la Historio enskribis en siaj analoj kaj pri kiuj ni ĉi-supre parolis. Grandnombra lernantaro aliĝinta al tiu movado kaj loĝanta en aliaj sferoj partoprenis en tiaj kongresoj, kompateme kunlaborante por la konsolado al siaj malfeliĉaj fratoj katenitaj de l' memmortigo.

En tiuj okazoj, la tagoj estis festaj en la Urbo Espero! En la belegaj ĝardenitaj placoj ĉirkaŭantaj la majestan palacon de la Esperantista Ambasado, sur tapiŝoj el satenaj gazonoj, kie gaje miksiĝis bluaj miozotoj kun neĝblankaj aŭ rozaj azaleoj, okazis la florludoj, perfektaj konkursoj pri Klasika Arto, dum kiuj la animo de la spektanto ekzaltiĝis ĝis la kulmino de gloraj emocioj, ravita antaŭ la majesto de l' Belo, kiu tiam esprimiĝis per ĉiuj delikataj kaj dolĉaj nuancoj por ni kompreneblaj! Elstariĝis la baletoj, ensemblaj aŭ solaj, surscenigitaj de junaj diligentaj esperantistinoj, kies animoj, reedukiĝintaj en la bonfara lumo de la Frateco, ne disdegnis esprimi al siaj gefratoj kaptitaj de l' peko sian ŝaton kaj konsideron, malsuprenvenante de la lumaj kaj feliĉaj sferoj, kie ili loĝis, por amika vizito, kaj tiel kvietigante iliajn turmentajn zorgojn per la balzama ĝuo de grandiozaj artaj prezentadoj!

Kaj la beleco de la spektaklo randumis la nepriskribeblon, kiam, gracie glitante sur la florplena herbejo, ŝvebante en la aero kvazaŭ multkoloraj libeloj, la ĉarmaj ensembloj moviĝis, prezentante la belegan arton de Terpsikora laŭ la tempoj kaj laŭ la karakterizaĵoj de tiuj falangoj, kiuj scipovis ĝin plej bone interpreti. Nun, jen junulinoj, iam vivintaj en Grekujo, interpretantaj la idealan belecon de la dancoj en sia malnova naskolando; poste, dancistinoj egiptaj, persaj, hebreaj, hindaj, eŭropaj, ja multenombra legio da kulturantoj de l' Belo, kiuj nin ravis per siaj gracio kaj ĉarmo. Kaj ĉiu grupo altigis ĝis la sublimo la talenton, kiu riĉigis ilian eston, dum pompaj lumefektoj inundis la scenejon kvazaŭ splendaj, impresaj artfajraĵoj malsuprenvenus de la firmamento kaj disverŝus lumbenojn sur la urbon, kiu tuta ornamiĝis per gradiĝa bunto, per belegaj, delikataj nuancoj ĉiumomente ŝanĝiĝantaj en radiojn, kiuj nepreskribeble interfrapiĝis kaj estigis artismajn kolorludojn, interkruciĝis, kunfandiĝis en ĉiam novajn kaj surprizefektajn scintilojn! Kaj tiu tuta entuziasmiga kaj neesprimebla astspektaklo, kiu per si mem estis oferaĵo al la Superega Mastro de l' Belo, kiu havis lokon sub libera ĉielo, ne en la sanktega interno de l' Temploj, estis akompanata de dolĉaj orkestraj muzikoj, kies plej delikataj sonoj, kies feblaj akordoj de grandiozaj ensembloj da harpoj kaj violonoj, similaj al birdoj rulkantantaj ĉielajn melodiojn, verŝigis el niaj ravitaj okuloj, el niaj tuŝitaj koroj, spirojn el bonfaraj emocioj, kiuj vigligis niajn Spiritojn, fortikigante niajn inklinojn al la plejbono, malfermante antaŭ nia ankoraŭ malfortika animo horizontojn neniam antaŭe viditajn de nia intelekto! Kiel ofte famaj komponistoj, iam vivintaj sur la Tero, partoprenis en tiuj karavanoj esperantistaj, kiuj vizitadis nian Kolonion, kunlaborante per siaj superbelaj inspiroj, nun multe pli riĉaj kaj noblaj, por tiuj frataj festoj aranĝitaj sub la inspiro de la Amo al la proksimulo kaj de la kulto al la Belo! Sed tiuj manifestiĝoj esprimis tiajn superecon kaj moralan grandecon, kiajn la homoj ankoraŭ tute ne povas koncepti!

Kaj la koncertaĵoj sin sekvis, unu post alia: korusaj kantoj, kiuj atingis miregindajn esprimojn; muzikaj komponaĵoj, ĉe kiuj paliĝus la plej ravaj surteraj melodioj; poeziaj ludoj per deklamado, kies grandiozo randumis la neimageblon kaj nin ĝisekstaze ravis! Kaj la elektita idiomo uzata de tiu eminenta plejado da artistoj, apartenantaj al falangoj, kiuj vivis kaj progresis sub la flago de ĉiuj regionoj, de ĉiuj Patrolandoj sur la terglobo, estis Esperanto, kiel krono al tiu iniciĝo, kiu nin reedukis sub la principoj de Moralo, Scienco kaj Amo!

Sed nur la Klasika Arto estis permesita. En nia Universitata Urbo ni neniam ĉeestis ian ajn esprimon de regiona arto. Kaj post kiam larmoj banis al ni la vizaĝon, kaj niaj animoj raviĝis antaŭ tielaj brilo kaj mirindo, jenon al ni parolis niaj bonaj gardistinoj, nin akompanante al la internulejo por la nokta ripozo:
– Ne miru, amikoj! Kion vi spektis, tio prezentas nur la komencon de la Arto en la transtomba mondo... Temas pri plej simpla esprimo de l' Belo, la sola, kiun viaj mensoj dume kapablas kompreni... En sferoj pli riĉe dotitaj ol la nia ekzistas multo, ja pli multo!... Sed la animon pekintan koncernas releviĝi el siaj faloj, revirtiĝante per rezignado, laboro, amo, por gajni la meriton transloĝiĝi en tiujn sferojn...

.......................................................................................................................

La devosento igas min serioze pripensi la neceson reveni en la surterajn regionojn por atesti pri mia deziro definitive harmonii kun tiu Scienco de l' Vero, kun kiu mi konatiĝis dum mia staĝo en ĉi tiu Kolonio. Mi devas ne plu resti en la Urbo Espero, ĉar kontraŭe mi pligrandigos miajn ŝuldojn per stagno neakordigebla kun la principaroj, kiujn mi ĵus finstudis kaj akceptis. Mi grave erarus, se mi plu prokrastus la riparon, kiun mi ŝuldas al mi mem kaj al la leĝo de la Eternulo de mi malŝatata de antaŭ multe da jarcentoj. El la malnovaj amikoj kaj kamaradoj kun mi elmigrintaj el la Sinistra Valo, kiuj de la Hospitalo enloĝiĝis en la Universitata Urbo, mi sola ankoraŭ ĉi tie restas, sen kuraĝo

por provi la proprajn fortojn en la kulpelpagaj luktoj sur la arenoj de la Tero. Belarmino de Queiroz e Souza, la nobla amiko, kies altvalora amikeco estis al mi unu el la plej karaj balzamoj dum la malfacilaj spiritaj klopodoj survoje al la rehonorindiĝo, antaŭ dek jaroj foriris por novaj elprovoj, preferinte renaskiĝi en Brazilo, kie li pli facile trovos la subtenon de la protekta Doktrino, kiun li alprenis dum la preparaj kursoj en la Akademioj. Mi klinis min, kortuŝe kaj amoplene, sur lian malgajan lulilon de malriĉa orfo, ĉar post unu jaro de sia naskiĝo li perdis la patrinon trafitan de tuberkulozo. Mi ofte flustras en liajn infanajn orelojn certigajn esprimojn pri mia porĉiama inklino, dum tiuj malgajaj horoj, kiam li, malfeliĉa infano, pripensas la dornojn, kiuj jam pikas al li la koron. Kaj mi jam multe ploris pro kompato kaj malĝojo, rigardante lian doloran infanecon: – duonparalizita brako, neevitebla heredaĵo de la sinmortigo en la 19a jarcento; gracila, malsana filo de ftizulino, kun egala sorto lin atendanta en la plenkreskula aĝo! Mi deziris foriri kun li, esti lia frato, vivi ĉe li por lin protekti kaj konsoli, kaj tiel min mem revigligi per la efiko de lia lojala amikeco. Sed al mi tio ne estis ebla! Tian mision de amo ne kapablus plenumi ia pekulo kiel mi, bezonanta samajn helpon kaj prizorgon! Diferencaj estos sur la Tero niaj destinoj kaj situacioj. Nur poste, kiam ni gajnos la venkon pro la kuraĝe elportitaj provoj, ni renkontiĝos ĉi tie, en la Kolonio mem, por rekomenci la marŝon direkte al la Plejbono. Doris Mary ankaŭ proponis sian helpon al li. Ŝi deziris lin akompani ĉe la familia rondo, ĉar ŝi amis lin per tenera sento kaj pretis sin oferi por mildigi al li la ĉagrenojn per la sindonaj zorgoj de sento inspirita de la kristana frateco. Sed oni al ŝi ne konsentis la koncernan permeson, ĉar tia abnegacio kuntrenus vicon da sinsekvaj malfeliĉoj kaj Doris ja havas meritojn, rajtojn, kompensajn kreditojn asignitajn de la Leĝo, por ĝuo en la surtera socia vivo, kaŭze de tio, ke ŝi travivis ekzistadon, dum kiu ŝi iris akran vojon de kuraĝe elportitaj suferoj kune kun brutala, nekomprenema edzo, vojon kiun la memmortigo de Joel faris

ankoraŭ pli suferiga. Nun, ŝiaj gvidantoj konsilas al ŝi ne fari novajn oferojn por sia filo ĉe ties travivotaj elprovoj, nek por Belarmino, kiu la saman doloron kaŭzis al sia maljuna, sindona patrino! Ŝi prefere prigardu la du amatojn kvazaŭ luma, protektanta anĝelo, kiu el la Transmondo verŝus sur ilian vojon inspiron kaj konsolon en la decidaj horoj!

Kiel ni diris, ne nur Belarmino, sed ankaŭ Joel malsupreniris por la riparaj provripetadoj. Ankaŭ Johano d' Azevedo kaj Amadeo Ferrari revenis antaŭ la devon retravivi la nevenkitajn provojn. Pasis jam ok jaroj, de kiam mi vidis ilin eniri la Azilon por la koncernaj preparoj. Ĉi tiu lasta, sub la premo de ĉagrenoj kaj nekonsoleblaj rimorsoj, eĉ ne finis tiun preparan, al ni ĉiuj necesan kurson. Li ĉerpis fervoran kuraĝon en la instruoj de la Dia Sendito kaj foriris denove en Brazilon, petinte pri la konsento, ke li renaskiĝu en humila, negra korpo, per kiu li atestu pri la duobla bedaŭro, kiu lin turmentas: – la hieraŭa memmortigo kaj la iama tiraneco kiel mastro de sklavoj! Kaj mi ne scias, ho Dio mia, kial mi ankoraŭ ne kuraĝis imiti ilian noblan decidon, ĉar eĉ Roberto de Canalejas ne plu apartenas al la teamo de kuracistoj-lernantoj de la Hospitala Departemento, surmetinte novajn karnajn vestojn por bela komisio sur la kampoj de la Tria Revelacio. Lian decidon ankaŭ imitis Rinjo de Kasja, la bela kaj ĉarma gardistino, kiu tiom da larmoj forviŝis el miaj dolorantaj okuloj de pentinto; Rinjo, al kiu mi inklinis per la plej dolĉa, frata amo, kiun mia koro kapablus senti! La surplanedaj luktoj de tiu admirinda amiko ne inkluzivas la edzan ligon. Fidela al la malnova amo al sia adorata edzino, li preferis servi al pli ampleksaj aferoj, sin dediĉante al agadoj por la bono de la kolektivo. Sed Rita, moralfirma karaktero, koro jam evoluinta por la altaj streboj, kaj ĝuste tial kapabla por plenumi plej gravajn virinajn misiojn, petis kaj ricevis la permeson sekvi Joelon, kun kiu ŝi edziniĝos post kiam li estos travivinta nepre necesan suferon kiel ripeton de la provoj, ĉe kiuj li iam fiaskis, kaj post lia rehonorindiĝo antaŭ la propra konscienco ŝi aperos en lia vivo

kiel radiluma, ĝojiga aŭroro! Ili sin amas, unu la duan! Tion mi frue komprenis! Kaj nun, skribante ĉi tiujn paĝojn, mi pripensas la subliman bonecon de la Sinjoro de l' Mondoj kaj Kreitaĵoj, kiu konsentas tiajn kompensojn al la animo, post kiam ĝi releviĝas el la mallumo de la peko!...[1]

Same kiel en la Spaco, Rita ankaŭ estos sur la Tero la amema kaj ĝentila gardistino, kiu en la familia rondo kolektos ĉirkaŭ si animojn ankoraŭ bezonantajn protekton, kiujn ŝi konsolos, revigligos, varmigos per la dolĉeco de sia amo, ilin samtempe kondukante, per siaj virtaj ekzemploj, sur la vojo de l' Venko!

En la vasta dormejo de l' Internula Domo de la Urbo Espero, kie mi loĝas ekde la komenco de la jaro 1910, estas nur "novuloj". Profunda malĝojo iafoje premas al mi la animon, simile al iu, kiu, vivinte multajn jardekojn sur la Tero, ne plu ĝuas la ĉeeston de la plej karaj amikoj kaj familianoj kaj kontemplas la ruinojn, kiujn la foresto de la amataj estuloj, englutitaj de l' morto, amasigas ĉirkaŭ lia maljunaĝo, loĝejo de liaj intima, glaciaj afliktoj, farante lin nekomprenebla kaj netolerebla por la junuloj, liaj kunvivantoj en la nunaj tagoj. La litojn de miaj malnovaj amikoj hodiaŭ okupas aliaj estuloj, kiuj, kvankam kun mi harmoniaj laŭ samaj idealoj kaj principoj, tamen ne estas al mi tiel kore ligitaj per tiuj ĉenoj forĝitaj en la tempo kaj en la komunaj suferoj... Tie troviĝas la fenestro kun borderita balustrado, vasta, dividita en tri arkojn de artisme

---

[1] Kiel ofte en la bolado de ŝajne senrimeda sufero, la homo malespere sinĵetas en la sinistran aventuron de memmortigo, ne konsciante, ke post nelonge li trovus la solvon por sia problemo, la kompenson, la helpon de la Providenco kaj la bezonatan konsolon! Sed al li mankis la pacienco, la necesa sereneco por pripensi kaj atendi la pliboniĝon de la situacio, kaj pro tio ia malluma abismo malfermiĝas en lia destino per jarcentoj da luktoj kaj renovigaj provoj egalaj al tiuj, ĉe kiuj li fiaskis, portante la instruon, ke al la homo utilas, dum la elprovado, la fortanimeco kaj la pacienco, tute ne la ribelo kaj la malespero, kiuj ja por nenio helpas!

rafinita ellaboro, memoriganta pri hindaj konstruaĵoj sublimigitaj de supera spirita klaso. Ĉiumatene Belarmino kliniĝis super ĝia balustrado por saluti la tagiĝon kaj komunikiĝi kun la Supro per la sankta pateno de l' Preĝo! Ĉi tie, jen la simpla tableto, ĉe kiu ŝajnas al mi ankoraŭ vidi la konsternitan, malĝoje klinitan figuron de Johano d' Azevedo, studanta la programon de tiuj elprovoj al li konvenaj sur la kampo de la karno. Malpli proksime, pitoreske dismetitaj sub la bonodoraj kurtenoj el la parkaj branĉaroj, vidiĝis la benkoj kie mi kaj miaj malfeliĉo-kunuloj distriĝis parolante pri la esperoj, estigantaj novajn energiojn en nia interno! Mi rigardadas tiujn etajn neniaĵojn kaj tuj la larmoj venas en miajn okulojn. Ja signo de l' resopiroj, kiuj, flustrante angorojn en mian animon, admonas, ke mi devas ilin senprokraste imiti serĉe de l' solvo por la ĝenaj ŝuldoj de la konscienco! Sed mi neniam restis senokupa. Mi ĉiam provas serenigi al mi la malĝojan koron per la penado, kune kun miaj karaj konsilantoj, servi al tiuj, kiuj pli suferas ol mi. Mi dividas min inter la Hospitalaj kaj diversaj aliaj taskoj por mi plenumeblaj, tiel sur la krusto de l' planedo kiel ankaŭ en la limoj de nia Kolonio, kiuj estas la solaj, en kiuj mi povas libere moviĝi, dum mi ne atestos al la Granda Leĝo, ke mi plenumis la postulatajn elprovojn! Sed nenio el ĉio ĉi povos formovi el miaj angorplenaj zorgoj la juĝon, kiun pri mi mem mi nun faras, juĝon malaltigan de iu klare konscianta, ke li ekkulpas novajn erarojn kaj tiel memvole gravigas la ŝuldojn, kiuj pezas sur li. Ŝajnas, ke mi estas nenio alia, ol senskrupula parazito, okupanta lokojn, kiuj pli ĝuste konvenas al aliaj! Kaj la ruĝo kovras al mi la vizaĝon, ĉiufoje kiam, sur la pitoreskaj aleoj de la Urbo, mi renkontas Hanibalon de Silas, Epaminondas el Vigo kaj Souria-Omaron, kiuj jam de longe sendevigis min ĉeesti iliajn lecionojn, ĝis mi povos digne praktiki la akiritajn sciojn dum la reenkarniĝo. Ili bonkore ridetas al mi, min rigardas interesoplene, sed ilia rigardo efikas kiel fajraj sagoj sondantaj en mia konscienco la kaŭzon, ke mi ankoraŭ ne kuraĝis plenumi mian devon!

Karlo de Canalejas kaj Ramiro de Guzman lastatempe multe konsiladas min. Antaŭ ol foriri por la reenkarniĝo, Roberto klopodis por la streciĝo de miaj rilatoj kun lia eksbopatro kaj amiko, al ĉi tiu rekomendante ne forgesi iam rakonti al mi la draman historion de Lejla, kies amo portis la koron de ambaŭ en la kulminon de l' doloro. Miajn servojn mi ofte plenumas sub lia gvidado, kio al mi malfermis vastan laborkampon en la surteraj regionoj, ĉar, kiel ni scias, li estras la Sekcion pri Eksteraj Rilatoj. Sub lia direktado mi ofte vizitas la iamajn amikojn, nun revenintajn en la karceron el karno. Antaŭ ĉirkaŭ du monatoj mi revenis de dekdusemajna staĝo en la brazilaj regionoj, kie min absorbe okupis eksperimentaj laboroj sur la kampo de la disvastigo de tiuj sublimaj veraĵoj, kiuj hodiaŭ edifas mian koron. La bona mentoro kondukis min por vizito al Mario Sobral, reenkarniĝinta en iu tumulta brazila grandurbo. Mi ne povis min deteni ekverŝi larmoplenan ploron ĉe la litaĉo kie ripozis la mutilita korpo de la malfeliĉa amanto kaj murdinto de la bela Eŭlina. Lia mizera loĝejo el malfortikaj pinarbaj tabuloj kun zinklada tegmento ruinigita de l' Tempo estas la esprimo de la plej abomena mizero de brazilanoj subjugitaj de fajraj, dolorplenaj kulpelpagoj ĉe la sublima penado por sia regeneriĝo. Sed tia hejmo estas la sola, kiu konvenas al la reenkarniĝo de eksa bohemiulo, vante fiera pri siaj fizikaj dotoj, kiu en la fidomoj por mondumaj senokupuloj kaj en la malhonorigaj bordeloj fordiboĉis la patran heredaĵon honeste kaj penege akiritan per la kampa laborado!

Vestita per ĉifonoj, kun nudaj piedoj kaloplenaj pro la kontakto kun la ŝtonoj kaj la polvo de la irataj vojoj; mutilita je la manoj, kun la haroj taŭze malkombitaj, kia ni lin vidis detempe de la Sinistra Valo, en la Nevidebla Mondo; kun fizionomiaj trajtoj similaj al tiuj, kiuj li havis en la Transmondo; malbonfarta kaj nervoza, portanta strangan malsanon, kiu dolortrafas al li la trakeon kaj la faringan kanalon kaj ofte kaŭzas al li turmentajn krizojn, altan febron kaj afonion; sen familio, ĉar iam en Lisbono

li insultis la familian rondon, honoran kaj amindan, en kiu li naskiĝis, kiun al li konsentis la Providenco, por ke li, sub ĝia virta influo, havigu al si bonvolan emon al honestaj faroj; malriĉa, mizera, eĉ malsata, ĉar en la pasinteco li ne estis fidela administranto de la materiaj havaĵoj al li konfiditaj de la Ĉielo kaj kiujn li male disperdis, ilin uzante por malbonmora konduto; analfabeta, ĉar kiel universitatano en Coimbra, dum la pasinta ekzistado, li por nenia nobla celo utiligis la riĉan intelektan kulturon, per kiu lin dotis la beletro, kontraŭe li volonte glitis en neproduktivecon, baraktante en brutmora konduto kaj en morala nekapableco por la edifado de si mem kaj de siaj similuloj. Kiun mi havis nun antaŭ miaj teruritaj okuloj, tiu jam ne estis tiu Mario, kies vortoriĉa, brila parolo revis la malsanulejajn kamaradojn, sed ja kompatinda almozulo peteganta la preterirantojn pri karitato! Tio estis la socia ruiniĝo reduktita ĝis la plej malalta kaj suferiga nivelo, kiun mi povis vidi, kaj ĝuste pro tio mi elrompiĝis per aflikta, kompatoplena plorado. Sed apud mi Ramiro de Guzman ridetis kortuŝita, provante min revigligi per la konsola lumo de siaj saĝaj konsideroj:

"– Vi troigas, Kamilo! Ne ruinojn ni rigardas en ĉi tiu domaĉo aŭ en ĉi tiu mutilita korpo, sed ja la penadon de Animo Senmorta por releviĝi, Animo, kiun la fajro de sincera rimorso brulskurĝis, ĝin pelante al noblaj konkeroj! Profunde pentinta la malvirtan pasintecon, kiel vi ja memoras, Mario starigis – li mem! – la programon de la kulpelpagoj, kiujn vi nun konstatas, dum la penduma memmortigo originis la nervan malsanon kaj la vibran insuficiencon de la gorĝaj organoj, ĉar lian perispiritan organismon profunde trafis la refrapoj venintaj de tiu regiono... kio ja pruvas, ke tiu bedaŭrinda, nuna situacio estas verko de lia pasinta vivo mem, tute ne ia puno, kiun verdiktus severa aŭ senkompata juĝisto strebanta al revenĝo.

Ĉu vi diras, ke vi rigardas ruinojn?... Nu bone, el ĉi tiuj ruinoj, kies vido vin afliktas, naskiĝos por via amiko Mario Sobral

la aŭroro de novaj progresoj, ĉar per tiu ĉi reboniga proceso li elpagos la malhonoran ŝuldon, kiu lin katenis al la pilorio de l' rimorso, kaj rehonorindiĝos antaŭ si mem kaj antaŭ la leĝoj, kiujn li malobeis... Krom tio, ĉu vi opinias, ke ĉi tie li estas forlasita, ekskluzive dependanta de la homa kompatemo?... Vi trompiĝas!... Ĉu li, antaŭ ĉio, ne estas zorgato de la Legio de la Servantoj de Maria?... Ĉu li ne estas matrikulita en la Hospitalo Maria el Nazareto? Memoru, ke tia enkarniĝo estas la kuracado konvena al tiaj gravaj kazoj, kiel lia, ja sublima operacio, kiu lin tre baldaŭ kondukos al la resaniĝa fazo... Ĉu do Fraton Teokrito ne gvidas liajn paŝsojn?... Ĉu gardistoj kaj flegistoj de la Hospitalo, kiel ankaŭ de la Departemento, al kiu mi apartenas, ne lin karese helpas, lin prizorgante kiel gravan malsanulon, ĉiutage enverŝante en lian animon energiojn, kuraĝon, esperon, ĉiam novajn kaj solidajn, en la sublima zorgo helpi lin formovi la pezajn montojn el maljustaĵoj, kiujn en lia destino starigis la agoj de li mem faritaj kontraŭaj al Bono?... Ĉu mi mem ne ofte vizitas lin, kiel nun, fidela al la min koncernantaj komisioj, kaj ne kondukas multfoje lian Spiriton al niaj Transmondaj urĝahelpaj postenoj, celante lian revigliĝon, renovigante fluidecajn energiojn en lia fizika-spirita envolvaĵo, por ke li elportu la doloran punon, kiun li mem difinis al si, sen troaj malfortiĝoj?... Ĉu vi cetere ne scias, ke li treniĝas kun ridetanta rezignacio, kiu grade preparas al li senduban venkon ĉe tiu neevitebla kulpelpaga fazo, kiun li nepre devas travivi?... Li mem sentas sin feliĉa, ĉar el la profundo de lia konscienco lumigas lin la esperdona certeco, ke ja en tia stato, kian vi nun vidas, li plenumas sian sanktan devon, kiel senmorta civitano de l' Universo, kies destino estos agordiĝi al la harmoniaj tonoj de la universaj leĝoj de Bono kaj Justeco!"

Mi silentis, rezignacia kaj enpensiĝa, kaj pripensis la urĝajn decidojn, kiujn mi mem devos preni. De Guzman surmetis siajn diafanajn manojn sur la ardan frunton de la iama zorgato de Teokrito, al li transigante fluidecajn medikamentojn por mildigo

de lia aflikta dispneo. Mi restis en respektema enmemiĝo, petegante la amoplenan Guberniestrinon de nia Kolonio pri ia balzamo al la mizera kunulo en miaj iamaj malfeliĉoj, kaj dume, fininte sian bonfaran agadon, la nobla amiko denove parolis, konsoleme:

"– La Providenco, kara amiko, kondukas nin al la gloro sur vojoj plenaj de fekundaj luktoj ĉe larmoj kaj elaĉetaj okazoj... Kaj dum la irado Ĝi konsentas al la pentintaj kulpuloj kompensojn, kiujn, pro la kondiĉoj truditaj de la enkarna vivo, ili ne kapablas ĝuste taksi..."

Li sin turnis al ombra angulo de la domaĉo, kiun mi preterrigardis, zorgoplena pro la vido de la reenkarniĝinta Mario, kaj montrante al iu figuro, kiu, humile kaj silente, prizorgis la malsanulon kaj samtempe flikadis ĉifonajn vestojn, demandis:

"– Ĉu vi vidas tiun kompatindan virinon?... Vi neniel povos taksi la bonegan elaĉetproceson, kiu, sub la protekto de la Plejalta Majstro, efektiviĝis en la intimo de ŝia animo, tiel pentoplena kiel tiu de Mario, meze de la dornoj de ekstrema malriĉeco, de bataloj tiel ardaj kiel digne elportataj!..."

Mi provis orientiĝi, interesita kaj kortuŝita, ĉe la elkora tono de la nobla pensulo, kiu min akompanis. Apud la enirpordo, la sola en tiu malriĉega loĝejo, serĉante iom da helo, kiu faciligus la humilan laboron, pri kiu ŝi sin okupis, vidiĝis nigrulino, purema malgraŭ la malriĉaj vestoj, ŝajne aĝanta ĉirkaŭ kvindek jarojn. Ŝia serena vizaĝo travidigis simplecon kaj humilecon. Surprizite, mi demandis la karitatan mentoron:

"– Mi ne konas ŝin... kiu ŝi estas?..."

"– Penadu vi mem, Kamilo... Penetru la vibrajn ondojn de ŝia penso, kiu disvolviĝas en la fluo de l' rememorado, kaj vidu, kio okazis antaŭ kvardek jaroj, tio estas, en la tempo, kiam Maria revenis en la karnan, surteran rondon..."

Impresita, mi obeis, dum la negrino, alproksimiĝinte al la malsanulo, karese levis al li la kapon, donis al li ian

homeopatiaĵon kaj tuj revenis al sia laboro. La ĉirkaŭa silento ekscitis la ŝprucadon de la rememoroj. Vesperiĝis, kaj la intensega sunlumo en Brazilo flamigis la okcidenton per siaj ardaj, orgajaj radioj, lumigante la firmamento per miloj da koralaj rebriloj. Interne la virino pensadis, pensadis... Ĉirkaŭ ŝia cerbo la imagoj leviĝis per kapricaj movoj kaj sinsekvoj, dum mi, terurita kaj kortuŝita, ĉion legis kaj komprenis, kvazaŭ edifa libro estus malfermita antaŭ miaj okuloj:

– Mario renaskiĝis en iu bordelo... Lia patrino, nerezignacia pri la patrineco, rimarkante, kiel kulminan malfeliĉon, lian humiligan mutilon, kaj vidante lin senforta por eligi la gajajn krietojn de ĵusnaskito, duonsufokita pro spasmaj kontrahiĝoj, kvazaŭ feraj manoj volus lin frue stangoli, forte hororis kaj, elrompiĝante per korŝirega plorado, forpuŝis la monstraĉon, kiun ŝi naskis. Ŝi estis kompatinda pekulino, al kiu la patrineco barus la ĝuadon de la libereco, kiun ŝi permesis al si. Ĉagrenita, ŝi konfidis sian mizeran idon al malriĉa tollavistino, loĝanta en la ĉirkaŭaĵoj, kiu honeste sin subigadis al la duraj laboroj truditaj de la malriĉeco, kaj al kiu ŝi promesis monatan gratifikon pro la servoj faritaj al la infaneto. La bona laboristino konsentis, celante ne nur kroman enspezon por sia monujo, sed ĉefe obeante al la karitataj impulsoj de sia noble edukita koro, ĉar malgraŭ sia obskura pozicio en la socia skalo, kaj kiel adeptino de ia doktrino, el kiu abundege fontas lumoj kaj instruoj – la Tria Revelacio –, ŝi sciis, ke la adopto de tiu estaĵeto, kiu tiele eniris en la surteran vivon, envolvita en tiel ombraj akuzoj de la pasinteco kaj tiel malgajaj perspektivoj en la nuno, certe estas plano starigita de la Supro! Ŝi do lin akceptis en sian humilan domaĉon, penante lin kiel eble ami, ĉar al ŝia pordo li frapis tuj post sia naskiĝo. Ŝi ankaŭ havis unu filinon dekjaraĝan, penseman kaj laboreman, kiu volonte kunlaboris kun la patrino en la ĉiutagaj, malfacilaj taskoj. Ankaŭ ŝi korinkliniĝis al la frateto, kiun la destino metis en ŝiajn brakojn, kaj por helpi la patrinan klopodadon ŝi pacience edukis la kompatindan malsanulon, sin dediĉante dum kvardek

jaroj al tiu nobla misio – kiel neniam ĝin farus altranga sinjorino! Kvankam ŝia patrino mortis antaŭ pli ol dek kvin jaroj kaj tre frue rompiĝis la promeso pri monata gratifiko, kiun la nerespondeca patrino de la infano faris, kiam ŝi lin forpuŝis, la fratino tamen restis en sia posteno de abnegacio, laborante por ke la malfeliĉa frato kiel eble plej malofte almozu sur la stratoj!...

Mi alproksimiĝis al la virino kaj per gesto de danko pro la multa bono, kiun ŝi faris al mia amiko, mi apogis mian dekstran manon al tiu nigra frunto, kiu al mi, en tiu momento, montriĝis kvazaŭ aŭerolita de diamantaj brilegoj:

"– Jesuo vin benu, kara fratino, pro la multa bono, farata al la kompatinda Mario, kiun mi ĉiam vidis en konstanta suferado!"– mi flustris, sentante, ke doloraj larmoj plenigas miajn kompatindajn spiritajn okulojn.

Kun grava mieno, Don Ramiro alproksimiĝis, kvazaŭ li esprimus riverencan laŭdon al la Sublima Leĝo, kies karitata splendo lumigis tiun kabanon konvenan por anima elaĉeto, kaj murmuretis, min konsterne surprizante:

"– Eble vi ankoraŭ ne divenis, kiu ĉi tie troviĝas, kaŝita en tiu nigra korpa envolvaĵo, sin dediĉante al kristanaj laboroj cele al sia propra spirita releviĝo?..."

Kaj ĉar mi lin fikse rigardis kun demanda mieno, li respondis:

"– Eŭlina!..."

.......................................................................................................................

Mi prenis la neprokrasteblan decidon: morgaŭ mi iros al la Departemento pri Reenkarniĝo, celante la Azilon, por skizi la planon de mia estonta fizika-surtera korpo kaj esplori pri la medio plej favora al mia reboniga renaskiĝo. Ĉiujn aŭtoritatojn de la Kolonio, ligitajn al mia afero, mi konsultis, kaj ĉiuj unuanime kuraĝigis min al tiu nepre necesa kaj al mi profita iniciato. Mi mem deziris difini la programon de la taskoj, min realĝustigontaj

al la leĝoj, kiujn mi malobeis per la memmortigo, ĉar mi jam estas sufiĉe klarmensa por preni sur min tiel gravan respondecon. En la aĝo de kvardek jaroj mi fariĝos blinda, ja neresanigeble blinda, kvazaŭ la malplenaj orbitoj de Hiacinto de Ornelas translokiĝus en mian vizaĝon, post trijarcenta atendado, dum kiu mia Spirito restis dolore terurita antaŭ la nekoruptebla figuro de la Justeco! Sed mi ankaŭ konsultis miajn karajn majstrojn, Hanibalo de Silas, Epaminondo el Vigo, Souria-Omar kaj Teokrito, ilin petante pri inspiro kaj helpo, kaj ĉiuj afable kontentigis mian peton, helpante min harmoniigi la ĝeneralajn liniojn de la programo kun la preskriboj de la Leĝo. Sed la koncernaj informoj estos suprensenditaj al la Templo, por ties aprobo, nur post mia transloĝiĝo en la Azilon. Tiuj miaj karaj amikoj certigis al mi, ke ili sin klinos super miaj paŝoj, gvidante min sur la vojo de l' devo, min inspirante en la decidaj horoj, kiel protektantoj komisiitaj pri mia gardo dum mia staĝo en tiu bonfara Instituto. Oni informis al mi, ke la kuracistaro de la Hospitala Departemento prizorgos la evoluon de mia estonta karna envolvaĵo, ekde la embrio en la sankta geneza juvelujo ĝis la lastaj momentoj de agonio kaj disiĝo de mia Spirito el la portaĵo, kiun mi trenos por regajni la tempon perditan pro la memmortigo! Mia liberiĝo de la fizikaj, surteraj ligiloj okazos, kiam mi aĝos sesdek jarojn. Mi sekve disponos dudek jarojn por rigardi ekskluzive en mian internon kaj tiel plenumi fruktodonan kaj gloran memedukan laboron, per kiu mi subigos la impulsojn de la orgojlo ankoraŭ ne estingita en mia esto! Ofte min ekposedas la timo pri nova falo, pri forgeso de la devoj kaj taskoj plenumotaj dum mi restos droninta en la abismo de refoja enkorpa ekzistado, forgeso ja tre ordinara ĉe Spirito provanta reboniĝi. Sed miaj instruistoj al mi sciigis, ke mi kunportos solidajn, venkigajn elementojn, akiritajn dum mia longa reeduka staĝo, kaj ke, ĝuste tial estos tre malprobable, ke mia volo dekliniĝu kaj min trenu en pli grandajn kaj gravajn ŝuldiĝojn.

En frateca migrado tra la Departementoj de la Kolonio, en la kompanio de Olivier de Guzman kaj Pastro Anselmo, komencante de la Viglado, mi adiaŭis ĉiujn miajn amikojn kaj kamaradojn. Ĉiuj unuanime promesis al mi helpon, dum tiu neevitebla ekzilo, pere de siaj preĝoj al la Sinjoro de Ĉiuj Ekzistaĵoj. Mi jam frue resopiras tiun dolĉan rifuĝejon, kiu dum tiel longa tempo min gastigis kaj en kiu tiom da altvaloraj instruoj mi akiris por denove labori en la sociaj medioj kie mi devos elmontri novajn moralajn valorojn. De antaŭ kelke da tagoj vera procesio da amikoj venas al ĉi tiu Internulejo por min viziti. Sekciestroj, flegistoj, gardistoj kaj eĉ psikokuracistoj kaj instruistoj min ĉirkaŭbrakas kaj gratulas pro mia decido, aŭgurante glorajn tagojn por mia Spirito en la klopodoj por rehonorindiĝo. Ili ankaŭ esprimas al mi plej bonkorajn kaj instigajn bondezirojn pri venko kaj akiro de meritoj. Kaj pro ĉio mi estas dankema, certa, ke en la nova elprovado, min atendanta ĉe la pitoreskaj bordoj de la malnova kaj amata Taĥo, kiun mi tre amas kaj de kiu mi ne volas disiĝi, luma legio da amikaj estuloj min akompanos kaj revigligos per sia honora inspirado. Kaj hieraŭ ili ĝuigis al mi adiaŭan feston! Konsola surprizo atendis min dum tiu kunveno, kie la frateco kaj la beleco ankoraŭfoje montris nevortigeblajn esprimojn: – pere de niaj potencaj televidiloj, mi unuafoje povis kontempli, en la pleneco de ties harmonia kaj nedifinebla beleco, la Sidejon de l' Templo! Tiel mi ĉeestis kunvenon de inicitoj, aŭskultis ilajn sublimajn paroladojn inspiritajn de la plej altaj esprimoj de Moralo, Filozofio, Scienco, Belo – unuvorte, de Vero – kiujn mi kapablus kompreni! En la sanktejo, kie ili kunvenis, troviĝis la sankta tablo por la komunikiĝo kun la Supro, ĉe kiu sidis la dek du viroj, kiuj respondecas pri la tuta Kolonio, unuiĝintaj per komuneco de celoj kaj idealoj por la solena momento de la Preĝo! Poste vidiĝis la rava panoramo de la urbo, kie mi povos denove loĝi nur post la min atendanta enkarniĝo: – ĝiaj domoj, la vastaj, florornamitaj horizontoj nuance koloritaj per delikataj tonoj de bluo, en kiujn la rebriloj

de la Reĝo-Astro transfluigas orajn scintilojn... La larmoj abunde ekfluis sur mia vizaĝo, dum mia animo, gravurante la grandiozan vidaĵon en la plej kaŝaj anguloj de la konscienco, kiel bonfaran stimulon por la akraj bataloj en la estonteco, murmuretis al si:

– Kuraĝon, pilgrimanto de la peko! Revenu al la deirpunkto, rekonstruu vian destinon kaj revirtigu vian karakteron ĉe la elaĉetaj batoj de la Eduka Doloro! Suferu kaj ploru kun rezignacio, ĉar viaj larmoj estos la benata fonto, kie sensoifiĝos via animo sopireganta la pacon! Lasu, ke viaj piedoj sangu inter la kardoj kaj dornoj de la suferoj ĉe la surteraj riparoj; ke via koro disrompiĝu en la forĝejoj de la malfeliĉo; ke viajn horojn envolvu la nigra mantelo de la elreviĝoj, kneditaj el angoroj kaj soleco! Sed estu pacienca kaj humila, memorante, ke ĉio tio estas pasema kaj aliiĝos laŭgrade kiel vi realĝustiĝos al la sanktaj leĝoj, kiujn vi malobeis... kaj lernu, unu fojon por ĉiam, ke – vi estas nemortema kaj ke neniel laŭ la danĝera misvojo de memmortigo la homo atingos la havenon de la vera feliĉo...